

Tabelo de la enhavo

Prezento

LA MISIO DE ESPERANTO

INTIME KUN EMMANUEL

UNUA PARTO

I - DU AMIKOJ

II - LA SKLAVO

III - EN LA HEJMO DE PILATO

IV - EN GALILEO

V - LA MESIO EL NAZARET

VI - LA FORRABO

VII - LA PREDIKOJ ĈE TIBERIADO

VIII - EN LA GRANDA TAGO SUR KALVARIO

IX - LA VENKINTA KALUMNIO

X - LA SAMARIA APOSTOLO

DUA PARTO

I - LA MORTO DE FLAMINIO

II - OMBROJ KAJ EDZIĜO

III - PLANOJ DE LA MALLUMO

IV - TRAGEDIOJ KAJ ESPEROJ

V - EN LA KATAKOMBOJ DE LA FIDO KAJ EN LA CIRKO DE LA MARTIRIGO

VI - UNUAJ LUMRADIOJ EN LA REGNO DE LA SINJORO

VII - RETOJ DE LA MALFELIĈO

VIII - ĈE LA DETRUADO DE JERUSALEM

IX - AMARAJ REMEMOROJ

X - DUM LA LASTAJ MINUTOJ DE POMPEJO

NOTO DE LA ELDONISTOJ

DADOS DE COPYRIGHT

Sobre a obra:

A presente obra é disponibilizada pela equipe [Le Livros](#) e seus diversos parceiros, com o objetivo de oferecer conteúdo para uso parcial em pesquisas e estudos acadêmicos, bem como o simples teste da qualidade da obra, com o fim exclusivo de compra futura.

É expressamente proibida e totalmente repudiável a venda, aluguel, ou quaisquer uso comercial do presente conteúdo

Sobre nós:

O [Le Livros](#) e seus parceiros disponibilizam conteúdo de domínio público e propriedade intelectual de forma totalmente gratuita, por acreditar que o conhecimento e a educação devem ser acessíveis e livres a toda e qualquer pessoa. Você pode encontrar mais obras em nosso site: [lelivros.love](#) ou em qualquer um dos sites parceiros apresentados [neste link](#).

"Quando o mundo estiver unido na busca do conhecimento, e não mais lutando por dinheiro e poder, então nossa sociedade poderá enfim evoluir a um novo nível."



Francisco Cândido Xavier

(Mediumo)

ANTAŬ DU MIL JAROJ...

Epizodoj de la Historio de Kristanismo dum la Jarcento I

Romano de EMMANUEL (Spirito)

El la portugala lingvo tradukis

L. C. Porto Carreiro Neto

Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio DEPARTAMENTO EDITORIAL eGRÁFICO Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040 Rio de Janeiro, RJ – BRAZIL

2a eldono (reviziita de la Tradukinto)

De la 4a ĝis la 6a ekzempler-milo

El la portugala lingvo tradukis:

L. C. PORTO CARREIRO NETO

34-AA; 000.3-O; 1/1993

Copyright 1951 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(Brazila Spiritisma Federacio)

SGAN 603 – Conjunto F – Av. L2 Norte Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de Presejo de la Eldona Fako de FEB

Rua Souza Valente, 17

20941-040 – Rio-RJ – Brasil

C.G.C. no 33.644.857/0002-84

Impreso no Brasil

PRESITA EN BRAZIL

IE. no 81.600.503

Prezento

Mi devas prezenti al la estimata leganto, ne nur la Aŭtoron de ĉi tiu bela kaj instrua verko, sed ankaŭ la mediumon.

La Aŭtoro, Emmanuel – nomo, kies skribon mi trovis bone ne ŝanĝi en Esperanto kaj kiu signifas “Dio kun ni” – estas unu el la Superaj Spiritoj, gvidantaj nian landon, Brazilon, sub la Ĝenerala Direktado de Ĥsmael. Hodiaŭ jam tre progresinte, Emmanuel antaŭ pli ol du mil jaroj okupis ja malaltan rangon en la spirita hierarkio: li estis “malsupera Spirito”, aŭ, laŭ la ordinara dirmaniero, malica homo, portanta riproĉindajn malvirtojn, kiajn bedaŭrinde posedas la plej granda parto de la homaro. Li devis do multe suferi pro sia granda neperfekto; por kompensi tiom da eraroj, li trapasis longan serion da turmentaj reenkarniĝoj, ĝis li povis forlavi de sia spirito ĉiujn makulojn, per kiuj li mem sin nigrigis.

En ĉi tiu verko li preterpase parolas pri unu el siaj ekzistadoj, antaŭinta tiun, kies okazaĵojn li nun priskribas; pro tiu antaŭa ekzistado kaj pro sia supermezura malhumileco li travivis plej dolorajn momentojn; krudeco kaj fiero devigis lin iri longan, malglatan vojon, ĝis li sukcesis altiĝi per humiliĝo. Ĉi tiu libro estas do saĝa averto, ke ni obeu la Leĝon de Amo, se ni sincere deziras ŝpari al ni multe da ĉagrenoj, pri kiuj ni solaj respondas; ĝi instruas al ni, ke fiero estas alta kaj dika muro, disiganta la homojn, kiuj tamen devas kune kaj konsente vivi; ĝi atentigas nin ankaŭ pri la bagatela valoro de la materialaj aferoj, nura polvo, kies eroj, hodiaŭ kungluitaj, morgaŭ disŝutiĝos en la aero, kiel simpla “vantaĵo de vantaĵo”.

La mediumo, Francisco Cândido Xavier (*), meritas ĉi tie apartan konsideron.

Li naskiĝis en la 2-a de Aprilo 1910, en la urbeto Pedro Leopoldo, proksima al Belo Horizonte, ĉefurbo de la ŝtato Minas Gerais, Brazilo, kaj tie li ankoraŭ loĝas. Lia familio estis tre malriĉa, kaj tial la knabeto ne trovis la kondiĉojn necesajn al ia norma instruado; eĉ vivrimedoj estis apenaŭ troveblaj. Tia malfavora situacio devigis la knabon tre frue komenci labori kaj malhelpis al li ricevi konvenan instruadon.

Havante nur sep jarojn, li jam konstatis sian mediumecon kiel “vidanto”, kaj ankoraŭ hodiaŭ li vidas la Spiritojn tiel klare, kiel la surterjan homojn; oni povus diri, ke li ne bone distingas unujn de la aliaj. En 1927 li komencis sian aktivecon en la spiritismaj medioj, en familia rondo, kie li tuj ricevis la unuajn komunikaĵojn, prozajn kaj versajn.

Ne estas mia intenco fari la biografion de tiu eksterordinara mediumo. Mi skizis la kondiĉojn, en kiuj li naskiĝis kaj estis edukata en sia infaneco nur por tio, ke oni sciu precipe lian tre malaltan instruitecon. Ĉi tiu ne transpasis la limojn de elementa lernejo, kie la knaboj kaj knabinoj lernas skribi kaj kalkuli; por pli ol tio li ne havis tempon, nek okazon. Nun li estas malaltranga ŝtatoficisto, havanta la funkcion de maŝinskribisto; kaj tamen – mireginde! – li jam skribis (ne “verkis”!) kaj ĝis hodiaŭ publikigis kvardek unu verkojn beletristikajn, historiajn, sciencajn!(**)

En Aŭgusto 1931 li komencis grandan verkon el ĉirkaŭ ducent poeziĵoj de proksimume kvindek Spiritoj, iamaj brazilanoj aŭ portugaloj; tiun libron publikigis, kiel preskaŭ ĉiujn aliajn, la Brazila Spiritisma

Federacio, en 1932. Estu reliefigite, ke F. C. Xavier ĉerpas neniom da materiala profito el la verkoj de li ricevataj; li estas ankoraŭ tiu malriĉa junulo, kiu tamen, ne edziĝinte, subtenas junajn gefratojn kaj orfajn genevojn, kaj sisteme rifuzas ĉian monsumon kontraŭ servoj, de kiuj, li diras, li estas nura peranto: la favoratoj danku Dion pro la ĉiela graco. Gajhumora, komuniĝema, afabla, babilema, amanto de senmalicaj spritaĵoj, li estas efektive unu el la plej senafektaj, humilaj kaj amindaj homoj, kiajn oni povus trovi.

Tiu “Transmonda Parnaso” skuis la literaturajn sferojn en Brazilo kaj Portugalujo: tiujn poeziaĵojn ja verkis tiuj homoj, kies nomoj estis tie subskribitaj! Mi informu, ke poeziaĵojn kaj ĉion ceteran F. C. Xavier skribas flue, sen eĉ unu sekundo da ekpenso kaj seninterrompe; laŭsajne, la Spirito alportas sian verkon jam preta, kaj la laboro limiĝas do je simpla diktado. Ordinare la mediumo skribas “nekonscie” kaj ĉiam sen ia “elvoko”. En tia maniero li ricevas ĉiajn komunikaĵojn, ĉu tiuj estas dikaj volumoj, ĉu simplaj alparoloj, konsiloj, preĝoj k.t.p., kiuj aŭ tute ne estas publikigataj – pro sia nur persona intereso – aŭ aperas kiel flugfolioj, gazetartikoloj, broŝuretoj k.s. Tiu nepublikigita parto de la komunikaĵoj jam formus multenombrajn dikajn librojn.

Ĉe tiu konstato, ke neklerulo skribas verkojn pri ĉiuj temoj – tiel facile kaj abunde; ke li skribas komunikaĵojn tute personajn de “mortintoj”, kiuj parolas al siaj surteraj karuloj pri aferoj tute nekonataj al la mediumo; ke li priskribas la “fantomon” al li aperintan ĝuste tia, kia estis la homo en sia lasta ekzistado, kaj kelkafoje malsama, ol kiel opiniis la konsultanto, kiu poste konfesas sian eraron; oni ja devas rekoni, ke “io” ekzistas ekster niaj ordinaraj sentumoj, trans la komune homaj kapabloj.

Antaŭ ĉio mi devus diri, ke ĉiuj tiuj verkoj – ĉu prozaj aŭ versaj – estas fundamente kaj esence instruaj: ilia programo estas Kristanismo laŭ ties tuta pureco, kaj do oni el ili ricevas efektivajn normojn de konduto, konsolon, paciencon, komprenemon, toleremon, fidon, esperon; oni lernas, unuvorte, vivi.

Pere de F. C. Xavier, ni povus sentime aserti, la vera Kristanismo disetendiĝis kaj ĵetis firmajn radikojn en la koron de nia tradicie katolika lando. Sed plej gravas reliefigi, ke Spiritismo ĉe ni estas kulturara, antaŭ kaj super ĉio, laŭ sia pure kristana aspekto, laŭ sia reala flanko, nome, celante la moralajn sekvojn de tiu giganta klopodado de niaj transmondaj Amikoj. Treege malofte ni kunvenas kiel malvarmaj, scivolaj eksperimentantoj, kiuj eliras el siaj kunsidoj kun dezerta koro: tiu “scienca” flanko de la superbela Doktrino nin apenaŭ altiras.

Mi aldonu, ke Esperanto jam de longe ĝuas la tutan apogon de la Brazila Spiritisma Federacio, kiu ekde 1937 havas Departementon de Esperanto, kies Direktoro estas nia tre konata samideano Iŝmael Gomes Braga. Multaj spiritistoj estas niaj samideanoj, kaj tial la du movadoj estas por ĉiam interligitaj en nia lando. La natura sekvo el tia forta ĉeno estis, ke nin favoras el la Transmondo estuloj, kiuj senĉese sendas al ni sian parolon en aŭ pri Esperanto. Unu el tiuj manifestaĵoj, kiuj klare elmontras la valoron de Esperanto en la mondo, estas la sekvanta komunikaĵo de la sama Emmanuel, ricevita de F. C. Xavier en la 19-a de Januaro 1940. Ĝi estas titolita “La Misio de Esperanto” kaj, kiel ĉiuj aliaj skribitaj de tiu mediumo, originale redaktita en la portugala lingvo; Iŝmael Gomes Braga ĝin esperantigis kaj publikigis en la verko “Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo”, kolekto da poeziaĵoj, preskaŭ ĉiuj rekte en Esperanto ricevita de la klera Prof. F. V. Lorenz.

(*) La lastan nomon legu Ŝavjer.

(**) Ĉi tion mi skribis en 1951. Poste li emeritiĝis pro nekuracebla malsano de la okuloj kaj hodiaŭ loĝas en Uberaba, en tiu sama ŝtato, kie li daŭrigis siajn mediumajn laborojn.

LA MISIO DE ESPERANTO

Dum la multnombraj aliformiĝoj de la mondo, ne malmultaj estas la centroj, kiuj sin instalas nun sur la Tero, celante starigi la estontecon de la homaro. Se ĉie ni konstatas la disfalon de la homaj konstruaĵoj, renovigante la vojon de la civilizacio, ni rigardas ankaŭ tiujn armeojn da laboristoj por la konstruaĵoj de l' estonteco, kvazaŭ konstruantoj de nova mondo, dissemitaj sur la teraj vojoj, sed klopodantaj por rektigi iliajn direktojn. Estas tiuj ja la laboristoj de la Dia progreso, firme tenantaj en la manoj la potencan pioĉon de la fido super ĉio al Tiu, Kiu estas la lumo de niaj destinoj. En la amaso de tiu preparado de renovigaj energioj celantaj la venontan jarmilon mi deziras mencii Esperanton, amike ĉirkaŭprenante nian fraton, kiu fariĝis sincera proklamanto de ĝia afero, en oboe al la Dia determinismo de la taskoj ricevitaj en la lumo de la spirita mondo.

Jesuo deklaris, ke Li ne venis sur nian planedon por detrui la Leĝon, same kiel Spiritismo en sia formo de Konsolanto ne starigis sin por elpeli la ekzistantajn religiojn. La Majstro venis por plenumi la principojn de la Leĝo tiel same kiel la konsolanta Doktrino venas por restarigi la Veron kaj reenkonduki la esperon en la korojn en tiu ĉi terura tempo por la mondo, kiam ĉiuj moralaj valoroj de la mondo estas ĝisfundamente en danĝero antaŭ la doktrinoj de la perforto, kiuj ebriigis la cerbon de la nuntempa civilizacio, kiel maldolĉa veneno pereiganta la energion de maljuniĝinta korpo. Esperanto ankaŭ ne venis, amikoj, por detrui la lingvojn uzatajn en la mondo en la interŝanĝado de la pensoj. Ĝia Misio estas la alta tasko de unuigo kaj kunfratigo, celante la universalan unuecon. Ĝia principo estas konkordo kaj ĝiaj apostoloj estas egale laborkunuloj de ĉiuj, kiuj sinoferadis por la dia idealo de la homa solidareco, ĉu en ĉi tiuj, ĉu en aliaj cirkonstancoj.

La Helpa Lingvo estas unu el la plej fortaj vokoj al frateco ankoraŭ aŭdataj sur nia planedo malriĉiĝinta je spiritaj valoroj, en la nuna momento de apartigemo, de aŭtarkio, de kolektiva egoismo, de falsita naciismo. La ekzemplo de la moderna Eŭropo donas al ni ideon pri tiu dolora situacio: ĉiuj popoloj havas entuziasmajn advokatojn, kiuj per varmegaj paroladoj pravigas tiun aŭ alian decidon de siaj registaroj. La nacioj estas grandaj tribunoj, kie ĉiu parolas pri si mem kaj humiligas la laborojn de sia frato. Oni protektas ĉiun politikan krimon, se ĝi nur estas farita interne de la landlimoj. Tamen la granda Eŭropo, tiu patrina noblega estaĵo, kiu kunlaboris por la homa perfektigo, tiu havas neniun advokaton, posedas neniun voĉon por aŭdigi la ĝemojn de sia disŝirita koro, ĉar landlimoj apartigas ĉiujn ĝiajn infanojn per dikaj muroj el sablo kaj ŝtalo, ĝin transformante en tiun dezerton malĝojigan por la koroj, kie ne ekzistas la fonto de amo por refortigi la animojn.

Ja, en la nuna tempo Esperanto estas forto promesanta unuigon kaj harmonion, ĉar ĝi faciligas la interŝanĝon de l' universalaj valoroj.

Ĉu revo? Ĉu propagando nur per parolo? Ĉu nova movado por starigi ekonomian profiton? Ĉiuj tiuj ĉi supozoj povos esti eldirataj de malatentaj spiritoj; sed nur de la malatentaj, kiuj atendas la ĝeneralan aliĝon por poste eldiri sian senĝenan elekton. Tamen tiuj, kiuj serĉas la lumon de la sincereco por ekzameni ĉiujn aferojn, tiuj scipovos trovi en la esperantista movado tiun renovigan lumon, kiu en sanktaj efektivigoj, jam nun, heligos pli malfrue la ideojn de la mondo, elstarigante la noblecon de ĝiaj principoj direktataj de tiu frateca sento, kiu venas el la Dia penso de Jesuo por ĉiuj verkoj de la homa evoluado.

Esperanto estas leciono de frateco. Ni lernu ĝin por esplori sur la Tero la penson de la suferantoj kaj laborantoj sur aliaj kampoj. En laŭvorta senco mi diras: “ni lernu ĝin”, ĉar ni ankaŭ estas viaj laborkunuloj, kiuj jam akiris la esprimon de l’ universala penso, kaj al vi deziras tiun saman spiritan bonon, por ke tiamaniere ni organizadu sur la Tero la plej efikajn movadojn por unuecigo.

Dio estas adorata de la homoj tra multnombraj lingvoj, kiuj estas la sektoj kaj religioj, ĉiuj celantaj la mirindan bonon de l’ esenca unueco. Ni kopiu tiun saĝan klopodon de la Dia naturo kaj marŝu al la sintezo de l’ esprimo, malgraŭ la diverseco de la procedoj per kiuj vi esprimas viajn pensojn. Tiu tuta penado apartenas al la justa frateco kaj nun, petegante al Jesuo, ke Li benu la laborojn kaj esperojn de nia ĉeestanta frato, sanktigante la penadon lian kaj de liaj laborkunuloj en la sama tasko, kiu estas al ili donita de la spiritaj energioj, mi lasas al vi ĉiuj mian deziron de paco, esperante por ni ĉiuj, humilaj disĉiploj de la Kristo, la refortigantan benon de Lia amo.

EMMANUEL.

Fine, ĉi tiuj konsideroj ne estus kompletaj, se mi ne esprimus mian tutkoran dankon al tiu duobla samideano, sindona amiko kaj senlaca esperantisto, Ísmael Gomes Braga, pro lia grandega, netaksebla laboro, revizii mian tradukaĵon, ĝin maŝine kopii, doni multajn klarigojn pri diversaj pecoj de la romano, pacience kunlaboradi kun la subskribinto. Tion li faris, ne nur kiel konscienca Direktoro de la Departamento de Esperanto de la B.S.F., ĵaluza pri la bona stilo de ties eldonaĵoj en Esperanto, sed ankaŭ – kaj precipe – kiel admirinda frato: tiel malproksimen iras Frateco, tiu sento, pri kiu ni tiel arde deziras, ke ĝi reale ekzistu en ĉiu koro tra la tuta mondo!

Porto Carreiro Neto (*) Rio-de-Ĵanejro, la 2-an de Aprilo 1951.

(*) Noto de la Eldonistoj en la fino de la libro.

INTIME KUN EMMANUEL

AL LA LEGANTO

Leganto: Antaŭ ol vi transpaŝos la sojlon de ĉi tiu historio, ni devas prezenti al via scivolo kelkajn alparolojn de Emmanuel, la eks-senatano Publius Lentulus, deveninta de la fieraj “gens Cornelia”; tiujn alparolojn ni private ricevis de tiu nobla Spirito en la rondo de spiritualismaj studoj en Pedro Leopoldo, ŝtato Minas Gerais (Brazilo).

Per tiuj alparoloj vi ekscios la unuajn vortojn de la Aŭtoro pri ĉi tiu verko kaj liajn plej intimajn impresojn dum la skribado, kiu daŭris de la 24-a de Oktobro 1938 ĝis la 9-a de Februaro 1939 – 109 tagojn –, laŭ la tempo, pri kiu lia medio povis disponi, kaj sen interrompo de aliaj laboroj de Emmanuel mem ĉe la suferantaj personoj, ofte petantaj lian helpon, kaj de lia klopodado por la propagando de la kristana Spiritismo en la Sudkruca Lando.

En la 7-a de Septembro 1938 li sciigis per intima nelonga komunikaĵo al siaj enkarniĝintaj amikoj:

“Se Dio permesos al ni, iam mi parolos al vi pri la fieraj patricio Publio Lentulus, por ke vi ion lernu

el la doloraj travivaĵoj de indiferenta kaj sendanka animo.

“Ni atendu la tempon oportunan kaj la permeson de Jesuo.”

Emmanuel ne forgesis sian promeson. Efektive, la 21-an de Oktobro de la sama jaro li rememorigis per nova familiara komunikaĵo:

“Se la boneco de Jesuo al ni permesos, ni post kelkaj tagoj komencos nian laboron; mi atendas, ĝis estos al ni eble skribi miajn memoráĵojn pri la tempo, kiun la Dia Majstro pasigis sur la Tero.

“Mi ne scias, ĉu tian intencon ni povos realigi tiel bone, kiel ni deziras. Antaŭ ĉio, mi volas tamen ĉi tie certigi mian fidon je la kompatemo de Nia Senlime Bona Patro.”

En la 24-a de Oktobro supre menciita la mediumo Francisco Cândido Xavier ja ricevis la unuan paĝon de ĉi tiu libro; kaj la 25-an de tiu monato Emmanuel revenis por diri:

“Kun la helpo de Jesuo ni komencas alian modestan laboron. Dio permesu, ke ni povu ĝin sukcese plenumi.

“Nun vi vidos la amplekson de miaj pasintatempaj malfortáĵoj; mi tamen sentos min vigla, aperante, kun la tuta sincereco de mia koro, antaŭ la tribunalo de viaj konsciencoj. Preĝu kun mi, petante Jesuon, ke mi povu fari ĝis la fino ĉi tiun penon, tiel, ke la tribunalo disetendiĝu trans vian medion, por ke mia konfeso estu gvidilo por ĉiuj.” ()*

() Tiu ĉi libro estas la unua verkita de Emmanuel; post ĝi li jam skribis plurajn aliajn, nome: “Post 50 jaroj”, “Sur la Vojo al la Lumo”, “La Konsolanto”, “Paŭlo kaj Stefano”, “Abnegacio”, “Vojo, Vero kaj Vivo”, “Pano Nia” k. a., ricevitajn pere de la sama mediumo F. C. Xavier. – La Trad.*

Dum la tuta psikografia laboro la Aŭtoro de ĉi tiu libro ne preterlasis okazon, por instrui al ĉiuj, lin akompanantaj, humilecon kaj fidon. En la 30-a de Decembro 1938 li diris per nova intima komunikaĵo:

“Mi dankas vin, miaj infanoj, pro la altvalora helpo, kiun vi donas al mi. Jam de la komenco mi kiom eble klopodas, por konformigi tian antikvan historion al la gusto de la esprimoj de la hodiaŭa mondo, sed, rakontante ion veran, ni estas instigataj, super ĉio, penetri en la esencon de la aferoj, de la faktoj, kaj de la instruoj.

“Por mi ĉi tiu rememorado estas tre dolĉa, sed ankaŭ tre amara: dolĉa pro la revokado, en la menson, de agrablaj faktoj, sed profunde dolora ĉe la konsiderado pri mia nesentema koro, kiu ne sciis profiti el la luma minuto, kiun antaŭ du mil jaroj sonis la horloĝo de mia vivo de Spirito.

“Jesuo permesu, ke mi povu trafi la celon de la tasko, per kiu mi mem ŝarĝis min, prezentante en ĉi tiu verko, ne ian interesan memoráĵon pri mia mizera persono, sed, sole nur, iun sperton por la homoj, nun sin donantaj al la prisemado de la kampo de Nia Dia Majstro.”

Ĉe aliaj okazoj Emmanuel instruadis al siaj enkarniĝintaj samlaboruloj la neceson de nia spirita ligiteco kun Jesuo dum la plenumado de ĉiuj taskoj. En la 4-a de Januaro 1939 li diktis, per intima komunikaĵo, la jenan preĝon, ankaŭ rilatantan al liaj rememoroj pri la fora pasinteco:

“Jesuo, Kompatema Ŝafido de Nia Ĉiugraca Patro, jam forpasis du mil jaroj, kaj mia mizera animo

ankoraŭ unu fojon travivas siajn afliktajn, malĝojajn tagojn!

“Kiom valoras du jarmiloj, Sinjoro, ĉe la horloĝo de la Eterna Tempo?”

“Mi sentas, ke via favorkoreco respondas al ni el sia nekonata profundo... La tempo estas ja la granda trezoro de la homo, kaj dudek jarcentoj, same kiel dudek ekzistadoj, eble estas dudek tagoj da provoj kaj da luktoj, per kiuj la kulpaj Spiritoj sin elacetas.

“Nur via boneco estas senlima! Nur via favorkoreco povas ampleksi ĉiujn jarcentojn kaj ĉiujn estulojn, ĉar vivas en vi la glora sintezo de la tuta surtera evoluado, dia intigilo de ĉiaj kulturoj, superbela animo de ĉiuj pensoj.

“Antaŭ miaj mizeraj okuloj bildiĝas la antikva Romo, kiu ĉeestis miajn ĉagrenojn kaj miajn dolorajn falojn... Mi sentas min ankoraŭ envolvita en la ŝlimo de miaj malnoblaĵoj, kaj mi rigardas la monumentojn starigitajn de la homa vantamo... Mi rigardas politikajn reĝimojn, variantajn pri siaj karakterizaj trajtoj de libereco kaj de perforto, homojn, kiuj tenadis aŭtoritaton kaj regadon, sinjorojn de la riĉeco kaj de la inteligento, efemerajn potencojn, kiuj daŭras nur unu forpasantan tagon!

“Mi rigardas tronojn kaj suverenojn, multekostajn mantelojn, honoratajn sur la Tero, robojn de la erarema homa justeco, parlamentojn kaj dekretojn, kiujn oni kredas nenuligeblaj! Silente, Sinjoro, vi vidis la konfuzon, kiu leviĝis inter la malkvietaj homoj, kaj, kun via senŝanĝa profunda amo, vi ĉiam savadis la kreitojn en la dolora momento de la grandaj frakaso... Vi etendis vian kompatan, senmakulan manon al la plej malaltaj kaj malfortaj popoloj; vi konfuzis la falsan sciencon de ĉiuj tempoj; vi humiligis la homojn, kiuj sin mem rigardis kiel grandajn kaj potencajn!

“Sub via kompatema rigardo la morto malfermis siajn ombrajn pordojn, la falsaj gloroj de la mondo estis disbatitaj en la kirlego de la ambicioj, kaj ĉiuj vantaĵoj estis reduktitaj al monto da cindro!

“Antaŭ mia animo montriĝas la rememoroj pri la elegantaj konstruaĵoj sur mirindaj montetoj; mi vidas la riveron Tibero, kies akvo rikoltas la forĵetaĵojn de la granda imperia Babilono; mi vidas la akveduktojn, la altvalorajn marmorĵojn, la varmbanejojn, kiuj ŝajnis nedetrueblaj... Mi ankoraŭ vidas la multmovajn stratojn, kie mizera plebo atendas la favorojn de la grandsinjoroj, la almozonatan tritikon, la pecojn da ŝtofo, kiuj ŝirmos kontraŭ la malvarmo la nudecon de la karno.

“Plenŝtopitaj estas la cirkoj... Jen la aristokrata patriciaro observas la elegantajn konkurojn sur la Marsa Stadio, kaj ĉie, de la plej malgravaj vojoj ĝis la plej luksaj palacoj, oni parolas pri Cezaro, la Respekteginda!

“En tiuj rememoroj, mi pave paŝas, Sinjoro, inter ĉifonoj kaj brilĵoj, kun mia malnobla fiero! Tra la dika vualo de mia ombro ankaŭ mi ne povus vidi vin, sidantan en la Alta Ĉielo, kie vi tenas vian tronon, trezoron de neelĉerpeblaj gracoj...

“Dum la granda Imperio disruiniĝis per maltrankviligaj luktoj, via koro estis silenta; kaj mi, kiel la ceteraj homoj, mi ne rimarkis, ke vi gardostaras!

“Vi permesis, ke la Roma Babelo tre altiĝu; sed, kiam vi vidis, ke ĉe tio la firmestareco mem de la surplaneda vivo estas kompromitita, vi diris: “Sufiĉe! la tempo jam venis por laboro sur la kampo de Vero!” Kaj la grandaj monumentoj, kune kun la statuoj de la antikvaj dioj, rulfalis de sur siaj mirindaj

piedstaloj! Ia mortoblovo trabalais la regionojn, infektitajn de la viruso de ambicio kaj de senbrida egoismo, kaj la granda metropolo de la peko senhomiĝis. Renversiĝis la grandiozaj cirkoj, turniĝis en rubojn la palacoj, nigra koloro kovris la luksajn marmorĉojn...

“Sufiĉis unu sola vorto el viaj lipoj, Sinjoro, kaj jen la grandsinjoroj revenis al la bordoj de Tibero kiel plej mizeraj sklavoj! Ni tiel disvagadis en nia nokto ĝis la tago, kiam nova lumo ŝprucis en nia konscienco. Estis necese, ke la jarcentoj forpasu, por ke ni lernu la unuajn elementojn pri via senlima scienco, tiu scienco de pardono kaj de amo!

“Kaj tie ĉi ni estas, Jesuo, por laŭdi vian grandecon! Permesu, ke ni povu ĉiumomente memori vin, vian voĉon aŭdi en ĉia okaza sono sur la vojo, por foritir nin el la dolora ombro! Etendu al ni vi-ajn manojn kaj parolu al ni ankoraŭ pri via Regno! Ni treege soifas al tiu eterna akvo de vivo, pri kiu vi figure parolis en la instruo al la Samaria virino... ()*

() Johano, 4: 5 ĝis 26. – La Trad.*

“Kiel armeo da laboristoj de via Evangelio, ni marŝas sub viaj mildaj, sanktaj ordonoj! Subtenu nin, Sinjoro; ne forprenu de sur niaj ŝultroj la luman, savantan krucon, sed helpu nin, ke ni sentu, en la ĉiutagaj laboroj, la eternan, grandegan lumon de via regno de paco, de konkordo, de saĝo, sur nia vojo de batalado, de solidareco kaj de espero!”

En la 8-a de Februaro, tago antaŭ la fino de la ricevo de ĉi tiu libro, Emmanuel dankis pro ilia kunhelpo siajn enkarniĝintajn amikojn per familiara komunikaĵo, el kiu ni elprenas kelkajn frazojn:

“Miaj amikoj, Dio vin helpu kaj rekompencu. Nia modesta verko estas baldaŭ finiĝonta. Restas skribotaj malmultaj paĝoj, kaj mi vin kore dankas.

“Denove renkontante la Spiritojn, kiuj iam estis miaj amikoj, mi sentas la koron kontenta kaj revigligita, ĉar mi konstatas la sindonon de ĉiuj al la firma penso pri la evoluado, antaŭen kaj supren; ne senmotive ni hodiaŭ laboras en la sama metiejo, kie regas klopodo kaj bonvolo.

“Jesuo certe rekompensas vin pro la amika, sincera peno, per kiu vi kompletis min; lia senlima favorkoreco benu vin: jen mia ĉiama preĝo.”

Ĉi tiuj estas kelkaj el la intimaj alparoloj de Emmanuel dum la ricevado de tiu ĉi verko. La humileco de tiu komplezema Spirito pruvas, ke ankaŭ en la nevidebla sfero ekzistas la neceso de propra penado, de pacienco kaj de fido, por ia ajn realigo.

Tiuj intimaj paroloj de la Aŭtoro estas admono, por ke ni ĉiuj sciu preĝi, labori kaj esperi al Jesuo Kristo, neniam perdante la kuraĝon dum la batalado, kiun la Dia Boneco proponas al ni por nia elaçeto, direkte al nia propra savo.

Pedro Leopoldo, la 2-an de Marto 1939.

UNUA PARTO

I - DU AMIKOJ

Jam la lasta tagheleco antaŭ la vespero banis la Roman domaron.

La akvo de la rivero Tiberio, fluanta ĉe la monteto Aventino, respegulis la lastajn rebrilojn de la krepusko; sur la mallarĝaj stratoj pasis rapidaj portoseĝoj, tenataj de muskolfortaj, facilmovaj sklavo.

Pezaj nuboj, amasiĝantaj en la atmosfero, anoncis baldaŭan pluvegon, kaj la lastaj fenestroj de la privataj kaj kolektivaj loĝejoj brue fermiĝis ĉe la blovo de la unuaj vesperaj ventoj.

El inter la elegantaj, simplastilaj konstruoj, kun altvaloraj marmorajoj, ĉe la bazo de la monteto, unu altiris al si la tenton de la fremduloj pro siaj gravaspektaj, majestaj kolonoj. Pro ĝia artisma kaj impona aspekto, ĝia eksteraĵo vidigis, ĉe la unua ekrigardo, la socian pozicion de ĝia posedanto.

Ĝi estis, efektive, la loĝejo de la senatano Publio Lentulus Cornelius, ankoraŭ juna viro, kiu, konforme al la moro, plenumis en la Senato leĝodonajn kaj juĝistajn funkciojn, laŭ la rajto, kiun li havis kiel homo deveninta de malnova familio el senatanoj kaj konsuloj de la Roma Respubliko.

La Imperio, fondita de Aŭgusto, limigis la senatan povon, kaj, vere, la senatanoj havis nenian rektan influon sur la privatajn aferojn de la imperia registaro; tamen ĝi daŭrigis plu la heredecon de la titoloj kaj de la altrangaj oficoj de la patriciaj familioj, kaj tiel ĝi starigis la plej tranĉan dividon de la klasoj, en la socia hierarkio.

Estas la sepa vespere de iu tago de Majo de la jaro 31 de nia erao. Komforte sidante sur unu el la sofoj de la triklinio (*), Publio Lentulus, kune kun sia amiko Flaminio Severus, finas la vespermanĝon, dum Livia, edzino de la senatano, donas mastrumajn ordonojn al juna etruska sklavo.

(*) Triklinio, en la latina lingvo “triclinium”: manĝoĉambro kun tri sofoj (aŭ litoj) ĉirkaŭ la tablo. – La Trad.

La gastiganto estis juna viro, laŭŝajne malpli ol tridekjara, malgraŭ la fiera, serioza mieno kaj la tuniko kun larĝa purpura borderaĵo, kiu trudis respekton al ĉiu, alproksimiĝanta al li; kontraste kun li, lia amiko, ankaŭ en vesto de senatano, vidigis grandan aĝon, kiun kronis antaŭtempa hargrizeco, signo de boneco kaj de sperto en la vivo.

Lasinte la junan sinjorinon kun la hejmaj okupoj, ambaŭ sin direktis al la peristilo, por spiri iom da oksigeno en la varma nokto, kvankam la minaca aspekto de la ĉielo antaŭsentigis baldaŭan pluvon.

– Vere, mia kara Publio – diris Flaminio maltrankvila – vi okulfrape konsumiĝas. Ĝi estas situacio, kiu postulas ian senprokrastan modifon. Ĉu vi jam konsultis ĉiujn kuracistojn por la resanigo de via filineto?

– Bedaŭrinde – amare respondis la patricio – mi jam uzis ĉiajn rimedojn laŭ nia povo. Antaŭ kelkaj tagoj mia kompatinda Livia vojaĝis kun ŝi, por distri ŝin, al nia domo en Tibur; tie ili iris al unu el la plej bonaj kuracistoj, kiu diris, ke tia malsano estas nekuracebla por la hodiaŭa scienco. La kuracisto faris ja nenian pozitivan diagnozon, certe kompatante la malsanan knabinon kaj nian gepatran malesperon; sed, laŭ nia observado, ni kredas, ke la kuracisto en Tibur suspektas, ke ĝi estas lepro.

– Trokuraĝa, absurda suspekto!

– Tamen, se, unuflanke, ni povas akcepti nenian dubon koncerne niajn praulojn, aliflanke vi scias, ke Romo svarmas per sklavoj el ĉiuj regionoj de la mondo, kaj ili estas ia instrumentoj de niaj ĉiutagaj laboroj.

– Estas vere... – konsentis Flaminio per amara tono.

Ia ombro da malgajaj perspektivoj montriĝis sur la frunto de la amikoj dum la unuaj pluvogutoj kontentigis la soifon de la floraj rozarbetoj, kiuj ornamis la graciajn helkolorajn koloniojn.

– Kaj la malgranda Plinio? – demandis Publio, kvazaŭ dezirante turni la konversacion en alia direkto.

– Tiu, kiel vi scias, estas ĉiam sana, ĝuas bonegan farton. Kalpurnia ĉiumomente turmentiĝas, penante kontentigi ĉiajn kapricojn de knabo preskaŭ dekdujara. Iafoje li obstinas kaj ribelas: li kontraŭstaras la admonojn de la maljuna Parmenido kaj faras la gimnastikajn ekzercojn nur tiam, kiam tio plaĉas al li; tamen li havas grandan preferon por la ĉevaloj. Prezentu al vi, ke, en momento de senpripensio propra al lia aĝo, trompante la viglan atenton de sia frato, li konkuris ĉe la kurado de bigoj (*), dum la ordinara ekzerco en sporta societo de la Marsa stadio, kaj atingis unu el la unuaj lokoj. Rigardante miajn du filojn, mi ĉiam pensas pri via malgranda Flavia Lentulia, ĉar vi ja konas mian intencon por la estonteco, por la streĉo de la malnovaj ligiloj inter niaj familioj.

(*) Bigo, en la latina lingvo “biga”: du- aŭ kvarrada ĉaro, tirata de du ĉevaloj kaj uzata, en la antikva Romo, por kuradoj, por la triumfoj aŭ por la transportado de ŝarĝoj. Mi proponas la vorton bigo por tiaspeca ĉaro, similan la kvadrigo, en la latina lingvo “quadriga”, samtipa ĉaro tirata de kvar ĉevaloj, laŭ la “Vortaro de Esperanto”, de Kabe. Bedaŭrinde tiu grava verko ne parolas pri ia “bigo”. – La Trad.

Publio silente aŭdis sian amikon, kvazaŭ la envio mordus lian kareseman koron de patro.

– Tamen – li rebatis –, malgraŭ niaj projektoj la aŭguristoj ne favoras niajn esperojn, ĉar vere estas, ke mia kompatinda filino, kiu ricevas nian tutan zorgadon, ŝajnas unu el tiuj estuloj, forlasite vivantaj en Velabro. (*)

(*) Antaŭurbo de la antikva Romo, situacianta sur marĉo. – La Eldonistoj.

– Ni tamen fidu al la kompatemo de la dioj...

– De la dioj? – rediris Publio kun apenaŭ kaŝita senkuraĝeco. – Pri tia subtilega rimedo mi jam de longe teksadas milojn da teorioj en la bolanta cerbo. Antaŭ kelka tempo, dum vizito al vi, mi havis la okazon pli intime koni vian maljunan Grekan eks-sklavon. Parmenido parolis al mi pri sia juneco kaj vivado en Hindujo, kaj pri la hindaj kredoj kun ĝiaj misteroj pri la animo. Ĉu vi kredas, ke ĉiu el ni povas reveni, post la morto, sur la scenejon de la vivo, en alia korpo?

– Tute ne – energie respondis Flaminio. – Malgraŭ sia alte ŝatinda karaktero, Parmenido donas tro liberan kuron al sia spirita vagado.

– Mi tamen, mia amiko, inklinas al la kredo, ke li pravas. Kiel ni povus ja klarigi la diversecon de la destinoj en ĉi tiu mondo? Kial la riĉegeco en niaj aristokrataj kvartaloj kaj la mizero sur la monteto Eskvilino? La fido je la povo de la dioj ne sukcesas klarigi tiajn turmentajn problemojn. Vidante mian malfeliĉan filineton kun disŝirita kaj putranta karno, mi sentas, ke la vero estas ĉe via sklavoj. Kion,

efektive, faris la malgranda Flavia, ankoraŭ ne sepjara, por tian punon meriti de la ĉielaj potenculoj? Kian ĝojon niaj dioj povus ĝui el la ploro de infano kaj el la doloraj larmoj, bruligantaj niajn korojn? Ĉu ne estas ja pli kompreneble kaj akceptebla, ke ni venis el malproksime kun ŝuldoj kontraŭ la ĉielaj superuloj?

Flaminio Severus skuis la kapon, kiel iu deziranta forpuŝi de si ian dubon, sed, reprenante sian kutiman aspekton, firme respondis:

– Vi agas nebone, nutrante tiajn konjektojn en via animo. Aĝante nun kvardek kvin jarojn, mi ne konas kredojn pli valorajn ol la niaj, en la kultado al la prauloj. Vi devas konsideri, ke la diverseco de la sociaj pozicioj estas problemo naskita de nia politika organizado, la sola, kiu starigis netan disigon inter la homoj, laŭ ĉies valoroj kaj penoj; koncerne la demandon pri la suferoj, ni memoru, ke la dioj povas provi niajn moralajn virtojn per la plej grandaj minacoj al niaj animaj fibroj; tio ne sekvigas nepre, ke ni devas alpreni la absurdajn principojn de la Egiptoj kaj de la Grekoj, principojn, kiuj, por diri la veron, jam reduktis ilin al nenio kaj al servuto. Ĉu vi jam faris ian oferon en la templo post tiaj afliktaj duboj?

– Mi jam faris plurajn oferojn al niaj dioj, laŭ niaj moroj – emociita respondis Publio –, kaj neniuj, pli ol mi, fieras pri la gloraj virtoj de niaj familiaj tradicioj.

Sed miaj observoj ne rilatas nur al mia filineto. De multaj tagoj turmentas min la terura engimo de iu songo.

– De iu songo? Ĉu do la fantazio povas tiel skui la energion de patricio?

Publio Lentulus ricevis demandon en profunda enpensiĝo. Liaj senmovaj okuloj estis kvazaŭ fiksitaj sur ia bildo, kiun la tempo forigis kun la fluado de la jaroj.

Nun falis kontinua pluvego, kiu, inundante la impluvion (*), enfalis en la akvujon, kiu ornamis la korton de peristilo.

(*) Impluvio, en la latina lingvo “impluvium”: korto de la antikvaj Romaj domoj, en kies centro ekzistis cisterno, por kolekti la akvon de la pluvoj. – La Trad.

La du amikoj jam komforte sidis en la interno de la domo, sur ampleksa marmora benko kovrita per orientaj ŝtofoj, kaj daŭrigis sian intiman konversacion.

– Tia estas – plu diris Publio – la evidenta realeco de iuj songoj, ke ili ja distingiĝas de la fantazio.

“Iam mi revenis hejmen el kunsido en la Senato, kie ni diskutis problemon de profunda morala delikateco, kaj jen mi sentis min kaptita de neklarigebla malvigliĝo.

“Mi iris frue en mian dormoĉambron; kaj, kiam, konsiderante la delikatajn devojn de homo, kiu havas oficon de juĝado, mi kredis, ke mi vidas apud mi la figuron de Temisa, kiun ni tenas sur la hejma altaro, mi sentis, ke ia eksterordinara forto fermas al mi la lacajn, dolorajn palpebrojn. Tiam, mi ekvidis aliajn regionojn, kie mi rekonis lokojn hejmajn al mia spirito, kiujn mi estis tute forgesinta.

“Ĉu realaĵo, ĉu songo – mi ne scias diri; mi vidis min kun la insignoj de konsulo en la Respublika epoko. Ŝajnis, ke mi revenis al la epoko de Lucio Sergio Katilino, ĉar, apud mi, mi vidis lin kaj Ciceronon, kiuj estis kvazaŭ la personiĝoj respektive de la malbono kaj de la bono. Mi sentis min katenita al la unua per

fortaj, neŝireblaj ligiloj, kvazaŭ mi vivus dum la ombra tempo de lia konspiro kontraŭ la Senato kaj kun li partoprenus en la hontinda komploto, kiu celis tiun plej intiman organizaĵon de la Respubliko. Mi apogis ĉiujn liajn krimajn intencojn, aliĝante al ĉiuj projektoj per mia administra autoritato kaj direktante sekretajn kunvenojn, kie mi dekretadis abomenajn murdojn... En palpebruma daŭro mi denove travivis tiun tutan tragedion, kaj sentis, ke miajn manojn makulas sango kaj larmoj de senkulpuloj. Terurite, mi rigardadis, kvazaŭ pretervole reveninte al malluma, dolora pasinteco, la reton da fiaĵoj dum la revolucio, feliĉe sufokita pere de la influo de Cicerono; kaj la plej terura detalo estis, ke mi ludis unu el la roloj plej gravaj kaj reliefaj en tiu malnoblaĵo... Ĉiuj tiamaj naŭzaj bildoj preterpasis antaŭ miaj teruritaj okuloj...

“Sed, kio min plej humiligis ĉe tiuj vidaĵoj de la kulpa pasinteco, kvazaŭ mia nuna persono hontus tiajn rememorojn, tio estis, ke mi uzis mian aŭtoritaton kaj povon por, profitante de la situacio, plenumi la plej akrajn venĝojn kontraŭ miaj personaj malamikoj, donante ordonojn por ilia aresto ĉe la plej teruraj akuzoj. Al mia ŝtona koro ne sufiĉis la enŝlosado de la kontraŭuloj en haladzajn karcerojn, kio kaŭzis la disŝiron de la plej karaj kaj dolĉaj korligiloj for de la familio: mi donis ordonojn ankaŭ por la ekzekutado de multaj en la nokta mallumo, kaj al multaj politikaj opoziciantoj mi eltirigis la okulojn antaŭ mi, kiu plezuris ĉe iliaj turmentoj, kun la besta glacieco de la kruelaj venĝoj! Ve al mi, kiu dissemis elruiniĝon kaj malfeliĉon en tiom da animoj, ĉar unu tagon la subpremitoj decidis mortigi la kruelan turmentanton!

“Post la tuta serio da skandaloj, kiuj alportis al mi la perdon de la konsuleco, mi sentis la finon de miaj malnoblaj, abomenaj agoj antaŭ la senkonsienca kaj furioza popolamaso, kiu kondamnis min al la terura sufokturmento, kaj tiam mi spertis la suferojn kaj angorojn de la morto...

“Sed plej kurioze estas, ke mi revidis la nepriskribeblan momenton, kiam mi trapasis la nigran akvon de Akerono, laŭŝajne malsuprenirinte al la ombraj lokoj de Averno, kien ne penetras la lumo de la dioj. La granda amaso da viktimoj tiam alproksimiĝis al mia afliktita, suferanta animo, kaj postulis justecon kaj kompenson, eksplodante per krioj kaj ĝemoj, kiuj eĥis en la profundo de mia koro.

“Kiel longe mi tiel restadis, prenita de tiu nedifinebla martireco? Mi ne sicas diri. Mi memoras nur, ke mi vidis la ĉielan figuron de Livia, kiu, meze en tiu tumulto de teruraĵoj, etendis al mi siajn lumajn, karesajn manojn.

“Ŝajnis al mi, ke mia edzino estis al mi intime konata jam de tre malproksimaj tempoj, ĉar mi eĉ unu momenton ne hezitis ekpreni ŝiajn mildajn manojn; tiam, mi estis de ŝi kondukita al tribunalo, kie sidis strangaj, gravaspektaj figuroj. Respektindaj blankaj haroj kronis la serenan mienon de tiuj ĉielaj juĝistoj, senditaj de la dioj por la juĝado de la teranoj. Ia stranga subtileco karakterizis la atmosferon, kiu estis plena de dolĉa lumo, kiu faris travideblaj por ĉiuj ĉeestantoj miajn plej sekretajn pensojn.

“Livia certe estis mia gardanĝelo ĉe tiu kolekto da nekorupteblaj juĝistoj, ĉar ŝia dekstra mano kuŝis super mia kapo, kvazaŭ admonante min al rezignacio kaj sereneco, por ke mi aŭdu la superan verdikton.

“Mi ne bezonas diri al vi, kiel mi ekmiris kaj timis antaŭ tiu tribunalo, kiun mi ne konis; kaj jen, la juĝisto, kiu ŝajnis al mi la ĉefa aŭtoritatulo, sin turnis al mi per jenaj vortoj:

– Publio Lentulus: la justeco de la dioj, laŭ sia favorkoreco, decidis vian reiron al la kirlego de la surteraj luktoj, por ke vi forlavu la makulojn de viaj kulpoj en la elaĉetantaj larmoj. Vi vivos en epoko de mirinda spirita brilo, baraktante kontraŭ ĉiaj provoj kaj malfacilaĵoj, malgraŭ la ora lulilo, kiu akceptos vin, por ke vian nigrigitan konsciencon edifu la doloroj, kiuj purigas kaj revirtigas! Feliĉa vi estos, se vi scios bone profiti la benindan okazon por via revirtiĝo per abnegacio kaj humileco... Ni decidis, ke vi

estos potenca kaj riĉa, por ke via seninteresiĝo pri la homaj vojoj estu pli bone uzata de viaj spiritaj mentoroj en la oportuna momento. Vi havos inteligentecon kaj sanon, riĉecon kaj aŭtoritaton, kiel rimedojn por la plena rebonigo de via animo; sed venos momento, kiam vi sentos malŝaton kontraŭ ĉiuj riĉaĵoj kaj sociaj valoroj, se vi scios prepari la koron por la nova vojo de amo kaj humileco, de toleremo kaj pardono, kiu, post ne multaj jaroj, malfermiĝos sur la ombra supraĵo de la Tero. La vivo estas reto da cirkonstancoj, kiujn ĉiu spirito devas interplekti por la bono, en la meĥanismo de sia destino. Profitu do tiujn rimedojn, kiujn la favorkoreco de la dioj metas en la servon de via revirtiĝo. Ne malŝatu la alvokon de la vero, kiam sonos la horo de la atesto kaj de la sanktigaj abnegacioj... Livia sekvos kun vi la doloran vojon de la perfektigiĝado, kaj ŝi estos por vi la amika, protekta brako dum la tagoj de akraj kaj amaraj provoj. La esenca afero estas via animfirmeco sur la malglata vojo: ĝi purigos vian fidon kaj viajn farojn, en la rebonigado de nigra, krima pasinteco!

Ĉe tiuj lastaj vortoj, la fiera voĉo de la patricio fariĝis iom post iom sufokita kaj dolora. Profundaj amaraj emocioj retenigis en lia koro, turmentata de neforigebla senkuraĝeco.

Flaminio Severus aŭdadis lin interese kaj atente, kaj dume serĉis la rimedon plej facilan, por forpeli de li tiajn ĉagrenajn impresojn. Li sentis sin instigata deturni la fluon de la pensoj de sia amiko, tirante ties spiriton for de tiu mondo el emocioj nekonvenaj por la intelekta strukturo de Publio, alvokante ties edukitecon kaj fieron; sed samtempe li ne sukcesis forpuŝi siajn proprajn dubojn pri tiu songo, kies klareco kaj versimileco lin ja frakasis. Li komprenis, ke li devas unue restarigi sian animan firmecon, kaj opiniis, ke la mildeco devas esti la apogo de liaj vortoj, por instruo de la amiko, kiun li konsideris pli ĝuste frato.

Apogante sian longan blankan manon al lia ŝultro, Flaminio afable demandis:

– Kaj poste, kion vi vidis?

Sentante, ke la amiko lin komprenas, Publio Lentulus ricevis novan energion kaj daŭrigis:

– Post la admonoj de tiu severa kaj respektinda juĝisto, mi ne plu vidis la figuron de Livia ĉe mi, sed nur aliajn graciajn estulojn, envolvitajn en tunikoj, kiuj ŝajnis al mi faritaj el travidebla neĝo; tiuj estuloj kuraĝigis al mi la koron per siaj afablaj ridetoj.

“Obeante al ilia amika alvoko, mi sentis, ke mia Spirito revenas al la Tero.

“Mi observis Romon, kiu jam ne estis ĝuste tia urbo, en kiu mi vivis antaŭ kelka tempo; ia blovo de plibeligo rekonstruadis ĝian malnovan parton, ĉar mi konstatis la ekzistadon de novaj cirkoj, luksegaj teatroj, elegantaj varmbanejoj kaj ĉarmaj palacoj, kiujn miaj okuloj neniam antaŭe vidis.

“Mi havis la okazon vidi mian patron inter liaj papirusoj kaj pergamenaj dokumentoj, studanta la senatajn procesojn, ĝuste tiel, kiel hodiaŭ okazas inter ni, kaj, petinte la benon de la dioj, ĉe la altaro de nia hejmo, mi spertis ian prematecon en la fundo de la animo. Ŝajnis al mi, ke atakis min dolora cerba afekcio, kaj kelkatempe mi dormetis, prenite de nedifinebla sveno.

“Mi ne povas precize vortigi tion, kio okazis; mi vekigis konsumata de alta febro, kvazaŭ tiu disvagado de mia penso tra la regionoj de Morfeo havigis al la korpo ian senton de laceco.

“Mi ne sicas vian opinion pri ĉi tiu malgaja korprema konfidenco, sed mi dezirus, ke vi iel klarigu al mi

la aferon.”

– Ĉu klarigi al vi? – modeste respondis Flaminio, penante doni al la voĉo tonon de energia konvinkiteco.
– Vi ja konas la respekton, kiun mi havas por la aŭguristoj; kio okazis al vi, tio estis, efektive, nenio pli ol songo, kaj vi ja scias, ke ni, kiel praktikaj homoj, devas eviti ĉian fantazion en nia maniero juĝi la aferojn. Pro tio, ke ili tro multe revadis, la kleraj Atenanoj fariĝis mizeraj sklavoj; estas nia devo rekoni la bonecon de la dioj, kiuj konsentis al ni la senton de la realo, necesan al niaj konkeroj kaj venkoj. Ĉu estus pravigeble, se vi rezignus la amon al vi mem kaj al la socia pozicio de via familio, por ia nura imagaĵo?

Publio lasis, ke lia amiko abunde parolu pri la afero, kaj en la koron rikoltis liajn admonojn kaj konsilojn; sed poste, prenante liajn amikajn manojn, la senatano ekkriis kortuŝita:

– Mia amiko, mi ne indus la helpon de la dioj, se mi lasus min peli laŭ la kaprico de la okazaĵoj. Ia simpla songo ne estigus en mi motivon por tiaj doloraj konjektoj, sed vere mi ankoraŭ ne diris al vi ĉion.

Flaminio Severus kuntiris la brovojn kaj demandis:

– Ĉu vi ankoraŭ ne diris tion? Kion signifas tiaj asertoj?

En lia nobla animo, aflikta dubo estis jam enradikiĝinta ĉe la detala priskribado de tiu impresa, dolora songo, kaj nur tre pene lia frata koro penis kaŝi antaŭ la amiko la ŝirantajn emociojn, kiuj ĝin profunde turmentadis.

Publio silente prenis lin sub la brako kaj kondukis lin al la galerioj de la portretoj, en unu el la anguloj de la peristilo, proksime de la hejma altaro, kie prezidis la kulton al la dioj la korligiloj plej puraj kaj sanktaj de la familio.

La amikoj penetris en la skriboĉambron kaj en la arkivon kun profunda montrado de respekta enpeniĝo.

En unu el la anguloj orde kuŝis multenombraj pergamenaj kaj papirusaj dokumentoj, kaj en la galerioj estis vidataj vaksaj portretoj de prauloj de la familio.

Al Publio Lentulus estis malsekaj la okuloj kaj tremanta la voĉo, kvazaŭ profundaj emocioj lin tiam regis. Alproksimiĝinte al unu el la multenombraj vaksaj figuroj, tie starantaj en vicoj, li atentigis Flaminion pri ĝi per simpla demando:

– Ĉu vi rekonas ĉi tiun?

– Jes – respondis lia amiko, ekstremante –, mi rekonas ĉi tiun skulptaĵon. Ĝi estas figuro de Publio Lentulus Sura, patro de via avo, ekzekutita per gorĝpremo antaŭ preskaŭ unu jarcento, dum la revolucio ĉefita de Katilino.

– Antaŭ ĝuste naŭdek kvar jaroj la patro de mia avo estis mortigita ĉe tiuj teruraj cirkonstancoj – emfaze diris Publio, kiel iu, ĉion scianta pri la okazintaĵoj. – Atentu bone la trajtojn de ĉi tiu figuro, por konstati la perfektan similecon inter mi kaj tiu parenco, antaŭ longe vivinta. Ĉu ne kuŝus tie ĉi la ŝlosilo de mia dolora songo?

La patricio rimarkis la frapan identecon de trajtoj de tiu senviva figuro kun la mieno de lia ĉeestanta amiko. Lia konfuziteco atingis sian apogeon ĉe tiuj miregigaj pruvoj. Li estis klarigonta la aferon per la

grava konsidero pri la genealogio kaj heredeco, sed lia dialoganto, kvazaŭ divenante la plej malgrandajn detalojn de liaj duboj, antaŭigis al lia opinio:

– Ankaŭ mi spertis ĉiujn ŝanceliĝojn, kiuj turmentas vian menson; ankaŭ mi luktis kontraŭ la prudento, antaŭ ol konsenti la tezon de ĉi tiu nia konversacio. La simileco de mienoj, eĉ la plej ekstrema, estas natura kaj ebla; sed tio ne tute kontentigas min. Antaŭ kelkaj tagoj mi sendis unu el niaj hejmaj servistoj al Taormina, proksime al kiu ni havas malnovan domon, kie estis konservata la arkivo de tiu mortinta parenco; tiun arkivon mi transportigis ĉi tien.

Kaj, kvazaŭ li estus certa pri ĉiuj siaj konjektoj, li turnis kaj returnis per nervaj manoj plurajn dokumentojn, ekkriante:

– Vidu ĉi tiujn papirusojn! Ili estas notoj de mia praavo pri liaj projektoj kiel konsulo. En ĉi tiu amaso da dokumentoj mi trovis plurajn malnetojn de verdiktoj je morto, kiujn mi estis jam rimarkinta dum mia vagado tra la neklarigebla songo... Komparu ĉi tiun skribon! Ĉu ĝi ne similas la mian? Kion ankoraŭ ni dezirus, krom ĉi tiuj kaligrafiaj pruvoj? Jam de multaj tagoj mi travivas ĉi tiun malluman dilemon en la interno de la koro... Ĉu eble mi estas Publio Lentulus Sura reenkariniĝinta?

Flaminio Severus lasis la frunton antaŭen kliniĝi, kun nekaŝebla maltrankvileco kaj nepriskribebla amareco.

Multaj estis la pruvoj pri la klareco kaj la logikeco de argumentado de lia amiko. Ĉio konspiris, por ke lia kastelo el klarigoj tondre disfelu ĉe la realaj faktoj; li tamen, pretiĝante por serĉi aliajn fortojn, kiuj gardus la komunan heredaĵon el kredoj kaj tradicioj, transdonitaj de iliaj prauloj, penis revenigi al la prudento la spiriton de tiu homo, al kiu li estis ligita per tia longjara amikeco.

– Mia amiko – li murmuris, ĉirkaŭprenante Publion – mi konsentas kun vi, konsidere tiujn konsternantajn okazaĵojn. Tiu fakto estas unu el tiuj, flamigantaj la plej malvarman spiriton; ni tamen ne povas riski nian respondecon en la necerta senco de la unuaj impresoj. Se tiu pasaĵo siaflanke ŝajnas al ni reala, la neprokrasteblaj, pozitivaj realaĵoj postulas nian agadon. Kvankam mi alte estimas viajn saĝajn konsiderojn kaj ja kredas la verecon de tiu fenomeno, mi tamen opinias, ke ni ne devus enprofundiĝi en tiajn misterajn kaj transcendantajn aferojn. Mi tute ne amas tiajn esplorojn, certe pro mia sperto en la praktika vivo. Mi entute akordas kun via punkto de vidado, sed mi admonas vin ne etendi ĝin trans la rondon de nia frata intimeco, des pli, ke, malgraŭ la ĝusteco de argumentoj, per kiuj vi atestas vian mensklarecon, mi sentas, ke vi estas laca, konsumita, en tiu kirlego da laboroj en la hejma kaj socia medioj!

Li iom interrompis siajn konsiderojn, kvazaŭ iu, kiu rezonadus, serĉante rimecon efikan por sia savo el la situacio, kaj delikate daŭrigis:

– Vi povus iom ripozi en Palestino, kune kun via familio.

“Tie ekzistas regionoj kun bonega klimato, kiuj eble rehavigus la sanon al via filineto kaj samtempe restarigus vian viklecon. Kiu scias? Vi forgesus la urban tumulton, kaj poste vi revenus al nia medio kun novaj fortoj. La nuna prokuroro de Judujo estas mia amiko. Ni povus harmoniigi plurajn problemojn de niaj interesoj kaj de niaj funkcioj, ĉar ne estus al mi malfacile ekhavi de la imperiestro vian forliberigon de la laboroj en la Senato, kaj tiel vi ne ĉesus ricevi la ŝtatan salajron dum via restado en Judujo. Kion vi pensas pri tio? Vi povus foriri trankvila, ĉar mi prenis sur min la direktadon de ĉiuj viaj aferoj en Romo,

mi zorgus viajn interesojn kaj bienojn.

“Publio travidigis tra la rigardo ian radion da espero kaj, ekzameninte ĉiujn flankojn de la demando, tiujn favorajn kaj tiuj kontraŭajn al la plenumo de la projekto, delikate konsideris:

– La propono estas providenca kaj nobla, sed la sano de Livia ne permesas al mi preni tujan kaj definitivan decidon.

– Kial?

– Ni atendas la baldaŭan venon de nia dua infano.

– Kaj, kiam vi kredas, ke tio okazos?

– Ne pli malfrue ol post ses monatoj.

– Ĉu la forveturo interesas vin post la plej proksima vintro?

– Jes.

– Nu: vi estos en Judujo ĝuste post unu jaro de hodiaŭ.

La amikoj konfesis inter si, ke la konversacio estis longedaŭra.

La pluvo estis ĉesinta. En la ĉiela arkaĵo flagris lavitaj, klaraj konstelacioj.

La bruaj ĉaroj jam ektrafikis kun la ne tre agrablaj krioj de la kondukantoj, ĉar, en la imperia Romo, la horoj de la hela tago estis ekskluzive rezervataj al la trafiko de la patriciaj palankenoj kaj al la movado de la piedirantoj.

Flaminio emocie adiaŭis sian amikon kaj reprenis sian luksan portoseĝon, per helpo de siaj herculesaj, viglaj sklavo.

Apenaŭ vidinte sin sola, Publio Lentulus direktis sin al la teraso, super kiu la nokta vento rapide kuris.

En la belega lunlumo li ekrigardadis la Roman domaron, dissemitan sur la sanktaj montetoj de la glora urbo. Li disetendis la rigardon sur la noktan vidaĵon, konsiderante, kun klinita kapo kaj malgaja, la profundajn problemojn de la vivo kaj de la animo. Ia nevenkebla melankolio regis lian kaprican kaj senteman koron, dum muro de memamo kaj fiero baris la larmojn, kiujn verŝis la animo turmentata de premantaj pensoj.

II - LA SKLAVO

De la unuaj jaroj de la Imperio, la Romaj virinoj sin tute fordonadis al diboĉado kaj troa lukso, malprofite por la sanktigaj devoj hejmaj kaj familiaj.

La facileco de la akirado de sklavo, ŝargitaj ne nur per la plej krudaj servoj, sed ankaŭ per la plej altaj

hejmaj taskoj, inkluzive de la edukado kaj instruado mem, kaŭzis grandan falon al la moralo de la patriciaj familioj; efektive, la abundeco de la luksartikoloj, venantaj el Oriento, kaj ankaŭ la senokupeco, moligis la fibrojn de energio kaj laboro de la Romaj matronoj kaj inklinigis ĉi tiujn al frivolajoj de la vestaro kaj al la amaj intrigoj; tio estis la komenco de la plena malorganizo de la familio, kiu forgesis siajn plej ŝatindajn tradiciojn.

Tamen kelkaj hejmoj heroe rezistis al tia invado de malvirtigaj, krimaj fortoj.

Iuj virinoj tiam fieris pro la modelo de la pasintatempaj familiaj virtoj, de tiuj virtoj de tiom da virinoj, kiuj, pli frue ol ili, sin donadis al la konstrua penado de generacioj de tiom da sentemaj, noblaj animoj.

La edzinoj de Publio kaj Flaminio estis alkalkulataj al tiaj virinoj. Inteligentaj kaj fortanimaj, ili ambaŭ evitadis la tiaman malvirtigan ondon, kaj, tial, estis du simboloj de saĝo kaj korsimpleco.

La lastaj signoj de la vintro estis jam malaperintaj, en la jaro 32, kaj sur la varman, gajan Teron disŝutiĝis grandega korbo da floroj kaj parfumoj...

En unu hela, suna tago jen ni vidas Livian kaj Kalpurnian, amike konversaciantajn en la hejmo de Livia, dum du knabetoj distre desegnas en angulo de la ĉambro.

La du sinjorinoj preparas provizojn por la vojaĝo, riparante kelkajn lanvestaĵojn kaj interfluŝtrante intimajn impresojn, per amika, diskreta tono.

Ĉe unu momento la du knaboj eniras en apudan ĉambron, kaj Livia tiras la atenton de sia amikino jene:

– Ĉu viaj infanoj ne faras hodiaŭ siajn kutimajn ekzercojn?

– Ne, mia bona Livia – respondis Kalpurnia kun fratina delikateco, komprenante ŝiajn intencojn –; ne nur Plinio, sed ankaŭ Agripo dediĉis la hodiaŭan tagon al la malsanulineto. Mi sentas viajn patrinajn hezitojn kaj skrupulojn, konsidere al la bona farto de miaj filetoj, sed via timo estas senbaza...

– La dioj tamen scias, kiel mi vivas de antaŭ kelka tempo, de la momento, kiam mi aŭdis la malkaŝan kaj sinceran opinion de la kuracisto en Tibur. Vi ja scias, ke, laŭ lia opinio, la malsano de mia filino estras kruela kaj nekuracebla. De tiam, mia tuta vivo estas sinsekvo da absorbaj zorgoj kaj afliktoj. Mi faris ĉiajn paŝojn, por ke la infano estu izolita for de niaj amikoj, ĉar tion ordonis la higieno kaj la neceso ĉirkaŭlimigi, per nia penado mem, la teruran malsanon.

– Sed, ĉu tiu malsano estas ja nekuracebla? Ĉu tiu opinio estas la neerarema parolo de la dioj? Ĉu vi ne scias, kiel erara estas la scienco de la homoj?

“Antaŭ kelka tempo, miaj du filetoj estis atakitaj de insida, detrua febro. Mi venigis kuracistojn, sed rimarkis, ke ili alternis ĉe sia klopodo savi de la morto la du malsanulojn, tamen sen ia videbla sukceso. Mi poste pli bone pensis pri la ĉiela helpo, kaj tuj faris oferadon en la templo de Kastoro kaj Polukso; tiel mi savis ilin de nedubela morto. Dank’ al tiu decido, mi hodiaŭ vidas ilin ridantaj kaj feliĉaj.

“Nun, kiam vi havas ne nur la malgrandan Flavian, sed ankaŭ la etan Markon, mi konsilas al vi fari kiel mi, petante helpon de la ĝemelaj dioj.”

– Jes, vere, mia bona Kalpurnia; tiel mi faros, antaŭ ol ni baldaŭ forvojaĝos.

– Kaj, ĉar vi parolis pri la vojaĝo: kiel vi sentas vin koncerne ĉi tiun senatendan transloĝigon?

– Vi scias, ke mi ĉion faros por la trankvileco de Publio kaj por nia hejma paco. Jam de longe mi rimarkas, ke Publio estas senkuraĝa, malsana, pro siaj lacekonsumantaj penoj en la servado al la ŝtato. De kelka tempo, anstataŭ gaja kaj komunikigema, li fariĝis melankolia kaj kolerema. Li ekscitiĝas pro ĉio kaj kontraŭ ĉio; mi pensas, ke la malbona farto de nia filineto decide kunefikas por lia homevitemo kaj acida humoro.

“Konsiderante tiujn motivojn, mi min plezure preparas por akompani lin al Palestino, kaj bedaŭras nur, ke mi devas, kvankam provizore, foriri de via intimeco kaj de viaj konsiloj.”

– Mi ĝojas, aŭdante de vi ĉi tiujn vortojn, ĉar koncernas nin ekzameni la situacion de la personoj, elektitaj de nia koro kiel dumvivaj kunuloj, kaj ĉion fari por mildigi al ili la surterajn ĉargrendojn.

“Publio estas bonkora, nobla kaj idealista; sed, kiel patricio, naskita en unu el la familioj plej kleraj en la Respubliko, li estas tro vantama. Tiaj homoj postulas grandan psikologian takton de siaj edzinoj; estas do konsilinde kaj necese, ke vi montru absolutan egalecon de sentoj, por povi konduki lin ĉiam sur la plej bona vojo.

“Flaminio sciigis al mi ĉion pri via restado en Judujo, sed kelkajn detalojn mi ankoraŭ ne konas. Ĉu via ja daŭre loĝos en Jerusalemo?”

– Jes. Publio deziras, ke ni loĝu en la hejmo mem de lia onklo Salvio, en Jerusalemo, ĝis ni povos elekti tiun klimaton de la lando plej favoran al la sano de nia filineto.

– Bone – diris Kalpurnia, prenante mienon de plej granda diskreteco –, pro via nesperteco en la vivo, mi devas klarvidigi vian spiriton pro eblaj estontaj komplikaĵoj.

Livia forte ekmiris pro la averto de sia amikino, sed impresite demandis, kun streĉitaj oreloj:

– Sed, kion vi intencas diri?

– Mi scias, ke vi ne tre bone konas viajn boparencojn, jam de tiel longe forestantajn de Romo – flustris Kalpurnia, kun la detaloj, kiuj karakterizas la virinan spiriton –, kaj estas por mi devo de amikeco klarvidigi vian spiriton, por ke vi ne tro konfidu la personojn, kun kiuj vi ekrilatos.

“La pretoro Salvio Lentulus, kiu antaŭ multaj jaroj estis eksigita de la regado de la provincoj kaj estas hodiaŭ simpla oficisto ĉe la nuna Prokuroro de Judujo, ne estas, vere, homo kun tiu sama karaktero kiel via edzo; ĉi tiu havas ja iujn familiajn malfortajn flankojn, tamen li estas tre lojala kaj sincera spirito. Vi estis tre juna, kiam fariĝis en nia socio bedaŭrindaj okazaĵoj, en kiuj estis implikitaj la homoj, kun kiuj vi baldaŭ vivos. La edzino de Salvio, virino tre verŝajne juna kaj komforte vivanta, estas fratino de Klaŭdia, edzino de Pilato, al kiu via edzo estas rekomendota, por la alta administrado de la provinco.

“En Jerusalemo vi renkontos ĉiujn tiujn personojn, kies moroj estas tre malsamaj ol la niaj; cetere, pripensu, ke vi kunvivos kun hipokritaj, danĝeraj homoj.

“Ni rajtas riproĉi nenies agojn, escepte se ni tion faras en la ĉeesto mem de tiuj, kiujn ni konsideras kulpaj aŭ akuzindaj; mi tamen devas sciigi vin, ke la imperiestro devis komisi tiujn personojn por eksterlandaj servoj pro gravaj familiaj aferoj en la intimeco de la Kortego.

“La dioj pardonu min pro ĉi tiuj rimarkoj, farataj en malesto de la koncernaj personoj, sed kiel Romanino kaj ankoraŭ juna edzino de senatano, vi ricevos honorojn de niaj forestantaj samlandanoj; tiuj honoroj estos al vi farataj, en la scoio, kvazaŭ bukedoj da rozoj bonodoraj, sed ankaŭ dornaj...

Livia aŭdadis sian amikinon, duone mirplena, duone meditante, kaj fine diris diskrete, kvazaŭ dezirante forigi iun dubon:

– Sed, ĉu la pretoro Salvio ne estas grandaĝa viro?

– Vi eraras. Li estas ne multe pli juna ol Flaminio, sed lia danca rafiniteco faras el lia persono tipon de belega aspekto.

– Kiel mi povos sukcese elplenumi miajn devojn en la okazo, se sieĝos min la sociaj perfidaĵoj, tiel oftaj en nia tempo, ne pliruigante la spiritan staton de mia edzo?

– Ni fidu je la helpo de la dioj – murmuris Kalpurnia, lasante travuduĝu la belan fidon de sia patrina koro.

Sed la amikinoj ne povis daŭrigi plu sian konversacion. Pli forta bruo signis la alproksimiĝon de Publio kaj Flaminio, kiuj trairadis la vestiblon, serĉante ilin.

– Nu? – ekkriis Flaminio, ĉe la pordo, kun bona humoro kaj mokpetola rideto. – Inter la kudrado kaj la konversacio, ies reputacio nepre ricevas ian vundon en ĉi tiu ĉambro, ĉar jam mia patro diradis, ke unu virino sola ĉiam pensas pri sia familio; sed, se ŝi estas kun dua virino, ŝi tuj pensas pri... la aliaj.

Senmalica ridado de ĉiuj aplaŭdis liajn gajajn vortojn; tiam Publio bonhumore diris:

– Ni estu trankvilaj, mia Livia: ĉio estas preta kaj tute kontentiga por ni. La imperiestro volonte helpos nin per siaj rektaj ordonoj, kaj post tri tagoj galero atendos nin proksime de Ostio; tiel, ni senzorge vojaĝos.

Livia, kontenta kaj trankvila, ridetis. Ĉe la pordo de la ĉambro de la malgranda Flavia aperis du ridantaj kapoj, kaj Flaminio pretiĝis por akcepti en la brakojn samtempe ambaŭ siajn infanojn.

– Venu ĉi tien, vi petolaj moŝtoj! Kial vi ne iris hieraŭ al la lecionoj? Hodiaŭ mi ricevis plendon de la gimnazio kontraŭ via foresto, kaj mi estas forte ĉagrenita pro via konduto...

Plinio kaj Agripo konfuzitaj aŭdis la patran riproĉon; tiam la pli aĝa humile respondis:

– Sed, paĉjo, mi ne estas kulpa. Kiel vi scias, Plinio forkuris el la ekzercoj, kaj tial mi devis serĉi lin.

– Tio estas hontiga por vi, Agripo – patre diris Flaminio –, via aĝo jam ne permesas al vi partopreni en la petoloj de via frato.

En tiu momento de la sceno Kalpurnia intervenis, per paciga tono:

– Ĉio ĉi estas tre pravigebla, sed ni decidu la aferon hejme, ĉar la momento ne estas oportuna por diskutado inter patro kaj infanoj.

Ambaŭ knaboj kisis la manojn de sia patrino, dankante ŝin pro la anĝela interhelpo; Flaminio promesis, ke, en la tago de la forveturo, li akompanos siajn geamikojn ĝis Ostio, proksime de la enfluejo de Tibero, kaj post kelkaj minutoj la du familioj adiaŭis unu la alian.

Post tiuj sepdek du horoj da vigla, rapida preparado, jen niaj konatoj en komforta kaj eleganta galero, ĉe Ostio, kie ankoraŭ ne ekzistis la konstruaĵoj de la haveno, nur poste faritaj dum la regado de Klaŭdio.

Instigite de siaj gepatroj, kiuj ilin tuj de frua aĝo pretigis por la ĝentilaĵoj de la socia vivo, Plinio kaj Agripo kunhelpis por la komforto de la malsanulino, dum Kalpurnia kaj Livia donis instrukciojn al servistino pri la lokigo de la eta Marko. En ioma distanco Publio kaj Flaminio interŝanĝis impresojn; inter ĉi tiuj estis aŭdata la konfidenca averto de Flaminio al sia amiko:

– Vi ja scias, ke la homoj, kiujn la Imperio faris siaj regatoj, nin ofte rigardas envie kaj kolere, kaj tial ni devas neniam fariĝi neindaj je nia pozicio de patricioj.

“Kelkaj regionoj en Palestino, laŭ via scio mem, estas prirabataj de maliculoj; estas do necese, ke vi antaŭgardu vin kontraŭ tiaj homoj, precipe dum via irado al Jerusalemo. Tuj alveninte kun via familio, kolektu ĉirkaŭ vi la plej grandan nombron da sklavoj, por sekureco de vi kaj de viaj karuloj, kaj, se okazos iu atako, ne hezitu severe kaj akre puni.”

Publio atente akceptis la averton, kaj post kelkaj minutoj, la du amikoj traŝiris la internon de la ŝipo, al kies mastro la vojaĝanto sin turnis:

– Nu, Aŭlus, ĉu preta ĉio?

– Jes, Via Moŝto. Ni atendas nur vian ordonon por la forveturo. Koncerne nian laboron, vi povas esti trankvila, ĉar mi zorge elektis la plej lertajn Kartaganojn por la remado.

Efektive, tiam komenciĝis la lastaj adiaŭoj. La du sinjorinoj sin reciproke ĉirkaŭprenis, kun eklkoraj, amaj larmoj, promesante unu al la alia ĉiaman memoradon kaj petante la diojn pri trankvileco por ĉiuj.

Post la lastaj emociaj ĉirkaŭprenoj ekmoviĝis la luksa galero, kie la flago de la Roma aglo fiere flirtis sub la milda blovado de la maraj ventoj. La ventoj kaj la dioj estis favoraj, ĉar, dank’ al la vigla impulso de la sklavoj, ritme movantaj la fortajn remilojn, la vojaĝantoj baldaŭ rigardis la malproksiman verdan strekon de la Itala marbordo, kvazaŭ ili antaŭenirus sur la likva maso de la maro en la nesondeblan vastaĵon de la senlima spaco.

La vojaĝo fariĝis plej serene kaj kviete.

Publio Lentulus sentis tamen la koron plena de ombroj, kvankam bela estis la vidaĵo dum la marveturo tra Mediteraneo kaj novaj la aspektoj, kompare kun la monotoneco de liaj okupon en la Roma vivo, ĉe la multaj procesoj de la ŝtato.

Vane lia edzino provis alproksimiĝi al lia acidhumora spirito, penante trakti pri delikataj familiaj temoj, por ekkoni kaj mildigi liajn intimajn ĉagrenojn. Li havis la senton, kvazaŭ li alpaŝas al emocioj decidigaj dum sia ekzistado. Li konis parton de Azio, ĉar, ankoraŭ tre juna, li servis unu jaron ĉe la administrejo en Smirno, por plej bone penetri en la reton de la ŝtataj laboroj; sed li ne konis Jerusalemon, kie li estis atendata kiel sendito de la imperiestro, por la solvo de pluraj administraj problemoj ĉe la registaro de

Palestino.

Kia li trovos sian onklon Salvio, kiu estis pli juna ol lia patro? Jam de multaj jaroj li ne vidis tiun parencon; sed li ne estis multe pli juna ol la onklo. Kaj tiu Fulvia, frivola kaj kapricema, kiu edziniĝis kun lia onklo dum la tumulto de siaj multenombraj sociaj skandaloj kaj pro ĉi tiuj fariĝis kvazaŭ nedezirinda en la sino de sia propra familio? Li rememoris pli intimajn detalojn de la pasinteco, sed li sin detenis kaj ne komunikis al sia edzino la plej dolorajn perspektivojn. Pripensante ankaŭ la situacion de la edzino kaj de la infanoj, li maltrankvile rigardis la unuajn embarasojn, kiujn ili trovos dum sia restado en Judujo, ja kiel patricioj, sed ankaŭ kiel fremduloj, ĉar la amikrilatoj, ilin atendantaj, estis problemaj.

Meze inter liaj absorabaj pensoj kaj la preĝoj de lia edzino la veturo tra Mediteraneo estis baldaŭ finiĝonta, kiam li vokis sian plej fidindan serviston por diri la jenon:

– Komenio, ni baldaŭ estos ĉe la pordegoj de Jerusalemo; sed antaŭ ol ĝin atingi, ni devas fari nelongan marŝon ekde la loko de elŝipiĝo, kaj tio postulos de mi grandan zorgon pri la kondukado de la familio. Estas atendataj kelkaj reprezentantoj de la administrantaro de Judujo, sed nin certe akompanos via zorgado, ĉar ni ankrados ĉe regiono por mi fremda kaj al mi nekonata. Kolektu ĉirkaŭ vi ĉiujn servistojn sub via estreco, por ke ni estu absolute sekuraj dum la trairado.

– Mastro, kalkulu je nia zorgo kaj aldoniteco – respondis la servisto, respekte kaj kortuŝite.

En la sekvanta tago Publio Lentulus kaj lia akompanantaro elŝipiĝis en malgranda haveno de Palestino, sen menciindaj interokazaĵoj. Atendis lin, krom la sendito de la Prokuroro, ankaŭ iuj liktoroj kaj multenombraj gvardianoj, komandataj de Sulpicio Tarkvinius, provizita per ĉiuj rimedoj por kvieta kaj komforta veturado sur la vojoj al Jerusalemo.

Post la necesa ripozo la karavano ekiris, ŝajnante pli ĝuste ia milita ekspedicio, ol simpla transportado de familio inter sinsekvaj haltejoj.

La jungilaroj de la ĉevaloj, la Romaj kaskoj, brilantaj en la sunlumo, la strangaj vestoj, ornamitaj palankenoj, tirbestoj kaj pezaj ĉaroj kun la pakaĵoj aspektis kiel ia triumfa ekspedicio, kvankam rapidpaŝa kaj silenta.

Trankvile iradis la karavano, kiam jen proksime de Jerusalemo io ne antaŭvidita okazis. Ia siblanta korpo tranĉis la subtilan, helan aeron kaj enĵetiĝis en la palankenon de la senatano; samtempe akrasona kaj plenda krio estis aŭdita. Tre malgranda ŝtono negrave vundis la vizaĝon de Livia, kio kaŭzis fortan konfuzon ĉe la granda amaso da servistoj kaj rajdistoj. Inter la veturiloj kaj la ĉevaloj, kiuj haltis teruritaj, multe da sklavoj ĉirkaŭis siajn gemastrojn kaj ekscititaj penis ekscii la okazintaĵon. Sulpicio Tarkvinius, per unu ekrigardo, instigis sian ĉevalon al vigla galopado, penante aresti junulon, kiu timplena foriris de proksime de la vojo; kaj, ĉu kulpa aŭ ne, junulo eble dekokjara estis prezentita al la vojaĝantoj, por la necesa puno.

Publio Lentulus rememoris la rekomendon de Flaminio kelkajn momentojn antaŭ la forventuro, kaj bridante siajn plej bonajn sentojn de toleremo kaj grandanimeco, decidis montri la voloron de sia pozicio kaj aŭtoritato antaŭ la okuloj de ĉiuj, kiuj vivos kun li dum lia restado en tiu fremda lando.

Al la liktoroj, lin akompanantaj, li ordonis tuj agi, kaj tie, en la varma heleco de la suno ĉe la zenito kaj antaŭ la terurita rigardo de kelkaj dekoj da sklavoj kaj de multe da centestroj, li ordonis, ke la junulo estu

senkompate vergata pro sia ventanimeco.

La sceno estis malagraba kaj dolora.

Ĉiuj servistoj kortuŝite sekvadis la krakadon de la vergoj sur la duone dorso de tiu ankoraŭ juna viro, kiu, plorsingultante pro doloro, ĝemadis sub la despota, kruela punado. Neniu kuraĝis kontraŭstari al la malhumana ordono ĝis la momento, kiam Livia, ne povante rigardi plu la krudecon de tiu spektaklo, petegis sian edzon:

– Sufiĉe, Publio: la rajtoj de nia socia pozicio ne neprigas, ke ni estu kruelaj...

La senatano tiam konsideris sian troan severecon kaj ordonis haltigi la doloran punon; sed, ĉe damando de Sulpicio pri la destino de la malfeliĉulo, li parolis, akre kaj kolere:

– Al la galeroj!...

La ĉeestantoj ekstremis, ĉar la galeroj estis tio sama, kiel la morto mem aŭ la porĉiama sklaveco.

La malfeliĉulo senforte sin apogis sur la manoj de la centestro lin ĉirkaŭantaj, sed, aŭdinte la tri vortojn de la kondamna verdikto, fiksas sian fieran juĝanton per rigardo, en kiu montriĝis plej grandaj malamo kaj malŝato. En la interno de lia animo flagris fulmoj de venĝemo kaj kolero; sed la karavano denove ekiris, meze de la bruoj de la pezaj ĉaroj kaj la tintado de la armilaroj pro la movo de la ardaĵoj, malkvietaj ĉevaloj.

La alveno al Jerusalemo okazis sen aliaj notindaj faktoj.

Aliaj aspektoj, aliaj homoj – jen, kio impresis la vojaĝantojn ĉe ties kontakto kun la urbo, kies mieno, escepte de tre malmultaj ŝanĝiĝoj tra la jarcentoj, estis ĉiam tiu sama, funebra kaj malgaja, kiel antaŭparto de la sunrostitaj pejzaĝoj de la dezerto.

Pilato kaj lia edzino partoprenis en la solenoj por akcepto je la senatano, kiu reprezentis la principon de la leĝo kaj aŭtoritato, kiel sendito de Tiberio ĉe la administrantaro de la provinco.

Salvio Lentulus kaj lia edzino, Fulvia Prokula, parade kaj plej afable akceptis siajn geparencojn. Multaj honoroj estis faritaj al Publio Lentulus kaj ties edzino; ĉi tiu tamen, ĉu pro la avertoj de Kalpurnia, ĉu pro sia psikologia akreco mem, tuj rimarkis, ke en tiu medio ne batis la noblaj, sinceraj koroj de ŝiaj Romaj amikoj, kaj tial ŝi ricevis ian senton de ĉagreno kaj aflikto. Ŝi ĝoje rimarkis, ke ŝia malgranda Flavia tiam pli bone fartas, malgraŭ la laciga vojaĝo; sed ŝin samtempe turmentis vidi, ke Fulvia ne havas sufiĉe grandan koron, por ilin ĉiam akcepti ame kaj simpatie. Ŝi rimarkis, ke, kiam ŝi prezentis al Fulvia sian malsanan filineton, la fiera patriciino faris instinktan ekmovon malantaŭen, tirante la knabinon Aŭrelia, sola filino de la geedzoj Salvio kaj Fulvia, for de la kontakto kun la familio de Livia, sub tute neakcepteblaj pretekstoj. Sufiĉis unu tago da restado en tiu fremda hejmo, por tio, ke la kompatinda sinjorino komprenis la amplekson de la ĉagrenoj, ŝin tie atendantaj, kaj konjektis la oferojn, kiujn tiu situacio postulos de ŝia sentema kaj amema koro.

Kaj ne nur la familia bildo, kun siaj impresaj detaloj, turmentis ŝian menson, afliktitan de nigraj perspektivoj. Renkontante Poncion Pilaton, ĉe la momento mem de sia alveno, ŝi klare sentis, ke ŝi trovis necedeman kaj potencon malamikon.

Nekonataj fortoj de la intuicia mondo paroladis al ŝia virina koro, kvazaŭ voĉoj el la nevidebla regiono pretigus ŝian spiriton por la akraj suferoj dum la venontaj tagoj. Efektive, pro sia pli subtila anima strukturo, la virino, simbolo de la sanktejo de la hejmo kaj de la familio, ofte povas, per rapida pripenso, trapenetri nesondeblajn misterojn de la karakteroj kaj animoj post la dika kaj ombra kurteno de la sinsekvaj, doloraj reenkarneigoj.

Publio Lentulus, kontraŭe, ne ricevis tiajn samajn emociojn, kiajn sentis lia edzino. La malsameco de la medio iom ŝanĝis lian humoron, kaj li sentis moralan fortikiĝon ĉe la tasko, kiun li devos plenumi sur la nova scenejo de siaj laboroj kiel ŝtata aŭtoritatulo.

En la dua tago de lia restado en la urbo, tuj post lia unua vizito en la instalaĵoj de la Turo Antonia, kie loĝis Romaj trupoj, kiam li observadis la preterpasadon de advokatoj kaj leĝistoj en la fama Templo de Jerusalem, deziris paroli al li malaltranga, ankoraŭ juna viro, kies sola vizitkarto estis la afliktita koro de amanta patro.

Obeante prefere la politikajn devojn ol ian noblan senton, la senatano rompis la etiketon kaj tuj akceptis lin en sia privata kabineto, preta aŭdi la vizitanton.

Judo, iom pli aĝa ol la senatano, kun respekta humileco kaj per malfacila parolo, kiu tamen komprenigis lian deziron, turnis sin al li jene:

– Via senatana moŝto, mi estas Andreo, filo de Ĝioras, modesta kaj malriĉega laboristo, kvankam multaj membroj de mia familio havas gravajn oficojn en la Templo kaj en la sfero de la Leĝo. Mi kuraĝis veni al vi, por peti la liberigon de mia filo Saul, antaŭ tri tagoj arestita laŭ via ordono kaj sendita rekte al dumviva servado en la galeroj... Mi petas de vi indulgon kaj kompaton, ke vi ŝanĝu tiun decidon, kiu terure efikos al la solideco de mia mizera hejmo... Saul estas mia unuenaskita filo kaj mia tuta patra espero... Mi ja konfesas lian nesperton en la vivo, kaj tial mi venas ne por senkulpigi lin, sed por peti vian indulgemon kaj grandanimecon, pro lia malsaĝeco de junulo; mi ĵuras al vi per la Leĝo, ke mi de nun gvidos lin sur la vojo de la severe plenumata devo...

Publio memoris, ke li devas klare vidigi la aŭtoritatecon de sia rango, kaj rebatis kun la fiero propra al liaj decidoj:

– Mi ja konscias, ke mi agis juste, kaj vi kuraĝas diskuti miajn ordonojn! Mi ne povas ŝanĝi mian decidon, kaj surprizas min, ke Judo dubas la ordonon kaj la parolon de Imperia senatano, prezentante tiajn plendojn.

– Sed, sinjoro, mi estas patro...

– Se vi estas patro, kial do vi faris el via filo iun senokupan kaj neutilan?

– Mi ne povas kompreni la motivojn, kiuj intigis mian kompatindan Saulon sin tiamaniere kompromiti, sed mi ĵuras al vi, ke li estas la ĉefa helpanto de miaj ĉiutagaj laboroj.

– Ne koncernas min ekzameni la motivojn de via sento, ĉar mia parolo estas neŝanĝebla dirita.

Andreo de Ĝioras rigardis Publion Lentulus de la kapo ĝis la piedoj, vundite je sia patra sentemo kaj sia homa digno, ŝaŭmante de doloro kaj retenita kolero. Liaj malsekaj okuloj montris internan angoron ĉe tiu

formala, senapelacia rifuzo, sed, flanken metante ĉiajn homajn konvenciojn, li diris kun fiera firmeco:

– Senatano, mi malsupreniris de mia digno, por peti vian kompaton, sed mi akceptas vian malhonoran rifuzon!

“Vi ĵus akiris, per la malnobleco de via koro, eternan, nepardoneman malamikon! Per viaj povo kaj prerogativoj vi povos ja ruinigi min por ĉiam, aŭ reduktante min al mallibereco aŭ kondamnante min al malgloriga morto; sed mi preferas alfronti vian arogantecon! Vi nun plantis dornan arbon, kies frukto iam senrime vundos vian krudan, nesenteman koron, ĉar mia venĝo eble malfruos, sed, kiel via nefleksebla, malvarma animo, tiel same ĝi estos fatala kaj terura!”

La Judo ne atendis la respondon de sia dialoganto, kiun amare emociis la malmildeco de tiuj vortoj; kun firma paŝo kaj supren turnita vizaĝo li eliris el la kabineto, kvazaŭ li estus ricevinta la plej bonan rezultaton el sia nedaŭra kaj decida vizito.

Plena samtempe de fiero kaj maltrankvilo, Publio Lentulus tiumomente portis la plej diversajn sentojn, kiuj superpotencis lian koron. Li deziris tuj ordoni aresti tiun viron, kiu ĵetis al li rekte en la vizaĝon la plej akrajn veraĵojn; samtempe, li deziris voki lin al si, por promesi al la patro la revenon de la kara infano, kiun li protektos per sia influo, kiel ŝtata aŭtoritatulo; sed la voĉo retenigis en lia gorĝo meze en tiu miksaĵo el emocioj, kiuj denove forprenis de li la pacon kaj serenecon. Dolora premo paralizis liajn voĉkordojn, dum en lia afliktita koro eĥis tiuj ardaĵ, amaraj vortoj.

Ondo da ĉagrenaj konsideroj plenigis lian internan mondon, kiel signo de la plej fortaj konfliktoj de sentoj. Ĉu ankaŭ li ne estas patro kaj ne penadas teni siajn infanojn ĉe sia koro? Tiu viro havis ja la plej pravigeblajn motivojn por lin rigardi kiel maljustan, malican Spiriton.

Revenis al lia spirito tiu neklarigebla sonĝo, kiu, rakontite al Flaminio, nerekte kaŭzis lian venon al Judujo, kaj li pensis pri la pentbedaŭraj larmoj, kiujn li verŝis, antaŭ la tumulto de rememoroj pri sia ĵus pasinta malnobla ekzistado, plena de tiom da krimoj kaj dekliniĝoj for de la virto.

Li eliris el sia kabineto, jam havante en la menso la solvon de tiu demando: li ordonis, ke plej urĝe, kiel postulis la afero, oni konduku al li la junan Saulon, por ties reveno al la patra domo; tiamaniere, li mildigos la doloran impreson, kiun li kaŭzis al la kompatinda Andreo. Liaj ordonoj estis tuj konigitaj, sed atendis lin malagrabra surprizo, kiun portis la informoj de la oficistoj, kiujn koncernis la necesaj paŝoj en tiu direkto.

La juna Saul estis malaperinta el la karcero, el kiu, laŭŝajne, li senespere kaj neatendite fuĝis. La informoj estis donitaj al la supera aŭtoritatulo, Publio Lentulus; sed tiu ne sciis, ke la malhonestaj ŝtatoficistoj ofte vendadis la junajn arestitojn al la ambiciaj sklavo-komercistoj en la plej loĝataj centroj de la monda ĉefurbo.

Eksciinte, ke la enkarcerigito fuĝis, la senatano sentis sian konsciencon liberigita de la akuzoj, kiuj ĝin ŝargis. Nu, li konkludis, tio estis ja bagatela afero, ĉar la junulo, ekster la karcero, iros tuj al sia patro; kaj, por plisolidigi sian trankvilecon, li ordonis al la respondantoj por la administra sekureco, ke ili neniel persekutu la forkurinton: al ĉi tiu estos siatempe konsentita la pardono de la leĝo.

La vojo de Saul estis tamen tute alia.

En preskaŭ ĉiuj Romaj provincoj ekzistis famaj bandoj da maliculoj, kiuj, profitante el la ombro de la ŝtato, estis fariĝintaj komercantoj de konsciencoj.

La Juda junulo, en sia multpromesa, fortika junaĝo, estis viktimo de tiaj fianimaj homoj. Sekrete vendite al potencaj sklavokomercistoj en Romo, kune kun multaj aliaj, li estis enŝipigita ĉe la antikva haveno de Jafo, direkte al la ĉefurbo de la Imperio.

Rompante la naturan ordon de la faktoj, ĉi tie rakontataj, jen ni trovas lin, post kelkaj monatoj, sur granda podio proksime de la Forumo, kie, unuj ĉe aliaj korŝire miksiĝis viroj, virinoj kaj infanoj, preskaŭ ĉiuj nudaj kaj kun malgrada aŝiŝo, pendanta de la kolo. Kun okuloj fulmantaj de venĝosentoj, tie staris Saul, duone nuda; lian kapon kovris ĉapo el blanka lano, kaj liaj piedoj estis supraĵe ŝmiritaj per gipso.

Ĉe tiu amaso da malfeliĉuloj tien kaj reen iradis viro kun malŝatinda, abomena mieno, kiu kriadis al la multego da videmuloj, lin ĉirkaŭantaj:

– Civitanoj, bonvolu observi... Kiel vi scias, ne estas al mi urĝe vendi miajn varojn, ĉar mi ŝuldas al neniu; tamen mi estas ĉi tie por servi al la noblaj Romanoj!

Kaj ekzamenante speciale tiun aŭ alian malfeliĉulon, li daŭrigis sian maldecan insultan alparoladon:

– Vidu ĉi tiun junulon! Li estas ekzemplero de sano, sobreco kaj obeemo: li obeas ĉe la unua signo. Atentu bone la firmecon de lia karno. Nenia malsano atakos lian organismon.

“Observu zorge ĉi tiun viron! Li scias korekte paroli Greke kaj havas perfektan strukturon de la kapo ĝis la piedoj!”

Per tiu bombasto de senskrupula negocisto li reklamadis plu por ĉiu el la sklavo, antaŭ la amaso da aĉetantoj ĉirkaŭ li, ĝis venis la vico de la juna Saul, kiu tra la mizera aspekto vidigis siajn kolerimpulsojn kaj sovaĝajn sentojn.

– Atentu bone ĉi tiun junulon! Li ĵus venis el Judujo, kiel la plej bela ekzemplero de sobreco kaj sano, de obeemo kaj forto. Li estas unu el la plej riĉaj specimenoj de miaj hodiaŭaj komercaĵoj. Observu lian junecon, noblaj Romanoj! Mi lin donos al vi por bagatelaj kvin mil sestercoj.

La juna sklavo rigardis la komerciston kun la animo bolanta de malamo kaj karesanta la plej sovaĝajn promesojn je venĝo. Lia Juda mieno impresis la homamason, en tiu mateno starantan sur la placo, ĉar intensa vidamo ĉirkaŭis lian interesan, tre kuriozan figuron.

El la homamaso elpaŝis viro direkte al la komercisto, al kiu li flustris:

– Flakus, mia mastro bezonas elegantan kaj fortikan junulon, kiu kondukus la bigojn de liaj filoj. Ĉi tiu junulo interesas min. Ĉu vi ne vendus lin por kvar mil sestercoj?

– Tiel estu! – murmuris la komercisto, akceptante la proponon. – Mia intereso estas komplezi al la nobla klientaro.

La aĉetanto estis Valerio Brutus, estro de la ordinaraj servoj en la domo de Flaminio Severus, kiu komisiis al li akiri junulon, bonaspektan sklavon por la bigoj de liaj infanoj, en la gravaj tagoj de la Romaj festoj.

Tiel, saturita de malnoblaj, bedaŭrindaj sentoj, Saul, la filo de Andreo, estis lokita de la fortoj de la destino ĉe Plinio kaj Agripo, en la hejmo de la familio Severus, en la centro de Romo, por la mizera prezo de kvar mil sestercoj.

III - EN LA HEJMO DE PILATO

La sekeco de la medio, kie kuŝas Jerusalem, havigas al tiu fama urbo melankolian belecon, miksitan kun ia premanta monotoneco.

Dum la epoko de la Kristo ĝi aspektis preskaŭ tiel, kiel nun, kun unu sola diferenco, nome, ke la monteto Micpa, kun siaj dolĉaj, belaj tradicioj, montriĝis kiel verda, gaja loko, kie la okuloj de la fremduloj ripozadis, for de la senfruktaj kaj krudaj pejzaĝoj.

Ni tamen rimarkigu, ke, dum la tempo, kiam Publio Lentulus kaj ties familio tie loĝadis, Jerusalem montris novaĵojn kaj brilon de nova vivo. Multaj estis la domoj, kiujn Herodo konstruigis en ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj en ĉiuj vidiĝis nova estetika sento de Izrael. La preferon por la monolitoj eltranĉataj el rokoj, propran al la antikva Izraelida popolo, anstataŭis la adaptado de la Juda gusto al la Grekaj normoj, kaj tiel renoviĝis la interna aspekto de la fama urbo. Sed la mirinda juvelo estis la Templo, tute nova, kia ĝi estis en la epoko de Jesuo. Ĝian rekonstruadon ordonis Herodo, en la jaro 21; la starigo de ĝiaj portikoj postulis ok jarojn, kaj la planoj de tiu grandioza verko, malrapide disvolviĝintaj tra la tempo, estis elfinitaj nur nelonge antaŭ la momento de ĝia plena disruiniĝo.

Sur la grandegaj kortoj ĉiutage kunvenadis la kremo de la Izraelida intelektularo; tie troviĝis la forumo, la universitato, la superegaj tribunalo kaj templo de unu tuta raso.

La civilaj procesoj mem, kaj ankaŭ la lertaj diskutoj pri teologio, tie ricevis siajn lastajn decidojn; en la impona, majesta Templo koncentriĝis ĉiaj ambicioj kaj laboroj de tuta nacio.

Respektante la religian filozofion de la fremdaj popoloj, la Romanoj ne partoprenis en la subtilaj tezoj kaj sofismoj, ĉiutage diskutataj kaj ekzamenataj, sed la Turo Antonia, kazerno de la imperiaj trupoj, superstaris la lokon kaj tiel faciligis la konstantan kontroladon de la tuta movado de la pastroj kaj de la popolo.

Post la okazaĵo pri la malliberulo, kiun li ankoraŭ konsideradis negrava epizodo, Publio Lentulus reprenis ioman trankvilecon por la plenumo de siaj ordinaraj devoj. La krudaj bildoj de Jerusalem havis por liaj lacaj okuloj ian novan ĉarmon, en kiu li penso ripozadis post la multenombraj kaj pezaj laboroj en Romo.

Livia tenadis sian koron turnita al siaj foraj amikrilatoj kaj kritike observis la vantamon de tiuj spiritoj, kun kiuj ŝi nun vivadis. Kvazaŭ mirakle, la malgranda Flavia pli bone ekfartis: oni rimarkis grandan transformiĝon de la vundoj, kovrantaj ŝian haŭton. Sed la malamika sinteno de Fulvia, al kiu ne plaĉis la ĉarma simpleco kaj la alta inteligenteco de Livia, kaj kiu uzadis ĉiun okazon por ĵeti al ŝi en la vizaĝon mizerajn, kelkfoje ironiajn kaj mordajn aludojn, lasis ŝian spiriton konfuzita en ia kirlego da halucinaciaj perspektivoj. Tiajn faktojn ŝia edzo ne konis, ĉar la malfeliĉa sinjorino sin detenis kaj prisilentis siajn plej profundajn ĉagrenojn.

Sed ĝustadire ne tiuj faktoj ŝin frakasis en tiu medio plena de premaj duboj.

Jam de unu semajno ili troviĝis en la urbo, kaj estis rimarkinde, ke, eble kontraŭ sia kutima konduto, Poncio Pilato ĉiutage iradis al la hejmo de pretoro, pretekstante preferon por la konversacio kun la patricioj, ĵus venintaj el la Kortego. Multajn horojn li tie restadis; sed Livia, per la sekretaj intuicioj de sia animo, komprenis la fiajn pensojn de la provincestro pri ŝi, kaj kun singarda spirito aŭdis liajn mielajn madrigalojn kaj malpli rektajn deklarojn.

Ĉe tiuj alproksimiĝoj de sentoj, antaŭsignantaj la apogeon de la pasioj, estis vidata ankaŭ la kolereto de Fulvia, prenita de venena ĵaluzo en la situacio, kiun kreis la konduto de Pilato. Post tiuj brilaj kulisoj de la scenejo de la nesincera amikeco, kun kiu ili estis akceptitaj, Publio kaj Livia devus kompreni, ke ekzistas ia marĉo el malnoblaj pasioj, kiuj certe pereigos la trankvilecon de iliaj animoj. Ili tamen ne komprenis la detalojn de la situacio kaj, bonafide kaj naive, ekiris la ombran, doloran vojon de la suferoj, kiujn Jerusalem asignis al ili.

Senĉese referante komplezojn kaj ĉiam pli da ĝentilaĵoj, Pilato nepre volis doni vespermanĝon, per kiu la tuta familio estus regalita kaj en kiu la frateco kaj la gajeco estus perfektaj.

En la tago difinita, Salvio kaj Publio, kune kun la siaj, iris al la palaco de la provincestro, kie ankaŭ Klaŭdia ilin atendis kun afabla, gastama rideto.

Livia, en sia simpla, modesta vesto, estis pala, kaj, kontraŭ ĉia supozo de la edzo, decidis ne iri sen sia malsana filineto; tiel, ŝi esperis, ŝia patrino zorgado iamaniere forpuŝos la pretendojn de la amindumanto, kiujn ŝia virina koro antaŭsentis, laŭ la nedeca, trokuraĝa sinteno de tiu homo, kiu ilin gastigos en tiu vespero.

La manĝo estis plenumita en tre speciala maniero, laŭ la plej rigoraj kaj elegantaj moroj de la Kortego.

Livia estis konfuzita meze de tiuj solenaĵoj, sekvantaj unu alian laŭ la plej alta rafiniteco de la Roma etiketo, ĉar tiaj moroj venis de medio, for de kiu ŝi kaj Kalpurnia ĉiam staris, pro la simpleco de siaj koroj. Kvazaŭ ia armeo da servantoj, tro granda nombro da sklavoj iradis tien kaj reen, por tia malgranda nombro da kunmanĝantoj.

Kiam la manĝmetoj estis preparitaj, jen la “vokatoroj” laŭte diris la nomojn de la gastoj, kaj la “infertoroj” alportis la pladojn, kun la manĝaĵoj simetrie aranĝitaj. La invititoj tiam kliniĝis sur la dorson de la trikliniaj litoj, kovritaj per atlasecaj lanugoj kaj florpetaloj. La viandoj venis sur pladoj el oro kaj la panoj en korboj el arĝento; multaj estis la servistoj por ĉiuj taskoj, inkluzive de tiuj, kiuj provos la manĝaĵojn, por kontroli ties guston, por ke la manĝoj estu plej sekuraj. La servistoj disdonis malnovan, bongustan vinon, miksitajn kun aromaĵoj, en kalikoj inkrustitaj per gemoj, dum aliaj servistoj, ilin akompanantaj, prezentis, en arĝentaj kruĉetoj, varmetan aŭ malvarman akvon, laŭ la plaĉo de la invititoj. Ĉe la litoj, kie ĉiu gasto mole sidis, staris junaj sklavoj, zorge vestitaj kaj kun gracia turbano, brakoj kaj piedoj duone nudaj; ĉiu el ili havis difinitan taskon. Kelkaj svingadis longajn mirtobranĉojn por forpeli la muŝojn, dum aliaj, klinite ĉe la piedoj de la manĝantoj, devis diskrete forviŝi la signojn de ties manĝamo kaj malsobreco.

Dek kvin malsamaj manĝaĵoj estis disportitaj de la sindonaj, humilaj sklavoj. Post la manĝo, centoj da torĉoj heligis la salonojn kaj estis aŭdataj agrablaj simfonioj.

Junaj, beltaliaj sklavoj kaj sklavinoj ludis pasiajn, voluptajn dancojn honore al siaj mastroj, kies malsuperajn sentojn ili tiel dorlotis per sia stranga kaj spontanea arto; kaj ne okazis duelo inter gladiatoroj, laŭ la kutimo post la grandaj festenoj en la Kortego, nur tial, ĉar Livia, kun malgajaj okuloj, petis, ke estu evitita, en tiu festo, la dolora vido je homa sango.

Tiu estis unu el la plej varmaj noktoj en Jerusalemo, kaj tial, post la vespermanĝo kaj la aliaj ceremonioj, ĉiuj, nun kun Sulpicio Tarkvinio, sin direktis al la vasta kaj bela teraso, kie junaj sklavinoj ludadis ĉarmajn orientajn muzikaĵojn.

– Mi ne pensis, ke mi trovos en Jerusalemo ian patrician nokton, kiel ĉi tiu – kortuŝite diris Publio al la provincestro, kun respekta ĝentileco. – Mi ŝuldas al via nobla, grandanima komplezemo la ĝojon ĝui la neforgeseblajn medion kaj vivon de la Kortego, kie la forestantaj Romanoj tenas siajn korojn kaj pensojn.

– Senatano, ĉi tiu domo apartenas al vi – respondis Pilato per intima tono. – Mi ne scias, ĉu mia propono plaĉos al vi: ni havus motivojn nur por danki la diojn, se vi konsentus al ni la honoran ĝojon ĉi tie loĝi, kune kun viaj estimindaj familianoj. Mi kredas, ke la hejmo de la pretoro Salvio, ne havigas al vi la necesan komforton; krom tio, konsiderante la proksiman parencecon inter mia edzino kaj la edzino de via onklo, mi ne sentas min ĝenita farante ĉi tiun proponon, sen ia rompo de niaj sociaj moroj.

– Tio estas nebla – ekkriis siavice la pretoro, kiu atentis la ĝentilan proponon. – Mi kaj Fulvia kontraŭstaras la efektivigon de tia plano – kaj fidele signante al sia edzino, li finis sian konsideron –, ĉu ne, mia kara?

Sed Fulvia, kun ia amareco, respondis, surprizante ĉiujn alestantojn:

– Jes, mi plene konsentas. Publio kaj Livia estas niaj efektivaj gastoj; ni tamen ne povas forgesi, ke la celo de ilia vojaĝo estas la resaniĝo de ilia filineto, objekto de ĉiuj niaj nunaj zorgoj; tial estas ja konsilinde, ke ni ne igu ilin malhavi ian rimedon necesan al la malsana infano...

Kaj, instinkte direktante sin al la marmora benko, kie la malsanulineto ripozis, ŝi skandalis ĉiujn, daŭrigante:

– Cetere, ĉi tiu knabino serioze maltraktiviligas nin ĉiujn. Ŝia diskrevanta haŭto prezentas neordinarajn simptomojn, kiuj ŝajnas...

Sed ŝi ne sukcesis elfini la disvolvadon de siaj skrupulaj timoj, ĉar Klaŭdia, nobla animo, kies karaktero estis tute malsama ol tiu de la fratino, kiun la destino donis al ŝi, komprenis la embarasan situacion, kiun la vortoj de Fulvia naskis, kaj interrompis ŝin:

– Mi vidas nenian motivon por tiaj timoj; mi kredas, ke Flavia nun pli bone fartas kaj estas pli fortika. Mi eĉ pensas, ke sufiĉos la klimato de Jerusalemo por ŝia plena resaniĝo.

Kaj paŝante al la malsanulineto, kvazaŭ dezirante forviŝi la doloran impreson de tiuj krudaj vortoj, Klaŭdia prenis ŝin en la brakojn kaj kisis ŝian vizaĝon, kovritan de violaj tonoj de apenaŭ kaŝeblaj ulceroj.

Livia, kies vizaĝo ardis pro la humiligo kaŭzita de la vortoj de Fulvia, ricevis la ĝentilaĵon kiel dolĉan balzamon por ŝiaj patrinaj zorgoj; siaflanke, Publio, amare surprizita, konsideris, ke li devas reakiri sian

serenecon kaj viran energion, maskante la ĉagrenon, kiun la epizodo kaŭzis al li; li do, treege kortuŝita, reprenis la direktadon de la konversacio:

– Jes, vere, amikoj. La sano de mia kompatinda Flavia estas la ĉefa objekto de nia longa vojaĝo tien ĉi. Kiam estos solvitaj la problemoj de la ŝtato, jam de kelkaj tagoj mi ekzamenas la eblon loĝi en ia regiono internlanda, por ke mia filineto denove havu la organisman ekvilibron, spirante pli puran aeron.

– Nu – diris Pilato firmtone –, pri klimatoj mi estas ĉi tie kompetentulo. Jam de ses jaroj mi vivas en ĉi tiu lando, kiel ties estro, kaj vizitis preskaŭ ĉiujn loketojn de la provinco kaj de ĝiaj najbaraj regionoj: mi havas motivojn por aserti, ke Galileo okupas la unuan vicon. Ĉiam, kiam mi povas ripozi post intensaj laboroj, kiuj min ĉi tie tenas, mi tuj iras al nia vilao en la ĉirkaŭaĵo de Nazaret, por ĝuadi la serenecon de la pejzaĝo kaj la mildajn ventetojn de ĝia grandega lago. Mi konfesas, ke la distanco estas tre longa, sed vere estas, ke, se mi restus proksime de la urbo, dum miaj periodaj ripozoj, mi perdus mian tempon aŭdante la senĉesajn petojn de la rabenoj de la Templo, ĉiam dronantaj en senfinaj disputoj. Ĝuste nun Sulpicio estas forironta tien, por kontroli kelkajn riparojn en nia loĝejo, ĉar ni intencas tien iri baldaŭ, por restarigi la fortojn konsumitajn, dum la ĉiutaga laborado.

“Ĉar mia gastigo ne estas necesa al vi en Jerusalemo, eble ni havos la plezuron poste akcepti, vin, por ke vi loĝu en nia tiea vilao, ĉu ne?”

– Nobla amiko, – respondis dankplene la senatano –, mi devas ŝpari al vi tian laboron, sed mi restos al vi tre danka, se via amiko Sulpicio faros la necesajn paŝojn, en Nazaret, por aĉeti komfortan, simplan domon, kiun li reformigus laŭ niaj familiaj kutimoj, por ke ni tie povu senzorge loĝi dum kelkaj monatoj.

– Plej plezure.

– Tre bone – afable diris Klaŭdia, dum Fulvia pene kaŝis venenan kolereton –, mi prenos sur min konformigi nian bonan Livian al la vivo en la kamparo, kie oni sin tiel plaĉe sentas, ĉe la rekta kontakto kun la Naturo.

– Se vi nur ne fariĝos Judinoj... – aldonis la senatano en bona humoro, por kio ĉiuj gaje ridetis.

Tiumomente, aŭdinte la detalojn de la taskoj baldaŭ konfidotaj al li, Sulpicio Tarkvinus, fidindulo de la provincestro, permesis al si enmiksiĝi en la aferon kaj demandis, surprizente ĉiujn:

– Kaj, ĉar estas parolete pri Nazaret: ĉu vi jam aŭdis pri ĝia profeto?

–?

– Jes – li daŭrigis – Nazaret havas nun profeton, kiu jam de kelka tempo faras mirindaĵojn.

– Kiel, Sulpicio! – pikita ekkriis Pilato. – Ĉu vi do ne scias, ke ĉe la Judoj naskiĝas profetoj ĉiutage? Ĉu la malpacoj en la Templo de Jerusalemo okazas pro ia alia kaŭzo? Ĉiuj legistoj konsideras sin inspirataj de la Ĉielo, kaj ĉiu el ili posedas ian novan revelacion.

– Sed tiu, sinjoro, estas tre malsama.

– Ĉu eble vi estas konvertita al ia nova kredo?

– Tute ne, des pli, ke mi komprenas la fanatikecon

kaj obsedon de tiuj neŝatindaj homoj, sed mian atenton ja turnis al si la impresa figuro de ankoraŭ juna Galileano, kiam, antaŭ kelkaj tagoj, mi estis en Kapernaum.

“En la centro de iu placo, mi vidis grandan homamason, kiu, sidante sur kvazaŭaj benkoj el ŝtono kaj sablo, aŭdadis lian parolon en ekstazo, neskita de admiro kaj emocio...

“Ankaŭ mi, tuŝita de ia mistera, nevidebla forto, eksidis por aŭdi lin.

“El lia figuro, eksterordinara pro simpla beleco, venis ia nekaptebla “io”, kio superregis la amason, kaj ĉi tiu sereniĝis, aŭdante liajn promesojn pri ia eterna regno... Liaj haroj flirtis ĉe la venteto de la kvieta vespero, kvazaŭ fadenoj el nekonata lumo ĉe la heleco de la krepusko; kaj el liaj dolĉaj okuloj ŝajnis, ke elŝprucas ia ondo da senlimaj kompato kaj kortuŝiteco. Piednuda kaj malriĉa, li tamen portis senmakulan tunikon, kies blankeco akordis kun la subtileco de liaj delikataj trajtoj. Lia parolo estis kvazaŭ kanto de espero por ĉiuj suferantoj en la mondo, kanto, kiu ŝvebis inter la ĉielo kaj la Tero kaj kiu altigis la pensojn de ĉiuj liaj aŭskultantoj... Li parolis pri nia grandeco kaj pri niaj konkeroj, kvazaŭ ili estus ja malŝatindaj aferoj; li havis amarajn vortojn pri la monumentaj verkoj de Herodo, en Sebasto, kaj asertis, ke super Cezaro staras iu Ĉiopova Dio, konsolanto de ĉiuj senesperaj kaj afliktitaj homoj... Laŭ lia instruado pri humileco kaj amo, ĉiuj homoj estas amataj fratoj, idoj de tiu pardonema kaj justa Patro, kiun ni ne konas...”

La voĉo de Sulpicio estis saturita de tiu emocia tono, karakterizanta la sentojn naskitajn de la vero.

La emocio de lia rakontado komunikiĝis al lia aŭdantaro, kiu plej interese lin aŭskultis.

Tamen Pilato, ne perdante la flamon de sia vantamo de provincestro, interrompis lin:

– Ĉiuj estas fratoj... Tio estas absurdo! La doktrino pri la unika Dio ne estas io nova por ni, en ĉi tiu lando de nekleruloj; ni tamen ne povas konsenti tiun koncepton pri la larĝasenca frateco. Kaj la sklavoj? Kaj la vasaloj de la Imperio? Kio fariĝus do el la prerogativoj de la patricioj?

“Sed min plej mirigas – li daŭrigis, sin turnante speciale al la rakontinto – tio, ke vi, praktika homo, lasis vin trompi de la vanaj vortoj de tiu nova profeto kaj miksiĝis kun la popolamaso, por aŭdi lin. Ĉu vi ne scias, ke la konsento de liktoro povas signifi grandegan apogon al la ideoj de tiu viro?”

– Sinjoro – respondis Sulpicio konsternita –, mi mem ne scius klarigi la motivon de miaj observoj en tiu vespero. Mi tuj konsideris ankaŭ, ke la doktrinoj, de li predikataj, estas revoluciaj kaj danĝeraj, ĉar ili samniveligas servistojn kaj mastrojn; sed, aliflanke, mi rimarkis lian doloran mizerecon, kiun liaj disĉiploj kaj sekvantoj rigardas kiel feliĉan staton, kaj tio tute ne estas motivo, ke la provincaj aŭtoritatuloj ion timu.

“Cetere, tiuj predikoj ne malutilas la kamparanojn, ĉar ili ordinare okazas dum la horoj de ripozo kaj neniofarado, dum la interrompo de la ĉiutagaj laboroj; estas ankaŭ notinde, ke liaj preferataj kunuloj estas la plej nekleraj kaj modestaj fiŝistoj en la lago.”

– Sed, kial vi lasis vin tiel logi de tiu homo? – ree demandis Pilato per energia tono.

– Pri tio vi eraras – respondis la liktoro, sin pli bone regante –; mi ne estas impresita, kiel vi kredas, kaj

tio estas des pli vera, ĉar, pro lia simpla, ĉarma originaleco, mi rekonas ĉe li neniajn supernaturajn privilegiojn, kaj mi pensas, ke la klereco de la Imperio klarigos la jenan fakton, kiun mi rakontos, responde al via nuna demando.

“Mi ne scias, ĉu vi konas Koponion, maljunan centestron, servantan en la urbo, kiun mi menciis; tamen mi devas sciigi vin pri fakto kiun mi mem ĉeestis. Post kiam la voĉo de la Nazareta profeto estigis ian dolĉan kvietecon en la medio, mia konato prezentis al li sian fileton mortantan kaj petis karitan helpon je la agonianta infano. Mi vidis, ke la profeto levas siajn radiajn okulojn al la ĉielo, laŭŝajne petante la benon de niaj dioj, kaj, poste, ke liaj manoj tuŝas la infanon; tiam, kvazaŭ ricevinte ian fluon da nova vivo, la infano subite ekstaris kaj, plorante, kuris al la patra kareso, turninte al la profeto longan dankan rigardon...”

– Sed, ĉu eĉ centestroj jam lasas sin treni de babiladoj de la Judoj? Mi devas komuniki tiujn faktojn al la aŭtoritatuloj en Tiberias – diris la provincestro kun videbla kolereto.

– La okazaĵo estas kurioza – diris Publio Lentulus, impresita de la rakonto.

– Sed vere, mia amiko – kontraŭparolis Pilato, sin turnante al li –, en ĉi tiu regiono naskiĝas religioj ĉiutage. Ĉi tiu popolo estas tre masama ol nia, kaj oni konstatas ĉe ili videblan mankon de rezonemo kaj praktika saĝo. Provincestro, ĉi tie, ne povas lasi sin kapti de figuroj, sed devas tenadi rigidaj la principojn, por gardi la netuŝeblan suverenecon de la regno. Tial, obeante la saĝajn ordonojn el Romo, mi ne ekzamenas izolajn aferojn, sed konsideras nur la parolon de la pastroj de la Sinedrio, kiuj reprezentas la organon de la legitima povo, kapabla trovi, kun ni, la solvon de ĉiuj sociaj kaj politikaj problemoj.

Publio kontentiĝis per tiu argumento, sed la ĉeestantaj sinjorinoj, escepte de Fulvia, ŝajnis funde impresitaj de la priskribo de Sulpico, inkluzive la malgrandan Flavian, kiu sorbis liajn vortojn kun la plej granda infana scivolo.

Ia vualo da zorgoj ombris la gajecon de ĉiuj alestantoj, sed la provincestro ne akordis pri tia sinteno kaj ekkriis:

– Fi! Liktoro, kiu, anstataŭ fari justecon por nia bono, agas kontraŭ ni mem, malheligante nian gajan medion, ja meritas serevan punon pro siaj neĝustatempaj rakontoj!...

Ridado de ĉiuj sekvis liajn bruajn kaj spritajn vortojn, dum li finis:

– Ni malsupreniru al la ĝardeno, por aŭdi novajn muzikaĵojn kaj tiel elsarki el la koro tiujn neatenditajn ĉagrenojn.

La propono estis volonte akceptita de ĉiuj.

La domomastrino kuŝigis la malgrandan Flavian en komforta ĉambro, kaj en nemultaj minutoj la ceteraj personoj disiĝis laŭ tri grupoj tra la aleoj de la ĝardeno heligata de brilaj torĉoj, sub la sono de strangaj kaj voluptaj muzikaĵoj.

Publio kaj Klaŭdia paroladis pri la pejzaĝo kaj la Naturo; Pilato multigis ĝentilaĵojn al Livia; Sulpicio promenadis kun Fulvia, kaj la pretoro Lentulus decidis resti en la arkivo ekzamenante kelkajn artverkojn.

Intence deturniĝinte de la ceteraj grupoj, la provincestro rimarkis la palecon de sia kunulino, kiu, en tiu

nokto, ŝajnis al li pli hela kaj alloga.

La respekto, kiun ŝia diskreta beleco trudis al lia animo, kvazaŭ pligrandigis, en tiu momento, la ardecon de lia pasia koro.

– Nobla Livia – li emociita ekkriis –, mi ne povas kaŝi plu la sentojn, kiujn viaj tiel belaj virtoj en mi flamigis. Mi ja konas la naturan senton de abomeno de via digna animo ĉe miaj vortoj, sed mi bedaŭras, ke vi ne komprenas mian koron, tuŝitan de tiu min reganta admiro!

– Ankaŭ mi – rebatis la kompatinda sinjorino, kun spontaneaj digno kaj energio – bedaŭras, ke mi inspiris al via spirito tian pasion. Viaj vortoj min amare surprizas ne nur tial, ke ili venas de patricio grave respondeca kiel ŝtata prokuroro, sed ankaŭ pro la konfida kaj nobla amikeco de mia edzo al vi.

– Sed, rilate aferojn de koro – li afable interrompis – neniom povas valori la formalajoj de la politikaj konvencioj, eĉ la plej altaj. Mi komprenas miajn devojn kiel ion plej ŝatindan, kaj scias serĉi la solvon de ĉiuj problemoj koncernantaj min, sed mi ne memoras, kie mi iam vidis vin! Ia vero estas, ke jam de unu semajno, mia koro estas disŝirita, premata... Kiam mi renkontis vin, ŝajnis, ke staras antaŭ mi tiu amata, neforgesita figuro. Mi ĉion faris, por eviti ĉi tiun malagrablan kaj suferigan scenon, sed mi konfesas, ke ia nevenkebla forto konfuzas al mi la koron!

– Vi eraras, sinjoro! Inter ni nenia alia ligilo povas ekzisti, ol tiu inspirita de la respekto por la identeco de niaj sociaj kondiĉoj. Se vi tiel alte taksas viajn politikajn devojn, ne forgesu, ke politikisto devas zorgi la virtojn de sia privata vivo, nutrante, en si mem, la respekton kaj la nekorupteblecon de sia konscienco.

– Sed via persono igas min forgesi ĉiujn tiujn devojn. Kie do mi iam vidis vin, ke mi sentas min tiel kaptita?

– Silentu, pro la dioj! – murmuris Livia, timplena kaj pala. – Mi neniam vidis vin antaŭ mia alveno al Jerusalemo, kaj mi petas vian noblecon ŝpari al mi tiajn aludojn, kiuj min turmentas! Mi havas motivojn por kredi vian geedzan feliĉon ĉe honesta, pura virino, kia mi vidas ŝin, kaj mi rigardas kiel frenezaĵon la proponojn, kiujn viaj vortoj apenaŭ kaŝas...

Pilato estis daŭrigonta sian argumentadon, sed la kompatinda sinjorino, amare surprizita, sentis, ke ŝi svenos. Vane ŝi streĉis siajn fortojn, por eviti la senkonsciigon.

Posedita de stranga malvigliĝo, ŝi apogis sin al arbo de la ĝardeno, kie okazis la interparolado, kiun ni ĵus aŭdis. Timante la sekvojn de tio, la provincestro ekprenis ŝian delikatan manon, turmentate de siaj malnoblecaj pensoj, sed, ĉe lia milda kontakto, ŝajnis, ke la organismo de Livia reagis decide kaj kun nerompebla firmeco.

Revigliĝinte, ŝi preskaŭ nepercepteble dankis lin per la kapo; Publio kaj Klaŭdia tiam alproksimiĝis, kaj refariĝis la gaja interparolado de ĉiuj.

Sed la sceno, kiun naskis la korelverŝado de la provincestro, ne restis konata nur al la du personoj, kiuj ĝin intense travivis. Fulvia kaj Sulpicio sekvis ĉiujn ĝiajn detalojn tra inter la mallumaj branĉoj.

– Be! – ekkriis la liktoro al sia kunulino, observante la detalojn de la ĵus preparolita konversacio. – Ĉu vi do perdis la favoron de la prokuroro de Judujo?

Ĉe tiu demando Fulvia, kiu siavice ne deturnis de la sceno la okulojn, konvulsie tremetis, kun la plej profunda sento de ĵaluzo kaj kolero.

– Ĉu vi ne respondas? – daŭrigis Sulpicio, plezurante ĉe tiu sceno. – Kial vi tiel obstine forpuŝas min, se mi havas por vi profundan senton de sindono kaj lojaleco?

Ŝi tamen silentis plu, en sia observejo, kaj bolis de kolero, vidante, ke la provincestro tenas inter la siaj la senfortan manon de sia kunulino kaj al ĉi tiu diras vortojn kiujn ŝi, Fulvia, ne aŭdis, sed kiujn ŝiaj malnoblaj sentoj kredis realaj en tiu neatendita interparolado.

Sed, tuj kiam Klaŭdia kaj Publio eniris en la scenejon, Fulvia sin turnis al sia kunpromenanto kaj flustris per kaverna voĉo:

– Mi kontentigos ĉiujn viajn dezirojn, se nur vi helpos min en unu faro.

– Kio ĝi estas?

– Tio, ke vi, en oportuna okazo, sciigu la senatanon pri la malfideleco de lia edzino.

– Sed, kiel?

– Unue, evitu, ke Publio transloĝiĝu al Nazaret, por ke ŝi estu pli malproksime; tiel la rilatoj inter Livia kaj la provincestro estos pli malfacilaj, kiam Pilato forestos de Jerusalem, ĉar mi antaŭvidas, ke ŝi deziras baldaŭ vivi en Nazaret. Poste, mi persone klopodos, por ke vi estu elektita, por protekti la senatanon dum ties ripozotempo; en tiu ofico, vi direktos la okazaĵojn por la efektivigo de niaj planoj. Post tio mi scios rekompenci viajn ĉiamajn penojn kaj bonan servadon per mia absoluta sindono.

La liktoro silente, sendecide aŭdis la proponon; sed ŝi, laŭŝajne dezirante elfini lla pereigan interligon, firmtone demandis:

– Ĉio konsentita, ĉu ne?

– Jes, konsentita! – respondis Sulpicio, jam fine decidiĝinta.

Kaj, sigelinte sian fian kontrakton, la du personiĝoj de la malamo kaj de la volupto alkolektiĝis al la frata rondo, sub la masko de la ŝajnaj ĝojoj.

La lastaj horoj estis destinitaj al la adiaŭoj, kun la ekstera afableco de la sociaj konvencioj.

Livia sin detenis kaj ne sciigis sian edzon pri la ĝena okazaĵo en la ĝardeno konsidere ne nur al lia bezono de ripozo, sed ankaŭ al la socia graveco de la koncernataj personoj; kaj tial ŝi promesis al si mem ĉiamaniere eviti ian malpli konvenan esprimon, kiu alportus skandalon pro vortoj.

IV - EN GALILEO

En la tago post tiuj okazaĵoj, frumatene, Publio Lentulus akceptis, en sia privata kabineto, la viziton de

Fulvia, kiu alparolis lin per jenaj vipuraj vortoj:

– Senatano, la supera forto de niaj familiaj rilatoj devigis min veni al vi, por pritrakti malagrablan, doloran aferon; sed, laŭ mia sperto de virino, mi devas konsili al vi gardi vian edzinon kontraŭ la insido de viaj amikoj mem, ĉar mi hieraŭ surprizis ŝin en intima konversacio kun la provincestro...

Ŝia dialoganto estis surprizita de tiu stranga, maldelikata sinteno, kontraŭa al lia konduto de honesta homo.

Li digne forpuŝis tiun atakon kaj defendis sian edzinon, kies noblecon li plej laŭdis; tiam, Fulvia plendetale kaj kun la plej vivaj koloroj de sia nenormala imagemo ekrakontis al li la antaŭtagan scenon.

La senatano falis en enpenŝiĝon, sed havis la moralan kuraĝon, por forpuŝi la kalumnion.

– Nu – ŝi diris, finante la denuncon –, tro malproksime vi portas vian konfidon kaj naivecon. Iu viro neniam ion perdas, aŭdante la konsilojn de la virina sperto. La pruvon, ke Livia sekvas la larĝan vojon de la devodekliniĝo, vi baldaŭ havos, ĉar ŝi preferos tuj foriri al Nazaret, kie la provincestro penos renkonti ŝin.

Kaj ĉi tion dirinte, ŝi rapide eliris kaj lasis la senatanon konfuza kaj afekciita, pensanta pri la malŝatindaj koroj, lin ĉirkaŭantaj, ĉar, en la tribunalo de sia konscienco, li ne inklinis akcepti ian penson, kiu makulus la altan noblecon de lia edzino.

Ia grandega ombro vualis lian senteman, amantan spiriton. Li sentis, ke en Jerusalemo ĉiuj pereigaj fortoj de lia destino konspiras kontraŭ li kaj ke ekzistas ia vasta dezerto en lia koro.

Tie li ne trovos la saĝan, kuraĝigan parolon de iu amiko, kiel Flaminio, al kiu li povus malkaŝi sian profundan ĉagrenon.

Dronante en tiu korporea meditado, li ne rimarkis, ke la petaloj de horoj senĉese turniĝadas en la kirlovento de la tempo. Nur post tre longa tempo li rimarkis la laŭtan voĉon de unu el siaj fidintaj servistoj, kaj tiam li eksciis, ke Sulpicio Tarkvinio petas de li konfidencan rendevuon, kion li plej volonte konsentis.

Enlasite en la kabineton, la liktoro sciigis, sen ĉirkaŭfrazoj, la celon de sia vizito kaj senembarase diris:

– Senatano, honorite per via konfido, koncerne vian transloĝiĝon al iu ripozoloko, mi venas, por proponi al vi la luadon de riĉa bieno, apartenanta al unu el niaj sampatrujanoj, en la ĉirkaŭaĵo de Kapernaŭm, ĉarma urbo en Galileo, sur la vojo al Damasko. Estas vere, ke vi jam elektis Nazareton, sed sur la ebenaĵo de Esdraelon la komfortaj domoj estas tre maloftaj; cetere, vi multe elspezus por plibonigoj kaj reformoj. En Kapernaŭm okazas malsame: mi havas tie amikon, Kajon Gratus, kiu estas preta luigi por nedefinita tempo sian bonegan vilaon; ĝi estas bieno provizita per ĉia komforto, kun riĉaj fruktoĝardenoj, en tute kvieta regiono.

La senatano aŭdadis la komisiiton de Pilato, sed laŭŝajne lia spirito ŝvebis aliloke; ĉe unu momento, kvazaŭ lia atento subite vekigis, li diris, kiel iu faranta konsiderojn al si mem:

– De Jerusalemo ĝis Nazaret estas distanco de sepdek mejloj... Kie kuŝas Kapernaŭm?

– Tre malproksime de Nazaret – respondis liktoro kun malica intenco.

– Bone, Sulpicio – respondis Publio, kiel iu, kiu prenis firman decidon –, mi estas al vi tre danka pro via komplezo, kiun mi ne forgesos taŭgatempe rekompenci. Mi akceptas vian proponon, kiun mi opinias saĝa, ankaŭ tial, ĉar ne povas ja interesi min la definitiva aĉeto de iu domo en Galileo, pro la bezono baldaŭ reveni al Romo. Mi rajtigas vin elfari la kontrakton, ĉar mi fidas je viaj informoj kaj je via sperto en tiaj aferoj.

Ia sekreta kontenteco travidiĝis tra la okuloj de Sulpicio, kiu adiaŭis la senatanon kun hipokrita dankmondo.

Publio Lentulus denove apogis la kubutojn sur la tablon, dronante en profunda melankolio.

Tiu propono de Sulpicio ja alvenis en la ĝusta momento, kiam Publio baraktadis en sufoka meditado, ĉar ĉe tiu nova decido, li sukcesos loki sian familion ekster ĉia influo de la hejmo de la prokuroro de Judujo, kaj tiel li gardos sian reputacion kontraŭ la abomenaj vomajoj de la klaĉuloj.

Sed la denunco de Fulvia vekis en lia animo sinsekvajn zorgojn. Ĉu pro la neatenditeco de la kalumnio, ĉu pro la maliceco, kun kiu la kalumnio estis teksita, lia penso enretiĝis en maltrankviligaj antaŭvidaĵoj.

Je la vespero de tiu tago, post la manĝo, jen li estis nur kun Livia, sur la teraso de la hejmo de la pretoro, kiu eliris por kelkaj horoj, kune kun siaj gefamilianoj, por plenumi iujn sociajn formalajojn.

Rimarkinte sur lia vizaĝo la evidentajn signojn de profundaj ĉagrenoj, lia ekzino abrupte diris, kun la ĉarma intimeco de sia virina koro:

– Mia kara, afliktas min vidi vin tia, klinita sub tiaj grandaj ĉagrenoj, kaj tamen ĉi tiu longa vojaĝo devus redoni al ni la trankvilecon necesan al la plenumado de viaj taskoj... Mi permesas al mi peti, ke vi akcelu nian translokiĝon for de Jerusalemo al ia pli kvieta medio, kie ni sentus nin pli izolitaj, ekster ĉi tiu rondo de homoj, kies kutimoj estas malsamaj ol la niaj kaj kies sentojn ni ne konas. Kiam do ni foriros al Nazaret?

– Al Nazaret? – ripetis la sanatano kun kolera, malluma voĉo, kvazaŭ lin tuŝis la venena spirito de ĵaluzo, kaj pretervole memorante la senbazajn akuzojn de Fulvia.

– Jes – daŭrigis Livia, per petega, karesa tono –; ĉu tiu ja ne estis la hieraŭ proponita aranĝo?

– Vere, mia kara! – ekkriis Publio, rekonsciiĝinte kaj jam pentante pro la malicaj pensoj, kiujn li dum momento tenis –; tamen, alie ol nia lasta interkonsento, mi poste decidis, ke ni loĝu en Kapernaŭm.

Kaj, prenante la manon de sia edzino, kvazaŭ serĉante ian balzamon por sia vundita animo, li milde flustris:

– Livia, vi estas ĉio, kio restas al mi en ĉi tiu mondo! Niaj infanoj estas floroj el via animo, kiujn la dioj donis al ni por mia ĝojo! Pardonu min, kara! Jam de tiel longe mi vivas absorbita kaj malgaja, forgesante vian senteman, kareseman koron! Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi nun vekigis el tre dolora, profunda dormo, sed mia animo estas timoplena kaj subpremita. Ĉirkaŭvagas min amaraj antaŭsentoj... Mi timas perdi vin, kaj tamen mi ja volus fermi vin en la brusto, tenadi vin en la koro por eterne... Pardonu min!

Dum ŝi lin rigardadis, surprizita, liaj soifaj lipoj kovradis ŝiajn manojn per ardaĵoj; kaj ne nur la ardaĵoj venis kun tiu amelverŝiĝo: larmo ruliĝis el liaj okuloj kaj miksiĝis kun la floroj de lia pasio.

– Kion tio signifas, Publio? Ĉu vi ploras? – ekkriis Livia kortuŝita kaj afliktita.

– Ho! Mi sentas, ke la genioj de malbono ĉirkaŭpremas al mi la koron kaj la menson. Mia internaĵo estas plena de ombroj, signantaj la finon de nia feliĉo; mi tamen estas viro kaj fortanima... Mia kara, ne rifuzu al mi vian manon, por ke ni kune laŭiru la vojon de la vivo, ĉar, kun vi, mi venkos eĉ la neblon mem!

Ŝi ekremis ĉe tiuj vortoj, kiuj ne estis kutimaj al li.

En palpebruma daŭro ŝi revenis en penso al la antaŭa vespero kaj rememoris la trokuraĝon de la provinestro, kiun ŝi digne repuŝis; ĉe la aflikto de sia edzo, ŝi sentis absolutan trankvilecon de konscienco, kaj, milde prenante lian manon, kondukis lin al angulo de la teraso, kie ŝi eksidis ĉe sonora malnova harpo; tiam, ŝi mallaŭte kantis, kvazaŭ ŝia voĉo, en tiu vespero, estus la trilado de ia vundita alaŭdo:

Anim' ĝemela de l' mia,

De mia vivo lumfloro,

Falinta stel' de la koro

De l' bela spaco sen fin'.

Dum mi vagadis tra l' mondo,

Malgaja ombro tutsola,

Jen vi kun rido konsola,

Feliĉa mi sentis min!

Vi venis kun ben' de l' dioj,

Je lumo sur vojo riĉa,

Por fari min plej feliĉa,

De via kor' ĉe la flam'!

Karega mia trezoro,

Kun vi mi vivos sur Tero;

Vi mia estas l' espero,

Por mi vi estas – la am'!

Tio estis komponaĵo, kiun li, kiel junulo, dediĉis al ŝi, laŭ la gusto de la Roma junularo, kaj kiun ŝia muzika talento gardadis por specialaj momentoj de ŝia sento.

Sed ĉe tiu momento ŝia voĉo havis aliajn nuancojn, kvazaŭ en ŝia gorĝo estus ia dia silvio, ekzilita el la helaj kamparoj de Paradizo.

Ĉe la lasta noto, plena de malĝojo kaj angoro, Publio ŝin milde prenis al la brusto, forte kaj decide, kvazaŭ li volus por ĉiam tenadi en la koro sian juvelon de neimagebla pureco.

Nun Livia abunde ploradis en la brakoj de sia edzo, kiu ŝin senĉese kisis kun la entuziasmo de sia lojala, iafoje impulsiĝema, animo.

Post tiu ekzaltiteco, Publio sentis sin senpezigita kaj kontenta.

– Kial ni ne revenu plej baldaŭ al Romo? – demandis Livia, kvazaŭ ŝian spiriton heligus profetaj lumoj pri la venontaj tagoj. – Ĉe niaj infanoj ni reprenus niajn ordinarajn okupojn, sciante, ke lukto kaj sufero estas ĉie kaj ke ĉia ĝojo signifas, en ĉi tiu mondo, benon de la dioj!

La senatano konsideris la proponon de sia edzino, pesante en sia animo la tutan situacion, kaj fine rimarkigis:

– Via propono estas justa kaj saĝa, mia kara, sed, kion dirus niaj amikoj, eksciinte, ke post tiom da penoj por ĉi tiu vojaĝo, ni decidis resti nur unu semajnon en tia malproksima regiono? Kaj nia malsana filineto? Ĉu ŝia organismo ja ne reagus sukcese en la nova klimato? Ni fidu kaj estu trankvilaj. Mi plifruigos nian foriron al Kapernaum kaj baldaŭ ni estos en nova medio, laŭ niaj deziroj.

Tiel ja okazis.

Kontraŭstarante la pereigajn vibrojn de tiu medio, Publio Lentulus faris la necesajn paŝojn por la solvo de ĉiuj problemoj, koncernantaj ilian transloĝiĝon, sen ia atento al la pikantaj vortoj de Fulvia; siaflanke, Livia, uzante kiel ŝildon la superecon de sia animo, izoliĝis en la malgranda dolĉa mondo de siaj du amataj infanoj kaj evitis la provincestron, kiu ne ĉesigis siajn flatojn al ŝi kaj ĉe kiu la nobla figuro de Klaŭdia vekis en ĉiuj sinceran simpatian.

Intencante transloĝiĝi al Kapernaum, la geedzoj dungis du servistinojn; tiuj ne estis nepre necesaj al la hejma servado, ĉar multaj servistoj estis kunvenigitaj el Romo; tamen la senatano ekzamenis la utilecon de ilia dungado, ĉar li kaj lia familio bezonos pli rektan kontakton kun la moroj kaj dialektoj de la popolo, kaj la servistinoj konis Galileon.

Anna kaj Semele, rekomenditaj de amikoj de la pretoro, estis, kun bonvolemo kaj simpatio, akceptitaj de Livia en la servadon al ŝi.

Tridek tagoj pasis en preparado de la planita vojaĝo.

Stimulite de siaj propraj materialaj intereso, Sulpicio Tarkvinius ne preterlasis la okazon kapti la tutan konfidon de la senatano: li aranĝis la bienon plej zorge kaj ĝentile, kaj tial ricevis de ĉiuj esprimojn je kontenteco kaj laŭdon.

Unu tagon, antaŭ sia foriro, Publio Lentulus iris al la kabineto de Pilato, por la adiaŭa danko. Kore

salutinte lin, la provincestro diris, kun ĝenateca bonhumoro:

– Mi bedaŭras, kara amiko, ke la cirkonstancoj kondukas vin al Kapernaum; mi esperis, ke mi havos la plezuron restigi vin proksime de mia dono, en Nazaret. Sed, dum vi estos en Galileo, anstataŭ viziti, kiel ordinare, Tiberiason (*), mi direktos min norden, por ke ni estu kune.

(*) Tiberias: urbo de Palestino. Vd. en Johano, 6 kaj 21. – La Trad.

Publio esprimis al li sian dankon, kaj, kiam la senatano pretiĝis por foriri, la prokuroro de Judujo daŭrigis, per amika, konsila tono:

– Senatano, ne nur kiel respondanto por la situacio de miaj sampatrujanoj en ĉi tiu provinco, sed ankaŭ kiel sincera amiko, mi ne povas permesi al mi, ke vi foriru laŭ la kaprico de la hazardo, sole nur kun sklavoj kaj fidindaj servistoj. Mi ĵus komisiis Sulpicion, kiu havas mian plenan fidon, por direkti la sekurecozorgojn, kiujn vi rajtas. Krom li, ankaŭ unu liktoro kaj kelke da centestroj iros al Kapernaum, kie ili restos sub viaj ordonoj.

Publio ĝentile dankis kaj sentis sin feliĉa pro tia afero, kvankam la ĉeesto de la provincestro ne estis por li tre simpatia.

Fine, kiam estis pretaj la aranĝoj por la vojaĝo, la densa karavano ekmarŝis kaj trairis la teritoriojn de Jehuda kaj la verdajn montarojn de Samario, direkte al sia celo.

Kelkajn tagojn postulis la irado laŭ vojoj, multfoje

kurantaj flanke de la rapida, klara akvo de Jordano.

Proksime de Kapernaum, je triono de mejlo for de la vojo, meze de foliriĉaj arboj, apud la lago Genesaret, impona bieno atendis niajn konatojn, kiel ties ripozejo.

Sulpico Tarkvinius plej klopodis pri ĉiaj plej malgrandaj detaloj, laŭ la rafinita gusto de la epoko.

La bieno situaciis sur altaĵeto kaj estis ĉirkaŭita de fruktarboj de la malvarmaj klimatoj, ĉar, antaŭ du mil jaroj, Galileo, hodiaŭ fariĝinta polvoplana dezerto, estis ia paradizo el kreskaĵoj. En ĝiaj mirindaj pejzaĝoj disvolviĝadis ĉiaklimataj floroj. Ĝia grandega lago, naskita de la pura akvo de la sankta rivero de Kristanismo, estis eble la plej fiŝhava baseno en la tuta mondo; kaj la kvietaj kaj mole fluantaj ondoj de tiu lago milde disŝaŭmiĝis ĉe la trunkoj de la sukriĉaj arbustoj, kies radikoj sorbis la akran parfumon de la oleandroj kaj de la sovaĝaj floroj. Densaj nuboj da ĉarmaj birdoj kovris tiun mirinde lazuran akvon, hodiaŭ ĉirkaŭfermitan inter senarbaj, varmaj rokoj.

Norde, la neĝokovritaj suproj de Ĥermon konturiĝis laŭ gajaj blankaj linioj; okcidente, estis vidataj la altaj ebenaĵoj de Gaŭlanitida kaj Perejo, envolvitaj en la sunlumo kaj kune formantaj etendaĵon, irantan de Cezarea Filipi direkte al sudo.

Mirinda kaj unika vegetaĵaro, kiu kaŭzis la senĉesan blovadon de la plej pura aero, moderigis la varmecon de la regiono, kie la lago hodiaŭ kuŝas, multe sub la nivelo de Mediteraneo.

Publio kaj lia edzino sentis ian ondon da nova vivo, kiun iliaj pulmoj larĝe enspiradis.

Tio tamen ne okazis al la malgranda Flavia, kies sanstato fariĝis treege pli grava, kontraŭ ĉia atendo.

Pliakriĝis la vundoj kovrantaj ŝian malgrasan, deliktatan korpon, kaj la kompatinda infano jam ne povis elrampi el la lito, kie ŝi restadis profunde malvigligita.

Tial pliintensiĝis la aflikto de ŝia patro, kiu vane provis ĉiajn rimedojn, por plibonigi la situacion de la malsanulino.

Estis jam pasinta unu monato en Kapernaum, kie, en pli rekta kontakto kun la dialektoj de la popolo, ne estis al ili nekonata la famo pri la agoj kaj predikoj de Jesuo.

Aŭdante ian sekretan voĉon de sia koro, Publio tre ofte ekdeziris paroli al la miraklisto, por peti lian helpon por la infano. Li tamen konfesis al si mem, ke tio estus humiliĝo de lia socia kaj politika pozicio, en la okuloj de la plebanoj kaj vasaloj de la Imperio, kaj li ekzamenis la eblajn sekvojn de tia konduto.

Malgraŭ tiuj konsideroj, li permesis al multaj servistoj de sia hejmo ĉiusabate aŭdi la predikojn de la Nazareta Profeto, eĉ al Anna, kiu plej respektate estimis tiun homon, kiuj la malaltklasaj nomis Majstro.

Pri tiu la sklavoj teksadis la plej ĉarmajn historiojn, en kiuj la senatano vidis nenion alian, ol instinktajn impulsojn de la popola animo, kvankam ja lin mirigis la favora opinio de tia homo, kiel Sulpico.

Sed unu posttagmezon la suferoj de la knabino atingis sian apogeon. Krom la vundoj, kiuj, jam de pluraj jaroj, pli kaj pli multiĝis sur ŝia gracia korpo, aliaj malfermiĝis sur la iam violkolora epidermo kaj ŝanĝis la delikatajn organojn en ian vivan pustulon.

Publio kaj Livia, konsternite, atendis baldaŭan elfiniĝon de ŝia vivo.

En tiu tago, post tre simpla vespermanĝo, Sulpicio restis ĝis pli malfrue, pretekstante kuraĝigi la senatanon per sia ĉeesto. Tiam, jen ili sur la vasta teraso, kie Publio sin turnis al Sulpicio kun ĉi tiuj vortoj:

– Mia amiko, kion vi diras al mi pri tiuj famoj, ĉi tie diskonigataj, koncerne la profeton el Nazaret? Mi ordinare ne atentis la malsaĝan parolon de la popolamaso, sed mi volonte aŭdus denove viajn impresojn pri tiu eksterordinara viro.

– Ho, jes! – diris Sulpicio, kiel iu, kiu penus rememori ion –; impresite de tiu sceno, kiun mi antaŭ kelka tempo ĉeestis kaj kiun mi havis okazon rakonti en la domo de la provincestro, mi ĉiamaniere klopodas, por sekvi la paŝojn de tiu viro, tiel bone, kiel ebligas al mi la tempo, pri kiu mi disponas.

“Kelkaj el niaj sampatrujanoj rigardas lin kiel ian viziulon; tian saman opinion mi havas en rilato al liaj predikoj, plenaj de nekompreneblaj paraboloj, sed ne rilate al liaj faroj, kiuj tuŝas al ni la koron.

“La popolo de Kapernaum estas ravita de liaj mirakloj, kaj mi povas aserti al vi, ke ĉirkaŭ li jam ekzistas kolekto da sindonaj disĉiploj, pretaj lin ĉien sekvi.”

– Sed, kion do li instruas al la popolamaso? – demandis Publio interesita.

– Li predikas principojn, kiuj vundas niajn plej malnovajn tradiciojn, kiel, ekzemple, la doktrino pri amo eĉ al malamikoj kaj la absoluta frateco inter ĉiuj homoj. Li admonas la aŭdantojn strebi al la regno de Dio

kaj al ties Justeco, sed tiu ne estas Jupitero, la ĉefo de niaj dioj; kontraŭe, li parolas pri iu pardonema kaj kompatema Dio, kiu sekvas nin el Olimpo kaj al kiu estas plene konataj niaj plej sekretaj pensoj. Aliajn fojojn la Nazareta profeto parolas pri tiu ĉiela regno per kuriozaj kaj nekomprenblaj apologoj, en kiuj ekzistas reĝoj kaj princoj, kreitaj de lia revema imagovo kaj kiuj neniam povus ja ekzisti.

“Sed plej malbone estas – finis Sulpicio, emfazante siajn vortojn – ke tiu stranga viro, per tiuj principoj pri ia nova regno, prenas, en la popola menso, aspekton de ia princo, aperinta por postuli prerogativojn kaj rajtojn de la Judoj, super kiuj li eble iam volos regi...”

– Kian disponon faras la aŭtoritatuloj en Galileo, ekzamenante tiujn revoluciajn ideojn? – demandis la senatano, kun kreskanta intereso.

– Jam aperas la unuaj elmontroj de reago, fare de la homoj pli ligitaj al Antipas. Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi estis en Tiberias, mi rimarkis, ke naskiĝas ĉe iuj grupoj la opinio, ke la altaj aŭtoritatuloj devus zorge esplori tiun aferon.

– Oni do vidas – diris la senatano – ke li estas nura pleba viro, kiun la fanatikeco, reganta en la Judaj temploj, ŝveligis per aspiroj je nepravigeblaj postuloj. Mi opinias, ke la administra aŭtoritatulo bezonas nenion timi el tia predikanto, kiu rekomendas humilecon kaj fratecon, nekonsentajn kun la nuntempa homa evolucio. Aliflanke, aŭdante el via buŝo la priskribon de liaj agoj, mi sentas, ke tiu viro ne povas esti ia vulgarulo, kiel ni pensas.

– Ĉu vi dezirus koni lin pli intime? – demandis Sulpicio komplezeme.

– Tute ne! – respondis Publio, afektante superecon. – Tia konduto rompus la dignon de la devoj, kiujn mi havas kiel politikisto, kaj mia aŭtoritato ĉe la popolo pereus. Cetere, mi opinias, ke la pastroj kaj la predikantoj en Palestino devus pasigi kelkan tempon da laboro kaj studado en la sidejo de la imperia registraro, por ke estu rebakita tiu emo al profeteco, ĉi tie trovata en ĉiuj lokoj. Kontakte kun la progreso de Romo, ili certe reformus siajn konceptojn pri la vivo, la socio, la religio kaj la politiko.

Dum la du sinjoroj tenas ĉi tiun konversacion pri la persono kaj la instruoj de la Nazareta majstro, ni eniru en la domon.

En la ĉambro de la malsana knabino Livia kaj Anna flegas la vundojn, kiuj kovras ŝian epidermon kaj kiuj fariĝis unu sola ulcero sur la tuta korpo.

Anna, milda kaj komplezema koro, iom pli aĝa ol la mastrino, estis nun preferata kunulino en la rondo de ŝiaj hejmaj okupoj. En tiu senkora medio, la sentema animo de Livia trovis en tiu inteligenta, amika servistino ian oazon por la ĉiutagaj konfidencoj kaj afliktoj.

– Ha, sinjorino – ekkriis la servistino, kun sincera intereso, kiu vidiĝis tra ŝiaj okuloj kaj gestoj –, mi tenas en la koro profundan fidon al la mirakloj de la Majstro kaj eĉ kredas, ke, se ni portus ĉi tiun infanon al la beno de liaj manoj, la vundoj malaperus kaj ŝi revigliĝus por via patrina amo... Kiu scias?

– Bedaŭrinde – respondis Livia per serioza, malgaja tono – mi ne kuraĝus proponi tion, ĉar mi ja scias, ke Publio ĝin ne aprobus pro nia socia pozicio; sed, sincere, mi dezirus vidi tiun kariteman, eksterordinaran viron, pri kiu vi tiel ofte parolas.

– En la ĵus pasinta sabato, sinjorino – respondis la servistino, kuraĝigita de la vortoj de simpatio, kiujn ŝi ĵus aŭdis – la profeto el Nazaret prenis en siajn brakojn multe da infanoj.

“Ni lin amase atendis, venintan el la ŝipeto de Simon, por aŭdi liajn konsolajn instruojn. Ni kuris al li, avidante ricevi samtempe la sanktajn emanaĵojn (*) el lia kuraĝiga ĉeesto; sed, en tiu tago, multo da patrinoj iris al la prediko kun siaj infanoj, kiuj intermiksiĝis kaj kriegadis, kvazaŭ ia bando da senkonsciaj birdetoj. Simon kaj aliaj disĉiploj komencis riproĉi la infanojn, por ke ni ne perdu la dolĉan ĉarmon de la vortoj de la Majstro; sed, kontraŭ nia atendo, jen li eksidis sur la kutiman ŝtonon kaj diris kun neesprimebla mildeco: “Lasu la infanojn veni al mi, ĉar el tiaj estas la regno de Dio”. Fariĝis tiam miriga silento ĉe la homoj de Kapernaum kaj la pilgrimantoj venintaj el Korazin kaj Magdala; dume, tiuj petolemaj geknaboj kuris al lia ama brusto kaj kun nepriskribebla gajeco kisis lian tunikon.

(*) En sia traduko “La Evangelio laŭ Spiritismo” nia klera samideano Ísmael Gomes Braga alprenis la vorton “emanaĵo” por esprimi ian “fluon”, kiu iras de unu persono al alia, simile al la eretoj disĵetataj de la radiumo. Tiun radikon, laŭ ĉi tiu senco, mi plene aprobas, uzas kaj rekomendas. – La Trad.

“Multaj estis la malsanaj infanoj, kies patrinoj ilin kondukis al la predkoj ĉe la lago, por ke ili resaniĝu el malsanoj kronikaj aŭ konsiderataj nekuraceblaj...”

– Tio, kion vi rakontas al mi, havas edifan belecon – ekkriis Livia profunde emociita –; sed, posedante ĉiajn materialajn rimedojn, mi sentas, ke mi ne povos ricevi la altajn bonfarojn de via Majstro.

– Tio estas bedaŭrinda, sinjorino, ĉar multaj altrangaj virinoj akompanas lin en la urbo. Ne nur la malaltklasaj homoj, kiel ni, aŭdas liajn predikojn, sed ankaŭ multaj sinjorinoj, okupantaj gravan pozicion en Kapernaum, edzinoj de ŝtatoficistoj ĉe Herodo kaj de impostistoj, ĉeestas la dolĉajn lecionojn ĉe la lago, miksite kun la malriĉuloj kaj la sklavoj. La profeto forpuŝas nenium; ĉiujn li invitas al la regno de Dio kaj al la Dia justeco. Malsame ol ĉiuj ĉielaj senditoj, kiujn ni konas, li evitas la favoritojn de la sorto kaj havas amikajn rilatojn kun la plej malfeliĉaj homoj, ĉar li rigardas ĉiujn kiel fratojn tre amatajn de lia koro...

Livia atente kaj ravite aŭskultadis la vortojn de sia servistino. La figuro de tiu fama, bonkora homo strange altiris ŝian spiriton. Kaj, dum ŝiaj grandaj okuloj esprimis la plej altgradan intereson por la ĉarma kaj simpla rekonto de la lojala servistino, la du virinoj ne rimarkis, ke la malsana knabino sekvas ilian konversacion kun arda scivolemo, propra al la infanaj animoj, malgraŭ la alta febro, konsumanta ŝian organismon.

En tiu momento, la senatano, post la adiaŭo de Sulpicio, iris al la ĉambro de sia malsana filineto, pelite de sia patra zorgo.

Antaŭ li la virinoj eksilentis kaj sin dediĉis nur al la aferoj, ilin tenantaj ĉe la lito de la infano, kiu nun dolore ĝemadis.

Publio Lentulus, kun larmoplenaj okuloj, klinis sin super la lito de sia filino. Li ludis kun ŝiaj velkintaj, vunditaj manetoj kaj ilin karesis, kun la koro tuŝita de grandega amareco.

– Filineto, kion vi hodiaŭ volas, por dormi pli bone? – li demandis kun sufokita voĉo, kio ŝprucigis larmojn el la okuloj de Livia.

“Mi aĉetos por vi multe da ludiloj, multe da novaĵoj... Diru al paĉjo, kion vi deziras...

Abunda ŝvito malsekigis la ulcerajn elkreskaĵojn de la malsana infano, kiu montris angoran aflikton. Estis rimarkebla ŝia granda peno, kvazaŭ ŝi provus venki sin mem, por respondi la patran demandon.

– Parolu, filino kara – murmuris Publio, sufokita, observante ŝian deziron esprimi ian respondon.

“Mi serĉos ĉion, kion vi volos... Mi irigos iun al Romo speciale, por alporti ĉiujn viajn ludilojn...”

Post videbla peno, la infano povis flustri per laca, apenaŭ perceptebla voĉo:

– Patreto,... mi volas... la profeton... el Nazaret...

La senatano, humiligita kaj konfuzita ĉe tiu neatendita respondo, mallevis la okulojn, dum Livia kaj Anna, kvazaŭ tuŝitaj de ia nevidebla, mistera forto, pro la surprizo de la sceno, kaŝis siajn vizaĝojn surverŝitajn de larmoj.

V - LA MESIO EL NAZARET

La mateno de la sekvanta tago trovis Publion kaj lian familion turmentataj de seriozaj zorgoj.

Ankoraŭ frue, jen li intime konversacias kun sia edzino, kiu lin alparolas per peteganta, ama voĉo:

– Mi opinias, mia kara, ke vi devus iom mildigi la severecon de la pozicio, en kiun la destino metis nin, irante al tiu grandanima homo, por la bono de nia filino. Ĉiuj parolas pri liaj faroj, ravite de lia edifa boneco, kaj mi kredas, ke lia koro kompatos nian malfeliĉan situacion.

La senatano, maltrankvila kaj dubanta, aŭdis ŝin, kaj fine diris:

– Nu, Livia; mi konsentas viajn dezirojn, sed nenio krom aflikto, premanta niajn animojn, igas min tiel krude dekliniĝi de miaj principoj.

“Sed mi ne agos tiel, kiel vi proponas. Mi iros sola al la urbo, kvazaŭ en momento de simpla amuzo, trapasante la vojon, kiu kondukas al la bordoj de la lago; mi tamen ne faros la absurdon alproksimiĝi el la profeto, por ne malaltiĝi de mia socia kaj politika digno; se sin prezentos ia favora cirkonstanco, mi diros, ke nin plezurigus lia vizito por la celo revigligi nian malsanan infanon.”

– Tre bone! – diris Livia, konsolita kaj dankoplena –; mi tenas en la animo la plej sinceran kaj profundan fidon. Iru ja, karulo! Mi dume petegos la benon de la ĉielo por nia iniciativo. La profeto, nun aperinta kiel vera kuracanto de animoj, ekscios, ke post via pozicio de senatano de la Imperio kelkaj koroj suferas kaj ploras!

Publio rimarkis, ke lia edzino tro flamiĝas ĉe siaj konsideroj, lasante sin konduki de io, kion li opiniis eksceso de malforteco kaj sentimentaleco; li tamen ne riproĉis tion al ŝi pro la aflikto de tiu momento, kiu povus ja skui plej fortan cerbon.

Li lasis, ke la laboraj horoj de la tago forfluu kun la okcidenta heleco, kaj, kiam la krepusko per neprecizaj koloroj superverŝis la mirindan pejzaĝon, li eliris, ŝajnigante distriĝon, kvazaŭ li dezirus rigardi de proksime la malnovan urban fonton, kiu allogadis ĉiujn fremdulojn.

Irinte ĉirkaŭ kvincent paŝojn, li renkontis fiŝkaptistojn kaj aliajn homojn, kiuj revenis hejmen kaj lin rigardis kun apenaŭ kaŝita scivolo.

Unu horo forpasis post liaj amaraj intimaj meditoj.

Grandega ombro vualo kovris la tutan regionon, plenan de viveco kaj parfumoj.

Kie estis la profeto el Nazaret en tiu momento? Ĉu ne estis ia iluzio la historio de liaj mirakloj kaj de lia ensorĉa impono super la animoj? Ĉu ne estis absurdo serĉi lin, vagante sur la vojoj, flanken metante la dignon de la socia hierarkio? Nu, li certe estis simplanima, neklera viro, ĉar li preferis Kapernaumon kaj la fiŝkaptistojn.

Lasante liberan kuron al la pensoj, fluantaj el lia samtempe flamanta kaj senkuraĝigita menso, Publio Lentulus opiniis tre malfacila, ke li renkontiĝos kun la Nazareta Majstro.

Kiel ili ja interkompreniĝos?

Ĝis tiam ne interesis lin detale koni la dialektojn de tiu popolo, kaj certe Jesuo alparolos lin en la Siria dialekto, ordinare uzata en la baseno de Tiberiado (*).

(*) Tiberiado: lago en Palestino, aŭ Genesaret. En “Quo Vadis?” ĝia nomo estas “Tiberiada lago”. – La Trad.

Profundaj zorgoj elverŝiĝis el lia cerbo en la koron, simile al la ombro de la krepusko antaŭanta tiun nokton.

Sed la ĉielo, en tiu horo, estis mirinde blua, kaj la opaleca lumo de la luno ne atendis la plenan fermadon de la grandega nokta ventumilo.

La senatano sentis, ke lia koro baraktas en ia senborda maro da zorgoj, kaj aŭdis ĝian sentaktan batadon en la premata brusto. Dolora emocio skuis la plej internajn fibrojn de lia spirito. Nun li estis pretervole apogita sur ŝtonbenko ornamita de rubusarbetoj, kaj tie restis senmova, sondante la senliman vastajon de sia penso.

Neniam antaŭe li spertis ian similan sensacion, krom ĉe la rakontado de sia stranga sonĝo, kiun li sciigis nur al Flaminio.

Li memoris eĉ siajn plej malgravajn travivaĵojn, kaj havis la impreson, kvazaŭ li provizore eltiris sin el la materia korpa karcero. Li sentis ian profundan ekstazon antaŭ la Naturo kaj ties mirindaĵoj, kaj tiel terura estis la enfermiteco, en kiu li ĉiam tenadis sian fieran koron, ke li ne sciis kiel esprimi sian admiron kaj dankon al la ĉielaj potenculoj.

El la kvieta akvo de la lago Genesaret ŝajnis al li, ke elvaporigaŝ subtilegaj parfumoj, kiuj harmonie miksiĝis kun la akra aromo de la foliaro.

Ĝuste en tiu momento, kun la spirito kvazaŭ sub la jugo de ia stranga, agrabla magneta forto, jen li aŭdis kvietajn paŝojn de iu homo, sin direktanta al tiu loko.

Antaŭ liaj maltrankvilaj okuloj staris distingiga, unika persono. Tiu estis ankoraŭ juna viro, tra kies okuloj, profunde dolĉaj, vidiĝis serena, nedifinebla beleco. Longaj, silkecaj haroj garnis lian kompateman mienon, kvazaŭ brunaj fadenoj apenaŭ origitaj de nekonata lumo. Dia rideto, samtempe montranta grandegan bonecon kaj strangan energion, elradiigis el lia melankolia, majesta figuro ian nerezisteblan sorĉon.

Publio Lentulus facile rekonis tiun impresan homon, sed en lia koro muĝadis ondoj da sentoj, kiujn li ĝis tiam ne konis. Eĉ lia prezentado la Tiberio, ĉe la solenoj en Kapreo, ne tiel forte tuŝis lian koron. Ardaĵ larmoj ruliĝis el liaj okuloj, kiuj malofte ploris, kaj ia mistera, nevenkebla forto devigis lin ekgeni sur la herbejo, banata de la lunlumo. Li penis paroli, sed lia brusto estis sufokita kaj premata. Tiam, montrante sian dolĉan, superegan bonecon, la milda Nazaretano paŝis al li, kvazaŭ materiiĝinta vizio de unu el la dioj de la antikvaj kredoj, kaj, karese apogante sian dekstran manon al lia frunto, diris per ĉarma lingvo, kiun Publio perfekte komprenis, kvazaŭ li aŭdus sian patrujan idiomon, kaj kiu donis al la senatano la impreson, ke la parolo iras de spirito al spirito, de koro al koro:

– Senatano, kial vi serĉas min? – kaj, disetendante sian profundan rigardon sur la pejzaĝon, kvazaŭ li dezirus, ke lia voĉo estu aŭdata de ĉiuj homoj sur la planedo, la profeto daŭrigis kun serena nobleco:

“Estus pli bone, se vi venus al mi publike, en la plej hela horo de la tago, por ke vi povu lerni, per unu fojo kaj por la tuta vivo, la superegan lecionon pri fido kaj humileco... Sed mi ne venis al la mondo, por nuligi la superajn leĝojn de la Naturo, kaj venas renkonte al via senfortiĝinta koro!”

Publio Lentulus nenion povis diri, kaj sian senton li esprimis nur per abundaj larmoj, dolorplene pensante pri sia filineto; sed la profeto, kvazaŭ ne bezonante liajn vortojn, aldonis:

– Mi ja ne venas al la ventanima, fiera politikisto, kiun nur jarcentoj da sufero povas konduki al la sino de mia Patro; mi venas kontentigi la petegojn de malfeliĉa, premata koro, sed vere, mia amiko, ne via sento savas vian lepran filinon, al kiu ne helpas la monda scienco, ĉar vi ankoraŭ havas la egoistan homan prudenton: ŝin savas la fido kaj la amo de via edzino, ĉar la fido estas dia... Sufiĉas unu radio de ĝia potenca energio, por pulvorigi ĉiujn monumentojn, starigitajn honore al la surtera vanteco...

Tiaj estis la nekonataj kaj subitaj emocioj, kiuj posedis lian koron, ke la senatano, tuŝita kaj ensorĉita, konfesis al si, ke lia spirito ŝvebas en ia atmosfero el sonĝo, kaj opiniis, ke liaj realaj sentumoj enretiĝas en ia nekomprenebla, plena iluzio.

– Ne, mia amiko, vi ne sonĝas... – milde kaj energie diris la Majstro, divenante liajn pensojn. – Post longaj jaroj for de la bona vojo, sur la irejo de indignigaj eraroj, vi hodiaŭ trovas deirpunkton por la rebonigo de via tuta vivo.

“Dependas tamen de via volo profiti tiun punkton nun aŭ post kelkaj jarmiloj... Ĉar la disvolviĝo de la homa vivo devas obei la cirkonstancojn, vi tial devas konsideri, ke ili estas ĉiaspecaj; la homon koncernas do la devo ekzerci la povon de la volo kaj de la sento, penante alproksimigi sian destinon al la fluoj de la bono kaj de la amo al siaj similuloj.

“Por via spirito, en ĉi tiu momento, sonas decida minuto, kiu estos glora, se vi sukcesos uzi vian

liberecon, por ke tiu minuto estu, en via koro, kanto de amo, humileco kaj fido, en la nedifinebla horo de la savo, en la eterneco...

“Sed neniu povos agi kontraŭ via konscienco mem, se vi volos senfine preterlasi ĉi tiun feliĉan minuton!

“Kiel paŝtisto de la homaj animoj, ekde la estiĝo de ĉi tiu planedo, jam de multe da jarmiloj mi penas kolekti la elvojiĝintajn ŝafojn kaj porti al iliaj koroj la eternajn ĝojojn de la regno de Dio kaj de Ties Justeco!”

Publio rigardis tiun eksterordinaran viron, kies kuraĝa parolo naskis surprizon kaj admiron.

Ĉu humileco? Kiajn titolojn la profeto prezentis al li, por paroli al senatano de la Imperio, havanta ĉian povon super vasalo?

Rapide venis al lia menso la urbo de la Cezaroj, kovrita per triumfoj kaj gloro, kun monumentoj kaj povoj, kiujn li, ĉe tiu momento, kredis nepereemaj.

– Ĉiuj povoj de via Imperio estas tre malfortaj kaj ĉiuj ĝiaj riĉaĵoj estas tre mizeraj... La pompoj de la Cezaro estas unutagaj iluzioj, ĉar ĉiuj scienculoj kaj ĉiuj militistoj estas vokataj, en la oportuna momento, al la tribunaloj de la justeco de mia Patro, kiu estas en la Ĉielo. Unu tagon iliaj potencaj agloj ĉesos ekzisti sub monto da senvalora cindro. Iliaj scioj transformiĝos ĉe la blovo de la penoj de aliaj laboristoj pli meritantaj la progreson; iliajn maljustajn leĝojn englutos la pereiga abismo de ĉi tiuj malpiaj jarcentoj, ĉar unu sola leĝo ekzistas kaj postvivos la ruinojn de la homa agitiĝo, nome, la leĝo de amo, starigita de mia Patro, jam de la komenco de la kreitaĵaro...

“Nun reiru vian hejmon, konsciante la respondecon por via destino...”

“Se, resanigante vian filinon, la fido donis al via hejmo tion, kion vi opinias ĝojo, ne forgesu tamen, ke por via koro tio signifas pligraviĝon de devoj antaŭ nia Ĉiopova Patro!”

La senatano ekvolis paroli, sed lia voĉo estis retenita de emocio kaj profundaj sentoj. Li deziris foriri, sed en tiu momento li rimarkis, ke la Nazareta profeto transfiguriĝas, kun la okuloj fiksitaj sur la ĉielo...

Tiu loko certe estis sanktejo por la meditado kaj preĝoj de la profeto, en la aroma koro de la Naturo, ĉar Publio sentis, ke li intense preĝas kaj ke rivero da larmoj banas lian vizaĝon, tiam superversatan per ia milda lumo, kiu reliefigis la serenan belecon kaj la nedifineblan melankolion de la Majstro...

Ĉe tiu momento, ia dolĉa malvigliĝo paralizis la observokapablojn de la patricio, kiu kvietiĝis, konfuzite.

Estis probable la naŭa horo vespere, kiam la senatano sentis, ke li vekiĝas.

Venteto karesis liajn harojn, kaj la luno disverŝis siajn arĝentecajn radiojn sur la grandegan, glatan akvospegulon.

Gardante en la memoro la plej malgrandajn detalojn de tiu neforgesebla minuto, Publio sentis sin humiligita kaj frakasita, pro sia malforteco antaŭ tiu eksterordinara viro.

En lia cerbo kirliĝis torento da antagonismaj pensoj pri la admonoj de la profeto kaj pri tiuj vortoj, nun por ĉiam tenataj en la fundo de la konscienco.

Ĉu ankaŭ Romo ne havas siajn sorĉistojn? Li penis rememori ĉiujn misterajn dramojn en la malproksima urbo, kie vivas tiaj imponaj, nekompreneblaj homoj.

Ĉu tiu viro ne estas eble fidela kopio de la magiistoj kaj divenistoj, al kiuj estas turnita la tento ankaŭ de la Roma socio?

Ĉu li do forneu siajn plej karajn tradiciojn de patrujo kaj familio, por fariĝi senvalora homo, frato de ĉiuj kreitoj? Li ridetis al si mem, kun sia iluzia supereco, ekzamenante la vanecon de tiuj admonoj, kiujn li konsideris malŝatindaj. Tamen aliaj kortuŝaj petoj iris de lia koro al la cerbo. Ĉu la profeto ne parolis pri la unika, mirinda oportuneco? Ĉu la Nazaretano firme ne promesis la resaniĝon de lia infano, pro la arda fido de Livia?

Dronante en tiuj profundaj meditoj, li kviete malfermis la podon de sia hejmo; afliktite li iris al la ĉambro de la malsanulino, kaj, ho miraklo! lia infano tute serene kuŝis sur la brakoj de Livia.

Ia superhoma, nekonata forto mildigis ŝiajn akrajn suferojn, ĉar tra ŝiaj okuloj vidiĝis dolĉa infana ĝojo, kiu heligis ŝian ridetantan mienon. Livia, plena de patrina feliĉo, tiam rakontis al li, ke la knabino ĉe unu momento diris, ke ŝi sentas sur la frunto la kontakton de karesaj manoj, kaj ke ilia filino tuj eksidis sur la lito, kvazaŭ ia mistera energio subite revigligis ŝian organismon. Flavia akceptis nutraĵon, kaj, kontraŭ ĉia atendo, la febro malaperis; ŝi jam ŝajnis resaniĝanta kaj, kun la spontanea ĉarmo de sia infanaĝo, konversaciis kun sia patrino.

Fininte sian raporton, la juna sinjorino entuziasme diris:

– De tiam, kiam vi eliris, mi kaj Anna fervore preĝis ĉe nia malsana filineto, petegante la profeton, ke li kontentigu vian deziron, ke li aŭdu niajn vortojn, kaj nun, jen nia filino resaniĝis! Ĉu povas ekzisti, karulo, feliĉo pli granda? Ha, Jesuo certe estas iu, sendita rekte de Jupitero kaj venis al ĉi tiu mondo por glora misio de amo kaj ĝojo por ĉiuj animoj!

Sed Anna, kiu emociita aŭskultis, propramove kaj nebrideble enmiksiĝis, instigite de la granda ĝojo de tiu momento:

– Ne, mia mastrino! Jesuo ne venis komisiite de Jupitero. Li estas la Filo de Dio, lia Patro kaj nia Patro, kiu estas en la ĉielo kaj kies koro estas plena de boneco kaj pardonemo al ĉiuj estuloj, laŭ la instruado de la Majstro. Ni do gloru la Ĉiopovan pro la ricevita graco, dankante Jesuon per preĝo de humileco.

Publio Lentulus silente sekvis la scenon kun interna kolereto, pro la troa kamaradeco de lia edzino kun simpla servistino. Kun profunda malplezuro li rimarkis, ne nur la spontaneecon de la entuziasma danko de Livia, sed la enmiksiĝon de Anna en la konversacion, kion li opiniis trokuraĝo. Li rapide kolektis ĉiujn fortojn de sia fiero, por restarigi la disciplinon en sia hejmo, kaj, reprenante la arogantan aspekton de sia fizionomio, seke turnis sin al sia edzino:

– Livia, estas necese, ke vi detenu vin de tiaj entuziasmoj! Ĝustadire, mi vidas nenion eksterordinaran en la ĵusa okazaĵo. Nenio ĝis hodiaŭ mankis al nia malsanulino, koncerne la necesajn kuracadon kaj flegadon, kaj estis do logika nia espero, ke ŝia organismo efike reagos ĉe nia senĉesa zorgado.

“Rilate al vi, Anna – li arogante diris al la terurita servistino –, mi kredas, ke estas jam plenumita la tasko, kiu restigadis vin en ĉi tiu ĉambro; pro la pli bona farto de la knabino, mi ne vidas la neceson, ke

vi estu plu ĉe via mastrino, kiu venigis kun si el Romo la virinojn, por la persona servado al ŝi.”

Anna kun disŝirita koro rigardis sian mastrinon, kiu klare montris sur la vizaĝo la signojn de sia doloro pro tiuj neatenditaj vortoj, kaj, farinte supraĵan kaj respektan riverencon, eliris el tiu ĉambro, kie ŝi uzis plej bonan parton de sia frata abnegacio.

– Kion vi faris, Publio? – demandis Livia, tre emociita. – Nun, kiam ni devus montri al la sindona servistino la ĝojon de nia danko, ĉu vi tiel krude kondutas?

– Viaj infanaĵoj devigas min al tio. Kion oni diros pri la matrono, kiu malfermas la animon al siaj plej malaltrangaj sklavinoj? Ĉu do via koro alkonformiĝas al tiaj ekscesoĵ de intimeco? Mi ĉagrenite rimarkas, ke nun staras inter ni profundaj malkonsentoĵ. Kial tia troa fido al la Nazareta profeto, se li ne estas supera al la Romaj sorĉitoĵ kaj magiistoj? Kaj, cetere, kion vi faras el la tradicioĵ de niaĵ familiaĵ dioĵ, ne sciante gardi la fidon ĉe la heĵma altaro?

– Mi ne akordas kun vi, karulo, pri tiuj konsideroj. Mi estas absolute konvinkita, ke nia Flavia estas resanigita de tiu eksterordinara viro... En la momento, kiam ŝi subite ekfartis pli bone kaj kiam ŝi parolis al ni pri la eterecaĵ manoj, ŝin karesantaj, mi vidis, per miaĵ propraj okuloĵ, ke la liton de la malsanulino banas ia stranga lumo, kian mi neniam antaŭe vidis...

– Stranga lumo? Vi certe deliras, post tiom da lacigaj laboroj; aŭ eble vi estas infektita de la halucinacioĵ de ĉi tiu popolo el fanatikuloĵ, en kies medion ni havis la malfeliĉon fali...

– Ne, mia amiko, mi ne deliras. Malgraŭ viaĵ vortoj, kiuj, mi konfesas, venas el la koro, kiun mi plej amas kaj admiras sur la Tero, mi estas certa, ke la Nazareta Majstro ĵus resanigis nian filineton; koncerne Annan, karulo, mi trovas malĵusta vian sintenon, kiu ja ne akordas kun via konata grandanimeco por la servistoj en nia heĵmo. Ni ne povas, nek devas, forgesi, ke ŝi ĝis hodiaŭ estis plej sindona al mi kaj al nia filino, en ĉi tiuj senhomaj lokoj. Ŝiaĵ kredoj ja diferencas de la niaĵ, sed mi opinias, ke ŝia honesta, edifa konduto povas nur honorigi la servadon en nia domo.

La senatano pripensis la superecon de sentoj de lia edzino kaj pentis pro sia impulsiĝemo; ĉe la saĝeco de tiuj vortoj li kapitulacis.

– Bone, Livia, mi ŝatas la noblecon de via koro kaj plezuros, se Anna daŭrigos sian servadon al vi; sed mi tute ne cedas koncerne la resaniĝon de nia filineto. Mi ne konsentas, ke ŝia resaniĝo estas atribuata al la Nazareta magiisto. Cetere, ĉiam memoru, ke plaĉas al mi scii, ke viaĵ fido kaj intimeco estas rezervitaj nur al mi. Al servistoj aŭ nekonatoĵ la patricio, kaj ĉefe la Roma matrono, ne devas malfermi la pordoĵn de la koro.

– Vi scias, ke mi obeas viaĵn ordonoĵn – diris lia edzino pli konsolita, turnante al li karesan kaj dankan rigardon – kaj mi petas vian pardonon, se mi ofendis vian noblan, senteman animon!

– Ne, mia kara, se ĉi tie ekzistas iu demando pri pardono, neniu alia, ol mi, devas peti pardonon; vi tamen scias, ke ĉi tiu regiono min turmentas kaj teruras. Mi sentas min konsolita, konstatante la bonfaran reagon de la organismo de nia filineto, ĉar tio signifas nian baldaŭan revenon al Romo. Ni atendos nur kelkajn tagojn, kaj morgaŭ mi petos Sulpicion komenci la aranĝojn necesajn al nia reveno.

Livia konsentis pri la konsideroj de sia edzo kaj karesis sian filineton, revigligitan post la profunda

konsumiteco, kiu posedis ŝin dum multe da tagoj. En sia animo ŝi ĝoje dankis Jesuon, ĉar ŝia koro diris, ke tiu okazaĵo estis beno, kiun la Ĉiela Patro sendis al ŝia patrino spirito per la kompatemaj kaj sanktaj manoj de la Majstro.

Sed, obeante la impulson de sia vantemo, Publio ne volis rememori la eksterordinaran figuron, kiun liaj ravitaj okuloj iam havis antaŭ si. En sia ekzaltita imagemo li starigis kastelojn da teorioj, penante nuligi la rektan intervenon de tiu viro en la resaniĝon de lia filino, kaj tiel li respondis la kontraŭdirojn de sia propra spirito de observema, zorge analizema homo.

Li ne povis forgesi, ke la profeto envolvigis lin en nekonataj fortoj, sufokis lian voĉon, igis lin ekgenui; tiu deviga surgenuiĝo, kiun li rigardis kiel doloran humiligon, pikis lian fieron.

Turmentaj pensoj plenigis lian cerbon, lacan de tiom da internaj luktoj; post alvoko al la protektaj genioj de la familio, ĉe la hejma altaro, li penis ripozi de la amaraj animaj streĉoj.

Sed en tiu nokto, sur la mildaj flugiloj de la sonĝo, lia animo travivis la samajn rememorojn de lia pasinta ekzistado.

Li vidis sin kun la samaj insignoj de Konsulo de la epoko de Cicerono; li revidis la kruelaĵojn, faritajn de Publio Lentulus Sura, ties eksigon el la funkcioj de Konsulo, la sekretajn kunvenojn de Lucio Sergio Katilino, la revoluciajn malicaĵojn; kaj sentis sin denove kondukata al tiu sama tribunalo el severaj, respektigindaj juĝistoj, kiuj, en lia antaŭa sonĝo, sciigis al li, ke li renaskiĝos sur la Tero en tempo de granda spirita lumo.

Antaŭ tiuj honorindaj juĝistoj, en neĝoblankaj talaroj, li ricevis amaran senton de premateco kaj lia koro sentakte ekbatis.

La sama juĝisto ekstaris, en tiu medio brile heligata de spiritaj lumoj, kaj diris:

– Publio Lentulus, kial vi preterlasis la gloran minuton, por kiu vi povus aĉeti la senfinan, radiluman koron de via savo en la eterneco?

“Ĉi tiun vesperon vi staris inter du vojoj: tiu de la servisto de Jesuo kaj tiu de la servisto de la mondo.

Sur la unua, la jugo estus milda kaj la ŝarĝo malpeza; sed vi elektis la duan, sur kiu ne ekzistas amo sufiĉa, por forlavi ĉiujn viajn maljustaĵojn... Preparu vin do por ĝin kuraĝe sekvi, ĉar vi preferis la pli malglatan vojon sur kiu mankas la floroj de humileco, por mildigi la akrecon de la venenaj dornoj!

“Vi multe suferos, ĉar sur tiu vojo la jugo estas nefleksebla kaj la ŝarĝo estas treege peza; sed vi agis kun libereco de konscienco sur la vasta kampo de la cirkonstancoj de via vivo... Kondukite al mirinda oportuno, vi tamen persistis en la decido iri la amaran, doloran vojon de la plej akraj provoj.

“Ni ne kondamnas vin, sed nur bedaŭras la obstinemon de via spirito antaŭ la vero kaj la lumo! Revigliĝu ĉiujn fibrojn de via animo, ĉar de nun via lukto estos grandega!”

Li atente aŭdis tiujn emociajn admonojn, sed en tiu momento li vekigis por la sensacioj de la materiala vivo, sentante ian strangan animan senfortiĝon kaj neesprimeblan malgajecon.

Ankoraŭ frumatene Livia turnis lian atenton al la malgranda Flavia, resaniĝanta kaj feliĉa. Ŝia epidermo

kvazaŭ glatiĝis sub la efiko de ia nekonata, miriga terapia procedo; forestis la violaj nuancoj, kiuj iam montriĝis, antaŭ ol krevis la sangokoloraj ulceroj.

La senatano rericevis iom de sia sereneco, konstatante la realan pli bonan farton de la filino, kiun li ame premis al la koro, kaj, pli trankvila, diris:

– Livia, estas ja vere, ke hieraŭ vespere mi renkontiĝis kun la tiel nomata majstro el Nazaret, sed, laŭ la logiko de mia edukiteco kaj de miaj scioj, mi ne povas akcepti, ke li estas la aŭtoro de la resaniĝo de mia filino.

Kaj li tuj ekrakontis supraĵe la okazaĵojn jam al ni konatajn, sed sen la detaloj, kiuj lin plej forte impresis.

Livia atente aŭdis lian rakonton, sed, rimarkante lian spiritan inklinon pri la profeto, kiun ŝi konsideris supera kaj alte respektinda homo, ŝi ne volis vortigi sian penson pri la temo, timante ian neoportunam, nepravigeblan konflikton de opinioj. En sia koro ŝi dankis tiun karesman, kompateman Jesuo, kiu kontentigis ŝiajn patrinajn petegojn, kaj en la plejprofundo de sia animo ŝi lulis la esperon humile kisi la randon de lia tuniko, kiel pruvon de ŝia sincera danko, antaŭ ol reveni Romon.

Post kvar tagoj la malsanulino montris klarajn signojn de senduba fizika restariĝo, kio kaŭzis la plej grandan ĝojon en ĉiuj koroj.

En unu hela mateno, jen la juna Livia lulas sian fileton, preskaŭ unujaran, kaj donas instrukciojn al servantino nomata Semele, idino de Judoj, komisiita por prizorgi la infanon Marko, por kiu tiu sklavino montris grandan intereson ekde la momento, kiam ŝi komencis servi al Livia. Ĉe unu momento la servistino ekkiriis, montrante la larĝan ŝtonpavimitan vojon:

– Sinjorino, jen venas galope du nekonataj rajdistoj!

Tion aŭdinte, ankaŭ Livia ilin vidis, venantajn sur la larĝa vojo, kaj tuj eniris por antaŭsciigi al sia edzo ilian alvenon.

Efektive, post kelkaj minutoj haltis ĉe la pordo du ŝvitokovritaj, spiregantaj ĉevaloj. Viro en Romanaj vestoj, kune kun Juda gvidisto, rapide kaj vigle deseliĝis.

Tio estis Kvirilio, fidinda eks-sklavo de Flaminio Severus, kiu, en la nomo de sia mastro, portis al Publio kaj ties familio kelke da sciigoj kaj multe da donacoj.

Tiu plaĉa surprizo plenigis la tagon per dolĉaj rememoroj kaj plezuroj dum plej agrablaj horoj. La nobla patricio ne forgesis siajn forestantajn geamikojn; kune kun la kuraĝigaj sciigoj kaj granda monsumo, venis afablaj donacoj de Kalpurnia al Livia kaj al ties du infanoj.

En tiu tago Publio Lentulus okupis sin nur per la skribado de multenombraj pergamenrulaĵoj, por sendi al sia kolego detalajn sciigojn pri ĉiuj okazaĵoj. Inter ĉi tiuj estis la feliĉa resaniĝo de lia filineto, okazo, kiun Publio atribuis al la favora klimato de Galileo. Sed, ĉar li havis en tiu brava membro de la familio Severus animon de sindonema, fidela frato, al kies koro li ĉiam konfidencis la plej sekretajn emociojn de sia spirito, li tial skribis al tiu sama amiko alian longan leteron, kvazaŭ direktotan al la Roma Senato, pri Jesuo Kristo, kiun li serene rigardis ekskluzive el la homa vidpunkto, sen ia sentimentaleco. Kaj fine, Publio kaj Livia ĝoje sciigis al siaj malproksimaj amikoj, ke ili eble maksimume post unu monato revenos

Romon, ĉar la eta Flavia tute resaniĝis.

Kiam li finis tiun longan leteron, estis jam posttagmezo; sed en tiu sama tago, ĉe la vesperkrepusko, kiam la geedzoj distriĝis, en la triklinio, relegante la dolĉajn vortojn de la karaj forestantoj kaj teksante la ridetantajn esperojn pri sia baldaŭa reveno, jen Sulpicio petas anonci lin, venintan kun sendito de Pilato.

La senatano akcpetis ilin en sia privata kabineto kaj la komisiito respekte sin turnis al li per jenaj vortoj:

– Klera Moŝto, sinjoro la provincestro de Judujo kominikas al vi, ke li alvenis al sia hejmo, proksime de Nazaret, kie li atendas la grandan plezuron de viaj ordonoj kaj sciigoj.

– Dankon! – Publio respondis bonhumore, kaj aldiris: – Estas bone, ke lia provincestra moŝto ne estas malproksime, kaj tial estas por mi eble nelonge restadi en Jerusalem, antaŭ mia baldaŭa reveno al Romo!...

Kelkaj formalaj vortoj estis interŝanĝitaj, sed Publio Lentulus ne rimarkis la sintenon de Sulpicio, kiu direktadis al li esprimoplenajn okulojn.

VI - LA FORRABO

Dum la epoko de la Kristo, Galileo estis vasta provizejo de preskaŭ la tuta Palestino.

Tiam, la ĉarma lago Genesaret ne havis tiel malaltan nivelon, kiel hodiaŭ. La tuta ĉirkaŭa grundo estis taŭga por irigaciado dank' al la multenombraj fontoj, la kanaloj kaj la akvoleviloj, kaj tial sukoriĉa vegetaĵaro ornamis per fruktoj kaj plenigis per parfumoj tiun paradizan regionon.

Tritiko, hordeo, kukurboj, lentoj, figoj, vinberoj estis semataj kaj rikoltataj dum la tuta jaro, kaj havigis al la vivo ĝojon kaj abundecon. Sur la pli altaj lokoj, miksite kun vastaj vinberejoj kaj olivarbaroj, staris grandvaloraj palmoj kaj daktilujoj, kies fruktoj estis la plej bonaj en Palestino.

En Kapernaum, krom tiuj riĉaĵoj, prosperis ankaŭ la industrio de fiŝkaptado, ĉar la tiam nomata “Maro de Galileo” abundis per fiŝoj: la vivo estis do simpla kaj trankvila. Super ĉiuj ceteraj popoloj de la Galileaj medioj la Kapernauma popolo elstaris pro sia spirita, modesta, simpla beleco. Konscienca kaj pia, ĝi akceptis la leĝon de Moseo, sed tute ne partoprenis en la hipokritaĵoj de la fariseismo en Jerusalem. Ĝuste pro tiu natura simpleco kaj tiu spontanea, sincera fido, la pejzaĝo de Kapernaum servis kiel amfiteatro por la unuaj neforgeseblaj, nemortemaj lecionoj pri Kristanismo, laŭ ties origina pureco. Tie Jesuo trovis la varmon de sindonaj, noblaj koroj; tie la spirita mondo trovis la plej bonajn elementojn por la fondo de la neforgesebla lernejo, kie la Dia Majstro ekzempladis siajn instruojn.

En ĉiuj urboj de tiu regiono ekzistis sinagogoj, por ke la Leĝo estu instruata ĉiusabate, ĉar sabato estis la tago, kiun ĉiuj homoj devis dediĉi nur al la ripozo de la korpo kaj al la aktiveco de la spirito. En tiuj malgrandaj sinagogoj la parolo estis permesata al ĉiu ajn, kiu ĝin nur deziris, sed Jesuo preferis la mildan templon de la Naturo por la disaŭdigado de siaj instruoj.

Ĉiuj malaltaj sociaj klasoj ĉeestis sub libera ĉielo liajn predikojn, kies eksterordinara beleco ensorcis eĉ plej hardiĝintajn korojn.

Malnova konvencio inter la mastroj ordonis, ke ripozu la servistoj en la tago difinita por la studado, de la Leĝo, kaj la Romanoj mem penis kulturi tiujn regionajn tradiciojn, por kapti la simpation de la konkerita popolo.

Dum tiu epoko, estis granda la nombro de la sklavoj, venantaj aŭdi la konsolajn predikojn de la Mesio el Nazaret.

*

Pasis unu semajno post la ricevo de la sciigo el Romo; en tiu sabato, ne multe post tagmezo, Livia kaj Anna intime kaj amike konversaciis.

– Jes – diris la juna patriciino al sia servistino, kiu surhavis promenveston – se estos por vi eble, hodiaŭ, danku persone la profeton, en mia nomo, ĉar mi sentas min tre feliĉa pro lia grandega boneco. Diru al li ankaŭ, ke, se mi povos, antaŭ ol foriri Romon mi penos konatiĝi kun li, por kisi liajn malavarajn manojn, kiel pruvon de mia danko!

– Mi ne forgesos viajn ordonojn kaj esperas, ke vi povos iri al la domo de Simon por lin viziti, antaŭ ol foriri de ĉi tiu regiono... Hodiaŭ – ŝi diris plu per konfidenca tono – mi esperas paroli, en la urbo, al mia maljuna onklo Simeon, kiu venis el Samario speciale por ricevi lian benon kaj liajn instruojn. Mi ne estas certa, ĉu vi scias, ke inter la Samarianoj kaj la Galileanoj jam de longe okazas malpaciĝoj; sed la Majstro, en siaj lecionoj pri amo kaj frateco, ofte laŭdas la Samarianojn pro ilia lojala, sincera karitemo. Multajn miraklojn li jam faris en Samario, kaj mia onklo, kiel unu el tiuj favoritoj, venos hodiaŭ ricevi la benon de liaj konsolaj manoj!

Dolĉa, kortuŝanta fido plenigis la animon de tiu malaltklasa virino kaj intensigis en Livia la deziron ekkoni tiun eksterordinaran viron, kiu kapablis lumigi, per siaj gracoj, la plej neklerajn kaj simplajn korojn.

– Anna, atendu iom – ŝi diris emociita kaj direktiĝis al sia ĉambro. Ŝi revenis kun radianta mieno, feliĉa pro tio, ke jam de tiam ŝi komencis sian kristanan fratiĝon; kaj, doninte al la servistino iom da moneroj, ŝi plej ĝoje diris:

– Portu ĉi tiun monon al onklo Simeon, en mia nomo... Li venis de malproksime, por vidi la Mesion, kaj bezonas monajn rimedojn!

Anna ricevis la sumon, kiu estis kelke da denaroj, kaj ĝojplena dankis la mastrinon por tiu donaco, kiun ŝi konsideris efektiva riĉaĵo; post kelkaj minutoj, kune kun Semele kaj aliaj amikinoj, ŝi sin direktis, sur la vojo al Kapernaŭm, al la lago, kie ili atendis la vesperkrepuskon, kiam la ŝipeto de Simon Bar-Jona kondukos la Mesion por la kutimaj predikoj.

En la urbo, ŝia unua penso estis rapidi al kaduka, malriĉa kabano, kie la grandaĝa Simeon ŝin amike ĉirkaŭprenis, plorante de feliĉo. Granda ĝojo, post tio, agitis tiujn korojn ne protektatajn de la sorto, pro la nobla donaco de Livia, ĉar tiuj moneroj reprezentis por ili modestan trezoron.

Lasinte siajn kunulinojn sur la kutima loko, pro tiu vizito, Anna ne povis rimarki, ke, tuj post ŝia foriro, Semele rapidis al domo kaŝita inter multnombraj olivarboj, en la fino de preskaŭ tute forlasita strateto.

Kelkaj frapoj estis aŭditaj sur la pordo, kaj bonaspekta sinjorino ĝin volonte malfermis al ŝi.

– Ĉu nia amiko alvenis? – demandis la servistino, ŝajnigante nezorgecon.

– Jes, sinjoro Andreo de hieraŭ troviĝas tie ĉi, atendante vin. Atendu iomete, mi petas.

Post kelkaj minutoj, homo jam al ni konata venis al Semele, ĉe unu el la anguloj de la ĉambro, kaj ŝin varme brakumis, kvazaŭ ŝi estus tre estimata persono.

Tio estis Andreo de Ĝioras, kiu venis al Kapernaum por la venĝa frapo, kun la favoro de kunkulpulino, kiun lia soifo al venĝo, per kruela sagaceco, sukcesis enŝovi en la hejmon de Publio Lentulus, en Jerusalema.

Post longdaŭra, tre mallaŭta konversacio, ni aŭdu la servistinon de la senatano, parolantan jene:

– Nenia dubo estas... Mi jam sukcesis kapti la plenan konfidon de la gemastroj kaj la simpation de la knabeto. Vi povas do esti trankvila, kaj la momento estas oportuna, ĉar la senatano intencas reveni Romon post nemultaj tagoj.

– Kanajlo! – ekkriis Andreo, kolera – ĉu li do jam pensas pri reveno? Tre bone! Tiu malbeninda Romano por ĉiam sklavigis mian kompatindan filon, forpuŝinte miajn patrajn petegojn; sed li ja tre kare pagos por sia trokuraĝo de konkerinto, ĉar lia filo estos servisto en mia hejmo! Mi iam montros al li mian venĝon; mi pruvos al li, ke ankaŭ mi estas viro!

Ĉi tiujn vortojn li grumblis per minaca tono, kun brilaj okuloj, kvazaŭ fiksitaj sur nevideblaj estuloj.

– Ĉu ĉio estas do preta? – li demandis Semelen, montrante plenan decidon.

– Jes, tute preta – respondis plej serene la servinstino.

– Nu, post tri tagoj mi rajdos tien malfrue en la nokto.

Kaj, doninte al ŝi flakoneton, kiun ŝi zorge kaŝis en sia vesto, li surde aldonis:

– Sufiĉas dudek gutoj, por ke la infano ekdormu kaj vekigu nur post dek du horoj... En malfrua nokto trinkiĝu al li ĉi tion en iom da akvo kun ia malforta vino, kaj atendu mian signalon. Mi estos proksime de la domo, kiun mi de hieraŭ konas, kaj tie mi atendos la multvaloran ŝarĝon. Envolu la dormantan infanon tiamaniere, ke, vidate de kelka distanco, la pakaĵo ne perfidu sian enhavon; kaj ĉar pri tiaj aferoj devas esti kunkalkulata la okazo, ke aliaj okuloj povas atesti la fakton, mi tial iros en Romana vesto, kaj, krom tio, mi esperas, ke vi povos vesti vin per unu el la tunikoj de via mastrino; tiel, ni evitos, ke kulpo pri tiu forrabo falos sur iun homon de nia raso, en la okazo, se aperos ia neoportuna kaj neatendita atestanto... Tuj post la signalo pri mia ĉeesto sur la vojo, apud la fruktoĝardeno, elvenu kaj donu al mi la valoregan pakaĵon.

Kaj kun la okuloj fiksitaj sur la anticipa bildo de sia venĝo, Andreo de Ĝioras kriis, kun minacantaj pugnoj:

– Se la malbenindaj Romanoj senkompate sklavigas niajn infanojn, ankaŭ ni povas fari sklavojn el iliaj malŝatindaj idoj! La homoj naskiĝis kun egalaj rajtoj en ĉi tiu mondo...

Atente aŭdante liajn vortojn, Semele, iom timigita, demandis:

– Sed, kaj mi? Ĉu mi ne akompanos la malgrandan Markon en tiu sama nokto?

– Tio estus granda senprudentaĵo. Vi devos resti en Kapernaŭm, ĝis estos perditaj ĉiuj postesignoj de la estonta senatano, kiu ja estos iam nenio alia, ol sklavo. Via malapero estus certa signo, nun aŭ en iu alia tempo, kaj ni devas bari ĉi tiun certan vojon.

“Kiel vi scias, mi havas riĉajn parencojn en Judujo, kaj ne estas absurdo esperi, ke ia ŝanco donos al mi la superan lokon, kiun mi aspiras, en la Templo de Jerusalemo. Ni do ne povas impliki nin en proceson; vi tamen povas esti trankvila, ĉar via hodiaŭa peno estos poste malavare rekompencita.”

La servistino rezignacie ĝemetis, konsentante pri ĉiuj sugestoj de tiu venĝema spirito.

Post kelkaj horoj, ĉe la vesperkrepusko, la servistoj de Publio revenis al la domo, gaje kaj vigle konversaciante pri la negravaj okazoj kaj zorgoj en tiu tago.

Semele ne ŝajnis maltrankvila, ĉar, jam de longe, ŝi estis pacience instruciata de Andreo, por efike kunhelpi en tiu venĝoplano. Multaj ligiloj ŝin tenis ĉe la familio de Ĝioras, kaj, kunagante por tiu pereiga dramo, celanta venĝon, ŝi faris nenion, laŭ sia opinio, krom pagi multenombrajn ŝuldojn de materiala speco.

Nu, ŝi pensis en si mem, kiam tiu afero pri la infano estos elfinita, ŝi reiros Jesusalemon en la momento, kiam ŝi volos, konvinkite, ke ŝi plenumis devon, obeante la terurajn postulojn de Andreo.

En la morgaŭo ŝi kalkulis ĉiajn eblojn de sukceso de la entrepreno kaj, en la difinita dato, ŝi faris ĉiujn necesajn paŝojn.

La akiro de iu tuniko de Livia ne estus por ŝi malfacila. La mastrino posedis multe da tunikoj kaj preskaŭ ĉiutage Anna prenadis sur sin la taskon prepari tiujn, kiuj troviĝis ekster la privataj ĉambroj de Livia, por la necesa purigado; jen kiel, trompante la sindonecon kaj la atenton de sia koleginino, Semele forprenis elegantan, neluksan tunikon de sia mastrino, precize sekvante la instrukciojn de la viro, kies kunkulpulino ŝi fariĝis.

Hejme, la senatano kaj lia edzino neniam antaŭe spertis horojn de tiel granda paco kaj de tiel multaj esperoj, ekde la tago, kiam ili alvenis Palestinon. La resaniĝo de ilia filino estis la ĉiumomenta feliĉo kaj favoris la plej ĉarmajn planojn de trankvileco en la venontaj tagoj.

Livia jam ordigis ĉiujn siajn objektojn por la vojaĝo, ĉar post kelkaj tagoj ili estos ĉe la malnova haveno de Jafo, revenante al la kara metropolo.

Ia sereneco, kiu ŝajnis nerompebla, tiam ŝvebis super la geedzoj, kaj faris iliajn korojn trankvilaj kaj feliĉaj.

Publio estis tute forgesinta la admonojn, kiujn li aŭdis dum tiu songo kaj kiujn li opinias simpla rezulto de lia impresa konversacio kun la Nazareta profeto; lia koro estis sennubigita, kaj li pesis la valoron de la homaj fortoj laŭ sia fiera vantamo, kiu sufokis en li ĉiajn spiritajn aferojn.

Unu sola penso okupis lian koron, nome, reveni Romon post kelkaj tagoj.

Sed en tiu nokto estis rulfalontaj ĉiuj liaj esperoj kaj por ĉiam prenonta alian vojon lia destino sur la Tero.

Kiu konus la perfidon, teksitan de la venĝema spirito de Andreo kaj efektiviĝontan post noktomezo, tiu aŭdus longan fajfadon, kiu refariĝis tri fojojn, en la peza silento de la arbareto.

Viro en Romanaj vestoj saltis de arda ĉevalo, je kelkaj paŝoj for de la domo, sur la larĝa vojo disiganta la kampan vegetaĵaron disde la fruktoportaj arboj. Tuj poste, pordo kviete malfermiĝis kaj unu virino, vestita laŭ la patricia modo, iris al la rajdanto, kiu ŝin afliktite atendis, kaj plej zorge metis en liajn manojn iom grandan pakajon.

– Semele – li flustris – ĉi tiu horo estas decidiga en niaj destinoj!

La servistino de Lentulus nenion povis respondi kaj sentis la bruston premata.

Ĉe tiu momento la partoprenantoj en la sceno ne rimarkis la alproksimiĝon de viro, kiu haltis, je kelkaj paŝoj, en la ombro de la densa branĉaro.

– Nun – ankoraŭ diris la rajdanto, antaŭ ol plej rapide sin forpafi – ne forgesu, ke silento estas oro kaj ke, se vi iam estos sendanka, vi eble pagos per via propra vivo la malkaŝon de nia sekreto!

Tion dirinte, Andreo de Ĝioras forgalopis sur la ombraj vojoj, kunportante la pakajon, tiel altvaloran por li.

La servistino, ankoraŭ dum kelkaj momentoj, sekvis lin per la okuloj, samtempe timante kaj kompatante, kaj per ŝanceliĝantaj paŝoj revenis hejmen.

Ili ambaŭ ne sciis, ke la okuloj de kalumnianto estas pli danĝeraj, ol la brakoj de rabisto, kaj ke tiaj okuloj ilin spionis en la nokta dezerto.

Tio estis Sulpicio, kiu, pro koincido, malfrue rehejmiĝis tiun nokton, kaj kiu tial kaptis la scenon, pale lumigatan de la lunradioj.

De kelka distanco rimarkinte, ke viro kaj virino, en Romanaj vestoj, staras sur la vojo en tia nekonvena horo, li sufokis la bruon de siaj kataj paŝoj inter la arboj, por ilin de pli proksime identigi; sed la sceno estis tre rapida, kaj tial venis en liajn orelojn nur la lastaj vortoj de la malama kaj minaca promeso de Andreo.

Tuj poste, li vidis, ke la virino, ĉe la foriro de la rajdanto, revenas per ŝanceliĝantaj paŝoj en la domon, ŝajnante posedita de ia frakasanta malvigleco. Li tiam rapidis por ŝin surprizi kaj rigardis ŝian figuron en distanco de nemultaj paŝoj; sed li ne kuraĝis tro alproksimiĝi, kaj konstatis nur la karakterizaĵojn de ŝia vesto, en la malforta lumo de la nokto. Tiun tunikon li ja konis. Tiu virino, laŭ lia opinio, estis Livia, la sola, kiu povus esti vestita tiamaniere, en tiu loko.

En palpebruma daŭro liaj rapidaj pensoj de viro sperta en la plej malnoblaj agoj en la mondo asociis faktojn kaj personojn. Li plendetale rememoris la scenon, kiun li havis la okazon ĉeesti en la ĝardeno de Pilato, kaj kredis, ke la edzino de Publio fariĝis amata de la provincestro, kies koron ŝi en malmultaj minutoj subigis pro sia eksterordinara beleco; ankaŭ venis al lia menso, ke la prokuroro de Judujo troviĝas en Nazaret, kaj, fine, li jene monologis:

– Provincestro, en sia alta rango, estas ĉiam ankoraŭ viro, kaj viro, sur bona ĉevalo, ja kapablas dum tuta nokto trarajdi distancon, kia estas tiu de Kapernaum ĝis Nazaret, por renkontiĝi kun sia amatino... Nu! Mi devas nun daŭrigi mian taskon observi paron da geamantoj... La sola stranga afero estas la facileco, kun kiu tiu virino, ŝajne tiel severmora, lasis sin sklavigi ĝis tia graco! Sed, ĉar mi havas intereson pri Fulvia, mi tial pripensu la plej bonan manieron sciigi pri la afero tiun kompatindan homon, kiu, senatano, tiel juna kaj tiel riĉa, estas tiel malfeliĉa edzo!

Kaj, post tiu singarda monologo, Sulpicio revenis hejmen intime kontenta pro la superregado de la situacio, jam antaŭĝuante la momenton, kiam li malkaŝos al Publio sian sekreton, por iam postuli, en Jerusalemo, la hontindan prezon de sia malicaĵo, laŭ la promesoj de Fulvia.

La sekvanta tago alportis doloran surprizon al la senatano kaj ties edzino, konsternitaj ĉe la neatendita okazaĵo.

Neniu konis la cirkonstancojn, laŭ kiuj okazis la forrabo de la infano en la nokta silento.

Kvazaŭ freneza de doloro, Publio Lentulus petis ĉiajn eblajn helpojn de la aŭtoritatuloj en Kapernaum, sed neniel sukcesis. Multaj el liaj fidindaj servistoj estis vane dissenditaj por esplori la ĉirkaŭajn lokojn; kaj dum ŝia edzo plej fervoris per ordonoj kaj ĉiaj rimedoj, Livia enlitigis, prenita de neesprimebla ĉagreno.

Semele, kiu hipokritis la plej profundan bedaŭron, helpis la zorgojn de Anna ĉe la sinjorino, frakasita de doloro.

En tiu posttagmezo Publio ordonis al Komenio, tiam havanta la honoron administri ĉiujn laborojn de la bieno, kolekti ĉiujn servistojn, por ke ili lernu sian devon per severa puno, trudata al la sklavoj komisiitaj por la nokta gardo. Dum tutaj horoj ĝis verperkrepusko, skurĝo draŝadis la karnon de tri fortikaj viroj, kiuj vane petegis kompaton kaj pardonon, asertante sian senkulpecon. Nur antaŭ tiuj maljuste punataj homoj Semele konsideris la amplekson de sia konduto; sed, timante la eblajn sekvojn de sia krimo, ŝi rekuraĝigis, por pli profunde kaŝi sian kulpon kaj la teruran sekreton.

Daŭris la skurĝado ĝis la momento, kiam Livia, turmentata de tiuj korŝiraj krioj, per ekstrema peno ellitiĝis, kaj, vokinte sian edzon al angulo de la verando, el kie li malvarmsange rigardadis la torturon de tiuj mizeruloj, petegis lin:

– Publio, estas jam sufiĉa la puno de tiuj mizeraj, malfeliĉaj viroj! Ĉu ia troa rigoro, kiun ni uzis kontraŭ niaj servistoj, ne estas la kaŭzo de tia dolora puno, kiun ni ricevis de la dioj? Ĉu ankaŭ tiuj sklavoj ne estas filoj de homoj, kiuj ilin tre amis en ĉi tiu mondo?

“Malgraŭ mia patrino afliktiĝo, mi tamen opinias, ke ni ankoraŭ havas rajtojn kaj rimedojn, por teni ĉe ni la amatajn infanojn; sed, kiel granda certe estas la turmento de la patrino de malfeliĉulo, kiam ŝi vidas lin prenita for de ŝiaj karesaj brakoj, por esti vendita de fiaj negocistoj de homaj konsciencoj!

– Livia, la sufero kaŭzis al vi strangajn dekliniĝojn de la koro! – ekkriis la senatano kun serena energio.

“Ĉu vi do kredas ian absurdan egalecon de rajtoj inter Roma civitanino kaj malŝatinda servistino? Ĉu vi ne vidas, ke inter vi kaj la patrino de sklavoj ekzistas grandegaj diferencoj de sentoj?”

– Mi pensas, ke vi eraras – respondis lia edzino, kun neesprimebla ĉagreno –, ĉar eĉ la bestoj posedas la plej noblajn instinktojn, kiam temas pri patrinaj aferoj...

‘Kaj cetere, karulo, eĉ se mi neniel pravus, la prudento ordonas, ke ni ekzameni nian pozicion de gepatroj, por kokludi, ke neniu krom ni mem kulpas pri tiu okazaĵo, ĉar la infanoj estas sankta deponitaĵo de la dioj, kiuj konfidis ilin al niaj koroj kaj trudas al ni, kiel ĉiuminutan devon, la abundecon de la necesaj kareso kaj gardo; mi amare suferas tial, ke mi pensas pri la superbela amo, liganta nin al niaj infanoj, kaj ne povas trovi la kaŭzon de tiu mistera krimo, ne povas atribui la niaj servistoj la kulpon pri tiu fatalaĵo...’

Sed la voĉo de Livia rapide estingiĝis. Sveno estis la rezultato de ŝiaj energiaj vortoj, ĉe la fino de tiu tago tiel plena de maldolĉaj emocioj. Subtenata de la karesaj, sindonaj manoj de Anna, la kompatinda sinjorino enlitiĝis ardante de febro; kaj Publio, sentante, ke la amaraj veraĵoj, diritaj de lia edzino, profunde vundas al li la koron, ordonis tuj ĉesigi la punon, kio kaŭzis al ĉiuj trankviligon; post tio, li enŝlosiĝis en sian kabineton, por mediti pri la situacio.

En tiu vespero lin vizitis Sulpicio, kiu venis, por sciigi al li la fiaskon de la esploroj pri la direkto, prenita de la malgranda Marko.

Ĉe sia adiaŭo, la liktoro forte surprizis Publion, kiu observadis la nebulecan tonon de liaj vortoj, dirante:

– Senatano, mi ne povas deĉifri tiun doloran enigmon, kia estas la malapero de via infano, sed, per miaj personaj observoj, rilataj al la afero, mi eble povos orienti vin sur iu trafa vojo.

– Se vi posedas tiajn elementojn, sentime elverŝu do vian koron – diris Publio kun la plej granda intereso.

– Mia kolekto da observoj ne sufiĉas por decida klarigo, kaj, ĉar iuj medikamentoj, anstataŭ resanigi vundon, naskas aliajn nekuraceblajn ulcerojn, tial mi opinias pli bone prokrasti ĝis morgaŭ vespere la malkaŝon de miaj impresoj pri la faktoj.

Ĝojante pro la konsterniĝo de sia interparolanto, profunde impresita de liaj krimaj duondiroy, Sulpicio fine adiaŭis la Senatanon, intence aldonante:

– Morgaŭ mi denove estos tie ĉi en ĉi tiu tempo; hodiaŭ mi ne kontentigas vian deziron, ĉi tie restante ĝis pli malfrue, nur tial, ke atendas min iuj aferoj en mia kabineto, nome, kelkaj informpetoj de niaj administraj aŭtoritatuloj.

Sub la pezo de tia enigmo, Publio Lentulus forpermesis lin, ankoraŭ havante forton por purmuri:

– Nu, ĝis morgaŭ. Mi esperas la plenumon de via promeso, por la sennubiĝo de mia koro.

Nun sola, enprofundiĝis la senatano en la maron de siaj maltrankviligaj zorgoj.

Ĝuste tiam, kiam li intencis reveni Romon, jen io neatendita, pli terure aspektanta ol la malsano de lia filino – tiu malsano, dum tiom da jaroj serene kaj rezignacie travivita –, ĉar nun temis pri la neklarigebla forrabo de infano, kio serioze kompromitis la moralecon de lia hejmo kaj la honoron mem de lia familio.

En sia animo, li sentis sin homo sen iaj malamikoj en Palestino, ĉar, escepte de la filo de Andreo, la juna Saul, kiu, laŭ lia opinio, certe estis en sia patra hejmo, li neniam ofendis la dignon de iu ajn Izraelido,

sed, kontraŭe, ĉiujn li plej estime traktadis.

Kia la kaŭzo de tiu mistera krimo?

En lia memoro ekaperis la saĝa parolo de Flaminio Severus, kiu konsilis al li grandajn singardon kaj decidemon en Palestino, pro la ekzisto de banditoj, kiuj trarabis tiun regionon; sed, aliflanke, li rememoris la simbolan sonĝon, kaj, per la okuloj de la imago, ŝajnis, kvazaŭ li vidas la respektindan figuron de tiu severa, nekoruptebla juĝisto, kiu profetis, ke la senatano havos ekzistadon plenan de amarajoj pro sia malŝato kaj indiferenteco pro la savantaj veraĵoj de Jesuo el Nazaret.

Skurĝate de turmentaj pensoj, li klinis la kapon super sian skribtablon kaj lasis la vunditan fieron abunde plori ĉe la nekapablo nuligi la kaŝitajn, senkompatajn fortojn, kiuj konspiris kontraŭ lia feliĉo, sur la ombraj vojoj de lia kruela destino.

Malfrue en la nokto li penis senpezigi la koron ĉe la karesa brusto de sia edzino, kaj tiam unu konfidis al la dua siajn ĝemojn kaj larmojn.

– Publio – ŝi diris, kun la mildeco, kiu karakterizis ŝian koron – ni penu reanimi niajn fortojn favore al ni mem... Ne ĉio estas perdita! Per la rajtoj koncernantaj nin, ni povos ordoni fari ĉiajn paŝojn por la trovo de nia infano. Se necese, ni prokrastos ĝis ia nedefinita dato nian revenon al Romo, kaj ĉion ceteran la dioj faros anstataŭ ni, rekonante nian afliktiĝon kaj abnegacion.

“Nepravigeble estas, ke ni senrimede nin fordonas al nia malespero kaj do neniigas la lastajn fortojn por la lukto”.

Dirante tiujn vortojn de espero kaj konsolo, la kompatinda sinjorino mobilizis la lastan restaĵon el sia patrina energio. Dio tamen konis ŝian neesprimeblan profundan ĉagrenon ĉe tiuj sufokaj momentoj, kaj nur ŝia rafinita sento de abnegacio kaj amo turnis en forton la malfortecon de la virino, por konsoli la afliktitan koron de ŝia edzo ĉe tia dolora situacio.

– Jes, mia kara, mi faros ĉion laŭ mia povo, por atendi la helpon de la dioj – diris la senatano, iom reanimita de ŝia braveco.

La sekvanta tago pasis, plena de la samaj korprenaj esperoj, de la sama senfrukta serĉado.

Vespere, kiel li promesis, jen, en la domo de la senatano, Sulpicio Tarkvinius atendis sian decidan momenton.

Post la manĝo, en kiu Livia ne povis partopreni pro sia profunda afekcio, Publio tute intime enlasis la liktoron en la triklinion mem, sur kies glataj litoj ili ambaŭ sterniĝis por la kutima konversacio.

– Nu, hieraŭ – diris la senatano al sia ŝajna amiko – vi vekis mian patran intereson, parolante al mi pri viaj personaj observoj, kiujn nur hodiaŭ vi povos konigi al mi...

– Ho, jes! – respondis la liktoro, ŝajnigante surprizon –; estas ja vere, ke mi dezirus peti vian atenton al la misteraj okazoj dum la ĵus pasintaj tagoj. Ĉu vi havas ian malamikon en Palestino, kiun interesus via restado en regiono tiel malmulte adaptebla al la kutimoj de Romana patricio?

– Tute ne – respondis la senatano, treege surprizita. – Mi pensas, ke mi troviĝas en rondo el sinceraj

amikoj, koncerne niajn administrajn aŭtoritatulojn, kaj mi kredas, ke ekzistas neniu, kiun interesus mia restado for de Romo. Mi ja tre ĝojus, se vi povus pli bone klarigi viajn observojn.

– Tion mi demandis, ĉar en Judujo, antaŭ kelkaj jaroj, fariĝis okazo simila al la via.

“Kuras la famo, ke unu el la antaŭuloj de la nuna provincestro freneze enamiĝis en la edzinon de Romana patricio, kiu malfeliĉe ekloĝis en Jerusalemo, kaj, atinginte sian celon, ĉion faris por kontraŭi la revenon de siaj viktimoj al la ĉefurbo de la Imperio. Kiam li konstatis, ke neniel helpis la baroj de lia aŭtoritato, li faris la krimon malliberigi unu el la infanoj de la geedzoj kaj aliajn kruelaĵojn, kiuj restis senpunaj dank’ al lia politika influo ĉe la Senato.”

Publio aŭdis tiujn observojn kun ardanta cerbo.

Pro sia emocia intenseco, lia sango abunde alfluis al la kapo kaj kvazaŭ amasiĝis ĉe la tempioj; poste, palegeco kovris lian vizaĝon, kiu ricevis kadavrecan aspekton, kaj li ne kapablis difini la emocion, kiu posedis lian animon ĉe tiaj duonvortoj kontraŭ lia persona digno kaj kontraŭ la honorindaj tradicioj de lia familio.

Rapide venis al lia memoro ĉiuj akuzoj de Fulvia, kaj, juĝante siajn similulojn laŭ siaj propraj sentoj, li ne povis kredi tian monstran malicecon en la spirito de Sulpicio.

Dum lia menso baraktis en akraj pensoj, ne respondante al la liktoro, kiu observis lin, ĝuante la efikon de siaj teruraj malkaŝoj, la kalumnianto diris plu, hipokritante humilecon:

– Mi ja rekonas la gravecon de miaj vortoj, pri kiuj cetere mi petas vian bonvolan diskretecon; sed mi ne malfermus mian koron pri tio, se min ne instigus al tio la profunda intereso, kiun via amikeco sukcesis inspiri al mia sindona, sincera animo. Vere mi ne dezirus denunci iun ajn antaŭ via justa kaj nobla spirito; mi tamen tuj rakontos al vi tion, kion mi vidis per miaj propraj okuloj, por pli certe orienti viajn paŝojn en la klopodo trovi la infanon.

Kaj Sulpicio Tarkvinius, kun la falsa modesteco de siaj venenaj vortoj, disvolvis longan vicon da kalumnioj, kiujn li miksis kun sinsekvaj vinglutoj, kio pli ekzaltis la mirindan fonton de liaj fantazioj.

Li rakontis al sia dialoganto, kiu lin aŭdadis konsternita pro la koincido de liaj observoj kun la denuncoj de Fulvia, ĉiujn detalojn de la okazaĵo en la ĝardeno de la domo de Pilato; poste li sciigis, kion li ĉeestis en tiu nokto, kiam fariĝis la forrabo, kaj substrekis la fakton, ke, pro koincido, la provincestro tiam estis en Nazaret.

La senatano aŭdis lian raporton, tre pene kaŝante sian doloran miregon. La malfideleco de lia edzino, laŭ tiu spontanea denunco, estis nedubbla vero; li tamen deziris kredi la malon. Dum sia tuta edzineco, Livia montris la plej grandan sindetenemon for de la sociaj medioj kaj vivis nur por li kaj por siaj amataj infanoj. El ŝia saĝa, sincera parolo lia spirito ĉerpis la inspirojn necesajn al la sukceso en la bataloj de la vivo; sed tiu denunco konfuzis lian koron kaj nuligis ĉiujn faktorojn de lia konfido. Cetere, doloraj koincidoj vundis lian prudenton kaj naskis amarajn suspektojn en lia animo.

Ĉu efektive ŝi mem ne propetis lin humile pro la sklavoj, en la momento, kiam ili estis punataj, kvazaŭ la kulpo pro la okazaĵo pezus ankaŭ sur ŝia koro?

En la hieraŭo ŝi proponis, ke ili ambaŭ restu en Palestino, kaj tiam ŝi montris nevulgaran flamecon. Ĉu tio eble ne estis ia maniero ŝajne konsoli sian trompitan edzon, por la celo senfine restadi en tiu lando, obeante nedecajn intencojn?

Ia kirlego da antagonismaj pensoj agitis la maron de liaj doloraj meditoj.

Aliflanke, li rapide konsideris sian pozicion de politikisto, la severajn devojn, kiuj koncernis lin en la socia organismo.

La elstara ofico, la rigoraj devoj, al kiuj li sin dediĉis en la meĥanismo de la ĉiutagaj sociaj rilatoj, la fiero pri la nomo kaj la tradicoj de la familio kunfandiĝis por la energio necesa al la superregado de la emocioj en tiu momento; kaŝante la sentimentalulon, kia li esence estis, por elmontri nur la politikiston, li sukcesis diri:

– Sulpicio, mi dankas vin por via intereso, se nur viaj vortoj spegulas vian sinceran grandanimecon; sed mi devas diri, rebatante vian ĵusan opinion pri mia edzino, ke mi akceptas nenian argumenton, kiu vundus ŝian dignon kaj altan noblecon; tiujn ŝiajn naturdotojn mi devas koni pli, ol iu ajn.

“La renkontiĝo en la ĝardeno de Pilato estis de mi permesita; kaj viaj observoj en tiu nokto, kiam okazis la forrabo de mia infano, ne estas tre precizaj; niaj esploroj bezonas tute klarajn signojn.

“Mi dankas do vin pro via sindono al mi, sed via opinio de nun strekas inter ni linion, kiun mia konfido neniam kuraĝos transpasi.

“Vi estas do liberigita de la komisio, tenanta vin ĉe mia familio, ankaŭ tial, ke la probableco de mia reveno al Romo disfumiĝis kun la malapero de la infano. Ni ne povos reveni al la ĉefurbo de la Imperio, ĝis ni sukcesos denove havi lin ĉe ni aŭ havos la doloran certecon pri lia morto.

“Sekve de tio, mi kondukus nekonvene, se mi postulus la daŭrigon de via servado en Kapernaŭm, kontraŭstarante decidojn de viaj hierarkiaj superuloj; tial, vi estos eksigita el via ofico en mia domo sen iaj skandaloj, kiuj pereigus vian profesion karieron.

“Mi atendas la oportunan okazon, por komunikiĝi kun la provinestro pri vi, kaj tiam vi estos oficiale eksigita el la servado al mi, sen ia malutilo al via nomo.

“Vi do vidas, ke, kiel politikisto, mi dankas vin por via intereso kaj scias ŝati vian abnegacion; sed, kiel amiko, mi jam ne povas konfidi vin tiom, kiom ĝis hodiaŭ.”

La liktoro, kiu ne atendis tian respondon, evidente disrevita palegiĝis, sed ankoraŭ kuraĝis hipokrite rebati:

– Sinjoro senatano, venos la momento, kiam vi opinios valora mian fervoron, ne nur kiel servanto de via domo, sed ankaŭ kiel sindona, sincera amiko. Kaj, ĉar vi ne havas alian rekompencan pli bonan ol la nejustan malŝaton, por pagi mian impulson de amiko, mi tial plezure sentas min liberigita el la devoj, kiuj ligis min al via aŭtoritato.

Sulpicio tuj poste diris kelkajn adiaŭajn vortojn, kiujn Publio seke reciprokis, turmentate de la plej profundaj ĉagrenoj.

En la silento de sia kabineto la senatano ekzamenis, kiom da energio la cirkonstancoj postulis de lia koro en tia peniga situacio. Li ja rekonis, ke li kondukis kontraŭ la liktoro plej konvene kaj akorde kun la okazo, sed en sia animo li nutris doloran dubon pri la konduto de Livia. Ĉio konspiris kontraŭ ŝi kaj laŭŝajne montris ŝin al lia koro de edzo ĵaluza pri sia digno kiel personiĝon de la falsa senkulpeco.

Tiam ankoraŭ ne estis diskonigita en la mondo la admono “viglu kaj preĝu” de la eterne dolĉaj instruoj de la Kristo; kaj la senatano, preskaŭ tute sin fordonante al la jugo de la amaraj emocioj, kiuj lin frakasis, klinis la bruston sur grandan nombron da pergamenrulaĵoj kaj konvulsie ekploregis.

VII - LA PREDIKOJ ĈE TIBERIADO

Kelkaj tagoj pasis post la ĵus rakontitaj faktoj. En Kapernaum, ne nur la scenejo, sed ankaŭ la personoj konservis la saman fizionomion.

Premate de la neŝanĝebla kaj energia sinteno de la senatano, Sulpicio Tarkvinius revenis Jerusalemon, obeante la ordonojn de Pilato, kiu siavice ricevis la oficialan leteron de Publio Lentulus pri la eksigo de la liktoro.

Ni ne forgesu, ke Publio havis en Palestino plenajn povojn, kiel sendito de Cezaro kaj de la Senato, kaj ke ĉiuj provincaj aŭtoritatuloj, inkluzive de la provincestro, devis trakti lin per speciala ŝato kaj plej granda respekto.

Tial, la prokuroro de Judujo ne forgesis kiel eble plej bone anstataŭigi Sulpicion, kaj interesplene penis koni la motivojn de ties eksoficigo; ĉi tiun aferon la senatano plej noble solvis, el la politika vidpunkto. Pilato plej volonte kunhelpis por la retrovo de la malgrada Marko, komisiante por tio oficistojn al li tute fidindajn kaj veninte mem al Kapernaum, por konstati, en ilia intimeco, la faratajn klopodojn.

La senatano plej altŝate ricevis lian viziton kaj sincere kortuŝite akceptis lian helpon, ĉar la okazaĵoj malkonfirmis, antaŭ la konscienco de li, senatano, la kalumniajn akuzojn kontraŭ lia edzino.

Sed la hejma vivo de Publio ricevis profundajn ŝanĝojn. Li jam ne povis pasigi tiujn horojn da feliĉa konversacio kun sia edzino, de kiu lin apartigis ia vualo da amaraj, senfinaj duboj. Plurfoje li vane penis rricevi sian iaman fidon kaj sian spontanegan karesemon.

Ĉagrensulkoj tiam kavigis lian vizaĝon, ordinare rigidan kaj fieran, kaj envolvis liajn fizionomiajn trajtojn en ia nebulego da teruraj zorgoj.

Ĉiuj liaj samhejmanoj, inkluzive de lia edzino, atribuis tian strangan aliĝon al la malapero de lia fileto.

En la kutimaj tempoj de la manĝoj estis rimarkata lia peno por sennubigi sian mienon. Li tiam turnis sin al sia edzino, aŭ respondis ŝiajn afeblajn demandojn per rapidaj unusilabaj vortoj, kiujn li substrekis kun nekomprenebla koncizeco.

Treege suferante pro tia situacio, Livia montriĝis pli kaj pli senkuraĝa kaj vane penadis deĉifri la motivon de tiom da provoj kaj malfeliĉoj.

Ŝi ofte penis sondi la spiriton de Publio, por havigi al li iom da kareso kaj konsolo, sed li, sub decidaj pretekstoj, evitadis ŝiajn korelverŝojn.

Li aperis al ŝi preskaŭ nur en la triklinio kaj, post la kutimaj manĝoj, abrupte foriris en la grandan arkivon, kie li pasigis ĉiujn siajn horojn de premaj meditoj.

Pri Marko nenia sciigo havigis al li la plej malgrandan ombron da espero.

En unu bela mateno, kiaj estas la matenoj en Galileo, jen Livia intime konversaciis kun sia sindona, fidela servistino, al kiu ŝi, ĝentile demandite pri sia farto, respondis:

– Mi tre malbone fartas, mia bona Anna! Ĉiunokte mia koro sentakte batas kaj mi vidas pli kaj pli kreski en mia interno ian doloran senton. Eĉ se mi volus, mi ne povus ĝuste difini mian staton. La malapero de la knabeto plenigas al mi la animon per funebraj antaŭsentoj kaj pligravigas la pezon de miaj patrinaj afliktoj; sed efektive, mi ne povas eĉ konjekti la kaŭzon de tiaj grandaj suferoj...

“Kaj nun, precipe ĉagrenas min la anima stato de Publio. Li ĉiam estis pura, lojala, nobla homo; sed, jam de kelka tempo, mi rimarkas en li strangan aliiĝon de temperamento, kaj la simptomoj de ia malsano pligraviĝis post la nekomprenebla forperdiĝo de nia infano.

“Ŝajnas al mi, ke li travivas la plej fortajn spiritajn malordojn, kiuj tre difektas lian sanon..”

– Mi ja vidas, sinjorino, kiom vi suferas! – diris la servistino per karesa tono. – Mi scias, ke mi estas malaltranga, senvalora homo, sed mi petos Dion, ke li senĉese protektu vin, por la restarigo de la paco en via koro.

– Malaltranga, senvalora homo? – diris la kompatinda sinjorino, por montri al ŝi la gradon de sia sincera amikeco. – Ne diru tion, ĉar, cetere, mi ne estas el tiuj, kiuj taksas la valoron de iu homo laŭ la pozicio, kiun li okupas, aŭ la honoroj, kiujn li ricevas.

“Mi estas solfilino de gepatroj, kiuj heredigis al mi grandan riĉaĵon, Romana civitanino, ĝuanta la prerogativojn de edzino de senatano, kaj tamen vi vidas, kiom mi suferas ĉe la amaraj travivaĵoj en ĉi tiu mondo.

“La titoloj, kiujn la lulilo donis al mi, ne sukcesis ŝpari la suferojn, kiujn la destino alportis al mi, samtempe kun la juneco kaj la facile akirita riĉeco.

“Rekonu do, ke, kvankam mi estas patriciino kaj vi servistino, ni tamen ne posedas korojn malsamajn, sed la plej bonan senton de frateco, kiu malfermas al ni la pordon al amika komprenemo – la dolĉa azilo en la malglataj tagoj de la vivo.

“Mi ĉiam opiniis, alie ol la ricevita eduko, ke ĉiuj homoj estas fratoj, idoj de ia komuna origino; mi neniam sukcesis vidi ian linion, kiu apartigus tiujn, kiuj posedas multe da riĉaĵoj kaj multe da titoloj, de tiuj, nenion havantaj en ĉi tiu mondo krom la koro, kie mi lokas la valorojn de ĉiu homo, en ĉi tiu vivo.

– Sinjorino – respondis la servistino, tuŝita de plej agrabla surprizo –, viaj vortoj emocias min, ne nur tial, ke ili venas el viaj lipoj, el kiuj mi kutimiĝis aŭdi vin ĉiam bonkore kaj respekte, sed ankaŭ pro tio, ĉar la profeto el Nazaret diras al ni tion saman en siaj predikoj.

– Jesuo?! – demandis Livia kun brilantaj okuloj, kvazaŭ ĉe la mencio de tiu nomo iu Supera Forto revenigis al ŝia memoro ian fonton de konsolo, kiun ŝi estis dume forgesinta.

– Jes, sinjorino, kaj, ĉar ni parolas pri li, kial vi ne serĉas iom da konsolo en liaj diaj vortoj? Mi ĵuras, ke liaj saĝaj, amplenaj vortoj konsolus vin meze de ĉiuj ĉagrenoj kaj havigus al vi senton de nova vivo! Se vi volus, mi povus vin diskrete konduki al la hejmo de Simon, por ke vi ricevu la bonon de liaj dolĉaj lecionoj. Tiamaniere, vi ricevus la ĝojon de lia beno, ne elmetante vin al ies riproĉo, kaj nutrus vian koron per liaj lumaj instruoj.

Livia profunde pripensis tiun proponon, kiu ŝajnis al ŝi savrimedo, kaj fine respondis:

– La suferoj en la vivo ofte ŝiris al mi la koron kaj modifis mian rezonadon pri la principoj instruataj al mi ekde mia naskiĝo; tial, volonte akceptante vian konsilon, mi opinias mia devo iri al Jesuo publike, kiel faras aliaj virinoj en ĉi tiu regiono.

“Mi ja intencis paroli al li, antaŭ ol ni revenos Romon, por esprimi al li mian dankon pro la resaniĝo de Flavia, kio min profunde impresis, sed kion ni ne povis komentarii pro la malamika sinteno de mia edzo; nun denove senprotekta, en la bolado de miaj doloroj, mi petos helpon de la profeto, por ke la premata kaj turmentata koro ricevu ian mildigilon.

“Kvankam edzino de viro, kiu, pro sia politika kariero, nun havas la plej altan oficon en ĉi tiu provinco, mi tamen iros al Jesuo kiel iu, kiun la sorto ne favoris, serĉante helpon kaj konsolon.”

– Sed, via edzo, sinjorino? – demandis Anna, antaŭvidante la sekvojn de tia konduto.

– Mi penos sciigi al li mian decidon; tamen, se Publio ankoraŭfoje evitos min por pli intima interkompreniĝo, mi ja iros, ne aŭdante lin pri ĉi tiu afero. Mi surmetos la modestajn vestojn, uzatajn en ĉi tiu regiono loĝata de simplanimaj homoj, kaj iros al Kapernaum, kie mi gastos en la hejmo de viaj parencoj, dum la necesaj horoj; en la momento de la predikoj, mi volas aŭdi la parolon de la Mesio, kun pentanta koro kaj kun animo kompatanta la suferojn de miaj similuloj...

“Jam de kelkaj tagoj mi sentas min treege izolita, kaj mi bezonas ian kuraĝigon por mia koro skuata de la kruelaj provoj.”

– Sinjorino, Dio benu viajn bonajn intencojn. En Kapernaum, miaj parencoj estas tre malriĉaj kaj tre modestaj, sed vi tie estos en la sanktejo de la danko de ĉiuj; unu vorto el viaj lipoj sufiĉoj, por ke ili estu al via dispono, kvazaŭ sklavoj.

– Por mi nenia riĉeco egalas la pacon kaj la sincerecon.

“Mi ne iros al la profeto, por peti de li iajn specialajn komplezojn, ĉar sufiĉas lia karita faro al mia filino, hodiaŭ sana kaj vigla, dank’ al lia kompatemo de justulo, sed nur por havigi konsolon al mia dispecigita koro.

“Mi antaŭsentas, ke, aŭdante liajn karesajn, amikajn admonojn, mi ricevos novajn fortojn, por alfronti la plej amarajn kaj akrajn provojn.

“Mi scias, ke li rekonos min en la malriĉaj Galileaj vestoj; tamen per sia intuicio li komprenos, ke en la brusto de la Romanino batas dolora, malfeliĉa koro.”

La du virinoj tial interkonsentis iri kune al la urbo, en la posttagmezo de la venonta sabato.

Livia vane serĉis iun okazon por peti la deziratan permeson de sia edzo, favoran al ŝia intenco. Multajn fojojn ŝi senrezulte penadis sondi la spiriton de Publio, kies malvarmeco forpelis ŝian kuraĝon por la necesa alparolo.

Ŝi tamen estis decidinta spite al ĉio iri al la Majstro. Forlasita en regiono, kie nur ŝia edzo povus ŝin plene kompreni, en ŝia rondo de edukiteco, kaj akre provata ĉe la plej sentemaj fibroj de sia animo de edzino kaj patrino, la kompatinda sinjorino tiel decidis en perfekta konsento kun sia honesta kaj pura konscienco.

Ŝi faris al si novan veston, konforman al la Galileaj kutimoj, por ne vekti la atenton de la popolamaso, kiu ordinare aŭdadis la predikojn ĉe la lago; sciiginte al Komenio la bezonon, kiun ŝi havas, iri promeni en tiu tago, por ke ŝia edzo eksciuj pri tio en la tempo de la vespermanĝo, ŝi prenis la vojojn jam al ni konatajn, kune kun sia fidinda servistino.

En la modesta domo de fiŝkaptistoj, kie loĝis la familianoj de Anna, Livia sentis sin envolvita en radiantaj vibroj de amika, dolĉa sereneco. Tio estis, kvazaŭ ŝia senkuraĝigita koro trovis ian novan lumon en tiu medio de mizero, de humileco, de kareso.

La patriarka figuro de la maljuna Simeon, el Samario, elstaris, antaŭ ŝiaj okuloj, inter ĉiuj, kiuj akceptis ŝin kun la plej altaj montroj de sincera boneco. El lia profunda rigardo kaj el liaj respektindaj blankaj haroj elfluis la dolĉaj emanaĵoj de la mirinda simpleco de la antikva Hebrea popolo, kaj lia parolo, animita de fido, tuŝis la korojn je iliaj plej sentemaj kordoj, kiam li rakontadis la eksterordinarajn farojn de la Mesio el Nazaret.

Akceptita de ĉiuj kun malkaŝa simpatio, Livia kvazaŭ penetris en ian novan mondon, ĝis tiam nekonatan en ŝia ekzistado. Tre varmigis al ŝi la koron la montro de sincereco kaj simplanimeco de tiu pura, modesta vivo, sen ornamoj kaj sociaj artifiko, sed ankaŭ sen mondumaj konvencioj kaj malicaj hipokritaĵoj.

En la vesperkrepusko, konfuzita inter la mizeraj kaj la malsanaj homoj, venintaj por la benoj de la Sinjoro, jen ŝi, kun senpezigita, serena koro, atendis la feliĉan momenton aŭdi el la Majstro iun vorton de amo kaj konsolo.

La krepusko de bela kaj varma tago havigis al ĉiuj aĵoj kaj mildaj konturoj de la pejzaĝo orluman rebrilon. La kvietajn akvojn de Tiberiado krispigis dolĉaj ventetoj, kiuj sorbiĝis per la parfumo de la floroj kaj arboj. Freŝaj aerblovoj forportis la varmon kaj dissendis agrablan senton de libera vivo en la forta, sukriĉa sino de la Naturo.

Fine, ĉiuj okuloj sin turnis al ia griza punkto sur la klara spegulo de la akvo, tre malproksime, ĉe la horizonto. Tio estis la ŝipeto de Simon, portanta la Majstron por ties kutimaj instruoj.

Rideto de sopiro kaj espero tiam heligis la mienon de ĉiuj, kiuj lin atendis, baraktante en siaj suferoj.

Livia observadis tiun homamason, kiu, siavice, ankaŭ rimarkis ŝian strangan ĉeeston. Tie staris modestaj laboristoj, senkulturaj fiŝkaptistoj, multenombraj patrinoj, sur kies palegaj vizaĝoj oni povis legi la

amaran rakonton pri la plej nekredeblaj suferoj, homoj el la sennoma plebo, adultulinoj, impostistoj maldece vivantaj, senesperaj malsanuloj kaj multe da infanoj, montrantaj la stampon de la plej dolora forlasiteco.

Livia daŭre staris apud la maljuna Simeon, kies fizionomia esprimo je fido kaj dolĉeco inspiris la plej profundan respekton al ĉiuj, kiuj proksimiĝis al li; kaj tiuj, kiuj rigardis ŝian delikatan Romanan vizaĝon kaj la simplecon de ŝia Galilea vesto, kredis, ke ŝi estas iu junulino el Samario en Judujo, ankaŭ veninta de malproksime, altirite de la famo de la Mesio.

La ŝipeto de Simon delikate albordiĝis, kaj la Majstro sin direktis al la kutima loko de siaj diaj lecionoj. Lia fizionomio kvazaŭ transfiguriĝis, envolvita en radianta beleco. Liaj haroj, kiel ordinare, disŝutiĝis sur la ŝultroj laŭ la kutimo de la nazoreoj, kaj flirtis ĉe la karesaj kisoj de la vesperventetoj.

La edzino de la senatano ne povis deturni siajn ensorĉitajn okulojn for de tiu senafekta kaj mirinda figuro.

La Majstro komencis nekompareble belan predikon; liaj vortoj, forĝitaj por la eterneco mem de la tempo, ŝajnis tuŝi la plej harditajn korojn kaj resoni en ĉiuj anguloj de Galileo kaj tra la tuta mondo.

“Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

“Feliĉaj estas la plorantoj, ĉar ili konsoliĝoj.

“Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.

“Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.”

Kaj li samtempe energie kaj milde parolis pri la

favorkoreco de la ĉiela Patro; pri la teraj kaj la ĉielaj bonaĵoj; pri la valoro de la homaj zorgoj kaj angoroj, kaj aldonis, ke li venis al la mondo, ne por la pli riĉaj kaj pli feliĉaj, sed por konsoli la pli malriĉajn kaj nefavoritajn de la sorto.

La heterogena homamaso lin ravite aŭdadis, en la apogeo de siaj espero kaj spirita ĝuado.

Serena, karesa lumo ŝajnis veni el Hermono kaj heligis la pejzaĝon per nuancoj de vaporiĝintaj opaloj kaj safiroj.

Estis jam malfrue, kaj kelkaj apostoloj de la Sinjoro decidis alporti nemultajn panojn al la homoj, plej bezonantaj nutraĵon. Du grandaj korboj da simpla manĝo estis portitaj, sed la aŭdantoj estis tro multenombraj por tia malgranda kvanto. Jesuo benis ties enhavaĵon kaj, kvazaŭ mirakle, la malabunda provizo estis distranĉita laŭ pecetoj, kiujn egale ricevis centoj da homoj.

Ankaŭ Livia ricevis sian porcion kaj, ĝin glutante, sentis ian strangan guston, kvazaŭ ŝi prenis medikamenton, kapablan forigi ĉiujn malsanojn de la animo kaj de la korpo, ĉar ia trankvileco serenigis ŝian turmentatan, elreviĝintan koron. Kun tregega emocio, kiu elŝiris al ŝi larmojn, ŝi vidis, ke la Majstro, kariteme aŭdas la petojn de grandnombraj virinoj, el kiuj multaj, kiel sciis la popolo en Kapernaum, vivis diboĉan, kriman vivon.

Ankaŭ la maljuna Simeon deziris alproksimiĝi al la Sinjoro, en tiu memorinda horo de ties mallonga

restado sur la planedo. Livia lin aŭtomate sekvis, kaj, post nemultaj minutoj, ili ambaŭ troviĝis antaŭ la Majstro, kiu ilin akceptis kun sia dolĉa, profunda rideto.

– Sinjoro – respekte diris la Samaria maljunulo –, kion mi faru por iam eniri en vian regnon?

– Vere mi diras al vi – Jesuo milde respondis –, ke multaj venos el Okcidento kaj el Oriento, serĉante la pordojn de la Ĉielo; sed trovos la regnon de Dio kaj de Lia Justeco nur tiuj, kiuj profunde amos, super ĉiuj surteraj aferoj, mian Patron, kiu estas en la Ĉielo, kaj sian proksimulon, kiel sin mem.

Kaj, disĵetante sian kompateman rigardon sur la vastan homamason, li dolĉe diris plu:

– Ankaŭ multaj el tiuj, kiuj estis ĉi tien vokitaj, estos elektitaj por la granda baldaŭa ofero... Tiuj trovos min en la ĉiela regno, ĉar ilia abnegacio estos la salo de la Tero kaj la Suno de iu nova tago!

– Sinjoro – kuraĝis diri la maljunulo, kun okuloj banataj de larmoj – mi ĉion farus, por esti unu el viaj elektitoj!

Fikse rigardante la Samarian patriarkon, Jesuo murmuris kun grandega dolĉeco:

– Simeon, iru pace kaj ne brulu, ĉar, vere, mi akceptos vian oferon en la oportuna momento...

Kaj, etendante la lumradion de siaj okuloj al Livia, kiu plej atente aŭdis liajn vortojn, li diris, kun la profeta heleco de siaj admonoj:

– Vi, Livia, gloriĝu per Nia patro, ĉar miaj vortoj kaj instruoj por ĉiam tuŝis al vi la koron. Iru kaj ne malkredu, ĉar tempo venos, kiam mi ja akceptos vian edifan abnegacion!

Ĉi tiuj vortoj estis diritaj en tia maniero, ke la senatanedzino facile komprenis ilian profundan sencion, kiel ion okazontan en malproksima estonteco.

Iom post iom disiris la granda amaso de la mizeraj, malsanaj kaj afliktitaj homoj.

Estis jam nokto, kiam Livia kaj Anna revenis al la patricia domo, konsolitaj de la favoroj, kiujn ili ricevis el la helpemaj manoj de la Mesio.

Profunda sento de kvieteco kaj konsolo plenigis al ili la animon.

Sed, enirante en sian ĉambron, Livia troviĝis antaŭ la energia figuro de sia edzo, kies rigida mieno travidebligis la plej intensajn signojn de kolero, kiel okazadis en la momentoj de lia plej acida humoro. Ŝi rimarkis lian ekscitecon, sed, malsame ol iam antaŭe, ŝajnis, ke ŝi estas tute preta por venki la plej terurajn luktojn de la koro, ĉar, kun absoluta sereneco, ŝi rigardis al li en la vizaĝon kaj rekte alfrontis liajn suspektantajn okulojn. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ la floro de eterna spirita paco disvolviĝis en ŝia brusto ĉe la milda varmo de la vortoj de la Kristo, ĉar ŝi sentis, kvazaŭ ŝi atingis la ĝis tiam nekonatan sferon de ia stranga, supera trankvileco.

Fiksinte ŝin, de la kapo ĝis la piedoj, per severa, esplora rigardo, Publio ekkriis, apenaŭ bridante sian koleron:

– Nu, kion signifas tio? Kiaj potencaj motivoj instigis vian sinjorinan moŝton foriĝi de la hejmo, dum

horoj tiel nekonvenaj la matronoj?

– Publio – ŝi humile respondis, mirante pro tia ceremonia titolo –, kvankam mi ĉion faris, por sciigi al vi mian decidon promeni hodiaŭ vespere, vi tamen ĉiam vin fortiris de mi kaj evitis mian demandon, kaj mi bezonis paroli al la Mesio el Nazaret, por kvietigi al mi la malfeliĉan koron...

– Sed, ĉu vi bezonus alivestiĝi, por trovi la profeton de la popolo? – serkasme interrompis la senatano.

“Tio estas la unua fojo, ke mi vidas patriciinojn kun tiaj artifikaĵoj, por konsoli al si la koron.. Ĉu do atingas tian gradon via malŝato al niaj plej sanktaj familiaj tradicioj?”

– Mi opiniis por mi nekonvene turni al mi la atenton de la malriĉaj kaj malfeliĉaj homoj, kiuj iras aŭskulti Jesuon sur la bordo de la lago; miksanter min inter la suferantoj, mi ne kredis, ke mi malŝatos niajn familiajn morojn, sed ke mi kondutos favore al nia nomo, konsiderante la fakton, ke vi nun okupas, en ĉi tiu provinco, la plej altan politikan oficon de Imperio.

– Escepte se vi kaŝas ian alian senton tiel same, kiel vi maskas vian socian pozicion per la vesto, vi forte eraris irante, en tiu vesto, al la Mesio, ĉar, efektive, mi havas potencon por ordoni la venon de iu ajn persono en mian hejmon!

– Sed Jesuo – kuraĝe kontraŭparolis Livia – certe troviĝas multe super la homa potenco, kiu, ni scias, iafoje estas tre malfirma. Mi opinias, ke la resaniĝo de nia filineto, pri kiu ĉiaj niaj rimedoj fiaskis, estas io sufiĉa, por ke li meritu nian nepereeman dankon.

– Mi ne sciis, ke via menso estas tiel cedema antaŭ la sukcesoj de la Majstro el Nazaret, en Kapernaŭm – akre diris plu la senatano.

“La resaniĝo de nia filineto... Ĉu vi povas certigi ion, kion via persona argumentado ne kapablas pruvi per pozitivaj elementoj? Kaj, eĉ se tiu viro, havanta fortojn diajn por la simpla, neklera spirito de la Galileaj fiŝkaptistoj, faris tian resanigon per sia supernatura helpo, veninte al ĉi tiu mondo kiel sendito de la dioj, ni tamen povos nomi lin senkompata kaj kruela: li resanigis knabinon, suferantan dum tiom da jaroj, sed permesis, ke la genioj de malbono kaj malico forprenu nian amatan sanan infanon, sur kies frunto mia patra amo vidis stampita brilan, multpromesan estontecon!”

– Silentu, Publio! – ŝi respondis, posedita de ia supera forto, kiu subtenis ŝian plenan serenecon. – Pensu, ke la dioj povas severe humiligi nian absurdan vantamon... Se Jesuo el Nazaret resanigis nian tre amatan filinon, kiun ni ĉirkaŭprenis per niaj brakoj, malfortaj kontraŭ la grandega potenco de la morto, li povus ja permesi, ke ni estu tuŝitaj je la plej sankta sento de niaj animoj, per la nekomprenebla malapero de nia Marko, por ke ni volantu al la kompato pro niaj similuloj!

– Vi, sinjorina moŝto, kompromitas vin pro tiu troa toleremo, kiu iras ĝis tiu absurdo, nome, la kunfratiĝo kun la sklavoj – diris Publio krude kaj severe.

“Tia sinteno igas min serioze pensi, ke vi ŝanĝiĝis dum ĉi tiu jaro, ĉar viaj ideoj, malproksime de la socia nivelo de la Imperia ĉefurbo, falis sur la kampon de la plej degenerintaj sentoj, kio ne harmonias kun la konduto, kiun devas havi edzino de senatano aŭ Romana matrono.”

Livia ĉagrenita aŭdis la nepravigeblajn vortojn de sia edzo. Ŝi neniam antaŭe vidis lin tiel ekscitita, dum

ilia tuta geedza vivo; sed ŝi rimarkis en si mem strangan renoviĝon, kvazaŭ la kruda pano, benita de la Majstro, transformis la plej profundajn fibrojn de ŝia konscienco. Ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj, ne pro ia vundita fiero aŭ pro la sendanko, kiun tiuj nejustaj admonoj montris, sed pro granda kompatato por ŝia edzo, kiu ne komprenis ŝin, kaj ĉe la vido je la dolora uragano, vipanta lian koron noblan, sed agantan laŭ sia arbitro. Serena kaj silenta, ŝi ne defendis sin kontraŭ liaj akraj rirpoĉoj.

Tiam komprenante, ke tiu konflikto ne devas daŭri plu, la senatano direktis sin al la pordo de la ĉambro, kiun li brue malfermis, ekkriante:

– Mi neniam faris tiel penigan kaj malfeliĉan vojaĝon! Ŝajnas, ke malbenindaj genioj prezidas en miaj laboroj en Palestino, ĉar mia filineto ja resaniĝis, sed, aliflanke, mia filo perdiĝis en la ombron, kaj mi komencas perdi mian edzinon en la abismon de la senpripensaj agoj kaj de nekonsekvenco; ankaŭ mi mem fine perdiĝos por ĉiam.

Tion dirinte, li ĵetfermis la pordon per la tuta forto de siaj instinktataj movoj kaj iris al sia kabineto; dume, lia edzino, kun humiliĝinta koro, direktis sian penson al tiu afabla, dolĉa Jesuo, veninta al la mondo por savi ĉiujn pekulojn. Doloraj larmoj fluis el ŝiaj okuloj, ankoraŭ alkroĉitaj al la bildo de la lago Genesaret, kien ŝi kvazaŭ revenis spirite. Tie staris la Majstro, en trankvila teniĝo de preĝanto, kun siaj brilantaj okuloj fiksataj sur la steloj de la ĉielo.

Ŝajnis al ŝi, ke ankaŭ Jesuo rimarkis ŝian aleston en tiu ombra horo, ĉar li deturnis sian luman rigardon for de la stelplena ĉielo kaj, etendante al ŝi siajn kompatatajn brakojn, kun neesprimebla dolĉeco diris:

– Filino, lasu, ke viaj okuloj ploru pro la neperfektaĵoj de la animo, kiun Nia Patro destinis por fari paron kun la via! El ĉi tiu mondo esperu nenion, krom larmoj kaj suferoj, ĉar nur per la doloro la koroj estas polurataj por la Ĉielo... Venos momento, kiam vi sentos vin en la apogeo de la afliktoj, sed ne dubu pri mia favorkoreco, ĉar en la oportuna momento, kiam ĉiuj malŝatos vin, mi vokos vin en mian regnon de diaj esperoj, kie vi povos atendi vian edzon, tra la senĉesa fluado de la jarcentoj!...

Ŝajnis al ŝi, ke la Majstro lulos plu ŝian koron en dolĉaj promesoj pri feliĉo, sed ia brueto tiris ŝin el tiu vizia sceno de nedifineblaj lumo kaj anima raviteco.

Aerdisiĝis la bildo de ŝiaj spiritaj zorgoj, kvazaŭ ĝi estus farita el subtilegaj filigranoj.

Tamen la senatanedzino komprenis, ke ŝin ne atakis ia halucinacia konfuziĝo, kaj ame gardis en la interno de sia koro la dolĉajn vortojn de la Mesio. Kaj, demetante la Galilean veston, por denove komenci la hejmajn devojn, kun sennuba kaj konsolita animo, ŝi kvazaŭ vidis tra la nebulo, kiu malklarigis ŝiajn larmantajn okulojn, la amatan, serenan figuron de la Sinjoro sur la verdaj altaĵetoj ĉe la bordo de Tiberiado.

VIII - EN LA GRANDA TAGO SUR KALVARIO

Post la kverelo kun sia edzino, Publio Lentulus enfermiĝis en la plej suferiga melankolio.

Skurĝis lian impulseman koron doloraj suspektoj pri la konduto de la virino, kiun la destino por ĉiam katenis al lia spirito, laŭ la sistemo de la geedza vivo. Li ne povis kompreni la motivon, kial Livia

alvestiĝis por sia renkontiĝo kun la profeto el Nazaret; lia fiera temperamento ribelis kontraŭ la konduto de la edzino, ĉar li konsideris sian socian pozicion garantio de la estimo kaj respekto de ĉiuj, kaj tial, venenite de la kalumnioj de Fulvia kaj Sulpicio, li portis la plej ŝirantajn suspektojn.

Pasis kelka tempo, kaj, dum li enŝlosiĝis en muteco kaj melankolio, Livia tenis la ŝildon de la fido kaj de la karesaj, konvinkaj vortoj de la Nazaretano. Neniam plu ŝi reiris al Kapernaum, por aŭdi la konsolajn predikojn de la Mesio, sed, pere de Anna, kiu tien regule iradis, ŝi, ĉiam, kiam eble, kiom povis ŝiaj materialaj rimedoj, helpadis la pilgrimantojn, kiuj avidis la parolon de Jesuo. Profunda malĝojo plenigis ŝian senteman, noblan koron, ĉe la nekomprenebla sinteno de ŝia kunulo; tamen, vere, ŝi jam ne metis siajn esperojn en ion ajn konkretan sur la terglobo, sed turnis siajn plej ardajn aspirojn al tiu mirinda superbela regno de Dio, kie ĉio certe elspiras amon, feliĉon kaj pacon, en la abunda sino de superaj ĉielaj konsoloj.

Proksima estis la Pasko de la jaro 33. Multaj amikoj de Publio estis konsilintaj lin reveni por kelka tempo al Jerusalemo, por plistreĉigi la serĉadon de sia fileto dum la solenoj, kiuj tien koncentris, en tiu tempo, la plej grandajn homamasojn el Palestino; tial, kreskus la probableco trovi la malaperintan infanon. Sennombraj pilgrimantoj, el ĉiuj regionoj de la provinco, direktis sin al Jerusalemo, por partopreni en la grandaj festoj kaj samtempe oferi la tributojn de sia fido en la majesta Templo. En tiaj gravaj momentoj, tie troviĝis ankaŭ la nacia nobelaro, reprezentita de siaj plej eminentaj anoj. Ĉiuj politikaj partioj kolektis siajn fortojn por la eksterordinaraj laboroj de la solenoj, kiuj kunvenigis la plej grandajn amasojn de la Juda popolo; kaj tial iris tien la homoj plej influaj en tiu tempo. Ankaŭ la Romaj aŭtoritatuloj tiam troviĝis en Jerusalemo, kaj efektive tie estis preskaŭ ĉiuj centestroj kaj legianoj, servantaj al la Imperio en la plej malproksimaj lokoj de la provinco.

Publio Lentulus ne malŝatis la konsilon; antaŭ ol la urbo estis plena de pilgrimantoj kaj ekspluatistoj, li jam troviĝis tie kun sia familio kaj donis instrukciojn al siaj fidindaj servistoj, kiuj konis la malgrandan Markon, por ke estu starigita ĉeno da atentaj kaj konstantaj esploristoj, dum daŭros la festoj.

En Jerusalemo la sociaj konvencioj ne modifiĝis; estis rimarkita nur la fakto, ke Publio forlasis la hejmon de onklo Salvio kaj aĉetis en multemova strato komfortan kaj gracian vilaon, el kiu li povos vidi ankaŭ la popolan entuziasmon.

En la antaŭtagoj de la Pasko envenis torento da ĉiuklasaj pilgrimantoj el ĉiuj provincaj lokoj. Estis interese observi, en tiuj heterogenaj grupoj, la kutimojn plej diferencajn inter si.

Nekalkuleblaj karavanoj, montrantaj la plej strangajn vestojn, travenis la pordegojn de la urbo, patrolatajn de multenombraj imperiaj gvardianoj.

Dum la senatano faris komparojn pri ekonomio, socio kaj politiko, observante la popolamasojn sin direktantajn al la movoplenaj stratoj, Livia intime konversaciis kun sia fidinda kaj amika servistino.

– Ĉu vi scias, sinjorino, ke ankaŭ la Mesio venis hieraŭ al la urbo? – demandis Anna kun ĝojradio en la grandaj okuloj.

– Ĉu vere? – demandis Livia, surprizita.

– Jes, Jesuo alvenis hieraŭ Jerusalemon, kie li ricevis grandan popolan manifestacion.

“La reviviĝo de Lazaro, en Betanio, konfirmis, inter la plej nekredemaj homoj en ĉi tiu urbo, liajn diajn virtojn de Filo de Dio, kaj mi ĵus eksciis, ke lia alveno estis motivo por grandega ĝojo de la popolo. Ĉiuj fenestroj estis ornamitaj per floroj por lia triumfa preterpasado; la infanoj disŝutis verdajn kaj bonodorajn palmobranĉojn sur la vojon, honore al li kaj al liaj disĉiploj! Multe da homoj el ĉiuj lokoj, kiujn la Majstro trapasis, akompanis lin de la bordo de la lago Genesaret ĝis tie ĉi.

“Tion diris al mi konato, komisiita de onklo Simeon, kiu ankaŭ venis al Jerusalem, irante longan distancon, malgraŭ sia granda aĝo...”

– Anna, ĉi tiu sciigo estas tre konsola – bonkore diris al ŝi la mastrino –, kaj se mi povus, mi irus aŭdi la parolon de la Majstro, kie ajn li estas; sed vi ja scias, kiel malfacile mi plenumus tian deziron. Vi tamen estas liberigita de viaj devoj kaj laboroj dum la restado de Jesuo en Jerusalem, por ke vi efektive profitu el la Paskaj festoj, samtempe aŭdante la predikojn de la Mesio, kiuj tiel bone faras al ni!”

Kaj, doninte al sia servistino la necesan monhelpon, ŝi vidis, ke Anna ĝoje foriras direkte al la ĉirkaŭaĵo de la Olivarba Monto, kie staris densaj amasoj da pilgrimantoj; inter ĉi tiuj troviĝis la maljuna Simeon, el Samario, kiu brave ne hezitis, malgraŭ sia profunda aĝo, aliĝi al la vojaĝantoj laŭ la plej krudaj kaj longaj vojoj.

En la hejmo de Lentulus ne estis tiel granda la intereso pri la gravaj festoj de la Judismo.

Unu sola motivo pravigis la ĉeeston de la senatano en Jerusalem dum tiuj malkvietaj tagoj, nome lia senĉesa klopodo por trovi sian filon, kiu laŭŝajne estis perdita por ĉiam.

Li ĉiutage aŭdadis siajn fidindajn servistojn, post iliaj esploroj, kaj momento post momento li sentis sin pli sufokita de amaraj disreviĝoj, ĉe la vaneco de tiu laciga, senfrukta traserĉado.

En la hela, ĝardene ornamita vilao la horoj forpasadis, treniĝante kaj malgaje. Vane la stratoj montris viglan movadon, patrolataj de soldatoj kaj plenaj de ĉiuklasaj homoj. La konfuza kriegado de la brua popola entuziasmo trairis tiujn silentajn pordojn, kvazaŭ mallauĝigitaj eĥoj de foraj susuroj!

La ĝena hejma situacio, kiun la sanatano mem kreis al si, apartigis inter si la geedzojn, kvazaŭ ili estus senrevene disigitaj unu de la alia kaj ŝiritaj la sanktaj ligiloj de la koro.

Al tiu ŝajne kvieta izolejo Anna unu matenon revenis, post kelkaj tagoj, por informi al sia mastrino la neatenditan areston de la Mesio.

Kun spontanea, sincera simpleco de la popola animo, kiun ŝi personigis, la modesta servistino plej detale rakontis la scenon, naskitan de la sendankeco de unu el liaj disĉiploj, kiel sekvon de malkontenteco kaj ambicio de la pastroj kaj fariseoj de la Templo de la granda Izraela urbo.

Profunde afekciita de tia okazaĵo, Livia pripensis, ke, se ĝi fariĝus iam antaŭe, ŝi tuj petus la politikan protekton de sia edzo, por ke li evitigu al la Nazareta profeto la atakojn de la senbridaj ambicioj. Sed nun, en tiaj cirkonstancoj, ŝi rekonis, ke ŝi ne povas sin turni al la influo de sia kunvivanto. Malgraŭ tio, ŝi penis per ĉiuj rimedoj, kvankam senutile, alproksimiĝi al li. El ĉambro apud lia kabineto ŝi rimarkis, ke Publio akceptas multe da personoj, venantaj al li kun diskreta sinteno, por ia privata afero; kaj kurioze estis, ke laŭ ŝiaj observoj, ĉiuj parolis al la senatano, pri unu sama temo, nome, la neatendita aresto de Jesuo Nazaretano; tiu okazaĵo ja deturnis la atenton de ĉiuj for de la Paskaj festoj, ĉar granda estis la

intereso, kiun havis ĉiuj spiritoj pri la faroj de la Majstro. Kelkaj petis lian intervenon en la proceson favore al la akuzito; aliaj, en la nomo de la fariseoj, ligitaj per amikeco al la pastroj de la Sinedrio, reliefigis en liaj okuloj la danĝeron, kiun portas la predikoj de Jesuo, konsiderata de multaj kiel senkonscia revoluciulo, aganta kontraŭ la politikaj aŭtoritatoj de la Imperio.

Vane Livia esperis, en la ĉambro apud lia privata kabineto, ke ŝia edzo konsentos al ŝi du minutojn da atento.

Kiam ŝia maltrankvileco atingis sian zeniton, ŝi vidis Sulpicion Tarkvinius, kiu, laŭ ordono de Pilato, venis peti la senatanon pri la komplezo iri tuj al la prokuroro, en la palaco de la provinca administrado, por solvi aferon pri konscienco.

Publio Lentulus senprokraste kontentigis tiun peton.

Konsiderinte siajn devojn de alta politikisto, li konkludis, ke li devas forgesi ĉiajn antipatiojn rilatajn al lia privata vivo kaj plenumi siajn devojn al la Imperio.

Livia tiam tute perdis sian esperon, peti lin, en tiu tago, pri helpo favore al la Majstro. Ne sciante kial, ŝi sentis, ke intensa doloro invadas ŝian koron.

Kun la animo envolvita en ombroj, ŝi altigis al la ĉiela Patro siajn fervorajn, sincerajn preĝojn por la feliĉo de tiu viro, kiun ŝia koro konsideris luma sendito de la Ĉielo, petante ĉiujn fortojn de la bono deturni la Filon de Dio for de la persekutado kaj perfidemo de la homoj.

Veninte al la Romana provinca kortumo, en tiu neforgesebla tago en Jerusalemo, Publio Lentulus estis prenita de eksterordinara surprizo.

Densa popolamaso uraganis sur la vasta placo.

Pilato lin respekte kaj bonvole akceptis, kaj kondukis lin al ampleksa kabineto, kie troviĝis malgranda nombro da patricioj, zorge elektitaj en Jerusalemo. La pretoro Salvio, altrangaj ŝtatoficistoj kaj oficiroj, ankaŭ nemultaj civilaj Romanoj de bona reputacio, kiuj okaze troviĝis en la urbo, tie kolektiĝis, vokite de la provincestro; al Publio Lentulus ĉi tiu sin turnis, dirante:

– Senatano, mi ne scias, ĉu vi havis okazon koni, en Galileo, iun eksterordinaran viron, kiun la popolo kutimiĝis nomi Jesuo Nazaretano. Tiu viro estas ĵus arestita, sekve de kondamno diktita de la Sinedriaĵ pastroj; la popolamaso, kiu lin antaŭ nelonge akceptis en ĉi tiun urbon kun palmobranĉoj kaj floroj, nun petas, sur ĉi tiu placo, ke la provincaj aŭtoritatoj lin tuj juĝu, konfirme de la verdikto de la Jerusalemaĵ pastroj.

“Mi, tute sincere, vidas ĉe li nenian kulpon, escepte de tiu, ke li estas ekzaltita viziulo pri aferoj, kiujn mi ne povas aŭ ne scias kompreni; cetere, min profunde surprizas lia bedaŭrinda mizero.”

En tiu momento, eniris en la kabineton la du fratinoj, Klaŭdia kaj Fulvia, kiuj ekpartoprenis en tiu intima kunsido de patricioj.

– La ĵus pasintan nokton – daŭrigis Pilato, montrante sian edzinon – la senditoj de la dioj laŭŝajne manifestiĝis por mia orientado, ĉar Klaŭdia songis, ke ia voĉo rekomendas al ŝi, ke mi ne risku mian reputacion en la juĝado de tiu justa viro.

“Mi do decidis agi laŭkonscience, kaj tial mi kunvenigis ĉi tie ĉiujn patriciojn kaj eminentajn Romanojn, loĝantajn en Jerusalemo, por ke ni ekzameni la aferon en tia maniero, ke mia ago ne malutilu la interesojn de la Imperio kaj ne ofendu mian idealon je justeco.

“Kion do vi diras pri miaj skrupuloj, vi, kiel rekta reprezentanto de la Senato kaj de la imperiestro ĉi tie, en tiu ĉi momento?”

– Via konduto – diris la senatano, konsciante sian respondecon – montras la plej grandan kriterion pri la administraj aferoj.

Kaj, rememorante la bonfaron, kiun li ricevis de la profeto, nome, ke tiu ĉi resanigis lian filineton, malgraŭ la duboj starigitaj de lia vantamo kaj fiero, li aldonis:

– Mi konis intime la Nazaretan profeton en Kapernaŭm, kie neniu rigardis lin kiel konspiranton aŭ revoluciulon. Tie li agadis kiel supera, karitema, justa homo, kaj mi neniam aŭdis, ke lia parolo status kontraŭ ia ajn socia aŭ politika regulo de la Imperio. Vere, iuj tie ĉi supozas, ke li aspiras la politikan aŭtoritaton super Judujo, kaj el lia nomo profitas la ambicio kaj malkontenteco de la pastroj de la Templo. Sed, ĉar vi tenas en la koro la plej laŭdindajn skrupulojn, kial do vi ne sendu la arestiton al Antipas, pli propre kiun certe interesas la decido de la afero? Mi opinias, ke neniu, pli bone ol Herodo, kiu dum ĉi tiuj tagoj reprezentas la registaron de Galileo en Jerusalemo, povas tute konscie solvi aferon, kiel ĉi tiu, pro la cirkonstanco, ke li juĝus iun sian samlandanon, kaj ĉar vi, laŭ via konfeso mem, ne havas ĉiujn elementojn por definitiva verdikto pri ĉi tiu stranga proceso.

Ĉi tiu propono estis unuanime akceptita, kaj tial la akuzito estis de kelkaj centestroj kondukita al Herodo Antipas, strikte laŭ la ordonoj de Pilato.

En la palaco de la provincestro de Galileo estis Jesuo akceptita plej sarkasme. La Majstro el Nazaret, kiun la simplanimaj homoj alnomis “Reĝo de la Judoj” kaj kiu simbolis la esperon de multaj el liaj sekvantoj – inter kiuj la fama disĉiplo de Keriot – pri iaj politikaj postuloj, estis traktita de la Tiberiasa princo kiel ia vulgara konspiranto, humiligita kaj venkita.

Sed Antipas, por igi la Prokuroron de Judujo senti, kiel ridindaj li konsideris ties skrupulojn, ordonis, ke la arestito estu traktata plej malestime. Li vestis la Majstron per blanka tuniko, egala al tiu de la tiutempaj princoj, metis sur liajn brakojn malpuran kanon, kvazaŭ sceptron, kaj dornan kronon sur lian teren klinitan kapon; poste, li reirigis la profeton al la sankcio de Pilato, meze en la tumulta kriegado de la ekscitita popolamaso.

Multe da Romanaj soldatoj, ĉirkaŭ la akuzito, protektis lin kontraŭ la atakoj de tiuj furiozaj, senkonsciaj homoj.

Vestita, kiel mokataĵo, per reĝa tuniko, kronita per dornoj kaj tenante kanon, kiel simbolon de lia regado super la mondo, Jesuo videbligis tra siaj profundaj okuloj neesprimeblan melankolion.

Eksciinte, ke la arestito estas resendita de Antipas al lia juĝado, la provincestro sin turnis denove al siaj samlandanoj, dirante:

– Miaj amikoj, malgraŭ niaj penoj, ankaŭ Herodo petas nian konsilon, por ke estu sankciita la kondamno

de la Nazareta profeto, kaj tial li resendas al ni ĉi tiun en pli grava situacio antaŭ la popolo; efektive, kiel plej alta aŭtoritato en Tiberias, li kondukis kontraŭ la arestito kun indigniga sarkasmo kaj komprenigis al ni la malŝaton, kun kiu tiu viro devas esti traktata de niaj juĝaj kaj administra povoj.

“Tia amara situacio min tre malĝojigas, ĉar la koro diras al mi, ke tiu viro estas justulo; sed, kion ni faru en tia embaraso?”

El la izola ĉambro, kie kunsidis la malgranda konsilantaro el patricioj, rapide kunvokitaj, estis aŭdataj la bruaj eĥoj de la ribelanta, terure krieganta popolo.

Adjutanto de la provinestro, nomata Polibio, saĝa kaj honesta homo, pala kaj preskaŭ tremanta penetris en la ĉambro kaj parolis al Pilato:

– Via provinestra moŝto, la furioziĝinta popolamaso minacas al ĉi tiu domo per invado, se vi, kiel eble plej baldaŭ, ne konfirmos la kondamnan verdikton kontraŭ Jesuo Nazaretano...

– Sed tio estas absurdo! – ekkriis Pilato, emociita. – Kaj, efektive, kion diras la profeto en tiaj cirkonstancoj? Ĉu li ĉion suferas sen ia riproĉa vorto, sen ia oficiala apelacio al la tribunaloj?

– Sinjoro – respondis Polibio, ankaŭ impresita de tia sinteno –, la arestito estas eksterordinara pro sia sereneco kaj rezignacio. Li lasas sin konduki de siaj turmentantoj tiel obeeme, kiel ŝafo, kaj pri nenio plendas, eĉ ne pri la absoluta forlaso, en kiun ĵetis lin preskaŭ ĉiuj preferataj disĉiploj de lia doktrino!

“Kortuŝite de liaj suferoj, mi iris al li persone; kaj demandite pri sia martireco, li asertis, ke li povus voki la legiojn de siaj anĝeloj kaj en unu minuto pulvorigi la tutan Jerusalemon; ne tio tamen, li diris, estas parto de la Diaj Planoj, sed, kontraŭe, lia malhonora humiliĝo, por ke estu plenumitaj la ordonoj de la Sanktaj Skriboj. Mi tiam proponis al li, ke li povus apelacii al via grandanimeco, por ke estu starigita proceso laŭ niaj juĝaj leĝoj kaj pruvita lia senkulpeco; sed li rifuzis tian rimedon, dirante, ke li bezonas nenian politikan protekton de la homoj kaj fidus sole nur al justeco, kiu, li diras, estas la Justeco de lia Patro, kiu estas en la Ĉielo!”

– Eksterordinara viro! – diris Pilato, kies miregon ankaŭ sentis la ĉeestantoj.

“Polibio – li diris plu –, kion ni povus fari por evitigi al li tian malglorigan morton, en la krimaj manoj de la sencerba popolo?”

– Sinjoro, ĉar estas necesa ia rapida decido, tial mi proponas lian skurĝadon sur la placo, por ke ni vidu, ĉu ni tiel sukcesos mildigi la popolan koleron kaj ŝparos al la arestito malhonoran morton en la manoj de senkonsciencaj krimuloj...

– Sed, skurĝado? – mirante ekkriis Publio Lentulus, kiu antaŭvidis la turmentojn de la terura puno.

– Jes, mia amiko – diris la provinestro, parolante al li tute respekte –, la propono de Polibio estas bona. Por evitigi al la akuzito malhonoran morton, ni devas uzi tiun rimedon. Vivante en Judujo jam de preskaŭ sep jaroj, mi konas ĉi tiun popolon kaj ĝian timigan sintenon, kiam ĝiaj pasioj ekfuriozas.

La turmento estis do ordonita, laŭ la supozo, ke ĝi antaŭhaltigos pli grandan malbonon.

Antaŭ ĉiuj Jesuo estis senkompate skurĝita, meze de la mokfajfado de la ekscitita popolamaso.

Ĉe tiu dolora momento, Publio kaj kelkaj Romanoj por iom da tempo foriris el la privata ĉambro, kie ili kunsidis, por observi la instinktajn movojn de tiu fanatika, malklera kolekto da homoj. Ŝajnis, ke la pilgrimantoj venis Jerusalemon, ne por la gajaj solenoj de la Pasko, sed nur por kondamni la humilan Mesion el Nazaret. Iam kaj iam fariĝis necesa la energia enmiksiĝo de kuraĝaj centestroj, kiuj per sabrobatoj dispelis iujn pli ardajn grupojn.

La senatano decidis alproksimiĝi al la turmentato, kiu elportis siajn dolorajn, ekstremajn provojn.

Tiun samtempe energian kaj dolĉan vizaĝon, ĉirkaŭ kiu li iam, sur la bordo de Tiberiado, vidis aŭreolon el milda, kompatema lumo, nun banis sanga ŝvito, kiu, miksiĝante kun doloraj larmoj, fluadis el lia frunto, disŝirita de akraj dornoj; liaj delikataj fizionomiaj trajtoj ŝajnis invaditaj de angora, neesprimebla paleco; liaj haroj pendis, kun tiu sama ĉarmo, sur la duone nudaj ŝultroj, sed nun ili estis nekombitaj pro la sidado de la malhonora krono; lia korpo, tremante, ŝanceliĝis ĉe ĉiu forta skurĝobato, sed lia profunda rigardo estis saturita de tiu sama mistera beleco kaj montris ian amaran, nedifineblan melankolion.

Ĉe unu momento liaj okuloj renkontis tiujn de la senatano, kiu mallevis sian fronton, tuŝite de la nepereema impreso de tiu superhoma majesteco.

Profunde emociita, Publio Lentulus revenis en la palacon, kien post kelkaj minutoj reeniris Polibio, por sciigi al la provincestro, ke la skurĝado ne satigis la koleron de la rabia popolo, kiu postulis la krucumon de la kondamnito.

Dolore surprizita, la senatano per intima tono demandis Pilaton:

– Ĉu vi okaze ne havas ian malliberulon kun elfinita proceso, kiu povus anstataŭi la profeton en tia terura puno? La pleboj havas kaprican, ŝanĝeman animon, kaj tre povas esti, ke la nuna kontentiĝos per la krucumo de iu krimulo, anstataŭ tiu viro, kiu eble estas ia magiisto aŭ viziulo, sed vere karitema, justa koro.

La provincestro de Judujo dum kelkaj momentoj enpensiĝis kaj petis la helpon de sia memoro, por trovi la deziratan solvon. Venis tiam en lian kapon la nomo de Barabaso, terura homo, atendanta en la karcero sian mortpunon, konata kaj malamata de ĉiuj pro sia multfoje montrita maliceco, kaj li fine respondis:

– Tre bone! Por faciligo de la koro de ni ĉiuj, troviĝas en la urba karcero krimulo, kiu povus ja havi malhonoran morton, anstataŭ la profeto.

Kaj, ordonante, ke kiel eble fariĝu silento, el unu el la altaj partoj de la domo, li turnis sin al la popolo, ke tiu elektu inter la bandito kaj Jesuo. Sed, kio forte surprizis ĉiujn ĉeestantojn, la homamaso ekmuĝis, aŭdigante torenton da insultoj:

– Jesuon! Jesuon! Ni absolvas Barabason! Ni kondamnas Jesuon! Krucumu lin! Krucumu lin!

Ĉiuj Romanoj proksimiĝis al la fenestroj kaj observis la senkonsciencan teniĝon de tiu krimaj homoj, regataj de siaj elĉenigitaj instinktoj.

– Kion fari antaŭ tia sceno? – emociite demandis Pilato la senatanon, kiu lin atente aŭdadis.

– Mia amiko – energie respondis Publio –, se la decido nur de mi dependus, mi bazus ĝin sur niaj ĵuraj kodoj, kies evoluogrado jam ne permesas ian kondamnon tiel malformalan, kiel ĉi tiu, kaj mi ordonus al

la kavalerio dispeli la frenezan popolamason; sed mi opinias, ke mia pasema aŭtoritato ĉe via administrado ne rajtigas min fari tian perforton, kaj cetere vi jam akiris ĉi tie sperton dum sep seninterrompaj jaroj.

“Miaflanke, mi kredas, ke ĉio estas farita, por ke la decidoj ne estu trorapidaj. Antaŭ ĉio, la arestito estis sendita al la juĝo de Antipas, kiu komplikis la situacion antaŭ la nepriresponda popolaĉo, neĝuste komprenante la taskon de la registaro, ĉar li lasis al vi la lastan vorton pri la afero; poste, vi ordonis la skurĝadon, por kontentigi la ribelantan popolon, kaj nun vi ĵus proponis alian krimulon por la krucumo, anstataŭe de la akuzito: ĉio estis vana.

“Kiel homo, mi staras kontraŭ ĉi tiu senkonsciencia, malfeliĉa popolo, kaj ni ĉion farus por savi la senkulpulon; sed kiel Romano, mi opinias, ke tia provinco, kia estas ĉi tiu, estas ja ekonomia ero de la Imperio, kaj tial ni ne rajtas enmiksiĝi en ĝiajn grandajn moralajn problemojn: la respondecon por ĉi tiu nigriga morto, laŭ mia penso, devas do nun preni sur sin ekskluzive tiu malklera, freneziginta popolo kaj la ambiciaj, egoistaj pastroj ĝin estrantaj.”

Pilato kaŝis sian frunton inter la manoj, kvazaŭ por mature pripensi tiujn konsiderojn; sed, antaŭ ol li povis vortigi sian opinion, jen Polibio afliktite envenas kaj diskrete diras:

– Via provincestro moŝto, estas necese, ke vi rapidigu vian decidon. Klaĉemaj spiritoj, instigitaj de la intrigo de la templaj pastroj, ekdubas vian fidelecon al la aŭtoritato de Cezaro, kaj metas vian dignon sur kampon suspekteblan por ĉiuj... Krom tio, la popolaĉo penas invadi ĉi tiun domon, kaj tial estas necese, ke vi, sen perdo de eĉ unu minuto, prenu ian ajn decidon.

Ĉe tiaj trudaj kondiĉoj, Pilato ruĝiĝis de kolero kaj ekscitite ekkriis, kvazaŭ sub la jugo de la plej stranga determinismo:

– Nu bone! Pri ĉi tiu hontinda krimo mi lavas al mi la manojn! La popolo de Jerusalemo estos kontentigita...

Kaj farante tiun agon, kiu lin por ĉiam famigis, li diris kelkajn vortojn al la kondamnito; tuj poste li ordonis konduki ĉi tiun al ĉelo, kie la profeto povos resti kelke da minutoj ne suferante la trivialajn insultojn de la senbrida popolamaso, antaŭ ol esti kondukata al Golgota, kiu, en la vulgara lingvo, devas esti interpretata kiel Loko de Kranio.

Varmega suno faris la atmosferon sufoka, ne-elportebla.

Kiam fine la furiozeco de la popolamaso satiĝis de siaj bedaŭrindaj malsaĝaĵoj, multenombraj soldatoj eskortis la arestiton, kiu, sub la malhonora kruco, destinata de la tiama justeco al la banditoj kaj rabistoj, sin direktis per ŝanceliĝaj paŝoj al la monteto de krucumado.

Ĝis la momento, kiam li ekiris sub sia kruco, neniu interesiĝis pri li ĉe la aŭtoritato de la estro de Judujo. El tio la senatano konkludis, ke ĉiuj, kiuj ĉirkaŭis la Nazaretan Majstron sur la bordo de la lago, en Kapernaŭm, lin tute forlasis.

Ĉe unu el la fenestroj de la palaco li kompatplene konsideris la malŝaton kontraŭ tiu homo, kiu lin iam superregis per la magnetika forto de sia nekomprenebla persono, kaj observis la ondan movadon de la flamanta popolaĉo, ĉe la ekmarŝo de la neforgesebla irantaro.

Ĉe la flanko de la Majstro jam ne estis vidata la kora kunsenteco de liaj disĉiploj kaj multenombraj sekvantoj. Nur kelke da virinoj – inter kiuj elstaris la impresa, afliktita figuro de lia patrino – lin ame subtenis en lia lasta kaj dolora provo.

Iom post iom la vasta placo kvietiĝis en la sufoka varmo de la proksimiĝanta tagmezo.

De ioma distanco estis ankoraŭ aŭdata la muĝado de la plebo, kune kun la blekado de la ĉevaloj kaj la tintado de la armilaroj.

Impresitaj de tiu spektaklo, kiu efektive ne estis eksterordinara en Palestino, la Romanoj kolektiĝis en unu el la ampleksaj salonoj de la regpalaco, kaj tie, en vigla konversacio, komentariis la sovaĝajn instinktojn kaj pasiojn de la furioziĝinta plebo.

Post kelkaj minutoj, Klaŭdia ordonis alporti dolĉaĵojn, vinojn kaj fruktojn; kaj, dum la konversacio temis pri la problemoj de la provinco kaj la intrigoj de la kortego de Tiberio, tiu grupo da homoj tute ne ekpensis, ke el la kruda kaj modesta kruco sur Golgota ekradios glora lumo por ĉiuj teraj jarcentoj.

IX - LA VENKINTA KALUMNIO

Jesuo el Nazaret estis forlasita de siaj disĉiploj kaj pli proksimaj sekvantoj, sed tiel ne kondukis la granda nombro da senfamaj homoj, lin akompanantaj kun pura, sincera sindono.

Estas vere, ke tiuj superaj animoj ne montris malkaŝe sian simpatian antaŭ la freneziĝinta popolamaso, timante ties detruan furozon; tamen multaj kompatemaj spiritoj, kiel Anna kaj Simeon, rigardadis de proksime la martirigon de la Sinjoro sub la malhonora skurĝo, plenaj de doloraj larmoj kaj esperante, ke la justeco de Dio povos baldaŭ manifestiĝi kontraŭ la maliceco de la homoj kaj favore por la Mesio.

Sed iliaj lastaj esperoj disfumiĝis, kiam, sub la pezo de la kruco, la turmentato iris per ŝanceliĝantaj paŝoj al la monto, kie plenumiĝos la lasta insulto, post la konfirmo de la malnobla verdikto.

Konstatinte, ke la krucumo estas neevitebla, Anna kaj ŝia onklo decidis iri al la hejmo de Publio, por peti la helpon de Livia ĉe la provincestro.

Dum la funebra, impresa irantaro malrapide ekmarŝis, ambaŭ apartiĝis de la homamaso kaj prenis sunan strateton, kurante al la sopirata helpo.

Enirinte en tiun hejmon, dum Simeon ŝi pacience atendadis sur proksima trotuaro, Anna iris al la senatnedzino, kiu ŝin akceptis surprizita kaj afliktita.

– Sinjorino – ŝi diris, apenaŭ kaŝante larmojn –, la profeto el Nazaret estas jam sur la vojo al la malhonora morto sur la kruco, inter rabistoj!

Pli forta emocio retenis ŝian voĉon, sufokitan de ploro.

– Ĉu eble? – ekkriis Livia, dolore surprizita. – Ĉu lia aresto ne okazis antaŭ nemultaj horoj?

– Tamen estas vere... – respondis ŝia servistino kortuŝita. – Kaj en la nomo de tiuj suferantoj, kiuj vi vidis konsolataj de lia karesa, amika parolo, ĉe Tiberiado, mi kaj mia onklo Simeon venis, por petegi vian personan helpon ĉe la provincestro, por ia lasta peno favore al la Mesio!

– Sed, ĉu tia kondamno, sen ia studado, sen ia ekzameno, estus ja ebla? Ĉu do tiu ĉi popolo vivas sen alia leĝo, krom la leĝo de barbareco? – ekkriis la sinjorino, posedita de videbla indigno por la neatendita sciigo.

Kvazaŭ dezirante fortiri ŝin de ĉia alia temo, ne oportuna ĉe tiu momento, ŝia servistino decide kaj dolore insistis:

– Tamen, sinjorino, mi ne povas perdi eĉ unu minuton.

– Sed antaŭ ĉio mi devus demandi mian edzon pri la afero... – monologis la senatnedzino, subite pensante pri siaj edzinaj devoj.

Kie estis Publio en tiu momento? De la mateno ĝis tiam, li ne revenis hejmen, post la insista alvoko de Pilato. Ĉu li kunhelpis por la kondamno de la Mesio? En palpebruma daŭro la malfeliĉa sinjorino plendetale ekzamenis la situacion, ankaŭ rememorante la netakseblajn favorojn, kiujn ŝia koro ricevis de la karitemaj manoj de la Narareta Majstro; kaj, kvazaŭ ekmovita de ia supera forto, kiu igis ŝin forgesi ĉiujn pasemajn surterajn aferojn, ŝi diris kun heroa decidemo:

– Nu, Anna, mi iros kune kun vi peti la protekton de Pilato al la profeto. Atendu min unu momenton, dum mi denove surmetos tiun Galilean veston, kiun mi uzis en tiu vespero en Kapernaum; tiel, mi iros al la provincestro, ne turnante sur min la atenton de la senbrida homamaso.

Post nemultaj minutoj, ne prikalkulante la sekvojn de sia ekstrema konduto, Livia troviĝis sur la strato, denove en la simpla vesto de la mizeraj virinoj de Galileo, kaj tie interŝanĝis kun la maljunulo el Samario kaj ties nevino amarajn impresojn pri la doloraj okazaĵoj.

Kiam ŝi proksimiĝis al la provinca administrejo, ŝia koro pli forte ekbatis, devigante ŝin pli mature pensi pri tiu sia paŝo.

Ĉu ŝi ne agas trokuraĝe, irante al la provincestro sen ia antaŭa parolo al sia edzo? Ĉu tamen ŝi vane ne faris ĉion eblan, por proksimiĝi al sia nekomunikiĝema, kolera edzo, celante restarigi lian iaman konfidon al ŝi? Kaj Pilato? En sia menso ŝi ankoraŭ tenis ĉiujn detalojn de la amaraj emocioj el tiu nokto, kiam li estis al ŝi pli malkaŝa koncerne la voluptamajn sentojn, kiujn ŝia virina figuro inspiris al li.

Livia hezitis, penetrante en unu el la anguloj de la granda placo, nun dormanta sub brule varmega suno.

Ŝia menso protestis kontraŭ la teniĝo, kiun ŝi prenis ĉe la peto de sia servistino, peto, kiu reprezentis, laŭ ŝia opinio, la afliktitan petegon de multenombraj senhelpaj estuloj; sed ŝia koro tute aprobis tiun lastan penon favore al la ĉiela sendito, kiu, resaniginte la ulcerojn de ŝia filineto, plenigis per nedetruibla trankvilo ŝian turmentatan, kiel ofte nekomprenatan koron de edzino kaj patrino. Cetere, dum tiu interna konflikto inter la racio kaj la sento, ĉi tiu igis ŝin memori, ke Jesuo, sur la bordo de la lago, parolis al ŝi pri amaraj oferoj por lia grandioza afero; kaj ĉu ne estus tiu la sankta horo de la monstro de ŝia arda fido kaj de la pruvo de ŝia dankemo? Kvietigita de la profunda kontenteco pri la plenumo de tiu ama devo, ŝi kuraĝe ekpaŝis antaŭen; dum ŝiaj du gekunuloj restis atendente ŝin sur unu el la larĝaj anguloj de la placo,

Ŝi rapide kaj senĝene sin direktis al la palaco de Pilato.

Sia koro batis sentakte. Kiel ŝi povos trovi la provincestron de Judujo en tiu momento? Arda suno ĉion envolvis en netolerebla, sufoka varmo.

La irantaro, sin direktanta al Golgoto, ekmarŝis antaŭ preskaŭ unu horo, kaj la palaco nun ŝajnis droninta en ia atmosfero de silento kaj dormo, post la dolora konfuzo de tiu tago.

Nur kelke da centestroj gardostaris ĉe tiu konstruaĵo; kiam Livia pli alproksimiĝis al la ĉefaj pordoj, enlasantaj en la internon, jen Sulpicio aperis antaŭ ŝi; plej konfide kaj senkulpe, ŝi parolis al li, petante la komplezon havigi al ŝi privatan kaj tujan aŭdiencon de la provincestro, por ke ŝi pritraktu kun ĉi tiu la doloran situacion de Jesuo el Nazaret.

La liktoro ŝin fiksitis, de la kapo ĝis la piedoj, per rigardo plena de avideco kaj voluptamo, kiuj lin karakterizis; kaj, sen ia dubo konvinkite pri la nemoralaj rilatoj de tiu virino kun la prokuroro de Judujo, laŭ siaj personaj observoj, pro koincidoj, kiuj aspektis al li kiel la perfekta realeco de tiu laŭŝajna devodekliniĝo, li supozis en tiu stranga ago, ne la montritan motivon, kiu ŝajnis al li bonega preteksto pro forigo de iaj suspektoj, sed ŝian celon, nome, ke ŝi iras renkonte al sia preferata viro.

Abomeninda homo, kies servojn uzis la provincestro kiel instrumenton de siaj malicaj pasioj, Sulpicio opiniis, ke tia intervidiĝo devos okazi plej intime; kaj, pensante pri tio, ke Publio Lentulus ankoraŭ troviĝas en la palaco, konversaciante kun siaj amikoj, li kondukis Livian al parfumita ĉambro, kie vice staris altprezaj vazoj kun aromoj el Oriento, saturitaj de subtilaj, kapturnaj fluidaĵoj, kaj kie Pilato iafoje akceptis la sekretan viziton de virinoj de suspektinda konduto, invititaj al liaj diboĉaj plezuroj.

Tute ne konante la reton da cirkonstancoj, kondukantaj ŝin al tre malagraba situacio, Livia akompanis la liktoron en tiun ĉambron; kvankam surprizita de tiu stranga lukso, ŝi, sola kaj maltrankvila, dum kelkaj minutoj atendis la momenton persone petegi la multinfluan intervenon de la prokuroro de Judujo favore al la grandanima Nazareta Mesio.

Tamen, nek ŝi, nek Sulpicio rimarkis, ke esploraj okuloj ilin sekvis kun profunda intereso, ekde la strato ĝis la nomita privata ĉambro.

Tio estis Fulvia, kiu, konante tiun ĉambron de la palaco, hazarde vidis la senatnedzinon sub la masko de tiu modesta kampara vesto kaj kiu, konstatinte tiun neatenditan viziton, eksentis la koron ardanta de terura ĵaluzo.

Sulpicio Tarkvinius faris familieran geston al la provincestro, kiu ĝin tuj obeis, irante renkonte al li en la vasta koridoro, kaj tie ili flustris inter si iajn kelke da vortoj, per kiuj Pilato eksciis pri la dezirata privata intervidiĝo; dum tio, la malicema Fulvia direktis sin al ĉambroj, kiujn ŝi intime konis, por tute certigi, post la kurtenoj, pri la ĉeesto de Livia en tiu privata ĉambro, destinita por la malĉastaj elverŝoj de la instinktoj de la provincestro.

Tute certa pri la fakto, la kalumniema virino antaŭĝuis la momenton, kiam ŝi prenos Publion je la mano, ke li vidu per propraj okuloj la ŝajnan adulton de sia edzino; kiam ŝi revenis al la vasta salono, apenaŭ montrante la nigran kontentecon de sia animo, ŝi ankoraŭ povis aŭdi Pilaton ĝentile diri al siaj invititoj:

– Miaj amikoj, mi esperas, ke vi konsentoj al mi kelke da minutoj, por urĝa privata intervidiĝo, kiun mi ne

atendis en ĉi tiu momento. Mi kredas, ke nun, kiam estas elfinita la kondamno de la Mesio el Nazaret, jam frapas ĉi tiuj pordoj la homoj, ne kuraĝintaj lin publike defendi, en la oportuna momento! Ni vidu!

Kaj, foririnte post la unuanima konsento de la ĉeestantoj, la provincestro eniris en la privatan ĉambron, kie, treege surprizite, li renkontis la noblan figuron de Livia, kiu estis pli bela kaj pli alloga en tiu simpla vesto kaj kiu parolis al li jene:

– Provincestra moŝto, kvankam ne petinte permeson de mia edzo, mi tamen decidis veni ĉi tien, pro la urĝeco de la afero, por petegi politikan subtenon por la absolvo de la profeto el Nazaret. Kian malbonon li, modesta, bona, karitema, justa homo, ja faris, ke li meritis tian malhonoran morton, inter du rabistoj? Tial, konante lin persone kaj konsiderante lin homo inspirita de la Ĉielo, mi kuraĝas alvoki viajn altajn kvalitojn de politikisto, favore al la akuzito!

Ŝia voĉo tremis, evidentigante la emociojn, kiuj posedis ŝian animon.

– Sinjorino – respondis Pilato, kiel eble plej penante tuŝi kaj logi ŝian koron per la hipokrita mildeco de siaj vortoj –, mi ĉion faris por evitigi al Jesuo la morton sur la malhonora kruco, venkante ĉiajn miajn skrupulojn de imperia administranto, sed, bedaŭrinde, ĉio estas elplenumita. Nia leĝaro estas venkita de la furiozeco de la krima popolamaso, kiu senmotive eksplodigas sian nekompreneblan malamon.

– Ĉu do ni ne povus esperi iun alian paŝon favore al tiu kompatema, justa viro, kondamnita kvazaŭ vulgara maliculo? Ĉu li estos ja krucumita pro la krimo praktikadi kariton kaj semadi fidon en la koro de siaj similuloj, ankoraŭ ne sciantaj akiri ĝin per si mem?

– Bedaŭrinde, tiel estas... – respondis Pilato ĉagrenita. – Ni ĉion faris, por eviti la malsaĝaĵojn de la ribelanta plebo, sed miaj skrupuloj ne sukcesis; kaj tial mi kontraŭvole estis devigita sankcii la punon al Jesuo.

Dum momento Livia sin fordonis al siaj doloraj meditoj, kvazaŭ demandante sin, ĉu ia nova paŝo ne estas farebla sen perdo de eĉ unu minuto.

Siaflanke, farinte kelkan paŭzon, la provincestro lasis, ke la viraj instinktoj tute elrompiĝu, en tiaj cirkonstancoj.

Tiu tago estis plena de akraj, intensaj luktoj. Ia stranga fizika malvigliĝo subigis liajn plej potencajn centrojn de la organa forto; sed, antaŭ liaj okuloj, kutimiĝintaj al konkero kaj, ofte, al la rimedoj de la krueleco mem, staris tiu virino, kiu iam rezistis al li... Ia forta kateno kvazaŭ ligis lin al ŝia simpla, ravanta figuro, kaj li, pli ol iam antaŭe, deziris posedi ŝin, farante el ŝi, kiel ankaŭ el la ceteraj, objekton de siaj nedaŭraj pasioj. Precipe tiu atmosfero malklarigis la plej purajn fontojn de lia prudento. Tiu ĉambro estis ekskluzive destinita por liaj noktaj malĉastaĵoj, kaj ebriigaj fluidaĵoj, ŝvebantaj super ĉiuj ĝiaj punktoj, konfuzis la plej noblajn pensojn.

Li vidis la virinon, kiun li avidis, dum kelkaj sekundoj enprofundiĝintan en ĉarmaj meditoj, antaŭ lia impona figuro.

Tiu senpretenda gracieco, saturita de kvazaŭ infana impulsiĝemo kaj ligita al la klareco kaj profundeco de ŝiaj okuloj de hejma anĝelo, nebuligis al li la bontonon, kiu iafoje elŝprucis el la sovaĝeco de liaj maljustaĵoj kaj kruelaĵoj, tiel en la privata, kiel en la politika vivo.

Antaŭeniĝante, kvazaŭ ekprenita de ia nekontraŭstarebla forto, li subite ekkriis, igante ŝin kompreni la danĝerecon de la situacio, en kiun ŝi mem enpaŝis:

– Nobla Livia – li komencis, en la bolado de siaj nepuraj pensoj –, mi neniam forgesis tiun nokton, plenan de muziko kaj de steloj, kiam mi malkaŝis al vi, je la unua fojo, la ardecon de mia koro, flamanta por vi... Forgesu, por unu momento, tiujn nekompreneblajn Judojn, kaj ankoraŭfoje aŭdu la sinceran parolon de la profundaj sentoj, kiujn vi inspiris al mi per viaj virtoj kaj senkompara beleco!

– Sinjoro! – la kompatinda sinjorino havis fortojn por ekkrii, penante repuŝi la insulton.

Sed la provincestro, kun la trokuraĝo de la impetemaj viroj, ne povis sin deteni kaj ne obei siajn impulsiĝemajn kapricojn, malrespekte prenante al ŝi la manojn.

Streĉante ĉiujn siajn fortojn, Livia tamen sukcesis sin tiri de liaj longaj, feraj brakoj, kaj energie rebatis:

– Malantaŭen, sinjoro! Ĉu iu politikisto tiele traktus Romanan civitaninon, edzinon de klera senatano de la Imperio? Eĉ se mi ne havus ĉiujn tiujn titolojn, kiuj devus honorindigi min en viaj voluptaj, nehomaj okuloj, mi kredas, ke en ĉi tiu momento ne decus, ke vi forgesu la elementan devon je respekta bonedukiteco, kiun ĉiu viro ŝuldas al virino!

La provincestro, kutimiĝinta al la plej rafinitaj procedoj de allogo, detenis sin antaŭ tiu neatendita heroa konduto.

La kontraŭsatro de tiu virino ekscitis lian deziron venki ŝian noblan fieron kaj ŝian nekorupteblan virton.

En la kirlego de la voluptamo, ombranta lian prudenton, li sentis sin puŝata kontraŭ tiun delikatan, malfortan kreitaĵon; tamen ia nebridebla potenco kvazaŭ alfrontis liajn danĝerajn kapricojn de pasiulo kaj nuligis liajn forotjn, necesajn al la plenumo de tiu ago.

Ĉe tiu momento, ĵetinte al li doloran rigardon, en kiu povis esti legata la tuta grado de ŝia sufero kaj de ŝia abomeno ĉe la ricevita ofendo, la senatanedzino foriris profunde afekciita, kun la cerbo konfuzita de konfliktantaj pensoj.

Sed, antaŭ ol ni vidos Livian eliranta el tiu ĉambro, ni retropaŝu ĝis antaŭ kelkaj minutoj; tiam Fulvia petis la nevon de sia edzo bonvoli aŭdi ŝin sekrete, kaj sciigis lin pri ĉio okazanta.

La senatano ricevis teruran pikon ĉe la koro, kaj antaŭsentis, ke la devodekliniĝo de lia edzino tuj ricevos sian konfirmon antaŭ liaj propraj okuloj; li tamen ankoraŭ hezitis kredi tian malnoblaĵon.

– Livia ĉi tie? – li per kaveca tono demandis la edzinon de sia onklo, komprenigante, per la nuanco de la voĉo, ke ĉio estas nenio alia ol krima kalumino.

– Jes – ekkriis Fulvia, avidante doni al li palpeblan pruvon de sia aserto –, ŝi konversacias kun la provincestro, en ties privata ĉambro, ne konsciante pri sia situacio, nek pri la cirkonstancoj, en kiuj fariĝas tia intervidiĝo; efektive, Klaŭdia ankoraŭ troviĝas en ĉi tiu domo, kaj, antaŭ la leĝo, mia fratino estas la leĝa edzino de Pilato, morale ruinigita pro la malsolidaj kutimoj de la Kortego, el kiu li estis sendita ĉi tien, sekve de gravaj similaj okazaĵoj!

Publio Lentulus, en sia naiveco, malfermegis la okulojn, kaj ekportis plej terurajn sentojn; plej akra

malfido lin venenis, ĉar ja ĉiuj cirkonstancoj konspiris kontraŭ lia edzino, kvankam li kondukis pri tiu afero kun la plej alta dozo de sia toleremo kaj liberaleco.

Lia sendecideco ankoraŭ montris plej grandan nekredemon je la akuzoj, kiujn li aŭdis; sed, rimarkinte lian angoran silenton, la vipura virino malpacience ekkriis:

– Senatano, akompanu min tra ĉi tiuj ĉambroj, kaj mi donos al vi la ŝlosilon de la enigmo, ĉar, per viaj propraj okuloj, vi konstatoj la frivolecon de via edzino...

– Ĉu vi frenezas? – li demandis kun terura severeco – Familiestro de nia socia rango, escepte se pli forta intimeco konsentas al li tiun rajton, ne devas koni la angulojn de iu domo, kiu ne estas lia propra hejmo.

Kompreninte, ke ŝi maltrafis, Fulvia daŭrigis sian atakon kun sama firmeco:

– Nu, ĉar vi ne deziras deflankiĝi de viaj principoj, ni alproksimiĝu al unu el ĉi tiuj fenestroj. El ĉi tie vi ja povos certiĝi pri la vereco de mia parolo, vidante, ke Livia eliras el la privataj ĉambroj de ĉi tiu palaco.

Kaj kvazaŭ prenante sian dialoganton je la mano – tiel granda estis la morala frakaso posedanta lian animon –, la pretoredzino direktis sin al la balustrado de proksima fenestro, sekvate de li, kiu ŝin akompanis per ŝanceliĝaj paŝoj.

Ne estis necesaj aliaj argumentoj, kiuj lin pli bone konvinkus.

Veninte al la loko preferata de Fulvia kiel observejo, ili post nemultaj sekundoj vidis, ke la pordo de la montrita ĉambro malfermiĝas kaj, samtempe, ke Livia eliras en sia Galilea maskovesto, lasante vidi tra la fizionomio la evidentajn signojn de ŝia emocio, kvazaŭ ŝi volis sin tiri de ia situacio, ŝin dolore dispremanta.

Publio Lentulus sentis sian animon disŝirita por ĉiam. En palpebruma daŭro li konstatis, ke li perdis sian tutan kapitalon da socia kaj politika altrangeco, kune kun la plej sanktaj aspiroj de sia koro. Ĉe la konduto de sia edzino, rigardata de li kiel neviŝebla honto, kiu por eterne makulos lian nomon, li kredis sin la plej malfeliĉa el la homoj. Ĉiuj revoj estis nun mortintaj, kaj terure frakasitaj ĉiuj liaj esperoj. Por la viro, la virino elektita kiel edzino reprezentas la sanktan bazon de ĉiuj liaj faroj en la bataloj de la vivo, kaj Publio sentis, ke tiu bazo forglitas de sub liaj piedoj kaj ŝancelas al li la cerbon kaj la koron.

Tamen en tiu tumulto da fantomoj de sia tro ekscitita imagemo, mokantaj lian iluzian feliĉon, li vidis la dolĉajn figurojn de siaj infanoj, kiuj silentaj kaj kortuŝitaj lin fikse rigardadis. Unu el ili vagas en ia nekonata regiono, sed lia filineto atendas lian patran kareson kaj de tiam estos la motivo de lia vivo kaj la forto de ĉiuj liaj esperoj.

– Kion vi diras nun? – demandis Fulvia triumfinta, tirante lin el lia dolora silento.

– Vi venkis! – li seke respondis per voĉo sufokita de emocio.

Kaj, havigante al la fizionomia plej grandan energion, li revenis, per pezaj paŝoj, al la vasta salono, kaj heroe adiaŭis siajn amikojn, pretekstante negravan kapdoloron.

– Senatano, atendu unu momenton. La provincestro ankoraŭ ne revenis el siaj privataj ĉambroj – diris unu

el la patricioj.

– Mi tre dankas! – respondis Publio per obtuza tono. – Miaj estimataj amikoj certe pardonos mian insiston kaj diros mian adiaŭon kaj dankon al nia afabla gastiganto.

Kaj li senprokraste ordonis pretigi la portoseĝon, kiu lin kondukos hejmen per la fortaj manoj de la sklavo, por ĝuigi iom da ripozo al la koro, skurĝata de doloraj, neforgeseblaj emocioj.

Dum la senatano foriras profunde ĉagrenita, ne sekvu Livian, revenantan al la placo, por sciigi siajn du geamikojn pri la nula rezultato de sia provo.

Dolora malĝojo premis ŝian koron. Ŝi neniam supozis laŭ sia simpla, konfidema nobleco, ke la prokuroro de Judujo povos ricevi ŝian petegon kun tia granda montrado de indiferenteco kaj malkompatemo por ŝia situacio.

Alproksimiĝante al Anna kaj al ties onklo, ŝi penis forpuŝi de si tiujn emociojn, ĉar ŝi devis kaŝi tiun ĉagrenon en la fundo de sia koro.

Ĉe la du malaltklasaj samkredanoj, ŝi ellasis sian angoron, malgaje ekkriante:

– Anna, ĉio bedaŭrinde estas perdita! La verdikto estas definitiva, kaj jam nenia helpo estas ebla! La kormilda profeto el Nazaret neniam plu reiros al Kapernaum, por havigi al ni siajn dolĉajn, amikajn konsolojn! La hodiaŭa kruco estos la premio de ĉi tiu mondo al lia senlima boneco!

Ĉiuj tri homoj havis okulojn nebuligitajn de larmoj.

– Estu do farita la volo de la Patro, kiu estas en la Ĉielo! – ekkriis la servistino, elrompiĝante per plorsingultoj.

– Filinoj – diris la maljunulo el Samario, kun la profunda, klara rigardo fiksita sur la ĉielo, kie brilegis la radioj de la arda suno –, la Mesio neniam kaŝis de ni la veron pri siaj oferoj, pri la turmentoj, lin atendantaj en ĉi tiu regiono, por instrui al ni, ke lia regno ne estas el ĉi tiu mondo! En la ombro de mia maljuneco, mi kapablas konfesi al mi la grandan realecon de liaj vortoj, ĉar honoroj kaj vanaj famoj, juneco kaj riĉeco, kaj ankaŭ la pasemaj ĝojoj sur la tersupraĵo neniom valoras: ĉio tie ĉi estas iluzio, kiun englutas la abismoj de la doloro kaj de la tempo... La sola tuŝebla estas la realeco de nia animo, iranta al tiu mirinda regno, kies belecon kaj lumon portis al ni liaj neforgeseblaj, amplenaj lecionoj...

– Sed – interrompis Anna en larmoj – ni neniam plu vidos Jesuon Nazaretanon kun konsolaj vortoj al niaj koroj!...

– Kion vi diras, infano? – ekkriis Simeon firmtone. – Ĉu vi do ne scias, ke la Majstro certigis sian nepran konsolan ĉeeston inter tiuj, kiuj, en ĉi tiu mondo, kunvenas kaj kunvenos en lia nomo? Revenonte nun la Samario, mi starigos krucon ĉe la pordo de nia kabano kaj tie kolektos la kredantojn, kiuj deziras daŭrigi la amajn tradiciojn de la Mesio.

Kaj post paŭzo, dum kiun ŝajnis, ke li vekiĝas sub la pezo de akraj zorgoj, li diris energie:

– Ni perdu neniom da tempo... Ni iru al Golgoto... Ni ankoraŭfoje ricevu la benojn de Jesuo!

– Tre plaĉus al mi akompani vin ambaŭ – diris Livia impresita –, sed mi devas rapidi al mia hejmo, kie atendas min la zorgado de mia filino. Mi scias, ke vi pardonos mian maleston, ĉar mi efektive staros, en penso, ĉe la kruco de la Majstro, meditante pri liaj turmentoj kaj neesprimeblaj suferoj... Mi akompanos tiun nepriskribeblan agonion; la ĉiela Patro konsentu al ni la forton, kiun ni bezonas, por kurage elporti ĉi tiun doloran travivaĵon!

– Iru, sinjorino, ĉar ankaŭ viaj edzinaj kaj patrinaj devoj estas plej sanktaj – delikate diris Simeon.

Kaj dum la maljunulo kaj lia nevino direktis sin al Kalvario, suprenirante la publikajn vojojn, kondukantajn al la monteto, Livia rapidis returne al sia hejmo, prenante la plej mallongajn pasejojn laŭ la transversaj stratetoj, por plej baldaŭ atingi sian celon, ne nur por la neatendita cirkonstanco, ke ŝi, pelita de la tiamaj devoj, eliris el sia domo en nekutima vesto, sed ankaŭ pro tio, ĉar ia neklarigebla angoro vipadis ŝian koron, igante ŝin senti pli fortan bezonon de preĝado kaj meditado.

Veninte hejmen, ŝi unue zorgis pri tio, ke ŝi reprenis sian kutiman tunikon, kaj poste elektis pli silentan lokon en siaj ĉambroj, por fervore preĝi al la senlime kompatema Patro.

Post kelkaj minutoj ŝi aŭdis bruetojn, per kiuj ŝi sciigis, ke ŝia edzo revenas kaj eniras en sian kabineton, kies pordon li tondre fermis.

Ŝi tiam memoris, ke el ŝia domo povus esti vidata, en la malproksimeco, la movado de la popolamaso sur Golgoto; ŝi tial serĉis ian fenestran angulon, el kiu ŝi povos rigardi la ekstremajn suferojn de la Nazareta Majstro. Tion apenaŭ farinte, ŝi tuj vidis sur la deklivoj de la monto la grandan kolekton da homoj kaj la starigon de la tri famaj krucoj, en tiu neforgesebla tago.

Tiu monteto havis neniom da vegetaĵoj kaj beleco, kaj de malproksime ŝiaj okuloj povis distingi la polvokovritajn vojojn kaj la malgajan, sekan pejzaĝon sub varmega suno.

Regata de premantaj pensoj, Livia preĝadis kun la tuta emocia intenseco de sia spirito.

Al ŝia anima vidado ankoraŭ aperis la dolĉaj, ĉarmaj bildoj de la “maro” de Galileo; al ŝia memoro revenis tiu neforgesebla krepusko, kiam, inter modestaj kaj suferantaj homoj, ŝi atendis la agrablan momenton aŭdi, je la unua fojo, la konsolan parolon de la Mesio. Ŝi ankoraŭ vidis la krudan ŝipeton de Simon, sin apogantan al la delikataj bordaj floroj, dum la blanka ŝaŭma punto lekis la helkolorajn ŝtonetojn... Jesuo estis tie, kun siaj grandaj okuloj, mildaj kaj profundaj, ĉe tiu multego da senesperaj, elreviĝintaj estuloj...

Sed tiu kruco, starigita sur la Loko de Kranio, enigis ŝian koron en amaran meditado.

Longe preĝinte kaj enpenŝiĝinte, ŝi observis la tri malproksimajn krucojn, kaj laŭŝajne aŭdis la muĝadon de la krima densa popolamaso, kiu, ĉe la kruco de la Majstro, vomadis al li terurajn insultojn.

Subite ŝi sentis sin tuŝita de ia ondo da nedifinebla konsolo. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ la sufoka aero de Jerusalemo pleniĝis per melodiaj, neesprimeblaj vibroj. Ekstazante, ŝi rimarkis, sur la spirita retino, ke la granda Kalvarian krucon ĉirkaŭas multenombraj lumoj.

En la eksterordinara varmo de tiu tago, densaj nuboj kolektiĝis en la atmosfero kaj antaŭsentigis tempeston. Post nemultaj minutoj la tutan ĉielan volbon invadis nigraj ombroj; sed en tiu momento, ŝi

rimarkis inter la ĉielo kaj la Tero longan vojon, laŭ kiu malsuprenvenis sur Golgoton legioj da graciaj flugilhavaj estuloj. Milope ĉirkaŭante la krucon de la Majstro, ili kvazaŭ transformis ĝin en fonton de ĉiama viva lumo.

Altirita al tiu grandega fokuso de brilega lumo, ŝi sentis, ke ŝia animo, liberiĝinte el la karna korpo, transiras sur la supron de Kalvario, por fari al Jesuo la lastan honoron de sia sindono. Vere, ŝi nun vidis la Mesion el Nazaret ĉirkaŭita de siaj lumaj senditoj kaj de la potencaj legioj de siaj anĝeloj. Ŝi neniam pensis, ke ŝi vidos lin kun tia bela, dia aspekto, kun la okuloj turnitaj al la ĉielo, kvazaŭ fiksitaj sur ia supertera feliĉego.

Tuŝita de lia mirinda lumo, senatenta al ĉio, kio ĉirkaŭ ŝi okazis, ŝi lin rigardadis kaj petis pri forto, rezignaciemo, espero, korfavoro.

Ĉe unu momento, ŝia spirito sentis, sin superverŝita de nedifinebla konsolo. Kvazaŭ posedita de la plej granda emocio en sia vivo, ŝi rimarkis, ke la Majstro deturnas sur ŝin sian rigardon, per kiu li ŝin envolvis en ia ondo da neesprimebla amo, kaj da luma kareso. Tiuj serenaj, kompatemaj okuloj, en la ekstremaj turmentoj de lia agonio, kvazaŭ diris al ŝi: “Infano, atendu la eternan lumon de mia regno, ĉar sur la Tero, tiel ni devas ja morti!”

Ŝi deziris respondi la dolĉajn admonojn de la Mesio, sed radiluma fluo de spirita vivo sufokis ŝian koron. Ŝi tamen, en la interno de sia animo, asertis, kvazaŭ alparolante sin mem: “Vere, tiel ni devas ja morti! Jesuo, donu al mi kuraĝon, rezignaciemon kaj esperon, por ke mi plenumu viajn instruojn, por ke mi iutage atingu vian regnon de amo kaj justeco!”

Abundaj larmoj banis ŝian vizaĝon, en tiu ekstaza, mirinda vizio.

Sed ĉe tiu momento la pordo brue malfermiĝis kaj la obtuza, kolera voĉo de ŝia edzo, vibrante en la malfacile spirebla aero, ŝin subite vekis kaj tiris el ŝiaj konsolaj vizioj.

– Livia! – li ekkriis, kvazaŭ pikita de decidaj, ekstremaj emocioj.

Reveninte en sian hejmon, Publio Lentulus tuj direktis sin al sia kabineto, kie li longe restadis absorbita de akraj pensoj. Post kiam li sentis sian cerbon turmentata de la decidoj plej kontraŭaj unuj al aliaj, venis al li en la kapon, ke li devas peti la kompaton de la dioj por lia afliktiĝo. Li iris al la hejma altaro, kie staris la senanimaj simboloj de liaj familiaj dioj; sed, dum Livia ricevis netakseblan konsolon, akceptante en la koron la instruojn de Jesuo, ke ni pardonu, estu humilaj kaj praktiku la bonon, la senatano, vane klopodis por mensklariĝo kaj trankviliĝo, preĝante ĉe la piedoj de la statuo de malvarma, fiera Jupitero. Li vane petis pri inspiro siajn hejmajn diojn, ĉar tiuj estis la konkretiĝinta tradicio de la imperialismo de lia raso, tradicio konsistanta el vantamo, fiero, egoismo kaj ambicio.

En tia animstato, venenite de ĵaluzo, li senprokraste serĉis sian edzinon, por sputi kontraŭ ŝin la tutan malŝaton de sia amara malespero.

Ŝin krude vokinte, li rimarkis, ke ŝiaj duonfermitaj okuloj estas plenaj de larmoj, kvazaŭ rigardante ian spiritan vizion, nevideblan por li. Livia neniam antaŭe ŝajnis al li tiel spiriteca kaj tiel bela, kiel en tiu momento; sed la demono de la kalumnio tuj blovis en lin, ke tiu plorado estas nenio alia ol signo de konscienciproĉo kaj pento pro la farita kulpo, ĉar lia edzino certe sciis, ke li tiam troviĝis en la regpalaco: el tio estus prave konkludi, ke ŝi kalkulis je la ebleco de lia severa puno.

Tirita el sia ekstazo de la vibranta voĉo de sia edzo, la kompatinda sinjorino rimarkis, ke ŝia vizio tute disfumiĝis kaj ke la ĉielo super Jerusalem estas invadita de plena mallumo; estis aŭdataj la teruraj rulbruoj de malproksimaj tondroj, kaj timegigaj fulmoj laŭ ĉiuj direktoj strekadis la atmosferon.

– Livia – ekkriis la senatano per forta, malrapida voĉo, vidigante sian penon por subpremi la konflikton de siaj emocioj –, la pentaj larmoj estas senutilaj en ĉi tiu dolora momento de niaj destinoj, ĉar ĉiuj ligiloj de reciproka amo, kiuj nin kunigis estas nun rompitaĵoj por ĉiam...

– Sed, kion tio signifas? – ŝi sukcesis diri, montrante sian teruron, naskitan de tiaj vortoj.

– Eĉ ne unu vorton pli! – respondis la senatano, pala de kolero, kun sovaĝa, nesentema sereneco. – Mi vidis hodiaŭ, per miaj propraj okuloj, vian abomenan krimon, kaj nun mi scias la celon de via modesta vesto de Galileano! Via sinjorino moŝto aŭdos min ĝis la fino sen ia ajn praviga parolo, ĉar perfido, kiel la via, povos trovi sian justan punon nur en la profunda silento de la morto.

“Mi tamen ne volas mortigi vin. Mia morala konstruo ne akordas kun krimo; ne tial, ke ekzistas kompatemo en mia animo, ĉe la ebla pento de via koro en la oportuna okazo, sed pro tio, ĉar mi ankoraŭ havas filinon, sur kies frunton resalte falus mia kruelaĵo kontraŭ via kruelaĵo, kiu sufiĉas por fari nin malfeliĉaj la tutan vivon...”

“Viro honesta kaj preta lavi de ia ajn ofendo mian honoron, mi tro amas mian nomon kaj la tradicojn de mia familio, ke mi fariĝus monstra, krima patro.

“Mi povus forlasi vin por ĉiam, pro via treege mallojala paŝo, sed ankaŭ la servistoj de ĉi tiu domo manĝas ĉe mia tablo, kaj, jam ne rekonante la aliajn titolojn, kiuj alligis min al via sinjorino moŝto, mi ankoraŭ vidas en via persono la patrinon de miaj kompatindaj infanoj. Tial, de nun, antaŭ la palpeblaj pruvoj pri via devio, en ĉi tiu nigra tago de mia destino, mi malŝatas ĉian moralan flankon de via sendigna persono kaj konsideros, en ĉi tiu domo, sole nur vian karakteron de patrino, kiun mi kutimiĝis respekti ĉe la plej mizeraj neraciaj estaĵoj.”

La petegantaj okuloj de la kalumniita virino lasis vidi la neesprimeblan turmenton, kiu ŝiris ŝian kareseman, tre senteman koron.

Ŝi humile estis sur genuoj ĉe la piedoj de sia edzo, kaj doloraj larmoj ruliĝadis sur ŝiaj palaj vangoj.

Livia tiam rememoris Jesuon, dum liaj neesprimeblaj suferoj. Ŝi ja memoris liajn vortojn kaj estis preta al sia ofero. Meze de siaj doloroj, ŝi kvazaŭ sentis la guston de tiu pano de vivo, benita de liaj diaj manoj, kaj kredis sin liberigita el ĉiaj surteraj zorgoj. La ideo pri la ĉiela regno, kie ĉiuj afliktitoj estas konsolataj, kvietigis ŝian dolorantan koron dum ŝiaj unuaj pripensoj pri la kalumnio de kiu estis viktimo ŝia spirito, skurgata de ekstreme akraj provoj.

Malgraŭ tiu teniĝo de serena humileco, la senatano, en la plej alta grado de sia morala angoro, parolis plu:

– Mi donis al vi ĉion, kion mi posedis plej puran kaj sanktan en ĉi tiu mondo, esperante, ke vi respondos al miaj plej noblaj idealoj; sed, malŝate forpuŝinte ĉiujn viajn devojn, vi ne hezitis sur nin verŝi manplendon da koto... Ol la kunviveco kun mia koro vi preferis la diboĉajn morojn de ĉi tiu epoko de neprirespondaj homoj, koncerne la familian sistemon, kaj glitis sur la kruta deklivo, kondukanta la virinon

en la abismojn de la krimo kaj de la malpieco.

“Sed aŭdu bone miajn vortojn, kiuj signas la plej terurajn ĉagrenojn de mia koro!

“Vi neniam foriĝos de la hejmaj laboroj, de la ĉiutagaj devoj en mia domo. Se vi faros ankoraŭ ion, per kio vi incitos la lastajn restaĵojn el mia toleremo, ne atendu de mi alian sekvon ol la morton.

“Ne instigu miajn honestajn manojn al tia ago. La familiaj tradicioj laŭŝajne elviŝiĝis el via spirito, sed ĉiam vivaj ili estos en mia animo, kiu deziras al ili senĉese kulti en la sanktejo de miaj plej karmemoraj aferoj. Vivu kun via penso turnita al la malhonoro, sed detenu vin kaj ne moku publike miajn plej sanktajn sentojn, ĉar ankaŭ pacienco kaj liberaleco havas ja limon.

“Mi scios, kiel releviĝi post ĉi tiu falo, al kiu viaj senpripensaĵoj puŝis min.

“De nun, via sinjorina moŝto estos, en ĉi tiu domo, nenio alia ol servistino, konsidere al via patrineco, kiu hodiaŭ evitigas al vi la morton; tamen ne enmiksiĝu en la solvon de ia ajn problemo de la edukado de mia filino. Mi scipovos konduki ŝin sen via kunlaboro, kaj, ĝis la fino de miaj tagoj, mi serĉos la fileton, eble perditan pri via krima nezorgemo. Mi koncentros sur miajn infanojn la grandegan amon, kiun mi, laŭ la nobleco de mia konfidemo, rezervis al vi, ĉar de nun ne venu al mi kun la intimeco de edzino, kia vi ne sciis esti, pro via nepravigebla mallojaleco, sed kun la respekto, kiun sklavino ŝuldas al sia mastro!”

Dum fariĝis nedaŭra paŭzo de la akra, amara parolo de la senatano, Livia turnis al li treege angoran rigardon. Ŝi deziris paroli al li tiel, kiel ŝi al li ĉiam parolis, malfermante al li sian senteman, kareseman koron; sed, konante lian impulsigeman temperamenton, ŝi komprenis la vanecon de ĉia provo por sinpravigo.

Post la unuaj pripensoj kaj, trapikita de doloro, aŭdinte tiun teruran duondiron pri la malapero de ilia infano, ŝi lasis la koron barakti en longa, senmotiva ŝanceliĝado. Ĉe tiuj kalumnioj, kiuj faris ŝin tiel malfeliĉa, ŝi ja pripensis, ĉu la bonaj agoj ne estas vidataj de tiu senlime bona Patro, kiu, ŝi kredis, el la ĉielo zorgas ĉiujn suferantojn, laŭ la superbelaj promesoj de la Nazareta Mesio. Ĉu ŝi ne havis ĉiam noblan, modelan konduton, kiel sindona patrino kaj karesema edzino? Ĉu ŝia tuta koro ne vivis en tributado de espero kaj fido je tiu regno de superega justeco, kuŝanta trans la materia vivo? Cetere, ŝia trorapida iro al Pilato, sen la permeso de la edzo, havis nur la noblan celon savi de malhonora morto Jesuon el Nazaret. Kie la malfruanta supernatura helpo, kiu heligus ŝian doloran situacion kaj montrus tian maljustaĵon?

Amaraj larmoj nebuligis ŝiajn lacajn, senfortiĝintajn okulojn.

Sed, antaŭ ol ŝia edzo rekomencos sian akuzon, ŝi denove sin vidis, en penso, antaŭ la kruco.

Dolĉa venteto kvazaŭ mildigis la ulcerojn, kiujn la riproĉoj de ŝia edzo estigis en ŝia koro. Ia voĉo, sonanta en la plej profundaj anguloj de ŝia konscienco, atentigis ŝian senteman spiriton pri tio, ke ankaŭ la Nazareta Majstro estas senkulpa kaj en tiu tago faris, sur la kruco, sian lastan spiron, ricevante la insultojn de kruelaj turmentantoj: kaj li estis justa, bona, kompatema. De tiuj, kiujn li plej amis, li estis perfidita kaj forlasita en la ekstrema horo de la atesto pri fideleco, kaj de ĉiuj, kiujn li servis per sia karitemo kaj amo, li estis trapikita per la venenaj dornoj de la plej amara maldanko. Antaŭ la bildo de liaj grandegaj suferoj, Livia plifirmigis sian fidon kaj petis de la Ĉiela Patro la kuraĝon necesan, por ke ŝi venku la krudajn provojn de la vivo.

Ŝia moldolĉa meditado daŭris nur unu monenton, unu minuton, post kiu Publio Lentulus parolis plu, per ekscitita tono:

– Mi atendas ankoraŭ du tagojn, daŭrigante la esplorojn por trovi mian malfeliĉan infanon! Post tiuj nemultaj horoj mi reiros al Kapernaum, por atendi la pasadon de la tempo... Dum estos necese, mi restos sur ĉi tiu malbeninda scenejo; kaj, koncerne vian sinjorinan moŝton de nun retiriĝu en vian sendignon, ĉar, kiel mi grandanime indulgas vian vivon en ĉi tiu momento, mi tiel same ne hezitos doni al vi la lastan punon, kiam oportune!

Kaj, malferminte la elirpodon, kiu tremis ĉe la rulado de la tondro, li ekkriis per terura tono:

– Livia, ĉi tiu dolora momento signas la porĉiaman disiĝon de niaj destinoj. Ne kuraĝu transpaŝi la limon, kiu por eterne apartigas nin unu de la dua, en la sama hejmo kaj dum la sama vivo, ĉar tia ago eble sekvigus vian senapelacian kondamnon al morto.

Post li fermiĝis la pordo kun bruo mallaŭtigita de la muĝado de la tempesto. Jerusalemo ja troviĝis sub la potenco de detrua ciklono, kiu postlasis signojn de elruiniĝo, dezerteco kaj morto.

Restinte sola, Livia amare ekploris.

Dum la atmosfero estis lavata de la pluvego, torente falanta meze en la krakoj de la tondroj, ankaŭ ŝia animo perdis siajn dolĉajn iluziojn kaj elpuriĝis en la amaraj disveriĝoj.

Vere, ŝi ja estis sola kaj treege malfeliĉa.

De tiu momento, ŝi jam ne povos ĝui la helpon de sia edzo, nek la dolĉajn karesojn de sia filino; tamen ia anĝelo de sereneco prizorgis ŝin tiel sindone, kiel la gardostarantoj, neniam forlasantaj sian postenon de kompatado, amo kaj savo. Tiu luma Spirito, verŝante la esperbalzamon en la kalikon de ŝia premata koro, igis ŝin senti, ke ŝi ankoraŭ multe posedas: tio estis trezoro – la fido, liganta ŝin al Jesuo, al la Mesio de abnegacio kaj savo, kiu atendas ŝin en sia regno de lumo kaj favorkoreco.

X - LA SAMARIA APOSTOLO

En la sekvanta tago Publio Lentulus, plivigliĝis la klopodojn por la retrovo de sia fileto, inter ĉiuj venintaj al Jerusalemo por la Paskaj festoj, kaj asignis la premion de unu grandsesterco (*), tio estas, du mil kvincent asaroj, al tiu, kiu prezentos al liaj servistoj la malaperintan infanon.

(*) Mil sestercoj.

Ni ne forgesu, ke la servistino Semele kaj ŝiaj samhejmaj koleginoj estis submetitaj al plej rigora enketo, okaze de la puno de la nezorgemaj servistoj, komisiitaj por la nokta gardo en la domo de la senatano.

Publio ordinare ne permesadis, ke la virinoj ricevu fizikajn punojn, sed ĉe la mistera malapero de la infano li turmentis la servistinojn per ja senkompata esplora pridemandado. Ne estas necese diri, ke Semele asertis sian absolutan senkulpecon kaj lasis rimarki nenion, kio kompromitus ŝian konduton.

La tri servistinoj, pli rekte zorgantaj pri la infano, inter kiuj ŝi mem, devis tamen kunlabori kun la sklavo pri la serĉado de Marko tra la placoj kaj stratoj de Jerusalemo, kvankam ili ĉiutage havis siajn ripozajn horojn. Tiujn horojn Semele uzadis por viziti aŭ revidi amikojn, pasigante la plej grandan parton de tiu tempo en la bieno, kie Andreo kulturis siajn olivarbojn kaj sukriĉajn vinberejojn, en negranda distanco for de la enirejo de la urbaj ĉeflokoj.

En tiu tago ŝi tie vigle konversaciis kun la forrabinto kaj ties edzino, dum la infano dormis en angulo de iu ĉambro.

– Nu, ĉu do la senatano difinis unu grandsestercon kiel premion al tiu, kiu redonos al li la infanon? – mir-plena demandis Andreo de Ĝioras.

– Jes, vere – respondis Semele enpenŝiĝa. – Ĝi estas ja granda Roma sumo, kiun neniu gajnos en ĉi tiu mondo.

– Se ne estus mia prava kaj arda deziro de venĝo – diris la forrabinto kun sia malica rideto –, jen ni profitus la okazon, por nin regali per tiu ne malŝatinda sumo. Sed, fi! ni ne bezonas tian monon. Nenion ni bezonas el tiuj malbenindaj patricioj!

Semele aŭskultis lin indifere, laŭŝajne tute ne atentante la konversacion; li tamen pretervidis nenian fizionomian movon de sia kunkulpulino, kvazaŭ penante trovi en ŝia simpla, humila teniĝo ian kaŝitan penson.

Tial, por sondi ŝian animan sintenon, li diris per ŝajne trankvila, senzorga tono, kvazaŭ esplorante ŝiajn plej sekretajn intencojn:

– Semele, kiaj estas la lastaj sciigoj pri Benjamen?

– Nu, Benjamen – ŝi respondis, parolante pri sia fianĉo – ankoraŭ ne decidis definitive fiksi la daton de nia geedziĝo, pro niaj multaj malfacilaĵoj.

“Kiel vi scias, mia deziro labori celas nur la atingon de nia idealo, nome aĉeti tiun dometon en Betanio, jam al vi konatan; tuj kiam ni realigos nian intencon, ni estos por ĉiam ligitaj unu al la dua.”

– Bone – diris Andreo, kun la psikologia sinteno de iu, kiu trovis la ŝlosilon de ia enigmo –, pli aŭ malpli frue vi ja havos ĉion necesan al la feliĉo de vi ambaŭ. Miaflanke, estu trankvila, ĉar mi ĉion faros por vin patre helpi.

– Mi tre dankas! – ekkriis kortuŝita la junulino. – Bonvolu nun permesi, ke mi revenu al mia laboro, ĉar mi pensas, estas jam malfrue.

– Ankoraŭ ne – diris Andreo per firma toto –, atendu momenton. Mi volas, ke vi gustumu nian malnovan vinon, el kruĉo hodiaŭ malfermita nur por tio, ke ni festu la feliĉon, ke ni vivas post la terura hieraŭa tempesto.

Kaj kurante en la internon de la domo, li penetris en la kelon, kaj tie li prenis kruĉon da ŝaŭma, hela vino, kiun li malavare verŝis en antikvan pokalon. Poste, li iris al apuda ĉambro, el kiu li kunportis tubeton; el ĉi tiu li lasis fali kelke da gutoj en la pokalon, murmurante:

– Ha, Semele, vi ja povus vivi, se ne estus tiu malbeninda premio, kiu kondamnas vin al morto! Benjamen... la edziniĝo kaj amara malriĉeco... Sumo de mil sestercoj estas tento, al kiu ne povus rezisti la plej bonintenca, plej pura spirito... Dum la rimedoj estis rigoraj enketoj kaj aliaj punoj, tio estis negrava, sed nun ili estas mono, kaj la mono ne malofte kondamnas la homojn al morto!

Kaj, miksante la fortan venenon kun la ŝaŭmanta vino, li diris plu, grumblante:

– Post ses horoj mia kompatinda amikino eniros en la regnon de la ombroj... Kion fari? Restas al mi nenio, krom deziri al ŝi bonan vojaĝon! Kaj neniam iu alia scios, en ĉi tiu mondo, ke en mia domo ekzistas sklavo kun la nobela sango de la aristokratoj de la Roma Imperio!

Post du minutoj la malfeliĉa servistino de la senatano trinkis ĝojplena la enhavaĵon de la pokalo, kaj emociite dankis lin por lia ĝentilaĵo ja pereiga.

El la pordo de sia ŝtonkovrita domo Andreo vidis la lastajn paŝojn de sia kunkulpulino sur la lastaj kurbiĝoj de la vojo.

Jam neniu postulos la grandsestercon, proponitan de la afliktegita Lentulus, ĉar, preskaŭ je la sepa horo vespere, ŝi eksentis subitan malsaneton kaj tuj enlitiĝis.

Abunda, malvarma ŝvito fluis sur ŝiaj jam paliĝintaj vangoj, kie estis stampita la karakteriza vaksa koloro de la morto.

Anna, kiu ĉagrenita estis jam reveninta al la hejmaj laboroj, estis rapide vokita, por doni al ŝi la necesan helpon, sed trovis ŝin ĉe la apogeo de la afliktiĝo, kiu signas la mortantojn, tuj liberiĝontajn el la materia karcero.

– Anna... – apenaŭ flustris la agonianta virino – mi mortas... sed mia konscienco... estas peza... maltrankvila...

– Semele, kion tio signifas? – demandis Anna profunde emociita. – Ni fidu al Dio, nia ĉiela Patro, kaj al Jesuo, kiu hieraŭ rigardadis nin el la kruco, sur kiu li suferis, per treege kompataj okuloj!

– Mi sentas... ke estas... tro malfrue... – murmuris la mortanta virino, en la angoro de la morto. – Mi... volus... nur... pardonon...

Sed la raŭka, rompata voĉo ne povis soni plu. Pli forta singulto sufokis la lastajn vortojn, kaj la vizaĝo kovriĝis per violkoloraj tonoj, kvazaŭ la koro estus subite haltigita de ia nekontraŭebla forto.

Anna komprenis, ke tio estis la fino kaj petis Jesuon akcepti en sian kompateman regnon la animon de ŝia amikino kaj pardoni al ĉi tiu la gravajn kulpojn, kiuj certe motivis tiujn angorajn vortojn en ŝiajn lastaj momentoj.

Vokite por la ekzameno de la kadavro, la kuracisto konstatis, laŭ siaj empiriaj scioj, ke Semele mortis pro nekontentiga funkciado de la korszistemo; la vera kaŭzo de tiu neatendita fakto ne estis do trovita, kaj la sekreto de Andreo de Ĝioras involvis la densaj ombroj de la tombo.

Anna kaj Livia havis la okazon interŝanĝi impresojn pri la dolora fakto, sed, kvankam sub la profunda efiko de la lastaj vortoj de la mortintino, ili tamen konsideris ŝian transiron en la alian vivon kiel unu el

tiuj neeviteblaj fatalaĵoj de la mondo.

Post tiu okazaĵo Publio Lentulus decidis pli frue reveni al sia domo en Kapernaum, kiun li definitive aĉetis, antaŭvidante la eblon de longa restado en tiu loko. La reveno estis malgaja, vojaĝo peniga kaj senespera.

La multenombraj geservistoj tute ne rimarkis la profundan malkonsenton, nun ekzistantan inter li kaj lia edzino, kiuj, vere disiĝintaj laŭkore, tamen daŭrigis en la hejmo la saman tradicion de respekto antaŭ siaj subuloj.

Kelkajn tagojn post sia dua enloĝiĝo en la gaja kaj prospera urbo, kie tiom da fojoj Jesuo aŭdigis dolĉajn, diajn vortojn, la senatano preparis multon da korespondaĵoj, sendotaj al lia amiko Flaminio kaj al aliaj anoj de la Senato, kaj irigis al Romo Komenion, kiel sian tute fidindan ekspreson.

Malamante Palestinon, kiu tiom multajn kaj tiel amarajn suferojn havigis al li, sed alligita al ĝi pro la mistera malapero de sia infano Marko, la senatano petis la personan intervenon de Falminio, por ke onklo Salvio revenu al la sidejo de siaj laboroj en la ĉefurbo de la Imperio; en tia maniero, Publio penis sin tiri el la ĉeesto de Fulvia en tiu regiono, ĉar la koro diris al li el sia profundo, ke tiu virino havas pereigan influon sur lian destinon kaj sur tion de lia familio. Samtempe, posedita de terura abomeno kontraŭ Poncio Pilato, li plene informis sian malproksiman amikon pri sennombraj administraj skandaloj, kiujn li, post la Paska okazaĵo, decidis plej severe korekti. Li tiam promesis al Flaminio Severus pli intime koni la bezonojn de la provinco, por ke la Romaj aŭtoritatuloj sciu gravaj faktoj en la administrado, kaj tial, kiam oportune, la provincestro estu transforigita en alian parton de la Imperio; konsiderante la multajn kaj sinsekvajn plendojn, kiuj al li venadis el ĉiuj anguloj de la provinco, li ankaŭ promesis senprokraste kunmeti liston el ĉiaj maljustaĵoj, kiujn Pilato faris en sia politika funkcio.

Per tiuj privataj leteroj li ankoraŭ petis sian amikon fari la paŝojn necesajn, por ke venu instruisto por Flavia; sed li ne parolis pri la dramo de sia hejma vivo, escepte de la malapero de la infano, fakto citita en tiuj dokumentoj, kiel sola kaŭzo de lia senfina restado en tia lando.

Strikte obeante la ordonojn de la senatano, Komenio foriris el Jafo kun plej granda zorgo pri la korespondaĵoj kaj post kelka tempo atingis Romon, kie li venigis tiujn sciigojn en la manojn de iliaj adresatoj.

En Kapernaum la vivo fluis malgaja kaj silenta.

Publio donis sin al sia ampleksa arkivo, al siaj procesoj, al siaj studoj kaj al siaj meditoj, preparante la planojn por la edukado de sia filino aŭ farante projektojn, rilatajn al liaj estontaj laboroj, plej klopodante por releviĝi el la senkuraĝiĝo, en kiun li falis pro la doloraj okazintaĵoj en Jerusalemo.

Livia, konante la neflekseblecon de la fiera karaktero de sia edzo kaj sciante, ke ĉiuj cirkonstancoj kredigas ŝian kulpecon, trovis en la delikata animo de sia servistino zorgeman konfidenculinon kaj vivis preskaŭ konstante absorbita de fervoraj, sinsekvaj preĝoj. La spertitaj suferoj elmontriĝis sur ŝia vizaĝo, kie ili lasis profundajn signojn sub formo de sulkoj sur ŝiaj palaj vangoj. Tamen ŝiaj okuloj, atestante la hardecon kaj la forton de ŝia fido, havigis al ŝia fizionomio ian strangan brilon, malgraŭ ŝia videbla malvigleco.

En Kapernaum la sekvantoj de la Nazareta Majstro tuj fondis grandan rondon el kredantoj je la Mesio kaj

multaj fariĝis sindonaj apostoloj de lia doktrino de abnegacio, ofero kaj saviĝo. Kelkaj, kiel li, predikadis sur la placoj, kaj aliaj en lia nomo resanigadis la malsanulojn. Krudaj homoj estis strange prenataj de plej alta blovo de inteligenteco kaj de ĉiela inspiro, ĉar ili ja plej klare instruadis la tradiciojn pri Jesuo; tiel, la parolo de tiuj apostoloj antaŭiris la skribitan Evangelion, kiu estis poste rigardata en la mondo kiel la alparolo de la Savinto de la Tero al ĉiuj rasoj, popoloj kaj nacioj de la planedo, ia luma gvidilo de la animoj al la Ĉielo.

Ĉiuj, kiuj konvertiĝis al la nova ideo, publike konfesis la erarojn dum sia pasinteco, elmontrante la humilecon, kiun de ili postulis la interna regularo de la Kristana societo. Kaj, por ke la dolĉa profeto el Nazaret estu neniam forgesita, koncerne siajn savintajn turmentojn sur Kalvario, la tiama simpla kaj modesta popolo starigis la kulton al la kruco, kredante, ke tio estas la plej bona honoro al la memoro de Jesuo Nazaretano.

Livia kaj Anna, kun sia profunda amo al la Mesio, ne detenis sin de tiu natura aliĝo al la popolaj tradicioj. La kruco estis objekto de ilia kulto kaj absoluta respekto, kvankam ĝi tiam estis ilo por puno de ĉiujn krimaj kaj malicaj homoj.

Anna daŭrigis sian vizitadon al la bordo de la lago, kie kelkaj apostoloj de la Sinjoro praktikadis liajn diajn lecionojn ĉe la suferantoj, nefavoritaj de la sorto. Kaj ordinara afero estis, ke tiuj iamaj kunuloj kaj aŭdantoj de la Mesio, kvazaŭ senfamaj paŝtistoj, laŭiris senkulturajn vojojn, sen ia ajn komforto, por al ĉiuj homoj porti la konsolajn vortojn de la Bona-Novaĵo. Impresaj figuroj de krudaj, sindonemaj viroj iradis plej longajn kaj penigajn vojojn, en disŝiritaj vestoj kaj maldelikataj sandaloj; perfekte kaj sentoplene ili tamen predikadis la veraĵojn diritajn de Jesuo, kvazaŭ iliaj senlumaj mensoj estus tuŝitaj de la Dia graco. Por multaj el ili la mondo ne ampleksis pli ol Judujon aŭ Sirion; sed fakte estas, ke iliaj kuraĝaj kaj serenaj vortoj restis en la mondo por ĉiuj jarcentoj.

Pli ol unu monaton post la Pasko de la jaro 33 la senatano, en unu bela, varma posttagmezo de Galileo, alproksimiĝis al sia edzino, por sciigi ŝin pri siaj novaj intencoj:

– Livia – li respektplena komencis –, mi devas komuniki al vi, ke mi intencas vojaĝi dum kelka tempo, kaj tial mi estos for de ĉi tiu domo eble du monatojn, por plenumi miajn devojn kiel sendito de la imperiestro, laŭ tre specialaj kondiĉojn en ĉi tiu provinco.

“Ĉar tiu vojaĝo estos farata al multenombraj lokoj, kun iom da restado en ĉiuj internaj urboj, ĝis Jerusalemo, laŭ mia plano, tial mi ne povas preni vin kun mi kaj do lasos vin kiel gardantinon de mia filino.

“Kiel vi scias, inter ni ambaŭ jam nenio ekzistas, kio rajtigus vin ekkoni miajn privatajn problemojn; mi tamen ripetas miajn vortojn, diritajn en la nigra tago de nia amrompiĝo. Konsentinte, ke vi ankoraŭ loĝu en ĉi tiu domo, nur por via patrina tasko, mi nun konfidas al vi, dum mia foresto, la gardon de Flavia, ĝis venos el Romo la maljuna instruisto, pri kiu mi petis Flaminion.

“Mi sincere deziras, ke vi kredu mian fidon je via decido por revirtiĝo, kiel familestrino, kaj penas restarigi vian dignon, kiun mi, en la pasinta tempo, ne rifuzus rekoni en tiaj cirkontancoj; kaj tial mi esperas, ke vi faros neniam malnoblaĵon, kiu por ĉiam kompromitus mian kompatindan filinon.”

– Publio! – ankoraŭ povis afliktite ekkrii la edzino de la senatano, penante profiti tiun rapidan minuton da sereneco de sia edzo, por defendi sin kontraŭ la kalumnioj, per kiuj ŝi estis superĵetita pro la plej

komplikaj cirkonstancoj; sed, rapide forirante, enferme en sia fiera severeco, la senatano ne konsentis al ŝi tempon por paroli plu, kaj tial igis ŝin pli profunde kompreni sian doloran situacion en la propra hejmo.

Post unu semajno li foriris por sia aventura vojaĝo.

Animis lin precipe la deziro liberigi la koron el tiom da ĉagrenoj, la sama provado trovi la forperditan infanon kaj la registrado de la eraroj kaj maljustaĵoj, faritaj dum la administrado de Pilato, por ke ĉi tiu estu eksigita je sia ŝtata ofico, en oportuna tempo.

Sed lia decido havis gravan eraron, kies dolorajn sekvojn li ne povis antaŭvidi en sia turmentata animo. La fakton, ke liaj edzino kaj filino estas elmetitaj al la danĝeroj de regiono, kie ili estis rigardataj kiel sin altrudintaj personoj, lia kriterio de praktika homo devus pli atente ekzameni. Cetere, dum sia foresto, li ne povos kalkuli je la vigla sindono de Komenio, vojaĝanta al Romo laŭ la ordono de la mastro kaj lojala amiko.

Ĉiuj tiuj zorgoj okupis la spiriton de Livia, kiu, kiel virino, havis pli fortan kaj pli ĝustan senton koncerne konjektojn kaj antaŭvidojn.

Tiel, kun afliktita animo, ŝi vidis sian edzon foriri, kvankam li rekomendis al multenombraj servistoj la plej grandan atenton en la hejmaj laboroj, ĉe liaj familianoj.

En Tiberias solenaj festoj estis ordonitaj de Herodo, kiun la senatano avizis pri sia persona vizito en tiu urbo, unua haltejo de lia longa ekskurso. Ĉiuj pli gravaj lokoj estis haltejoj de la karavano, kaj en ili ĉiuj Publio ricevis la plej signifajn honorojn de la aŭtoritatoj, eskortotrupojn kaj multe da servistoj, kiuj helpis liajn laborojn dum tiu longa vojaĝo tra la malpli gravaj politikaj komunumoj de Palestino.

Ni rimarkigu, ke Sulpicio Tarkvinius tie troviĝis, komisiita ĉe Antipas, kiam Publio Lentulus feste alvenis al la granda urbo de Galileo. Li tamen penis ne esti vidita de la senatano, kaj en la sama tago revenis al Jerusalemo, kie nun li intime konversaciis kun la provinestro jene:

– Ĉu vi scias – diris Sulpicio kun la plezuro de iu, kiu donas deziratan kaj interesan sciigon – ke la senatano Lentulus decidis fari longan vojaĝon tra la tuta provinco?

– Kion vi diras? – diris Pilato tre surprizita.

– Jes, vere. Li estis en Tiberias, kiam mi de tie revenis, kaj de tie li iros baldaŭ al Sebasto; laŭ la programo de lia vojaĝo, kiun mi povis ekscii pere de iu amiko, mi kredas, ke li revenos al Kapernaŭm nur post kvardek tagoj.

– Kian celon havas la senatano, ke li faras tian malkomfortan, neallogan vojaĝon? Ĉu li ricevis ian sekretan ordonon el la imperia registaro? – demandis Pilato, timante punon pro siaj maljustaĵoj en la administrado de la provinco.

Sed, post kelkaj sekundoj da meditado, kvazaŭ li, kiel viro, superus sin mem, kiel politikiston, li interesita demandis la liktoron:

– Kaj lia edzino? Ĉu ŝi ne akompanas lin? Ĉu la senatano kuraĝis lasi ŝin sola, elmetita al la surprizoj de ĉi tiu lando, nesto de tiom da maliculoj?

– Pensante, ke tiuj informoj estos interesaj por vi – diris Sulpicio kun hipokrita sindonemo kaj kontentigita ruzeco –, mi penis plene ekscii tiun aferon pere de amiko, akompananta la vojaĝanton, kiel ano de ties persona gvardio, kaj mi aŭdis, ke sinjorino Livia restis en Kapernaum, kune kun sia filino, kaj tie atendas la revenon de sia edzo...

– Sulpicio – diris Pilato enpenŝiĝa – mi kredas, ke vi ja scias mian simpatian por la adorinda virino, pri kiu ni parolas...

– Jes, mi ja scias, des pli, ĉar mi mem, kiel vi eble memoras, antaŭ nelonge kondukis ŝin en vian privatan ĉambron.

– Jes, vere!

– Kial vi ne profitas el ĉi tiu oportuno por persona vizito en Kapernaum? – demandis la liktoro intence, sed ne atakante rekte la delikatan temon.

– Pro Jupitero! – ekkriis Pilato ekĝojante – De Ĥouza kaj aliaj altrangaj oficistoj de Antipas, en tiu urbo, mi ricevis inviton, kiu rajtigas min pensi pri tio. Sed, kion celas via propono en ĉi tiu rilato?

– Sinjoro – respondis Sulpicio Tarkvinus kun hipokrita modesteco – antaŭ ĉio, ĝi celas vian personan ĝojon el la efektivigo de tiu projekto, kaj, due, mi forte simpatias junan servistinon de tiu domo, nomatan Anna, kies mirinda, simpla beleco estas unu el la plej allogaj, kiajn mi jam vidis ĉe la virinoj en Samario.

– Kion vi diras? Mi neniam vidis vin freneza de amo. Mi pensas, ke por vi jam forpasis la tempo de la junjaraj entuziasmoj. Tamen tio signifas, ke mi ne estas sola en la ĝojo, kiun donas al mi la penso pri tiu neatendita vojaĝo – diris Pilato, videble bonhumora.

Kaj, kvazaŭ en tiu sama momento li jam preparis ĉiujn detalojn de sia plano, li diris al la liktoro, kiu aŭdis lin samtempe kontenta kaj fieranta:

– Sulpicio, vi restos ĉi tie, en Jerusalemo, nur la tempon necesan al via mallonga kaj tuja ripozo, kaj postmorgaŭ vi reiros Galileon, el kie vi iros rekte al Kapernaum, por sciigi Ĥouzan pri mia intenco viziti la urbon; tion farinte, vi iros al la domo de la senatano Lentulus, kies edzino vi diskrete avizos pri mia decido, informante ŝin pri la tagoj difinitaj por miaj foriro de ĉi tie kaj alveno tien. Mi esperas, ke, pro la malprudenta konduto de sia edzo, kiu lasis ŝin sola en tia regiono, ŝi venos mem kompanii al mi, por sin tiri el ĉe la krudaj, nekleraj Galileanoj kaj por dum kelkaj horoj rememori siajn feliĉajn tagojn en la Kortego, ĉe mia konversacio kaj amikeco.

– Tre bone! – respondis la liktoro, preskaŭ krevante de ĝojo. – Viaj ordonoj estos severe plenumitaj.

Sulpicio Tarkvinus foriris gaja kaj kontentigita pri siaj malnoblaj sentoj, antaŭĝuante la momenton, kiam li denove estos apud la juna Samarianino, kiu vekis la avidecon de liaj sentumoj; tiun avidecon li ja ne havis la okazon manifesti, kiam li private servadis al Publio Lentulus.

Plenumante la ricevitaĵajn ordonojn, jen li post kvar tagoj estis en Kapernaum, kie la avizoj de la provincestro estis kun granda ĝojo ricevitaĵaj de la politikaj aŭtoritatuloj.

Sed tio sama ne okazis en la hejmo de Publio, kie li estis ne plaĉe akceptita de la servistoj kaj sklavo, tie

laborantaj. Vokite de Sulpicio, prezentis sin al li Maksimo, anstataŭanto de Komenio en la estreco de la ordinaraj servoj, sed tute ne havanta ties energion kaj sperton.

Ĝentile akceptite de la maljuna servisto, kiu estis lia persona konato, la liktoro petis de Maksimo la komplezon venigi Annan, al kiu li bezonis private paroli por la solvo de ia afero.

La maljuna servisto de Lentulus ne hezitis voki ŝin al Sulpicio, kiu superĵetis ŝin per voluptaj, ardaĵaj rigardoj.

La servistino, samtempe surprizita kaj respekto plena, demandis lin pri la kaŭzo de lia neatendita vizito; tion Tarkvinus klarigis, dirante, ke li bezonas sekrete paroli al Livia, kaj ankaŭ penante sciigi la kompatindan junulinon pri siaj naŭzaj deziroj, per plej malnoblaĵaj kaj ofendaj proponoj.

Post kelkaj minutoj, dum kiuj li flustradis siajn insultojn, kiujn Anna treege pala aŭdis, sed plej prudente kaj pacience, por eviti ian skandalan diron pri ŝi, la digna servistino respondis per serioza, kuraĝa tono:

– Sinjoro liktoro, mi vokos mian mastrinon, por ke ŝi post nemultaj minutoj aŭdu vin. Rilate al mi, mi devas certigi vin, ke vi eraras, ĉar mi ne estas tia persono, kia vi min kredas.

Kaj kun firma decideco direktante sin en la internon de la domo, ŝi sciigis sian mastrinon pri la neŝancebla deziro de Sulpicio, paroli al Livia mem; ĉi tiun surprizis la neatendita okazaĵo kaj konsternis la fizionomio de la servistino, treege pala post la ricevita afekcio. Anna ne tuj sciigis ŝin pri ĉio, kio okazis, kaj aldonis:

– Sinjorino, la liktoro Sulpicio ŝajnas premata de urĝeco. Mi kredas, ke vi povus perdi neniom da tempo.

Ne lasante sin kapti de la cirkonstancoj, Livia tamen pretiĝis por aŭdi la senditon kun la plej granda atento, kiu estis al ŝi kutima.

Antaŭ ŝi la liktoro profunde riverencis kaj respektis sin turnis al ŝi, plenumante la devojn, kiuj tien kondukis lin:

– Sinjorino, mi venas komisiite de sinjoro Prokuroro de Judujo, kiu havas la honoron komuniki al vi sian venon al Kapernaŭm en unu el la unuaj tagoj de la plej proksima semajno...

La okuloj de Livia ekbrilis de prava indigno, kaj multenombraj konjektoj frapis ŝian spiriton; tamen, kolektante siajn fortojn, ŝi havis la kuraĝon, respondantan al la graveco de la cirkonstancoj, kaj diris:

– Sinjoro liktoro, mi dankas vin por via ĝentileco; sed mi devas diri, ke mia edzo nun vojaĝas kaj ke nia hejmo akceptas nenies viziton dum lia foresto.

Kaj, per apenaŭ perceptebla signo, ŝi igis lin senti, ke estas jam tempo foriri; tion Sulpicio kolerplena komprenis, kaj adiaŭis ŝin, farante grandajn riverencojn.

Surprizite de tiu sinteno, ĉar al lia spirito la devodeklinaĵo de Livia montriĝis kiel nedubebla realaĵo, la liktoro foriris treege disrevita, sed ne sen konjektoj pri la faktoj, laŭ sia maliceco de malbonmorulo.

Renkontinte unu el la soldatoj, gardantaj la domon, li diris al tiu konato kaj intima amiko, kun mensoga intereso:

– Oktavio, antaŭ ol pasos unu semajno mi eble estos denove tie ĉi, kaj dezirus trovi en ĉi tiu domo la altprezan juvelon de mia feliĉo kaj de miaj esperoj...

– Kio estas tiu juvelo? – scivole demandis lia amiko.

– Anna...

– Bone. Facila estas la tasko, kiun vi petas de mi.

– Sed aŭdu min bone – daŭrigis la liktoro, jam

antaŭsentante, ke la birdo ĉion faros, por flugi el liaj manoj –, Anna ofte foriĝas de la domo, kaj, se tio okazos, mi esperas, ke via amikeco nepre havigos al mi la necesajn informojn, ĉe la oportuna momento...

– Vi povas ja kalkuli je mia sindoneco.

Aŭdinte la plej gravan detalon de tiu dialogo, ni nun revenu al la interno de la domo, kie Livia, kun premata animo, konfidencas al sia amika, sindona servistino la dolorajn konjektojn, pezantajn sur ŝia koro. Malkaŝinte al sia amikino siajn pravajn timojn, plene dividitajn de Anna, kiu siavice sciigis ŝin pri la insultoj de Sulpicio, la kompatinda sinjorino, senafekta kaj korelverŝema, ellasis la longan vicon de siaj ĉagrenoj, rakontante ĉiujn suferojn, kiuj ŝiris ŝian kareseman kaj tre senteman animon, ekde la unua tago, kiam la kalumnio nestiĝis en la fiera spirito de ŝia edzo. La larmoj de la servistino, ĉe la stranga rekonto, ja elmontris ŝian profundan komprenon je la doloroj de la mastrino, pri kiu, konsiderante ŝian edukitecon kaj nobelan sangon, oni povus diri, ke ŝi velkas en tiu duonsovaĝa regiono.

Finante la amaran rakonton pri siaj suferoj, la nobla Livia akcentis per evidente maldolĉa tono:

– Vere, mi ĝis hodiaŭ ĉion faris, por eviti senmotivajn kaj nekompreneblajn skandalojn. Nun mi sentas, ke la situacio estas ĉiam pli danĝera, pro la insistado de miaj turmentantoj kaj la indiferenteco de mia edzo pri la okazaĵoj, kaj mia spirito perdiĝas en amaraj, doloraj konjektoj.

“Se ni sendos iun, por voki lin, kaj informos lin pri la faktoj, por ke li tuj protektu nin per siaj ordonoj, eble li ne komprenos la disvolviĝon de tiuj faktoj kaj rigardos miajn timojn kiel signon de iamaj kulpoj, aŭ prenos miajn skrupulojn por deziro je revirtiĝo pro eraroj, kiujn mi ne faris, sekve de liaj energiaj riproĉoj kaj doloraj minacoj; se mi ne sciigos lin pri tiuj gravaj okazaĵoj, tute same la skandalo ekflagros, ĉar la provincestro, profitante el lia foresto, venos al Kapernaŭm.

“Mi prenos Jesuon kiel mian solan juĝanton, en ĉi tiu dolora afero, en kiu la atestantoj estu nur mia koro kaj mia konscienco!

“Nun min plej maltrankviligas, mia bona Anna, ne la devo gardi min, kiu jam gustumis la galan maldolĉecon de la seniluziigo kaj de la kruela kalumnio, sed, pli ĝuste, la devo zorgi pri mia kompatinda filino, ĉar mi sentas, kvazaŭ tie ĉi, en Palestino, la maliculoj okupas la lokojn, kie devus sidi la homoj de pura, nekoruptebla karaktero...

“Kiel vi scias, mia malfeliĉa fileto jam foriris, elprenita de tiu kirlego da danĝeroj, eble murdita de indiferentaj, krimaj manoj... Mia patrino koro diras al mi, ke mia Marko ankoraŭ vivas, sed kie, kiel? Ni vane klopodas, tra ĉiuj lokoj, por ekscii lian sorton, sen eĉ la plej malforta signo pri lia ĉeesto aŭ traizado... Nun la konscienco ordonas, ke mi gardu mian filinon kontraŭ la pereigaj insidoj!”

– Sinjorino – diris la servistino kun stranga brilo en la okuloj, kvazaŭ ŝi estus subite trovinta ian konsiderindan solvon por la afero – tio, kion vi diris, montras la plej grandajn saĝon kaj zorgemon... Mi dividas viajn timojn kaj pensas, ke ni devas fari ĉion, por savi la knabinon kaj vin mem el la ungoj de tiuj sangavidaj lupoj... Kial ni ne rifuĝus en iun lokon tute fidindan por ni, ĝis la malbenindaj foriros de ĉi tiu regiono?

– Mi tamen kredas, ke, en la nunaj cirkonstancoj, estus senutile serĉi ia rifuĝejon en Kapernaum.

– Ni irus en alian lokon.

– Kien? – demandis Livia korpremata.

– Mi havas planon – respondis Anna, plena de

esperoj. – Se vi akordus pri ĝia efektivigo, ni ambaŭ elirus el ĉi tie, kune kun la knabino, kaj, en Samario mem, ni rifuĝus en la domo de Simeon, kies respektinda aĝo ŝirmus nin kontraŭ iu ajn danĝero.

– Sed – rebatis Livia iom senkuraĝa – Samario kuŝas tre malproksime...

– Tamen, sinjorino, la realo estas, ke ni bezonas ian tian lokon. Mi konsentas, ke la vojaĝo ne estas mallonga, sed ni urĝe forirus, kaj tuj post kelka ripozo, en Nain, ni luprenus freŝajn ĉevalojn. Post unu aŭ du tagoj ni atingus la valon de Ŝeĥem, kie staras la malnova domo de mia onklo. Maksimo estus informita pri via decido, sen alia motivo ol viaj nunmomentaj bezonoj: se la senatano tuj revenus, via edzo rekte eksciis la situacion kaj per si mem klopodus, por certiĝi pri via honesteco.

– Efektive, tiu ideo estas la plej praktika rimedo, restanta al ni – diris Livia iom konsolita. – Cetere, mi fidas la Majstron, kiu ne forlasos nin ĉe tiaj akraj provoj.

“Ankoraŭ hodiaŭ ni pretigos niajn porvojaĝajn provizojn, kaj vi iros al la urbo, ne nur por havigi al ni la ĉevalojn, kiuj kondukos nin ĝis Nain, sed ankaŭ por inviti unu el viaj familianoj iri kun ni; tiel, ni vojaĝos plej senlukse, ne turnante sur nin la atenton de la videmuloj, sed ja bone gardataj kontraŭ la malagrablajoj de ia neatendita okazo.

“Ne zorgu pri la elspezoj, ĉar mi estas provizita per la necesaj monrimedoj.”

Tiel estis farite.

En la tago antaŭ sia foriro, Livia vokis la serviston, kiu tiam oficis kiel ĉefservisto en la domo, kaj diris al li:

– Maksimo, fortaj motivoj devigas min iri morgaŭ al Samario en Judujo, kie mi restos kelke da tagoj, kune kun mia filino. Anna akompanos min, kaj mi esperas de vi tian saman aldonitecon, kian vi ĉiam montris al viaj gemastroj.

La servisto riverencis, kiel iu, kiu estus surprizita de tia sinteno de la mastrino, nemulte inklina al medioj aliaj ol la hejmo; sed, opiniante, ke li ne rajtas ekzameni ŝiajn decidojn, li respekte parolis:

– Sinjorina moŝto, mi esperas, ke vi ordonos, kiuj servistoj akompanu vin.

– Ne, Maksimo. Mi ne volas la solenojn kutimajn ĉe tiaj ekskursoj. Mi iros kun amikaj personoj, loĝantaj en Kapernaum, kaj intencas vojaĝi sen ia parado. Estas por mi interese sciigi vin pri mia decido nur pro tio, ke vi ankoraŭ pli vigle gardu nian domon dum mia foresto kaj pro la eventualeco de la subita reveno de mia edzo, kiun vi informu pri mia decido laŭ la vortoj, kiujn mi diras al vi.

La servisto respektive kliniĝis kaj Livia reiris al siaj ĉambroj, kie ŝi solvis ĉiujn problemojn rilatajn al ŝia trankvileco.

En la sekvanta tago, antaŭ mateniĝo, modesta karavano eliris el Kapernaum. Ĝin konsistigis Livia, ŝia filino, Anna kaj unu ties maljuna kaj respektinda familiano. Ili sekvis la vojon, kiu preskaŭ duonrondede ĉirkaŭis la lagon kaj laŭiris Jordanon, murmure kaj kviete fluantan en la Mortan Maron.

Dum nelonga halto en Nain, la vojaĝantoj luis aliajn ĉevalojn kaj en sama direkto iris plu al la valo de Ŝefem; tie, ĉirkaŭ la vesperkrepusko, ili deseliĝis antaŭ la ŝtona domo de Simeon, kiu akceptis la gastojn plorante de ĝojo.

La maljunulo de Samario ŝajnis tuŝita de ia dia graco, kio vidiĝis el la grava kristana movado, kiun li malgraŭ sia granda aĝo entreprenis en tiu tuta regiono, dissemante la konsolajn instruojn de la profeto el Nazaret.

Inter foliriĉaj olivarboj li starigis altan, pezan, krudan krucon, kaj, proksime de ĝi, grandan neellaboritan tablon, ĉirkaŭ kiu sidadis la kredantoj sur mizeraj benkoj, tie faritaj, por aŭdi lian amikan, konsolan parolon.

Kvin feliĉajn tagojn tie pasigis la virinoj, kiuj sentis sin komforte en tiu senluksa medio.

Posttagmeze, ĉe la karesoj de la sana kaj libera Naturo, en la verda sino de la paca pejzaĝo, kolektiĝis la malaltklasaj Samarianoj, inklinaj akcepti la pensojn de la Nazareta Mesio pri amo kaj superega favorkoreco.

Simeon, tie vivanta sen sia edzino, kiun Dio jam forkondukis al Sia regno, kaj sen siaj filoj, kiuj, siavice, tiam havis siajn proprajn familiojn, en malproksimaj vilaĝoj, estris super ĉiuj, kiel respektinda patriarko en sia trankvila maljuneco; kaj tia estis la profunda filozofia beleco, kiun havis liaj komentarioj pri la faktoj de la vivo de Jesuo kaj la preĝoj, kiujn improvizis la sincereco de lia amanta koro, ke ŝajnis, kvazaŭ la dia inspiro lin envolvas ĉe tiuj momentoj. En tiu sama poezia simpleco de la Naturo, kvazaŭ ili ankoraŭ aŭdus la vortojn de la Majstro ĉe Gerizim, preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj ploradis de emocio kaj spirita raviĝo, tuŝitaj de lia profunda, dolĉa parolo, altiritaj de la beleco de liaj rememorigoj plenaj de netakseblaj instruoj, de karito kaj de kormildeco.

En tiu tempo la kristanoj ne posedis la evangeliojn skribitajn, kiuj nur iom poste aperis en la mondo, redaktitaj de la Apostoloj; tial, ĉiuj predikantoj de la Bona-Novajo kolektadis la maksimumojn kaj la lecionojn de la Majstro per sia mano mem aŭ per la helpo de tiamaj skribistoj; en ĉi tiu maniero la instruoj de Jesuo estis registritaj, por la necesa studado dum la publikaj kunvenoj en la sinagogoj.

Disponante pri nenia sinagogo, Simeon sekvis tiun saman procedon.

Kun la pacienco, kiu lin karakterizis, li skribis ĉion, kion li sciis pri la Nazareta Majstro, por ĉi tiun rememorigi en siaj modestaj, simplaj kunsidoj, kaj plej volonte estis preta noti ĉiujn novajn lecionojn el

la rakontoj de siaj kunuloj aŭ de tiuj nekonataj apostoloj de la tiam naskiĝanta Kristanismo, kiuj traŭradis Palestinon laŭ ĉiuj direktoj kaj momente haltis en lia malnova vilaĝo.

Jam ses tagojn la gastinoj revigliĝadis en tiu karesa medio, kiam la respektinda maljunulo, postagmeze, dum siaj kutimaj rememorigoj pri la Majstro, ŝajnis tuŝita de spiritaj influoj de la plej alta beleco.

La lastaj nuancoj de la krepusko superverŝis la pejzaĝon per ia tono de smeraldoj kaj topazoj, kvazaŭ disvaporigintaj sub dubeblua ĉielo.

En tiu heterogena amaso troviĝis homoj, kiuj portis ĉiapecajn suferojn kaj kiuj memorigis al la spirito de Livia la neforgeseblan posttagmezon de Kapernaum, kiam ŝi je la unua fojo aŭdis la Sinjoron. Viroj kaj virinoj en ĉifonaj vestoj kunpremiĝe staris ĉe palegaj infanoj kaj avide rigardadis la maljunulon, kiu kortuŝita rakontis per sia simpla, sincera parolo:

– Fratinoj kaj fratoj, kia dolĉa rezignacio de la Sinjoro en lia lasta momento!

“Lia rigardo estis fikse turnita al la ĉielo, kvazaŭ li jam ĝuis la ĉielan feliĉon, en la regno de nia Patro, kaj mi vidis, ke la Majstro ame pardonas ĉiujn ofendojn! Unu sola el liaj plej karaj disĉiploj staris ĉe la kruco kaj konsolis lian patrinon en tiu dolora momento. El liaj kutimaj sekvantoj malmultaj ĉeestis, certe tial, ĉar ni, tiuj, kiuj lin tiel forte amis, ne povis elmontri niajn sentojn antaŭ la furioziĝinta popolo, ne elmetante al gravaj danĝeroj nian personan sekurecon. Malgraŭ tiaj riskoj, ni ĉiuj dezirus sperti tiajn samajn suferojn!

“Tiam kaj iam, unu aŭ alia pli malrespekta el liaj turmentantoj alproksimiĝis al lia sangverŝanta korpo kaj ŝiris lian bruston per la pinto de sia senkompata lanco!”

De tempo al tempo la nobla maljunulo forviŝis la fruntan ŝviton, kaj daŭrigis kun malsekaj okuloj:

– Ĉe unu momento mi rimarkis, ke Jesuo deturnas siajn kvietajn, lumajn okulojn for de la ĉiela arkajo kaj rigardas la ribelantan popolamason, poseditan de krima furiozeco! Kelkaj ebriaj soldatoj lin ankoraŭfoje skurĝis, kaj tamen el lia premata brusto, en la angoro de la agonio, neniam ĝemo ellasiĝis! Liaj mildaj, kompatemaj okuloj tiam disetendiĝis de la ofermonto ĝis la amaso da domoj de la malbeninda urbo! Vidante lin afliktite rigardante, tiel karese, kiel patro, al tiuj, kiuj lin insultadis dum la ekstremaj suferoj de la morto, mi ploris de honto pro niaj malicaĵoj kaj malfortaĵoj...

“La homamaso agitiĝis, meze en multego da kverel- oĵ... Surdigaj kriegoj kaj indignigaj insultoj leviĝis ĉirkaŭ lia kruco, sur kiu li abunde ŝvitis en sia ekstrema momento! Sed la Mesio, kvazaŭ li vidus profunde la sekretojn de la homaj destinoj, legante en la libro de la estonteco, denove rigardis la Altajn Regionojn kaj kun treega bonkoreco petis: “Patro, pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras!”

Ĉe la rememorigo de tiuj faktoj, la voĉo de la maljuna Simeon estis sufokita de larmoj, kaj la ĉeestantoj estis profunde emociitaj de lia rakonto.

Aliaj societanoj prenis la parolon kaj la maljunulo ripozis de siaj streĉoj. Sed unu el ili, dekliniĝante de la temoj traktataj en tiu tago, diris, surprizante ĉiujn alestantojn:

– Miaj fratinoj kaj fratoj, antaŭ ol foriri, ni memoru, ke la Mesio ĉiam admonis siajn disĉiplojn al viglado kaj preĝo, ĉar, en ĉi tiu mondo, la lupoj sieĝas la gregon!

Simeon aŭdis la averton kaj enprofundiĝis en meditadon, kun la okuloj fiksita sur la granda kruco, staranta nemultajn paŝojn for de lia kruda benko.

Post kelkaj minutoj da spontanea enpenŝiĝo, liaj okuloj estis plenaj de larmoj kaj fikse turnitaj al la kruda kruco, kvazaŭ super ĝi ŝvebus ia vizio, nekonata al tiuj, kiuj ĝin rigardis...

Poste, finante siajn instruojn dum tiu posttagmezo, li emociita parolis:

– Infanoj, ne sen prava motivo nia frato hodiaŭ rememorigis la instruon pri vigleco kaj preĝo! Io, kion mi ne scias difini, diras al mia koro, ke tre proksima estas la momento de nia atesto... Per miaj spiritaj okuloj mi vidas, ke nia kruco estas hodiaŭ prilumata, eble antaŭsciigante la gloran minuton de niaj oferoj... Miaj mizeraj okuloj pleniĝas per larmoj, ĉar, meze en la lumo ĉirkaŭ la kruco, mi aŭdas mildan voĉon, penetrantan en miajn orelojn kun dolĉa, amika tono, dirante: “Simeon, instru al viaj zorgatoj la lecionon pri la abnegacio kaj la humileco, per la ekzemplo de via sindoneco kaj de via propra ofero! Viglu kaj preĝu, ĉar ne malproksima estas la feliĉa momento de via eniro en la regnon; sed gardu la ŝafojn de via grego kontraŭ la insidaj atakoj de la karnavidaj lupoj de malpieco, libere laŭirantaj ĉiujn vojojn de la Tero, konvinkite, ke, ĉar al ĉiu estos donite laŭ liaj faroj, tial la malbonuloj havos sian tagon de admono kaj puno, konformaj al iliaj eraroj!”

La vizaĝo de la maljuna Samaritano estis banata de larmoj, sed ia dolĉa sereneco elradiis el lia milda, kompatema rigardo, kiu evidentigis lian nerompleblan, eksterordinaran energion.

Tiam, levante siajn malgrasajn, longajn manojn al la ĉielo, kie jam brilis la unuaj steloj, li sin turnis al Jesuo per arda preĝo:

– Sinjoro, pardonu miajn malfortaĵojn kaj hezitojn en la luktoj de la homa vivo, dum kiu niaj sentoj estas tre nefirmaj kaj mizeraj! Benu nian ĉiutagan klopodon kaj indulgu niajn kulpojn, se iu el ni, tie ĉi kunvenintaj, sin prezentas antaŭ vi kun la koro saturita de pensoj aliaj ol la pensoj de bono kaj amo, kiujn vi instruis al ni! Kaj, se alvenis la horo de la ofero, helpu nin per via senlima kompatemo, por ke nia fido ne ŝanceliĝu en la doloraj momentoj de sia atesto!

La kortuŝa preĝo signis la finon de la kunveno, kaj la partoprenintoj, sub forta impreso, reiris al siaj malriĉaj kabanoj.

Premate de zorgoj pro Livia kaj pro sia nevino, kiuj sciigis lin pri la gravaj okazaĵoj, ilin pelintaj al peto pri lia protekto, la maljunulo sukcesis tre malmulte ripozi tiun nokton. Ŝajnis al li, kvazaŭ delikataj voĉoj el la nevidebla mondo plenigas lian spiriton per ia nedifinebla angoro kaj strangaj impresoj, kiujn li ne povis elpuŝi el sia menso por la necesaj minutoj de ripozo.

Sed, dum fariĝis tiuj okazoj en la valo de Ŝeĥem, ni revenu la Kapernaum, kien, en tiu sama posttagmezo, la provincestro alvenis kun granda pompo.

En la tumulto de la multenombraj festoj, organizitaj de la komisiitoj de Herodo Antipas, ni ne povas forgesi la unuan penson de la altranga vojaĝanto.

Longe konversaciinte kun sia amiko Oktavio, proksime de la loĝejo de la senatano, kie li estis informita pri ĉiuj faktoj, Sulpicio reiris al Pilato, por sciigi al ĉi tiu, ke la du virinoj, kiujn ili avidis, sin pafis for, kiel migremaj birdoj, en la arbarojn de Samario.

Kutimiĝinte al facilaj konkeroj, la provincestro estis surprizita de la rezistado de tiu virino; intime admirante ŝian heroecon, li tamen konsideris nepravigebla ŝian kontraŭstaron al lia sieĝo, des pli, ĉar ne mankis al li allogaj, ĉarmaj virinoj, dezirantaj kapti lian amikecon, en la sfero de lia alta socia pozicio en Palestino.

Dum Pilato disvolvis tiujn pensojn, la malica spirito de la liktoro, antaŭĝuante la penigan konkeron de sia viktimo, flustris en lian orelon:

– Provincestro moŝto, se vi permesos, mi iros al Samario en Judujo, por informiĝi pri tiu afero. De ĉi tie ĝis la valo de Ŝeĥem estas la proksimuma distanco de tridek mejloj, tiel diri, unu salto por niaj ĉevaloj. Mi irigus kun mi ses soldatojn, kaj tiuj sufiĉus pro tenadi la ordon ie ajn en tiuj lokoj.

– Sulpicio, miaflanke, mi jam ne vidas la neceson de tiaj paŝoj – diris Pilato per rezignacia tono.

– Sed nun – klarigis la liktoro interesplene – se ne pro vi, tio devus fariĝi pro mi, ĉar mi sentas min sklavo de iu virino, kiun mi bezonas nepre posedi.

“Nun mi humile petas vin konsenti pri tiaj paŝoj” – li insistis afliktita, en la apogeo de siaj malpuraj pensoj.

– Nu bone – diris Pilato indiferenta, kvazaŭ mastro komplezanta fidindan serviston –, mi konsentas tion, kion vi petas. Mi opinias, ke la amo de Romano devas superforti ĉian korinklinon de la sklavo en ĉi tiu lando.

“Vi povas foriri, akompanata de homoj al vi fidindaj; tamen ne forgesu, ke ni devas reveni al Nazaret post tri tagoj de hodiaŭ. Ĉu du tagoj ne sufiĉos al vi por tiu entrepreno?”

– Sed – malicete daŭrigis la liktoro –, se okazos ia kontraŭstaro?

– Por tio vi havos viajn kunulojn, kaj mi rajtigas al vi fari mem la decidojn necesajn al via celo. En ĉia misio neniam forgesu honoro la patriciojn per nia estimo, sed al aliaj homoj apliku la justecon de niaj reflekseblaj superpotenco kaj forto.

En tiu sama nokto Sulpicio Tarkvinus elektis siajn fidindajn subulojn kaj, antaŭ la matenkrepusko, sep kuraĝaj rajdistoj ekiris direkte al Samario; en ĉiu pli grava haltejo ili ŝanĝadis siajn ardajn ĉevalojn.

La liktoro iris al sia aventuro, kvazaŭ iu paŝanta al ia nekonata regiono, kun la firma decido trafi sian celon, ne pensante pri la rimedoj. Bolis en lia cerbo kondamnindaj pensoj, kaj lia malkvieta, freneza koro dronis en maro da krimaj, nedifineblaj deziroj.

Sed ni turnu nian atenton al la modesta domo en la valo: tie Simeon troviĝis en febra aktiveco, en tiu neforgesebla mateno de sia vivo.

Post la simpla matenmanĝo, li pretigis siajn notojn kaj pergamenrulaĵojn, kaj pasigis pli ol unu horon en meditado kaj ardaĵ preĝoj; kiam la suno jam eksubiris li vokis siajn gastinojn kaj parolis al ili per grava tono:

– Filinoj, la vizio de miaj mizeraj okuloj, dum niaj hieraŭaj preĝoj, reprezentas seriozan averton por mia koro. La ĵus pasintan nokton kaj hodiaŭ, dum la tago, mi aŭdis mildajn voĉojn, kiuj vokis min, kaj, ne

povante plene klarigi al mi ilian motivon, mi havas la animon penetrita de ia dolĉa sereneco, kaj kredas, ke ne malfruos mia foriro al la Patra Regno... Sed io diras al mia spirito, ke ankoraŭ ne sonis la horo de via transpaso, kaj, konsiderante la instruon de nia bona, favorkora Majstro pri la lupoj kaj la ŝafoj, mi devas antaŭgardi vin kontraŭ ĉia danĝero.

Tial mi petas, ke vi akompanu min.

Tion dirinte, la respektinda maljunulo ekstaris kaj,

irinte al sia dometo, delokigis ŝtonblokojn el aperturo en la muro; tie li diris ordone, kun sia serena simpleco.

– Ni eniru!

– Sed, mia onklo – kuraĝe diris Anna iom surprizita –, ĉu tiaj antaŭzorgoj estas necesaj?

– Filino, neniam diskutu pri la konsilo de la homoj, maljuniĝintaj en laboro kaj suferado. La hodiaŭa tago estas decida, kaj Jesuo ne povus trompi mian koron.

– Ho! ĉu tio estos do ebla, ke la Majstro senigos nin je via ama, konsola ĉeesto? – demandis la kompatinda fraŭlino en larmoj, dum Livia emociita, tenante sian filinon je la mano, partoprenis en ilia doloro.

– Jes, por ni – respondis Simeon kun serena braveco, rigardante la bluan ĉielon – ekzistu unu sola volo, kiu estas la volo de Dio. Plenumiĝu do, ĉe la sklavo, la planoj de la Sinjoro.

La kvar homoj tiam penetris en galerion, kiu, en distanco de nemultaj paŝoj, kondukis al modesta rifuĝejo eltranĉita en krudaj ŝtonoj, kaj la maljunulo solene deklaris:

– Jam de pli ol dudek jaroj mi malfermas ĉi tiun galerion al neniu ajn... Sanktaj rememoroj pri mia edzino igis min fermi ĝin por ĉiam, kiel tombon de miaj plej karaj iluzioj; sed hodiaŭ matene mi ĝin decide malfermis, forigis de la vojo ĉiujn embarasojn kaj ĉi tien alportis ĉion necesan al la ripozo dum unu tago, pensante pri via sekureco ĝis la nokto. Ĉi tiu rifuĝejo estas kaŝita en la rokoj, kiuj, apud la olivarboj, ornamas nian lokon por preĝoj: kvankam ĝi ŝajnas sufoka, tamen ĝi ricevas la puran, freŝan aeron el la valo, tiel bone, kiel nia domo mem.

“Restu ĉi tie trankvilaj. Io diras al mia koro, ke ni travivas decidajn horojn. Mi portis nutraĵon necesan al vi tri dum la posttagmezaj horoj, kaj en la okazo, se mi ne revenos ĝis la vesperkrepusko, vi jam scias kiel formovi la ŝtonan pordon, tra kiu vi povos eniri en mian ĉambbron. El ĉi tie estas aŭdeblaj la murmuroj en la ĉirkaŭaĵo de la domo, kaj laŭ ili vi povos rimarki ian ajn danĝeron.”

– Kaj, ĉu neniu alia konas ĉi tiun rifuĝejon? – demandis Anna maltrankvila.

– Neniu, krom Dio kaj miaj forestantaj filoj.

Livia, profunde kortuŝita, tiam aŭdigis la voĉon de sia sincera danko:

– Simeon – ŝi diris – mi, kiu konas la karakteron de nia malamiko, opinias pravaj viajn timojn. Mi neniam forgesos vian patran agon, nome, ke vi savis min de la senkompata, nepardonema turmentisto.

– Sinjorino, ne danku min, kiu neniam valoras. Ni danku Jesuon por liaj superegaj decidoj, en la amara momento de niaj elproviĝoj...

El la faldoj de sia tuniko li tiris kruceton el neprilaborita ligno kaj, ĝin humile donante al la senatnedzino, diris per serena voĉo:

– Dio sola scias la alproksimiĝantan minuton, kaj ĉi tiu horo eble signas la lastajn momentojn de nia kunvivado sur la Tero. Se estos tiel, gardu ĉi tiun krucon, kiel memorajon de seninda servisto. Ĝi esprimas la dankon de mia sincera spirito.

Ĉar Livia kaj Anna komencis plori pro liaj emociaj vortoj, la maljunulo parolis plu, malrapide:

– Ne ploru, se ĉi tiu minuto signas la ekstreman momenton! Jesuo ja vokas nin al sia laboro, unujn pli frue ol aliajn; ni tamen memoru, ke ni ĉiuj iam kolektiĝos en la dolĉa lumo de lia regno de amo kaj kompatemo, kie ĉiuj afliktitoj estos konsolataj...

Kaj, kvazaŭ lia spirito troviĝus en la plena rigardado de aliaj sferoj, kies lumo lin superŝutus per divenaj intuicioj, li kortuŝite aldonis, sin turnante al Livia:

– Ni fidu al la Dia Providenco! En la okazo, se estas difinitaj la plej proksimaj horoj por mia atesto, mi konfidas al vi mian malfeliĉan Annan, tiel same, kiel mi fordonus al vi mian plej karan trezoron! Post kiam mi alprenis la lecionojn de la Mesio, ĉiuj idoj el mia sango forlasis min, ne komprenante la plej sanktajn intencojn de mia koro... Sed Anna, malgraŭ sia juneco, komprenis, kiel mi, la dolĉan Krucumiton en Jerusaleml

“Kaj vi, Anna – li diris, metante la dekstran manon sur la frunton de sia nevino –, amu vian mastrinon, kvazaŭ vi estus la plej malalta el ŝiaj sklavinoj!”

En tiu momento, pli forta bruo penetris en la rifuĝejon, kvazaŭ ĝi nekompreneble venus el la rokoj; ĝi ŝajnis pli bone ia galopado de multe da alproksimiĝantaj ĉevaloj.

La maljunulo faris adiaŭnan geston, dum Livia kaj Anna genuiĝis antaŭ lia severaspekta figuro; ili ambaŭ, verŝante larmojn, prenis liajn sulkiĝintajn manojn, kiujn ili kovris per amaj kisoj.

Simeon rapide trairis la malgrandan galerion kaj plej zorge relokis la ŝtonojn en la muron.

Post nemultaj minutoj li malfermis la pordojn de la modesta, gastama domo al Sulpicio Tarkvinus kaj ties kunuloj; tiam li komprenis, ke la avertoj de Jesuo, en la silento de liaj preĝoj, ne estis vanaj.

La liktoro alparolis lin tute sencere monie, plej penante forpuŝi de si la impreson el la majesta aspekto de la maljunulo kun liaj fieraj, serenaj okuloj kaj lia blanka barbo.

– Maljunulo – li abrupte komencis – pere de viaj konatoj mi jam scias, ke vi estas nomata Simeon kaj, ankaŭ, ke vi gastigas ĉi tie ian noblan sinjorinon el Kapernaum, venintan kun sia fidela servistino. Mi venas komisiite de la plej altaj aŭtoritatuloj, por paroli private al tiuj sinjorinoj, kiel eble plej private...

– Vi eraras, liktoro – murmuris humile Simeon. – Efektive, la edzino de la senatano Lentulus trairis ĉi tiun lokon; sed, nur pro tio, ke ŝi estis akompanata de nepino de unu el miaj fratoj, ŝi honoris min, ripozante kelke da horoj en ĉi tiu domo.

– Vi tamen devas scii, kie ili troviĝas en ĉi tiu momento.

– Mi povas doni pri tio nenian informon.

– Vi do ne scias, ĉu ne?

– Mi ĉiam opiniis – kuraĝe diris la maljunulo –, ke mi devas ne scii ĉiujn aferojn, kies ekkono portos malprofiton al miaj similuloj.

– Tio estas io alia – diris Sulpicio kolera, kiel mensogulo, kies plej sekretaj pensoj estus malkovritaj. – Tio do signifas, ke vi kaŝas de mi, kie troviĝas tiuj virinoj, pro nura kaprico de via kadukeco.

– Ne. Sciante, ke en la mondo ni ĉiuj estas fratoj, mi sentas la devon protekti la pli malfortajn kontraŭ la maliceco de la pli fortaj.

– Sed mi ne serĉas ilin por fari ian malbonon, kaj atentigas vin pri tiuj insultaj duondiroy, kiuj meritas la punon de la justico.

– Liktoro – rebate diris Simeon, tre serena –, vi povas trompi la homojn, sed vi ne trompas Dion per viaj abomenindaj sentoj... Mi konas la intencojn, kiuj instigis vin veni al ĉi tiu loko, kaj bedaŭras vian kriman impulsiĝemon... Vian konsciencon nebuligas krimaj, malpuraj pensoj, sed ĉiu momento estas oportuno por saviĝo, kiun Dio konsentas al ni laŭ Sia senlima boneco... Deklinu vin de la insido, kiu venigis vin tien ĉi, kaj iru aliajn vojojn, ĉar, kiel la homo savas sian animon per la farata bono, tiel same li povas morti per la konsumanta fajro de la pasioj, kiuj lin pelas la plej abomenaj krimoj...

– Fava maljunulo! – ekcriis Sulpicio Tarkvinius ruĝa de kolero, dum la soldatoj mirante observadis la serenon kuraĝon de la nobla maljunulo el Samario. – Viaj najbaroj, kiuj informis min pri vi, ja ne mensogis, dirante, ke vi estas la plej granda sorĉisto en ĉi tiu regiono!

“Malbenita divenisto, vi kuraĝas alfronti la imperiajn senditojn, kaj tamen mi povas dispulvorigi vin per unu nura vorto! Per kia rajto vi mokas la Roman povon?”

– Per la rajto de la veraĵoj de Dio, kiu ordonas, ke ni amu la proksimulon kiel nin mem.. Vi estas komisiitoj de Imperio, kiu posedas nenian leĝon krom la leĝo de senkompata perforto, por la plenumado de ĉiaj krimoj; miaflanke, mi sentas, ke mi troviĝas sub povo pli alta ol la via, plena de kompatemo kaj boneco! Tiu povo kaj tiu Imperio estas de Dio, kies pardonema justeco staras super la homoj kaj la nacioj!

Komprenante lian nerompeblajn bravecon kaj moralan energion, la liktoro, kvankam tremante de kolero, hipokrite rebatis:

– Bone, sed mi ne venis ĉi tien por ekkoni viajn sorĉaĵojn kaj vian religian fanatikecon. Unu fojon por ĉiam: ĉu vi volas aŭ ne volas doni al mi la bezonatajn informojn pri viaj gastinoj?

– Mi ne povas – kuraĝe respondis Simeon –, mia parolo estas unu sola.

– Arestu lin do! – li diris, sin turnante al siaj helpantoj, pala de kolero, vidante sin venkita en tiu duelo per vortoj. La maljuna Samaria kristano estis submetita de la soldatoj al la unuaj brutalaĵoj, sed sen ia ajn rezisto.

Ĉe la unuaj glavobatoj, Sulpicio moke ekkriis:

– Nu, kie troviĝas la forto de via Dio, kiu ne defendas vin? Ĉu Lia Imperio estas tiel mizera? Kial la ĉiela potenco ne helpas vin, ekstermante nin per la morto, favore por vi?

Tiujn vortojn sekvis ridegado de la soldatoj, kiuj plezure dividis la krimajn impulsojn de sia estro.

Simeon havis tamen siajn fortojn preparitaj por la atesto pri sia arda, sincera fido. Kun ŝnurligitaj manoj, li ankoraŭ sukcesis respondi, serene kiel ĉiam:

– Liktoro, eĉ se mi estus potenculo, kiel via Cezaro, mi neniam movus la buŝon, por ordoni mortigi iun ajn sur la Tero. Mi estas el tiuj homoj, kiuj ne rekonas la rajton mem de la tiel nomata necesa sindefendo, ĉar estas skribite en la Leĝo, ke “Ne mortigu”, sen ia preskribo, rajtiganta la homon pereigi sian fraton, ĉe tiu aŭ alia cirkonstanco... Nia tuta defendo, en ĉi tiu mondo, kuŝas en la manoj de Dio, ĉar Li estas la Kreinto de la tuta vivo kaj nur Li povas doni kaj disponi pri niaj destinoj.

Sulpicio spertis la apogeon de sia malamo antaŭ tiu nefleksebla, nobla kuraĝo, kaj, paŝante al unu el siaj subuloj, kolere ekkriis:

– Mercio, zorgu pri tiu stulta, sorĉipova kadukulo. Gardu lin streĉe kaj ne malatentu. Se li provos forkuri, regalu lin per via glavo!

Konscia, ke li travivas sian ekstreman horon, la respektinda maljunulo fiksas sian atakanton per rigardo de heroa humileco.

Sulpicio kaj liaj kamaradoj invadis la domon kaj la korton, kaj elpelis, per trivialaj vortoj kaj ŝtonoj, maljunan servistinon de Simeon. En lia ĉambro ili trovis la evangeliajn notojn kaj flaviĝintajn pergamenrulaĵojn, krom ankaŭ objektoj, kiujn li konservis memore de siaj plej karaj amikoj.

Ĉiuj tiuj memorigaĵoj, por li plej sanktaj, estis alportitaj antaŭ lin, kaj tie estis senkompate dispecigitaj. Antaŭ liaj serenaj, bonaj okuloj estis disŝiritaj tunikoj kaj antikvaj papirusoj, meze de indignigaj sarkasmoj.

Post la traserĉado, la liktoro kun la manoj interplektitaj sur la dorso, pripensante la plej bonan manieron, kiel eltiri el li la deziratan konfesion pri la loko, kie troviĝas la virinoj, vagadis en la ĉirkaŭaĵo dum pli ol du horoj kaj revenis al la sama ĉambro, kie li denove alparolis la maljunulon.

– Simeon – li diris interesplena –, kontenigu miajn dezirojn kaj mi liberigos vin.

– Por tia prezo, ĉia libereco estus al mi dolora. Oni devas preferi la morton, ol ian kompromison kun la malbono – respondis la maljunulo kun ĉiam sama kuraĝo.

De kolero Sulpicio Tarkvinius grincis per la dentoj kaj furioza ekkriis:

– Fiulo! mi scipovos elpremi al vi la bezonatan konfesion.

Tion dirinte, li fikse rigardis la grandan krucon, starantan je nemultaj paŝoj for de la pordo kaj, kvazaŭ elektinte la plej bonan turmentilon por preni el li la deziratan malkaŝon, per kava tono sin turnis al la soldatoj:

– Ni lin ligu al la kruco, kiel la Majstron de liaj sorĉoj.

Memorante la grandiozajn momentojn sur Kalvario, la maljunulo sin lasis konduki sen ia kontraŭstaro, kaj silente dankis Jesuon pro lia avero, ĝustatempe veninta, por ke saviĝu el la manoj de la malamiko tiuj virinoj, kiujn li konsideris tre amataj filinoj.

La soldatoj lin rapide ŝnurligis al la bazo de la peza kruco, sen ia kontraŭstaro de ilia viktimo.

La vesperkrepusko estis proksima, kaj Simeon rememoris, ke, antaŭ kelkaj semajnoj la Sinjoro pli dolore suferis. Per arda preĝo li petis de la ĉiela Patro kuraĝon kaj rezignacion, por elteni tian travivaĵon. Li pensis pri siaj forestantaj filoj kaj petis Jesuon akcepti ilin en la mantelon de sia senlima favorkoreco. Ligite al la bazo de la kruco je la brakoj, la trunko kaj la kruroj, li tiam vidis, ke iuj el la fratoj, partoprenantaj en liaj kutimaj preĝoj, jen alpaŝas por la kunveno ĉe la krepusko; tiujn amikojn la soldatoj kaj ties kruela estro tuj arestis.

Demandite pri la maljunulo, kiu tie troviĝis kun la dorso duone nuda por la skurĝado, ĉiuj senescepte diris, ke ili ne konas lin.

Pli ol la atakoj de la senkompataj Romanoj, tia maldanko ĉagrenis profunde lian noblan, sinceran spiriton, kvazaŭ venena dorno trapikus lian koron.

Li tamen tuj revigligis siajn spiritajn fortojn kaj, rigardante la ĉielon, murmuris ardan, angoran preĝon:

– Ankaŭ vi, Sinjoro, estis forlasita! Vi estis la Ŝafido de Dio, senkulpa kaj pura, kaj tamen vi spertis la plej akrajn dolorojn, vi gustumis la amarecon de la plej ŝirantaj perfidoj! Ne via mizera, pekoplenta servanto forpuŝu de si la purigajn turmentojn de la atesto!

Ĉe tiu momento, la korto estis jam plena de homoj, kiuj, laŭ la ordonoj de Sulpicio, devis daŭre sidi sur la krudaj benkoj, duonronde dismetitaj, por ĉeesti la sovaĝan scenon, kiel instruon al ĉiuj, kiuj malobeos la justicon de la Imperio.

La unua soldato, laŭ ordono de sia estro, komencis la skurĝadon. Sed, je la tria fojo, kiam liaj manoj svingis la longajn rimenojn, en la abomeninda torturo, sen ia eĉ plej malforta ĝemo de la maljunulo, li subite haltis kaj diskrete flustris al Tarkvinus:

– Sinjoro liktoro, ĉe la supro de la kruco brilas ia lumo, kiu paralizas miajn penojn.

Kolera, Sulpicio ordonis, ke alia soldato anstataŭu la unuan, sed tio sama okazis al la turmentantoj, vokitaj al la nigra tasko. Tiam, ekstreme furioza de nekomprenebla malamo, Sulpicio ekprenis la skurĝon kaj batis mem la korpon de sia viktimo, kiu tordiĝadis sub la potenco de neelporteblaj suferoj.

Banata de ŝvito kaj sango, Simeon sentis la krakadon de siaj kadukaj ostoj, kiuj disrompiĝis ĉiufoje, kiam la skurĝo frapis lian malfortiĝintan karnon. Liaj lipoj murmuradis varmajn preĝojn, petojn al Jesuo, por ke la turmentado ne daŭru senfine. Malgraŭ la terursento, kiu instigis ilin fornei la maljunan disĉiplon de Jesuo, ĉiuj ĉeestantoj, kun larmoj, tamen vidis liajn neesprimeblajn dolorojn.

En unu momento lia frunto kliniĝis senforta, antaŭvidigante la finon de lia tuta organa rezistado al la martirigo.

Sulpicio Tarkvinius tiam ĉesigis, dum minuto, sian nigran faron kaj, alproksimiĝinte al la maljunulo, kun premata koro flustris al li en la orelon:

– Ĉu vi nun konfesas?

Tamen, hardita de la surteraj luktoj dum pli ol sepdek jaroj da suferado, la maljuna Samariano elĉerpita susuris:

– La... kristano... devas... morti... kun Jesuo... por... la bono... kaj... la vero...

– Mortu do, sentaŭgulo! kriegis Sulpicio; kaj, preninte sian spadon, li enigis ĝin en la malviglan bruston de Simeon.

La sango ekfluis laŭ ruĝaj, abundaj ŝprucaĵoj.

En tiu momento, jam laĉa de la martirigo, la maljunulo vidis la ekstreman agon, kiu metis finon al liaj suferoj. Li sentis, kvazaŭ ia stranga ilo tranĉas lian dolorantan bruston, sufokitan de la angoro de la morto.

Sed li subite ekvidis du manojn el tralumebla neĝo, kiuj ŝajnis karese glatigi liajn blankajn harojn.

Li konstatis, ke la scenejo transformiĝis, dum li fermetis la okulojn en tiu dolora momento.

La ĉielo ne estis tiu sama ĉielo, kaj antaŭ si li jam ne vidis perfidulojn kaj turmentantojn. Tiu medio estis saturita de ia milda, konsolanta lumo, kaj en liajn orelojn venis la dolĉajn eĥoj de ia ĉiela ario, eble ludata de nevideblaj artistoj. Li aŭdis dissemitajn kantojn, kiuj laŭdis la dolorojn de ĉiuj malfeliĉuloj, de ĉiuj afliktitoj sur la Tero, kaj vidis la afablan rideton de lumaj, ĉarmaj estuloj.

Ŝajnis al li, ke li rekonas la medion, kiu lin akceptis. Li kredis, ke li estas transportita al la agrablaj anguloj de Kapernaum, al la feliĉaj momentoj, kiam li pretiĝadis por ricevi la benon de la Mesio, kaj estis konvinkita, ke, per ia mistera proceco, li venis al ia Galileo kun pli riĉaj floroj kaj pli bela ĉielo. Tie troviĝis lumbirdoj, kvazaŭ flugilhavaj lilioj de la paradizo, kiuj kantadis sur viglaj, foliplenaj arboj, certe kreskantaj en la ĉielan edeno.

Li penis mastri siajn emociojn en la heleco de tiu Promesita Lando, kiu, laŭŝajne, estis la ĉarma “Regno de la Sinjoro”.

Dum momento li ekmemoris la terglobon, siajn lastajn zorgojn kaj siajn dolorojn. Ia sento de laciĝo tiam ekregis lian dispremitan spiriton, sed iu voĉo, kiun liaj oreloj rekonas el inter miloj da aliaj voĉoj, milde parolis al lia koro:

– Simeon, venis la tempo de via ripozo! Ripozu nun de viaj ĉagrenoj kaj doloroj, ĉar vi alvenis al mia Regno, kie por eterne vi ĝuos la senliman favorkorecon de Nia Patro!

Ŝajnis al li, fine, ke iu plej zorge kaj karese lin prenas al sia brusto.

Milda balzamo dormetigis lian elĉerpitan, afliktitan spiriton. La maljuna servanto de Jesuo tiam kviete fermis la okulojn, karesate de anĝela estulo, kiu delikate surmetis siajn tralumeblajn manojn sur lian senfortiĝintan koron.

Sed ni reiru al la dolora spektaklo: apud la domo de la Samaria maljunulo, iom granda popolamaso terurita ĉeestas la abomenan scenon.

Ligita al la kruco, la kadavro de la maljuna Simeon verŝas sangon el la granda vundo farita en la koro. Lia frunto estas por ĉiam antaŭenklinita, kvazaŭ petante ripozon en la nobla tero; lia respektinda barbo estas ruĝe dismakulita de sango, ŝprucanta pro la skurĝobatoj, ĉar, Sulpicio, kvankam li scias, ke la spadofrapo estis la fina detalo de la terura dramo, vipadas plu la senvivan korpon, ligitan al la malhonora kruco de la martirigo.

Tio estis, kvazaŭ la elĉeniĝintaj fortoj de Mallumo tute ekposedis la spiriton de la liktoro, kiu, prenite de epilepsia, neesprimebla furiozeco, senkompate skurĝadis la kadavron, vomante insultojn, por impresi la popolamason, kiu lin observadis, konsternita de teruro.

– Vidu – li furioze kriegadis – vidu, kiel devas morti la friponaj Samarianoj kaj la murdantaj sorĉistoj! Abomeninda maljunulo! Kunportu en la inferon ankoraŭ ĉi tiun memorigaĵon!

Kaj la skurĝo senkompate frapadis la disfrakasitajn restaĵojn el la viktimo, nun reduktitajn al ia sanga pasto.

Sed tiam, ĉu pro la negranda profundeco de la bazo de la kruco, kiun skuis la ripetataj kaj fortaj movoj dum la torturo, ĉu kiel punon, difinitan de la superegaj fortoj de la nevidebla mondo, oni vidis, ke la grandega kruco fulmrapide falas teren.

Ekzamenante la situacion dum milono de minuto, la liktoro vane provis eviti la teruran morton, ĉar la supro de la kruco per unu frapo rompis lian kapon kaj tiel nebligis al li la unuan provon de sinsavo. Kun miriga rapideco ĵetita teren, Sulpicio Tarkvinius ne havis tempon por ellasi eĉ unu ĝemeton. El la bazo de la frakasita kranio eliĝis la encefala maso, miksitita kun sango.

Ĉiuj rapidis al la renversita korpo de la lupo, mortigita post la ofero de la ŝafo. Unu el la soldatoj detale ekzamenis lian bruston, kie la koro ankoraŭ batis per siaj lastaj aŭtomataj movoj.

La buŝo de la turmentisto estis malfermita, jam ne por la blasfema kriado, sed el la ruĝa gorĝo venis ia ŝaŭmo el salivo kaj sango, simila al nauza fluaĵo el la faŭko de iu monstro. Liaj okuloj estis malfermegitaj, kvazaŭ ili por eterne rigardadis en la spasmoj de la teruro ian senfinan falangon da timigaj fantomoj...

Impresitaj de la neatendita akcidento, en kiu ili vidis la influon de la mistera lumo, kiun ili vidis ĉe la supro de la kruco, la soldatoj ne sciis, kion fari ĉe tia situacio, ankaŭ konfuzitaj en la ondo da mirego kaj surpriziteco de ĉiuj, en la unuaj momentoj.

Ĝuste tiam aperis ĉe la pordo la nobla figuro de Livia, pala de amara konsterno.

Ŝi kaj Anna, en la kaverno, kie ili rufiĝis, sentis la danĝeron kaj, fervore preĝante, petis la kompaton de Jesuo en tiuj afliktitaj horoj.

Al iliaj oreloj venis la konfuzaj murmuroj de la diskutoj kaj la parolbruo de la vigle kverelanta popolo, dum la minutoj de la okazaĵo, kiun ĉiuj, ĝin ĉeestantaj, rigardis kiel punon el la Ĉielo.

Ili ambaŭ, afliktitaj kaj korpremataj, konsiderante, ke estas jam tro malfrue, decidis eliri kune kun Flavia,

kiaj ajn estos la sekvoj de tia paŝo.

Veninte al la pordo kaj ĉe la terura vido je la kadavro de Simeon, preskaŭ reduktita al ia senforma pasto, sub la bazo de la kruco, kaj antaŭ la korpo de Sulpicio sternita en distanco de nemultaj paŝoj, kun la bazo de la kranio frakasita, ili kompreneble spertis nedifineblan teruron.

Sed la paroksismo de la emocioj daŭris nemulte da minutoj.

Dum la servistino dronis en plorsinguloj, Livia, kun la energio, karakterizanta ŝian spiriton, kaj la fido, heliganta ŝian koron, tuj komprenis la okazintaĵon kaj, opiniante ke la situacio postulas la forton de potenca volo, por ke refariĝu la ĝenerala ekvilibro, diris al la servistino, decide donante al ŝia gardo sian filinon:

– Anna, mi petas vin havi plej grandan kuraĝon en ĉi tiu dolora travivaĵo, des pli, ĉar ni devas memori, ke la boneco de Jesuo preparis nin por digne elporti ankoraŭ ĉi tiun akran provon! Tenu Flavian ĉe vi, dum mi agos por la restarigo de la trankvileco!

Ŝi rapide sin direktis al la popolamaso, kiu kvietiĝis, laŭgrade kiel ŝi preterpasadis.

Tiu virino, de nobla, gracia beleco, vidigis tra la rigardo ian flamon de profunda indigno kaj malĝojo. Ŝia severa aspekto montris la ĉeeston de venĝanta anĝelo, oportune aperinda inter tiuj malkleraj, malaltklasaj homoj.

Alproksimiĝinte al la kruco, kie kuŝis la du kadavroj, ĉirkaŭitaj de la tie reganta konfuzo, ŝi petis Jesuon pri la kuraĝo kaj la forto necesaj, por ke estu subigitaj la nerveksciteco kaj maltrankvileco de ĉiuj alestantoj. Ŝi sentis, ke ia superhoma forto ekposedis ŝian animon, en la ĝusta momento. Dum minuto ŝi ekpensis pri sia edzo, pri la sociaj konvencioj, pri la brua skandalo de tiuj okazaĵoj; sed la sinofero kaj la glora morto de Simeon estis por ŝi la plej konsola kaj sankta ekzemplo. Ŝi forgesis ĉion kaj memoris nur, ke Jesuo staras super ĉiuj pasemaj aferoj sur la Tero, kiel la plej alta simbolo de vero kaj amo, por la nemortema feliĉo dum la tuta vivo.

Instigita de admiro kaj sciante, kiu staras antaŭ liaj okuloj, unu el la soldatoj alproksimiĝis al ŝi kaj kun plej alta respekto diris:

– Sinjorino, mi devas prezenti al vi niajn nomojn, por ke vi povu fari uzon el nia servo por tio, kion vi juĝos necesa.

– Soldatoj – ŝi respondis per decida tono – nenies nomon vi bezonas konigi. Mi dankas vin por via spontanea sindoneco, kiu, antaŭ kelkaj minutoj, estis krima nehumanajo; mi bedaŭras nur, ke ses viroj, en akordo kun ĉi tiu popolamaso, konsentis pri la plenumo de tiu ekstrema malnoblaĵo, kiun la Dia tribunalo ĵus punis antaŭ viaj okuloj!

Ĉiuj, kvazaŭ per ia sorĉo, estis silentaj, aŭdante tiujn energiajn vortojn.

La popolo havas ja tian misteran animŝanĝemon: iafoje sufiĉas unu gesto, por ke ĝi sin ĵetu en la abismojn de la krimo kaj de la malordo; unu vipa vorto, por igi ĝin reveni al la necesaj silento kaj ekvilibro.

Livia komprenis, ke ŝi mastras la situacion, kaj, sin turnante al la subuloj de Sulpicio, kuraĝe parolis:

– Nu, ni restarigu la trankvilecon de ĉiuj, forportante tiujn kadavrojn.

– Sinjorino – respektu proponis unu el la soldatoj –, ni sentas la devon sendi iun al Kapernaum, por ke lia provincestro moŝto estu informita pri ĉi tiuj okazaĵoj.

Kun la sama sereneco, ŝi tamen firme respondis:

– Soldato, mi permesas la foriron de neniuj el vi, ĝis vi entombigos ĉi tiujn korpojn. Se via provincestro havas koron de sovaĝa besto, miaflanke, mi nun sentas la devon protekti la pacon de la noblaj animoj. Mi ne deziras, ke refariĝu en ĉi tiu domo alia sceno de malhonoro kaj krima fiaĵo. Se la aŭtoritato, en ĉi tiu lando, iris ĝis la plej absurdaj kruelaĵoj, mi preferas preni ĝin sur min en ĉi tiu vespero, pagante la ŝuldon de la koro al la restaĵoj el ĉi tiu respektinda apostolo, murdita ĉe la kunhelpo de via krima malsaĝo.

– Ĉu vi ne deziras konsulti pri tio la aŭtoritatulojn en Sebasto? – time demandis unu el ili.

– Tute ne – ŝi respondis kun brava sereneco. – Kiam la cerbo de iu provincestro estas venenita, la koro de liaj regatoj estas same difektita. Ni vane atendus ian agon favore al la pli malaltrangaj kaj malfeliĉaj pro tio, ke Judujo troviĝas sub la tiraneco de kruela, ŝakala viro. Almenaŭ hodiaŭ mi volas alfronti la potencon de la malico, kaj, por min helpi, mi petos la senliman kompatemon de Jesuo.

Antaŭ ŝia serena, nekonsternebla teniĝo, la Romaj soldatoj eksilentis, kaj, obeante ŝiajn ordonojn, kuŝigis la senvivajn restaĵojn el Simeon sur la grandan krudan tablon, ĉe kiu fariĝis la kutimaj preĝoj.

Nur tiam la samaj kunuloj, kiuj malkonfesis la grandaĝan majstron de la Evangelio, respektu alproksimiĝis al lia kadavro, kies manojn ili ame kisis, pentante pri sia manko de kuraĝo kaj de animfirmeco, kaj kovris per floroj liajn sangmakulitajn restaĵojn.

Vesperigis, sed la neintensa heleco de la krepusko, en al ĉarma pejzaĝo de Samario, ankoraŭ ne tute forlasis la horizonton.

Ŝajnis, ke ia nedifinebla forto helpas la spiriton de Livia, inspirante al ŝi ĉiujn necesajn paŝojn.

Per la grandega peno de multenombraj Samarianoj estis baldaŭ eltiritaj pezaj ŝtonoj el la amaso da rokoj, ŝirmantaj la kavernon, kie rifuĝis la tri forkurintaj virinoj; dume, laŭ la ordono de Livia, la ses soldatoj malproksime de tie fosis tombon por la korpo de Sulpicio.

Jam brilis la unuaj steloj, kiam finiĝis la improvizo de tiuj korŝiraj laboroj.

En la momento, kiam estis transportataj la restaĵoj el la maljunulo, kiujn ŝi mem envolvis en blankan tolaĵon. Livia decidis preĝi, petante la Sinjoron akcepti en sian Regnon de Lumo kaj Vero la noblan animon de sia brava apostolo.

Ŝi genuiĝis, kvazaŭ ia anĝela figuro, ĉe tiu modesta, kruda benko, sur kiu tiel ofte sidis la servanto de Jesuo, inter siaj foliriĉaj, tre amataj olivarboj. Ĉiuj alestantoj, eĉ la soldatoj mem, kiuj sentis sin poseditaj de ia mistera timo, falis sur la genuojn por sama honoro, dum, en la lumo de kelke da torĉoj, blovadis parfumitaj la ventetoj de la ĉarmaj, stelplenaj noktoj en Samario, antaŭ du mil jaroj ...

– Fratoj – ŝi komencis emociita, je la unua fojo prezidante kunvenon da kredantoj –, ni levu al Jesuo nian koron kaj nian penson!

La pli forta sensacio kvazaŭ sufokis ŝin voĉon kaj plenigis ŝiajn okulojn per doloraj larmoj...

Tamen, kvazaŭ nevideblaj, potencaj fortoj ŝin kuraĝigis, ŝi serene parolis plu:

– Jesuo, dolĉa, dia Majstro, hodiaŭ estis la glora tago, kiam forflugis en la Ĉielon brava apostolo de via regno! Ĉi tie sur la Tero, Sinjoro, li estis nia protekto, nia helpo kaj nia espero! En lia fido ni trovis la necesan forton, kaj el lia kompatema koro ni sukcesis ĉerpi la necesan konsolon! Sed vi opiniis oportuna, ke Simeon ripozu en via ama, kompatema sino! Kiel vi, tiel same li suferis la turmentojn sur la kruco, montrante la saman konfidon je la Dia Providenco dum la doloraj torturoj, turditaj de lia amara atesto! Akceptu lin, Sinjoro, en vian Regnon de Paco kaj Favorkoreco!

“Simeon fariĝis feliĉa per siaj doloroj, per sia morala hardeco, per siaj afliktoj, elportitaj kun la kuraĝo kaj la fido, kiujn vi instruis al ni... Helpu lin en la lumo de la Paradizo de via senlima amo, kaj ni, ekzilitaj en la resopiro kaj en la aflikto, lernu la luman lecionon, kiun ni ricevis de via brava Samaria apostolo! Se vi iam trovos ankaŭ nin indaj je tiu sama ofero, fortikigu nian energion, por ke ni pruvu al la mondo la altan valoron de viaj instruoj, kaj helpu nin kuraĝe morti, por via paco kaj por via vero, kiel via fervora misiisto, kiun ni, en ĉi tiu momento, honoras per nia amo kaj nia danko.

Tiam ŝi nelonge interrompis sian preĝon kaj poste ĝin daŭrigis plu:

– Jesuo, al vi, kiu venis al ĉi tiu mondo, prefere por helpi tiujn jam sen espero pri sia saviĝo, kaj por levi tiujn pli malsanajn kaj pli malfeliĉajn, ni direktas nian peton ankaŭ por la krimulo, kiu ne hezitis moki viajn leĝojn de frateco kaj amo, martirigante senkulpulon, kaj kiu estis forkaptita de la morto, por la juĝado antaŭ via tribunalo. Ni volas forgesi lian kruelaĵon, same kiel vi, de sur la malhonora kruco de via martirigo, pardonis viajn turmentantojn... Helpu nin, Sinjoro, por ke ni komprenu kaj praktiku viajn instruojn!

Ekstarinte, plena de emocio, Livia malkovris la kadavron de la apostolo kaj je la lasta fojo kisis liajn manojn; poste, ŝi ekkriis, milda kaj larmanta:

– Adiaŭ, mia majstro, mia protektanto kaj mia amiko... Jesuo akceptu vian klarvidan, justan spiriton en sian regnon de neestingiĝema lumo, kaj mia animo sciu profiti, en ĉi tiu mondo, vian lecionon pri fido kaj heroeco!

Kuŝante en ĉerko tie rapide preparita, la senviva korpo de Simeon estis kondukita al sia lasta ripozejo. Multe da torĉoj brulis por la amara, dolora ceremonio. Kaj, dum la kadavro de liktoro Sulpicio estis metita en la malsekan teron, sen ia alia helpo krom la brakoj de liaj subuloj, la nobla maljunulo iris kuŝi antaŭ sia templo kaj sia nesto, inter la karesaj ventetoj de la valo, en la freŝa ombro de la olivarboj, al li tiel karaj!

Livia poste forpermesis la soldatojn de la provincestro kaj, gardata de bravaj, sindonaj homoj, pasigis la lastajn horojn de la nokto kune kun Anna kaj sia filino, en profunda meditado kaj doloraj zorgoj.

Ĉe matenruĝo, ili definitive foriris de la valo de Ŝeĥem, akompanataj de iu najbaro de Simeon, kaj revenis al Kapernaŭm, kunportante en siaj animoj multe da lecionoj por sia tuta vivo.

Sciante, ke nepre falos sur ilin la venĝo de la administraj aŭtoritatuloj, ili revene prenis aliajn vojojn, kiuj multe mallongigis ilian iradon, ne haltante ĉe Nain por ŝanĝi la ĉevalojn. Post kelkaj horoj da

seninterrompa rajdado, ili atingis la kvietan hejmon, kie ili ripozis de la travivitaj battoj.

Livia malavare monregalis sian sindonan vojkamaradon kaj foriris en siajn ĉambrojn, kie ŝi fiksas sur multekosta bazo la lignan kruceton, kiun la apostolo donacis al ŝi, kelkajn horojn antaŭ sia kruela martirigo.

Kelke da tagoj forpasis post tiuj malfeliĉaj okazaĵoj.

Informite pri ĉiuj detaloj de la faktoj, Poncio Pilato rabiigis de sovaĝa kolero. Rekonante, ke lin kontraŭstaras potencaj oponentoj, kiel Publio Lentulus kaj ties edzino, li, siaflanke, penis malvolvi tutan bobenon el teruraj venĝoj. Li iris tuj al sia palaco en Samario kaj igis ĉiujn loĝantojn de tiu regiono tre altpreze pagi por la morto de la liktoro, ilin humiligante per malhonoraj, hontindaj ordonoj. Multaj el la pacamaj loĝantoj de la valo estis murditaj, kaj la reto da krimoj kaj kruelaĵoj de lia venĝema, pereiga menso disetendiĝis al Sebasto kaj aliaj pli progresintaj lokoj.

Sed ni restu en Kapernaum kaj tie ni atendu la alvenon de iu sinjoro.

Efektive, post kelkaj tagoj la senatano revenis de sia vojaĝo tra Palestino. Livia tiam sciigis lin pri ĉio okazinta dum lia foresto. Publio Lentulus silente aŭdis ŝian raporton. Proporcie kiel li eksciis tiujn okazaĵojn, li sentis sin posedata de indigno kontraŭ la administranto de Judujo, ne nur pro ties politika malbona konduto, sed ankaŭ pro la treega persona antipatio, kiun Pilato inspiris al li; ĉe tiuj okazaĵoj, li decidis eĉ unu sekundon ne heziti senkomplete procesi la provincestron, opiniante, ke li devas persekuti la plej kruelan el siaj malamikoj.

La leganto eble kredos, ke al la fiera Romano estis la koro tuŝita kaj modifitaj la sentoj rilate al lia edzino, pri kiu pretendis posedi la plej klarajn pruvojn de mallojaleco kaj ĵurrompo, en la sankta sino de la hejmo kaj de la familio. Sed Publio Lentulus estis homo, kaj, en tia malforta, mizera kondiĉo, li nepre estis kreitaĵo de sia tempo, de sia edukado kaj de sia medio.

Aŭdinte la lastajn vortojn de sia edzino, kiu emociita parolis, kiel iu, kiu petas apogon kaj postulas la rajton pri iu kareso, li severtone diris:

– Livia, mi ĝojas pro via konduto kaj preĝas al la dioj por via edifo. Viaj agoj simbolas por mi la realecon de via revirtiĝo, post la granda falo, kiun mi vidis per propraj okuloj. Vi ja scias, ke por mi la edzino jam ne devas ekzisti; mi tamen laŭdas la patrinon de miaj infanoj kaj sentas min konsolita, ĉar, kvankam vi ne rekonsciiĝis en la tempo oportuna por esti feliĉa, vi tiris vin el la ombro ankoraŭ kun la eblo vivi... Malgraŭ sia malfrueco, via repuŝo je tiu kruela viro rajtigas min kredi vian patrinan sindonemon, kaj tio sufiĉas!

Tiuj vortoj, diritaj per superula, seka tono, montris al Livia, ke la kordisiĝo de la geedzoj devas nepre daŭri plu en la hejma interno.

Afekticiita de la skuoj de sia morala martirigo, ŝi foriris en sian ĉambron, kie ŝi genuiĝis antaŭ la kruco donacita de Simeon, kun senkuraĝa kaj frakasita animo. Tie, ŝi meditadis pri sia dolora situacio, sed, ĉe unu momento, ŝi vidis, ke la humila memoraĵo de la Samaria apostolo radias ian karesantan, brilan lumon, kaj samtempe ia milda voĉo murmuris ĉe ŝiaj oreloj:

– Infano, ne esperu el la Tero la feliĉon, kiun la mondo ne povas doni al vi! Tie, ĉiuj feliĉoj similas

forpasemajn nebulojn, aerdisiĝantajn ĉe la varmo de la pasioj aŭ ĉe la ruiniga blovo de la plej teruraj elreviĝoj! Sed atendu la regnon de la dia kompatemo, ĉar en la loĝejoj de la Sinjoro estas lumo sufiĉa, por ke floru la plej sanktaj esperoj de via patrina koro! Ne atendu do el la Tero ion alian, ol la dornan kronon de la ofero...

La senatnedzino ne miris pro tiu fenomeno. Konante, laŭ la popola famo, la reviviĝon de la Sinjoro, ŝi estis plene konvinkita, ke tio estis la sin savinta animo de Simeon, kiu, laŭ ŝia opinio, revenis el la lumo de la Dia regno, por kuraĝigi ŝian koron.

Dum sinsekvaj semajnoj Publio Lentulus akceptis la viziton de multe da Samarianoj, kiuj petis lin uzi energiajn rimedojn kontraŭ la ekscesoj de Poncio Pilato, kiu, tiam en sia palaco en Samario, kie li malofte sidis, ne ĉesis ordoni la murdadon aŭ la sklavigon de multenombraj homoj, kiel venĝon pro la morto de tiu, kiu en liaj okuloj estis la plej bona kortegano en lia domo.

Post kelka tempo Komenio revenis el Romo, kune kun kompetenta instruisto por la malgranda Flavia. Krom tiu klera mentoro, kiun la delikata komplezemo de Flaminio Severus sendis al Publio, venis ankaŭ novaj sciigoj, kiujn la senatano konsideris kuraĝigaj. Konsentante la peton de Flaminio, la altaj aŭtoritatuloj de la Imperio ordonis la revenon de la pretoro Salvio Lentulus, akompanata de sia familio, al la sidejo de la imperia regado; tiu amiko el Romo petis, ke Publio private sendu la li pozitivajn informojn pri la administrado de Pilato en Judujo, por ke la Senato proponu ties transforigon.

Sekve de tio, Komenio post kelka tempo reiris al Romo, kunportante al Flaminio dikan proceson, kiu enhavis ĉiajn kruelaĵojn, faritajn de Pilato kontraŭ la Samarianoj. Pro la distancoj, la proceso treniĝadis en la administraj kabinetoj ĝis la jaro 35, kiam la Prokuroro de Judujo estis vokita al Romo; tie li estis eksigita je ĉiuj funkcioj en la imperia regado, kaj estis ekzilita en Vienon, en Gallujo, kie post tri jaroj li sin mortigis, turmentata de konscienciproĉoj, de seniĝoj je ĉia komforto kaj de suferoj.

Publio Lentulus restadis plu, kun siaj esperoj de patro, en la sama vilao en Galileo, kaj dediĉis sin preskaŭ nur al siaj studoj, al siaj administraj procesoj kaj al la edukado de sia filino, kiu tre frue montris inklinton al la literaturo kaj rimarkindan inteligentecon.

Livia restigis Annan sub sia zorgado, kaj ili ambaŭ ĉiam preĝadis antaŭ la kruco, kiun Simeon donacis al ili ĉe sia ekstrema momento, petante de Jesuo la forton necesan por la malfacilaj luktoj de la vivo.

La familio de Lentulus vane esperis, ke la destino reportos al ĝi la ĉarman rideton de la malgranda Marko. Sed dum la senatano kaj lia filineto preparis sin por la mondo en la kompanio de Livia kaj Anna, kiuj lokis siajn esperojn en la Ĉielo, ni lasu forpasi pli ol dek jarojn super la dolora sereneco de la vilao en Kapernaum, pli ol dek jarojn, kiuj treniĝadis peze, silente, malgaje...

FINO DE LA UNUA PARTO

DUA PARTO

I - LA MORTO DE FLAMINIO

La jaro 46 kviete fluadis.

En Kapernaum, jen denove ni renkontas niajn konatojn en relativa sereneco.

La administraj aŭtoritatuloj, en Romo, jam ne estis la samaj. Tamen, apogita sur la prestiĝo de sia nomo kaj sur la granda politika influo de Flaminio Severus ĉe la Senato, Publio Lentulus daŭrigis sian komision en Palestino, kie li ĝuis ĉiujn politikajn rajtojn kaj privilegiojn ĉe la provinca administrantaro.

Atendante la okazon rricevi sian filon, kiun la tempo ankoraŭ tenis en la regiono de la misteraj ombroj, la senatano vane restadis tie, malgraŭ sia granda sopiro reveni al la sidejo de la imperia regado. Jam de kelkaj jaroj li tute perdis la esperon trafi sian celon, des pli, ĉar – li rezonis – Marko Lentulus tiam estus en sia unua fazo de juneco kaj do nerekonebla por la patraj okuloj.

Aliajn fojojn la fiera patricio opiniis, ke lia filo jam ne vivas; ke la malicaj, krimaj fortoj, kiuj kaptis la infanon for de lia hejmo, certe mortigis la gracian Markon, timante senapelacian punon. Sed interne de lia animo vibradis la intuicio, ke Marko ankoraŭ vivas; tial, inter la ĉiutagaj duboj kaj alternativoj, li decidis unue aŭdi la voĉon de la patra devo, uzante ĉiajn rimedojn por trovi sian infanon, tie restante sen ia difinita limtempo, kontraŭante ĉiujn siajn plej firmajn kaj sincerajn projektojn.

Liaj fizionomiaj trajtoj tiam nur iomete ŝanĝiĝis, kvankam dek tri jaroj estis forruliĝintaj post la doloraj okazaĵoj en 33. Liaj haroj ankoraŭ tute konservis sian naturan koloron kaj nur kelke da preskaŭ nerimarkeblaj sulkoj havigis al lia vizaĝo pli profundan severecon. Konstante nebuligis lian mienon ia serena malgajeco, kiu igis lin izoliĝi for de la socia vivo kaj droni en la oceano de siaj paperoj kaj studoj; lia plej granda absorba zorgo estis la edukado de la filino, pri kiu li klopodis por ŝin doti per la plej altaj intelektaj kaj sentaj kvalitoj. Lia hejma vivo estis ankoraŭ la sama, kvankam lia koro ofte petadis lin refari la geedzegan ligilon, konsidere tiujn dek tri jarojn da kordisiĝo, dum kiuj Livia tute rezignis ĉiujn distraĵojn, escepte la laborojn en sia hejmo kaj de sia fervora, sincera kredo. Tute sola kun siaj pensoj, Publio Lentulus lasis sian menson vagadi tra la plej dolĉaj kaj malproksimaj rememoroj; dum tiuj horoj de memobservado, li aŭdis la voĉon de la konscienco, kiu supreniris de la koro al la cerbo, kvazaŭ tio estus ia peto al la nefleksebla prudento, provanta disbati liajn antaŭjuĝojn; sed la fiero, per sia nerompebla rigideco, ĉiam venkadis. Io interna diris al li, ke lia edzino estas libera de ĉia makulo, sed lia vantamo tuj igis lin vidi la neforgeseblan scenon pri lia edzino eliranta, en maskovesto, el la privata ĉambro de Pilato, kaj kun terursento aŭdi la mokajn vortojn de Fulvia Prokula, vomanta siajn strangajn, krimajn kalumniojn...

Sed Livia rifuĝis en ian atmosferon de malĝoja rezignacio, kiel iu atendanta la supernaturajn helpojn, kiuj neniam aperas dum la paso de la homa ekzistado. Ŝia edzo restigis ŝin ĉe sia filino, konsiderante nur ŝian patrinecon, sed tute ne permesis al ŝi enmiksiĝi en liajn edukajn planojn kaj laborojn.

Por Livia tia akra bato estis la plej granda sufero en ŝia vivo. La kalumnio mem ne tiel profunde ŝin vundis; sed la fakto, ke oni ŝin juĝas nenecesa ĉe la amata filino, aspektis en ŝiaj okuloj kiel la plej dolora humiligo en ŝia ekzistado. Ĝuste tial ŝi tenadis la ŝildon de la fido kaj penadis heligi sian suferantan animon per la lumo de sia fervora, sincera kredo.

Malsame ol ŝia edzo, ŝia vizaĝo ne konservis la organan energion, sed atestis la ruinigan agadon de la tempo kun peza ŝarĝo el suferoj kaj afliktoj. Sur ŝia frunto, al kiu la doloroj donis sanktan aspekton, jam pendis kelkaj arĝentblankaj haroj, kaj ŝiaj enkaviĝintaj okuloj havis ian misteran brilon, kiu estis kvazaŭ pliintensiginta pro tio, ke ili estis konstante fiksitaj sur la ĉielo. Ŝiaj fizionomiaj trajtoj, kvankam ili

montris tro fruan maljunecon, tamen ankoraŭ travidigis ŝian pasintan belecon, nun transformitan en noblan, nedifineblan esprimon de martiriĝo kaj virto. Unu solan peton ŝi faris al sia edzo, kiam ŝi vidis sin fortirita for de siaj plej karaj estuloj, en la hejma medio, eĉ for de la spirita kontakto kun sia filino, kio pli afliktis ŝian turmentatan koron: tio estis, ke li al ŝi permesu daŭrigi siajn kristanajn servojn, kune kun Anna, kiu tiel forte alligiĝis al ŝi, kun tiu sindonemo, jam al ni konata, tiel granda, ke ŝi forpuŝis ĉiujn svatiĝantojn. La senatano konsentis al ŝi plenan permeson por tio, kaj eĉ diskrete havigis al ŝi monrimedojn por la helpo al la multenombraj laborantoj por la doktrino, kiuj venadis al ŝi, kalkulante je ŝiaj materialaj kapabloj por renovigaj iniciatoj.

Ni prezentu nun Flavian Lentulian al tiuj, kiuj vidis ŝin ankoraŭ infano, malsana kaj timema.

En sia brila aĝo de dudek du jaroj, ŝi montris la frukton de la edukado, per kiu la patro ŝin dotis, havigante al ŝi la fortan personecon de sia karaktero kaj de sia spirita konstruiteco.

La filino de la senatano similis al Livia laŭ la ĉarma gracieco de siaj fizikaj naturdotoj, kaj al Publio Lentulus, laŭ la koro. Edukita de eminentaj instruistoj, sin reciproke sekvintaj jaro post jaro kaj elektitaj de la geedzoj Severus, kiuj neniam forgesis siajn malproksimajn amikojn, ŝi perfekte scipovis sian nacian idiomon, same facile manipulis la Grekan lingvon kaj ĉiam kontaktis kun la plej famaj aŭtoroj pro sia konstanta kunvivado kun la klereco de sia patro.

Dum tiu epoko la intelekta edukado de la Romanaj junulinoj estis ja akcesora demando kaj nesufiĉa. La entuziasmigaj spektakloj en la amfiteatroj kaj la neekzisto de iu serioza okupiĝo por la tiamaj virinoj, pro la senĉesa multigo kaj ĉiam pli malalta prezo de la sklavoj, rimarkinde difektis la kulturon de la Romanaj virinoj dum la apogeo de la Imperio, kiam iliaj spiritoj rampadis meze en la skandalo, en la morala korupto kaj en la diboĉa vivado.

Tamen la senatano trudis al si mem esti homo de antikva karaktero. Ne viŝiĝis el lia memoro la heroaj, superbelaĵoj de la neforgeseblaj matronoj kaj de liaj familiaj tradicioj, kaj tial, dekliniĝante de la epoko, li klopodis por prepari sian filinon por la socia vivo, per la plej rafinita kulturo, kvankam li samtempe plenigis ŝian koron per fiero kaj vantamo, kun ĉiuj tiamaj antaŭjuĝoj.

La junulino tre amis sian patrinon, sed, obeante sian patron, kiu ŝin konstante tenadis ĉe si, en siaj studokabinetoj aŭ dum la kutimaj nedaŭraj vojaĝoj, ŝi ne kaŝis sian preferon por la patra spirito, kies plej brilajn kaj noblajn kvalitojn ŝi, laŭ sia opinio, ricevis; ŝi tamen ne povis kompreni la dolĉan humilecon kaj la heroan rezignacion de sia tiel digna, tiel malfeliĉa patrino.

La senatano penis disvolvi ŝiajn literaturajn inklinojn, ebligante al ŝi la plej bonajn intelektajn akirojn kaj admirante ŝian esprimfacilecon, precipe en poezio, tiel alte ŝatata en tiu epoko.

La tempo fluadis en relativa trankvileco por ĉiuj koroj. Iam kaj iam, oni parolis pri la ebleco de la reveno al Romo; sed la efektivigo de tiu plano estis ĉiam prokrastata pro la espero pri la retrovo de la malaperinta knabo.

En unu milda tago de Marto, kiam la foliriĉaj arboj kovriĝis per floroj, jen troviĝis en la domo de la senatano unu viro, urĝe veninta el Romo.

Tio estis komisiito de Flaminio Severus, kiu per longa letero sciigis al sia amiko sian malfortikan sanstaton kaj esprimis la deziron vidi lin, antaŭ ol morti. Tiu privata dokumento enhavis kortuŝajn petojn,

kiuj naskis en la spirito de Publio la plej seriozajn pripensojn. Sed letero, subskribita de Kalpurnia kaj aparte veninta, estis decida. Per tiu korelverŝigo la respektinda sinjorino informis lin pri la sanstato de sia edzo, opiniante, ke ĝi estas tre grava, kaj reliefigis la ĉagrenojn kaj la zorgojn, kiujn ili ambaŭ travivis koncerne siajn filojn, kiuj, en vigla junaĝo, sin donadis al la plej malsolida konduto, laŭirante la fluon de la tiamaj frivolaĵoj. Ŝi finis la emocian leteron, petante sian amikon, ke li revenu, ke li helpu ilin en tiu krizo, ĉar lia amikeco kaj patra intereso estus ia moderiga forto ĉe Plinio kaj Agripo, kiuj, jam plenaĝaj, sin lasis treni de la kirlego de la plej pereigaj plezuroj.

Publio Lentulus eĉ unu momenton ne hezitis. Li montris al sia filino la ricevitajn leterojn kaj, kune kun ŝi ekzameninte ilian enhavon, komunikis al Livia sian intencon reveni al Romo ĉe la unua oportuna okazo.

La nobla sinjorino tiam pripensis, kiel malsama estos ŝia vivo en la granda urbo de la Cezaroj, nun, kiam ŝi havis aliajn ideojn, kaj petis Jesuon, ke ne manku al ŝi la kuraĝo necesa por venki ĉiajn luktojn, kiujn ŝi devos elteni en la Roma socio, por konservi sendifekta sian fidon.

La reveno al Romo ne postulis do longan tempon. La sama komisiito portis la instrukciojn de la senatano al ties amikoj en la ĉefurbo de la Imperio, kaj, post nelonge, atendis ilin, en Cezarea, galero, per kiu Publio Lentulus kaj lia familio returne vojaĝis al sia patrolando, post restado dum dek kvin jaroj en Palestino.

Ne estas necese paroli pri la negravaj okazaĵoj dum tiu reveturo; ja banalaj estis la tiamaj vojaĝoj, kun sia teda unutoneco, la malrapide preterpasantaj vidaĵoj kaj la dolora spektaklo de la suferado de la sklavoj.

Ni devas tamen aldoni, ke, baldaŭ alvenonte, la senatano vokis siajn filinon kaj edzinon kaj per diskreta tono diris al ili:

– Antaŭ ol ni alvenos, estas necese, ke mi komuniku al vi mian decidon pri nia malfeliĉa Marko.

“Jam de multaj jaroj mi neniel parolas pri tiu afero al miaj amikoj en Romo, kaj ne deziras esti rigardata kiel malbona patro en nia socio. Nur unu cirkonstanco, kiel la nuna, kiu turdas al ni ĉi tiun vojaĝon, devigus min reveni, ĉar estas nepravigeble, ke patro forlasas sian filon en tiuj regionoj, eĉ tiam, se lin turmentas la necerteco, ĉu la infano ankoraŭ vivas.

“Mi do decidis diri al ĉiuj, kiuj demandos min, ke mia filo estas mortinta jam de pli ol dek jaroj, kaj li ja devas esti mortinta rilate nin, ĉar neeble estus al ni lin rekoni, en la okazo, se li reaperus.

“Se iu ekscius niajn ĉagrenojn, ne mankus maliculoj, kiuj dezirus trompi nian bonfidon, ekspluatante la familian sentimentalecon.

“La du virinoj konsentis pri lia decido, kiu ŝajnis al ili la plej ĝusta, kaj post kelkaj minutoj estis videbla la haveno de Ostio, nun bele aspektanta pro la zorgado de la imperiestro Klaŭdio, kiu tie farigis interesajn kaj monumentajn verkojn.

En tiu horo ne estis rimarkata la ĝojo, natura sento en tiaj cirkonstancoj.

La foriro, antaŭ dek kvin jaroj, estis ia kanto al la dolĉaj esperoj je la estonteco; sed la reveno estis plena de amara silento de la plej suferigaj realaĵoj.

Krom la elreviĝo pri la geedza vivo Publio kaj Livia ankaŭ ne vidis tie, inter la amikoj ilin atendantaj, la vizaĝojn de Flaminio kaj Kalpurnia, kiujn ili konsideris tre amataj gefratoj.

Du simpatiaj, fortikaj junuloj, kun senĝenaj movoj, en siaj modelaj togoj, tamen sin tuj direktis al ili per komfortaj boatoj, apenaŭ la ŝipo ĵetis ankron; tiujn junulojn la senatano kaj lia edzino tuj rekonis kaj akceptis per amika, kortuŝa ĉirkaŭpremo.

Ili estis Plinio kaj ties frato, kiuj, komisiitaj de siaj gepatroj, venis por saluti la karajn forestintojn.

Prezentataj al Flavia, ili ambaŭ faris instinktan geston de admiro kaj rememoris la forirtagon, kiam ili komferte kuŝigis sur la liton de la kajuto tiun iaman infanon, kiu, malsana, ĝemetis kaj grimacis.

La junulino, siaflanke, estis impresita de iliaj figuroj, pri kiuj ŝi gardis neprecizan memoron, tian saman, kian pri siaj de longe pasintaj infanaroj. Precipe Plinio Severus, la pli juna, ŝin profunde impresis: dudeksesjara, li aspektis elegante kaj noble, ĝuste tiel, kiel ŝia virina imagemo revis sian heroon.

Ankaŭ estis tuj rimarkite, ke la junulo ne estas indiferenta por tiuj emocioj, ĉar, post la unuaj impresoj pri la vojaĝo kaj la komentariioj pri la sanstato de Flaminio Severus, stato, kiun ties filoj rigardis kiel treege gravan, Plinio oferis sian brakon al la junulino; ĉe tio Agripo admonis lin, per iomete ĵaluza tono:

– Kion do vi faras Plinio? Via troa intimeco povas ofendeti Flavian!

– Nu, Agripo – li respondis kun sincera rideto –, la formalajtoj de la socia vivo tre malutilas al vi. Flavia, kiel denaskiĝa patricino, certe ne miras pri niaj kutimoj, kaj, cetere, mi ne naskiĝis por la ŝtata disciplino, kiun vi tiel ŝatas!

Ĉe tiuj vortoj, diritaj kun videbla bonhumoro, Publio Lentulus parolis, sentante sin komferte en sia preferata atmosfero:

– Ni ekiru, miaj infanoj!

Kaj li oferis la brakon al sia edzino, por ludi la komedion pri la geedza feliĉo dum la ordinara vivo en la granda urbo, sekvate de Plinio, kiu kondukis la junulinon per sia fortika brako, al militanta virinajn korojn; tiel ili elŝipiĝis kune kun Agripo, sed, antaŭ ol iri plu al Romo, ili ĝuis nedaŭran ripozon, por kiu la fratoj Severus, kun plej granda zorgo kaj spontanea sindonemo, faris ĉiujn necesajn paŝojn.

Livia ne forgesis Annan, ĉion aranĝante por ŝia komforto ĉe la ceteraj geservistoj tra la tuta vojo ĝis la domo, al kiu ili revenis.

Direktante sin al urbo, la senatano tiam pensis, ke li fine revidos sian tre amatan amikon. Jam de multaj jaroj li dorlotadis la personon buŝe konfesi al tiu amiko ĉiujn siajn ĉagrenojn en la geedzeca vivo, sincere malkaŝante al Flaminio siajn plej intimajn zorgojn pri la faktoj, kiuj disigis lin de la ekzino. Li soifis la amikajn vortojn kaj la konsolajn klarigojn de Severus, ĉar li sentis ke li amas sian edzinon super ĉio, malgraŭ ĉiuj spertitaj batoj. Sincere li ne kredis ŝian devodekliniĝon, kaj tial nur lia homa fiero detenis lin de repaciĝo, kiu tago post tago fariĝis pli bezona.

Baldaŭ ili troviĝis antaŭ la pasintatempa loĝejo, bele ornamita por ilin akcepti. Multenombraj servistoj iradis tien kaj reen, dum la ĵusvenintoj rekone vizitis la pli intimajn lokojn.

Jam de dek kvin jaroj la palaco sur la monteto Aventino atendis siajn posedantojn, sub la streĉa zorgado de sindonemaj, dignaj sklavo.

Post nelonge estis farita simpla manĝo en la triklinio, dum la fratoj Serevus, kiuj partoprenis en tiu manĝo, restis kun siaj geamikoj, por ke ĉiuj kune iru al la hejmdomo de Flaminio, kiu ilin sopire atendis.

Ĉe unu momento Plinio, intencante doni interesan, agrablan sciigon, diris al la senatano:

– Jam de longe ni faris konatiĝon kun via onklo Salvio Lentulus kaj ties familio, loĝantaj proksime de la Forumo.

– Mia onklo? – ekkriis Publio impresita, kvazaŭ la rememoro pri Fulvia alportis al lia animo ian svarmon da fantomoj. Sed samtempe, kvazaŭ farante cion eblan, por kvietigi siajn ĉagrenojn, li daŭrigis kun ŝajna sereneco:

– Ha, vere! De pli ol dek du jaroj li revenis el Palestino...

Tiumomente Agripo enmiksiĝis, kvazaŭ vengante sin por la konduto de sia frato, kiam ili ankoraŭ ne estis elŝipiĝintaj, kaj intence diris:

– Ŝajnas, ke Plinio estas inklinata edziĝi kun lia filino, nomata Aŭrelia, al kiu li estas de longe ligita per la plej koraj rilatoj.

Aŭdinte tiujn vortojn, Flavia Lentulia fikse rigardis la koncernatan pli junan filon de Flaminio, kvazaŭ inter li kaj ŝia koro jam ekzistus la plej fortaj ligiloj de ama interkonsento, laŭ la misteraj leĝoj de la psikaj altiroj.

Dum tiu interfrapiĝo de emocioj Plinio ĵetis sur sian fraton preskaŭ malaman rigardon, vidigante la impulsiĝemon de sia spirito, kaj emfaze respondis, kvazaŭ sin defendante kontraŭ negrava akuzo antaŭ sia preferata virino:

– Ankoraŭ ĉi tiun fojon, Agripo, vi eraras. Miaj rilatoj kun Aŭrelia havas nenian alian bazon ol la puran reciprokan amikecon, des pli, ĉar mi konsideras tre malproksima ian ajn eblon edziĝi en la nuna fazo de mia vivo.

Petola rideto streĉis la lipojn de Agripo, kaj la senatano, komprenante la situacion, kvietigis la diskutantojn, bonkore dirante:

– Nu, infanoj, ni poste parolos pri mia onklo. Mi brulas de la deziro ĉirkaŭbraki la karan malsanulon, kaj neniom da tempo ni devas perdi.

Post nemultaj minutoj grupo da portoseĝoj direktiĝis al la noblega domo de la familio Severus, kie Flaminio malpacience atendis sian amikon.

Lia fizionomio jam ne montris tiun pasintatempan moviĝemon kaj la imponan energiesprimon, kiu ĝin karakterizis; sed, kompanse pro tio, elradiis el liaj okuloj ia sereneco, kiu kortuŝis ĉiujn, kiuj lin vizitadis dum liaj lastaj tagoj de surteraj penoj. La esprimo de lia mieno similis tiun de teren ĵetita luktanto, laca de la batalado kontraŭ la misteraj fortoj de la morto. La kuracistoj neniom esperis lian resaniĝon, pro lia profunda fiziologia malekvilibro kaj la plej grava misfunkciado de lia koro. Eĉ la plej etaj emocioj

Ŝancelis lian farton kaj naskis ĉe lia familio la plej grandan timon.

De tempo al tempo liaj serenaj, kvietaj okuloj longe sin fiksas sur la enirpordon, kvazaŭ ili plej interese atendus iun; fine, pli fortaj bruoj, venantaj el la vestiblo, diris al lia koro, ke estas ĉesonta tiu disiĝo, daŭrinta dek kvin seninterrompajn jarojn, inter li kaj liaj ĉiam memorataj amikoj.

Kalpurnia, ankaŭ tre malvigliginta, ĉirkaŭprenis, plorante, Livian kaj Publion, kaj prenis Flavian en siajn brakojn, kvazaŭ ŝi akceptus tre amatan filinon.

En la vestiblo mem ili interŝanĝis impresojn kaj parolis pri siaj intensaj resopiroj kaj multenombraj absorbaj zorgoj; Publio tiam decidis lasi la du amikinojn en reciproka korelverŝo kaj sin direktis kun Agripo al unu el la ĉambroj proksimaj al la galerio de bildoj, kie li ĉirkaŭbrakis sian grandan amikon, kun larmoj de ĝojo.

Flaminio Severus estis tiam malgrasega, kaj liajn vortojn kelkafoje interrompis impresa dispneo, kio igis ĉiujn senti, ke el lia vivo restas tre malmulte.

Sciante, kiom multe lia patro ĝojas en intima societo kun la lojala amiko, Agripo foriris de la vasta ĉambro, kien la krepuskaj ombroj jam komencis enŝoviĝi, kvazaŭ en la sanktan silenton de iu navo.

Publio Lentulus estis surprizita, trovante sian malnovan amikon en tia sanstato. Li ne pensis, ke li revidos Flaminion tiel malfortika. Nun, li estis certa, ke lin, Publion, koncernas helpi la malsanulon per siaj konsiloj, por levi ties organajn kaj spiritajn fortojn per siaj amikaj, elkoraj admonoj.

Tuj kiam solaj, li rigardis sian amikon kaj mentoron, kvazaŭ li estus antaŭ malsana infano.

Flaminio siavice lin rigardis rekte en la vizaĝon kaj, kun larmoplenaj okuloj, prenis liajn manojn en la siajn, igante lin kompreni, ke, en tiu momento, Publio estis tie akceptita kiel tre amata filo.

Li penis sidiĝi pli komforte kaj, delikate, karese apogante sin al la ŝultroj de Lentulus, kortuŝita flustris en lian orelon:

– Publio, tie ĉi jam ne akceptas vin la iama energia, decidema amiko. Mi sentas, kvazaŭ mi nur atendis vin, por trankvile fordoni la animon al la dioj, kredante, ke estas jam plenumita la misio, kiu koncernis min sur la Tero, kun justa konscienco kaj honestaj pensoj.

“De pli ol unu jaro mi antaŭsentas la fatalan momenton, kiu nun, post la kontentigo de mia arda deziro, certe alproksimiĝas kun fulma rapideco. Mi do ne dezirus forflugi, ne preminte vin inter miaj brakoj, kaj nun mi faras al vi miajn lastajn konfidencojn sur ĉi tiu lito de mia morto...”

– Sed, Flaminio – diris lia amiko, kun dolora sereneco –, ĉio igas min kredi la baldaŭan pliboniĝon de via sano, kaj ni ĉiuj esperas la benon de la dioj, por ke ni povu ankoraŭ longatempe kalkuli je via kunesto, en ĉi tiu mondo.

– Ne, mia bona amiko, ne iluziu vin per tiaj supozoj kaj pensoj. Nia animo neniam eraras, kiam ĝi alproksimiĝas al la ombro de la tombo... Ne malfruos mia eniro en la misteron de la granda nokto, sed mi firme kredas, ke la dioj savos min per la lumo de siaj aŭroroj...

Kaj lasante la profundan, serenan rigardon ĉirkaŭvagi la ĉambron, kvazaŭ la marmorumitaj muroj senlime

disetendiĝus, Flaminio Severus produnde enpenŝiĝis unu minuton, kaj poste parolis plu, kvazaŭ li dezirus turni la konversacion en alian direkton:

– Ĉu vi memoras tiun vesperon, kiam vi, en la plej alta grado de via dolora emocio, konfidencis al mi la detalojn de ia mistera sonĝo?

– Ho! ĉu mi ĝin forgesus? – respondis Publio Lentulus, neklarigeble rememorante ne nur la konversacion, kiu antaŭ longe decidis lian vojaĝon al Palestino, sed ankaŭ alian sonĝon, en kiu li ĉeestis la samajn neesprimeblajn fenomenojn, en la nokto, post kiam li renkontis Jesuon el Nazaret. Ĉe la rememoro pri tiu mirinda persono, lia koro tremetis, sed li plej klopodis, por ŝpari al sia amiko pli fortan kaj doloran impreson, kaj aldonis kun ŝajna sereneco:

– Sed, kion celas via demando, se mi hodiaŭ, konsente kun vi mem, estas plene konvinkita, ke ĉio tio estis nenio pli ol nura impresio, naskita de bagatela fantazio?

– Fantazio? – rebate diris Flaminio, kvazaŭ li estus trovinta novan formulon de la vero. – Mi jam tute modifis miajn ideojn. La malsano havigas ankaŭ belajn, grandiozajn profitojn. Jam de multe da monatoj devante resti sur la lito, mi kutimiĝis alvoki la protekton de Temisa, por ke mi vidu en miaj suferoj nenion, krom la peniga rezulto de miaj propraj meritoj antaŭ la nekoruptebla tribunalo de la dioj; kaj fine en unu nokto, mi ricevis impresojn egalajn al la viaj.

“Mi ne memoras, ĉu en mi restis ia absorba penso pri via rakonto, sed, antaŭ ĉirkaŭ du monatoj, mi sentis min transportata, en sonĝo, al la epoko de la konspiro de Katalino kaj konstatis la verecon de ĉiuj faktoj, kiujn vi antaŭ dek ses jaroj raportis al mi; tiam mi vidis vian praavon mem, Publion Lentulus Sura, kiu estis kvazaŭ via portreto pro sia eksterordinara simileco al vi, precipe nun, kiam vi estas kvardek kvar jarojn aĝa kaj viaj fizionomiaj trajtoj plene fiksiĝas.

“Kurioze estas, ke mi troviĝis ĉe vi, kaj kun vi iris la saman vojon de indignigaj malicaĵoj. Mi memoras, ke ni vidis nin subskribantaj senkompatajn verdiktojn kaj ordonantaj torturi multajn el niaj similuloj... Min tamen plej teruris vidi vian kruelan konduton, nome, ke vi ordonas blindigi multajn el niaj politikaj opoziciantoj kaj ĉeestas mem tiun turmentadon per arduĝa fero, kiu por ĉiam bruligis multenombrajn pupilojn, ĉe la dolorkrioj de la sendefendaj viktimoj!”

Publio Lentulus mirigita malfermegis la okulojn ankaŭ spertante tiujn rememorojn, profunde dormantajn en lia nuba animo, kaj fine diris:

– Mia bona amiko, kvietigu vian koron... Tiaj impresoj ŝajnas bildoj de ia pli forta emocio, kiu restis profunde en via memoro, pro miaj rakontoj en tiu antaŭ longe pasinta vespero!

Sed Flaminio Severus apenaŭ ridetis, komprenante la noblan, konsolan intencon de sia amiko, kaj kun serena bonkoreco respondis:

– Mi devas diri al vi, Publio, ke tiuj bildoj ne teruris min, kaj mi parolas al vi pri tiu reto da emocioj nur tial, ĉar mi estas certa, ke mi estas tuj forlasonta ĉi tiun vivon kaj ke vi, eble ankoraŭ dum longa tempo, restos sur la supraĵo de ĉi tiu mondo. Povos okazi, ke la rememoroj de via spirito denove elŝprucos, kaj, se estos tiel, mi volas, ke vi akceptu la religian veron de la Egiptoj kaj Grekoj. Mi nun kredas, ke ni havas multenombrajn ekzistadojn, kun malsamaj korpoj. Mi sentas, ke mia mizera organismo tre baldaŭ dispulvoriĝos; tamen mia penso estas pli vigla ol iam antaŭe, kaj nur en tiaj cirkonstancoj mi pretendas

kompreni la grandan misteron pri niaj ekzistadoj. Pezas sur mia koro, ke mi faradis malbonon dum mia abomena pasinteco, kvankam forfluis pli ol unu jarcento post la bedaŭrindaj okazoj, kiujn niaj spiritoj revidis; mi tamen ĉi tie troviĝas en la ĉeesto de la dioj, kun kuraĝigita, trankvila animo.

Publio lin atente aŭdadis, samtempe kun bedaŭro kaj kortuŝiteco. Li provis diri konsolajn vortojn, sed la voĉo estingiĝis en lia gorĝo, sufokita de la emocioj ĉe tiu dolora momento.

Sed Flaminio, kun larmoplenaj okuloj, prenis lin al sia koro kaj flustris al li en la orelon:

– Mia amiko, ne dubu pri miaj paroloj... Mi ja kredas, ke ĉi tiuj estas la lastaj horoj... En mia kabineto troviĝas ĉiuj viaj dokumentoj kaj la raporto pri la materialaj aferoj, kiujn mi pritraktis en via nomo, dum via foresto, kaj ankaŭ pri niaj financaj kaj politikaj demandoj. Ne estos por vi malfacile taŭge katalogi ĉiujn tiujn paperojn...

– Sed, Flaminio – diris Publio kun energia sereneco –, mi pensas, ke multan tempon ni ankoraŭ havos por prizorgi tion.

Ĉe tiu momento, Livia kaj ŝia filino, Kalpurnia kaj la junuloj alproksimiĝis al la nobla malsanulo, alportante al li amikan ridedon kaj konsolajn vortojn.

La malsanulo elmontris al ĉiu el ili kuraĝon kaj ĝojon, kaj per mildaj, varmaj vortoj reliefigis la konsumitecon de Livia kaj la vivan belecon de Falvia.

Denove sola kun Publio, la nobla senatano, kies vizaĝon la malsano difektis, per afabla tono diris, inter la blankaj tolaĵoj de sia lito:

– Jen, mia aniko, la ridetantaj papilioj de la amo kaj juneco, kiujn la tempo ensorbas rapide en sia kirlego da kruelaĵoj...

Kaj mallaŭtigante la voĉon, kvazaŭ li volus fari al sia amiko ian delikatan konfidencan, li malrapide parolis plu:

– Mi kunportos en la tombon multe da maltrankviligaj zorgoj pri miaj kompatindaj filoj. Mi havigas al ili, koncerne edukadon, ĉion, kion mi povis, kaj kvankam mi rekonas, ke ili ambaŭ posedas noblajn, sincerajn sentojn, mi tamen rimarkas, ke iliaj koroj suferas de la bedaŭrinda transiĝo de la nuna tempo, dum kiu nin ĉagrenas konstati la plej profundan disfalon de la digno de la hejmo kaj familio.

“Agripo faras ĉion eblan, por alkonformiĝi al miaj konsiloj, donante sin al la laboroj de la ŝtato; sed Plinio havis la malbonan sorton lasi sin logi de perfidaj, neloyalaj amikoj, kiuj deziras nur lian ruinon kaj tiras lin al plej grandaj devioj en la suspektindaj rondoj de niaj plej altaj sociaj klasoj; sekve de tio, li tro malproksimen pelas sian inklinon al aventuroj.

“Ili ambaŭ kaŭzas al mi la plej fundajn ĉagrenojn per siaj agoj, montrante tre nesufiĉan senton de individua prirespondeco. Pro ilia malŝparegado de granda parto de nia propra riĉaĵo mi ne scias, kia estonteco estas destinita por mia kompatinda Kalpurnia, se la dioj ne konsentos al mi la gracon ŝin baldaŭ forporti el la ekzilejo de ŝia resopiro kaj aflikto post mia morto!”

– Sed al mi – respondis Publio kun intereso – ili ŝajnas indaj je la patro, kiun la dioj donis al ili, pro sia nobla ĝentileco kaj la rafiniteco de sia konduto.

– Tamen, mia amiko, vi ne povus forgesi, ke via foresto for de Romo estis tre longa kaj ke multo da nova okazis dum tiu tempo.

“Ŝajnas, ke ni rapide paŝas al grado de plena dekadenco de niaj familiaj moroj kaj de niaj edukaj procedoj, kiuj, laŭ mia opinio, estas dolore disruinitaj!”

Kaj, kvazaŭ dezirante denove turni la konversacion al la plej urĝaj temoj, de la ĉiutaga vivo, li akcente aldiris:

– Nun, kiam mi vidas vian filinon brilanta de juneco kaj energio, mi refaras mian iaman projekton, venigi ĝin en la sinon de nia familia rondo.

“Estis mia deziro, ke Plinio edziĝu kun ŝi, sed mia pli juna filo ŝajnas inklina al la filino de Salvio, malgraŭ la kontraŭstaro de Kalpurnia al tia projekto; ne pro via onklo, ĉiam digna kaj respektinda en niaj okuloj, sed pro lia edzino, kiu ne ŝajnas voli forlasi la malnovajn konceptojn kaj agmanierojn de la pasinteco. Tamen mi devas konsideri, ke mi havas ankaŭ Agripion, por ke ni realigu niajn ridantajn esperojn.

“Se vi iam povos, ne forgesu ĉi tiun rekomendon, kiun mi faras al vi in extremis!”

– Bone, Flaminio, sed ne laciĝu. Lasu kuri la tempon, ĉar ne mankos okazo por la diskutado pri ĉi tiu afero – diris Publio Lentulus kortuŝita.

Ĉe tiu momento Agripo eniris en la ĉambron kaj afable sin turnis al sia patro:

– Mia patro, la ekspreso, sendita al Massilia (*), ĵus alvenis kun la dezirataj informoj pri Saul.

(*) Hodiaŭ “Marseille”, Franca urbo ĉe Mediteraneo. – La Trad.

– Kaj, ĉu Saul nenion dirigas al ni pri sia veno? – demandis la malsanulo kun bonkora intereso.

– Nenion. La ekspreso komunikas nur, ke Saul foriris en Palestinon tuj, kiam solidigis sian riĉaĵon per la lastaj komercaj profitoj, sciigante, ke li decidis iri Judujon, por revidi sian patron, vivantan proksime de Jerusalemo.

– Nu bone – diris la malsanulo per rezignacia tono –; se estas tiel, rekompencu la ekspreson pro lia servo kaj ne pensu plu pri tiuj miaj deziroj.

Aŭdante ilin, Publio streĉis la cerbon por rememori ion, kion li ne povis precize difini. La nomo Saul ne estis al li fremda. Pro la cirkonstanco, ke la loĝejo de ties patro situacias proksime de Jerusalemo, li fine prezentis al si, tute fidele, tiujn personojn de la scenejo de lia memoro. Li rememoris la malagrablan okazaĵon, pro kiu li devis, proksime de la urbo, puni Judan junulon, tiel same nomatan kaj de li kondamnitan al galeroj pri sia senpripensa ago, kaj ankaŭ la momento, kiam Juda terkulturisto, sin prezentinta kiel patro de la arestito, venis peti de li ties liberigon. Kun malpreciza premo en la koro, li intence demandis:

– Saul? Ĉu tiu ne estas ja karakteriza nomo en Judujo?

– Jes – serene respondis Flaminio –, li estas emancipita sklavo, servinta al mia domo. Li estis Juda, ankoraŭ juna kaptito, aĉetita de Valerio per aŭkcio, por la bigoj de miaj infanoj, por la bagatela prezo de kvar mil sestercoj. Sed li estis tiel kompetenta pri la laboroj, ordinare difinitaj al li, ke, post kiam li gajnis, per siaj lertaĵoj sur la Sportejo de Marso, plurajn premiojn, destinitajn por miaj infanoj, mi decidis emancipi lin kaj doti lin per la rimedoj necesaj, por ke li vivu kaj starigu siajn proprajn entreprenojn. Ŝajnas, ke la mano de la dioj benis lin en la ĝusta momento, ĉar Saul nun posedas solidan riĉaĵon, akiritan per lia penado kaj laboro.

Publio Lentulus trankviligita nenion pli diris, ĉar lia arestito, laŭ sciigoj ricevita de la komisiitoj de la provinca registraro, forkuris en sian patran domon kaj tiel liberiĝis el la malhonora sklaveco.

Estis jam malfrue en la nokto.

La vizitanto tiam rememoris, ke li esperis intervidiĝi kun Flaminio por longa, riĉa konversacio pri diversaj temoj, kiel ekzemple lia ĝena geedza situacio, la mistera malapero de lia fileto, lia renkontiĝo kun Jesuo el Nazaret. Sed li konstatis, ke Flaminio estas lace konsumita, kaj estis do prudente kaj necese, ke li prokrastu siajn amarajn konfidencojn.

Plena de konsolaj espero, li tiam foriris el la ĉambro, por atendi la morgaŭon.

La du amikoj interŝanĝis longan, multesignifan rigardon en la momento de tiu adiaŭo, kiu nun ŝajnis io ordinara, kiaj la afablaj ĉiutagaj salutoj en la pasinta tempo.

Kuraĝigaj admonoj kaj elkoraj promesoj estis interŝanĝitaj, inter esprimoj de frateco kaj kareso, antaŭ ol Kalpurnia, kun sia nobla, gastama boneco, rekondukis la vizitantojn al la vestiblo.

Sed en la sekvanta tago frumatene, rapidanta ekspreso haltis ĉe la pordo de la palaco de la familio Lentulus, al kiu li portis alarman, doloran sciigon.

Flaminio Severus neatendite ekfartis pli malbone, kaj la kuracistoj donis al liaj familianoj nenian esperon pri resaniĝo. Lia nur ŝajna reago al la malsano tute disfumiĝis. Ia neklarigebla forto rompita lian organisman harmonion, kaj nenia medikamento ĉesigis lian angoron.

Post nemultaj horoj Publio Lentulus kaj liaj familianoj denove troviĝis en la komforta domo de siaj amikoj.

Dum li korpremata eniris en la ĉambron de sia malnova kamarado en la surteraj luktoj, Livia en la intimeco de alia ĉambro, june parolis al Kalpurnia:

– Mia amikino, ĉu vi jam aŭdis pri Jesuo el Nazaret?

La fiera matrono, kiu ne deflankiĝis de sia vantamo, en la familia medio, eĉ en la momentoj de la plej doloraj afliktiĝoj, malfermegis la okulojn kaj ekkriis:

– Kial vi demandas tion?

– Ĉar Jesuo – humile respondis Livia – estas la konsolanto de ĉiuj suferantoj, kaj mi ne povas forgesi lian bonkorecon nun, kiam ni travivas tiel akrajn, tiel dolorajn provojn.

– Mi opinias, kara Livia – diris Klapurnia per serioza tono –, ke vi forgesis ĉiujn rekomendojn, kiujn mi faris al vi, antaŭ via foriro al Palestino, ĉar el via parolo mi konkludas, ke vi bonfide akceptis la absurdajn teoriojn pri egaleco kaj humileco, neakordigeblajn kun niaj plej vulgaraj tradicioj, lasante, ke vin trenu la trompa fluo de la eraraj kredoj de la sklavoj.

– Sed ne temas pri tio. Mi parolas pri la Kristana fido, kiu kuraĝigas nin en la luktoj de la ekzistado kaj konsolas la koron, turmentatan de la plej malmildaj kaj plej amaraj provoj...

– Tia kredo nun venas en la ĉefurbon de la Imperio, sed vere ĝi renkontas la forpuŝon de niaj plej saĝaj kaj kleraj samlandanoj.

– Sed mi faris intiman konatiĝon kun Jeuso, kaj lia doktrino estas doktrino de amo, de frateco, de pardono... Konante vian pravan timon pro la sanstato de Flaminio, mi pensis pri ia helpo de la Nazareta profeto, kiu, en Galileo, estis la rifuĝejo por ĉiuj afliktitoj kaj suferantoj!

– Ba, infano, vi estas, ke frateco kaj pardono tute ne akordas kun niaj konceptoj pri honoro, patrujo kaj familio; kaj min plej mirigas tio, kiel ventanime Publio permesis al vi tian intiman kontakton kun la eraraj ideoj, regantaj en Judujo, ĝis tia grado, ke via morala personeco estas modifita, laŭ tio, kion mi konkludas el viaj vortoj.

– Tamen...

Livia estis kiel eble plej bone klarigonta siajn vidpunktojn pri tiu afero, kiam Agripo neatendite eniris en la ĉambron kaj, prenita de plej forta emocio, ekkriis:

– Patrino, venu tuj, tre rapide! Ŝajnas, ke la patro agonias!

En palpebruma daŭro la du sinjorinoj eniris en la ĉambron de la mortanto, kies okuloj estis rigidiĝintaj, kvazaŭ lin subite atakis ia nekontraŭstarebla sveno. Publio Lentulus tenadis inter la siaj la manojn de la mortanto, kaj afliktita rigardadis la fundon de liaj pupiloj.

Tamen, ŝajnis, ke la torako de Flaminio iom post iom moviĝas denove, per la forto de profunda, dolora spirado. Poste, liaj okuloj montris viglan vivlumon kaj konscion, kvazaŭ la lampo de la cerbo per lasta peno denove ardu. Li ĉirkaŭrigardis siajn karajn familianojn kaj amikojn, kiuj maltrankvilaj estis klinitaj super li. Kompreninte la gravecon de la momento, kuracisto, kiu estis tre amika al li kaj kiu pri li konstante zorgadis, eliris al la vestiblo; dume, ĉirkaŭ la agonianto estis aŭdata nur la malfacila spirado de la personoj ĉi tie konataj.

Flaminio ĵetis sian brilan, nedifineblan rigardon al ĉiuj vizaĝoj, kvazaŭ li pli arde serĉus sian edzinon kaj siajn filojn, kaj diris, iam kaj iam paŭzante:

– Kalpurnia, mi troviĝas... ĉe la ekstrema horo... kaj dankas la diojn..., ke mi sentas la konsciencon... sennuba kaj trankvila... Mi atendas vin en la eterno... iam... kiam Jupitero... bonvolos decidi... voki vin al mi...

La respektinda sinjorino kaŝis al si la vizaĝon inter la manoj kaj lasis flui la larmojn, ne sukcesante diri eĉ unu vorton.

– Ne ploru... – li daŭrigis, kvazaŭ uzante siajn lastajn momentojn. – La morto estas ia solvo..., kiam la

vivo... jam havas nenian rimedon... kontraŭ niaj doloroj...

Kaj, rigardante siajn filojn, kiuj lin maltrankvilaj fiksas per larmantaj okuloj, li prenis la manon de la pli juna kaj murmuris:

– Mi dezirus... mia Plinio... vidi vin feliĉa... tre feliĉa... Ĉu vi intencas... edziĝi kun la filino de Salvio?

Plinio komprenis la patrajn parolojn en tiu grava, decida momento, kaj time skuis la kapon por nei; samtempe li fiksas Flavian Lentulian per siaj grandaj, ardaĵaj okuloj, kvazaŭ montrante al la patro sian preferantaron.

La mortanto, siavice, kun la hela spirita vidklareco de la homoj, al kiuj la morto alproksimiĝas, kun tuta konscio pri la situacio kaj pri siaj devoj, komprenis la silenton de sia kara filo; prenante la manon de la junulino, kiu estis amplene klinita super lia lito, li premis la manojn de ili ambaŭ ĉe sia koro kaj ĝoje murmuris:

– Tio estas... ankoraŭ motivo..., por ke mi foriru... trankvila... Vi, Agripo... ankaŭ vi estos... tre feliĉa..., kaj vi... mia kara... Publio... ĉe Livia... ja vivos...

Sed pli forta singulto subite eliĝis el lia gorgo, kaj la sinsekvo da penigaj, doloraj singultoj devigis lin eksilenti, dum Kalpurnia genuiĝis kaj kovris per kisoj liajn manojn...

Livia, ankaŭ surgenu, rigardadis supren, kvazaŭ dezirante malkaŝi la sekretojn de la altaj regionoj. Al ŝiaj okuloj tiu funebra ĉambro montriĝis plena de lumaj kaj aliaj nedifineblaj figuroj, kiuj kviete ŝoviĝis ĉirkaŭ la mortanto. Ŝi faris preĝon el la fundo de sia animo, petante de Jesuo forton kaj pacon, lumon kaj favorkorecon por la granda amiko foriranta. Ĉe tiu momento, ŝi vidis la luman figuron de Siemon, ĉirkaŭitan de ia blueta, brila heleco.

Flaminio agoniis...

Laŭgrade kiel la minutoj forpasis, liaj okuloj fariĝis vitrecaj kaj senkoloraj. Lia tuta korpo gutigis abundan ŝviton, kiu malsekigis la blankan tolaĵon de la lito.

Livia rimarkis, ke ankaŭ ĉiuj alestantaj ombroj troviĝas surgenu kaj nur la impona figuro de Simeon ankoraŭ staras, kvazaŭ li estus ia dia gardisto, kun siaj lumradiantaj manoj sur la malfortika frunto de la mortanto. Ŝi tiam vidis, ke la lipoj de Siemon malfermiĝas por preĝo, kaj samtempe dolĉaj vortoj klare venis en ŝiajn spiritajn aŭdorganojn:

– *Patro nia, kiu estas en la ĉielo, Via nomo estu sanktigita. Venu Via regno; plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero!*

En tiu momento, Flaminio Severus ellasis sian lastan spiron. Marmorblanka paleco kovris lian fizionomion kaj granda sereneco ekposedis lian rigidiĝintan vizaĝon, kvazaŭ lia nobla animo forflugis al la loĝejo de la feliĉaj kaj justaj Spiritoj.

Nur Livia, kun sia kredo kaj fido, povis konservi sian animon serena inter ĉiuj, kiuj ĉirkaŭ ŝi travivis la doloran okazaĵon. Verŝante elkorajn larmojn, Publio Lentulus estis certa, ke li perdis la plej bonan, plej grandan el siaj amikoj. Neniam plu Flaminio parolos al li pri la plej belaj filozofiaj ekvacioj, pri la grandiozaj problemoj de la destino kaj de la doloro, en la senfina fluado de la vivo. Kaj, kiam li vidis, ke

La pordoj de la palaco estas malfermitaj por la honoroj de la Roma socio, kaj dum estis farata la funebra ceremonio kun peto pri protekto de la familiaraj Spiritoj de la mortinto, lia koro de amiko konsideris la doloran realon, ke unu el la plej belaj paĝoj de amikeco elŝiriĝis el la libro de lia vivo kaj por ĉiam malaperis en la densa, nepenetrebla mallumo de la sekretoj de tombo.

II - OMBROJ KAJ EDZIĜO

La funebran ceremonion de Flaminio ĉeestis multenombraj amikoj de la mortinto, krom ankaŭ multe da sociaj kaj politikaj reprezentantoj de ĉiuj organizoj al kiuj li ligis sian dignan kaj kleran nomon.

Inter tiom da personoj ne povus ne esti la pretoro Salvio Lentulus, kiu al tiuj postmortaj honoroj iris kun sia edzino kaj sia filino; ĉi tiuj plej klopodis, en la ĉeesto de Kalpurnia, verŝanta la larmojn de sia plej dolora ĉagreno, por precize ludi la komedion de sia hipokrita bedaŭro pro la morto de la granda senatano.

En la palaco mem de la familio Severus renkontiĝis la anoj de la familio de Publio Lentulus, al kiu evidente naŭzis la ĉeesto de la onkledzino; la sinjorinoj interŝanĝadis dolorajn impresojn, laŭ la afekta etiketo de la sociaj banalaĵoj.

Fulvia kaj Aŭrelia kun profunda malplaĉo rimarkis, kiel karese Plinio Severus traktas Flavian Lentulian, kiun li honoris per aparta estimo dum la funebra ceremonio, kvazaŭ montrante la preferatinon de sia koro.

Jen kial, post kelka tempo, patrino kaj filino vigle konversacias pri tiu afero en la intimeco de sia hejmo, vidigante la malnoblecon de siaj sentoj, kvankam la blankaj haroj de la patrino trudis respekton; Fulvia tamen ne lasis sin venki de la argumentoj de la sperto kaj de la aĝo.

– Ankaŭ min – diris Fulvia per pikanta tono, respondante demandon de sia filino – tre surprizis la teniĝo de Plinio, ĉar mi konsideras lin junulo, skrupule plenumanta siajn devojn; sed ne interesis min la konduto de Flavia, ĉar mi ĉiam opiniis, ke la infanoj nepre heredos la kvalitojn de siaj gepatroj, kaj precipe en la nuna okazo, kiam ŝi heredis de la patrino; tio havigas al ni neŝanceleblan certecon por nia juĝo.

– Ho, patrino, ĉu vi do intencas diri, ke vi ĝis tiu grado konas la konduton de Livia? – demandis Aŭrelia plej interesita.

– Tute ne dubu tion!

Kaj la kalumniema imagpovo de Fulvia kontentigis la scivolon de ŝia filino, rakontante la plej neverŝajnajn kaj terurajn faktojn pri la senatanedzino dum ilia restado en Palestino, ironie kaj malkaŝe komentariatajn de la junulino, posedita de plej akra ĵaluzo. Tiun raporton ŝia patrino finis jene:

– Nur via onklino Klaŭdia povus detale sciigi al vi tion, kion ni suferis, pro la devodekliniĝo de tiu virino, kiun ni hodiaŭ vidas tiel simplanima kaj soleca, kvazaŭ ŝi ne konus la plej fortajn spertojn en ĉi tiu mondo. Ni ne forgesu, ke ni troviĝas ĉe personoj ne sole influaj en politiko, sed terure ruzaj. Treege malfeliĉa edzo, la nevo de via patro estas ankaŭ fiera kaj malica politikisto!

“Mi ne scias, ĉu li korektis sian ventkapan kaj malfidelan edzinon, konstatinte, per siaj propraj okuloj,

Ŝian perfidon; sed, sufiĉis, ke ŝi igis lin suferi pro ŝiaj devioj kaj jen ni ĉiuj, la Romanoj, kiuj tiam vivis en Judujo, pagis la okazaĵon per plej teruraj dolortributoj...

“Granda amiko de nia familio estis la liktoro Sulpicio Tarkvinius, kiu estis, en tragedia situacio, barbare murdita en Samario, kaj neniu ĝis hodiaŭ sukcesis identigi liajn mortigintojn, por la meritita puno... Nia familio, kiu posedis grandajn interesojn en Jerusalemo, devis rapide reveni al Romo, kio kaŭzis gravajn monajn malprofitojn al via patro; kaj fine – daŭrigis la venena parolo de la kalumnianta virino –, la nobla koro de mia bofrato Poncio ĉeses bati sub plej ofendaj kaj akraj provoj... Eksigita je la provinca regado kaj turmentata de la plej amaraj humiligoj, li estis ekzilita en Gallujon kaj sin mortigis en Vieno (*), en dolora situacio, kio alportis al ni neestingeblan ĉagrenon!

(*) Poncio Pilato mortis en Vienne (Isère), Francujo, en la jaro 39 de nia epoko. – La Trad.

“Konsiderante la suferojn de Klaŭdia pro la pereiga influo de tiu virino, mi ne estas surprizita de la konduto de ties filino, penanta deklini de vi la fianĉon, kiu promesas brilan estontecon!”

– Urgas al ni klopodi, por ke tio ne okazu, patrino – diris la junulino sub forta impreso, kiun ricevis ŝiajn sentemaj nervoj. – Mi jam ne povas vivi sen li, sen lia kunesto... Liaj kisoj helpas min vivi en la kirlego de niaj ĉiutagaj zorgoj...

Fulvia tiam levis siajn okulojn, por pli bone ekzameni la prematecon, kiu vidiĝis sur la vizaĝo de ŝia filino, kaj diris kun inteligenta, maliceta mieno:

– Ĉu vi do fordonas vin al Plinio ĝis tiu grado?

Tremante de kolero, la junulino ricevis la patrinan parolon konforme al la bedaŭrindaj edukaj principoj, kiujn ŝi sekvis de sia infaneco, kaj furioza ekkriis:

– Kion vi pensas do, ke ni faras, kune irante al festoj kaj cirkoj? Ĉu mi estas malsama ol la aliaj junulinoj de mia tempo?

Kaj laŭtigante la voĉon, kiel iu, kiu devus defendi sin per riproĉo kontraŭ sia akuzanto, ŝi eksplodis per nekonvenaj konsideroj, elĵetante abomenajn vortojn, kaj jene finis:

– Kaj vi, patrino, ĉu ankaŭ vi ne havas...

Sed Fulvia prenante akran, severan teniĝon, per unu salto alpremiĝis al la korpo de sia filino kaj ekkriis kun malvarma sereneco:

– Silentu! Eĉ ne unu vorton pli, ĉar mi neniam intencis luli vipuron ĉe mia sino mem!

Tamen, komprenante, ke ŝia situacio povos fariĝi pli embarasa pro ŝiaj gravaj kulpoj, kiel patrino, edzino kaj virino, ŝi diris per miela voĉo, donante al sia filino bedaŭrindan lecionon:

– Pa, pa, Aŭrelia! Ne kolere! Mi parolis al vi en tia maniero nur por instrui al vi, ke ni ne povas kapti viron por edziĝo, donante al li ĉion per unu fojo. Malpacienca kaj galantan viron, kia estas la filo de Flaminio, ni, virinoj, konkeras grado post grado, farante al li malmulte da cedo kaj multe da karesoj...

“Vi ja scias, ke la unua problemo en la vivo de virino dum nia epoko, estas, super ĉio, la ekhavo de ia

edzo, ĉar la nunaj tempoj estas nefavoraj kaj ni ne povas vivi sen la ombro de iu arbo, kiu ŝirmos nin de malagrablaj surprizoj sur la malglata vojo...”

– Jes, efektive, patrino – respondis la junulino en tute alia humoro, dank’ al tiuj ruzaj argumentoj –; vi ja diras al mi la veron, kaj, ĉar via sperto estas granda, kion do vi proponas, por la realigo de miaj deziroj?

– Unue – malice respondis Fulvia –, ni devas uzi la argumentojn de la ĵaluzo, kiuj ĉiam estas tre fortaj, kiam ekzistas pli aŭ malpli sincera intereso ion atingi en amaj aferoj. Kaj, ĉar vi tiel streĉe alligiĝis al la filo de Flaminio, profitu el la unuaj festoj en la cirko, kaŭzante ĉe li impulsojn de envio kaj ĵaluzo.

“Ĉu jam de kelka tempo la protektato de la kvestoro Britanikus ne amindumas vin?”

– Emiliano? – demandis la junulino interesita.

– Jes, Emiliano. Ankaŭ li estas bona partio, ĉar lia estonteco en la militista klaso laŭŝajne prezentas belajn perspektivojn. Penu kapti lian atenton, kiam vi estos ĉe Plinio, en tia maniero, ke ni faru ĉion eblan, por havigi al vi tiun idon de Severus, kiu estas ja la plej bona partio el ĉiuj, kiuj eble aperos.

– Sed, se tiu plano bedaŭrinde fiaskos?

– Restos al ni la scienco de Arakso kun siaj ŝmirajoj kaj magiaĵoj...

Peza silento fariĝis, dum ili ekzamenis tiun perspektivon, iam peti helpon de la pereigaj fortoj de unu el la plej famaj sorĉistoj de la tiama socio.

Tagoj sekvadis tagojn, sed la pli juna filo de Falminio ne amindumis denove la filinon de la pretoro Salvio Lentulus; kiam, post kelka tempo, li rekomencis vizitadi la festajn, bruajn cirkojn, lin ne tre surprizis renkonti, intime konversaciantan kun Emiliano Lucius, tiun virinon, al kiu li sentis sin katenita nur per la rompiĝemaj, falsaj ligiloj de la voluptamo kaj de la malĉastaj moroj en tiu tempo.

Sed Aŭrelia ne rezignaciis pri la forlaso, kiu ŝin trafis, kaj planis la plej bonan manieron venĝi en oportuna momento, ĉar Plinio, ĉe la karesaj vibroj de la amo de Flavia Lentulia, ŝajnis tute alia homo. Li spontanee foriĝis de la tiama kutimaj orgioj kaj ankaŭ evitis siajn iamajn amikojn, kiuj trenadis lin en la abismon de ĉiuj malvirtoj kaj frivolajoj. Ŝajnis ja, kvazaŭ ia nova forto lin nun kondukis al la vivo kaj alkonformigas lian koron al la dolĉaj, helaj rondoj de la familio.

En la palaco de Lentulus la vivo fluadis kun relativa trankvileco.

Kalpurnia tie pasigis la unuajn monatojn post la morto de sia edzo, kune kun siaj filoj, dum Plinio kaj Flavia teksadis sian romanon de espero kaj amo, en la varmo de la juneco, sub la beno de la dioj, kiujn ili ne forgesis ĉe la lumplena apogeo de sia dolĉa korinklino.

Foriĝinte el la tiutempaj agitiĝoj, Plinio, ĉiam, kiam eble, enfermiĝis en siaj ĉambroj, en la palaco sur la monteto Aventino, kaj tie sin donis al la pentrarto aŭ la skulptarto, en kiuj li estis tre lerta; el multekostaj marmoroj li kutimis modeli statuetojn de Venuso kaj de Apolono, kiujn li donacis al Flavia, kiel memoraĵon de lia forta amo. Ŝi, siaflanke, faris delikatajn poeziajn juvelojn, al kiuj ŝi adaptis muzikon, kiun ŝi mem kantis ĉe sia liro; tiel ŝi oferis la florojn de sia animo al la amata fianĉo, en kies nobla spirito ŝi lokis la plej belajn revojn de sia koro.

Precipe unu persono ne toleris tiun ĉarman kuniĝon de du ĝemelaj animoj: tiu estis Agripo. Ekde la momento, kiam li renkontis la filinon de la senatano, en la haveno de Ostio, li kredis, ke li trovis sian estontan edzinon. Pro la projektoj de edziĝo de lia frato kun Aŭrelia, li pensis, ke li estas la sola kandidato al la koro de Flavia, tiu enigma kaj inteligenta Romana junulino, sur kies ruĝaj vangoj ĉiam ludadis rideto de supera boneco, kvazaŭ Palestino havigis al ŝi novan belecon, plenan de misteraj, strangaj logoj.

Sed liaj planoj tute fiaskis. Li vane kredis, ke li trovis la revatan virinon, ĉar siajn karesojn kaj zorgojn Flavia dediĉis nur al lia frato. Tial, dum Plinio Severus izolis sin en sian hejmon, por organizi siajn estontajn projektojn, Agripo dekliniĝis de la bona konduto, sin donante al longa vico da malsaĝaĵoj; preferante la plej sentaŭgajn kunulojn kaj la plej diboĉajn mediojn, li ĉiam pli reliefigis la strangan trajton de sia personeco.

Meze dum siaj multenombraj senprudentaĵoj li grave malsaniĝis, kaj pro tio afliktiĝis la patrino, kiu sin donadis al siaj filoj kun sia ĉiam sama zorgado.

En unu bela Roma posttagmezo, jen li estis sur tiu sama teraso, kie ni vidis Publion Lentulus en amara meditado, kiel estas dirite sur la unuaj paĝoj de ĉi tiu libro.

Karesaj ventetoj malvarmigis la krepuskon, ankoraŭ saturitan de la lumo de ĉarma, arda suno.

Apud li, Kalpurnia ekzamenis kelkajn pecojn da lanŝtofo kaj de tempo al tempo turnadis al li amplenajn okulojn. Ĉe unu momento, la respektinda sinjorino parolis al li jene:

– Nu, mia filo, ni danku la diojn, ke mi nun vidas vin multe pli bone fartanta kaj sendube resaniĝanta.

– Jes, patrino – diris la junulo –, mi fartas pli bone kaj estas pli fortika; mi tamen esperas, ke mi maksimume post du tagoj revenos en nian domon, por plifirmigi mian resaniĝon kaj peni forgesi...

– Kion forgesi? – demandis Kalpurnia kun miro.

– Patrino – respondis la junulo per enigma tono –, la sano ne povas reveni en la korpon, kiam la spirito ankoraŭ estas malsana...

– Nu, filo, vi devas pli sincere, pli malkaŝe elverŝi al mi vian koron. Konfidu al mi viajn plej profundajn ĉagrenojn, ĉar eble mi povos doni al vi ian konsolon!

– Ne, patrino, mi ne devas fari tion!

Kaj tion dirinte, ĉu por tio, ke li ankoraŭ estis malvigla, ĉu tial, ke li bezonis liberigi sian animon de ĝia premateco, Agripo Severus eksplodis per larmoj, kaj per tiu neatendita teniĝo li amare surprizis la patrinan koron.

– Kion tio do signifas, mia filo? Kio okazas en via animo, ke vi tiel suferas? – demandis Kalpurnia treege kompatanta, ĉirkaŭprenante lin per siaj karesaj brakoj. – Diru al mi ĉion! – ŝi daŭrigis afliktita. – Ne kaŝu antaŭ mi viajn ĉagrenojn, Agripo, ĉar mi ja scios tiel aŭ alie rebonigi la situacion!

– Patrino, mia patrino – li tiam diris tute elverŝante sian koron –, mi suferas ekde la tago, kiam Plinio forprenis de mi la deziratan virinon! Mi sentas en la animo ian misteran allogon al Flavia kaj mi ne povas

rezignacii pri la dolora realo, pri la efektivigo de tiu baldaŭa edziĝo.

“Mi kredas, ke, se mia patro ankoraŭ vivus, li penus savi mian situacion, akirante por mi tiun edziĝon per la feliĉaj decidoj, por kiuj, kiel ni scias, li estis kapabla.

“Meze de ĉiuj aventuroj de la juneco mi ĉiam esperis, ke iam aperos antaŭ mi la virino, kiun mi revis, por krei hejmon kaj familion; kaj kiam ekmontriĝis la virino, kiun mi aspiras, jen ŝi estas al mi elprenita, kaj, efektive, kiu ŝin forprenis?! Ĉar, vere, se Plinio ne estus mia frato, mi ne hezitus uzi la plej krudajn procedojn, por kontentigi miajn dezirojn!”

Kalpurnia lin silente aŭdadis, dividante lian aflikton kaj plorante, kiel li. Ŝi ne sciis la ekziston de tiu interfrapiĝo de sentoj kaj nur nun ŝi povis kompreni la tro daŭran malsanon, kiu kruuele konsumadis ŝian pli maljunan filon.

Sed ŝia koro posedis pri la tiamaj vivo kaj moroj sperton sufiĉan, por plej ĝuste taksi la situacion; kaj, aliigante la virinan sentemecon kaj la patrinajn timojn en neflekseblan fortikecon, ŝi kortuŝita respondis al li, dolĉe karesante liajn harojn:

– Mia Agripo, mi komprenas vian koron kaj scias taksi la intensecon de viaj moralaj suferoj; vi tamen devas kompreni, ke en la vivo ekzistas doloraj fatalaĵoj, kies premantajn problemojn ni devas solvi kun plej grandaj kuraĝo kaj pacienco... Ne por alia celo la dioj lokis nin sur la sociaj altaj rangoj, ol por tio, ke ni instru al la malpli sciantaj kaj malpli fortaj homoj la tradiciojn pri nia spirita supereco antaŭ ĉiuj doloraj okazaĵoj de la vivo kaj de la destino.

“Sufoku en via animo tiun nepravigeblan pasion, des pli, ĉar mi sentas, ke Flavia kaj via frato naskiĝis en ĉi tiu mondo kun interplektitaj destinoj... Plinio ankoraŭ estis knabeto, kaj jam tiam via patro planis tiun edziĝon, nun baldaŭ efektiviĝontan.

“Estu forta – parolis plu la nobla matrono, elviŝante liajn silentajn, malgajajn larmojn –, ĉar la ekzistado kelkafoje postulas de ni tiajn agojn de senkondiĉa abnegacio!

“Ni dume supren direktu niajn petojn al la dioj! De Jupitero ja venos al via vundita animo la necesa konsolo!”

Aŭdinte la patrina voĉon, Agripo sentis sian koron malpli premata, kvazaŭ ĝi kvietiĝis post tumulto de la plej antagonismaj sentoj.

Li opiniis, ke la patrinaj konsideroj reprezentas la veron, kaj, ankoraŭ sub la psika impreso, lin turmentanta pretiĝis por plej altgrade rezignacii pri sia dolora, neriparebla situacio.

Antaŭ ol denove paroli al li, Kalpurnia lasis flui kelke da minutoj, kvazaŭ atendente la bonan efikon de siaj unuaj admonoj, kaj daŭrigis:

– Ĉu nun ne interesus vin vojaĝi al nia bieno en Avenio? Mi ja scias, ke, pro via profesia inklino kaj pro la cirkonstancoj, vi devas resti ĉi tie, kiel posteulo de via patro; tamen tia vojaĝo estus solvo de pluraj urĝaj problemoj, inkluzive de via privata afero.

Agripo, aŭdis la konsilon kun plej granda intereso kaj fine respondis:

– Patrino, viaj amikaj vortoj konsolis min, kaj mi akceptas vian proponon, por provi, ĉu mi sukcesos trovi la mirindan eliksiron de forgeso; mi tamen dezirus forvojaĝi komisiite de la ŝtato, ĉar tiel mi povus restadi en Massilia, havante la aŭtoritaton, kiu estos al mi necesa en tiaj cirkonstancoj...

– Kaj, ĉu vi ne povus facile tion ekhavi?

– Mi kredas, ke ne. Por fari vojaĝon kun oficiala povo, mi realigus mian intencon nur kiel militista komisiito.

– Kaj, kial ni ne uzu niajn influajn amikrilatojn, por atingi tion, kion vi deziras? Vi ja scias, ke, per la helpo de Publio kaj de la senatano Kornelio Dokus, Plinio esperas esti baldaŭ promociita al oficireco, kun vastaj perspektivoj de progreso kaj novaj estontaj faroj en la kadro de nia militistaro. Cetere, oni diras, ke la imperiestro Klaŭdio, pli firme centralizante la regnan povon per nova administra reĝimo, ĝojas, kiam li aliigas la politikajn rajtojn en militistajn prerogativojn.

“Por mi estus motivo nur por fiero kaj plezuro oferi ambaŭ miajn filojn al la Imperio, por la plisolidiĝo de ĝiaj superegaj konkerroj.”

– Tion mi faros – diris Agripo jam ne plorante, kvazaŭ la patrina propono estus milda forigilo de liaj turmentaj zorgoj.

Iom post iom dispaliĝis ĉe la horizonto la lasta ruĝa tono de la posttagmezo, kiun anstataŭis ĉarma stelpunktita nokto.

Apogita al la brako de sia patrino, la juna patricio iris pli konsolita en sian ĉambron kaj atendis la okazon prizorgi la efektivigon de siaj novaj planoj.

Lin konvene komfortiginte, Kalpurnis revenis al la teraso, kie ŝi penis ripozi de sia intensa morala laciĝo. Petante la kompaton de la dioj, ŝi fiksas per larmantaj okuloj la stelplenan ĉielon.

Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝia koro haltis en la brusto, por ĝui la preterpasadon de la plej dolĉaj rememoroj, kvankam ŝia menso estis saturita de amaraj, doloraj pensoj.

Pli ol ses monatoj estis forpasintaj post la morto de ŝia edzo, kaj la nobla matrono jam sentis sin tute fremda al la socio kaj al la mondo. Ŝi faradis plej mirindajn pensojn, por digne rigardi sian socian situacion, ĉar, en sia maljuneco plena de rezignacio, ŝi ja sentis, ke la kurado de la tempo apartigas de la ceteraj iujn homojn sur la bordoj de la senfina rivero de la vivo. En la medio kaj en la koroj, ŝin ĉirkaŭantaj, ŝi sentis ian strangan diferencon, kvazaŭ mankus iu peco de la mekanismo de ŝia prudento, por perfekta juĝado pri aferoj kaj okazaĵoj. Tiu peco estis ŝia edzo, forkaptita de la morto; ĝi estis lia grava kaj karesa, milda kaj saĝa parolo.

De la unuaj tagoj, kiam ŝi ekloĝis en la domo de siaj geamikoj, ŝi aŭdis de Livia kaj de Publio – ĉiu siavice – la plej dolorajn konfidencojn pri la okazintaĵoj en Palestino, por ĉiam kompromitintaj ilian feliĉon kaj geedzan trankvilecon. Kvankam ŝi faris uzon el siaj kapabloj de observado kaj analizado, ŝi tamen ne sukcesis definitive decidiĝi, koncerne tiujn faktojn, por la senkulpeco de sia afabla, lojala amikino. Kiom ŝi vidis, Publio Lentulus estis la sama viro, perfekte konscia pri siaj tre noblaj devoj ĉe la regna registaro kaj pri la karaj tradicioj de la patricia familio; sed Livia ŝajnis al ŝi treege aliĝinta pri sia maniero kredi kaj senti.

Laŭ sia koncepto pri rasaj fiero kaj vantamo, Kalpurnia ne povis akcepti tiujn principojn de humileco, tiun fratecon kaj tiun agantan fidon, kiujn Livia klare montris ĉe siaj sklavoj mem, obeante la ordonojn de la nova doktrino, kiu ekinvasis ĉiujn sociajn klasojn.

Kiel forte ŝi deziris, ke la edzo ankoraŭ estu apud ŝi, por povi submeti al li tiujn intimajn demandojn kaj ricevi lian ĉiam moderan, saĝan opinion! Sed nun ŝi estis tute sola kaj sola devis rezoni kaj agi kun plene libera konscienco; kiom ajn ŝi klopodis, por trovi ian solvon por la dolora geedza problemo de siaj amikoj, ŝi tamen nenion povis konkludi el sia observado kaj el la ekzameno de la familiaj tradicioj, kulturataj de ŝia spirito kun plej grandaj fiero kaj zorgo.

Sur la ĉielo brilis miriadoj da konstelacioj en la nokto, kio faris pli nigra la misteron de ŝia peniga animvagado; tiam, al ŝiaj oreloj venis la bruo de iaj alproksimiĝantaj paŝoj. Tio estis Publio, kiu, post sia vespermanĝo, ankaŭ venis al la teraso, por iom ripozigi sian menson.

– Ĉu vi ĉi tie? – afable demandis la matrono.

– Jes, mia amikino: plaĉas al mi spirite reiri al la forpasintaj tagoj... Mi kelkafoje plezuras ripozante sur ĉi tiu teraso, por la rigardado al la ĉielo. Mia opinio, el tie, el tiu grandega stelplena kupolo ni ricevas lumon kaj vivon; tie certe troviĝas nia neforgesebla Flaminio, lulata de la kareso de la bonkoraj dioj!

“Kaj efektive, nobla Kalpurnia – ĝentile daŭrigis la senatano – ĉi tiu estis unu el la lokoj, preferataj por niaj konversacioj kaj revoj, kiam la ĉiam memorata amiko honoris min per siaj vizitoj al ĉi tiu domo. Ankaŭ tie ĉi, antaŭ pli ol dek ses jaroj, ni ofte interŝanĝadis pensojn kaj impresojn pri mia foriro al Judujo, kelkajn tagojn antaŭ mia longa restado for de Romo!”

Fariĝis granda paŭzo; ŝajnis ke ili, kun identaj spiritaĵoj, profitas la mildan noktan helecon por enprofundiĝi en siajn proprajn korojn, kaj el tiuj tomboj elprenas, en dolora, rezignaciopluna silento, siajn plej karajn rememorojn.

Post kelkaj minutoj, kvazaŭ dezirante deturni la fluandon de siaj rememoroj, la respektinda matrono diris:

– Ĉar ni rememoras vian vojaĝon en la pasinta tempo, mi tial devas sciigi al vi, ke Agripo foriros al Avenio tuj, kiam li sentos sin plene resaniĝinta.

– Sed kial tia decido? – demandis Publio tre interesita.

– Jam de multaj tagoj mi pensas pri la neceso tie kontroli la grandnombrajn interesojn de niaj bienoj, ankaŭ tial, ĉar, antaŭ ol morti, mia edzo intencis persone trakti pri tiu afero.

– Sed, ĉu la solvo de tiu demando estas tiel urĝa? Kaj la edzino de Plinio? Ĉu Agripo ĝin do ne ĉeestos?

– Mi kredas, ke ne; tamen en la okazo, se li forestos, lin reprezentos Saul, emancipita sklavo en nia domo kaj kiu jam venigis al ni ekspreson el Massilia, por komuniki, ke li ĉeestos la ceremonion.

– Estas bedaŭrinde! – murmuris la senatano kortuŝita.

– Mi ankaŭ devas diri al vi – serene daŭrigis la matrono –, ke mi esperas la komplezon de via influa amikeco ĉe Kornelio Dokus, por ke vi ricevu de la imperiestro Klaŭdio bonan situacion por nia vojaĝonta amiko, kiu deziras ian oficialan mision; por tio li bezonas nur, ke la politikaj rajtoj, al li ŝuldataj pro

nobelego, estu ŝanĝitaj en militistajn privilegiojn.

– Tion ricevi ne estos malfacile. La nuna ŝtata regado multe pli interesiĝas pri la militistaro, ol pri aliaj klasoj.

Nova silento fariĝis dum la konversacio; post longa paŭzo, la senatano reprenis la parolon, kvazaŭ dezirante uzi la okazon, por definitive solvi la amaran problemon:

– Kalpurnia – li diris kun premata koro –, parolante pri mia pasintatempa ekskurso, vi sciigis min pri la nuna deviga vojaĝo de nia Agripo. Miaflanke, mi ankoraŭ kaj ĉiam memoras mian dispecigitan, perditan feliĉon, kiu neniam plu revenis!

La senatano observis ĉiujn psikologian reakciojn de sia respektinda amikino, ardante de la deziro ricevi de ŝi ian lastan konsolon. Li deziris, ke ŝi, kiu ĉiam konsiladis Livian, kvazaŭ ties patrino mem laŭ la eternaj kaj sanktaj ligiloj de la spirito, forviŝu ĉiujn liajn dubojn, diru al li, ke lia edzino estas senkulpa, certigu, ke lia kaprica, egoista vira koro eraras; sed li vane atendis tiun spontanegan defendon, kiu ne aperis en la oportuna kaj decida momento. La respektinda vidvino de Flaminio lasis pendanta en la aero la saman signon de dolora demando, malgaje murmurante, dum luna lumfasto kronis ŝiajn blankajn harojn:

– Efektive, mia amiko, la dioj povas al ni doni kaj de ni repreni la feliĉon... Ni estas du animoj, plorantaj ĉe la tombo de siaj revoj plej karaj al la koro!

Tiuj malkuraĝigaj vortoj penetris en la senteman, fieran bruston de la senatano, kvazaŭ ia akra sabro, kiu ĝin malrapide tranĉus.

– Sed, unuvorte, mia nobla amikino – li ekkriis iom energie, kvazaŭ atendente definitivon, por forigi la preman sendecidecon de sia animo –, kion vi nun pensas pri Livia?

– Publio – serene respondis Kalpurnia –, mi ne scias, ĉu la malkaŝa parolo estas malbono ĉe iuj cirkonstancoj; mi tamen preferas esti sincera.

“De la momento, kiam vi faris al mi tiujn maldolĉajn konfidencojn pri la okazaĵoj en Palestino, mi observas nian amikinson, celante pledi antaŭ via koro pro ŝia senkulpeco; sed, bedaŭrinde, mi rimarkas ĉe Livia la plej strangajn kaj surprizajn ŝanĝojn koncerne la spiriton. Ŝi estas, kiel ĉiam, humila, afabla, inteligenta kaj nobla, sed ŝajnas, ke ŝi malestimas niajn familiajn tradiciojn kaj niajn plej karaj kredojn.

Dum niaj intimaj diskutoj kaj konversacioj, ŝi jam sin ne prezentas tiel ĉarme timeme, kia mi iam ŝin vidis, sed, kontraŭe, ŝi elmontras tro evoluintan opinion pri la sociaj problemoj, kiujn, laŭ ŝia opinio, ŝi solvis per nova kredo. Ŝiaj ideoj skandalas min, pro siaj plej nepravigeblaj konceptoj pri homa egaleco; ŝi ne hezitas rigardi niajn diojn kiel iluziojn malutilajn al la socio, kiun ŝi ĉiam plej akre riproĉas; ŝi do vidigas strangajn ŝanĝojn pri sia pensmaniero kaj iras ĝis la absurdo konsideri sin fratino de la servistinoj mem de sia domo, kvazaŭ ŝi estus nura plebanino...

“Ĉu tio estas ia mensa konfuziteco, post iu dekliniĝo, pro kiu ŝia digno estis instigita al vigla reago? Ĉu eble tion kaŭzis iaj influoj de la medio aŭ eĉ de la sklavinoj, kun kiuj ŝi kutimiĝis vivi dum tiu longa foresto el Romo? Mi ne scias... Vere mi ne povas, kun pura konscienco kaj definitive, ion diri pri viaj edzaj suferoj, kaj konsilas al vi atendi, kion montros la tempo.

“Post nedaŭra paŭzo, la maljuna matrono finis siajn rimarkon, interesplene demandante:

– Kial vi permesis al Livia implikiĝi en tiujn novajn ideojn, lasante ŝin sub la kaprico de tiu Juda reformisto, konata sub la nomo de Jesuo el Nazaret?

– Vi estas prava – diris Publio Lentulus senkuraĝa –, sed tio originis el potencaj cirkonstancoj, ĉar Livia kredis, ke la Nazareta profeto resanigis nian filinon!

– Vi estis naiva, ĉar tian hipotezon vi ne povus akcepti, konsiderante la evoluogradon de la nuntempa sciado; vi devus liberigi el tiuj danĝeraj spiritaj influoj la facile regeblan spiriton de via edzino. Estas pruvite, ke tiu nova kredo ordonas humiligajn mensajn teniĝojn kaj renversas la plej profundajn konvinkojn de la homoj, kiuj ĝin alprenas. Riĉuloj kaj scienculoj, kiuj submetiĝas al tiuj abomenaj principoj en la Imperio, favore al ia imaga regno, ŝajnas ebriaj de terura narkotiko, kiu igas ilin forgesi kaj malŝati siajn riĉaĵon, nomon, tradiciojn kaj eĉ familion!

“Mi klopodos kune kun vi, prenante Flavian for de tiuj moralaj antaŭjuĝoj kaj forkondukante ŝin en mian hejmon tuj, kiam efektiviĝos la geedziĝo de niaj karaj infanoj, ĉar koncerne Livian, mi ĉion vane faris, por konvinki ŝin pri ŝia eraro.”

– Tamen, mia bona amikino – diris la senatano kortuŝita, kvazaŭ defendante sin antaŭ la nobla patriciino –, mi rimarkas, ke Livia ankoraŭ estas simplanima kaj modesta virino, postulanta de mi nenion ekscesan aŭ superfluan. Dum tiuj preskaŭ dek sep jaroj da disiĝo de ni ambaŭ en la hejmo, ŝi petis de mi nur la permeson daŭrigi siajn kristanajn laborojn, kune kun malnova servistino de nia domo; tiun permeson mi devis konsenti, konsiderinte la konstantecon de ŝia silenta kaj malĝoja abnegacio en nia hejmo.

– Ankaŭ mi opinias, ke tiu peto estas tre modera, precipe nun, kiam ĉiuj virinoj en nia urbo, laŭ la aktualaj moroj, postulas de siaj edzoj la plej malsaĝajn ekstravagancojn pri lukso; mi tamen devas konsili al vi, kiu konservas netuŝitaj niajn plej karajn tradiciojn, atendi ankoraŭ iom da tempo, antaŭ ol forgesi la dolorajn okazintaĵojn; ni dume vidos, ĉu Livia ricevos ian utilon el la konstanta kontakto de nia sinteno kaj fine revenos en la sinon de niaj tradicioj kaj kredoj!

Post tiuj vortoj, dolora silento fariĝis inter la dialogantoj.

Kalpurnia opiniis, ke ŝi plenumis sian devon, kaj Publio, en tiu nokto, iris en sian ĉambron pli senkuraĝa ol iam.

Post nemultaj tagoj, sukcesinte pri sia intenco, Agripo foriris al Avenio, malgraŭ la petoj de sia frato kaj de Flavia, ke li atendu ĝis la edziĝa ceremonio. Sed lia decido estis neskuebla; la pli maljuna filo de Flaminio, premata sub la pezo de siaj elreviĝoj estis forvojaĝonta el Romo por kelkaj jaroj, longaj kaj doloraj.

La tagoj rapide forpasis; kaj, ĉar ni devas en nia rakonto, akompani ĉiujn personojn, kiujn ĝi koncernas, ni tial sciigu, ke, vidante sin forlasita de sia preferata viro kaj konsumata de venena ĵaluzo, Aŭrelia decidis akcepti la noblan kaj amikan manon, kiun la juna Emiliano Lucius etendis al ŝi.

Instigita de siaj malnoblaj sentoj, Fulvia, kiu sekvis tiun silentan batalon, decidis atendi la tempon, por efektiviĝi sian ruinigan venĝon.

Post nelonge, la geedziĝo de Plinio kaj Flavia okazis kun diskreta pompo, en la palaco sur la monteto Aventino. La fianĉo, kovrita de militista gloro kaj de honoraj titoloj, kaj lia estonta kunulino, plena de nedifinebla ĉarmo kaj de rava simpleco, sentis sin feliĉaj, kvazaŭ la perfekta feliĉo konsistis nur en la eterna kunfandiĝo de iliaj koroj kaj animoj. Tiu tago sendube signis la plej sanktan kaj belan horon de iliaj destinoj.

Inter la tre malmultaj ĉeestantoj, la plej intimaj amikoj, troviĝis viro ankoraŭ juna, kiu reprezentis reliefan figuron en tiu bildo kaj kiun tiu epoko esence karakterizis.

Liaj avidaj ardaĵoj okuloj estis, kun mistera stranga intereso, fiksitaj sur la fianĉino.

Tiu viro estis Saul de Ĝioras, kiu, forlasinte sian familian nomon, nun prezentiĝis kun nomo Romana, laŭ permeso de Flaminio, por ĉiam pligravigi la valoron de sia riĉaĵo en la socio.

La senatano vane penis identigi tiun Judon, kiu ŝajnis al li malnova persona konato. Saul tamen rekonis sian iaman turmentanton; li ĉi iun rekonis, kaj silentis, kvietigante la grandajn skuojn de sia animo, ĉar same kiel lia patro, li portis en sia koro la pereigan intencon je kruela venĝo.

III - PLANOJ DE LA MALLUMO

Post la ceremonio de la edziĝo de Plinio, la Juda emancipita sklavo, kontraŭante ĉiujn supozojn, ne reiris Massilian, sub la preteksto, ke multo da negocoj lin restigas plu en la ĉefurbo de la Imperio.

Loĝante en la palaco de la familio Severus, kien la juna geedza paro iris vivi kun Kalpurnia, Saul havis multajn okazojn renkonti la senatano Publio Lentulus, kun kiu li ofte konversaciis pri Judujo kaj ĝiaj gravaj regionoj.

Cerbumante pri tiu arda rigardo kaj tiuj fizionomiaj trajtoj, kiuj ne estis al li tute fremdaj, kaj klare memorante tiun patron, kiu afliktita iris al li, en Jerusalem, jen la senatano dum unu el siaj intimaj konversacioj kun la kurioza nekonato, kiun li abrupte demandis:

– Sinjoro Saul, ĉar vi naskiĝis en la ĉirkaŭaĵo de Jerusalem, ĉu tial via patro ne estas nomata Andreo de Ĝioras?

Ĉe tiu rekta parolo pri la afero plej delikata en lia ekzistado, la emancipito mordetis la lipojn kaj eviteme respondis:

– Ne, senatano, mia patro ne havas tiun nomon. Kiam mi estis sklavigita de senkompataj, kruelaj manoj, ĉar vere, mi tiam estis nura malbone edukita, nepriresponda infano – li akcentis kun profunda acideco –, mia patro estis mizera terkulturisto, kiu havis nenion alian ol siajn brakojn por la ĉiutaga laboro... Mi tamen havis la feliĉon trovi la komplezemajn manojn de Flaminio Severus, kiuj gvidis min al libereco kaj riĉeco, kaj hodiaŭ mia patro, per la malmulto da mono, kiun mi donis al li, pliampleksigis siajn laborkapablojn; nun li havas ne nur ioman socian gravecon en Jerusalem, sed ankaŭ superan oficon en la Templo.

“Sed, kial vi demandas tion?”

Antaŭ tia lerta respondo, la senatano kuntiris la brovojn, sed, sentante sian koron malpli ŝarĝita, ĉar al li ŝajnis, ke lia dialoganto ja ne estas tiu sama Saul, kiun li dolorplene rememoris, li pli trankvila respondis:

– Mi tion demandis, ĉar mi okaze faris konatiĝon kun Juda terkulturisto, nomata Andreo de Ĝioras, kies fizionomiaj trajtoj ne tre malsimilis la viajn...

Kaj la konversacio sekvis la normalan ritmon de la bagatelaj interparoladoj en la rondoj, kie regas la konvencioj de la socia vivo.

Sed Saul lasis vidi strangan brilon en la rigardo, kiel iu treege kontenta pri la destino kaj atendanta la okazon, por efektivigi siajn terurajn venĝoplanojn.

Sekreta malnobla motivo restigis lin plu en Romo, kvankam multaj komercaj operacioj postulis lian ĉeeston en Massilia, kie lia nomo estis firme ligita al grandaj financaj kaj materialaj interesoj. Tiu motivo estis lia arda deziro esti rimarkita de la juna edzino de Plinio, kies rigardo kvazaŭ altiris lin al ia abismo da furioza, nebridebla amo.

De la momento, kiam li vidis ŝin kun la fianĉinaj ornamaĵoj, en la feliĉa tago de ŝia edziniĝo, ŝajnis al li, ke li trovis la idealan virinon de siaj plej intimaj revoj, en kiuj li sin jam de longe lulis.

Vere, la infanoj de liaj iamaj gemastroj indis lian respekton kaj lian plej grandan estimon; tamen iu forto, pli pova ol ĉiuj liaj danksentoj, pelis lin al la deziro posedi Flavian Lentulian, kiom ajn tio kostos, eĉ se lian vivon mem.

Tiuj ĉarmaj, revemaj okuloj, tiu nobla, senafekta gracieco, tiu hela, delikata inteligento, ĉiuj ŝiaj spiritaj kaj fizikaj naturdotoj, kiujn li akraŭvide observadis dum la nemultaj tagoj de sia restado en la urbo, rajtigis lin kredi, ke tiu virino ja konkretigas lian idealon.

Kaj baraktante en tiu kirlego da nigraj pensoj, li pasigis du monatojn da malnoblaj, afliktaj esperoj, preterlasante nenian okazon, por montri al Flavia, kiel grandaj estas lia amo, admiro kaj estimo, antaŭ la konfidaj, amikaj okuloj de Plinio.

En la soleco de siaj profundaj zorgoj, Saul konsideris, ke, se ŝi amos lin, se ŝi reciprokos la fortegan pasion de lia flama, egoista spirito, li jam neniam pensos pri sia planata venĝo kontraŭ la koro de ŝia patro: li rekondukos la junulon Marko Lentulus en lian patran hejmon kaj elviŝos sian pasintecon plenan de krimaj intencoj; sed, se okazos kontraŭe, li realigos siajn malicajn projektojn, ĝis ebrieco drinkante la malaman vinon de la venĝo.

Tiam fluadis jam la jaro 47; ne forgesante Fulvian kaj ŝian filinon, jen ni vidas ilin ankoraŭ regataj de la samaj kruelaj, pereigaj sentoj.

Aŭrelia vane edziniĝis kun Emiliano Lucius, ĉar li tute ne estis, en ŝiaj okuloj, la tipo de viro, kiun ŝia temperamento supozis trovi ĉe la pli juna filo de Flaminio.

Tial, post la unuaj elreviĝoj kaj kolizioj en la hejmo, konsilita de sia patrino ŝi iris kun ĉi tiu peti helpon de la mistera scienco de Arakso, fama Egipta sorĉisto, kiu tenis butikon por vendado de strangaj varoj proksime de la monteto Eskvilino.

Arakso, kies kriman komercon ĉiuj konis kiel neelĉerpeblan fonton de miraklaj eliksiroj de amo, de malsano kaj de morto, estis incito pri la religiaj ritoj de la antikva Egiptujo; li tamen dekliniĝis de la sankta misio de karito kaj paco, pro sia arda avideco je la mono de la granda Romana klientaro, tiam dronanta en skandalaj malvirtoj kaj vivanta en la ruino de la plej belaj moroj de la respektinda sistemo de la familio.

Ekspluatante ĝiajn malnoblajn pasiojn kaj nedecajn kutimojn, la Egipta magiisto preskaŭ tute uzadis sian spiritan sciencon por la plenumado de ĉiaj malicaĵoj kaj krimoj, kaj tiel kaŭzis grandegajn malutilojn per siaj venenaj drogoj kaj strangaj konsiloj.

Diskrete alparolita de Fulvia kaj ŝia filino, li plene informiĝis pri la celo de ilia vizito kaj tie, inter grandaj retortoj kaj pakoj da plantoj kaj diversaj substancoj, ŝovis la kapon inter la manojn, kvazaŭ lia spirito esplorus la plej profundajn sekretojn de la nevidebla mondo, antaŭ tripiedo kaj aliaj iloj de la okultaj sciencoj; per tia parado li, tre lerta psikologo, intencis impresi la sugestieblan menson de siaj mutenombraj klientoj, kiuj venis al li por la solvo de la malfacilaj problemoj de la vivo.

Post multaj minutoj da enpeniĝo, la Egipta magiisto, kun strange brilantja okuloj, sin turnis al Aŭrelia kaj per impresa tono asertis al ŝi:

– Sinjorino, mi vidas antaŭ mi dolorajn bildojn el via spirita vivo, dum malproksima pasinteco! Mi vidas Delfojn dum la ĝloraj tagoj de ĝia orakolo kaj rimarkas, ke vi penas delogi viron, ne apartenantan al vi? Tiu viro estas la sama, nun vivanta... La samaj animoj hodiaŭ vagas en aliaj korpoj, kaj vi devas pensi pri pri la realo en la nun fluantaj tagoj kaj rezignacii pri la klara malsameco de la vojoj de la destino!

Aŭrelia lin aŭdis, samtempe surprizita kaj terurita; ankaŭ la subtila animo de ŝia patrino sekvis la konversacion, tuŝita de ia malpreciza impresio.

– Kion vi diras al mi? – demandis la juna sinjorino, en la apogeo de sia vundita sentemeco. – Aliaj vivoj? Iu viro, ne apartenanta al mi? Kion ĉio ĉi signifas?

– Vere, nia spirito, en ĉi tiu mondo – respondis la sorĉito kun nekonsternebla sereneco – havas longan vicon da ekzistadoj, kiuj riĉigas nian internaĵon per kreskanta konado pri la devoj koncernantaj nin dum la vivo!

“Vi jam vivis en Ateno kaj en Delfoj, dum longa stadio de teruraj malsaĝaĵoj en amaj aferoj; hodiaŭ, vidante vin apud la objekto de viaj iamaj ardaĵoj, pekaj pasioj, vi pretendas la samajn eblojn por la kontentigo de viaj brulaj, fiaj deziroj!

“Tien ĉi venis jam multenombraj homoj. Al multaj mi konsilis persisti en siaj intencoj, kelkafoje nepravigeblaj kaj malsuperaj; sed, pri via afero, iu voĉo pli laŭte parolas al mia konscienco. Se via senprudenteco pelas vin ĝis la ekstremo inciti tiun viron, ĝis nun konsciencie honestan, povos okazi, ke lia koro, ankaŭ flamiĝema, respondos viajn kapricojn; tamen penu ne fari tian frenezan inciton, ĉar nun la destino kunigis lin al animo ĝemela de lia animo, kaj malglata vojo, semita per dornaj provoj, atendas ilin en la estonteco, por la solidigo de iliaj reciprokaj amo kaj konfido, por la plifirmigo de la grandeco de iliaj spiritoj! Ne baru la vojon al tiu virino, kiun via spirito konsideras potenca konkurantino! Se vi enŝoviĝus inter ŝin kaj ŝian edzon, vi pliakrigus viajn proprajn suferojn; ĉar, vere, via koro ne estas preparita por la grandaj sanktigaj abnegacioj; kion vi rigardas kiel profundan, superbelan amon, tio estas nenio krom fantazio, malutila al via koro de virino kaprica kaj inklina, ne al la sinofero por la karesoj de

amanta, lojala edzo, sed al la multigo de amorantoj, laŭ la nombro de siaj arbitraj deziroj...”

Aŭdante tiujn vortojn, kiujn ŝi opiniis trokuraĝaj kaj insultaj, Aŭrelia estis palega. Ŝi deziris defendi sin, sed ŝajnis, ke ia eksterordinara forto prenas ŝian gorĝon kaj paralizas ŝiajn voĉkordojn.

Sed Fulvia, plena de kolero pro la insultoj de tiu viro, prenis sur sin la defendon de sia filino, lin energie riproĉante:

– Arakso, senhonta sorĉisto, kion vi intencas diri per tiuj vortoj? Ĉu vi insultas nin? Ni povas faligi sur vian kapon la pezon de la imperia Justico, kiu enŝlosos vin en karceron kaj malkaŝos al la socio viajn nigrajn sekretojn!

– Kaj, ĉu ankaŭ vi, nobela sinjorino, ne havas sekretojn? – li nekonsternita rebate demandis. – Ĉu vi estas tiel senkulpa, ke vi ne hezitus kondamni min?

Tremante de kolero, Fulvia mordtis la lipojn kaj furioza ekkriis:

– Silentu, hundo! Ĉu vi ne scias, ke staras antaŭ vi la edzino de pretoro?

– Tio ne ŝajnas al mi – respondis la sorĉisto kun serena ironio –, ĉar la nobelaj matronoj de tiu klaso ne venus al ĉi tiu domo peti mian helpon por iu krimo... Kaj cetere, kio estus dirita en Romo pri patriciino, kiu irus ĝis la mizera ekstremo, intime paroli al maljuna sorĉisto sur la monteto Eskvilino?

“Estas vere, ke multe da malbono mi jam faris dum mia vivo, sed ĉiuj scias, ke mi tiel kondutas kaj ke mi ne uzas la ombron de bonaj sociaj pozicioj, por kaŝi la abomenecon de mia malŝatinda ekzistado! Malgraŭ tio, mi volas savi la junecon de via filino for de la nigra vojo de viaj malicaĵoj, ĉar, se ŝi sekvos vian tordan vojon de vipuro, kiel adulta, krima edzino, ŝi renkontos ĉe ĝia ekstremo nur prostituitecon kaj malfeliĉon, elfinitajn per malhonora morto ĉe puŝo de glavo...”

Fulvia ekdeziris energie rebati tiujn insultojn de Arakso, repuŝi tiujn tre ofendajn esprimojn, kiujn ŝi ricevis kiel ekstreman malrespekton; sed Aŭrelia, timante novajn implikaĵojn kaj komprenante la kulpecon de sia patrino, prenis ŝian brakon, kaj ili ambaŭ silente foriris, moke rigardataj de la maljuna Egipto, kiu rekomencis kolone amasigi pakojn da plantoj inter multenombraj vazoj kun strangaj substancoj.

Sed ne multan tempon li povis uzi por sia soleca, silenta laboro. Post du horoj alia homo frapis ĉe lia pordo.

Arakso estis surprizita de la vizito de tiu simpatia Judo. La brilo de la okuloj, la karakteriza nazo, la harmonio de la Izraelidaj trajtoj faris el tiu ankoraŭ juna viro strangan, impresan figuron.

Tio estis Saul, kiu, ardante de la deziro, por ĉiu prezo posedi la edzinon de Plinio, uzis la samajn misterajn procedojn, por ekhavi la talismanon aŭ la miraklan eliksiron de la sorĉisto, servontan al liaj malsaĝaj pretendoj.

Akceptinte en la sama maniero, kiel la du aliaj personoj partoprenantaj en nia dolora dramo, Saul detale prezentis al la divenisto siajn amajn turmentojn ĉe tiu honesta, digna virino.

Post sia kutima enpenŝiĝo, jam al ni konata, antaŭ la tripiedo, ĉe kiu li faradis siajn preĝojn, Arakso streĉis la lipojn per diskreta, apenaŭ videbla rideto, kvazaŭ trovinte alian strangan koincidon en sia

ampleksa studado pri la homa psikologio. Sed liahezito daŭris ne multajn sekundojn, ĉar li baldaŭ ekparolis per malrapida, kaverna voĉo:

– Judo! – li serioze diris – laŭdu la dion de viaj kredoj, ĉar vian vizaĝon levis el la polvo la manoj de la viro, kiun vi hodiaŭ penas perfidi... La severaj leĝoj de via patrolando ordonas, ke, eĉ en penso, vi ne deziru la edzinon de via proksimulo kaj des malpli la sindonan, fidelan edzinon de unu el viaj plej grandaj bonfarintoj. Faru paŝon malantaŭen sur via mizera, hontinda vojo! Estis tempo, kiam via Spirito vivis en la korpo de pastro de Apolono, en la glora templo de Delfoj... Vi persekutis junan gardistinon de la sanktaj misteroj kaj ŝin kondukis al mizero kaj morto per viaj abomenaj, doloraj malsaĝaĵoj. Ne kuraĝu nun tiri ŝin el la brakoj, destinitaj por helpo kaj protekto al ŝi en ĉi tiu mondo! Ne intrudiĝu en la destinton de du homoj, kiujn la ĉielaj fortoj konformigis unu al la alia!

Sed, kvankam impresita de tiu tranĉa admono, la Juda junulo ne kondukis tiel akre kiel la du virinoj, venintaj pli frue ol li por sia mistera vizito.

Tirinte sakon da moneroj, li ĝin karesis, kvazaŭ por eksciti la konsentemon de la divenisto, kaj ekkriis per preskaŭ petega voĉo:

– Arakso, mi havas oron... multe da oro, kaj da ĝi mi donos al vi tiom, kiom vi volos, por la altvalora helpo de via scienco... Pro la amo al viaj dioj, havigu al mi la simpation de tiu virino, kaj mi malavare rekompencos vin pro viaj netakseblaj penoj...

Rigardante la kornoforman monujon, kie oro brilis, la okuloj de la Egipta magiisto fulmis pro stranga sento, kvazaŭ li ĝin avidus, sed li pli delikate respondis:

– Mia amiko, tiun virinon ne deziras nur vi, kaj mi opinias, ke vi devus kunhelpi, por ke ŝi ne forlasu la kompanion de sia edzo!

– Ĉu do ekzistas alia aspiranto?

– Jes, la signoj de la destino konigas al mi, ke tiun virinon deziras ankaŭ la frato de ŝia edzo.

Saul faris koleran geston, sentante sin turmentata de la plej akra ĵaluzo, kaj murmuris tra la dentoj:

– Ha, jes... Nun mi pli bone komprenas la subitan forveturon de Agripo direkte al Avenio!

Kaj, laŭtigante la voĉon, kvazaŭ farante la lastan provon de sia ambicio, li korpemata ekkriis:

– Arakso, mi ankoraŭfoje petegas vin! Faru ĉion eblan! Mi vin plej malavare pagos!

La frunto de la magiisto denove kliniĝis antaŭen, kun teniĝo de profunda meditado, kvazaŭ lia spirito serĉus en la nevideblaj regionoj ian malican forton, favoran al liaj pereigaj intencoj.

Post kelkaj minutoj, li ree parolis, dirante per milda, amika tono:

– Ŝajnas, ke post kelka tempo de nun aperos iu okazo oportuna por via korinklino!

La Juda junulo kun angora espero aŭdis liajn asertojn, kiuj jene daŭris plu:

– La signoj de la destino diras, ke, por la plifirmigo de ilia profunda amo kaj reciproka konfido, kaj ankaŭ por ilia spirita progreso, doloraj provoj, kiujn ili spertos post kelkaj jaroj de hodiaŭ, estas difinitaj al la du geedzoj!

Okazos io, kio ilin disigos en la hejmo mem, sed mi ne povas precize vidi, kio ĝi estos. Mi scias nur, ke ili ambaŭ devas travivi longan stadion de asketismo kaj peniga abnegacio en la sankta sino de la familio... Ĉe tiu momento, eble, mia amiko povos konkeri tiun arde soifantan koron!

– Ĉu io do fariĝos? – demandis Saul scivola kaj afliktita, esplorante la transcendan aferon –; sed kio povos okazi, kio disigos ilin en la hejmo mem?

– Mi mem ja ne scias diri...

– Kaj, ĉu estos ĉiu el ili devigita al fidela asketismo kaj al nerompebla sindoneco?

– La determinismo de la destino ordonas, ke tiel estu; tamen, tiel la edzo, kiel la edzino, povos enmiksiĝi en tiujn provojn, farante novan moralan ŝuldon aŭ elaçetante sian dornan pasintecon per la necesa morala braveco en la suferoj, tio estas, uzante, en la determinismo de la purigaj provoj, sian bonan aŭ malbonan volon... Sciu, ke la homo inklinas pli forte al malbono, kaj tial, viaj pretendoj eble estos kontentigitaj en tiu tempo.

– Kaj, kiel longe mi devos atendi, ĝis tio okazos? – demandis la emancipita sklavo, treege maltrankvila.

– Kelke da jaroj.

– Kaj, ĉu estos senutile provi ian penon pli frue?

– Tute senutile. Mi scias, ke mia estiminda kliento

havas multe da interesoj en iu malproksima urbo, kaj estas pravigeble, ke vi dume zorgu pri viaj materialaj aferoj.

Pasigante la observojn de Arakso tra la kribrilo de sia konscienco, Saul fikse rigardis tiun viron, kiu laŭŝajne konis la plej kaŝitajn sekretojn de lia vivo.

Dankante lin por lia bonvola atento kaj promesante reveni en oportuna tempo, Saul donis al la magiisto sian orplenan monujon.

Post kelke da tagoj, ne longe antaŭ ol foriri, la Juda junulo profitis iujn minutojn da pura, simpla intimeco kun Flavia, dirante al ŝi:

– Nobla sinjorino – li komencis per tima voĉo, sed kun la sama stranga fajro de malnoblaj sentoj, travidebla tra la okuloj –, mi ne scias la motivon de tio, kion travivas mia animo kaj kion mi nun malkaŝos al vi, nome, ke mi forveturos al Massilia, tenante vian bildon en la plej profunda angulo de mia penso!

– Sinjoro – diris Flavia Lentulia, ruĝiĝante de ĝenateco –, mi devas vivi sole nur en la penso de tiu viro, per kiu la dioj prilumis mian destinton!

– Nobela Flavia – rebate diris la sagaca Judo, rimarkinte, ke la atako estis antaŭtempa kaj neoportuna – mia estimo kuntrenas nenian malpli noblan senton. En miaj okuloj vi estas respektinda pro du motivoj, ne nur pro via alta pozicio kiel patriciino, sed ankaŭ pro tio, ke vi estas la edzino de unu el la plej grandaj bonfarintoj de mia vivo!

“Trankviliĝu pri miaj paroloj, ĉar en mia koro ekzistas nur la plej lojala intereso por via persona feliĉo apud la digna edzo, kiun vi elektis.

“Mi sentas pro vi tion, kion sklavo devas senti por sinjorino, bonfarinta al lia ekzistado, ĉar vere, en mia mizera situacio de emancipito, mi ne povas prezenti min antaŭ via grandanimeco kun la titolo de frato, kiu vin tre multe respektas kaj estimas.”

– Bone, sinjoro Saul – diris la junulino pli trankvila –, mia edzo konsideras vin kiel tre karan fraton, kaj estas por mi honoro, ke mi partoprenas en liaj sentoj.

– Mi vin tre dankas – hipokrite respondis Saul –, kaj, ĉar vi min tiel bone komprenas, nur interesite kiel frato mi turnas min al via nobla animo, por averti vin kontraŭ iu danĝero.

– Iu danĝero? – demandis Flavia afliktita.

– Jes. Mi parolas al vi konfidence kaj do petas, ke vi gardu plej zorge la sekreton de ĉi tiu frata konfiditaĵo.

Kaj, dum la junulino lin plej atente aŭskultadis, Saul daŭrigis siajn perfidajn duondirojn:

– Ĉu vi scias, ke Plinio preskaŭ fianĉiĝis kun la filino de la pretoro Salvio Lentulus, via onklo, tiu sama junulino, hodiaŭ edzino de Emiliano Lucius?

– Jes... – respondis, kun premata animo, la kompatinda sinjorino.

– Nu, mi devas averti vin, kiel frato, ke via kuzino Aŭrelia, malgraŭ siaj gravaj edzinaj devoj, ne rezignis la viron, kiun ŝia koro iam preferis: hodiaŭ iu amiko informis min, ke ŝi jam iris al pluraj sorĉistoj en Romo, por reakiri lian pasintetempan amon, kiom ajn tio kostos al ŝi!

Ĉe tiuj perfidaj vortoj, Flavia Lentulia eksentis la unuan dornon en sia geedzeca vivo, la turmenton de la plej akra ĵaluzo.

Plinio reprezentis ŝian tutan idealon, ŝian tutan feliĉon de juna virino. Ŝi konfidis al lia koro ĉiujn siajn virinajn revojn, ĉiujn siajn plej fortajn, plej florantajn esperojn. Vundita de la unua ĉagreno en sia socia vivo, en la granda urbo de siaj gepatroj, ŝi, en tiu momento, arde soifis ian amikan klarigon, ian karesan parolon, kiu restarigus la ekvilibron de ŝia koro, nun ekskuita de la unua malagrableco. Mankis al ŝi io, kio povus kompletigi la noblajn kvalitojn de ŝia virina koro, io, kio certe estis la patrina agado pro ŝia edukado, ĉar Publio Lentulus, en sia spirita blindeco, formis ŝian karakteron laŭ la fiero de la raso, laŭ la vantaj tradicioj de sia praularo, ne disvolvinte en ŝia animo la konsideremon, kiun la influo de Livia sendube kreus, por la vigla burĝonado de la sento.

La juna patriciino sentis la koron disŝirita de preskaŭ sovaĝa ĵaluzo; sed, komprenante la devojn, kiuj en tiaj situacioj ŝin koncernis, ŝi rericevis la moralan energion necesan al la reago ĉe tiu unua bato de provoj, respondante al la Juda junulo kaj plej penante, por ŝajnigi la plej severan kaj trankvilan noblecon:

– Mi kore dankas vin por la intereso de via sciigo; nenio tamen rajtigas min suspekti pri la honesteco de mia edzo, des pli, ĉar Plinio reprezentas ĉiujn miajn idealojn de virino kaj de edzino!

– Sinjorino – diris la Judo, mordetante la lipojn –, la virina spirito, pro sia riĉa imagemo kaj izolita de la praktika vivo, povas ofte erari, kredante la ŝajnojn...

“Mi ĝojas, aŭdante vin, kaj laŭdas vian senliman konfidon; mi volas tamen, ke vi konvinkigu, ke vi ĉiam trovos ĉe mi sinceran defendanton de via feliĉo kaj de viaj virtoj!”

Tion dirinte, Saul de Ĝioras adiaŭe riverencis, lasante la kompatindan junulinon baraktanta en siaj impresoj de surprizo kaj koramareco.

La unuaj malfeliĉaĵoj trafis la geedzan vivon de Flavia Lentulia, kaj tamen ŝi ne sciis forklini la danĝeron, kiu por ĉiam minacis ŝian feliĉon.

En tiu vespero Plinio Severus ne trovis en sia hejmo la delikatan, ĉarman virinon, al kiu li tute sin donis kaj kiun li profunde amis. En la intimeco de la dormoĉambro li renkontis sian edzinon flamanta per senkaŭzaj, neoportunaj riproĉoj, turmentata de amara, nekomprenbla malĝojo; okazis do inter ili la unuaj kolizioj, kiuj por ĉiam povas, en la daŭro de unu ekzistado, ruinigi la feliĉon de geedzeca paro, kiam la koroj ne estas sufiĉe preparitaj pro la spirita kompreno, laŭ la leĝo de la elaĉetantaj provoj, kvankam la dia vojo de iliaj ĝemelaj animoj estas glora irejo al la plej altaj destinoj.

Post nemultaj tagoj Saul reiris Massilian, esperante efektiviĝi kelkajn negocajn aferojn kaj plej baldaŭ reveni Romon.

La vivo de niaj konatoj preskaŭ same daŭradis plu en la ĉefurbo de la Imperio.

La senatano Lentulus estis, kiel ĉiam, absorbita de siaj politikaj okupoj kaj, kiam eble, iris en la hejmon de sia filino, kie li plej longe konversaciis kun Kalpurnia pri la pasinteco kaj la tiamaj bezonoj.

Sekve de la okazintaĵoj, perforte forigita for de sia filino, malproksime de la plej bona amikino, kiun ŝi iam havis, sed kiu ŝin ne komprenis, kaj ankoraŭ sen ia ligilo kun sia edzo en la medio de siaj plej profundaj amoj, Livia rifugiĝis en la sindonan amikecon de Anna kaj en la plej varmajn, sincerajn preĝojn.

Ili ambaŭ ĉiutage preĝadis en dolora izoleco, ĉe la piedo de tiu kruda kruco, kiun Simeon donacis al ili en la momento de sia memofero.

Ofte ili, en ekstazo, rimarkis, ke ia milda lumo ĉirkaŭas la kruceton, kaj samtempe ŝajnis, ke ili aŭdas, en la sanktejo de la koro kaj de la pensoj, strangajn, mirindajn admonojn, venantajn de malproksime.

Ili sentis la impreson, kvazaŭ la dolĉa, amika voĉo de la Samaria apostolo venas el la regno de Jesuo, por instrui al ili fidon, plenumon de la devo de frata karito, rezignacion kaj kompaton. Ili tiam ploradis, kvazaŭ en iliaj sentemaj, delikataj animoj vibrus la harmonioj de ia dia preludo de la ĉiela vivo.

Dum tiu tempo, laŭ sciigo de kelkaj pli modestaj kristanoj, Anna informis sian mastrinon pri la kunvenoj en la katakomboj.

Nur tie la adeptoj de la naskiĝanta Kristanismo povis kolektiĝi, ĉar, ekde ĝiaj unuaj momentoj en la Roma

socio, ĝiaj ideoj estis konsiderataj revoluciaj kaj ruinigaj.

La Imperio, fondita de Aŭgusto, ja la plej granda esprimo de forta regno en ĉiuj epokoj de la mondo, post la demokratiaj konkeroj de la Respubliko, permesis nenian partion, kiu batalus por iaj sociaj kaj politikaj doktrinoj.

Okazis al Romo tio sama, kio hodiaŭ al la nacioj, ŝanceliĝantaj inter plej diversaj formoj de regado, laŭlonge de la akso de la ekstremistoj kaj en la neklereco de la homo, kiu obstine ne komprenas, ke reformo devas nepre komenciĝi en la animo mem de la estuloj.

La solaj permesitaj asocioj estis la kooperativoj por funebraj ceremonioj, pro siaj programoj de amo kaj protekto al la homoj, jam nekapablaj ŝanceli la surteran povon de la Cezaro.

Persekutataj de la leĝoj, kiuj ne konsentis iliajn renovigajn ideojn, kun abomeno rigardataj de la potenca forto de la malnovaj tradicioj, la adeptoj de Jesuo ja konsciis pri sia aflikta kaj suferplena situacio en la estonteco. Kelkaj pli rigoraj ediktoj devigis ilin kaŝi sian kredon, kvankam Klaŭdio ĉiam klopodadis por la plej perfektaj ordo kaj ekvilibro, sen grandaj eksceso dum la plenumado de siaj ordonoj.

Kelkaj kristanoj, pli klare komprenantaj la doktrinon, publike defendadis ĝiajn tezojn per leteroj redaktataj laŭ la tiama stilo; sed, multe pli frue ol la abomenaj krimoj de Domicio Nerono, la unuaj kristanoj vivis en atmosfero de aflikto, korpremateco kaj grandaj suferoj. Tial, la kunvenoj en la katakomboj okazadis neregle, sed ĉiam en absoluta sekreto.

Granda nombro da apostoloj el Palestino iris Romon, por fari al siaj gefratoj, loĝantaj en tiu ĉefurbo, la plej edifajn kaj konsolajn predikojn.

Tie, en la silento inter grandaj masivoj da ŝtonoj, en kavernoj forgesitaj de la tempo, estis aŭdataj profundaj, moraligaj voĉoj, kiuj komentariadis la Evangelion de la Sinjoro aŭ laŭdadis la belaĵojn de lia regno, starantajn super ĉiuj mizeraj provoj de la homa maliceco. Brilantaj torĉoj lumigis tiujn subterajn kaŝejojn, kiujn la hedero protektis, kaj la ŝtonaj pordoj faris impreson de angoro, malgajeco kaj tuta forlasiteco.

Ĉiam, kiam iu pilgrimanto venis al la urbo, estis dissendata avizo al ĉiuj konvertiĝintoj.

La krucosigno, iel ajn farata, estis la silenta signalo inter tiuj fratoj laŭ kredo, kaj, farita en tiu aŭ alia karakteriza maniero, esprimis avizon, kies signifon ĉiuj tuj komprenis.

Per tiuj senĉesaj komunikoj Anna konis la tutan movadon en la katakomboj kaj informis sian mastrinon pri ĉio, kio okazadis en Romo rilate al la savanta doktrino de la Krucimito.

Kiam estis anoncata la alveno de iu apostolo el Galileo aŭ el unu el ĝiaj najbaraj regionoj, Livia nepre ĉeestis lian akcepton, akompanata de sia sindona, fidela servistino kaj irante piede la vojon; tiam ŝi surhavis sian patrician veston, laŭ la konsento de sia edzo, ke ŝi libere praktiku sian kredon. Ŝi ja sciis, ke ŝi riskas sian reputacion antaŭ la socio; tamen la ofero de Simeon estis lumsigno, kiu montris ŝian destinton sur la Tero. Ŝi ricevis kuraĝon, serenecon, rezignaciemon kaj konon pri si mem, sufiĉajn, por neniam cedi malprofite pro sia arda, pura fido. Estas vere, ke ŝiaj malnovaj amikinoj, en Romo, atribuis la modifon de ŝiaj sentoj al frenezeco; ke ŝia edzo ŝin ne komprenis kaj, ankaŭ, Kalpurnia kaj Plinio pliprofundigis la abismon, kiun Publio fosis inter patrino kaj filino; tamen ŝia spirito havis en la kredo

dian vojon, por forkuri el ĉiuj surteraj amarajoj, kaj sentis, ke la Dia Nazareta Majstro mildigas la vundojn de ŝia animo, kompatante ŝian koron disŝiritan de ĉagrenoj. Ŝia fido similis brilantan torĉon, kiu heligis la doloran vojon kaj el kiu elradiis la belega lumo de la homa konfido al la Dia Providenco, kiu turnas la penigajn surterajn provojn en anticipan ĝuadon de la eternaj ĝojoj en la Senlimo.

IV - TRAGEDIOJ KAJ ESPEROJ

La reala vivo estas ĉiam proza, sen fantazioj kaj revoj. Tiel pasas la ekzistado de la personoj, priparolataj en ĉi tiu libro, sur la viva ekrano de la senmaskaj, doloraj realaĵoj de la surtera medio.

La homoj, atingintaj ian socian pozicion, kaj ankaŭ tiuj, kiuj alproksimiĝas al la krepusko de la nedaŭra vivo sur la Tero, ne havas multon novan, raportotan pri la ĉiutagaj okazaĵoj.

Estas periodo en la ekzistado de la homo, kiam ŝajnas al li, ke lia koro jam ne havas la psikan premon necesan, por ke renoviĝu liaj revoj kaj unuaj aspiroj: lia spirita situacio montriĝas kvazaŭ kristaliĝinta aŭ senmova. En lia interno jam ne estas spaco por novaj iluzioj aŭ por la reflorado de novaj esperoj, kaj la animo, kvazaŭ en dolora stadio de atendo kaj trudita silento, haltas sur la vojo kaj rigardadas la preterpasantojn, implikita en la reto de la rutino kaj de la samaspektaj, indiferentaj semajnoj.

Ni travivas nun la jaron 57, kaj preskaŭ nevaria montriĝas la longega disvolviĝo de la ordinaraj, ĉagrenaj okazaĵoj en la vivo de la aktoroj de ĉi tiu dolra dramo. Fariĝis nur unu granda modifo en la hejmo de Kalpurnia.

En sia plena fizika vikleco, Plinio Severus estis jam ricevinta la plej grandajn ŝatesprimojn de la militistaj institucioj, kiuj asekuris la solidecon de la Imperio. Longaj kaj periodaj restadoj en Gallujo kaj Hispanujo havigis al li tre honorajn ordenojn, sed en lia animo intense kreskis vantamo kaj fiero, malgraŭ la nobleco de lia koro.

La unuaj akraj ĵaluzoj de lia edzino havis pereigajn, dolorajn sekvojn.

Al la krimaj intencoj de Saul aldoniĝis la venenaj konfidencoj de la mensogemaj amikinoj; kaj, anstataŭ ĝui la geedzegan feliĉon, kiun ŝi rajtis pro la altaj kvalitoj de sia koro, Flavia Lentulia, pro sia supermezura ĵaluzemo, pretervole kuris en la teruran abismon de la sufero kaj animprovado.

Por tia viro, kiel Plinio, estis tre facile anstataŭigi la hejman medion per la pompaj festoj en la cirko, kune kun gajhumoraj virinoj, kiaj ne mankis en ĉiuj lokoj de la pekanta metropolo. La falsa amo de multenombraj amorantinoj baldaŭ venkis la karesojn de la edzino.

Kalpurnia senrezulte penis interhelpi per siaj amikaj konsiloj, kaj, siaflanke, la juna edzino de la Roma oficiro vane obstinis en sia nekonsternebla, silenta martireco.

La maloftajn plendojn de Flavia gardis la nobla koro de ŝia bopatrino aŭ ricevis la spirito de ŝia patro, per amaraj konfidencoj.

Komprenante, kiel grava estas la virina kunlaborado por la rebonigo de la moroj kaj por la renobligo de la hejmo kaj de la familio, Publio Lentulus admonis sian filinon al plej grandaj rezignacio kaj toleremo; li

igis ŝin senti, ke edzino estas la honoro de sia edzo kaj la nutraĵo de ties vivo; ke, dum iu edzo malvirtiga en la kirlado de senbridaj pasioj, malŝatante ĉiajn bonaĵojn de la vivo, iafoje sufiĉas virina larmo, por ke la geedzeca paco rebrilu sur la sennuba ĉielo de pura reciproka amo.

Por la spirito de Flavia la patra parolo estis nedubebla vero, kaj ŝi penis apogi sin al liaj promesoj kaj konsiloj, kiujn ŝi konsideris altvaloraj, esperante, ke ŝia edzo iam revenos al ŝia amo, por la bono de ilia vivo.

Dume, Plinio Severus disperdis en ludado kaj amuzoj montojn da mono. Lia malŝparemo por la virinoj famiĝis en la plej elegantaj rondoj en la urbo, kaj li malofte iris al la familia medio, kie, efektive, ĉiaj karesoj estis farataj por la klarvidigo de lia spirito, deklinita for de la bona vojo.

La morto de la maljuna pretoro Salvio Lentulus, antaŭ la jaro 50, devigis la familion de Publio kaj la restantajn parecojn de Flaminio al la sociaj ceremonioj ĉe Fulvia kaj ties filino, okaze de la honoroj faritaj al la cindro de tiu, kiu, kaŝita en la mistero de sia rezignacia, nekomprenbla pasiveco, apenaŭ vivis sur la Tero.

Sufiĉis al Aŭrelia tiu okazo por la rekupto de la perdita oportuno. Rigardo, renkontiĝo, vorto – kaj jen la pli juna filo de Flaminio, ravita de la pekantaj belulinoj, refaris la koran ligilon, kiu estis iam detruita de sankta, pura amo. Baldaŭ ili estis vidataj ĵetante unu al la dua multesignifajn rigardojn, en la teatroj, en la cirkoj aŭ en la grandaj sportaj kunvenoj, tiam okazantaj.

El ĉiuj tiuj doloroj Flavia Lentulia faris, en la hejmo, kiun ŝia fideleco nobligis, sian kalvarion de silenta turmento. Dum siaj solecaj meditoj ŝi ofte bedaŭris la iamajn eksplodojn de sia malprava ĵaluzo, kiuj estis la unua motivo, ke ŝia edzo deflankiĝis de la sanktaj devoj al la familio; fiera patriciano, ŝi tamen silente konsideris, ke estas jam tro malfrue pro ia pento kaj ke la sola rimedo estas plej humile kaj pacience atendi la revenon de sia edzo al ŝia fidela, sindona koro.

En siaj momentoj de malĝojo ŝi skribadis paĝojn dolorplenajn kaj samtempe lumajn pro iliaj altaj esprimoj, aŭ fervore petante la kompaton de la dioj, aŭ montrante sian suferon per kortuŝaj versaĵoj; ĉi tiujn vidis nur la okuloj de ŝia patro, kiu, plorante de emocio, ofte pripensis, ĉu la geedzeca malfeliĉo de lia kompatinda filino ne estas ia stranga, dolora heredaĵo.

Ĉirkaŭ la jaro 53 unu el la plej reliefaj personoj de ĉi tiu rakonto estis prenita de la potencaj brakoj de la morto. Tiu estis Fulvia, ĉe kiu, du jarojn post la forpaso de ŝia edzo, montriĝis la plej seriozaj mensaj perturboj kaj aliaj maltrankviligaj organaj fenomenoj, devenintaj de pasintatempaj devioj.

Kanceraj vundoj disruinigis la vivocentrojn de ŝia organismo kaj, dum du seninterrompaj jaroj, ŝia malgrasiĝinta korpo devis preni la plej penigajn kaj ĝenajn poziciojn de ripozo; ŝiaj malkvietaj, larĝe malfermitaj okuloj turniĝis en orbitoj, kvazaŭ dum siaj halucinacioj ŝi estus devigita vidi la plej terurajn, plej nigrajn bildojn.

En tiuj momentoj ŝi ne havis la sindonon de sia filino, kiun ŝi ne sciis eduki pro sia konstanta okupiteco ĉe festoj, kunvenoj, multenombraj sociaj interrilatoj. Sed la Dia favorkoreco, ne forlasanta la pli malfeliĉajn homojn, donis al ŝi kareseman bofilon, kiu kompatis ŝiajn kulpelaĉetajn dolorojn.

Emiliano Lucius, la edzo de Aŭrelia, estis unu el tiuj dignaj, energiaj viroj, kiaj malofte estas trovataj kun tiaj pacienco kaj altaj familiaj virtoj. Nokto post nokto li flegadis la kompatindan maljunulinon, kiun la

fizikaj doloroj kruele batis per la skurĝo de akregaj turmentoj.

Ni aŭdu ŝiajn dolorajn, seninterrilatajn vortojn en ŝiaj lastaj tagoj. Malfrue en la nokto, kiam eĉ la sklavinoj ripozis, venkitaj de laceco kaj dormo, ŝajnis, ke ŝiaj oreloj de frenezulino mirige pliakriĝas, por aŭdi la bruetojn de la nevideblaj regionoj mem; ŝi tiam superŝutis per insultoj siajn pasintatempajn viktimojn, kiuj revenis el la plej malaltaj spiritaj sferoj, por stari ĉirkaŭ ŝia lito de suferado kaj morto. Kun elorbitiĝintaj okuloj, kvazaŭ fiksitaj sur pereigaj, teruraj vizioj, la kompatinda kadukulino ekkriis, ĉirkaŭbrakante sian bofilon, ĉe la apogeo de siaj oftaj krizoj de timo kaj senkonscia malespero:

– Emiliano –, ŝi ekkriis kun ekstrema terursento – ĉi tiu ĉambro estas plena de timigaspektaj estuloj! Ĉu vi ilin ne rimarkas? Aŭskultu! Mi aŭdas iliajn akrajn insultojn kaj tremigajn ridegojn! Ĉu vi konis Sulpicion Tarkvinus, la grandan liktoron de Pilato? Jen, li venas kune kun siaj legianoj maskitaj per mallumo! Ili parolas al mi pri la morto, pri la morto! Helpu min, mia filo! Sulpicio Tarkvinus havas drakan korpon, kiu teruras min!

Krizoj de singultoj kaj larmoj sekvadis tiujn amarajn rimarkojn.

– Trankviliĝu, patrino! – respondis la militisto, kortuŝita kaj larmanta. – Ni fidu al la senlima boneco de la dioj!

– Ha,... la dioj! – nun kriegis la malfeliĉa virino kun histeriaj ridegoj. – La dioj!... Kio fariĝis el la dioj de ĉi tiu abomeninda domo? Emiliano, Emiliano, ni mem kreas la diojn, por pravigi la malsaĝaĵojn en nia vivo! Jupitera Olimpo estas mensogo necesa al la ŝtato... Sur la Tero ni estas skeletoj, ornamitaj per iom da polvo! La sola eble ekzistanta loko estas ja la infero, kie daŭre vivas la demonoj kun siaj tridentoj en la fajrejo! Jen ili, venantaj kiel mallumaj falangoj!

Kaj forte alkroĉita al la brusto de la oficiro, ŝi sence kriegis, kvazaŭ penante kaŝi sian vizaĝon antaŭ minacantaj ombroj:

– Vi neniam forkondukos min, malbenindaj! Malantaŭen, kanajloj! Mi havas filon, kiu defendas min kontraŭ viaj pereigaj atakoj!

Emiliano Lucius milde karesis la blankajn harojn de la malfeliĉa sinjorino, admonante ŝin peti la favorkorecon de la dioj, por ke estu kvietigita ŝia akra suferado.

Aliajn fojojn, kvazaŭ kun la konscio heligita de ia ĉiela radio, Fulvia Prokula, pli trankvila, diradis al la filo, kiun la destino donis al ŝi:

– Emiliano, mi proksimiĝas al la morto kaj devas konfesi al vi miajn erarojn kaj grandajn deviojn! Pardonu min, filo, ke mi trudis al vi tiajn gigantajn klopodojn! Mia malnobla ekzistado estis longa vico da krimoj, kies abomenindajn makulojn ne povos forlavi eĉ la larmoj, naskitaj de la malsano, kiu kondukas min en la nepenetreblajn sekretojn de la transmonda vivo! Mi tamen neniam sukcesis profunde pensi pri la teruraj afliktoj, min atendantaj. Hodiaŭ, meze en la peza ombro de mia animo, mi sentas, ke mian konsciencon nigrigas la estingiĝinta karbo el la ardo de la fatalaj pasioj, kiuj forkonsumis mian penplenan destinton! Mi estis mallojala, senkompata edzino, kaj monstra patrino...

“Se efektive ekzistas ia spirita lumo post la tombo, kiu estulo kompatos min? De sur ĉi tiu lito de frenezeco kaj senespera agonio mi vidas la seninterrompan preterpasadon de timigaj fantomoj, kiuj

laŭŝajne atendas min ĉe la enirejo de la Transtombo! Ĉiuj riproĉas miajn pasintatempajn krimojn kaj montras plezuron ĉe la suferoj, min trenantaj en la teron!

“Sen ia sincera kredo, mi sentas min en la manoj de tiuj drakoj el la subtilaj regionoj, kaj ili igas min rememori mian kriman, malluman pasintecon!”

Torento da larmoj de bedaŭro kaj pento sekvadis tiujn rapidajn momentoj de rezonado kaj konscio. Emiliano Lucius amplene karesis ŝiajn sulkokovritajn vangojn kaj enprofundiĝis mem en doloran meditado.

Tiu korŝira sceno estis ja la tumulto fino de ekzistado plena de naŭzegaj devodekliniĝoj.

Vere, li ĉion nun komprenis. La ribelemo kaj nekomprenemo de lia edzino, la hejmaj kvereloj, tiu nekvietigebla soifo de Aŭrelia al bruaj festoj, en kompanio de amikaj homoj aliaj ol li mem, certe estis la amaraj fruktoj de nesufiĉa kaj erara edukado. Lia koro estis tamen ekstreme nobla; energia spirito, li komprenis la situacion, kaj kiu komprenas, tiu ĉiam pardonas.

Unu nokton, kiam la malsanulino estis prenita de forta krizo, la bonkora oficiro ordonis, ke la servistinoj foriru en siajn ĉambrojn.

La kompatinda frenezulino ne ĉesis paroli, kvazaŭ posedita de ia neelĉerpebla, nekomprenebla energio. Abunda ŝvito kovris ŝian frunton, varman pro konstanta alta febro.

– Emiliano – ŝi furioze kriadis –, kie estas Aŭrelia, kiu ne penas prizorgi min, proksiman al morto? Kiel la falsaj amikinoj en mia vivo, ĉu ankaŭ ŝi sentas naŭzon al mia korpo?

– Aŭrelia – noble klarigis la oficiro – devis hodiaŭ plenumi taskon ĉe siaj amikinoj, por la organizo de kelkaj sociaj servoj.

– Ha! – ekkriis la frenezulino, terure ridegante – la sociaj servoj... la sociaj servoj!... Ĉu vi do kredis tion, mia filo? Via edzino certe estas nun kune kun Plinio Severus, ŝia iama amato, en ia suspektinda loko de ĉi tiu abomenda urbo!

Emiliano Lucius faris ĉion eblan, por ke la kompatinda frenezulino ne daŭrigu siajn terurajn, impresajn malkaŝojn; sed Fulvia verŝis plu sian brulan, doloran akuzon:

– Ne malhelpu min daŭrigi... – ŝi ekscitita kriis. – Aŭdu min ankoraŭ! Ĉiuj miaj akuzoj esprimas la kriman realon! La vero ofte estas ĉe la frenezuloj! Mi mem instigis mian kompatindan filinon al la edzinaj devodekliniĝoj... Plinio Severus estis la malamiko, kiun ŝi, kiel virino, bezonis venki... Mi faciligis ŝian adulton, kiu efektiviĝis sub ĉi tiu tegmento! Estu certa, mia filo, pri la monstra grandeco de miaj eraroj! Sentu teruron, sed pardonu! Kaj observadu vian edzinon, por ke ŝi ne plu perfidu vin per siaj malnoblaĵoj kaj iam bedaŭrinde ne putru, kiel mi, sur lito kovrita per bonodoraj silkaĵoj!

La nobla oficiro, mireganta kaj korprenmata, sekvadis tiujn terurajn malkaŝojn. Ĉu do lia edzino, krom ne kompreni lian idealismon, ankaŭ lin hontinde perfidas, en la hejma sanktejo mem? Doloraj emocioj retenis sin en lia koro; tamen tiuj vortoj estis nenio alia ol febra deliro, en ŝia nekuracebla frenezeco. Terura, senkompata dubo nestiĝis en lia angora koro. Kelke da larmoj banis liajn grandjan, melankoliajn okulojn, dum la malsanulino interrompis siajn ĉagrenajn malkaŝojn.

Post kelke da minutoj ŝi tamen ekkriis plu, per tondra voĉo:

– Kaj Aŭrelia? Kio fariĝis el Aŭrelia, kiu ne venas? Kie troviĝas mia kompatinda filino, krima kaj adulta? Morgaŭ, mia filo, mi ja konfidis al vi la fiajn sekretojn de nia malfeliĉa ekzistado!

Sed iu homo singarde kaj silente eniris en la apudan ĉambron. Tio estis Aŭrelia, reveninta de brua festo, kie vino kaj plezuroj estis abunde verŝitaj.

Trapasinte la proksiman pordon, ŝi aŭdis ankoraŭ la lastajn vortojn de sia patrino, en paroksismo de la febro kaj furiozeco. Aŭdinte la hontigan malkaŝon, antaŭ nelonge faritan, ŝi konsideris, ke la malsanulino en la sekvonta tago ja plenumos sian teruran promeson, kaj en palpebruma daŭro ekzamenis ĉiujn ŝancojn, kiujn havus la efektivigo de la nigra penso, trairinta ŝian kriman, bedaŭrindan menson. Ŝiaj okuloj estis vitrecaj pro kolero, sub la regado de ia nigra penso, subite ŝprucinta en ŝia malvarma nekompatema koro.

Ŝi demetis siajn festajn vestojn kaj prenis sian hejman negliĝon; tiam, ŝi malfermis alian pordon kaj iris al la lito de sia patrino, kiun ŝi hipokrite karesis, dum ŝia nekomprenata edzo, kun bolante, premata cerbo, rigardadis ŝin, turmentata de plej akraj duboj.

– Patrino, kion tio signifas? – ŝi demandis, ŝajnigante aflikton. – Vi estas laca..., vi bezonas iom ripozi...

Fulvia ŝin profunde rigardis, kvazaŭ ia radio da mensklareco subite heligus ŝian frakasitan spiriton. La ĉeesto de la filino iom kvietigis ŝian vunditan koron kaj ŝian dispecigitan konsciencon. Ŝi pene sidiĝis sur la liton, karesis la harojn de sia filino, kiel ŝi ĉiam faradis en la intimeco de la hejmo, kaj, laŭŝajne inklina al iom da ripozo, rekuŝiĝis.

Konsiderinte, ke lia ĉeesto jam ne estas necesa, Emiliano Lucius foriris el la scenejo; sed Aŭrelia, kun falsa kareso, parolis plu:

– Ĉu vi volas, patrino, dozon de via kvietiga medikamento, por la bezonata ripozo?

Spirite senkonscia, la kompatinda frenezulino kapjesis.

La junulino iris al sia privata ĉambro kaj, preninte tubeton el unu el siaj referataj mebloj, verŝis kelke da gutoj en malgrandan pokalon, monologante: “Nu! Sekreto estas ĉiam sekreto..., kaj nur la morto ĝin povas bone gardi!”

Ŝi senhezite paŝis al la patrina lito, kie, jam pli ol du jarojn, la malfeliĉa virino kuŝis, konsumata de la kancero kaj turmentata de la plej teruraj, nigraj vizioj.

La abomena venenaĵo rapide komencis efiki. Doninte la forte kaŭstikan trinkaĵon, Aŭrelia ordonis al du sklavinoj gardi la dormantan malsanulinon, kiel ordinare, kiam ŝi revenis el noktaj festoj, kaj atendis la rezulton de sia nepravigebla krimo.

Post du horoj la malsanulino vidigis la plej evidentajn signojn de sufokiĝo sub la agado de kaŭstikaĵo, kiu estis unu el la tiamaj misteraj mortigiloj.

Ĉe la aflikta alvoko de la servistinoj, ĉiuj familianoj alkuris, pretaj por helpo al la danĝera farto de la malsanulino. Emiliano Lucius rigardis ŝiajn okulojn, kiuj iom post iom estingiĝis post la vualo de la morto, kaj vane klopodis, por ke lia agonianta bopatrino diru al li ankoraŭ unu vorton. Ŝiaj malvarmaj

membroj grade rigidiĝis kaj el ŝia buŝo ekellasiĝis ia rozkolora ŝaŭmo.

Medicinistoj estis senutile venigitaj en tiuj lastaj momentoj. En tiu tempo, la kuracistoj ne konis la sekretojn de la homa organismo, kaj ne ekzistis ia speciala polico, por esplori la profundajn kaŭzojn de la misteraj mortoj. La venenado de Fulvia estis atribuita al la nekomprenebla malsano, kiu dum multaj monatoj ruinigis ĉiujn ŝiajn vivorganojn.

Sed tiu tro rapida agonio ne estis pretervidita de Emiliano, kaj estis ankoraŭ unu ŝiranta dubo, krom la amaraj pensoj, nubigantaj lian animon.

Aŭrelia penis plej bone ludi la komedion pri sentimentaleco konvena al tiaj cirkonstancoj; post la simpligitaj kaj rapidaj ceremonioj, pro la putrado de la kadavro, kiu necesigis baldaŭan cindrigon, la iama hejmo de la pretoro Salvio Lentulus fariĝis loĝejo de du sin reciproke malamantaj koroj.

Tuj post la unuaj funebrotagoj la adulta edzino denove ĵetiĝis en diboĉadon, sed Emiliano Lucius neniam povis forgesi la malkaŝojn, kiujn al li faris Fulvia proksime de sia forpaso, kaj envolvis sin en ia vualo da melankolio, kiu pli ol du jarojn kovris lian koron.

En la jaro 54 Domicio Nerono ekprenis la sceptron, ĉirkaŭita de korupta rondo el perversaj korteganoj kaj de multenombraj, malicaj konkubinoj.

Agripina tro malfrue rekonis, kiel nekonvena estis ŝia patrina konduto, deviginte la imperiestron Klaŭdio konsenti pri la edziniĝo de sia filino Oktavia kun tiu viro, kiu post kelka tempo plej sovaĝe mortigis sian propran patrinon.

La Forumo kaj la Senato tremante ricevis la maltrankviligan sciigon pri la proklamado de la nova Cezaro fare de la palacaj legioj, ne tiom pro li, kiom pro tio, ĉar ili antaŭvidis, ke tiu neklera, kruela princo estos facile manovrebla marioneto en la manoj de la plej ambiciaj kaj malicaj spiritoj de la Roma kortego.

Sed tiel granda estis la serio da abomenaj krimoj, senpune faritaj, por ke Domicio Nerono atingu la superegan povon, ke neniu ajn kuraĝis protesti.

En la jaro 56 la venenado de la juna Britanikus tremigis de teruro ĉiujn patriciojn. Malnoblaĵoj estis farataj por humiligo de la imperiaj senatanoj, kiuj ne sukcesis efektiviĝi siajn formalajn protestojn. Ĉiuj pli gravaj familianoj en la urbo rekonis, ke ili havas antaŭ si la venenajn trinkaĵojn de iu Lokusta, la tiranecon kaj malicon de iu Tiĝelinus aŭ la ponardon de iu Aniceto.

Sed la neatendita morto de Britanikus naskis ioman malkontentecon kaj donis okazon al la eksplodo de opinioj de kelkaj noblaj spiritoj. Unu el tiuj estis Emiliano Lucius, kiu tuj vidis sin sub la grava minaco de ekzilado kaj konstante observata de la multaj policianoj de la imperiestro.

La nobla oficiro penis vivi kiel eble plej izolita, por eviti kaŭzojn por konfliktoj. Liaj angoro kaj kreskis kaj liaj meditoj fariĝis pli profundaj kaj doloraj...

En tia animstato, reveninte en sian hejmon frue en iu kvieta nokto – kion li jam de longe ne faradis –, li aŭdis viglajn, gajajn voĉojn, bruantajn en la ĉambro de lia edzino. Li rimarkis, ke Aŭrelia kaj Plinio ebriiĝas per la vino de siaj venenaj plezuroj, kaj, kun mirego en la okuloj, vidis, ke lia edzino lin perfidas sur la geedzeca lito mem.

Konstatinte mem tiun kruelan realaĵon, Emiliano Lucius sentis, ke pli pikanta dorno eniĝas en lian emocieman, noblan koron. Li ekardis pro la deziro provoki la amoranton al duelo, por morti aŭ mortigi Plinion, sed li samtempe konsideris, ke Aŭrelia ne indas tian oferon.

Plena de naŭzo pri ĉio rilata al sia tempo kaj sentante sin frakasita sub la malsukcesoj de sia ĉagrena destino, la nobla oficiro foriris en la kabineton, iam apartenintan al la pretoro Salvio, kie li laboradis dum la tago, kaj, preninte nigran, doloran decidon, malfermis malnovan ŝrankon, kie staris iuj boteletoj; unu el ĉi tiuj, de speciala formo, li tiam elprenis, por plenumi la amaran intecon de sia venkita spirito.

Antaŭ la pokalo da cikuto, lia turmentata cerbo dum kelkaj minutoj perdiĝis en akraj konjektoj; sed, profunde ekzameninte ĉiujn siajn ŝancojn pri feliĉo, li, en la apogeo de la malespero, venis al la konkludo, ke al la perfido de la edzino, al la minacoj de ekzilado kaj proskribo, aŭ al iu ebla insida atako, estas preferinda tio, kion li rigardis kiel la lastan konsolon, nome la morto.

En palpebruma daŭro, sen ia eblo, ke liaj spiritaj amikoj lin deklinu de lia terura inteco, pro la subiteco de lia senpripensa ago, diktita de la anima turmento, li eltrinkis la enhavaĵon de la malgranda pokalo; kuŝante sur triklinia sofo, adaptita al lia antikvastila kabineto, kie abundis altvaloraj marmoraĵoj kaj pergamenrulaĵoj, li poste apogis sian junan kapon al la brakoj.

La terura morto ne tre malfruis; dum Aŭrelia ludis alian farson je hipokrita ĉagreno, en la granda rondo de liaj amikoj estis komentariata la memmortigo de Emiliano, ne kiel rekta sekvo el liaj profundaj hejmaj seniluziigoj, sed kiel frukto de la politika tiraneco de la nova imperiestro, dum kies regado tiom da krimoj estis ĉiutage farataj en la ombro.

Nun tute sola sur sia kampo de agado, Aŭrelia libere sin fordonis al siaj malsagaĵoj, plivastigante siajn malicajn inklinojn kaj ĉiam pli penante teni ĉe si la preferatan viron, objekton de ŝiaj senbridaj ambicioj.

En la hejmoj de la familioj Lentulus kaj Severus la vivo ĉiam ankoraŭ fluigis sian riveron da doloroj.

Jam de pli ol kvin jaroj, ekde la jaro 57, Saul de Ĝioras definitive ekloĝis en Romo, ne rezigninte pri siaj aspiroj kaj intencoj rilate al la edzino de sia amiko kaj bonfarinto. Firmiginte sian riĉaĵon per la komercado de feloj el Orineto, li preterlasis nenian okazon, por elmontri la solidecon de sia materiala situacio al la virino, kiun li jam de multaj jaroj avidis; sed Flavia Lentulia faris el sia ekzistado kalvarion de kortuŝa, silenta rezignacio.

La publika vivo de ŝia edzo estis, por ŝia spirito, longa, dolora morala turmentado. Pri tio Saul iam kaj iam nerekte parolis, celante turni ŝian atenton al lia amo, sed la kompatinda sinjorino vidis en li nuran amikon aŭ fraton. La juna Judo vane manifestis al ŝi sian admiron per plej grandaj ĝentilaĵoj kaj penante proponi al ŝi sian kompanion; sed, vere, la petegoj de lia impetema, ardanta animo ne trovis eĥon en la koro de tiu virino, kiu ornamis per la doloro la dignon de la edzineco.

Tuŝite de la sonoro de lia mono, Arakso vigligis liajn esperojn, ne lasante, ke li senkuraĝiĝu pri siaj danĝeraj instinktoj.

Pretekstante multe da laboroj aŭ vojaĝoj, por motivi sian kontinuan forestadon, Plinio Severus nur malofte venis hejmen. Li apenaŭ rimarkis, ke la grandegaj elspezoj iom post iom ruinigas lian riĉaĵon kaj kondukas ankaŭ liajn familianojn al elĉerpiĝo de ĉiuj monrimedoj.

Kelkafoje li plej amike konversaciadis kun sia edzino, al kiu li sentis sin altenita per ligiloj de eterna, profunda amo; sed la mondallogaĵoj estis jam tro forte eniĝintaj en lian koron, por esti elradikitaj. En sia koro, li deziris reveni en la kvietecon de la hejmo, en la sennuban, karesan vivon; tamen la vino, la virinoj, la bruaj rondoj estis la konstanta obsedo de lia malvigliĝinta spirito. Aliajn fojojn, kvankam li vere amis sian edzinon, li tamen ne pardonis ŝian moralan superecon kaj koleris pro ŝia humileco mem antaŭ liaj frenezaĵoj; tiam, kiel viktimo sendecida inter la fortoj de la bono kaj de la malbono, li ĉiam revenadis al la brakoj de Aurelia.

En tiu sama jaro 57, la sanstato de Kalpurnia, plej grave difektita, devigis ŝian familion kolektiĝi ĉirkaŭ la lito de la nobla matrono. La unuan fojon, post la edziĝo de sia frato, Agripo Severus revenis el siaj longaj aventuroj en Massilia kaj Avenio apud sian malsanan, senfortiĝintan patrinon, por kontentigi ŝiajn plendajn, dolĉajn petojn. Denove renkontiĝi kun Flavia Lentulia kaj partopreni kun ŝi en la hejma feliĉo rezultigis la reŝanĝon de malnova dormanta vulkano.

Per unu ekrigardo li komprenis la geedzegan situacion de Plinio kaj penis anstataŭigi ties amon, ĉe la sindona edzino. Li deziris konfesi al ŝi sian ardan, malfeliĉan amon, sed li tenis en la koro noblan fratan respekton por tiu virino, kiu konfidis lin kiel tre amatan fraton.

Tial, dum la pli bonaj fazoj de la farto de la grandaĝa malsanulino, Flavia akceptis lian kompanion, por distri sin en kelkaj spektakloj de la tiama gaja urbo.

Tiu estis motivo sufiĉa por tio, ke Saul falsis la sencon de la okazaĵoj, supozante en tiuj senkulpaj elverŝoj de sentoj ian nepuran ligitecon, kiu plenigis al li la senbridan, kolereman koron per akra ĵaluzo.

Ĉe la unua oportuna okazo li enŝovis en la orelon de Plinio Severus ĉiujn siajn malicajn suspektojn, elpensante per sia deliranta imagemo neniam fariĝintajn situaciojn kaj okazaĵojn. La edzo de Flavia estis unu el tiuj kapricaj viroj, kiuj permesas al si senliman liberecon, sed ĉion rifuzas al la edzino, eĉ sur la kampo de la amikrilatoj puraj, sen kaŝita intereso. Tial, Plinio Severus inklinis akcepti la parolon de Saul, plej forte kredante, en sia koro, ties malsaĝan akuzon. Forlasinte sian amantan edzinon kaj dum multe da jaroj kaŭzinte plej pezajn amarajojn en la hejmo, nun li sentis sin konsumata de akra, nepravigebla ĵaluzo. Li do komencis spioni la plej sekretajn pensojn de sia edzino; kaj esperante, ke la neresanigebla malbonfarto de la patrino trovos sian solvon per la morto, laŭŝajne baldaŭ venonta, li intencis pli decide agi por la reakiro de siaj edzaj rajtoj.

Tiam komenciĝis la jaro 58, kun ombraj perspektivoj por la personoj de ĉi tiu rakonto.

Sed io ekturnis al si la atenton de ĉiuj personoj de ĉi tiu reala, dolora historio. La aldoniteco de Livia al la malsana amikino estis malofta ekzemplo de frata amo, de nedifineblaj boneco kaj karesemo. Dum ok seninterrompaj monatoj ŝia malfortika, silenta figuro vigle staradis, tagon kaj nokton, sen ia ripozo, ĉe la lito de Kalpurnia, kaj tiel pruvis, per ekzemploj, la altegecon de siaj religiaj principoj.

La nobla matrono ofte konsideradis, en sia koro, la moralan superecon de tiu altruisma doktrino, kiu aperis en la mondo por levi la falintojn, por konsoli la malsanajn kaj la malgajajn homojn, kaj kiu dissemis la plej ĉarmajn esperojn inter tiuj, elreviĝintaj pri la sorto; tiam ŝi komparis siajn malnovajn diojn, kiuj amis la plej riĉajn homojn kaj tiujn, kiuj faris la plej bonajn oferojn en la temploj, kun tiu Jesuo, humila kaj mizera, nudpieda kaj krucumita, pri kiu Livia parolis al ŝi en siaj intimaj, afablaj konversacioj.

Proksimiĝante al la morto, Kalpurnia estis tute alia persono. La kontinua kunvivado kun la malnova amikino modifis ĉiujn ŝiajn pensojn kaj plej profundajn kredojn. Ŝi pli bone traktadis siajn sklavinojn, starantajn ĉe ŝia lito, kaj petis Livian instrui al ŝi la preĝojn de la profeto, krucumita en Jerusalemo; tion ili ambaŭ faradis kun kunmetitaj manoj, kiam en la ĉambro de la malsanulino estis silento kaj neniu alia homo. En tiuj momentoj la vidvino de Falminio Severus sentis, ke ŝiaj doloroj mildiĝas, kvazaŭ ia dolĉa balzamo refreŝigus ŝiajn internajn fortocentrojn; la doloraj dispneoj ĉesis kaj la spirado preskaŭ normaligiĝis, kvazaŭ profunda energio el la nevideblaj regionoj revigligus ŝian sklerozan, lacan koron.

La spirito de Publio klare rimarkis tiujn simptomojn de morala modifiĝo de la maljuna matrono, kiel ankaŭ la noblan konduton de sia edzino, kiu neniam plu ripozis ekde la momento, kiam ŝi vidis Kalpurnia ekstreme senfortiĝinta. Ankaŭ la suferoj dum la vivo forte modifis lian spiritan strukturon, kaj, kiel neniam antaŭe, la senatano sentis la neceson reamikiĝi kun sia edzino, por elporti la tranĉan vintron de la alproksimiĝanta maljuneco.

Li kaj Livia estis jam pli ol kvindekjaraj, kaj nun, kiam li tiel bone konis la vivon kaj ties dolorajn perfektajn rimedojn, li sentis sin kapabla pardoni ĉiujn iamajn kulpojn de sia edzino; li ja konsideris, ke ŝiaj dudek kvin jaroj da morala turmentado, en la sankta medio de la hejmo, sufiĉis por liberigi ŝin el la eraraj, kiujn ŝi eble faris, implikita en la iluzioj de la juneco, en fremda lando, laŭ tio, kion al li kredigis liaj falsaj observoj, devenintaj de la kalumnio, kiu detruis lian feliĉon kaj pacon dum tuta ekzistado.

En la unuaj tagoj de la jaro 58, la suferoj de Kalpurnia subite pligraviĝis, kaj tial estis ĉiumomente atendata ŝia forpaso.

Kvankam ili konfesis al si, ke tiu malsana, senfortiĝinta korpo bezonas ripozon, tamen ŝiaj gefiloj kaj la pli intimaj personoj, tre kortuŝitaj, staris ĉe ŝia lito.

Du tagojn antaŭ ol morti, la respektinda sinjorino petis, ke oni lasu ŝin sola kun la senatano, dum kelkaj horoj, dirante, ke ŝi bezonas konfidi al Publio Lentulus iujn aferojn in extremis.

Ŝia peto estis tuj kontentigita, kaj jen ili intime konversacias, kvazaŭ ili estus kune je la lasta fojo, por la decido de tre gravaj demandoj.

Publio, ankoraŭ en plena vigeleco de sia fizika strukturo, havis okulojn larmoplenajn, dum la maljuna matrono lin rigardadis, montrante, tra siaj kvietaj, kaviĝintaj okuloj, lumon de profunda mensklareco.

– Publio – ŝi komencis per serioza tono, kvazaŭ tiuj vortoj estus ŝiaj lastaj rekomendoj –, por la spiritoj, kiel la niaj, timo antaŭ la morto ne povas ekzisti, kaj nur tial mi decidis paroli al vi dum miaj ankoraŭ restantaj horoj...

– Sed, mia bona amikino – respondis la senatano, sulkigante la frunton kaj penante kaŝi la emociion, bolantan en lia animo, ĉar li memoris, ke, en tiaj samaj cirkonstancoj, Flaminio parolis al li je la lasta fojo, inter la muroj de tiu ĉambro –, nur la dioj povas decidi pri niaj destinoj kaj nur ili konas niajn lastajn momentojn!

– Mi ne dubas tiujn veraĵojn – diris la brava patriciino –, sed mi havas la certecon, ke miaj horoj sur la Tero alproksimiĝas al sia fino, kaj mi ne volas porti en la tombon iun konscienciproĉo pri kulpo, kiun, mi konfesas, mi faris antaŭ pli ol dek jaroj...

– Kulpo? Neniam... Via vivo, Kalpurnia, ĉiam estis unu el la plej maloftaj ekzemploj de virto, dum ĉi tiu epoko de transiĝo kaj degenerado de niaj plej belaj moroj...

– Mi dankas vin, mia granda amiko, sed via ĝentileco ne liberigas min el pento antaŭ via spirito, kaj tial mi asertas, ke antaŭ pli ol dek jaroj mi eraris pri juĝo; hodiaŭ mi petas vin ricevi la reĝustigon de mia juĝo, eble tre malfruan, sed ankoraŭ oportunan, por ke ni, kun plej justa respekto, honoru vivon plenan de oferoj kaj abnegacioj!

Publio Lentulus komprenis, ke ŝi aludas lian edzinon, kaj, kun la voĉo sufokita de emocio kaj larmoj, lasis, ke la malnova amikino, kun sekaj okuloj, parolu plu, montrante la plej altan moralan kuraĝon fronte al la alproksimiĝanta morto.

– Mi parolas pri Livia – daŭrigis Kalpurnia per emocia tono –, pri kiu mi havis la malfeliĉon konigi al vi eraran kaj nejustan supozon, kaj tial mi senigis ŝin je la lasta eblo, esti feliĉa sur la Tero; sed la morto aliigas niajn konceptojn pri la vivo, kaj la homoj, baldaŭ forlasontaj ĉi tiun mondon, pli klare vidas ĉiujn problemojn de la ekzistado.

“Hodiaŭ, mi amiko, mi, kun serena animo, diras al vi, ke via edzino estas senmakula kaj senkulpa...”

La senatano sentis, ke la larmoj spontanee elŝprucas el liaj okuloj, sed estis por li kora konsolo scii, ke nun lia respektinda amikino konfirmas liajn konvinkojn, kiujn la tempo plifirmigis, koncerne la noblecan kunulinon de lia ekzistado.

– Tion mi ne diras al vi pro ia persona egoismo, kiel dankon pro la grandega sindono de Livia al mi, dum ĉi tiu dolora malsano – ŝi firme parolis plu. – Spirito de tia harditeco, kian posedas la niaj, devas loki la veron super ĉio, kaj ĉi tiun konfeson mi ne faras nur pro mia tute homa malforteco.

“Reale estas, mia amiko, ke, de tiu vespero, kiam vi petis min eldiri mian opinion pri via edzino kaj mia sindonema amikino, mi sentas la pikadon de kruela dubo en mia disŝirita koro. Livia ĉiam estis mia plej bona kunulino, kaj malprave kunhelpi por ŝia malfeliĉo estis en miaj okuloj la plej granda kulpo en mia tuta vivo...”

“Dum dek unu jaroj mi senĉese preĝadis kaj faris multenombrajn oferojn en la temploj, por ke la dioj inspiru al mi la veron pri tiu demando, kaj dum tiu tuta tempo ĝis nun mi pacience atendas la malkaŝon el la Ĉielo... Nur hodiaŭ estis tamen donite al mi ĝin ricevi, jam ĉe la faŭko de la tombo!”

“Eble mia kompatinda animo, jam duone liberiĝinta, estas enkondukita en la nekomprenatajn misterojn de la transtomba vivo, kaj eble pro tio mi vidis, hodiaŭ matene, la figuron de Flaminio en ĉi tiu ĉambro! Estis tre frue, kaj mi troviĝis tute sola, kun mia meditado kaj miaj preĝoj!”

La parolo de la malsanulino estis dume interrompata de profundaj emocioj, ŝin regantaj, kaj Publio Lentulus ploradis, en dolora silento.

– Ja... – Kalpurnia diris plu, post longa paŭzo –, mese en ia malpreciza, blueta lumo mi vidis Flaminion, kiu etendis al mi siajn helpemajn, kompatajn brakojn... En lia rigardo mi rimarkis lian saman kutiman esprimon de mildeco, kaj en lia voĉo la tre konatan neforgeseblan tembron... Li avizis min, ke post du tagoj de hodiaŭ mi penetros en la neesplorableblajn misterojn de la morto; tiu sciigo pri mia proksima morto efektive ne surprizis min... Ĉar por mi,... kiu jam de tiom da jaroj vivas en mia angulo, kun resopiroj kaj

ombroj..., al kiuj aldoniĝis senĉesaj angoroj de la longa, dolora malsano..., la certeco pri la morto estas plej granda konsolo... Kuraĝigita de la dolĉaj promesoj de la vizio, kiuj antaŭdiris por baldaŭ tiun ripozon..., mi demandis la Spiriton de Flaminio pri la kruela dubo, jam longe min turmentanta... Mi tion faris mense, kaj ĝi sufiĉis: la radiluma estulo respondis al mi laŭte..., delikate balancante la kapon... kvazaŭ li esprimus grandegan, doloran malĝojon: “Kalpurnia, en bedaŭrinda momento vi suspektis tiun virinon, kiun vi devus ami... kaj protekti, kiel karan, sindonan filinon..., ĉar Livia... estas senmakula kaj senkulpa...”

“Tiam... – diris plu la malsanulino, iom pene – tiel forta estis la impreso, kiun mia animo ricevis... ĉe la surprizo de la respondo..., ke mi ne plu vidis la amikan, konsolantan vizion..., kvazaŭ mi estus subite vokita en la amarajn realaĵojn de la praktika vivo...”

El la okuloj de la maljuna matrono gutis larmoj, dum la senatano silente dronis en plorado, naskita de liaj korŝiraj emocioj.

Multe da minutoj ili ambaŭ restadis tiel, donante liberan kuron al la konscienciproĉo kaj al la sufero...

Fine, la nobla patriciino rompis la pezan silenton; prenante la manojn de la amiko inter la siaj blankaj, preskaŭ senkarniĝintaj, ŝi diris:

– Publio, parolas al vi la koro de malnova amikino, esprimanta la serenajn, ombrajn veraĵojn de la morto... Ĉu vi absolute kredas miajn dolorajn malkaŝojn?

La senatano penis forviŝi la larmojn, abunde fluantajn el liaj okuloj, kaj, plej streĉante siajn fortojn, firme respondis:

– Jes, mi ja kredas.

– Kaj, kion ni faru nun... por ripari niajn erarojn... kontraŭ la nobla, pura koro de via edzino?

Ekbrilo de amo vidiĝis tra liaj okuloj; glatigante sian frunton per la nervaj manoj, kvazaŭ trovinte ian preskaŭ feliĉan solvon, kaj kun mieno elradianta ĝojon kaj trankvilon, li revigligita sin turnis al la malsanulino, dirante:

– Ĉu vi scias, ke post nemultaj tagoj la ŝtato okazigos grandan feston, dum kiu la senatanoj, servantaj al la Imperio jam de dudek jaroj, estos kronitaj per mirto kaj rozoj, kiel venkintoj?

– Jes – respondis la matrono –, kaj tial mi jam petis miajn filojn, ke..., malgraŭ mia proksima morto..., ili estu apud vi ĉe tiu prava ĝojo..., ĉar vi estas unu el tiuj, kiuj ricevos la honorojn de niaj superaj aŭtoritatuloj...

– Ho, mia granda amikino, neniu povas kredi, ke vi baldaŭ mortos, des pli, ĉar ni ne povos seniĝi je la altvalora kontribuo de via vivo; tamen, ĉar mi penas pagi mian gravan eraron en la dolora pasinteco, mi atendas ankoraŭ unu semajnon, por prezenti al la spirito de Livia la esprimon de mia danko kaj de mia profunda amo. Mi iros al tiu festo, okazonta sub la aŭspicioj de Seneko, kiu ĉion eblan faras, por mildigi la akran impreson, kaŭzatan de la kruela konduto de la imperiestro, lia iama disĉiplo. Ricevinte la kronon de la plej alta venko en mia politika vivo, mi metos ĉiujn ordenojn ĉe la piedoj de Livia, kiel justan honoron al ŝia malglata ekzistado, plena de amaraj oferoj en la hejmo... Mi ekgenuos antaŭ ŝia sanktigita

figuro kaj, preninte de la frunto la kronon de la Imperio, mi sternos la simbolajn florojn ĉe ŝiaj piedoj, kiujn mi humile kisos kun mia pento kaj miaj larmoj – esprimo de miaj senfinaj danko kaj amo!

– Jen nobla ideo, mia karulo – diris la malsanulino kortuŝita –, kaj mi petas, ke vi plenumu ĝin... en la oportuna okazo. Kaj, en la momento..., kiam vi elmontras al Livia vian superegan amon..., diru al ŝi, ke ŝi pardonu min,... ĉar, en la kvietaj ombroj de mia tombo..., mi ploros de ĝojo..., vidante vin ambaŭ feliĉaj...

Poseditaj de emocio, ili silente ploradis...

Ĉe unu momento, la grandaĝa mortantino prenis la manojn de sia amiko, kvazaŭ dirante al li adiaŭ je la lasta fojo. Kalpurnia fiksas lin per siaj grandaj helkoloraj okuloj, verŝantaj misterajn radiojn, kaj, kun larmoj de neesprimebla emocio, diris kortuŝita:

– Publio..., mi petas vin... ne forgesi... vian promeson... Genuiĝu ĉe la piedoj de Livia..., kvazaŭ ĉe la piedoj de iu diino... de abnegacio kaj boneco... Ne ĉagrenu vin... mia foriro de ĉi tiu mondo... Iru al la festo de la Senato... Ni pagu... nian gravan eraron... Kaj nun, mia amiko... jen la lasta peto...: zorgu pri miaj filoj..., kvazaŭ ili estus viaj... Instruu al ili ankoraŭ honestecon..., animfortecon..., sincerecon kaj bonon... Iun tagon... ni ĉiuj... kuniĝos... en la eterno...

Publio kun ŝirita koro premis ŝiajn manojn kaj plikomfortigis ŝian blankharan kapon sur la silkaj kusenoj, dum larmoj de emocio sufokis lian voĉon.

Jam de longe la malsanulino subite spertis periodajn, daŭrajn dispneojn.

La senatano malfermis la pordojn de la vasta ĉambro, kaj Livia, kiel ĉiumomenta flegistino, rapide eniris, dum Flavia kaj kelkaj servistinoj alportis ŝmiraĵojn kaj aliajn drogojn, uzatajn de la tiama kuracarto.

Sed Kalpurnia ŝajnis atakita de la lastaj suferoj, kiuj portos ŝin en la tombon. Dum dudek kvar sinsekvaj horoj ŝi malfacile spiras kaj ŝia brusto sibilis, kvazaŭ ĝin baldaŭ rompos ia neregebla, mistera forto.

Post unu tago kaj unu nokto da penado kaj angoro, ŝajnis, ke la malsanulino iom pli bone fartas. La spirado estis pli facila, kaj ŝiaj okuloj montris grandan serenecon, kvankam ŝian tutan korpon kovris bluecaj kaj violkoloraj makuloj, antaŭsignantaj la morton. Nur la aŭdita ankoraŭ daŭris, sed, ĉe unu momento, ŝi gestis per la mano, vokante Livian al sia kapflanko, kun la dolĉa pasintatempa familiareco. La senatanedzino obeis la silentan alvokon; kun larmoplenaj okuloj, ŝi genuiĝis, kaj komprenis, per spirita intuicio, ke venis la dolora adiaŭa momento. Oni vidis, ke Kalpurnia deziras paroli, sed vane. Tiam, ŝi ame prenis Livian al sia brusto, per ekstrema peno kisis ŝiajn harojn kaj frunton, kaj, almetante la lipojn al ŝia orelo, plej dolĉe flustris: “Livia, pardonu min!” Nur ŝia amikino aŭdis la voĉbrueton de la mortantino. Tiuj estis la lastaj vortoj de Kalpurnia, agonianta. Laŭŝajne ŝia nobla animo bezonis nur fari tiun lastan peton, por sukcesi tiri sin el la Tero kaj altiĝi al la Paradizo.

Tenante sian senlaca amikinon en siaj brakoj, la agonianta sinjorino denove kuŝigis sian kapon sur la kusenojn, nun por ĉiam. Abunda ŝvito elfluis el ŝia tuta korpo, kiu iom post iom kvietiĝis, atendente la kadavran rigidigon; post kelkaj minutoj ŝiaj okuloj fermiĝis, kvazaŭ preparante sin por longa dormo. La spirado milde kaj laŭgrade estingiĝis, kaj sur ŝiaj sulkplenaj vangoj ruliĝis peza, blanka larmo, simila al ia dia lumradio, heliganta la nokton de ŝia tombo.

Tiam, la pordoj de la palaco estis malfermitaj, por la amikaj honoroj de la Roma socio. La funebran

ceremonion de la altranga matrono ĉeestis la plej eminenta kaj elektita parto de la spirita aristokrataro en la urbo, konsidere al la alta reputacio, kiun ĝuis la eksterordinaraj virtoj de la mortinta sinjorino.

Post kiam finiĝis la ceremonio por la cindrigo de la kadavro kaj estis enmetita la respektinda cindro de la patriciino en la senluman sinon de la familia funebra monumento, Flavia Lentulia prenis sur sin la mastrumadon kaj ŝiaj gepatroj reiris al sia hejmo sur la monteto Aventino, por la necesa ripozo.

Restis nur kvar tagoj ĝis al okazigo de la grandaj festoj, dum kiuj pli ol cento da senatanoj ricevos la kronon de la plej alta triumfo en sia politika vivo. Publio Lentulus, unu el tiuj, al kiuj estis farotaj la honoroj en la pompa festo, malgraŭ la funebro de la familio, senpacience atendis la grandan momenton. Tia animstato venis de tio, ke, ricevinte la superegan esprimon de la venko kiel ŝtatisto, li portos ĝin al la piedoj de sia edzino, kiel eternan simbolon de lia amo kaj danko por la tuta vivo. En sia koro li planis la plej dolĉan manieron, kiel li sin denove turnos al sia edzino, per karesa, milda tono, kiun lia voĉo jam de dudek kvin jaroj estis perdinta; konstatinte, ke lia amo al la edzino ankoraŭ daŭras, ĉiam pli profunda, li senpacience atendis la momenton de sia reeniro en la hejman feliĉon.

Vespere, dum tiuj longaj horoj, kiam la maljuna koro sin pretigis por la beno de la geedzeca feliĉo, post nemultaj tagoj, li iris ĝis apud la ĉambroj de sia edzino, situaciantaj tre malproksime de la liaj, dum tiuj jaroj da nesprimeblaj ĉagrenoj.

Du tagojn antaŭ la grandaj solenaĵoj, pri kiuj ni parolis, je ĉirkaŭ la dek-unua horo vespere, li staris fronte al la ĉambroj de sia edzino, antaŭĝuante la feliĉegan momenton de sia pentofaro, kiun li rigardis kiel plej grandan ĝojon.

Dum la penso enprofundiĝis en la abismojn de la fora pasinteco, lia spirita atento estis vekita de la milda melodio de la voĉo de virino, mallaŭte kantanta en la nokta silento. La senatano senbrue alproksimiĝis kaj almetis al la pordo la orelon, por bone aŭdi... Efektive, Livia kantadis per dolĉa, murmuranta voĉo, kvazaŭ ia forlasita alaŭdo, delikate sonigante la harmoniajn kordojn de liro, kiu revokis en ŝian memoron ŝiajn plej karajn travivaĵojn. Aŭdante ŝiajn arĝentajn notojn, kiuj disfluiĝis en la limita interno de la ĉambro, Publio ploradis kortuŝita; tio estis, kvazaŭ Livia kantadis por si mem, lulante sian humilan kaj forlasitan koron, por plenigi per konsolo la malgajajn, solecajn horojn de la nokto. Ĝi estis tiu sama komponaĵo de la muzoj de ŝia edzo, fluanta el ŝiaj lipoj en tiu momento, kiam ŝia voĉo havis strangajn, mirindajn, neesprimeble melankoliajn nuancojn, kvazaŭ ŝia kanto estus la dolora lamentado de iu vundita najtingalo:

Anim' ĝemela de l' mia,

De mia vivo lumfloro,

Falinta stel' de la koro

De l' bela spaco sen fin',

Dum mi vagadis tra l' mondo,

Malgaja ombro tutsola,

Jen vi kun rido kosola,

Feliĉa mi sentis min!

Vi venis kun ben' de l, dioj,

Jen lumo sur vojo riĉa,

Por fari min plej feliĉa,

De via kor' ĉe la flam'!

Karega mia trezoro,

Kun vi mi vivos sur Tero;

Vi mia estas l'espero,

Por mi vi estas – la am'!

Anim' ĝemela de l' mia,

Se rompiĝus nia ĉeno,

Min turmentus la ĉagreno

De l' sopir' en mia ĉel'!

Iam se vi min forlasos,

Adorata dolĉa lumo,

Vin, de floroj ĉe l' parfumo,

Mi atendas en ĉiel'! ()*

(*) Ĉi tiu poeziaĵo jam ricevis simplan, dolĉan muzikon kaj estas kantata de multaj el niaj samdoktrinanoj. Tiun saman arion ni, en Brazilo, aŭdas ĉe la prezentado de la teatraĵo, farita el ĉi tiu romano. – La Trad.

Post kelke da minutoj la harmonia voĉo eksilentis, kvazaŭ ĝi devus fari misteran halton. La senatano tiam foriris, kun larmoplenaj okuloj kaj al si mem dirante: “Postmorgaŭ, Livia, mi ja pruvos al vi, ke vi ĉiam estis la lumo de mia tuta vivo... Mi kisas al vi la piedojn, kun mia dankplena humileco, kaj enverŝos en vian koron la parfumon de mia pento...”

En sia ĉambro, jen Livia, metinte sur preferatan meblon sian karan liron, troviĝis surgenuie, kiel ĉiam, antaŭ la kruco, kiun Simeon donacis al ŝi kaj kiu en tiu tago montris al ŝiaj spiritaj okuloj pli intensan helecon.

Dum siaj preĝoj ŝi aŭdis la parolon de sia nevidebla amiko, kies profunda tono ŝajnis por ĉiam gravuriĝi en la interno de ŝia konscienco: “Filino – diris la amika voĉo el la spirita regiono – gloriĝu per la Sinjoro, ĉar baldaŭ venos la tago de via eterna, senmorta feliĉo! Levu vian humilan penson al Jesuo, ĉar ne estas malproksima la feliĉa momento de via glora eniro en lian regnon!”

Tra sia rigardo Livia montris ĝojon kaj surprizon, sed, plena de fido al la Dia Providenco, gardis, en la plej kaŝitaj anguloj de sia koro, la konsolon de tiuj sanktaj vortoj.

V - EN LA KATAKOMBOJ DE LA FIDO KAJ EN LA CIRKO DE LA MARTIRIGO

En la tago post la okazaĵo, kiun ni ĵus priskribis, jen kunstantaj la du nedisigeblaj amikinoj, kiuj, anstataŭ mastrino kaj servistino, estas du animoj, kiujn kunigis la samaj idealoj kaj la plej sanktaj ligiloj de la koro.

Plenuminte kelkaj devojn en la “Forum Olitorium” (*), Anna estis ĵus alveninta en la hejmo, kaj, trovinte Livian sola, diris al ŝi konfidence:

(*) Legomvendejo. – Rim. de Emmanuel.

– Sinjorino, hodiaŭ vespere estos aŭdata en la sanktejo de la katakomboj nova voĉo, kiu predikos por nia kredo. Iuj niaj amikoj hodiaŭ matene avizis min, ke jam de kelkaj tagoj troviĝas en nia urbo iu sendito el la Antiokia eklezio, nomata Johano Kleofas, kiu alportas al ni, kristanoj de ĉi tiu urbo, gravajn sciigojn...

Livia vidigis tra la okuloj ekbrilon de kora ĝojo kaj ekkriis:

– Ho, jes! Ni nepre iros hodiaŭ al la katakomboj. Mi bezonas partopreni, kun niaj gefratoj per kredo, en la samaj vibroj de nia fido! Krom tio, mi devas danki la Sinjoron, ke li korfavore konsentis al mi siajn grandegajn gracojn!

Kaj, iom levante la voĉon, kvazaŭ ŝi dezirus konigi al sia amikino la puran ĝojon de siaj plej profundaj esperoj, ŝi diris plu kun milda rideto, elradianta el ŝia trankvila mieno:

– Anna, de post la morto de Kalpurnia mi rimarkas, ke Publio estas pli serena kaj trankvila... Jam de kelkaj tagoj li parolas al mi kun tiu sama pasintatempa dolĉeco, kaj antaŭhieraŭ li diris, ke lia koro destinis por mi agrablan surprizon, kiun li faros al mi morgaŭ, post sia plej alta venko en la politika vivo. Mi sentas, ke estas jam tro malfrue, ke mi estus denove feliĉa en ĉi tiu mondo; tamen mi estas kontenta, ĉar mi neniam deziris morti malkonsente kun la kunulo, kiun Dio donis al mi por la bataloj kaj ĝojoj de la vivo. Mi pensas, ke li neniam pardonos min pro la krimo je malfideleco, kiun, laŭ lia opinio, mi faris antaŭ dudek kvin jaroj; mi tamen ploras de ĝojo konstatante, ke Publio juĝas min senkulpiĝinta ĉe la severeco de siaj okuloj!

Kaj ŝi emociita ploradis, dum ŝia maljuna servistino milde asertis al ŝi:

– Jes, mia mastrino, li eble rekonis viajn elmontrojn de sanktiga abnegacio en la hejmo dum tiuj multaj

jaroj da benindaj oferoj.

– Mi dankas Jesuon pro tia granda favorkoreco – respondis Livia kortuŝita. – Mi eĉ kredas, ke mi ne troviĝas malproksima de mia foriro en la mondon de la ĉielaj realaĵoj, kie ĉiuj suferantoj estas ja konsolataj...

Kaj post mallonga paŭzo ŝi parolis plu:

– Hieraŭ, efektive, kiam mi preĝis antaŭ la kruda kruco, en mia ĉambro, mi aŭdis ian voĉon, kiu sciigis, ke mi baldaŭ eniros en la regnon de Jesuo.

Ĉe tiuj vortoj Anna subite memoris Simeonon kaj la horojn antaŭ lia martirigo, kaj profundigis en doloran meditadon. La malproksima pasinteco ankoraŭ ŝvebis en ŝia memoro, kiam la voĉo de Livia ŝin revekis per jenaj vortoj:

– Anna – diris Livia, kun la heroa decidemo de sia fido –, mi ne scias, kiel mi estos vokita de la Mesio, sed, se mia foriro baldaŭ okazos, mi petas, ke vi restu en ĉi tiu domo, por daŭrigi viajn apostolajn laborojn kaj oferojn, ĉar Jesuo certe benos viajn sanktajn penojn.

La malnova servistino de la familio de Lentulus deziris turni la korŝiran konversacion en alian direkton kaj diris, kun sia saĝa sereneco, kiun ni jam konas:

– Sinjorino, Dio scias, kiu el ni foriros la unua. Ni hodiaŭ forgesu ĉi tiun aferon kaj ni pensu nur pri viaj grandaj ĝojoj.

Kaj, kvazaŭ por forviŝi la ĉagrenan impreson, kiun kaŭzis tiu intima interparolado, ŝi finis ĉi tiun, konfidence demandante:

– Ĉu do ni hodiaŭ certe iros la katakomboj?

– Jes, konsentite. Ĉe la vesperkrepusko ni iros, por niaj preĝoj kaj dolĉaj rememoroj pri la Nazareta Mesio. Mi bezonas tiun spiritan faciligon post la multaj monatoj da enfermiteco en la hejmo, apud mia nobla Kalpurnia; cetere, mi deziras peti miajn gefratojn kun mi preĝi por ŝi, kaj tial mi samtempe prezentos al la Sinjoro mian sinceran dankon pro liaj diaj gracoj...

“Antaŭ ol ni iros, mi petas, ke vi revigligu mian memoron, ĉar mi volas porti al la nova apostolo ian almozon, destinontan al la Antiokia eklezio.

“Publio morgaŭ ricevos la plej altan premion asigneblan al iu monduma viro, kaj tiam mi volas peti Jesuon ne forlasi lian bravon, noblan koron, por ke la surteraj vantaĵoj ne malpermesu al mia edzo iam direktiĝi al la mirinda regno de la Ĉielo!”

Tiel interkonsentinte, ili disiĝis, por daŭrigi siajn hejmajn laborojn. Kaj dum la senatano faris multenombrajn disponojn, por ke nenio manku al la persona brilo de lia granda triumfo en la morgaŭa tago, Livia pasigis la horojn kun la animo turnita al la Kristo, en fervoraj preĝoj.

Ĉe vesperiĝo, kiel interkonsentite, jen ili iris al la sekreta kunveno por la primitivaj laboroj de Kristanismo.

Ĉiuj pli altrangaj servistoj en la palaco sen ia maltrankviliĝo kaj surprizo vidis ilin eliri. Dum la tuta longa tempo, kiam Kalpurnia estis malsana, Livia kaj Anna neniam plu daŭre restis en sia hejmo, kaj tial ne estus io eksterordinara, se ili estus decidintaj iri, tiun vesperon, al la domo de la familio de Severus; el tie ili eble revenus nur en la sekvanta tago, konsolinte la malvigligintan spiriton de Flavia, okupita de siaj lacigaj taskoj en la mastrumado.

Tiel la horoj forpasis, glate kaj senzorge; kaj kiam, antaŭĝuante la grandajn ĝojojn, kiujn li esperis ricevi en la morgaŭa tago, li alproksimiĝis al la ĉambroj de sia edzino, la senatano kredis, ke la profunda silento, tie reganta, signifas, ke ŝi kviete kuŝas sur la malpezaj, karesaj flugiloj de la dormo. Opiniante, ke Livia ripozas en la superreganta paco de la nokto, Publio Lentulus iris en sian privatan kabineton, kun la cerbo plena de belaj esperoj kaj kun la intenco elaçeti ĉiujn iamajn erarojn.

Sed Livia, en kompanio de Anna, profitis de la unuaj vesperaj ombroj por atingi la katakomboj.

Estis jam soninta la sepa vespere, kiam la du virinoj sin kaŝis inter la forlasitaj ŝtonoj, kondukantaj al la subteraj galerioj, kie de longe amasiĝis la polvo de la mortintoj.

En vasta volbforma spaco, iam uzata por la kunvenoj de la kooperativoj por funebraj ceremonioj, granda nombro da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la simpatia, nobla figuro de la klera predikisto, veninta el la malproksima Sirio. Ĉe angulo staris improvizita tribunon, kiun Johano Kleofas post kelkaj minutoj suriris, meze en ia nimbo de dolĉeco, kiu envolvis lian distingigan personon.

La kapo de la Antiokia apostolo jam havis siajn unuajn blankajn harojn, kaj lian figuron tute saturis forta persona prestiĝo, kiu streĉe ligis lin al ĉiuj, kiuj alproksimiĝis al li, altirataj de la milda fluo de la kredo kaj de la profundaj sentoj.

Ĉiuj alestantoj ŝajnis kaptitaj de lia rava, impona parolo, kiu dum preskaŭ du seninterrompaj horoj falis en la koron de la aŭdantaro, kvazaŭ beninda roso de la ĉiela elokventeco. Altaj sentencoj, profetaj admonoj eĥe resonis de la silentaj, ombraj arkaĵoj, apenaŭ heligataj de la lumo de kelke da torĉoj.

Efektive, tiu ĉeestantaro sin prave sentis skuata de tiuj doloraj, ĉielaj profetaĵoj, ĉar Johano Kleofas faris profundan paroladon, pli-malpli jene:

– Fratinoj kaj fratoj, estu kun vi la paco de la Ŝafido de Dio, Nia Sinjoro Jesuo Kristo, en la fundo de viaj konsciencoj kaj en la sanktejoj de viaj koroj!

“Dum siaj ĉiutagaj preĝoj kaj meditoj, la sankta Antiokia patriarko ricevis multenombrajn revelaciojn de la Mesio, kaj tial ordonis, ke iu venu al la loko de viaj laboroj en la ĉefurbo de la mondo, por ke tiu anoncu al vi grandajn aferojn...

“Laŭ la revelacioj de la Sankta Spirito, la kristanoj en ĉi tiu malpia urbo estas elektitaj de la Ŝafido pro la granda ofero; kaj mi venis, en la nomo de liaj tre amataj apostoloj, por antaŭsciigi al vi, ke ni baldaŭ eniros en la regnon de Jesuo!

“Ja tiel estos, ĉar tie ĉi, kie la malpieco de la homoj mokis kaj humiligis la diajn glorojn, nepre okazos inter la fortoj de la bono kaj de la malbono la unuaj grandaj bataloj, kiel unuaj paŝoj por la definitiva starigo de la dia eterna Evangelio de la Sinjoro en la mondo!

“Ĉe la lasta ĝenerala kunsido de la kredantoj en Antiokio, la voĉoj el la ĉielo manifestiĝis en formo de langoj el fajro, same kiel okazis en la gloraj tagoj de la kunveno de la apostoloj, post la ĉieliro de nia Savinto; kaj via servanto, ĉi tie antaŭ vi, estas elektita kiel portanto de tiuj konsolaj sciigoj, ĉar la ĉielaj voĉoj promesas, por post nemultaj tagoj, la regnon de la Sinjoro...

“Amataj, mi kredas, ke ni troviĝas proksime de la kruela pruvo de nia fido per elaĉetaj suferoj; tamen la kruco sur Kalvario ja lumigos la teruran nokton de niaj doloroj...

“Ankaŭ mi havis la feliĉon aŭdi la parolon de la Sinjoro, dum la lastaj horoj de lia korŝira agonio sur ĉi tiu mondo. Kaj kion li petis, miaj karaj? nur tion, ke la Patro pardonu liajn senkorajn turmentantojn! Vere, ni ja ne dubu la revelaciojn el la ĉielo... Neflekseblaj turmentistoj spionas niajn paŝojn, kaj mi portas al vi la parolon de la amo kaj de la animforteco ĉe Nia Sinjoro Jesuo Kristo!

“Romo baptos sian novan kredon per la sango de la justaj kaj de la senkulpaĵaj homoj; tamen estas ankaŭ grave konsideri, ke la senmakula Ŝafido de la Ĉiopova Dio oferis sin sur la malgloriga kruco, por elaĉeti la pekojn kaj abomenaĵojn de la terloĝantoj!

“Ni eble laŭiros ĉi tiujn luksajn vojojn, kvazaŭ ili estus aliaj stratoj de ia putra Jerusalemo, plena de konsterno kaj afliktoj... La ĉielaj voĉoj diras, ke tie ĉi ni elportos malŝaton, humiligon, insultadon kaj frakason; tamen la superega venko de la Sinjoro atendas nin trans la dornaj palmbranĉoj de la martirigo, en la dolĉa heleco de lia regno, neatingebla por sufero kaj morto!

“Per nia sango kaj per niaj larmoj ni forlavis de la maljusteco ĉi tiujn altprezajn marmorajojn, kaj iun tagon, miaj fratinoj kaj fratoj, ĉi tiu nova Babilono, kie reĝas malkvieteco kaj peko, tondre dispulvoriĝos sub la pezo de siaj abomenaj hontoj... Detrua uragano faligos la falsajn idolojn kaj konfuzos la pretendemajn mensogojn de iliaj altaroj... Doloraj ventegoj de la ekstermado kaj de la tempo pluvigos sur ĉi tiun potencan Imperion la ruinojn de la malriĉeco kaj de la plej bedaŭrinda forgeso... La cirkoj de la kruelaĵoj malaperos sub monto da cindro; la Forumo kaj la Senato de la nepentantoj estos nuligitaj de la superega Dia justeco; kaj la fieraj militistoj de ĉi tiu pekanta urbo iam treniĝos, kvazaŭ vermoj, sur la bordoj de tiu sama Tiberio, kiu forportas ilian maljustecon!

“Tiam, iaj novaj Jeremiaj ploros sur la marmorajoj, en la dolĉa lumo de la nokto... La luksaj palacoj sur ĉi tiuj belaj, graciaj montetoj disfalos meze en terura konfuzo, kaj super iliaj monumentoj, starigitaj de fiero, egoismo kaj vantamo, blovos la malgajaj ventoj de la silentaj, dezertaj noktoj...

“Feliĉaj estos tiuj, kiuj nun ploros, pro amo al la Dia Majstro; feliĉaj tiuj, kiuj verŝos sian sangon por la superegaj veraĵoj de la Ŝafido, ĉar en la ĉielo ekzistas la diaj loĝejoj, destinitaj al la elektitoj de Jesuo...”

Aŭdiĝis la milda kaj terura voĉo de la komisiito de la Antiokia eklezio, kaj liaj vortoj vibris en la profunda silento inter tiuj solecaj volboj.

Tie troviĝis ĉirkaŭ ducent personoj, lin atente aŭdantaj. Preskaŭ ĉiuj alestantaj kristanoj ploradis, ravitaj. En la interno de la animoj ŝvebis ia dolĉa, mistika ekzaltiteco, kiu igis ilin senti la mildajn emociojn de ĉiuj tiuj anonimaj apostoloj, kiuj mortis sur la senhonorigaj arenoj de la cirkoj, por solidigi per sango kaj larmoj la konstruaĵojn de la nova kredo.

Post la strangaj, doloraj profetaĵoj, kiuj plenigis ĉiujn okulojn per ia neesprimebla lumo de interna ĝojo, ĉe la antaŭvido de la glora regno de Jesuo, multenombraj samkredanoj konsultis Johanon pri pluraj

demandoj, ĝenerale tuŝantaj la iradon kaj disvolviĝon de la nova doktrino, ĝuste tiel, kiel okazadis en la primitivaj kunvenoj de la naskiĝanta Kristanismo, kaj ĉiujn li kontentigis kun la plej sinceraj esprimoj de frata bonkoreco.

Demandite de unu el la ĉeestantoj pri la motivo de sia radianta ĝojo, dum la revelacioj de la Sankta Spirito anoncis tiajn grandajn provojn kaj suferojn, la nobla sendito respondis kun plej altgrada optimismo:

– Vere, miaj amikoj, ni povas esperi nur la sanktan plenumon de la sciigitaj antaŭdiraĵoj, sed ni devas ĝoje konsideri, ke, se Jesuo permesas al la malpiuloj la konstruon de mirindaj monumentoj, kiajn havas ĉi tiu luksa, putrinta urbo, kion do li destino, per sia senlima favorkoreco, al la bonaj kaj justaj homoj, en la lumo de sia regno?

Tiuj konsolantaj respondoj faladis en la animon de la granda kunvenantaro, kvazaŭ plej dolĉa balzamo.

Vorto de amo kaj koraj salutoj estis interŝanĝataj inter ĉiuj, meze de la plej sinceraj elmontroj de ĝojo kaj frateco.

Livia kaj Anna vidigis brilon de interna feliĉo tra siaj kvietaj okuloj.

Kiam la kunveno finiĝis, ĉiuj ekstaris por la simplaj, spontaneaj preĝoj de la primitivaj lecionoj de Kristanismo, prenitaj el siaj puraj fontoj.

Refoje aŭdiĝis, brila kaj klara, la voĉo de la sendito el Antiokio:

– Patro nia, kiu estas en la ĉielo, Via nomo estu sanktigita. Venu Via regno, plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero...

Sed en tiu momento, malbonsigna tintado de armaĵoj sufokis la mildan, kortuŝantan parolon.

– Jen, tie ĉi, Lukulo! – kriis la tondra voĉo de la centestro Klodio Varrus, kiu marŝis, kun siaj multenombraj gvardianoj, kontraŭ la surprizitan kolekton de la sendefendaj kristanoj, el kiuj la plej multaj estis virinoj.

Kelkaj pli flamiĝemaj kredantoj komencis tiam estingi la torĉojn, kio rezultigis konfuzon kaj tumulton en la mallumo; sed Johano Kleofas, radianta kaj impresa figuro, estis deirinta de la tribunon.

– Fratinoj kaj fratoj – li kriis per stranga, vibranta voĉo, kvazaŭ lia admono estus saturita de eksterordinara magneta povo –, la Sinjoro rekomendis, ke ni neniam metu la lampon sub grenmezurilon! Ne estingu la lumon, kiu devas priradii nian ekzemplon de kuraĝo kaj fido!

Tiam la centestroj jam interkonsente organizis siajn fortojn, dismetinte la kvindek soldatojn, venintajn sub ilia komando, por la okazo, se estos la rezisto.

Oni tiam vidis la Antiokian apostolon paŝi kuraĝe, meze de la silenta mirego de la ĉeestantoj, al Lukulo Kvintilius, etendi al li la brakojn sen ia kontraŭstaro kaj firme peti:

– Centestro, plenumu sentime vian taskon, ĉar mi venis Romon nur por la gloro de la ofero.

La komisiito de la Imperio ne kortuŝiĝis ĉe tiuj vortoj kaj, frapinte la vizaĝon de la misiisto per la manŝirmilo de sia glavo, rapide ŝnurligis liajn brakojn, kio malebligis al Johano ĉian movon.

Senbridiginte sian ardan, sinceran temperamenton kaj indignante pro tia kruelaĵo, du junaj kredantoj elingigis siajn armilojn, kiuj brilis ĉe la pala heleco de tiu duonombro, kaj sin ĵetis sur la soldatojn, prenante ekstreman teniĝon por defendo kaj rezisto; sed Johano Kleofas ankoraŭfoje admonis en sia impona, profunda parolmaniero:

– Miaj infanoj, ne reokazigu ĉi tie la doloran scenon de la aresto de la Mesio. Memoru Malkon kaj remetuviajn glavojn en iliajn ingojn, ĉar, kiu per fero vundas, tiu per fero estos vundita...

Fariĝis tiam inter la kristanoj movo de kvietiĝo kaj mirego. La serena braveco de la apostolo komunkiĝis al ĉiuj koroj.

En la grandaj momentoj de la vivo ia spirita vibro ĉiam fluas el aliaj mondoj, por la konsolo al la mizeraj pasantoj sur la vojoj de la surtera ekzistado.

Okazis tial io eksterordinara kaj neatendita: ĉiuj kredantoj imitis la bravan apostolon, senreziste etendante siajn brakojn por la memofero.

Ĉe sia dolora momento, Livia estis posedita de tia kuraĝo, kian ŝi neniam antaŭe havis. Antaŭ ŝia nobla figuro kaj ŝia vesto de patriciino la esprimoplenaj rigardoj de tiuj krueluloj longe haltis: en tiu kunvenantaro ŝi estis la sola virino kun la insignoj de la Romana patricieco.

Klodio Varrus respekte plenumis sian taskon, kaj post kelke da minutoj tiu granda grupo direktiĝis al la malliberejo, en la densa ombro de la noktomezo.

La malliberejo, kie la kristanoj estis pasigontaj multe da horoj, en malseketa aero kaj en ĝena miksiteco, kiu por ili iomgrade estis dolĉa konsolo, staris apud la Granda Cirko; sur la giganta amplekso de ĉi tiu ni devas unu momenton fiksi nian rigardon, por havigi al la leganto ian supraĵan ideon pri ĝia grandeco.

La Granda Cirko (*) situaciis en la valo inter la montetoj Palatino kaj Aventino kaj estis unu el la plej belaj mirindaĵoj en la nevenkita urbo. Ĝi estis konstruita ĉe la komenco de la Roma organizado kaj ĝia grandioza amplekso kreskis, samtempe kiel la urbo, tiel, ke dum la regado de Domicio Nerono ĝi havis 2190 futojn da longo kaj 960 da larĝo, en formo de duonrondo, kaj spacon por tricent mil komforte sidantaj spektatoroj. Ambaŭflanke troviĝis, unu sur la alia, du vicoj da portikoj, ornamitaj per multenombraj kolonoj, kronitaj per komfortaj terasoj. Meze de tiu lukso en konstruaĵoj kaj abundeco de ornamaĵoj, estis vidataj multenombraj fiaj drinkejoj kaj diboĉejoj, en kies ombro dormadis la mizeruloj kaj ripozadis la plimulto de la popolo, ebria kaj moliĝinta en la plej abomenaj plezuroj. Ses kvadrataj turoj, montrantaj la plej progresintan esprimon de bona gusto de la tiama arkitekturo, staris super la terasoj kaj servis kiel luksaj videjoj al la pli altrangaj personoj ĉe la festaj spektakloj. Larĝaj ŝtonbenkoj, aranĝitaj en formo de amfiteatro, okupis tri flankojn; post ili, en rekta direkto, etendiĝis la Karceroj, el kiuj eliris la ĉevaloj kaj ĉaroj, sklavoj kaj enkarcerigitoj, sovaĝaj bestoj kaj gladiatoroj, por la preferataj amuzoj de la tiama Roma socio. Sur la Karceroj troviĝis la luksega pavilono de la imperiestro, kiu, dum siaj distriĝoj, estis akompanata de la plej altaj aŭtoritatuloj kaj korteganoj. La arenon laŭlonge dividis murego de ses futoj da alto kaj dek du da larĝo, kaj sur tiu murego staris altaroj kaj altprezaj statuoj el rafinita, orumita bronzo. Ĝuste ĉe la centro de tiu murego, donante majestatan stampon de grandeco al la ludejo, la fama, cent dudek futojn alta obelisko, konstruita honore al Aŭgusto, superstaris la ruĝan kaj

verdan arenon, kiu faris la impreson, kvazaŭ ĝi estus ia glata herbejo, subite punktita de floroj el sango.

(*) Latinlingve “Circus Maximus” (plej granda cirko). – La Trad.

La kompatindaj kaptitoj de tiu hombuĉado estis puŝitaj en vastan ĉambron apud la Karceroj nelonge post noktomezo.

La soldatoj senigis ilin, unu post alia, je iliaj iom valoraj objektoj kaj malgrandaj monsumoj. Tiu humiliga senposedigo ne estis ŝparita eĉ al la sinjorinoj mem, kiuj tiel perdis siajn altprezajn juvelojn. Nur Livia, pro respekto al ŝiaj vestoj, ne suferis la fian priserĉadon.

En privata kabineto, Klodio Varrus informis sian superulon, Kornelion Rufus, pri la sukceso de sia tasko, en tiu nokto.

– Nu – ekkriis Kornelio, ĝojante –, kiom mi vidas, la morgaŭa festo plene kontentigos la imperiestron. Tiu unua ĉasado al kristanoj estos esenca por tia glora okazaĵo, kiaj estas la grandaj honoroj al la senatanoj.

“Sed, diru – li pli diskrete parolis plu, aludante Livian –, kiu estas nome tiu virino, surhavanta la togon de la matronoj el la plej alta socia klaso?”

– Mi ne sicas – respondis la centestro en profunda enpenŝiĝo. – Vere, mi forte miris, trovante ŝin en tia medio, sed mi akurate plenumis viajn ordonojn.

– Vi bone agis.

Tamen, kvazaŭ en sia animo planante ian novan aranĝon, Kornelio Rufus ordonis:

– Ni ilin restigu ĉi tie ĝis morgaŭ, ĝis komenciĝos la spektaklo, kaj tiam ŝi povos esti liberigita.

– Kaj, kial ni ŝin ne tuj liberigus?

– Pro sia nobeleco ŝi povus levi ian proteston kontraŭ la decido de Cezaro, kaj tio metus nin en tre ĝenan situacion. Ĉar tiuj mizeruloj estos ĵetitaj al la sovaĝaj bestoj, kiel sklavoj kaj homoj kondamnitaj al morto, dum la lastaj posttagmezaj amuzoj, tial ne konvenas, ke ni kompromitu nin antaŭ ŝia familio. Ŝin tenante plu ĉi tie, ni kontentigos la kapricojn de Nerono, kaj, ŝin poste liberigante, ni ne havigos al ni embarasojn kun la personoj, ĝuantaj la favorojn de la situacio.

– Jes, vere, tio estas la plej saĝa decido; sed kial tiuj homoj estu kondamnitaj kvazaŭ sklavoj, dum ili devus morti kiel kristanoj, se nur tio estas la kaŭzo de ilia justa kondamno? Ĉu la motivo de ilia morto ne kuŝas en la humiliga doktrino, kiun ili konfesas?

– Jes, sed ni devas konsideri, ke la imperiestro ankoraŭ ne sentas sin sufiĉe forta, por alfronti la opinion de la senatanoj, de la magistrato kaj de pluraj aliaj aŭtoritatuloj, kiuj certe dezirus pledi por tiuj malfeliĉuloj, kaj tio alportus al li mem kaj al liaj intimaj konsilantoj ioman perdon de politika influo... Sed mi ne dubas, ke tiu persekutado kontraŭ la adeptoj de la abomena doktrino de la Krucumito estos oficialigita post nemultaj tagoj (*), tuj kiam la imperiestra povo estos pli firme centralizita.

(*) La plimulto el la historiistoj de la Roma Imperio registras la unuajn persekutojn al Kristanismo nur en la jaro 64; tamen, ekde la jaro 58 kelkaj el la favoratoj de Nerono sukcesis komenci tiun kriman agadon.

Estu aparte notita la fakto, ke la tiamaj kristanoj, pli frue ol la granda brulado de la urbo, estis kondukataj al la buĉado kiel plej mizeraj sklavoĵoj, por amuzo de la popolo. – Rim. de Emmanuel.

“Ni do iom ankoraŭ atendu, kaj, dume, ni plifortigu la aŭtoritaton de Nerono, ĉar potenculo devas esti ĉiam rigardata kiel la plej bona el niaj amikoj.”

Dum tio, ĉiuj kristanoj en la malliberejo disiĝis en grupojn kaj interŝanĝis la plej intimajn impresojn pri tiu angora travivaĵo.

Ĉe unu momento malfermiĝis pordo, kie aperis la abomena figuro de Klodio, kiu ironie ekkriis:

– Kristanoj, Cezaro ne indulgas tiujn, kiuj konfesas la danĝerajn doktrinojn de la Nazaretano. Se vi havas iajn materialajn aferojn por elfini, konsideru, ke estas jam tro malfrue pro tio, ĉar malmultaj horoj apartigas vin de la bestoj sur la areno de la cirko.

La peza pordo refermiĝis post li, dum la kompatindaj kondamnitaj estis amare surprizitaj de la maltrankviliga, dolora sciigo.

Tra inter la fortikaj kradoj ili povis observadi la movojn de la multenombraj soldatoj, ilin gardantaj, kaj portis en sia koro, dum la unuaj momentoj, la plej angorajn konjektojn. Sed la malliberuloj baldaŭ reposedis sian trankvilecon kaj humile rezignaciis pri sia sorto. Kelkaj faradis fervorajn preĝojn, dum aliaj mallaŭte interŝanĝadis pensojn.

La provosoj post nelonge apartigis la virinojn en apudan ĉambron, kie ĉiu grupo da kredantoj restis kun animoj turnitaj al Jesuo dum la ekstremaj momentoj, kiam ili atendadis la morton.

Tre frumatene, kiam la suno apenaŭ aperis sur la ĉarma ĉielo super Romo, Anna kaj Livia, tute solaj, preskaŭ serenaj konversaciis en apartejo post ia ekranu, unu el la multaj ekzistantaj en la vasta salono rezervita al la virinoj, dum multenombraj kunulinoj laŭŝajne ripozis duonkonsciaj.

– Sinjorino – diris la servistino iom maltrankvila –, mi rimarkas, ke vi estas ĉi tie traktata kun simpatio kaj estimo. Kial vi tuj ne petus vian liberigon? Ni ne scias, kio terura kaj pereiga okazos al ni dum la amaraj horoj de ĉi tiu tago!

– Ne, mia bona Anna – respondis Livia trankvila –; estu certa, ke mia animo estas taŭge preparita por la ofero; kaj, eĉ se mi ne rezignacius pri mia sorto, vi ne devus konsili al mi ion similan, ĉar Jesuo, kvankam li estis la mastro super ĉiuj mastroj kaj Sinjoro de la ĉiela regno, ne petis pri sia liberigo la kruelulojn, kiuj lin turmentis kaj premegis...

– Tio estas vera, sinjorino; mi tamen pensas, ke Jesuo komprenus vian konduton, ĉar vi havas edzon kaj filinon... – rimarkigis la maljuna servistino, kvazaŭ rememorigante al ŝi la surterajn devojn.

– Edzon? – rebate diris la nobla matrono, kun heroa sereneco. – Jes, mi dankas Dion pro la paco, kiun Li konsentis al mi, permesinte, ke Publio montru al mi sian penton dum la ĵus pasintaj tagoj. Por mi, nur tiu trankvileco estis esenca kaj necesa, ĉar la edzon, kiel homon, mi jam perdis antaŭ dudek kvin jaroj... Mi vane oferis ĉiujn fortojn de mia juneco, por pruvi al li mian amon kaj mian senkulpecon, penante kontraŭi la kalumnion, per kiu oni humiligis mian nomon. Dum kvarono de jarcento, ĝis nun, mi vivadis kun miaj preĝoj kaj larmoj... Amara estas mia resopiro kaj plej dolora mia malgaja spirita izoleco, en kiun mi estas

pelita, en la sfero de miaj plej puraj amoj.

“Mi ne kredas, ke en la koro de mia malnova kunvivanto povos revivi la iama konfido al mi, tiu konfido plena de feliĉo kaj karesemo...”

“Mian filinon mi fordonis al Jesuo, ekde la tagoj de ŝia infaneco, kiam mi vidis min devigita al la terura apartigo de ŝia amo. Forigita de ŝia animo, ĉar tion trudis Publio, mi devis sufoki la plej dolĉajn entuziasmojn de la patrina koro. La Sinjoro ja konas miajn ŝirantajn afliktojn, dum la silentaj, malgajaj noktoj, kiam mi konfidis al li miajn amarajn suferojn. Cetere, Flavia hodiaŭ havas edzon, kiu penis ŝin pli izoli de mia kompatinda spirito, ĉar li timis mian kredon, kiun ĉiuj prenis por ia frenezeco...”

Kaj, post nelonga paŭzo de dia dolora konfidenco, ŝi diris akcente, kun serena malgajeco:

– Por mi, jam ne povos reflori la esperoj ĉi tie, sur la Tero... Nun, mi nur deziras morti en konsola paco kun mia konscienco.

– Tamen, sinjorino – vive insistis la servistino –, hodiaŭ estas la tago de la plej granda venko de via edzo...

– Mi ne forgesis tiun cirkonstancon, sed jam de dudek kvin jaroj Publio iras en senco kontraŭa al la mia; ĝi estas do nenio stranga, ke, dum li hodiaŭ serĉas al si la plej altan rekompencan de la mondo, kiel finan triumfon de siaj deziroj, ankaŭ mi strebas, ne al la ĉiela venko, kiun mi ne meritis, sed al la eblo montri al la Sinjoro la sincerecon de mia fido, sopiranta al la lumaj benoj de lia senlima favorkoreco.

“Krom tio, mia kara Anna, tre plaĉas al la koro revii pri lia sankta, kompatema regno..., kaj revidi la mildajn manojn de la Mesio, kiuj benas nian spiriton per siaj grandaj gestoj de karito kaj dolĉeco!”

Livia havis ian dian brilon en la okuloj, banataj de spontaneaj larmoj, kvazaŭ la paradiza roso estus falinta sur ŝian koron.

Oni klare vidis, ke ŝiaj ideoj jam ne troviĝas sur la Tero, sed ŝvebas en ia mondo de tre milda heleco, plena de agrablaj rememoroj pri la pasinteco kaj saturita de dolĉaj esperoj je la amo de Jesuo Kristo.

– Vere – ŝi parolis plu, kvazaŭ nur al sia animo mem, intime kun la koro –, mi lastatempe ĉiam memoras la Dian Majstron kaj liajn neforgeseblajn vortojn... En tiu neforgesebla vespero, kiam li faris sian predikon, la krepusko apenaŭ forviŝiĝis kaj la ĉielon ornamis steloj, kvazaŭ ankaŭ la lumpunktoj de la senlima arkajo dezirus aŭdi lin... La ondoj de la lago Tiberiada, kiuj ofte bruis ĉe la batoj de la vento, silente disŝaŭmiĝis kontraŭ la barkojn starantajn ĉe la bordo, kun dolĉa teniĝo de respekto, kiam li aŭdigis siajn diajn instruojn en tiu kampa atmosfero! Ĉio kvietiĝis, kaj estis vidinda la ama rideto de la infanoj, en la milda lumo de liaj okuloj de paŝtisto de la homoj kaj de la Naturo...

“Laŭ mia granda deziro, mia bona Anna, mi adoptus ĉiujn tiujn malsatajn, ĉifone vestitajn knabetojn, kiuj aperadis en la popolaj kunvenoj en Kapernaŭm; tamen mia patrino intencas helpi tiujn malŝatatajn virinojn kaj tiujn infanojn en ĉifonaj vestoj, senprotekte vivantaj, ne povus realiĝi en ĉi tiu mondo... Malgraŭ tio, mi opinias, ke mi efektiviĝos la idealojn de mia animo, se Jesuo akceptos min en la lumon de sia regno...”

Aŭdante tiujn dolĉajn, emociajn korelverŝojn, la maljuna servistino ploradis kun premata animo.

Post longa paŭzo, Livia diris plu, kvazaŭ dezirante bone uzi siajn lastajn horojn:

– Anna – ŝi diris kun energia trankvileco –, ni ambaŭ estas vokitaj al la sankta pruvo de nia fido, en la nunaj horoj, kiuj devas esti gloraj por niaj spiritoj. Pardonu min, kara amikino, se mi iam ofendis vian koron per ia malpli konvena vorto. Antaŭ ol Simeon konfidis vin al mia gardo, mi jam vin sincere amis, kvazaŭ vi estus mia fratino aŭ mia filino mem!

La servistino ploradis konsternita, kaj Livia karese daŭrigis:

– Nun, mia kara, mi devas fari al vi lastan peton...

– Diru, sinjorino – murmuris la servistino, kun la okuloj plenaj de larmoj –, antaŭ ĉio, mi estas via sklavino.

– Anna, se ni vere devas hodiaŭ pruvi nian fidon, mi dezirus oferi min kun tia sama vesto, kian surhavas tiuj senprotektaj homoj, kiuj aŭdadis la diajn konsolojn ĉe Tiberiado. Se vi povos kontentigi min, hodiaŭ vestu vin per la togo de la patriciino, interŝanĝe kontraŭ la tuniko de la servistino! Mi dezirus partopreni en la ofero kun la modesta, malriĉa vesto de la plebo, ne tial, ĉar mi sentus min humiligita antaŭ la personoj samklasaj kiel mi, sed pro tio, ke, por ĉiam ŝirante de mi la lastajn privilegiojn de mia naskiĝo, mi donus al mia kristana konscienco la konsolon de la lasta ago de humileco... Naskiĝinte meze de la purpurajoj de la nobeleco (*), mi tamen dezirus iri en la regnon de Jesuo kun la simpla vesto de tiuj kiuj vivis en ĉi tiu mondo, baraktante en la dolora kirlego de la provoj kaj laboroj!

(* Purpuro estas la koloro, distinganta la plej altan nobelecon. – La Trad.

– Ho, sinjorino! – diris la servistino, hezitanta...

– Ne ŝanceliĝu, se vi volas havigi al mi la lastan ĝojon.

Konsiderante la sanktan intencon de tiu nobla virino, Anna ne povis rifuzi ŝian peton; en la duonombro de tiu angulo, kiu ilin apartigis de la samsortulinoj, ili rapide interŝanĝis togon kaj tunikon, kiuj estis ia speco de mantelo sur la komplika vestaro tiam uzata. La togon el delikatega lano, nun sur la korpo de la servistino, Livia ornamis per la diskretaj juveloj, kiujn ŝi ordinare kunportadis. Post la fordono de du altprezaj ringoj kaj de gracia braceleto, nur unu grandvalora ornamaĵo restis al ŝi; sed, glatigante la kolon per la mano kaj plej dolĉe karesante malgrandan kolĉenon, ŝi decidplena diris al sia kunulino:

– Nu, Anna, restas al mi nur ĉi tiu malgranda kolĉeno, de kiu pendas kameo kun altreliefa vizaĝofiguro de Publio, lia donaco en la jam malproksima tago de nia geedziĝo. Mi mortos kun ĉi tiu juvelo, kvazaŭ ĝi estus ia simbolo de la kuniĝo de miaj du amoj, nome mia edzo kaj Jesuo Kristo...

Anna senproteste akceptis ĉiujn elkorajn altrudojn de sia mastrino, kaj post kelkaj momentoj la aspekto de la malaltklasa servistino, kun sia antikva virga beleco, ricevis imponan majestecon, kvazaŭ ŝi estus ia impresa bildo el malnova eburo.

Preter la okuloj de la enkarcerigitoj premataj de terura maltrankvileco, malgraŭ la dolĉa interna lumo de la preĝo, kiu havigis al ili la netakseblan moralan kuraĝon por la ofero, la horoj de tiu tago pasadis pezaj, malrapidaj. Kun la rezignacianta heroeco de sia religia fervoro, Johano Kleofas sukcesis tenadi viva en ĉiuj koroj la varmon de la fido; en la flamenco de sia konfido al la Dia Providenco, kelkaj pli bravaj kredantoj provis kanti la kantojn mem pri spirita gloro, por la ekstrema momento de la martirigo.

En la palaco sur la monteto Aventino ĉiuj pli intimaj domanoj kredis, ke Livia troviĝas en la hejmo de sia filino; sed, iom antaŭ tagmezo, Flavia Lentulus venis al sia patro, por kisi lin antaŭ la festo.

Informite pri lia projekto restarigi la iaman hejman feliĉon per la plej klaraj publikaj elmontroj de konfido kaj amo al la edzino, Flavia, forte surprizante sian patron, deziris vidi sian patrinon, por manifesti sian pravan ĝojon.

Afliktita signo de demando tial vidiĝis sur ĉiuj vizaĝoj. De dudek kvin jaroj, tio estis la unua fojo, ke Livia kaj Anna restis ekster la hejmo tra tuta nokto, ĝis la sekvanta tago, kio naskis la plej kompreneblan timon.

La senatano sentis sian koron pikita de maltrankvilaj konjektoj, sed la sklavoj estis jam pretaj por konduki lin al la Senato, kie la unuaj ceremonioj estis komenciĝontaj posttagmeze, en la ĉeesto de Cezaro. Rimarkinte lian afliktiĝon kaj angoran rigardon, Flavia Lentulia penis trankviligi lin per jenaj vortoj, kiuj kaŝis, ŝian propran korprematecon:

– Iru trankvila, mia patro. Mi nun reiros al mia domo, sed mi nepre faros la necesajn klopodojn, ĉar, kiam vi posttagmeze revenos kun la krono de la triumfo, mi volas ĉirkaŭpreni vin kun la patrineto, inter la floroj de la vestiblo, por ke ni ambaŭ vin akceptu kun la petaloj de nia ĉiutaga, sindona amo.

– Jes, filino – respondis la senatano, iom afliktita –; la dioj konsentu, ke tiel estu, ĉar la hejmaj rozoj estos mia plej bona rekompenco!

Kaj enirinte en la portoseĝon, salutite de multe da amikoj, kiuj lin atendis, Publio Lentulus direktis sin al la Senato. Tie entuziasma popolamaso boladis de ĝojo, montrante sian dankon por la abunda disdonado de tritiko, per kiu la Romaj aŭtoritatuloj festis tian okazaĵon, kaj aplaŭdande la honoratojn per la tondra kriegado de la grandaj popolaj manifestacioj.

El la nobela politika domo, kie okazis la plej elegantaj turniroj de oratora arto, por laŭdo al la imperiestro, kaj sekvante la impresan figuron de Cezaro, kiu, iama komediisto, neniam flanke lasis la bruon pompon de la grandaj spektakloj, la senatanoj direktis sin al la fama Templo de Jupitero; tie la honoratoj estis ricevontaj la kronon el mirto kaj rozoj, kiel venkintoj, laŭ la inspiro de Seneko, kiu ĉion faris por forviŝi la malagrablan impreson de la kruela regado de la ekdisĉiplo; kaj tamen ĉi tiu dekretis lian morton en la jaro 66. En la Templo de Jupitero la granda komediisto, kia estis Domicio Nerono, kronis la frunton al pli ol cent senatanoj de la Imperio, sub la konvencia beno de la pastroj; kelkajn seninterrompajn horojn daŭris la ceremonio, en sia komplika religia formo. Nur post la tria horo posttagmeze tiu grandega homamaso eliris el la templo, direkte al la Granda Cirko. La densa irantaro, kun solena aspekto, malofte vidita en Romo dum la postaj jarcentoj, direktis sin unue al la Forumo, kiun la supermezura popolamaso plej respektive trapasis.

Por klarigo al la legantoj, ni nun donu palan bildon de la mirinda sekvantaro, konforme al la grandaj publikaj ceremonioj en tiu tempo.

Antaŭe iris belega, lukse ornamita veturilo, kie mole sidis la imperiestro, sekvata de multenombraj aliaj veturiloj kun la honorataj senatanoj kaj ties preferataj korteganoj.

Ĉe unu el siaj plej karaj favoratoj, Domicio Nerono en sia ruĝa vesto de venkinto, fiere paradis per la tranĉanta lukso, kiu karakterizis liajn manierojn.

Tuj poste, granda grupo da dekkvinjaraj junuloj, rajdantaj aŭ irantaj piede, eskortis la ĉefajn veturilojn.

Ilin sekvis la bigoj, la kvadrigoj kaj la sejuĝesoj (*), kiuj estis ĉaroj tirataj, respektive, de du, kvar kaj ses ĉevaloj, por la frenezaj emocioj de la tradiciaj vetkuradoj.

(*) El la latina vorto “seiuges”: ĉaroj tirataj de ses ĉevaloj. – La Trad.

Poste, preskaŭ nudaj, la atletoj, farontaj ĉiujn grandajn kaj malgrandajn ludojn en tiu posttagmezo kaj sekvataj de la tri klasikaj ĥoroj de dancistoj: la unua konsistis el plenaĝuloj, la dua el plaĉaspektaj junuloj, kaj la tria el graciaj infanoj, ĉiuj kun skarлата tuniko, streĉita per kupra zono, glavo ĉe la flanko kaj lanco en la mano, krom, plej reliefe, bronza kasko ornamita per plumtufoj kaj kokardoj, kiuj kompletigis ilian ekstravagancan vestmanieron. Tiujn dancistojn sekvis muzikistoj, sin ritme movantaj kaj ludantaj militdancojn, sub la sono de eburaj harpoj, mallongaj flutoj kaj multenombraj liutoj.

Post la muzikistoj venis, kvazaŭ ia bando da nigraspektaj histrionoj, la Satirusoj kaj la Silenoj, strangaj personoj kun timigaj maskoj kaj kovritaj per kaprofeloj, sub kiuj ili faris la plej terurajn gestojn, en tia maniero, ke ili ekscitis ridegadon de la ĉeestantoj pro siaj vere ridindaj, frenezaj tordiĝoj. La gajigistojn sekvis ankoraŭ grupoj da muzikistoj, akompanataj de pluraj duarangaj pastroj de la kulto al Jupitero kaj aliaj dioj; tiuj pastroj portis en la manoj grandajn vazojn, similajn al iaj parfumbruliloj el oro kaj arĝento, el kiuj spirale turniĝis ebriigaj nuboj el incenso.

Post la pastroj iris, kun altprezaj ornamoj el oro kaj gemoj, statuoj de la multenombraj dioj, por unu momento prenitaj el siaj luksaj, kvietaj temploj. Ĉiu statuo, kun sia simbola esprimo, estis akompanata de siaj kultantoj aŭ de siaj diversaj pastraj kolegioj. Ĉiuj statuoj estis parade kondukataj en veturiloj el eburo aŭ arĝento, tirataj de imponaj ĉevaloj kaj delikate direktataj de nobelaj knaboj, aĝantaj dek ĝis dek du jarojn kaj havantaj patron kaj patrinon vivantajn; tiujn veturilojn respekte eskortis la patricioj plej eminentaj en la granda urbo.

Ĉio tio estis rava spektaklo de oraj kronoj, purpuraĵoj, luksaj teksaĵoj el Oriento, brilaj metaloj, lumbriloj de multekostaj ŝtonoj.

Fermis la marŝon la lasta aro da pastroj kaj religiaj helpantoj, kiujn sekvis la grandega amaso de la anonima, nekonata popolo.

La supermezura irantaro penetris en la Grandan Cirkon kun profunda respekto, konforme al la plej altaj solenoj. La silenton rompadis nur la partaj aklamoj de la pluraj grupoj da homoj, ĉe la preterpasado de la statuo de la dio, protektanta iliajn laborojn kaj profesion, en la ordinara vivo.

Post solena rondirado en la interno de la Cirko, la silentaj eburfiguroj estis metitaj en la niĉon, apud la Karceroj, sub la lumbrila pavilono de la imperiestro; tie nobeloj kaj plebanoj faris siajn preĝojn kaj oferojn, dum Cezaro kaj liaj korteganoj, en akompano de la politikistoj, honorataj en tiu tago, malsobre kaj seninterrompe drinkadis.

Post tiuj ceremonioj rompiĝis la respekta silento de la popolo.

Tiam komenciĝis la ludoj antaŭ la avidaj okuloj de pli ol tricent mil spektatoroj, kiuj ne konsistis nur el la densaj amasoj, kunpremiĝe sidantaj en la grandioza amplekso de la luksa amfiteatro: ankaŭ la palacoj sur Aventino kaj Palatino, kaj la elegantaj terasoj sur la monteto Celio, servis kiel benkoj al la multenombra

vidantaro, kiuj ne povis de pli proksime ĉeesti la eksterordinaran spektaklon.

Romo amuziĝadis, kaj ĉiuj klasoj estis ravitaj.

La unua programero estis la vetkuroj de la ĉaroj, sed la entuziasmaj aplaŭdoj eksplodis nur tiam, kiam mortis la unuaj kondukintoj kaj ties ĉevaloj, disfrakasitaj sur la areno.

La ludistoj distingiĝis inter si per la koloroj de siaj tunikoj. Reprezentante malsamajn partiojn, iuj surhavis veston ruĝan, aliaj bluan, blankan aŭ verdan, kaj la ĉeestantoj dividiĝis en flamantajn, freneziĝintajn grupojn. La admirantoj kaj anoj de ĉiu partio pasie kriegadis, esprimante sian ĝojon, sian timon, sian angoron aŭ sian senpaciencon. Kiam finiĝis tiu unua parto de la programo, okazis bedaŭrindaj scenoj de batalado inter la kontraŭuloj de tiu aŭ alia partio, meze en la grandega ĉeestantaro; el tio rezultis gravaj tumultoj, tuj degenerintaj en kriman furiozecon, post kiu kelke da kadavroj estis forprenitaj el la areno.

Post la vetkuroj efektiviĝis abomena ĉasado, teruraj bataloj inter homoj kaj sovaĝaj bestoj, kie kelke da junaj sklavoĵoj perdis la vivon en tragediaj cirkonstancoj, antaŭ la tondra akklamado de la malsaĝa popolamaso.

La imperiestro ridetadis kontenta kaj trankvile drinkadis plu, kune kun kelkaj pli intimaj amikoj. Ses harpistoj ludis liajn preferatajn melodiojn en la pavilono, dum ankaŭ la liutoj aŭdigis siajn dolĉajn, klaran sonojn.

Sekvis aliaj ludoj – diversaj, amuzaj kaj teruraj –, kaj, post strangaj dancoj sur la areno, unu kortegano, referata de Domicio Nerono, diskrete kliniĝis kaj flustris en lian orelon:

– Venis la momento, ho Aŭgusto, de la granda surprizo de la ludoj en ĉi tiu tago!

– Ĉu la kristanoj venos nun en la arenon? – mallaŭte demandis la imperiestro, kun sia senkompata, malvarma rideto.

– Jes, estas jam ordonite, ke la dudek afrikaj leonoj estu liberigitaj en la arenon, tuj kiam la kondamnitaj aperos antaŭ la publiko.

– Bela honoro al la senatanoj! – Nerono sarkasme komentariis. – Ĉi tiu festo estis feliĉa ideo de Seneko, ĉar mi havos la oportunan okazon montri al la Senato, ke la leĝo estas la forto kaj ke la tuta forto devas ja kuŝi en miaj manoj.

Kiam nur nemultaj minutoj restis por la prezentado de tiu surpriza punkto de la programo en tiu tago, Klodio Varrus konsilis al unu el siaj fidindaj helpantoj:

– Aton – li diris per serioza tono –, vi povas nun ordoni irigi ĉiujn malliberulojn sur la arenon, sed diskrete apartigu iun virinon en patricia togo. Lasu ŝin la lasta kaj tuj forkonduku ŝin sur la straton, ĉar ni ne deziras embarasojn kun ŝia familio.

La soldato faris signon, ke li bone komprenis la ricevitan ordonon kaj do pretiĝis, por ĝin fidele plenumi; post kelkaj momentoj, la grandnombra grupo da kristanoj, sub la insultoj kaj mokfajfado de la plej malaltrangaj servistoj en la Cirko, brave paŝis al la ofero...

La unua iris Johano Kleofas, murmurante sian lastan preĝon.

Sed, en la momento, kiam estis malfermota la kradita pordo, tra kiu estis aŭdataj la minacaj blekoj de la malsataj bestoj, Aton alproksimiĝis al Anna kaj, rimarkinte ŝian altkvalitan lanan togon, la diskretajn juvelojn, kiuj ornamis ŝian nobeliĝintan figuron, kaj la delikatan oran plektaĵon, kiu gracie entenis ŝiajn harojn, respekte diris, mirante la majestecon de ŝia aspekto:

– Sinjorino, vi restos ĉi tie, ĝis posta ordono!

La maljuna servistino de la familio de Lentulus direktis esprimoplenan, angoran rigardon al sia mastrino, sed respondis kun serena fiero:

– Sed, kial? Ĉu vi pretendas malhelpi, ke mi havu la gloron de la ofero?

Aton kaj liaj kolegoj estis surprizitaj de tia ago de profunda spirita heroeco; post momento da dubo, kiu esprimis lian heziton pri la respondo, kiun li devos doni, Aton respekte klarigis:

– Vi estos la lasta!

Tia klarigo laŭŝajne kontentigis ŝin, sed Livia kaj Anna, en tiu decida momento de disiĝo, interŝanĝis aman, afliktitan, neforgeseblan rigardon.

Sed ĉio daŭris nur kelke da sekundoj, ĉar la pordo al ilia pereco troviĝis nun malfermita kaj la minacaj armiloj de la subuloj de Domicio Nerono devigis la maliberulojn paŝi sur la arenon, kvazaŭ aro da homoj, kondamnitaj al la teruro de la morto.

La respektinda Antiokia apostolo, kun brava sereneco, marŝis ĉe la kapo de la irantaro. Lia koro per sinceraj, fervoraj preĝoj altiĝis al la senlima spaco. Post kelkaj momentoj ĉiuj malliberuloj staris kune ĉe la enirejo de la areno, penetritaj de ia morala forto, kian ĝis tiam ili ne konis. Ĝi venis de tio, ke malantaŭ tiuj luksaj purpurajojn kaj trans tiuj akrasonaj ridoj kaj teruraj insultoj troviĝis legio da ĉielaj senditoj revigligantaj la spiritan energion de tiuj homoj, spertontaj malhonoran morton por priverŝi la semon de Kristanismo per siaj fruktoportaj larmoj. Ia luma vojo, nevidebla pro la mortemaj okuloj, estis malfermita en la hela ĉielo, kaj laŭ ĝi malsuprenvenis tuta armeo da ĉefanĝeloj de la Dia Majstro, por kroni per la beno de lia gloro la noblajn laborantojn por lia afero.

Ĉe la freneza, tondra aplaŭdado de la grandega popolamaso estis liberigitaj la malsataj leonoj por la indigniga sceno de krueleco, teruro kaj sango; neniu el tiuj nekonataj apostoloj, mortontaj en la diboĉa festeno de Nerono, sentis tamen la angorojn de tia timiga morto, ĉar, en la turmenta momento, la milda balzamo de la diaj potenculoj kvietigis iliajn suferantajn kaj disŝiritajn korojn.

Skurĝataj de la angoro kaj afliktiĝo de tiu lasta momento, antaŭ la sangavida publiko, la kompatindaj kondamnitaj neniom da tempo havis por kolektiĝi sur la areno de sia ofero. Ŝajnis, ke la malsataj bestoj estas instigitaj de terura senpacienco. Kaj dum estis disŝirataj mizeraj korpoj, Domicio Nerono ordonis, ke ĉiuj ĥoroj de dancistoj kaj ĉiuj muzikistoj festu la spektaklon per la kantoj kaj dancoj de la venkanta Romo.

Inkluzive de la granda vidantaro, dense staranta sur la montetoj, preskaŭ duonmiliono da personoj vibradis per bruegaj, abomenaj aplaŭdoj, dum du centoj da homoj por ĉiam falis dispecigitaj...

Veninte en la arenon, Livia genuiĝis fronte al la granda, luksa pavilono de la imperiestro, kie ŝi penis vidi, je la lasta fojo, sian edzon; ŝi dezirus gardi en la profundo de sia animo la doloran esprimon de tiu lasta bildo, apud la bildo de Jesuo Krucumita, kiu plenigis per serenaj emocioj ŝian malfeliĉan koron, disŝiritan en la ekstrema minuto. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi neklare vidas, en la dolĉa lumo de la krepusko, la rekte starantan figuron de la senatano kronita per rozoj, kiel la venkintoj; sed, kiam ŝiaj lipoj apenaŭ malfermiĝis, por murmuri ian lastan preĝon, kun kiu konfuziĝis ardaĵaj larmoj, ŝprucantaj el ŝiaj okuloj, ŝi vidis sin subite envolvita en la sovaĝaj piedoj de ia monstro. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi ricevis malfortan baton, kaj nun ŝi estas lulata de iaj brakoj el travidebla nebulo, kiujn ŝi rigardis tre surprizita. Ŝi penis certiĝi pri sia situacio en la Cirko kaj rekonis, starantan apud ŝi, la noblan figuron de Simeon, kiu ĉarme ridis al ŝi kaj havigis al ŝi la silentan, dolĉan certecon, ke ŝi jam transpaŝis la sojlon de la Eterno.

En tiu momento, en la loĝio de la imperiestro, Publio Lentulus sentis en la koro neesprimeblan premon. En la kirlego de tiu freneza kriegado, la senatano neniam antaŭe spertis tian profundan senkuraĝecon, tian amaran disreviĝon pri la vivo. Nun tiuj sovaĝaj spektakloj de homa buĉado teruregis lin. Ne povante klarigi kiel, lia penso reiris al la malproksima Galielo kaj kvazaŭ vidis denove la dolĉan figuron de la Nazareta Mesio tiam, kiam la profeto asertis al li: “Ĉiuj povoj de via Imperio estas tre malfortaj kaj ĉiuj ĝiaj riĉaĵoj estas tre mizeraj...”

“Kliniĝante al sia amiko Eŭfanilo Drusus, Publio diskrete ellasis sian pezan impreson, dirante:

– Mia amiko, ĉi tiu hodiaŭa spektaklo teruras min! Mi ĉi tie sentas premantajn emociojn, kiajn mi neniam antaŭe spertis dum mia tuta vivo... Ĉu tiuj estas sklavoj kondamnitaj la morto, kiuj nun falas sub la krueleco de la krudaj karnavidaj bestoj?

– Mi ne kredas – respondis senatano Eŭfanilo, frustrante en lian orelon. – Kuras la famo, ke tiuj mizeraj kondamnitaj estas kompatindaj, senmalicaj kristanoj, arestitaj en la katakomboj!

Ne sciante klarigi al si la motivon de sia profunda malĝojo, Publio Lentulus subite pensis pri Livia kaj afliktite enprofundiĝis en la plej amarajn konjektojn.

Dum tiuj faktoj okazadis, ni revenu, por vidi la situacion de Anna, tuj post la iro de ŝiaj kunuloj en la arenon de la martirigo. Certa, ke Jesuo rezervis por ŝi la lastan lokon en la dolora momento de ŝia ofero, la malnova servistino tenis sian noblan spiriton en sincera, varma preĝado; sed ŝiaj okuloj ne dekliniĝis de la figuro de Livia, kiu direktis sin al angulo de la areno, kie ŝia mastrino genuiĝis kaj eĉ fikse rigardis la grandan Afrikan leonon, kiu donis al sia viktimo fatalan baton ĉe la brusto. En tiu momento, la kompatinda Anna sentis ian malvigliĝon, ĉe la terura perspektivo de sia propra atesto, sed en palpebruma daŭro, antaŭ ol ŝiaj ideoj prenis alian direkton, Aton kaj unu el liaj kolegoj alproksimiĝis kaj ekkriis:

– Sinjorino, akompanu nin!

Rimarkinte, ke la soldatoj igis ŝin reiri en la internon de la malliberejo, ŝi energie protestis:

– Soldatoj, mi nenion deziras, krom ankaŭ morti, en ĉi tiu horo, por la fido al Jesuo Kristo!

Sed, konstatinte ŝian nebrideblan kuraĝon, la komisiito de la Imperio ŝin forte prenis ja la brako kaj, treninte ŝin al la koridoro en la interno de la Karceroj, kondukantaj al la strato, Aton preskaŭ minace ekkriis:

– Foriru virino! Rapidu for, ĉar ni ne volas embarasojn kun via familio!

Kaj tion dirinte, li fermis la grandan pordon, dum la malnova servistino de Livia ĉion nun komprenis. Afliktita, ŝi tuj konkludis, ke la vesto de ŝia mastrino savis ŝian vivon en la dolora momento. Ŝia ploro estis ja ia miksaĵo el neesprimeblaj moralaj suferoj, kaj ŝi demandis sin mem, kial la Sinjoro ne allasis ŝin al la glorigo de la oferoj, en tiu memorinda, dolora posttagmezo.

Ŝi aŭdis la konfuzan bruon de tricent mil voĉoj, kiuj kuniĝis en tondrajn aplaŭdajn kriojn, aklamante la teruregan kuradon de la sovaĝaj bestoj, ĉasantaj homojn; tiam, paŝo post paŝo, kunportante la turmentan pezon de supermezura angoro, ŝi direktis sin al la palaco sur Aventino, ne tre malproksima de la abomeninda Cirko, kaj tien eniris frakasita kaj silenta.

Nur kelke da pli intimaj sklavoj gardis la hejmon de Lentulus, kiel ordinare en la grandaj tagoj de popolaj festoj, en kiuj partoprenis ĉiuj servistoj. Neniu rimarkis la revenon de la servistino, kiu sukcesis demeti la togon kun la necesa trankvileco. Ŝi forprenis la multekostajn juvelojn de la vesto, de la manoj kaj de la haroj, kaj, falinte sur la genuojn, lasis, ke la doloraj larmoj libere elfluu, instigitaj de la amaraj preĝoj, kiujn ŝi altigis al Jesuo, sub la pezo de siaj profundaj ĉagrenoj.

Ŝi ne faris al si ideon, kiom da minutoj ŝi restadis en tiu humila, dolora teniĝo, baraktante en ardaĵoj kaj amaraj konjektoj pri sia neatendita forigo for de la turmentoj en la Cirko, sentante sin neinda pruvi al la Savinto sian profundan, sinceran fidon, ĝis ia pli forta brueto estis pro ŝi signo, ke la senatano revenis en la domon.

Estis preskaŭ vespero, kaj la unuaj steloj jam brilis sur la blua, ĉarma ĉielo super Romo.

Penetrante en sian hejmon kun maltrakvila kaj senkuraĝa spirito, Publio Lentulus eniris en la senhoman vestiblon; tiam iris tuj al li la servisto Fabio Tullo, kiu, de multaj jaroj, anstataŭis Komenion, forprenitan de la morto en tiu konfidofico.

La senatano eniris sola, adiaŭinte al siaj amikoj, sub la preteksto, ke lia edzino estas grave malsana; la malnova servisto, alproksimiĝinte, respekte diris:

– Sinjoro, via filino sendis komisiiton por komuniki, ke ŝi daŭrigas siajn klopodojn, por ke vi ricevu informojn pri la mastrino kiel eble plej baldaŭ.

La senatano dankis per apenaŭ rimarkebla kapsigno kaj sentis pligrandigitaj siajn amarajn zorgojn.

Sola kun siaj preĝoj, en la ĉambro por ŝi destinita, Anna konstatinte la revenon de sia mastro, tiam sentis la korŝiran devon, kiu ŝin koncernis en tiu neforgesebla momento, sciigi lin pri ĉiuj okazintaĵoj; tial, post nemultaj minutoj Fabio reiris al li, por komuniki, ke Anna petas de li privatan intervidiĝon. Prenita de neesprimebla surprizo, la senatano tuj akceptis la malnovan servistinon de sia domo.

Kun okuloj ŝvelintaj de plorado kaj la voĉo ofte rompata de akraj emocioj, Anna rakontis ĉiujn faktojn, preterlasinte neniun detalon de la tragediaj pasaĵoj, dum la senatano, kun larĝe malfermitaj okuloj kaj konfuzita en nekredemo kaj frakasa mirego, plej penis kompreni tiujn dolorajn konfidencojn.

Post tiu terura raporto, malvarma ŝvito ekfluadis el lia turmentata frunto kaj liaj tempioj timegige pulsadis.

En la komenco, posedita de la unuaj sentoj de indigno de sia fiero kaj de sia vantamo, li deziris dispremi la modestan servistinon, same kiel li tion farus al iu venena vipuro. Li ne inklinis kredi tiun teruran, pezan raporton, sed lia koro rapide batis kaj liaj nervoj en ekzaltiteco dolore vibiris.

Publio Lentulus spertis la plej profundan doloron en sia malfeliĉa ekzistado. Ĉiuj liaj revoj, ĉiuj liaj aspiroj kaj dolĉaj esperoj amare, senrimede, por ĉiam dispulvoriĝis sub la frakasanta lavango de la nigra realo.

Sentante sin la plej kompatinda akuzito antaŭ la tribunalo de la dioj, en la momento, kiam li kredis, ke li atingos sian plej grandan feliĉon, li jam nenion vidis krom la eldetruanta realo de sia senlima doloro.

Sub la emociita rigardo de Anna, kiu timplena lin observis, li ekstaris rigida kaj senlarma, kun strange, dolore senmovaj okuloj, preskaŭ freneza; kaj kvazaŭ ia fantomo de nedifineblaj indigno, doloro, venĝemo kaj sufero, nenion respondinte al la konsternita servistino, kiu silente petegis Jesuon kvietigi lian korŝiran ĉargrenon, li aŭtomate faris kelkajn paŝojn direkte al la pordo; tiam li ĝin malfermis en la plena largho, kaj tra ĝi envenis la dolĉaj, malvarmetigaj ventetoj de la nokto...

Vundite de kruela doloro, li ŝanceliĝe trairis la peristilon, sed poste iris decide, kvazaŭ duelonte kontraŭ la ombroj, por defendi sian kalumniitan, perfiditan edzinon, martirigitan de la krimuloj de tiu abomena kortego; ne atentante la malordon de sia vesto, li rapide direktis sin al la Cirko, kie la plebo sin donadis al la lastaj elverŝoj de la fiaj pasioj de sia nehumana imperiestro.

Sed pli terura spektaklo montriĝis al liaj malserenaj okuloj, en la soleco de lia ekstrema morala angoro. Tute poseditaj de la brutaj instinktoj de sia malica materialeco, la soldatoj kaj la popolo metis la restaĵojn el la monstra festeno de la sovaĝaj bestoj, en tiu neforgesebla tago, sur la suprojn de fosto kaj kolonoj improvizitaj kiel torĉoj, kaj lumigis la tutan ĉirkaŭaĵon de la Granda Cirko per la naŭza brulado de fragmentoj de homa karno.

Antaŭ tia grandega elmonro de hororo kaj krueleco, Publio Lentulus eksentis la tutan amplekson de sia senpoveco; sed, ŝanceliĝante de doloro, li iris plu, kvazaŭ ebria aŭ freneza, mirigante la homojn, kiuj vidis lin piediranta en tia loko, konsternite rigardante tiujn funebrajn torĉojn el senformaj ardantaj kapoj.

Kiam li donadis liberan kuron al siaj doloraj pensoj de angoro kaj indigno, kvazaŭ lia spirito estus nenio alia, ol ia tigro enŝlosita en lia malvigliginta brusto, li ekrimarkis du ebriajn soldatojn, kiuj interdisputis pri delikata objekto; ĉi tiu subite turnis al si lian atenton, kvankam li ne sukcesis klarigi la motivon de sia subita intereso por ia ajn afero.

Ĝi estis malgranda kolĉeno el perloj, de kiu pendis altvalora kameo. Liaj okuloj fiksiĝis sur tiu stranga objekto kaj lia koro divenis la reston de la historio. Li estis ĝin rekoninta: tiun juvelon li donacis al sia amata edzino en la tago de ilia geedziĝo, kaj nur nun venis en lian menson la kora alligiteco de Livia al la kameo, kiu konservis lian junulan vizaĝofiguron kiel memorigaĵon el la sola amo en ŝia juneco.

Li venis antaŭ la interdisputantojn, kiuj tuj prenis respektan teniĝon pro lia ĉeesto. Severe alparolite, unu el la soldatoj humile kaj tremante klarigis:

– Klera Moŝto, ĉi tiu juvelo apartenis al unu el la virinoj, kondamnitaj kaj ĵetitaj al la sovaĝaj bestoj, dum la hodiaŭa spektaklo...

– Kiom vi deziras por la trovitaĵo? – malgaje demandis Publio Lentulus.

– Mi aĉetis ĝin de iu kamarado por du sestercoj.

– Donu ĝin al mi! – diris la senatano per minaca, ordonta tono.

La soldatoj humile donis al li la kolĉenon, kaj, traserĉinte sian veston, la senatano elprenis pezan saketon plenan de ormoneroj, kiun li, kun naŭzo kaj profunda malŝato, ĵetis al la kverelantoj.

Publio Lentulus foriris de tiu malbeninda loko, apenaŭ retenante la larmojn, kiuj nun torente elŝprucis el lia premata, disŝirita koro.

Tenante ĉe la brusto tiun malgrandan ornamajon, li estis kvazaŭ posedita de ia mistera forto. Ŝajnis al li, ke konservante tiun lastan pecon de la tualetto de sia edzino, li ĉe si kaj por ĉiam gardas ion el ŝia persono kaj koro.

For de la lumoj, malgaje heligantaj la straton laŭ ties tuta longo, la senatano prenis ombran strateton. Post kelke da paŝoj li rimarkis, ke antaŭ li staras ĝiganta arbo, kiu, majesta kaj foliriĉa, poeziigis tiun pejzaĝon. Ŝancelitante kaj avidante ripozon kaj konsolon, li apogis sin al ĝia grandega trunko, li rigardadis la stelojn, kiuj ornamis per dolĉaj trembriloj la tutan ĉielon super Romo, kaj konsideris, ke, en tiu momento, la purega animo de la edzino certe ripozas en la dolĉa paco de la ĉiela lumo benata de la dioj...

Per spontanea ekmovo li kisis la malgrandan kolĉenon kaj ĝin ame premis al la koro; kaj, konsiderante la akran dezerton de sia vivo, li ploris kiel neniam antaŭe, en ia ajn dolora cirkonstanco de sia tumulta ekzistado.

El profunda ekzameno de sia tuta amara pasinteco, li konkludis, ke ĉiuj liaj noblaj aspiroj estis mokitaj de la dioj kaj de la homoj. Pro sia malfeliĉa fiero, li pagis al la mondo la plej pezajn tributojn per angoro kaj doloraj larmoj, kaj, pro sia homa vantamo, li ricevis de la destino la plej akrajn humiligojn. Tro malfrue li konsideris, ke Livia ĉion faradis por lin feliĉigi, en simpla, senluksa vivado, en kiu amo ridetis. Li rememoris la plej negravajn okazaĵojn de la dolora pasinteco, kvazaŭ lia spirito farus zorgan dissekcadon de ĉiuj siaj revoj, esperoj kaj iluzioj, en la densa nebulo de la tempo.

Kiel viro, li vivis alkroĉita al la ŝtataj aferoj, kiuj deturnis lin de la plej ĉarmaj plezuroj de la hejma vivo; kiel edzo, li ne havis energion sufiĉan, por sin gardi kontraŭ la insidaj kalumnioj; kaj, kiel patro, li rigardis sin kiel la plej malfeliĉan el ĉiuj. Kiel utila do al li estas la krono de la triumfo, se ĝi estis tiel amara, kiel ia netrinkebla vermut-kaliko? Kian profiton al li donis la politikaj venkoj, la socia signifo de la nobeltitoloj, la altega valoro de lia riĉeco, sub la senindulga mano de lia kruela destino en ĉi tiu mondo?

Perdiĝis liaj pensoj en profundaj abismoj da ombro kaj amaraj duboj, kaj jen aperis antaŭ lia turmentata penso la milda figuro de la dia profeto el Nazaret, kun la nedetruenda riĉaĵo de sia paco kaj de sia humileco.

Meze en siaj rememoroj, li havis la impreson, kvazaŭ li aŭdas ankoraŭ la eksterordinarajn admonojn, kiujn tiu profeto faris al li per karesa kaj kompatema voĉo, apud la murmuranta akvo de Tiberiado. Forte rememorante Jesuon, li sentis sin kaptita de torento da doloraj larmoj kiuj efikis kiel ia balzamo sur la

dezerton de lia koro. Genufleksinte sub foliriĉa kaj akceptema arbo, kiel li iam faris en Palestino, kun la okuloj malsekaj de ploro kaj la penso turnita al la morala forto, kiun la kristana doktrino havigis al la koro de lia edzino, kiu per ĝi sin spirite nutradis, por digne kaj heore ricevi ĉiajn suferojn, li ekkriis al la ĉielo:

– Jesuo el Nazaret! – li diris per petega, dolorplena voĉo – mi devis ja perdi la plej bonan kaj plej karan el ĉiuj miaj trezoroj, por memori la enhavon kaj dolĉecon de viaj paroloj! Mi ne scias kompreni vian krucon kaj ankoraŭ ne scias akcepti vian humilecon laŭ mia homa sincereco; tamen, se vi povas vidi la grandecon de miaj vundoj, venu ankoraŭfoje helpi mian abomenan kaj malfeliĉan koron!

Amara fluado de larmoj sekvis tiun alvokon, diritan per kruda, ataka, dolora malkaŝemo.

Ŝajnis tamen al li, ke ia nedifinebla, subtilega energio nun helpas lin travivi tiun krizon.

Post la petego, ŝprucinta el la profundo de lia disŝirita animo, la fiera patricio eksentis, ke neklarigebla forto, en tiu neforgesebla momento, ŝanĝis ĉiujn plej internajn inklinojn de lia koro; tenante sin ankoraŭ surgenu, li rimarkis, per la vidpovo de sia spirito, ke ĉe li ekaperas ia luma punkto, kiu mirige disetendiĝis en la dolora sereneco de tiu malfacila momento de lia vivo; li sentis surpriziĝon pro tia fenomeno, kiu naskis en lia menso plej neatenditajn konjektojn.

Fine, tiu luma amaso prenis formon kaj li vidis, starantan antaŭ li, la radiantan figuron de Flaminio Severus, kiu venis paroli al li en tiu tumulto de lia supermezura ĉagreno.

Plena de surprizo kaj miro, Publio rekonis lin per la identeco de liaj fizionomiaj trajtoj kaj de lia amika saluto, kian li faris al la senatano, sur la Tero. Lia miemo estis la sama, kun sia dolĉa esprimo de sereneco, kiun nun ombris malgaja, amara rideto. Li portis la saman togon kun purpura randaĵo, sed ne montris la militistan, imponan aspekton, kian li havis dum sia surtera vivo. Flaminio rigardadis Publion, kvazaŭ posedita de grandegaj kompatoj kaj amareco. Liaj penetrantaj okuloj de Spirito esploradis la plej kaŝitajn angulojn de la konscienco de la senatano kaj dume ĉi tiu trankviliĝis en respekta teniĝo, kortuŝita kaj perpleksa.

– Publio – dolĉe parolis al li la amika voĉo de la fantomo –, ne koleru pro la plenumo de la Diaj decidoj, kiu hodiaŭ modifis ĉiujn planojn de via vivo! Aŭskultu min atente! Mi parolas al vi same sincere kaj kun tiu amo, jam de multaj jarcentoj interliganta niajn korojn. Antaŭ la figuro de la morto nia vantamo tute disfumiĝas... en ĝia superbela lumeco; niaj surteraj povoj estas rompiĝemaj kiel sapvezikoj... La fiero, ho amiko mia, malfermas al ni, trans la tombo, pardonon al densa ombro, kie ni perdiĝas en la reto el nia egoismo kaj nepentemo! Reiru en vian hejmon kaj, serene kaj kun spirita braveco, trinku la amaran likvoron el la pokalo de la akraj provoj, ĉar ankoraŭ multo mankas, por ke vi eltrinku la lastan guton el la kaliko de viaj purigaj suferoj... La grandaj doloroj, kontraŭ kiuj ekzistas neniam rimedoj en la mondo, ja malfermos al via racio novan vojon sur la eternaj kampoj de la kredo. Niaj dioj estas esprimoj de respektinda, pura fido, sed Jesuo el Nazaret estas la V oĵo, la V ero kaj la Vivo! Dum niaj iluzioj pri Jupitero pelas nin al donado de honoro al la plej potencaj kaj al la plej fortaj, kiujn oni konsideras kiel preferatajn de niaj dioj pro la sonora signifo de iliaj riĉaj oferoj, la altvaloraj instruoj de la Nazareta Mesio admonas nin pri la nenieco de niaj falsaj povoj en ĉi tiu mondo, tenante en siaj brakoj la plej malriĉajn kaj la plej malfavoritajn de la sorto; tiel, ili kvazaŭ invitas ĉiujn homojn sur la vojon al tiu regno, konkerata per la sinofero kaj penado de ĉiu estulo, direkte al la sola reala vivo – la vivo de la Spirito... Hodiaŭ mi scias, ke vi unu tagon preterlasis vian plej bonan oportunon; tamen la Filo de Dio Ĉiopova, per siaj senlimaj kompatemo kaj amo, aŭdas nun vian peton, permesante ke mia malnova

amikeco venu verŝi ian balzamon sur la dolorajn vundojn de via turmentata koro!

La senatano lasis, ke lia penso perdiĝu en la bolanta rivero de la larmoj plej sanktaj en lia tuta vivo. Sufokita en la ĝemoj de sia kortuŝiteco, li mense petegis:

– Jes, mia amiko kaj mia majstro, mi volas kompreni la veron kaj ardas por la pardono je miaj grandegaj eraroj! Flaminio, inspiro de mia disŝirita animo, estu mia gvidanto en la uragana nokto de mia nigra destino! Helpu min per via saĝo kaj boneco! Reprenu min je la mano kaj heligu al mi la koron sur la malluma vojo! Kion mi faru, por de la ĉielo ricevi la forgeson pri miaj eraroj?

Kvazaŭ forte emociita, aŭdinte tian peton, la serena vizio havis nun la okulojn prilumataj de kompata, dia larmo.

Ne povante kompreni, kiel fariĝas tia stranga fenomeno, Publio rimarkis, ke la figuro de lia amiko iom post iom disfandiĝas en la ombro kaj foriĝas de la ekrano de lia spirita rigardo; malgraŭ tio, li tamen perceptis, ke la lipoj de Flaminio kompate murmuris unu vorton:

– Pardonu!

Tiu milda rekomendo falis sur lian animon kvazaŭ ia dolĉefika balzamo. Li tiam sentis, ke liaj okuloj estas malfermitaj por la materiaj realaĵoj, lin ĉirkaŭantaj, kvazaŭ li estus vekiginta el ia edifa dormado.

Li sentis sin iom liberigita el siaj profundaj doloroj kaj stariĝis, por decide kaj brave repreni la pezan ŝarĝon de la surtera ekzistado.

Reveninte hejmen je ĉirkaŭ la deka horo vespere, tie li trovis Plinion kaj Flavian, kiuj afliktitaj lin atendis.

Vidante lian fizionomion profunde konsternita kaj aliiĝinta, lia filino kun premata koro lin ĉirkaŭbrakis, sub la impeto de neesprimebla karesemo, kaj plorante ekkriis:

– Mia patro, mia kara patreto, ĝis nun ne prosperis al ni ekhavi ian ajn sciigon.

Sed Publio Lentulus fiksas siajn infanojn per malgaja, elreviĝa rigardo kaj ilin silente ĉirkaŭprenis. Tuj poste, li vokis ilin en sian privatan kabineton, kien li venigis ankaŭ Annan; tiam, la kvar homoj, en familia konversacio, emocie ekzamenis la neforgeseblajn okazintaĵojn dum tiu tago plena de kruelaj provoj

Laŭgrade kiel la senatano transiradis al siaj infanoj la ĉagrenajn sciigojn de Anna, kiu forte kortuŝita akompanis liajn vortojn, Flavia kaj ŝia edzo klare montris sur la vizaĝo la plej strangajn kaj intensajn emociojn, sub la prema impresado de tiu rakonto.

Kiam finiĝis la detala raporto, Plinio Severus, ŝvelinte de senpripensa fiero, ekkriis:

– Sed, ĉu ni ne povus ĵeti la tutan kulpon pri tiuj faktoj sur ĉi tiun malŝatindan virinon, jam de tiom de jaroj nedigne servantan en via domo?

Tiel parolante, la oficiro montris per la fingro la servistinon; Anna humile mallevis la kapon kaj petis Jesuon fortigi ŝian spiriton pro tiu provo, tro peza por la plej delikataj sentoj de ŝia koro.

Publio Lentulus verŝajne samopiniis kiel lia bofilo; li tamen kredis, ke la vortoj de Flaminio ankoraŭ sonas en la plejprofundo de lia konscienco kaj firme respondis:

– Infanoj, ni flanken metu la tro rapidan juĝon; kvankam mi rekonas, ke Anna estas kulpa, akceptinte la vestojn de sia mastrino, mi tamen volas por ĉiam honori ĉe tiu ĉi servistino la memoron pri Livia. Fidela kunulino en ties grandegaj turmentoj dum dudek kvin sinsekvaj jaroj, ŝi restados plu en ĉi tiu domo kun tiuj samaj rajtoj, kiujn al ŝi donis ŝia bonfarantino. Mi postulas nur, ke ŝia koro tenu kaŝitaj ĉi tiujn niajn malgajajn sekretojn, ĉar mi deziras publike honori la memoron pri mia edzino, post ties supermezura memofero en tiu festo de la malnobleco.

Plinio kaj Flavia, surprizitaj, rimarkis lian spontanegan grandanimecon rilate al la servistino, kaj ĉi tiu siavice dankis Jesuon pro la graco de lia mensklariĝo.

La senatano ŝajnis profunde ŝanĝita ĉe tiu terura bato, kiun spertis liaj spiritaj fibroj.

En tiu momento, Plinio Severus elpaŝis, klarigante:

– Al pluraj el niaj amikoj, ĉi tien venintaj por gratuli vin, mi diris, ke kaŭze de nia funebro pro mia patrino, vi ne festos vian hodiaŭan politikan triumfon; por pravigi vian foreston, mi ankoraŭ informis, ke sinjorino Livia estas grave malsana en Tibur, kien ŝi iris, serĉante al si pli bonan farton. Tiajn sciigojn niaj intimuloj ja akceptis plej nature, ĉar via edzino, de post sia reveno el Palestino, neniam plu interrilatis kun la mondumo, kaj tial estas kompreneble, ke ĉiuj niaj amikoj kredis ŝin malsana.

La senatano interesite aŭdis tiujn klarigojn, kvazaŭ trovinte ian solvon por la dolora problemo, premanta lian koron.

Post kelkaj momentoj, ekzameninte, ĉu estos ebla la plenumo de unu ideo, veninta en lian suferantan cerbon, li kuraĝigita diris:

– Tiu via ideo, mia filo, portis al mi la esperon pri akceptebla solvo de la dolora demando, kiu min afliktas.

“Estas mia devo defendi la memoron pri mia edzino – diris plu la senatano kun malsekaj okuloj –, kaj, se estus eble, mi streĉe batalus kontraŭ la fia pensmaniero de la kruela registaro, kiu nun putrigas niajn plej bonajn sociajn konkerojn; sed, se mi mem publike elkrius mian indignon, mi estus rigardata kiel frenezulo; kaj se mi alfrontus Domicion Neronon, ĝi estus tio sama, kiel provi senmovigi la akvon de Tibero per florpedunklo. Koncerne tion, mi do scios agi post la politikaj kulisoj, por faligi la tiranon kaj ties abomenajn partianojn, eĉ se tio kostos al mi plej grandajn tempon kaj paciencon.

“Nun ni devas urĝe doni ĉiujn eblajn honorojn al la senmakulaj sentoj de mia edzino, forrabita en la kirlegon de la frenezeco kaj de la krueleco.”

Silentaj kaj kortuŝitaj, Plinio kaj Flavia aŭskultadis lin, ne interrompante la rapidan fluadon de liaj vortoj; kaj li saĝe daŭrigis:

– De pli ol dek jaroj ĝis hodiaŭ la Roma socio rigardadis mian kompatindan edzinon kiel mensmalsanan. Ĉar niaj amikoj estas informitaj, ke Livia troviĝas en Tibur, eble baldaŭ mortonta, mi tial foriros tien ne pli malfrue ol ĉi tiun nokton, prenante Annan kun mi.

Kaj kvazaŭ posedita de ia prempenso, kun tiu firma decido honori la neforgeseblan mortinton, Publio Lentulus parolis plu:

– Nia domo en Tibur estas nun nelogata, ĉar antaŭ pli ol dudek tagoj Filopator iris al Pompeja, por plenumi iujn miajn ordonojn... Mi tien venos kun Anna, kunportante ĉerkon, kiu tute efikos, kvazaŭ ĝi entenus la kadavron de mia kompatinda Livia... Niaj servistoj devos foriri morgaŭ, kiam mi sendos al Romo ekspresojn, kiuj sciigos ilin pri la okazintaĵo, por kontentigi la etiketon de la socia vivo. En Tibur ni donos al la memoro pri Livia ĉiajn honorojn kaj poste ni publike transportos ŝian cindron ĉi tien, kie mi farigos la plej solenan funebran ceremonion, dum la vizitado de la publiko; tiel, kvankam tro malfrue, mi montros mian respekton por la sankta virino, kiu sin oferadis por ni dum sia tuta vivo...

– Sed, la cindrigo? – saĝe demandis Plinio Severus, pensante pri la ebla sukceso de tiu projekto.

La senatano tamen ne hezitis kaj solvis la aferon per la kutima energio de siaj decidoj:

– Se tiu ceremonio postulas la ĉeeston de la pastroj, mi scios agi ĉe la helpanto de la kulto, en la urbo, dirante, ke mi deziras fari ĉion en la plej malgranda rondo de miaj familiaj intimuloj.

“Restas al mi nur esperi de vi, aŭdantaj min, absolutan silenton pri la doloraj aranĝoj en ĉi tiu nokto, por ke ni ne vundu la delikatecon de la sociaj konvencioj.”

Forte mirante tiun energion ĉe tiaj ĉagrenaj cirkosntancoj, Plinio Severus akompanis lin, tiel malfrue en la nokto, por la aĉeto de la ĉerko; tio estis farita post kelkaj minutoj ĉe komercisto, kiu pri nenio demandis la strangan klienton, konsidere al ties socia kaj politika pozicio kaj ankaŭ al la alta ricevita sumo, kiu portis grandan profiton al lia komercista intereso.

En tiu sama nokto Publio Lentulus kaj Anna, kune kun iuj sklavoj, direktis sin al la urbo, kie kutime ripozadis la antikvaj Romanoj; en kelkaj horoj trairinte la ombron de la vojoj, ili kiel eble plej trankvile alvenis, por konvene prepari la lastajn honorojn al la memoro pri Livia.

Ĉiuj aranĝoj estis faritaj ĉe granda miro de ĉiuj servistoj kiuj ne kuraĝis diskuti la ricevitajn ordonojn, kaj eĉ de la patricioj en la urbo, kiuj ja sciis, ke la senatanedzino estas malsana, sed ne konis la bedaŭrindan fakton, ke ŝi mortis.

Flavia kaj Plinio estis vokitaj la sekvantan tagon, por kontentigo al ĉiuj sociaj devoj ĉe tiu korŝita prezentado de kondolencoj.

Per pli riĉa kaj malavara oferado al la kulto je Jupitero, Publio Lentulus havigis al si la plenan rajtigon de la Tibura pastraro pri sia decido, cindrigi la kadavron de sia edzino tute intime, en la familia rondo; tiam al la memoro pri Livia estis donita honoro per ĉiuj formalajtoj de la antikva paganismo kaj estis alvokita la protekto de la hejmaj diaĵoj.

Multenombraj ekspresoj estis senditaj al Romo; post du tagoj la funebra urno alvenis al la ĉefurbo de la Imperio kaj estis plej solene kondukita en la Aventinan palacon, kie ĝin atendis luksa katafalko.

Dum tri sinsekvaj tagoj la simbola cindro de Livia estis elmetita al la publika vizitado; kaj al la plebo, kiu venis fari sian lastan honoron al la memoro de lia kara edzino, la senatano malavare disdonis monon kaj nutraĵojn. Longaj vicoj da homoj tage kaj nokte vizitadis la palacon, kiu tial prenis la imponan

aspekton de templo malfermita al ĉiuj sociaj klasoj. La tuta Romana nobelaro tie estis, kaj eĉ la kruela imperiestro sendis reprezentanton al tiu pompa ceremonio, kiu kvazaŭ esprimis ian konscienciproĉon kaj ian provon de kompenso fare de la ĉagrenita edzo. Publio Lentulus opiniis, ke nur tiel li nun povos publike montri sian penton pro sia konduto kontraŭ sia edzino, kaj ĉi tiu do reokupis sian respektan lokon en la granda rondo de la aristokrataj amikoj de ŝia familio.

Kiam tiuj solenaĵoj finiĝis, la senatano insistis ĉe siaj filino kaj bofilo, kiel ankaŭ ĉe Agripo, ke ili ekloĝu en la Aventina palaco, kune kun li; tion ili konsentis, sed nur por kelka tempo, kiel klare diris Plinio al sia edzino. En tiu sama nokto, kun la animo disŝirita de resopiro kaj doloro, li, helpata de Anna, transportis ĉiujn personajn objektojn de sia edzino en siajn privatajn ĉambrojn.

Post tio, Publio Lentulus kun viva intereso demandis la servistinon:

– Ĉio preta?

Ricevinte jesan respondon, li tamen insistis, kvazaŭ ankoraŭ io mankus: li aludis la krucon, donacitan de Simeon kaj zorge konservatan de la sindonema Anna, kvazaŭ neniu alia povus taksi la apartan signifon de tiu trezoro:

– Kie troviĝas tiu kruda ligna kruceto, kiun mia edzino tiel fervore amis?

– Ho jes, vere! – ekkriis la servistino, ĝojante rimarki la aliiĝon de tiu rigida animo.

Kaj, preninte el sia ĉambro la modestan memoraĵojn de la Samaria apostolo, ŝi donis ĝin al li kun afabla riverenco. La senatano tiam metis ĝin en meblon provizitan per seruro. Tamen, kiu akompanus lian dolorplenan ekzistadon, tiu povus vidi lin ĉiunokte, en la soleco de lia ĉambro, ĉe la karega simbolo de la kredoj de lia edzino.

Kiam la lumoj de la palaco kviete estingiĝis kaj ĉiuj serĉis al si ripozon en la nokta silento, la fiera patricio prenis la krucon de Simeon el la ŝranko, gardanta liajn plej karajn rememorojn kaj surgenu, kiel Livia faradis, li haltigis la maŝinon de la ĉiutagaj sociaj konvencioj, por mediti kaj amare ploradi...

VI - UNUJAJ LUMRADIOJ EN LA REGNO DE LA SINJORO

Ankoraŭ koncerne la doloran, kortuŝan scenon de la ofero de la kristanaj martiroj, sur la cirka areno, ni akompanu la Spiriton de Livia dum ties luma irado al la regno de Jesuo.

Neniam antaŭe iu regiono de la Tero estis dotita per tiel belaj vidaĵoj, kiel tiuj, kiuj malfermiĝis en la sferoj pli proksimaj al nia planedo, kiam multope forflugis la unuaj apostoloj de Kristanismo, mortigitaj de la homa krueleco en la ora, glora tempo de la konsola doktrino de la Nazareta profeto.

En tiu tago, kiam la malsataj sovaĝbestoj disŝiradis la sendefendajn adeptojn de la nova ideo, tuta legio da saĝaj, bonvolaj Spiritoj, sub la egido de la Majstro, ĉirkaŭis iliajn korojn, dispecigitajn dum la martirigo, kaj ilin plenigis per forto, rezignacio kaj kuraĝo por la ekstrema pruvo de fido.

Sur la abomenajn pasiojn, kiujn senbridigis tiu malklera, senkomapata ĉeestantaro, la ĉielaj potencoj

disvolvus la mantelon de sia senlima favorkoreco, kaj krom tiu malica, kapturna kriegado, leviĝis ankaŭ benantaj voĉoj, kiuj portis al la martiroj de la Sinjoro dolĉan, feliĉigan konsolon.

Jam vesperiĝis, kiam falis la lastaj viktimoj sub la kruda bato de la furiozaj, senkompataj leonoj.

Malferminte siajn okulojn sur la karesaj brakoj de sia maljuna, bonkora amiko, Livia tuj komprenis, ke tiu kriza momento jam forpasis. Simeon havis sur la lipoj ian dian rideton kaj patre, milde karesadis al ŝi la harojn. Tamen stranga emocio vibradis en la liberiginta animo de la senatanedzino, kiun ekposedis doloraj larmoj. Ĉe sia flanko ŝi rimarkis, kun ĉagrena surpriziĝo, la sangantajn restaĵojn el sia disŝirita korpo kaj komprenis, malgraŭ sia suferiga mirego, la dolĉan misteron pri la spirita reviviĝo, pri kiu Jesuo paroladis en siaj diaj lecionoj. Ŝi ekdeziris paroli, por esprimi siajn plej internajn sentojn, sed ŝia koro dronis en nedifinebla, turmenta emocio. Ŝi konstatis ankaŭ, ke el la sangmakulita areno unuj post aliaj leviĝas estuloj, similaj al ŝi, kiuj hezite faras siajn unuajn paŝojn; tamen ilin helpis eterecaj, senkompare graciaj figuroj, kiajn ŝi neniam antaŭe vidis en ia ajn momento de sia vivo. De antaŭ ŝiaj okuloj forviŝiĝis la multkolora, tumulta spektaklo en la cirko de la homa malnobleco, kaj ĉe ŝiaj oreloj jam ne sonis la mokaj, malicaj ridegoj de la kruelaj spektatoroj. Ŝi rimarkis, ke el la stelsemita ĉielo fluas konsola lumo, kvazaŭ ia nova heleco, nekonata sur la Tero, mirige fariĝis en la nokto. Grandega aro da estuloj, kiuj ŝajnis al ŝi flugilhavaj, ĉirkaŭis ĉiujn liberigintajn Spiritojn kaj plenigis la atmosferon per superbelaĵaj vibroj.

Ravita, ŝi tiam vidis, ke radiluma vojo etendiĝas inter la Tero kaj la ĉielo... Laŭlonge de ia strio el neesprimebla lumo, ne sufiĉe intensa, ke ĝi superus la mildan brilon de la steloj, kiuj kvazaŭ brodaĵo, ornamis la bluan ĉielan glataĵon, ŝi rimarkis aliajn spiritajn legiojn, rapide malsuprenirantajn el la mirindaj regionoj de la Senlimo...

Tute kaptitaj de la delikataj sonoj de tiu nepriskribeblaj medio, ŝiaj oreloj tiam aŭdis dolĉajn melodiojn el la nevidebla mondo, kvazaŭ en la Superaj Sferoj la diaj silvioj de la Paradizo kantis, akompanataj per liroj kaj flutoj, harpoj kaj liutoj, kaj tiel verŝus la ĉielan ĝojon sur la ombrajn, malgajajn regionojn de la Tero...

Kvazaŭ impulsita de ia mistera energio, ŝia Spirito tiam sukcesis eldiri siajn plej karajn kaj profundajn emociojn.

Ĉirkaŭprenante la maljunan, bonkoran amikon el Samario, ŝi povis murmuri en larmoj:

– Simeon, mia bonfaranto kaj majstro, kune kun mi, petu Jesuon, ke ĉi tiu horo estu por mi malpli dolora...

– Jes, filino – respondis la respektinda apostolo, premante ŝin al sia koro, kvazaŭ ŝi estus iu infano –, la Sinjoro, per sia senlima favorkoreco, rezervas sian amon al tiuj, kiuj sin turnas al lia grandanimeco, kun arda, sincera fido en la koro! Trankviligu vian spiriton, ĉar nun vi staras sur la vojo al la regno de la Sinjoro, destinita por la koroj, kiuj multe amadis!

Sed en tiu momento ŝajnis, kvazaŭ ia nekomprenebla forto pelas al la Superaj Regionoj ĉiujn, kiuj tie troviĝis sen la peza surtera vesto... Livia sentis, ke la grundo elglitiĝas el sub ŝiaj piedoj kaj ke ŝi tuta ŝvebas en la spaco; ŝi tiam spertis strangajn sensaciojn, kvankam forte ŝin tenadis la protektaj brakoj de la respektinda amiko.

Ĝi estis ja helega karavano de tre puraj estuloj, kiuj kune altiĝis laŭ tiu brila vojo farita el lumo, meze en

la etero! Sentante, kvazaŭ ŝia korpo senpeziĝis, la ŝatanedzino havis la impreson, ke ŝin envolvis ia oceano da karesaj, mildegaj vibroj. Ĉiuj ŝiaj kunuloj ridetadis al ŝi, kaj, rigardante ilin, ankaŭ helpatajn de la diaj senditoj, ŝi rekonadis ĉiujn, kiuj kun ŝi suferis en la karceroj kaj elportis samajn martirigojn kaj malhonoran morton.

Sed, ĉe unu momento, kvazaŭ ŝia memoro estus turnita al ĉiuj detaloj de la ĉirkaŭa realo, ŝi pensis pri Anna, kies maleston ŝi bedaŭris dum tiu irado de gloriĝo per Jesuo Kristo.

Tiu rememoro apenaŭ ekaperis en la profundo de ŝia menso, kaj jen la voĉo de Simeon klarige aŭdiĝis kun sia proverba mildeco:

– Infano, iam vi povos scii ĉion... kvankam resopirante, kliniĝu tamen antaŭ la Diaj decidoj, inspirataj de plenaj saĝeco kaj favorkoreco... Ne afliktu vin la malesto de Anna ĉe tiu ĉi festeno de ĉiela ĝojo, ĉar Jesuo decidis ankoraŭ iom longe tenadi ŝin en sia benata laborejo, en la ombro de la surtera ekzilejo...

Livia aŭdis lin kaj silenta rezignaciis pri la situacio.

Ŝi rimarkis, ke ili iradas ĉiam la saman mirindan vojon, kiu, en ŝiaj okuloj, interligis la Ĉielon kaj la Teron, kvazaŭ dolĉa lumrubando; ŝajnis al ŝi, ke ĉiuj diaj elementoj de tiu hela karavano ĝlate flugas supren en la spaco, direkte al gloraj nekonataj regionoj. Meze en la aero ŝi miris, ke ŝi ankoraŭ konservas, laŭlonge de la etereca, radiluma vojo, la tutan mekanismon de siaj fizikaj sentoj.

Malproksime, en la abismoj de la Senlimo, ŝajnis al ŝi, ke ŝi vidas aliajn stelplenajn ĉielarkaĵojn, kiuj mirinde kaj senfine sekvis unu la alian, kaj brilegajn radiojn, kiuj iaforte duonblindigis ŝiajn ravitajn okulojn... Ĉe aliaj okazoj, momente rigardante post si, ŝi vidadis amason da densaj ombroj, moviĝantaj tie, kie sidas la vivosferoj sur la malproksima Tero.

Sur ambaŭ bordoj de la vojo ŝi rimarkis graciajn, aromajn florojn, kvazaŭ la teraj lilioj, tie pli delikate aspektantaj, estus transplantitaj en la ĝardenojn de la Paradizo. La eterneco montriĝis al ŝi neesprimeble ĉarma kaj feliĉa!

Kiam Simeon karese paroladis pri ŝia alkonformiĝo al la nova vivo kaj pri la eksterordinaraj belaĵoj de la regno de Jesuo, ĝoje rememorante la amarajn ĉagrenojn de la vivo sur la Tero, jen iliajn orelojn atingis arĝentsonaj, harmoniaj voĉoj de la ĉielaj najtingaloj, festantaj, en la Superaj Regionoj, la elaceton de la martiroj de Kristanismo; tio estis, kvazaŭ la vojirantoj alproksimiĝis al ia dua Galileo, saturita de dolĉaj melodioj kaj parfumoj, staranta en la lumo de la Senlimo, kaj, simile al nesto de sanktigataj, puraj animoj, balanciĝanta, sur la arbo de la mirinda Kreitaĵaro, ĉe la blovado de bonodora vento, en senfina printempo...

Tiu milda, klara himno jen supreniris per superbelaj sonoj, kvazaŭ ia subtila incenso de la animoj, direktiĝanta al la trono de la Eternulo, kiel esprimo de amo, ĝojo kaj danko, jen per ravaj melodioj malaltiĝis al la tera ombro, simile al konfeso de fido kaj espero al Jesuo Kristo, por voki al la virto, en la mondo, la plej malicajn kaj nesentemajn korojn...

La homa lingvo ne esprimas fidele la harmoniajn vibrojn de la melodioj de la nevidebla mondo, sed tiun glorkanton mi, almenaŭ per palaj koloroj, devas ĉi tie reprodukti, kiel dolĉan rememoron pri la Paradizo:

– Glorata estu Vi, Estro de la Universo, Kreinto de ĉiuj mirindaĵoj!

“Per Via neatingebla saĝeco eklumas la stelaroj en la abismoj de la Senlimo, kaj per Via boneco kreskas la mola herbo sur la malhela krusto de la Tero!

“Per Via netaksebla grandeco kaj per Via favorkora justeco, la Tempo malfermas al la animoj siajn neelĉerpeblajn trezorojn!

“Per Via sankta, kvintesenca amo floras ĉiuj ridoj kaj ĉiuj larmoj en la koro de la kreitoj!

“Benu, Estro de la Universo, la sanktajn esperojn de ĉi tiu regno. Jesuo estas por ni Via Vorto de amo, paco, karito kaj beleco! Fortigu niajn strebojn al kunlaborado sur lia Sankta Kulturejo!

“Pligrandigu niajn fortojn kaj verŝu sur nin la sanktan fajron de la fido, por ke ni disĵetu sur la Teron la diajn semojn de la amo de Via Filo!

“Sufiĉas unu guto de la roso de Via favorkoreco, por ke puriĝu ĉiuj koroj, dronantaj en la ŝlimo de la surteraj krimoj kaj de la obstinado en eraroj, kaj ne pli ol unu sola radio de Via potenco estas necesa, por ke ĉiuj Spiritoj konvertiĝu al la superega bono!

“Kaj nun, ho Jesuo, Ŝafido de Dio, forviŝanta la pekon for de la mondo, ricevu niajn ardajn petegojn!

“Benu, ho Dia Majstro, tiujn, kiuj elaĉetinte siajn kulpojn, jen venas de la mondo de amaraj suferoj; sanktigu iliajn esperojn per la kreipova spiro de via sanktega beno!

“Viktimoj de la homa maliceco, viaj misiuloj brave plenumis ĉiujn devojn, kiuj ilin tenadis en la karcero de la peza ekzilejo!

“En la kirlego de siaj tumultoj kaj maljustaĵoj, la mondo ne komprenis iliajn tre amantajn korojn; vi tamen, per via boneco kaj favorkoreco, malfermas al la martiroj de la vero la sanktajn pordojn de via luma regno!”

Profunde belaj strofoj disŝutis sur la helajn, subtilegajn vojojn de la universa etero la benon de la paco kaj de la harmoniaj ĝojoj!

La malsuperaj estuloj, en la spiritaj sferoj plej proksimaj al la planedo, ricevadis tiujn sanktajn emanajojn de la ĉiela festeno, rezervita de Jesuo por la martiroj de lia savdoktrino, kvazaŭ ankaŭ ili estus invititaj de la favorkoreco de la Dia Majstro; ĉe la plej profunda penetrado de tiuj mirindaj vibroj en iliajn spiritojn multaj por ĉiam konvertiĝis al la superaj amo kaj bono.

Dolĉegaj harmonioj tute okupis ĉiujn spiritajn atmosferojn kaj surverŝis la Teron per majesta lumo.

En tiu regiono, plena de nekonataj, mirigaj belajoj, kiujn la mizera homa lingvo ne povus esprimi, Livia revigligis siajn moralajn fortojn post la konsciencia plenumado de sia dia misio.

Tie ŝi komprenis la tutan signifon de la koncepto “multe da loĝejoj”, pri kiu Jesuo parolis en siaj instruoj, rigardante, apud Simeon, plej diversajn laborkampojn, proksimajn al la Tero, aŭ observante la grandecon de la mondoj, disĵetitaj de la Dia saĝeco en la nemezurebla oceano de la etero kaj de la senmorteco. Cedante al la inklinoj de sia koro, ŝi ne forgesis siajn iamajn amikojn en la spiritaj rondoj, nun vivantaj sur la Tero.

Post kelkaj tagoj da mildaj emocioj, ĉiuj Spiritoj, kune starantaj en tiu luma medio, preparis sin por akcepto al la Sinjoro, kiel ĉe la okazoj de lia ĉeesto en la kampara sceno de Galileo.

En unu tago, radianta de mirinda, neesprimebla beleco, kiam ia lumo kun diaj nuancoj verŝis dolĉan ĝojorosen sur ĉiujn korojn, la Ŝafido de Dio malsuprenvenis de la supera sfero de sia alta gloro, kaj, parolante sur tiu ĉarma sceno, rememorigis siajn neforgeseblajn predikojn apud la kvietaj akvoj de la malgranda “maro” en Galileo. Neniel povus esti fidele esprimita, sur la Tero, la nova beleco de lia eterna parolo, principo de la tuta amo, de la tuta vero kaj de la tuta vivo; tamen estas por mi devo, en ĉi tiu tasko, memorigi lian senliman saĝecon, kaj tial mi kuraĝas, kvankam neperfekte kaj supraĵe, ĉi tie prezenti la esencon de lia dia leciono en tiu neforgesebla momento.

Ĉiuj ĉeestantoj kvazaŭ vidis la fidelan kopion de la graciaj, helaj bildoj ĉe la lago Tiberiada. La parolo de la Majstro enprofundiĝis en la animojn kun mistera sonoreco, dum el liaj okuloj venis tiu sama vibrado de korfavoro kaj de serena majesteco.

– Venu al mi, vi ĉiuj, kiuj per larmoj kaj sango prisemis la ĉielan vinberĝardenon de mia regno de amo kaj vero!

“En la sennombraj loĝejoj de la Patro estas lumo sufiĉa, por disbati ĉian mallumon, konsoli ĉiajn dolorojn, elaĉeti ĉiajn maliĉaĵojn...

“Gloriĝu do per la saĝeco kaj amo de Dio Ĉiopova, ho vi, kiuj jam deskuis la polvon de la mizeraj karnaj piedoj en la purigaj surteraj memoferoj! Porĉiama paco, reganta super ĉio, atendas vin en la vasta, senlima regno, promesita de la diaj “halelujaj” de la Bona-Novajo, ĉar en la mondo vi dorlotis nenian alian aspiron, ol peni atingi la Regnon de Dio kaj Ties Justeco.

“De la Staltrogo ĝis Kalvario mi strebis por miaj ŝafoj la eternan, luman vojon... La Evangelio nun floras, kiel senmorta, neelĉerpebla kampo de la dia beno. Ni tamen ne ripozu, miaj amataj, ĉar tempo estos sur la Tero, kiam ĉiuj ĝiaj instruoj estos piedpremataj kaj forgesitaj... Post longa epoko de memoferado de siaj adeptoj, por ke ĝi firmiĝu en la animoj, la savdoktrino estos vokita por ĵeti lumon sur la paseman regadon de la popoloj; sed fiero kaj ambicio, despotismo kaj krueleco ja revivigos la naŭzajn ekscesojn de sia libereco! La malnova kulto, kun siaj pompaj ruinoj, provos restarigi la abomenajn templojn de la bovido el oro. La religiaj antaŭjuĝoj, la ekleziulaj kasto, la falsaj pastroj rekomencos la komercadon de la sankataj aferoj; tiel ili ofendos la amon kaj saĝecon de Nia Patro, kiu kvietigas la bagatelan ondon sur la mara dezerto, tute same, kiel Li forviŝas la plej kaŝitan larmon, kiun la homo ellasas dum siaj preĝoj aŭ en la dolora sereneco de sia neesprimebla doloro!

“Kvankam ili sufokos la Evangelion en la abomeneco de la sanktaj lokoj, (*) la religiaj eksceso ne povos tamen vuali la helecon de miaj verajoj, forklinante ĉi tiujn de la koro de la bonvolaj homoj!

(*) Tiuj neklaraj vortoj aludas la profetan diron de Daniel (9: 27): “... sur la flugiloj de la sanktejo estos abomeninda dezerteco, ĝis la fina destinita pereco falos sur la ruinojn”. En la Evangelio laŭ Sankta Mateo ni legas: “Tiam multaj ofendiĝos, kaj perfidos unu la alian. Kaj multaj falsaj profetoj leviĝos, kaj forlogos multajn. Kaj pro la multobligo de la maljusteco, la amo de la plimulto malvarmiĝos. Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. Kaj ĉi tiu evangelio de la regno estos predikata tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj; kaj tiam venos la fino. – Kiam do vi vidos la abomenindaĵon de dezerteco, pri kiu estas dirite de la profeto Daniel, starantan sur la sankta loko (la leganto komprenu), tiam tiuj, kiuj estas en Judujo, forkuru al la montoj; kiu estas sur la tegmento, tiu ne malsupreniru por preni ion el sia domo...” (Mateo,

24: 10 ĝis 17). Ankaŭ en Ev. laŭ Marko, 13: 14, estas tiu antaŭdiro. Ne mi intencas interpreti tiajn profetaĵojn. – La Trad.

“Kiam okazos tiu malvigliĝo de la evoluado de miaj instruoj, eĉ tiam mi ne ĉesos vive ami tiujn miajn ŝafojn, perdiĝintajn for de la gregejo.

“El la lumsferoj, superregantaj ĉiujn kampojn de la surtera agado, mi venos kun miaj protektatoj, iam ribelintaj anĝeloj, kiel pasintatempe inter la malpiajn, ŝtoniĝintajn korojn de Izrael, kiun mi unu tagon elektis kiel heroldon de la diaj veraĵoj ĉe la deviintaj triboj de la grandega homa familio!

“En la nomo de Dio Ĉiopova, mia Patro kaj via Patro, mi ĉi tie ĝojas kun vi por la spiritaj premioj, kiujn vi konkeris en mia regno de paco per viaj benindaj memoferoj kaj per viaj purigaj abnegacioj! Multenombraj misiuloj de mia doktrino ankoraŭ falos senvivaj sur la arenon de la krueleco; tiuj tamen ja estigos kun vi la apostolan grupon, kiu jam neniam estingiĝos, helpante ĉiujn laborantojn, kiuj persistos ĝis la fino, sur la longa vojo de la savo de la animoj!

“Kiam la mallumo fariĝos pli nigra en la koroj sur la Tero, instigante la homon uzi ĉiujn formojn de sia progreso por ektermado, por mizero, por morto, mi verŝos mian lumon sur ĉiun estulon vivantan en la karno, kaj ĉiuj, kiuj vibros harmonie kun mia regno kaj fidos miajn promesojn, aŭdos nian voĉon kaj niajn sanktigajn alvokojn!

“Dum la dolĉaj revelacioj de la Parakleto per saĝo kaj vero, mia vorto denove manifestiĝos en la mondo al la homoj, blinde paŝantaj sur la malglata vojo, kaj per viaj instruoj, kiuj eterniĝos sur la grandegaj paĝoj de la venontaj jarcentoj.

“Vere, miaj amataj, ĉar venos tago, kiam ĉiuj homaj falsaĵoj estos dispuŝitaj de la lumo de la ĉielaj revelacioj. Potenca blovo de vero kaj vivo balaos la tutan Teron, kiu tiam pagos por la evoluado de siaj organizaĵoj la plej ŝarĝan tributajn de suferado kaj de sango... Ĝissate ricevinte la venenajn fluidaĵojn de la abomeneco kaj maljusteco de siaj propraj loĝantoj, la planedo mem protestos kontraŭ la malpieco de la homoj, ŝirante sian internon per doloraj kataklismoj... La surteraj eraroj naskos pezajn dolornubojn, kiuj siatempe krevos per larmentoj sur la ombra supraĵo de la Tero; tiam, el la lumo de mia favorkoreco mi rigardos mian malfeliĉan gregon kaj diros, kiel miaj senditoj: Ho Jerusalem, Jerusalem!

“Sed Nia Patro, la sankta manifestiĝo de la tuta amo kaj saĝo, ne volas, ke perdiĝu eĉ unu el liaj deviintaj kreitoj, irantaj la ombrajn vojojn de la malvirto!

“Ni ame laboros sur la kampo de la venontaj jarcentoj; ni reorganigos ĉiujn detruitajn elementojn; zorge esplorante ĉiujn ruinojn, ni serĉos la materialon reutiligeblan; kaj, kiam la surteraj medioj konformigos sian vivon al frateco kaj bono, al paco kaj justeco, post la natura elekto de la Spiritoj, per la renovigaj agitiĝoj de la surplaneda vivo, ni preparos por la mondo novan evoluciklon kaj, per la diaj veraĵoj de la Parakleto, ni firmigos la definitivajn progresojn de la spirita homo.”

Ŝajnis, ke la voĉo de la Majstro plenigas la sferojn de la Senlimo mem, kvazaŭ ĝis estus la dia signo de lia amo, kiun li fiksus en la senfina etendaĵo de la spaco kaj de la tempo, en la radiluma sino de la Eterneco.

Findirinte siajn belegajn profetaĵojn, lia subtila figuro altiĝis al la Superaj Regionoj, dum ia oceano da blueta lumo, kune kun sonoj de diaj, senkomparaj melodioj, invadis tiujn spiritajn kampojn, al kiuj ili

havigis la mildajn nuancojn de la teraj safiroj.

Surgenue kaj dolĉe emociitaj, ĉiuj tie ploris de danko kaj ĝojo, kaj pleniĝis per sankta kuraĝo por la noblaj taskoj, kiujn ili devos efektiviĝi dum la senĉesa pasado de la jarcentoj. Floroj kun mirinda ĉielblua koloro pluvis el la Superaj Regionoj sur ĉiujn kapojn, sed ili disfluiĝis, apenaŭ tuŝinte la delikatajn substancojn, el kiuj konsistis la grundo de tiu loko, kie regis majesta harmonio, kvazaŭ ili estus emanecaj (*) lilioj el bonodora nebulo.

(*) Vd. pĝ. 86, rimarkon pri la vorto emanaĵo. Tiuj “emanecaj lilioj” havus similan naturon: “emanaĵoj” venis el la Ĉielo, materiiĝis kiel floroj kaj aerdisiĝis ĉe la kontakto de la grundo. – La Trad.

Livia ploradis de nedifinebla kortuŝiteco, dum Simeon, per siaj noblaj instruoj, sciigis ŝin pri ŝiaj novaj misioj de sanktiga laboro, atendantaj ŝian sindonemon en la spirita rondo.

– Mia amiko – ŝi diris kun larmoj – la surteraj turmentoj estas bagatela prezo pro ĉi tiuj lumaj, senmortaj rekompencoj! Se ĉiu homo rekte konus tian feliĉon, li nutrus nenian alian penson, ol celi la gloran regnon de Dio kaj de Ties Justeco.

– Vere, infano – diris Simeon, kvazaŭ liaj okuloj serene kuŝus sur la bildoj de la estonteco –, ĉiuj surteraj homoj iam nepre konos la Evangelion de la Majstro kaj obeos liajn instruojn! Por tiu celo, ni ja oferos nin por la ŝafido de Dio tiom da fojoj, kiom ĝi postulos. Ni starigos unuavicajn laborejojn en la surtera ombro, ni klopodos por veki ĉiujn korojn, dormantajn en la dolora reenkarneigo, por la superbela harmonio de ĉi tiuj diaj matenruĝoj!

“Se estos necese, ni denove reiros en la mondon, por plenumi sanktajn misiojn de paco kaj vero... Ni pereos sur la malgloriga kruco, aŭ nutros per nia sango la sovaĝajn bestojn de la ambicio kaj fiero, de la malamo kaj nekompatemo, vivantajn en la animo de niaj surteraj kunuloj, kaj konvertos ĉiujn korojn al la amo al Jesuo Kristo!”

Ĉe tiu momento Livia rimarkis, ke gracia grupo da anĝelaj estuloj disverŝas la gracojn de la Sinjoro sur tiun floran kampon de la Senlimo, tie servantan kiel restadejon de ripozo; ili tiel rekompencis tiujn Spiritojn, foririntajn de la surteraj turmentoj post la plenumo de iu dia misto.

Ĉiuj, kiuj atingis la ĉielan venkon per siaj penoj, ĉe la sanktigaj oferoj, nun refreŝigis siajn moralajn fortojn kaj deziris koni aliajn sferojn de spirita ĝuado, manifestiĝojn de la vivo en aliaj mondoj; tiam ili ricevos novajn sciojn en la radilumaj, grandiozaj temploj de la Eterneco kaj, samtempe, restarigos la ekvilibron de siaj emocioj.

Ĉe la noblaj senditoj de Jesuo plej altaj planoj estis tiam faritaj; jen, novaj scenejoj, novaj studokabinetoj, emocioj ĉe la revido de neforgeseblaj amikoj, irintaj pli frue ol la misiuloj de la Sinjoro en la ombran, glacian nokton de la morto.

Sed, kiam venis al ŝi la vico vortigi siajn plej internajn dezirojn, ekzameninte siajn plej profundajn sentojn, al la sendito de Jesuo, kiu demandis ŝin, la nobla senatanedzino, plorante, respondis:

– Disendito, la mirindaĵoj de la regno de la Sinjoro havus en miaj okuloj alian belecon, se mi povus ilin ĝui akompanata de la koro, kiu estas la duono de la mia, kun la animo, kiu estas ĝemela de la mia kaj kiun la saĝeco de Dio, laŭ Siaj profundaj, dolĉaj misteroj, destinis pro mia “mem”, ekde la aŭroro de la

tempoj!

“Mi ne intencas malestimi la grandiozan gloron de ĉi tiuj regionoj de neesprimeblaj feliĉo kaj paco; tamen, meze de tiu ĉi tuta ĝojo, min ĉirkaŭanta, mi resopiras la animon, kiu estas la kompletigaĵo de mia vivo mem!

“Konsentu al mi la favoron reiri al la ombro de la Tero kaj levi el la ŝlimo de la fiero kaj de la malpiaj vantaĵoj la kunulon de mia destino! Permesu, ke mi, kiel Spirito, povu protekti lin, por ke mi iam konduku lin al la piedoj de Jesuo kaj do ankaŭ li ricevu la dian benon de la Majstro!”

La anĝela estulo ridetis kun profunda kompreneno kaj dolĉa kompto, kaj diris:

– Vere, amo estas la ligilo el eterna lumo, kuniganta ĉiujn mondojn kaj ĉiujn kreitojn en la vastega spaco; sen ĝi la Senlima Kreitaĵaro mem havus nenian pravon de ekzisto, ĉar Dio estas ĝia superega manifestiĝo... La majestaj vidaĵoj de la feliĉaj sferoj perdis sian dian helecon, se ni ne lulus la esperon iam partopreni en ilia eterna feliĉo kune kun niaj amatoj, vivantaj sur la Tero aŭ en aliaj provorondoj en la Universo...

Kaj, fiksante per sia klara rigardo la serenajn kaj ravitajn okulojn de Livia, pli parolis plu, kvazaŭ li esplorus ŝiajn plej sekretajn kaj profundajn pensojn:

– Mi konas vian tutan historion kaj viajn senĉesajn, elaĉetajn luktojn dum viaj pasintaj enkarniĝoj; estas do pravigita via intenco, nun kiel Spirito, laboradi plu sur la Tero por la progresigo de la homoj, kiujn vi tre amis! Ankaŭ la Ŝafido de Dio, ĉar li tre amis la homaron, ne deklinis de si humiliĝon, turmenton, sinoferon...

“Iru, mia infano. Vi povos laŭplaĉe labori ĉe la lumaj anaroj, agantaj sur la ombra supraĵo de la terglobo. Ĉi tien vi revenos ĉiam, kiam vi bezonos novajn instruojn kaj freŝajn fortojn. Vi revenos al Simeon tuj, kiam vi deziros. Helpu vian kompatindan kunulon dum la longa vico de liaj akraj, amaraj kulpelaĉetoj, des pli ĉar la malfeliĉa Publio Lentulus ne staras malproksime de sia plej terura provo en la nuna ekzistado, kiu bedaŭrinde estas perdita pro lia supermezura fiereco kaj pro lia malvarma, senkompata vantamo!”

Livia sentis sin posedita de neesprimebla emocio ĉe tiu dolora antaŭdiro, sed samtempe, en la profundo de sia sentoriĉa, karesema koro, ŝi konfesis sian grandan dankon al la Dia favorkoreco.

En tiu sama tago, kune kun Simeon, tiu nobla Spirito revenis al la Tero, provizore foriĝante de tiu grandioza sfero.

Dum sia superbela kaj rapida irado, Livia rimarkis tiujn samajn ĉarmajn, sorĉajn bildojn de la vojo kaj ravita ricevis altajn instruojn de la respektinda amiko el Samario.

Post nelonge ili alproksimiĝis al ia ampleksa, nigreta makulo. Jam en la atmosfero de la Tero, Livia sentis la strangan diversecon de la ĉirkaŭa naturo kaj ricevis ektuŝojn de la plej malagrablaj emanaĵoj.

En palpebruma daŭro ŝi konstatis, ke ili troviĝas en tiu sama Romo de ŝia infanaĝo, de ŝia juneco, de ŝiaj amaraj provoj. Estis noktomezo. La tuta hemisfero dronis en la ombraj abismoj.

Apogita al la brakoj kaj al la sperto de Simeon, ŝi alvenis al sia iama palaco sur Aventino kaj rekonis

ĝiajn multekostajn marmorĵojn. Tien enirinte, Livia kaj Simeon tuj direktis sin al la ĉambro de la senatano, ĉambro tiam heligata de malforta lumo.

Escepte de la stratoj, kie brue iradis la sklavoĵoj, sin okupantaj per la noktaj transportoj, laŭ la tiamajn moroj, la tuta urbo ripozis en la ombro.

Surgenue, antaŭ la relikvo de Simeon, kiel li de antaŭ nelonge faradis, Publio Lentulus meditis. Lia penso enprofundiĝis en la nigrajn abismojn de la pasinteco, kie li afliktita penadis revidi la karajn amikojn, kiuj pli frue ol li ekprenis la malgajajn vojojn de la morto. Estis jam pasinta pli ol unu monato, post kiam ankaŭ lia edzino tragike foriris en la misterojn de la tombo.

Envolvita en la ombro de sia izoleco plena de amarĵoj kaj profundaj resopiroj, la fiera patricio tiam klopodis, por kvietigi la dolorajn agitiĝojn dum la tago, por pli bone studi la misterojn de la individuo, de la sufero kaj de la destino... Ĉe unu momento, kiam liaj akraj rememoroj estis pli fundaj kaj melankoliaj, li rimarkis, tra la vualo el siaj larmoj, ke la ligna kruceto laŭŝajne elradias delikatajn fadenojn el arĝenta lumo, kvazaŭ ĝin banus ia milda, konsolanta lunbrilo.

Absorbata de la pezaj, malhelaj vibroj de la karno, Publio Lentulus ne vidis la majestan figuron de sia edzino, kiu tie staris apud la respektinda Samaria apostolo kaj kiu dankis la Sinjoron, konstatinte la profundan spiritan pliboniĝon de la animo ĝemela de la ŝia, dum la refariĝado de la surteraj enkarniĝoj. Posedita de ĝojo kaj danko al la Dia Providenco, Livia kisis lian frunton, sub la impulso de nedifinebla amo, dum Simeon direktis al la ĉielo preĝon de amo kaj danko.

La senatano ĝustadire ne perceptis per la okuloj ilian dolĉan, luman ĉeeston, sed en la interno de la animo li sentis sin tuŝita de ia nova forto, samtempe kiel lia premata koro estis envolvita en la karesa lumo de ia neesprimebla, ĝis tiam nekonata konsolo.

VII - RETOJ DE LA MALFELIĈO

Ŝajnas, ke al la jaro 58 estis destinite registri la plej malfeliĉajn okazaĵojn dum la vivo de la senatano Lentulus kaj de ties familio.

La morto de Kalpurnia kaj la neatendita elkarniĝo de Livia – doloraj pasaĵoj, kiuj ŝargis tiun domon per daŭra funebro – devigis Plinion Severus iom pli alproksimiĝi al la hejma medio; li ja de kelka tempo ĉesigis siajn malsaĝaĵojn de ankoraŭ juna viro, por vivi relative kvieta apud sia edzino.

Sed Aŭrelia, insitigita de la flameco de siaj aspiroj, ne ripozis. Sukcesinte enŝovi ruzan servistinon en la domon de Flavia, laŭ malnova projekto de sia nenormala menso, ŝi komencis la abomenan efektivigon de makiavela plano, nome, iom post iom veneni la malfeliĉan izoliĝintan konkurantinon.

Ĉe la komenco, la filino de la senatano rimarkis, ke sur ŝia haŭto aperas iaj erupcioj; konsiderataj negravraj, ĉi tiuj estis kuracataj nur per ia pasto el panmolajo miksitaj kun azenina lakto, medikamento tiam rigardata kiel unu el la plej efikaj preparaĵoj por la konservado de la haŭto.

Tamen la edzino de Plinio senĉese plendis pro malfortikeco de sia tuta organismo kaj montris plej profundan malviglecon.

Plinio post nemultaj tagoj reprenis sian ordinaran socian vivon kaj tute sin donis al la arda amo de Aŭrelia; li rekomencis la skandalan vivon kun sia amorantino, precipe nun, kiam lia hejma situacio estis forte ŝancelita de la kalumniaj sciigoj de Saul pri la amikrilatoj de Agripo al Flavia.

Plinio Severus, kvankam impulsiĝema, estis grandanima; sed en la familia sistemo lia spirito estis unu el tiuj hejmaj tiranoj, kiuj, sekvante senbridan, nekompreneblan konduton, tamen ne toleras eĉ plej malgrandan devion en la hejma sanktejo. Malgraŭ sia malĝusta, kondamninda vivmaniero, li komencis konstante spionadi siajn fraton kaj edzinon kun la kruela furiozeco de ia ofendita leono.

Kolera pro la pura frata amikeco inter Flavia kaj Agripo, kiu silente daŭrigis sian abnegacian amon, Saul siavice preterlasis nenian okazon, por ombri la flamiĝeman koron de la oficiro per la plej fiaj, nepravigeblaj kalumnioj.

Pro sia nobla kaj sentimentala karaktero, Agripo ne povis suspekti la insidojn, kiuj implikis lin dum la ordinara vivo, kaj daŭrigis la ĝentilan elmontron de sia digna amikeco al la virino, kiu ne povus ami lin alie, ol per alta frata amo.

Sed la iama sklavo de la familio Severus ne perdis siajn esperojn. Senpacience atendente la momenton realigi siajn amaspirojn, li ofte iradis al la maljuna Arakso, kies avideco kaj ambicio kreskis samtempe kun la aĝo.

Rimarkante, ke Flavia Luntulia havas profundan korinklinon por Agripo, li ne hezitis vidi en ŝiaj plej simplaj agoj senduban elmontron de intensa kaj reciproka amo; li tial ĉiamaniere penadis enŝoviĝi en ŝian koron, por ke ankaŭ li kaptu ŝian intereson kaj estimon.

Unu vesperon, premkore atendinte pli ol du monatojn, ĝis li povos realigi siajn malnoblajn intencojn, li sukcesis resti sola, tute sola, kun la juna sinjorino, kiu iom ripozadis sur larĝa divano en la vasta teraso.

De tiu alta loko estis vidataj la plej belaj panoramoj de la urbo, kiun jam lumigis la brilo de la unuaj steloj ĉe la dolĉeco de la krepusko. La karesaj ventetoj de tiu kvietita horo alportadis sonojn de liutoj kaj harpoj, proksime ludataj kvazaŭ tio estus harmoniaj voĉoj en la grandega sino de la vespero.

Saul fikse rigardis tiun virinon, kies konkeron li avidis, kaj sub la potenco de nenormala, neklarigebla pasio, longe observadis ŝian ĉarman, delikatan, neĝoblankan mienon, similan al tiu de iu diino. Tiu virino estis ja la objekto de ĉiuj liaj akraj, sovaĝaj aspiroj, la celo de lia neatingebla, impeta feliĉo. Laŭ la materieco de siaj sentoj, li ne povus ami ŝin kvazaŭ frato, sed nur kun la krudeco de siaj malpuraj deziroj.

– Sinjorino – li firme diris, post longa rigardado al ŝia vizaĝo –, jam de multaj jaroj mi atendas tian minuton, kiel la nuna, por povi konfesi mian grandegan korinklinon al vi. Mi amas vin super ĉio, eĉ super mia vivo mem! Mi scias, ke rilate min vi staras sur neatingebla nivelo; tamen, kion fari, se mi ne sukcesas sufoki ĉi tiun adoradon, ĉi tiun ardan amon de mia animo?

Ekprenita de dolora surpriziĝo, Flavia malfermegis siajn serenajn, malgajajn okulojn.

– Sinjoro Saul – ŝi kuraĝe rebatis, venkinte sian emocion –, kvietigu vian animon... Se vi ja portas por mi tian grandan amon, lasu min sur la vojo de miaj devoj, kie nepre restadu ĉiu virino ĵaluza pri sia virto kaj pri sia nomo! Silentigu do viajn sentojn koncerne tion, ĉar la amo, kiun vi konfesas, povas esti nenio alia, ol malmodera, nepura deziro!

– Neeble, sinjorino! – diris la iama sklavo, kvazaŭ freneza. – Mi jam faris ĉion por forgesi vin... Ĉion eblan mi faris, por definitive foriri de Romo, ekde la malfeliĉa tago, kiam mi vidis vin je la unua fojo! Mi reiris Massilian, decidinte neniam plu reveni ĉi tien; tamen, ju pli mi tiris min de antaŭ vi, des pli multe mia animo pleniĝis per enuo kaj amareco! Mi denove ekloĝis tie ĉi, kie mi vivas per mia malfeliĉo kaj per miaj mizeraj esperoj! Dum pli ol dek jaroj, sinjorino, mi ĝis hodiaŭ pacience atendadis. Mi ĉiam honoris viajn nediskuteblajn virtojn, atendante la tagon, kiam vi jam ne toleros la malfidelan edzon kiun la destino senkompate starigis sur via vojo!

“Nun mi sentas, ke vi trinkis la lastan guton el la kaliko de la hejmaj ĉagrenoj, ĉar vi ne hezitis cedi antaŭ la korinklino de Agripo... De tiam, kiam mi vidis vin en kompanio de iu viro, kiu ne estas via edzo, mi tremas de ĵaluzo, ĉar mi ne havas la impreson, ke vi estas kreita nur por mi... Mi ardas de pasio, sinjorino, kaj ĉiunokte mi intense sonĝas pri viaj karesoj kaj pri la dolĉeco de viaj paroloj, kiuj plenigas al mi la tutan animon, kvazaŭ nur de vi dependus la tuta feliĉo en mia vivo!

“Kontentigu la petojn de mia senlima amo! Ne igu min atendi pli longe, ĉar mi povus morti!”

Flavia Lentulia nun aŭdis lin, samtempe kun surprizo kaj teruro. Ŝi volis leviĝi, sed mankis al ŝi la necesa forto. Eĉ tiel, ŝi havis kuraĝon sufiĉan por al li respondi:

– Vi eraras! Inter mi kaj Agripo ekzistas nenio, krom sankta, pura amikeco de gefratoj, elportantaj identajn provojn kaj luktojn de la vivo.

“Mi ne akceptas viajn akrajn aludojn pri la privata vivo de mia edzo, ĉar, kia ajn estas la konduto, kiu plaĉas al li en la ekzistado, mi devas esti la ŝildo de lia hejmo kaj la honoro de lia nomo...

“Se vi povas kompreni la respekton ŝuldatan al virino, foriru de ĉi tie, ĉar viaj perfidintencoj kaŭzas al mi plej profundan naŭzon!”

– Ĉu lasi vin? Neniam! – ekkriis Saul per terura tono. – Atendadi tiom da jaroj kaj nenion atingi? Neniam, neniam!

Kaj alpaŝante al la sendefenda sinjorino, kiu per ekstrema peno jam staris, li kun pasia impeto ĉirkaŭprenis ŝian buston kaj dum kelke da sekundoj firme tenis ŝin inter siaj fortikaj brakoj.

Malgraŭ ŝia eksciteco kaj terura impulsiĝemo, Saul tamen ne povis rezisti al la superhoma forto, per kiu la kompatinda sinjorino defendis sin en tiu momento dolora por ŝia sentema animo: ŝi sin subite forsavis el liaj krimaj manoj kaj tuj malsupreniris en sian ĉambron, kie ŝi enfermiĝis, verŝante larmojn pro sia ofendita digno; tamen ŝi evitis skandalon pri la okazaĵo.

Nur en la sekvanta tago, vespere, Plinio Severus revenis hejmen, kie li trovis sian edzinon senkuraĝa kaj deprimita.

Ĉar ŝi riproĉis al li la foreston for de la geedza intimeco, la malfidela edzo seke respondis al ŝi:

– Ĉu ankoraŭ unu ĵaluzokomedio? Vi ja scias, ke tio helpas nenion!

– Plinio, mia kara – ŝi plorante klarigis –, ne temas pri ĵaluzo, sed pri la justa defendo de nia domo!

Kaj per malmultaj vortoj la malfeliĉa virino sciigis lin pri ĉiuj faktoj; rideto de nekredemo nun glitis trans

la lipojn de la oficiro, kiu iom indiferente diris kun akcento:

– Se ĉi tiu tuta historio estas ankoraŭ unu artifiko de ĵaluza virino, por teni min en la hejma enueco, via tuta peno estas nebezona, ĉar Saul estas mia plej bona amiko. Hierau, kiam mi troviĝis en serioza embaraso, por pagi kelkajn ŝuldojn, li pruntis al mi okcent mil sestercojn. Estus do pli bone, se vi pli ŝatus la honoron de nia nomo, metante finon al viaj rilatoj kun Agripo, jam tro kritikataj, por ke mi havus ian dubon pri ili!

Kaj tion dirinte, li ree foriris al la plezuroj de la nokta vivo, dum lia edzino silente elportis sian neesprimeblan moralan turmenton kaj sentis sin forlasita, nekomprenata, sen ia espero.

Kelkaj tagoj forpasis, malrapidaj amaraj, doloraj.

Pro sia natura virina sindeteno, Flavia ne kuraĝis konfidi sian grandan aflikton al la patro, jam mem tiel dispremita de la vivobatoj.

Konstatinte ŝian malgajecon, Agripo provis konsoli ŝian koron per amikaj vortoj, zorge konsiderante la perspektivojn de pli bonaj tagoj en la estonteco. La kompatinda sinjorino tamen okulfrape velkis sub la potenco de la neklarigebla malsano, detruanta ŝiajn fortocentojn, kaj sub la interna turmento de siaj doloraj sekretoj.

Siaflanke, Saul de Ĝioras, kvazaŭ liaj instinktoj estus ekzaltitaj de tiu minuto, kiam li havis inter siaj impetaj brakoj tiun arde deziratan virinon, ĵuris spite al ĉio posedi ŝin, nutrante la plej teruran intencon al venĝo kontraŭ la pli maljuna filo de Flaminio. Tial li daŭrigis plu siajn vizitojn en la palaco sur la monteto Aventino, ĉiam kun plej pereigaj intencoj.

Respektante la malnovajn tradiciojn de la familio Severus, kiu ĉiam plej klopodis por trakti tiun eksklavon kiel intiman amikon, Publio Lentulus, malgraŭ la neforta simpatio, kiun tiu inspiris al li, konsentis al Saul plej grandan senĝenecon, tute ne suspektante ties riproĉindajn intencojn. Sed nun Saul ne enmiksiĝis en la familion, kaj tute ne pensis pri renkontiĝo kun la edzino de Plinio aŭ kun ŝia patro; li vivis kun la servistoj de la domo aŭ en la privataj ĉambroj de Agripo, aŭ de ties frato kiuj neniam rifuzis al li la plej sinceran konfidon.

En la ombro, kie li sin kaŝis, li tamen penis observi la plej malgravajn paŝojn de la pli maljuna frato de Plinio; danke la konsumitecon de Flavia Lentulia, Agripo ofte restadis tutajn horojn kune kun la maljuna senatano, en ties privataj ĉambroj, jen ankoraŭ portante sian esperon, ke lia frato iam eble komprenos siajn familiajn devojn, jen voĉlegante al li la poeziadojn plej ŝatatajn en la urbo aŭ kun li amike komentariante la ĉarmajn bagatelojn de la socia vivo.

Sed la fia Saul ĉiutage iradis al la edzo de Flavia, por konigi al li senbazajn, malverajn faktojn pri ŝia intima vivo. Plinio Severus absolute kredis la sensencaĵojn de sia falsa amiko kaj ĉiam pliflamigis sian sindonon al Aŭrelia, kiu kaptis lian koron, sieĝatan kaj blindigitan de la plej malnoblaj tentoj de la materia vivo.

Venenita de la ripetataj krimaj intrigoj de Saul, la oficiro ricevis permeson por vojaĝi Gallujon, kien li intencis iri kun sia kromvirino, por kontentigi kaprican deziron, kiun ŝi de longe manifestis al li.

En la tago de ilia foriro Massilian, de kie li projektis iri plu internen de la provinco, Plinio akceptis

Saulon en la domo de Aurelia, proksime de la Forumo, kaj tie, ardante de malamo, aŭdis de la falsa amiko la plej terurajn asertojn, finitajn per jena malbonintenca propono:

– Se vi volos mem konstati la perfidon de Agripo kaj via edzino, nevidate revenu hodiaŭ nokte en vian hejmon kaj penu neatendite eniri en vian ĉambron. Tiam vi jam ne bezonos la zorgojn de mia amika aldoniteco, ĉar vi renkontos vian fraton en nedubinda sinteno.

En tiu momento Plinio Severus sin donis al la lastaj preparaj aranĝoj por sia vojaĝo, jam matene adiaŭinte siajn plej intimajn domanojn; por pravigi la nepran bezonon de sia foriro, li pretekstis ordonojn de sia militista ĉefo, kvankam tute alia estis la vera sed nekonigebla motivo de lia forveturo.

Aŭdinte la gravan denuncon de la Juda emancipito, la oficiro pretiĝis por ia ajn eventualaĵo, kaj, kun la spirito turmentata de bestecaj sentoj, vespere iris al la palaco sur la monteto Aventino.

Sed Saul, kiu celis plenumi sian kriman planon, laŭ sia senkompata, terura intenco, antaŭvespere eniris, ĉe la komprenebla senkulpeco de la domservistoj, en la privatan ĉambron de Agripo, agante en tia maniero, ke la sklavoj mem ne povas suspekti, ke li tie troviĝas.

Vespere, surprizante kelkajn servistojn, kiuj sciis, ke li jam adiaŭis sian familion, Plinio Severus neatendite eniris en sian domon kaj, nenion dirinte, blindigita de la kalumnio de sia falsa amiko, singarde penetris en la ĉambron de sia edzino; tiam li aŭdis la trankvilan voĉon de sia frato, kvankam li ne sukcesis perfekte ekscii, kion tiu diradis.

Iom forŝovinte la delikatan silkan kurtenon, li vidis Agripion en intima, frata korelverŝo, karesanta la manojn de Flavia kun dolĉa, apenaŭ perceptebla rideto.

Korpremata, li longe observadis iliajn plej malgrand-ajn gestojn kaj reciprokajn elmontrojn de pura frata amikeco; sed nun, en liaj okuloj, blindaj pro malamo kaj ĵaluzo, tiaj elmontroj aspektis kiel la plej sendubaj signoj de devodekliniĝo kaj adulto.

Ĉe la apogeo de la kolero, li abrupte disŝovis la kurtenojn kaj eniris en la edzinan ĉambron, kvazaŭ incitita tigro.

– Senhonoraj! – li mallaŭte kaj energie elvomis, penante eviti la skandalan ateston de la servistoj. – Ĉu tiel do vi ambaŭ montras la respekton, ŝuldatan al la digno de nia nomo?

Flavia Lentulia, kies malsano estis tiam pli grava, fariĝis neĝe pala, dum Agripo, treege surprizita, alfrontis la teruran rigardon de sia frato.

– Plinio, per kia rajto vi tiel insultas min? – li energie demandis. – Ni tuj eliru el ĉi tie. Viajn ofendajn demandojn ni diskutu en mia ĉambro. Ĉi tie sidas nobla virino, malsana kaj forlasita de sia edzo, kiu humiligas ŝian nomon kaj sentemon per krima, nepravigebla konduto, kaj al tiu sinjorino ni ŝuldas helpon kaj respekton!

La okuloj de Plinio Severus fulmis de malamo, dum lia frato serene ekstaris kaj foriris en sian ĉambron, akompanata de la oficiro; ĉi tiu tremis de kolero, kiun pliintensigis la sento de humiliĝo pro la dignoplena trankvileco de lia kontraŭulo.

Sed, kiam ili venis en la ĉambron de Agripo, la flamiĝema oficiro, post multaj akuzajoj kaj riproĉoj,

eksplodis per ekkrioj, kiel la jenaj:

– Nu! Klarigu vian konduton, perfidulo! Vi superŝutas per la koto de via malnobleco mian nomon, kaj nun vi malkuraĝiĝas sub la tego de tiu nekomprenebla sereneco?!

– Plinio – modere respondis Agripo, devigante sian dialoganton silenti kelkajn momentojn –, jam estas tempo, ke vi metu finon al viaj malsaĝaĵoj.

“Kiel do vi povos pruvi tian kalumnion kontraŭ mi, kiu ĉiam vin plej kore amis? Ĉia nedigna komentario pri la konduto de via edzino estas nepardoninda krimo. En ĉi tiu grava momento de niaj destinoj, mi parolas al vi, alvokante la neriproĉindan memoron pri niaj gepatroj kaj nian pasintecon plenan de sincereco kaj frata fideleco...

Aŭdante tiujn noblajn, serenajn konsiderojn, la arda oficiro estis preskaŭ senmova, kvazaŭ vundita leono, kaj dume Agripo esprimadis plu siajn plej profundajn kaj sincerajn impresojn:

– Kaj nun – li trankvile daŭrigis –, ĉar vi depostulas rajton, kiun vi neniam zorgis – kaj tion pruvas la senfina serio de viaj malsaĝaĵoj en la socia vivo – mi tial devas konfesi al vi, ke mi amegis vian edzinon super ĉio, dum mia tuta vivo! Kiam vi forkonsumis vian junecon ĉe la malkvieta spirito de Aŭrelia, ni vidis Flavian en ŝia juneco je la unua fojo, tuj post ŝia reveno el Palestino; tiam mi vidis en ŝiaj okuloj la karesan, dolĉan lumon, kiu heligus la trankvilan hejmon, kiun mi imagis en tagoj forpasintaj... Sed vi samtempe vidis tiun saman lumon, kaj mi ne hezitis rekoni la rajton de via koro, ĉar ŝi reciprokis la ardecon de via amo, kaj tial ŝajnis al mi, kvazaŭ ŝin katenas al vi la nedifineblaj ligiloj de ia sankta mistero! Flavia vin amadis tiam, kiel ĉiam, kaj al mi restis nur forgesi kaj peni kaŝi mian turmentan korprenatecon...

En la tempo de via edziĝo, mi ne elportis la doloron vidi ŝin foriri sub via brako, kaj, aŭdinte la aman, saĝan parolon de nia patrino, mi kun disŝirita koro foriris en aliajn landojn! Dum dek malgajaj, amaraj jaroj mi vagadis, tien kaj reen, de Massilia ĝis nia bieno en Avenio, en frenezaj, krimaj aventuroj. Senĉese turmentata de la memoro pri mia silenta, nehelpebla malfeliĉo, mi neniam plu povis dorloti la person estigi propran familion.

“Antaŭ nelonge mi revenis Romon kun la lastaj restaĵoj el mia dolora, fiaskinta iluzio...”

“Mi trovis vin en la abismo de nepermesita amo, sed ne kondamnis vian nepravigeblan devion.

“Mi scias, ke vi fordiboĉis tri kvaronojn de niaj komunaj havaĵoj, kontentigante la frenezan malavarecon de viaj bedaŭrindaj, malhonoraj aventuroj, kaj tamen mi ne riproĉis vian strangan konduton.

“Kaj ĉi tie, en ĉi tiu domo, sub ĉi tiu tegmento, kiu por ni ambaŭ estas la protektanta pliampleksigo de la patra, mi ĝis hodiaŭ estis por via edzino nur sindona, amika frato!”

Vidante sin malkaŝe akuzata pri siaj eraroj kaj sentante sin vundita je sia vantamo de viro, Plinio Severus pli sovaĝe reagis, ekzaltite ekkriante en sia furiozeco:

– Kanajlo, vi vane ŝajnigas tiun nekredindan animsuperecon! Ni egalas unu la alian laŭ la sentoj, kaj mi ne kredas, ke via sindono ne havas ian kaŝitan intereson en ĉi tiu domo. Jam de longe vi vivas kun Flavia, tute videble, en krimaj aventuroj, sed nun ni solvos nian tutan aferon per spado, ĉar unu el ni devas ja

malaperi!

Kaj tirinte el ĝia ingo la armilon, kiun li kunportis por iu bezono, li firmiĝis sin ĵetis kontraŭ sian fraton; ĉi tiu tamen serene krucigis la brakojn, atendente lian senkompatan frapon.

– Nu, kio do fariĝis el via vira digno? – ekkriis Plinio kolera. – Tiu flegmeco ja esprimas vian malkuraĝon... Prenu teniĝon por defendo de via vivo, ĉar, kiam du fratoj konkuras inter si pri sama virino, unu el ili devas ja morti!

Sed Agripo Severus malgaje ridetis kaj diris:

– Ne tre malfruigu la plenumon de via intenco, ĉar vi ĝuigos al mi la nesupereblan bonon de la tombo: efektive, mia vivo, kun siaj ĉiumomentaj turmentoj, jam nenio estas por mi krom kruta, longa vojo al la morto.

Rekonante lian noblecon kaj heroecon, sed tamen kredante la malfidelecon de sia edzino, Plinio denove eningigis la spadon kaj ekkriis:

– Bone! Mi povus mortigi vin, sed tion mi ne faros, pro respekto al la memoro pri niaj neforgeseblaj gepatroj; kvankam mi ankoraŭ kredas vian malnoblaĵon, mi tamen de ĉi tie foriros por ĉiam, kunportante en la profundo de mia animo la certecon, ke via spirito de perfidulo estas mia plej granda kaj plej kruela malamiko.

Nenion pli dirinte, Plinio larĝgapaŝe foriris, dum lia frato, irinte ĝis la pordo, faris al li lastan amikan peton, ke li ne foriru.

Sed iu sekvis la scenon, pretervidante nenian detalon. Tiu estis Saul de Ĝioras: elirinte el sia kaŝejo kaj subite estinginte la lumon de la ĉambro, li de poste atingis per trafa salto Agripon, kiun li vundis per forta frapo. La kompatinda junulo peze falis abunde sangante, ne povinte eldiri eĉ unu vorton. Post sia krimo la eks-sklavo forkuris, ŝajnigante senzorgecon, en tia maniero, ke neniu povus suspekti la doloran okazaĵon.

En sia ĉambro, Flavia Lentulia miris, kiom malfruas la solvo de afero, en kiun ŝi estis trenita kaj kiun ŝi konsideris, unuavide, kiel negravan okazon.

Post granda peno ŝi ekstaris kaj direktiĝis al la pordo, per kiu la ĉambro de Agripo komuniĝis kun la peristilo, sed, surprizita de la tie regantaj mallumo kaj silento, ŝi aŭdis, venantan de tiu ĉambro, nur ian apenaŭ percepteblan brueton, similan al raŭkaj sonoj de malfacila, angora spirado.

Posedita de dolora intuicio, la malfeliĉa virino sentis sian koron sentakte batanta. La senlumeco, tiu bruo de stertora spirado, kaj precipe la profunda terura silento devigis ŝin tie halti; ŝi iris do peti la helpon kaj sperton de Anna, kiu kaptis ŝian koron per sia sindono kaj humileco, dum ĉiuj tagoj de tiu ĉagrenplena parto de ŝia ekzistado.

La maljuna servistino de Livia ĝuis la estimon kaj amikecon de ĉiuj familianoj kaj nun estis kvazaŭ la mastrumantino, al kiu, laŭ ordono de la mastroj, ĉiuj sklavinoj en la Aventina palaco devis obei.

Vokita de Flavia al ties ĉambro, la malnova servistino de la familio Lentulus, aŭdinte la rapidan konfidencon de sia mastrino, kies timon ŝi mem sentis, akompanis la sinjorinon al la ĉambro de Agripo; ĉe la pordo ŝi, meditante, haltis, sed jam ne estis aŭdata la angora spirado, antaŭ kelke da minutoj

rimarkita de la edzino de Plinio.

– Sinjorino – ŝi afable diris –, vi estas sane malvigla kaj ankoraŭ bezonas ripozon. Reiru en vian ĉambron; se io fariĝis, kio pravigus vian timon, mi penos decidi pri la afero, petante helpon de via patro, kiun mi sciigos, en lia privata kabineto, pri la eventuala okazaĵo.

– Dankon, Anna – respondis la sinjorino videble emociita. – Mi konsentas kun vi; tamen mi atendos ĉi tie, en la peristilo, la rezultaton de viaj klopodoj.

Preĝante, la malnova servistino eniris en la ĉambron, kiun ŝi iom lumigis, sed terurita fiksita sur io la rigardon: sur la tapiŝo, la kadavro de Agripo Severus surventre kuŝis rulita en sango, kiu ankoraŭ fluadis el la profunda vundo, farita de la armilo de Saul.

Anna devis helpi al si per la tuta sereneco de sia fido, por ne kriegi, kio ĵetus teruron en la tuta domo; sed al ŝi, kiu tiom da suferoj estis jam spertinta dum sia vivo, ne estis malfacile aldoni ankoraŭ unu eron al la ĉeno de siaj ĉagrenoj, ĉiam rezignacie kaj serene elportitaj.

Tamen, ne povante kaŝi sian angoron kaj palegecon, ŝi reiris en la peristilon kaj iom maltrankvila sciigis al Flavia Lentulia, kiu afliktita observis ĉiujn ŝiajn movojn:

– Sinjorino, ne ektimu: sinjoro Agripo estas vundita...

Kaj ĉe la unuaj elmontoj de korporema scivolo de la senatanfilino, kiu rememorigis al sia kunulino la altan ekscitecon de sia edzo, antaŭ kelkaj momentoj, Anna trankviligis ŝin per jenaj vortoj:

– Ni ne perdu tempon! Ni iru al la senatano, por la unuaj disponoj; tamen mi pensas, ke mi sola devas prizorgi tiun aferon, kaj konsilas al vi la kvietecon de via ĉambro.

Sed, silentaj kaj ĉagrenitaj, ili ambaŭ sin direktis al la kabineto de Publio, kies okuloj estis fiksitaj sur multenombraj politikaj procesoj, en la serena nokto.

– Agripo vundita?! – forte surprizita demandis la senatano, eksciinte per Anna la okazintaĵon. – Kiu do estis la aŭtoro de tia atenco en ĉi tiu domo?

– Mia patro – respondis Flavia en larmoj –, Plinio kaj Agripo, antaŭ ne longe, serioze kverelis inter si en mia ĉambro!

Publio Lentulus komprenis la danĝeron de la konfidencaj paroloj de sia filino, ĉe tiaj cirkonstancoj, kaj, ne povante kredi, ke la filoj de Flaminio, ĉiam tiel noblaj kaj ligitaj unu al la dua, prenis armilojn por interbatado, diris per decida tono:

– Mia filino, mi ne kredas, ke Plinio kaj Agripo kuraĝus fari tian ekstreman paŝon.

Kaj, ĉar ili estis en la ĉeesto de Anna, kiu, kiom ajn ŝi nun meritis ilian personan kofidon, ne povus tamen modifi la strukturon de iliaj rigidaj familiaj tradicioj, li aldiris, kvazaŭ dezirante averti la spiriton de sia filino kontraŭ ia nekonvena sciigo, kiu senrimede povus impliki ŝian nomon en socian skandalon:

– Cetere, ŝajnas al mi, ke via memoro ne estas tre fidela, ĉar Plinio adiaŭis nin matene, por forvojaĝi Massilian: ni ne povas forgesi ĉi tiun cirkonstancon. Ĉu ne estis vidita ia nekonato en ĉi tiu domo?

– Sinjoro – humile respondis Anna –, antaŭ kelkaj minutoj mi vidis, ke sinjoro Saul rapide eliras el la ĉambro de la vundito. Laŭ miaj observoj kaj konsidere al lia familiareco rilate viajn amikojn, mi kredas, ke li estas la ĝusta homo, por doni al ni ian klarigon.

La okuloj de la maljuna senatano strange ekbrilis, kvazaŭ li estus trovinta la ŝlosilon de la enigmo.

Sed en tiu momento, dum li rapide ordigis siajn paperojn, por doni la unuan helpon al la vundito, Flavia Lentulia, kvazaŭ la rimarkoj de Anna instigus ŝin fari aliajn klarigojn, eksplodis per larmoj.

– Mia patro, mia patro, nur nun mi memoras, ke mi devis siatempe sciigi vin pri pri tre gravaj aferoj!

– Filino – li decide interrompis –, vi estas malsana kaj laca. Reiru en vian ĉambron, mi penas ĉion rebonigi! Estas jam tro malfrue por ia flanka pripenso. La gravaj aferoj estas ĉiam malbonaj, kaj malbono, kiun oni ne eltranĉas ĉe ĝia radiko, kun la necesa saĝo, ĉiam estas semo de malfeliĉo, tenata en nia koro kaj krevonta per amaraj larmoj en neatenditaj momentoj de la vivo! Ni do parolos pri tio poste. Nun estas necese fari tion plej urĝan kaj oportunan.

Rapide forirante, kune kun la servistino, direkte al la ĉambro de la junulo, li rimarkis, ke Flavia sendiskute obeas lian ordonon, revenante en sian ĉambron.

Enirinte en la ĉambron de Agripo, en akompano de la maljuna servistino, Publio Lentulus taksis la amplekson de la tragedio, tie okzinta sub lia respektinda tegmento.

Ferminte la eniran pordon, la senatado konstatis, ke la pli maljuna filo de lia neforgesebla Flaminio estas mortinta; restis nur ekscii la detalojn de tiu dolora dramo, kies korŝira fino estis la sola sceno, kiu tie montriĝis al iliaj okuloj.

Genufleksinte ĉe la kadavro, kion saman faris la lojala servistino kaj amikino, li en malespero diris:

– Anna, estas jam tro malfrue! Mia kompatinda Agripo jam ne vivas, kaj cetere neniam helpo ekzistus por tia vundo! Ŝajnas, ke li mortis nur antaŭ nemultaj momentoj!

Turninte al la ĉielo siajn okulojn malsekajn de larmoj, li amare ekkriis:

– Ho dioj de mia malfeliĉa filo, akceptu nian preĝon por la eterna ripozo de lia animo!

Li ne povis daŭrigi tiun preĝon. Lia voĉo estis sufokita. Tiu terura sceno lin profunde skuis. Li volis paroli plu, sed ne povis, ĉar lia gorĝo estis kvazaŭ disŝirita kaj ribelis, sub la forto de la plorsingultoj, kiuj estingiĝis en la dezerto de lia fiera spirita fortikeco.

Anna lin rigardadis afliktita, ĉar ŝiaj okuloj neniam antaŭe, dum ŝia tuta longa tempo da servado en tiu domo, tiel intime vidis lian animon. En ŝiaj okuloj, Publio Lentulus estis ĉiam la malvarma, senkompata viro, en kies brusto batis ia fera koro, kiu kapablis vibri nur ĉe la frenezaj mondumaj vantaĵoj.

Sed en tiu momento, ŝi, samtempe maltrakvila kaj kortuŝita, konstatis, ke ankaŭ la senatano havas larmojn por elverŝi. El liaj ĉiam fieraj okuloj fluis varmaj larmoj, kiuj ruliĝis, silentaj kaj malgajaj, sur la senmova kapon de la junulo, kiun li konsideris ankaŭ filo, kvazaŭ jam nenio restus al li krom la plej granda konsolo, karese ĉirkaŭbraki ties kadavron, tra la nigra vualo de siaj turmentaj duboj.

Profunde tuŝita de la akreco de tiu intima sceno, Anna humile diris, dezirante dolĉigi la grandegan doloron de la neriparebla malfeliĉo:

– Sinjoro, ni havu kuraĝon kaj serenecon. Per miaj humilaj preĝoj mi ĉiam petas la profeton el Nazaret, ke li el la Ĉielo protektu vin, konsolante vian suferantan, senesperan koron!

La menso de la senatano baraktis en la reto da premaj duboj. Komparante la rimarkojn de sia filino kun la vortoj de Anna, li penis trovi en sia animo ian intuicion pri la murdinto. Kiun el la du viroj, ĉu Plinion aŭ Saulon, li kulpigu pri la abomena krimo? Li, kiu decidis tiom da malfacilaj procesoj, dum sia vivo; li, kiu estis senatano kaj kiu, ankaŭ, preterlasis nenian okazon partopreni en la laboroj de la Roma magistrato –, li nun spertis la grandegan doloron eldiri juĝon en sia hejmo mem, antaŭvidante la elruiniĝon de la feliĉo de siaj tre amataj infanoj!

Sed, aŭdante la konsolajn, karesajn parolojn de la servistino, li rememoris la eksterordinaran homon, kia estis Jesuo Nazaretano, kies doktrino de kompatemo kaj favorkoreco tiom multajn fortigis, por ke ili alfrontu la plej akrajn situaciojn en la vivo, aŭ heroe mortu, kiel mortis lia edzino mem. Tiam, kun neatendita intimeco kaj kortuŝa monstro de nobla simpleco, kian la servistino neniam antaŭe vidis ĉe li, en ia ajn okazo dum la hejma vivo, li, turnante sin al ŝi, diris:

– Anna mi ĉiam, dum mia tuta vivo, estis energia viro; tamen nepre venas momento, kiam nia koro sentas sin frakasita, ĉe la severeco de la bataloj, kiuj la mondo trudas al ni kun siaj amaraj, doloraj elreviĝoj! Vi estas nur kaj simple servistino, kaj nun, kvankam tro malfrue, mi scias ŝati vian koron!

Spontanea larmo interrompis lian parolon, sed la maljuna patricio diris plu:

– Dum mia tuta ekzistado mi juĝis grandegan nombron da ĉiaspecaj procesoj, rilataj al la monda justeco; sed, de kelka tempo ĝis hodiaŭ, ŝajnas, kvazaŭ mi troviĝas sub la nekontraŭebla forto de ia supera Justico, kies tribunaloj ne staras sur la Tero!

“De post la morto de Livia, mi sentas mian koron modifita, inklina al sentemo, kian ĝis tiam mi ne konis.

“La alproksimiĝo de la maljuneco ŝajnas ia antaŭsigno de la pereco de ĉiuj niaj revoj kaj esperoj!

“Antaŭ ĉi tiu kadavro, kiu certe pligrandigos la ombbron de niaj familiaj sekretoj, mi sentas, kiel dolora estas la tasko pruvi la senkulpecon de niaj karuloj; kaj, ĉar vi parolas pri la Nazareta Majstro, kies doktrino de paco kaj frateco jam instruis tiom da homoj morti kun plej altaj rezignacioj kaj heroeco, por la venko de la kruco de iliaj surteraj suferoj, kiel do li agus en tia okazo, kiel ĉi tiu, en kiu la plej teruraj duboj sidas en mia koro, koncerne la kulpecon de tre amata filo?”

– Sinjoro – humile respondis Anna, profunde emociita pro tiu elmonstro de amikeco kaj estimo –, Jesuo ofte instruis, ke ni ne juĝu, por ke ni ne estu juĝataj.

Ricevinte de virino tiel simpla kaj tiel senkultura, kia li ŝin opiniis, tiun belegan sintezon de la homa filozofio, la senatano ekmiris kaj rememoris sian doloran pasintecon.

– Sed – li argumentis, kvazaŭ dezirante pravigi sin pro la grandaj eraroj dum sia estinteco de politikisto –, kiu ne juĝas, tiuj pardonas kaj forgesas; kaj kvankam la leĝoj de la vivo ordonas, ke ni danku tiun, kiu faris al ni bonon, ni tamen ne povas pardoni la malbonon ĵetitan sur nian vojon!

Sed Anna ne preterlasis la okazon por plifirmigi la evangelian instruon, kaj delikate aldonis:

– Eĉ en mia lando mem la malnova Leĝo ordonis, ke oni postulu okulon pro okulo kaj denton pro dento; tamen, ne forviŝante la esencon de la instruoj en la Templo, Jesuo el Nazaret diris, ke tiuj, kiuj plej multe eraras en la mondo, estas la homoj plej malfeliĉaj kaj plej multe bezonantaj nian spiritan helpon, kaj rekomendis, per sia doktrino de amo kaj karito, ke ni ne pardonu nur unufoje, sed ĝis sepdekoble sep fojoj.

Publio Lentulus miris lernante, diratajn de lia servistino, tiujn noblajn maksimumojn, konformajn kun la principoj de la senkondiĉa pardono. Pardonu? Tion li neniam faris dum siaj akraj bataloj en la mondo. Liaj edukiteco ne permesis indulgon aŭ kompaton je la malamikoj, ĉar ĉia pardono kaj ĉia humiligo estis, por la homoj de lia socia klaso, tio sama, kiel perfido aŭ malkuraĝo.

Sed nun li memoris, ke ĉe multaj politikaj procesoj li povus pardonu kaj ke, en multaj okazoj dum sia vivo, li povus kovri la okulojn de sia severeco per la vualo de ama forgeso.

Ne sciante kiel, kvazaŭ ia nekonata energio kondukus lian menson reen al la pasintaj tempoj, li transportis sin, per la rememoro, al la malproksima peco de sia vivo, kiam li forvojaĝis Judujon; tiam, per la okuloj de la imago li revidis tiun scenon, kiel li, pro sia rigoreco, senkompatate sklavigis malfeliĉan junulon. Efektive, ankaŭ tiu junulo estis nomata Saul, kaj nun al la senatano turmentis la cerbon amaraj duboj, inter tiu Saul, emancipita de liaj amikoj, kaj la persono de Plinio, kiun lia opinio ĉiam tenadis en luma rondo el amo kaj bonvolo.

Pardonu?

Kaj la penso de la senatano longe restis implikita en amara, afliktanta meditado dum tiuj turmentaj, treniĝantaj minutoj. Tio estis eble unu el la maloftaj fojoj dum lia vivo, ke lia cerbo hezitis, timante faligi la severecon de sia juĝo sur la kapon de tre kara filo.

Sed, tirante sin el tiu kelkminuta apatio, li per decida tono ekkriis:

– Anna, la Nazareta profeto certe estis dia figuro ĉi tie, sur la Tero! Sed mi estas homo kaj bezonas novajn fortojn por ekzistado ekster mia epoko... Mi volas pardonu, sed ne povas... Mi volas juĝi pri ĉi tiu afero kaj ne scias, kiel tion fari... Mi tamen ja scios decidi pri la solvo de ĉi tiu korpremana problemoj! Mi ĉion eblan faros, por observi la instruojn de via majstro, tenante min en silento, ĝis mi konos la veran kulpulon; tiam mi penos ne juĝi kiel la homoj, sed mi petos tiun dian justecon montriĝi, helpante miajn pensojn kaj lumigante min pri miaj agoj...

Kaj, kvazaŭ repreninte sian kutiman energion por la bataloj de la vivo, la maljuna patricio decide diris:

– Nun ni zorgu pri la vivo laŭ ĝia dolora realeco...

Li portis la kadavron de Agripo sur la liton kaj, rekomendinte al la servistino prepari la spiriton de lia filino kaj subteni ŝian koron en tiu dolora momento, li malfermis la pordojn de la ĉambro kaj petis la ĉeeston de ĉiuj domaj servistoj; poste, li konigis la aŭtoritatulojn pri la okazintaĵo kaj samtempe komencis rigoran enketon, por trovi la krimulon, kvankam tiaspeca fakto estis rigardata kiel io tre ordinara dum la turmentaj tagoj de la tiama Romo sub la regado de Domicio Nerono.

Kelkaj servistoj deklaris, ke ili vidis Plinion kun sia frato dum la nokto, sed la parolo de la senatano nuligis iliajn informojn per la aserto, ke la frato de la viktimo foriris dum la tago, direkte al la haveno de Massilia.

Saul estis do la ĝusta homo, por klarigi la aferon, kaj, jam antaŭ ol efektiviĝis la funebra ceremonio, la senatano opiniis sin prava, kredante lian kulpon, laŭ ties strangaj elturniĝaj paroloj kaj aludoj, kiuj ne kontentigis la postulojn de la psikologia esplorado de Publio. Liaj asertoj kaj duonparoloj ne akordis kun la kategoriaj certigoj de Anna, kies verdiremon li bone konis. Ĉe kelkaj punktoj de siaj informoj li neis, ke li estis en la ĉambro de Agripo, kaj jam pro tio la senatano tuj konkludis, ke li mensogas.

Plinio ne estis ja trovita: oni ricevis nur la nedetalan sciigon pri lia forvojaĝo al Massilia, kio fakte okazis en la sama nokto de la tragedio, post la decida kverelo kun la frato, en la Aventina palaco. En kompanio de Aŭrelia li do iris Gallujon en luksa galero, tra la kvietaj akvoj de la iama "mare nostrum".

Sed la senatano deziris nur aŭdi pli bone la konfidencojn de sia filino, por elpremi la finan konfeson al tiu malnoblulo, kiun Flaminio emancipis kaj pri kies kulpeco li jam ne dubis.

Li do faris disponojn, por ke la filo de lia neforgesebla amiko ricevu plej diskretan funebran ceremonion, kiun Saul senhonte kuraĝis ĉeesti kun la tuta venena sereneco de sia abomena spirito.

Sub la pereiga efiko de mortigaj venenoj, kiujn Ateja, la perfida servistino, por tio pagita de Aŭrelia, krime almiksis al ĉiuj kosmetikoj uzataj de ŝia mastrino por flegado de la haŭto kaj okulharoj, la fizikaj suferoj de Flavia Lentulia estis nun serioze pli gravaj; al tio aldoniĝis ŝia terura morala situacio ĉe la dolora okazintaĵo kaj ŝia dispremiteco pro afliktantaj duboj.

Ŝia infanjara lepro ŝajnis revivanta, ĉar ŝia korpo denove kovriĝis per doloraj ulceroj kaj la okuloj aspektis kvazaŭ trafita de ia kruela malsano.

Tri tagojn post la funebra ceremonio de Agripo, Publio Lentulus, profunde kortuŝita, aŭdis ŝian doloran raporton, kun plej granda atento, plena de amo kaj intereso. Post tiu detala raporto de la filino, kies ĉagrenoj de edzino krevigis lian koron, la maljuna senatano petis, ke Saul estu denove pridemandata en lia ĉeesto; sed, sendinte servistojn por venigi la emancipiton de Flaminio, li estis konsternita de alia surprizo. Respondinte la privatajn demandojn de Publio Lentulus, jam antaŭ ol okazis tiu ceremonio, Saul de Ĝioras klare komprenis ties mensan sintenon kontraŭ li kaj konkludis, ke li ne povas trompi la psikologian takton de la maljuna senatano.

Du tagojn post la funebra ceremonio, la iama sklavo, kun ekscitita, maltrankvila spirito, iris konsulti Arakson, en ties naŭza kaŝejo sur la monteto Eskvilino.

Konsiderante lian divenkapablon, kiun efektive ekspluatis malicaj fortoj de la nevideblaj regionoj, alligitaj al ties pereiga monavidemo, Saul sincere kredis la supernaturan kunhelpon de la magiisto, kaj rimarkis, ke la divenisto lin akceptas kun sia ĉiam mistera flegmo. Sian grandegan monujon, ŝvelintan de moneroj, li tre videble elmetis, kvazaŭ por montri al Arakso siajn riĉajn rimedojn, por la akiro de la talismano, kiu portos al li la feliĉon.

Konstatinte lian malavaran humoron, la maljuna sorĉisto, kies vizaĝon la tempo ŝrumpigis, superŝutis Saulon per ridetoj de ambicia, enigma bonvolo, kaj laŭŝajne esploris lian teruritan, malkvietan rigardon per siaj moviĝemaj kaj penetrantaj okuloj.

– Arakso – ekkriis Saul per preskaŭ peteganta voĉo –, mi estas laca atendadi la amon de la virino, kiun mi adoras! Mi estas afliktita kaj premata de zorgoj... Mi bezonas serenigi miajn pezajn ĉagrenojn. Aŭskultu min! Mi volas el viaj manoj ricevi la feliĉotalismanon por mia malprospera amo!

La maljuna divenisto dum kelke da minutoj tenadis la kapon inter la manoj, en tute propra maniero, kaj poste respondis per preskaŭ neaŭdebla voĉo:

– Sinjoro, la voĉoj de la nevidebla mondo diras al mi, ke viaj suferoj ne venas de nekomprenata kaj senespera amo...

Sed la emancipito, kiu spertis la plej akran konscienciproĉon, ĉar li forprenis la vivon de amiko kaj bonfarinto en plena florado de la juneco, interrompis lian parolon kaj tranĉe ekkriis:

– Kiel do vi kuraĝas kontraŭdiri min, abomena sorĉisto?

Sed, kun stranga brilo en siaj malkvietaj okuloj, Arakso rapide rebatis:

– Ĉu vi do opinias min abomena sorĉisto? Tamen eĉ tiel mi min ne detenas kaj diras ja la veron, kiam la vero al mi konvenas.

– Nu, mi ripetas, kion mi diris! Sed, al kiaj misteraj veraĵoj vi aludas per viaj neprecizaj asertoj? – demandis la emancipito forte ekscitita.

– Vere, mia amiko – diris la magiisto kun malbonsigna sereneco –, se vi estas tiel konsternita, tio okazas nur tial, ke vi estas krimulo. Vi malvarmsange murdis bonfarinton kaj amikon, kaj la konscienco de la maliculo timas la manon de la Justico.

– Silentu, hundo! Kiel vi do tion eksciis? – ekkriis Saul tre ekscitita, samtempe tirante ponardon el inter la faldoj de sia mantelo.

Kaj, paŝante kontraŭ la sendefendan maljunulon, li aldonis kun kaveca voĉo:

– Ĉar viaj okultismaj konoj havigas al vi sciojn pereigajn por la aliula trankvileco, ankaŭ vi devas malaperi!

Arakso komprenis, ke tiu estis decida momento. Tiu flama viro ja estus kapabla mortigi lin per unu sola frapo. Rapide mezurinte la situacion kaj disvolvante sian tutan ruzecon, por konservi sian vivon, li apenaŭ montris hipokritan kaj indulgan rideton, kaj diris:

– Pa, pa, mi parolis la veron nur por tio, ke vi povu taksi mian spiritan potencon, ĉar, se vi tion deziras, mi povos tuj doni al vi la bezonatan talismanon. Ĝin posedante, vi estos profunde amata de via preferata virino... Per ĝi vi alligos la plej intimajn sentojn de tiu virino, kiun vi adoras kaj kiu tiam faros vin feliĉa por la tuta vivo. Koncerne la duan aferon, vi ne estas la unua, kiu forprenis la vivon de iu homo, ĉar ĉiutage venas al mi klientoj en via situacio. Cetere, inter ni devas ekzisti granda reciproka konfido, ĉar jam de pli ol dek jaroj vi estas mia kliento.

Aŭdinte liajn bonsentajn, serenajn vortojn, la emancipito de Flaminio rekaŝis la armilon, konsiderante novajn perspektivojn de feliĉo kaj tute konsentante kun la divenisto; ĉi tiu, invitive lin eksidi, okupis lian atenton dum pli ol unu horo, priskribante faktojn identajn al tiuj, okazintaj al Saul, kaj teorie pruvante la

efikecon de siaj miraklaj amuletoj. La konversacio fluadis bonorde, kaj dume Saul petis la tujan liveron de la talismano, ĉar li deziris provi ĝian efikon en tiu sama tago; ĉe tio Arakso komplezeme respondis:

– Via talismano estas preta. Mi povas liveri al vi tiun altvalorajn en ĉi tiu minuto; tio dependas nur de vi mem, ĉar vi devos trinki la magiajn, kiu havigos al vi la spiritajn kondiĉojn, postulatajn de la entrepreno.

Saul tute ne kontraŭstaris la altrudojn de la maljuna Egipto, kiu tiel faris groteskajn, misterajn manovrojn, kaj eniris en ĉambron ornamitan per diversaj strangaj simboloj, al li tute nekonataj.

Arakso ludis la plej sugestiajn teatraĵojn. Sur la ordinaran togon de Saul li metis larĝan tunikon, egalan al tiu, per kiu li mem estis vestita, kaj, post afektaj gestoj de ia nekomprenebla magio, eniris en sian malgrandan laboratorion, kie li prenis boteleton da forta veneno dirante al si mem:

– Vi tuj ricevos la talismanon plej konvenan al vi en tiu ĉi mondo...

Li verŝis kelke da gutoj de la danĝera trinkaĵo en pokalon da vino, kaj kun larĝaj teatrecaj movoj, kvazaŭ plenumante ian nekonatan riton, ĝin donis al Saul por trinki, kaj daŭrigis la saman ridindan gestadon, kiu estis ja la pitoreska, terura esprimo de stranga magio de morto.

Englutinte la vinon kun la plej bona intenco ricevi la amuleton de sia feliĉo, la danĝera emancipito eksentis, ke liaj membroj malstreĉiĝas sub la potenco de ia nekonata, detrua forto, ĉar al li mankis la voĉo mem, por ke li vortigu siajn plej internajn emociojn. Li volis krei, sed vane; ankaŭ senutilaj estis ĉiuj penoj, kiujn li faris por stariĝi. Iom post iom liaj okuloj morte senbriliĝis, kvazaŭ nebuligitaj de ia densa, nedifinebla ombro. Li deziris kraĉi sian malamon kontraŭ la murdinta magiisto, defendi sin kontraŭ tiu angoro, kiu sufokis al li la gorĝon, sed la lango estis rigida kaj ia penetranta malvarmo invadis liajn vivorganojn. Lasinte la kapon pendi sur la kubutojn, apogitajn al la granda tablo, li komprenis, ke la fulmobata morto nuligas ĉiujn fortojn de lia organismo.

Arakso trankvile fermis la ĉambron, kvazaŭ nenio estus okazinta, kaj revenis en la butikon, kie li diligente servis sian multenombrian klientaron, sen rompo de sia ordinara sereneco.

Sed antaŭ la noktiĝo li eniris en la funebran ĉambron kaj, malpleniginte la monujon de la kadavro, silente metis ĝian enhavon inter siajn abundajn provizojn de avarulo.

Post la dek-unua vespere, kiam la urbo dormis, la maljuna sorĉisto de la monteto Eskvilino sin miksis inter la sklavoj, kiuj faris la noktan transportadon, puŝante manĉareton, kie kuŝis granda pakaĵo.

Post longa irado li atingis la ĉirkaŭaĵon de la Forumo, inter la Kapitolo kaj la monteto Palatino, kaj tie li ripozis ĝis la lasta kvarono de la nokto; tiam li delasis sian ŝarĝon ĉe la malluma angulo de la strato kaj trankvile revenis por dormi, kiel ĉiunokte.

Matene la kadavro de Saul estis facile indentigita; ankoraŭ serĉante la emancipiton por klarigoj, la senatano ricevis la surprizon de tiu sciigo; tiam konsternita ĉe la komplika mekanismo de la Dia Justeco, li demandis sin mem pri la motivoj de tiu neantaŭvidita, stranga morto, kaj sian propran konsciencon li demandis, ĉu Saul ne estis unu el tiuj krimuloj, tuj punitaj de la leĝo de la kompensoj, sur la senfina vojo de la destinoj.

Lia koro, pli ol iam antaŭe, inklina al la esplorado de la profundaj filozofiaj demandoj, dronis en ia abismo de konjektoj, rememorante la rekomendon de la Spirito de Flaminio kaj la noblajn lecionojn de Anna, kiuj sin apogis sur la Evangelio: li plej volonte penadis solvi la problemon pri la pardono kaj la kompatemo. Dezirante kontentigi sian konsciencon per agoj de la praktika vivo, li ĉe tiu okazintaĵo pensi rompi siajn tradiciojn kaj kutimojn, kaj, irinte al la domo de tiu viro, kiu atencis kontraŭ la vivo kaj la honoro de liaj gefiloj, ordonis, ke ĉio estu farita, por ke ne manku dececo kaj respekto ĉe ties funebra ceremonio. Kelkaj fidindaj sklavoj kaj servistoj havis instrukciojn por solvi ĉiujn problemojn rilatajn al la ne finitaj negocoj de la mortinto; kaj, kunhelpante tiun ceremonion, Publio Lentulus estis kontenta, ke li venkis sian personan antipation kaj ankaŭ honoris la memoron de Flaminio.

Preninte loĝejon kun sia nova kunvivantino en Avenio, Plinio Severus estis informita de amikoj pri la tragedio okazinta en Romo, en la nokto, kiam li forvojaĝis, kaj ankaŭ pri la malagrabra suspekto, pendanta super lia kapo. Profunde tuŝita ĉe siaj sentemaj fibroj kaj rememorante sian fraton, kiu tiel ofte donis al li la plej altan montron de amikeco, li deziris reveni, por tute klarigi la aferon kaj venĝi la morton de Agripo; sed, moliĝinte inter la brakoj de Aŭrelia kaj timante la juĝon de la maljuna senatano, respektata kvazaŭ patro, kaj, krom tio, sub la suspekto, kiun ĉe li naskis la sciigo pri la neklarigebla malsano de la edzino, li senenergie daŭrigis plu sian nekompreneblan vivadon, tra Avenio, Massilia, Arelate, Antipolo kaj Nico, penante dronigi en ebriigaj plezuroj la pezajn ŝarĝojn, pri kiuj li respondis.

Apud Aŭrelia la vivo de la oficiro dum tri jaroj fluadis en kondamninda trankvileco, sed unu tagon li ricevis la doloran surprizon trovi sian perfidan, nesenteman kunulinon inter la brakoj de la muzikisto kaj kantisto Sergio Aceronius, kiu alvenis Massilian kunportante la bruajn amuzojn de la ĉefurbo de la Imperio.

En tiu tago de sia amara ekzistado, la filo de Flaminio kun armilo en la mano sin ĵetis kontraŭ la perfidan virinon, decidinte meti finon al ŝia krima, diboĉa vivo. Sed, ĉe la momento de sia venĝo, li pripensis, ke la murdo de iu virino, kvankam ŝi estas diable malica, ne devas partopreni en lia vivo; kaj li ankaŭ opiniis, ke lasi ŝin iri plu sur la malglata vojo de siaj kruelaĵoj, estas la plej bona venĝo de lia perfidita, malfeliĉa koro.

Li do por ĉiam forlasis tiun malĉastan virinon, kiu poste, en Antium, estis mortigita de la sangsoifa ponardo de Sergio: ĉi tiu ja ne toleris ŝian malfidelecon kaj obstinon en la krimo.

Vidante sin sola, Plinio Severus amare pripensis la krientajn erarojn de sia vivo. Li revidis pasintecon, plenan de riproĉindaj frivolaĵoj kaj frenezaj agoj. Preskaŭ malriĉa, li opiniis sin tro neinda pro reveni Roma socio, kie li tiel ofte briladis dum sia juneco, donante sin al malavaraĵoj, feliĉaj aventuroj.

La senatano vane faris al li amikajn alvokojn. Kun sia honorsento vekita de la doloraj instruoj de la propra destino, la oficiro, helpata de kelkaj Romaj amikoj, preferis klopodi por sia rehonoriĝo en la urboj de Gallujo; tie li longajn jarojn restadis, silente, severe laborante por la releviĝo de sia nomo ĉe la parencoj kaj pli intimaj amikoj.

Jam matura, en la aĝo de la profundaj pripensoj, kaj for de siaj plej karaj estuloj, forte li devis penadi por sia rehonoriĝo.

Kun sia rigida spirita strukturo, la maljuna senatano brave rezistis al la tre akraj batoj de la destino. Farante el la ĉiutaga batalado la plej bonan vojon de instruado, li vidis, sen malkuraĝiĝo kaj senfareco, la fluadon de la jaroj.

De post la tragikaj okazaĵoj, kiam Agripo kaj Saul mistere perdis la vivon, nun, kiam la edzo ŝin definitive forlasis, al Flavia Lentulia estis la sano por ĉiam ruinigita. Sur la epidermo la efikoj de la venenoj de Ateja estis nuligitaj de la aplikitaj kuraciloj, sed la lumo de ŝiaj okuloj por ĉiam estingiĝis; afekciita kaj blinda, ŝi tamen trovis en la nobla koro de Anna la patrinecan amon, kiu al ŝi ne mankis ĉe tiaj doloraj cirkonstancoj de la vivo.

Spite al ĉio, la fizika strukturo de la senatano rezistis kontraŭ ĉiaj frapoj kaj malfeliĉaĵoj.

Inter liaj penoj, por ame prizorgadi sian filinon, kaj la politikaj laboroj, kiuj tenis ĉe si lian plej grandan atenton, liaj tagoj pasis plenaj de akraj bataloj, sed, kiel ĉiam, silentaj kaj malgajaj.

Lia spirito troviĝis nun el la plej firma kaj sincera humoro, por kompreni la sanktan esencon de la kristanismo intruoj, kaj, en tia stato, lia koro envenis en la krepuskon de la maljuneco, kvazaŭ la ombrojn heligus mildlumaj steloj. En lia plejprofundo restadis neskuebla sereneco, sed en la materiala vivo bolis la tumulto de la klopodoj por la entreprenoj de lia tempo. Lia koro rezignaciis pri la doloraj, amaraj elreviĝoj de la destino, sed la superegan povon de la Imperio havis tirano, kiu devos fali, por la starigo de la rajto kaj de la familio; kaj tial, kune kun multenombraj amikoj, li sin donis al la subtila laborado de la interna politiko, celanta la detronigon de Domicio Nerono, kiu ne ĉesis sufoki la urbon per la naŭzaj spektakloj de sia abomena regado.

Kajo Pizono, Seneko kaj aliaj respektindaj homoj de tiu tempo, pli ardantaj de patriotismo kaj de amo al la justeco, falis sub la krimaj manoj de la kronita fiulo; sed Publio Lentulus, kun aliaj samidealaj fratoj, kiuj laboradis, en la silento kaj en la ombro de la sekreta politiko, ĉe la militistoj kaj la popolo, atendis la morton aŭ la ekzilon de la tirano kaj la lumon de la estonteco; efektive, tiu lumo aperis dum la nedaŭra regado de Servio Sulpico Galbo, kiun, laŭ la esprimo de Tacito, ĉiuj konsiderus inda je la krono de la Imperio, se li ne estus ricevinta la sceptron.

VIII - ĈE LA DETRUADO DE JERUSALEM

Pli ol dek jaroj, silente amaraj, fluis post la jaro 58, en la ordinara vivo de la personoj de ĉi tiu historio.

Nur en 69 la porpaciga politiko de granda nombro da patricioj, inter kiuj Publio Lentulus, sukcesis definitive forpuŝi Domicion Neronon kaj ties abomenajn kruelaĵojn. Tamen la regado de Galbo daŭris malmultajn monatojn, kaj tiu jaro 69 vidis grandajn okazaĵojn en la vivo de la Imperio.

Sennombraj luktoj plenigis la urbon per teruro kaj sango.

La serioza malpaco inter Oton kaj Vitelio dividis ĉiujn klasojn de la Roma familio en antagonismajn partiojn, kiuj en ekstrema grado sin reciproke malamis. Fine, la fama batalo apud Bedriako havigis la tronon al Vitelio, kiu komencis novan serion da kruelaĵoj en ĉiuj politikaj grupoj. Sed la interna politiko vigle staris en la ombro kaj streĉe kontroladis la situacion, por ne permesi, ke daŭru plu la ondo da ekstermado kaj malnobleco.

Vitelio tenis la regadon nur dum ok monatoj kaj kelke da tagoj, ĉar en tiu sama jaro 69 la legioj, servantaj en la Afrika teritorio, instigite de la lerta orientado de la homoj, kiuj forpelis de la regado Neronon kaj

ties bandon, proklame elektis Vespazianon por la plej alta funkcio en la Imperio. Kontentigante la ambiciajn postulojn de ĉiuj civilaj kaj militistaj klasoj, la nova imperiestro, kiu ankoraŭ sur la batalkampo klopodadis pro la repacigo de la malproksima Judujo, estis triumfe akceptita sur la superegan postenon, kaj tiel komenciĝis la glora epoko de la Flavioj.

Vespaziano estis membro de tiu grupo da laboremaj patricioj, kiuj sen parado kunhelpis por la faligo de la tiranoj.

Persona amiko de Publio Lentulus, la imperiestro famiĝis, ne nur pro siaj militistaj venkoj, sed ankaŭ pro sia saĝa politika sperto, konstatita en Romo ekde la tumultaj tagoj de regado de Kaligulo.

Sub lia administra orientado, kelkatempe ĉesis la registaraj maldecaĵoj, ekestis nova periodo da kompreno pri la popolaj bezonoj, kaj, sur la vojo de liaj ekonomiaj- financaj planoj, la Imperio paŝis al la rehonorigaj tagoj de nova epoko.

Ĉiujn tiujn okazaĵojn Publio ricevis kun la apenaŭ sentata ĝojo, kiun al li ebligis liaj 67 jaroj da luktoj kaj akraj travivaĵoj. En la serena lumo de la maljuneco, liaj morala strukturo kaj fizika fortikeco estis ĉiam la samaj.

Esperante pli bonajn tagojn por la patriotismaj entreprenoj, li nun konsideris kiel utile uzitan la tutan tempon, en kiu li forestis de apud sia blinda filino, por kontribui al la laboroj por la kolektiva bono; kaj en tia spiritostato, kun kontenta konscienco pro la plenumita devo, laŭ sia maniero rigardi la aferojn, li iris al la palaco, obeante specialan alvokon de la imperiestro, kiu ofte petis la konsilon de siaj malnovaj samidealanoj.

– Senatano – diris al li Vespaziano, en la kvieta intimeco de unu el la luksaj kabinetoj de la imperiestra loĝejo –, mi venigis vin, por ke vi helpu min per via tradicia aldoniteco al la Imperio, por la solvo de unu afero, kiun mi opinias plej grava. (*)

(*) Vespaziano estis en Romo tuj post sia proklamado. – Rim. de Emmanuel.

– Diru, respektinda! – respondis Publio kortuŝita.

Sed la imperiestro, ĝentila, interrompis lian parolon:

– Ne, mia kara, ni konversaciu laŭ nia malnova,

iama intimeco. Ni dum momento flanken metu la etiketon.

Kaj vidinte, ke la lipojn de la senatano transkuris rideto de danko pro lia flua afabla parolo, li elvolvis plu la aferon, kiu lin okupis:

– Vokite al Romo por la plej alta posteno, mi ne

kuraĝis malobei la nediskuteblajn ordonojn, kiuj trudis al mi la plenumon de tiu granda tasko, kvankam mi devis lasi mian filon kun la ŝarĝo repacigi la ribelantan Judujon; tian laboron mi rigardos, dum mia tuta vivo, kiel mian plej utilan penon por la vivoforto de la Imperio sur la kampo de la elvolviĝo de ĝiaj gloraj tradicioj.

“Sed la sieĝo de Jerusalemon jam tro longe daŭras, kio serioze kompromitas miajn ekonomiajn projektojn, laŭ la programo, kies efektivigon dum mia regado mi proponis al mi por la rebonigo de niaj financoj.

“Mi kredas, ke mia brava Tito bezonas konsilantaron el civiluloj, krom la militistaj asistantoj, kiuj lin akompanas ĉe la riska entrepreno; tial, mi ekpensis, ke ĝi konsistu nur el la plej intimaj amikoj, konantaj Jerusalemon kaj ties ĉirkaŭaĵon.

“Okaze de miaj unuaj laboroj ĉe la magistrato, mi estis informita pri viaj klopodoj por administra reformo de Judujo, kaj do mi scias, ke vi restadis en Jerusalemon antaŭ pli ol dudek jaroj.

“Estis do mia deziro, ke vi, kun aliaj malmultaj el miaj amikoj, akceptu la taskon pli bone orienti la militan taktikon de mia filo. Tito ja bezonas la politikan kunlaboradon de iu, konanta de la urbo la plej malgrandajn angulojn kaj la popolajn idiomojn, en tia grado, ke estu venkita tiu situacio, kiu fariĝas pli kaj pli premanta.”

Publio dum momento ekpensis pri sia filino, kiu estas malsana, sed, memorante la absolutan aldonitecon de Anna, kiu per siaj zorgoj povus tute bone lin anstataŭi dum kelka tempo, li firme kaj energie respondis:

– Mia estimata imperiestro, via alta parolo estas la parolo de la Imperio. La Imperio ordonas, kaj mi obeas, fierante, ke mi plenumas viajn ordonojn, kaj respondante al la noblaj impulsoj de via konfido.

– Mi tre dankas! – treege kontenta diris Vespaziano, etendante al li la manon. – Ĉio estos pretigita en tia maniero, ke vi, kune kun du aŭ tri el miaj amikoj, forvojaĝu, plej malfrue, post du semajnoj.

Tiel okazis.

Post sia dolora adiaŭo ja la filino, kiu restis zorgata de la sindona servistino, en la Aventina palaco, la senatano enŝipiĝis en luksan galeron, kiu, ekirinte de Ostio, baldaŭ traveturis la maron, direkte al Judujo.

Kun dolora sereneco, la maljuna patricio denove spertis la travivaĵojn de la vojaĝo, kiun li faris dum sia rozokolora juneco, kiam, en kompanio de la edzino kaj la du infanoj, la feliĉo estis por li nekomprenebla. La eta figuro de Marko, lia malaperinta filo, ja kvazaŭ remontriĝis antaŭ liaj okuloj, envolvita en la lumo de ia brila, ĉarma vizio.

Unu tagon, en Kapernaŭm, instigita de la kalumniaj vortoj de Sulpicio Tarkvinio, li dubis la honoron de sia edzino, kaj poste, kredis, ke la forkapto de la infano rezultis el ŝia malfideleco; sed nun Livia estas absolvita pri ĉiuj siaj kulpoj, en la juĝejo de lia konscienco. Ŝiaj hejmaj sinoferoj kaj ŝia heroa morto en la Cirko estis la plej alta pruvo pri la plej granda pureco de ŝia koro. Dum tiuj momentoj de meditado, ŝajnis, kvazaŭ li revenis al la pasinteco, plena de akraj suferoj; li tamen implikiĝis en la peza ombro de la mistero penante relegi la paĝojn de tiu dolora ĉapitro de sia ekzistado.

En kiajn nesondeblajn, nekonatajn abismojn estis kondukita la infano, destinita por ĉiamigi lian nobelan praularon? Ŝajnis, ke liaj patraj emocioj denove ekboldas post tiom da jaroj kaj da familiaj suferoj.

Kvankam en lia animo ŝvebis la plej ĉagrenaj duboj, tamen la senatano, kun sia rigida morala strukturo, preferis kredi, ke Marko Lentulus estas murdita de ordinaraj maliculoj, sin donantaj al rabado kaj terurado, kaj tial jam neniam bezonos liajn patrajn zorgojn.

Tion li volis kredi, sed tiu vojaĝo aspektis al li, kvazaŭ ia elfosado de liaj plej karaj kaj korŝiraj

rememoroj.

Ĉe vesperiĝo, en la milda lumo de la krepusko super Mediteraneo, ŝajnis al li, ke li ankoraŭ vidas Livian lulanta la infanon aŭ parolanta al lia koro per amaj, karesaj vortoj, kaj ankaŭ Komenion, la fidindan serviston, inter la subuloj kaj sklavoj.

Kune kun tri aliaj civilaj konsilantoj, li facile atingis sian celon; tiam, tiu malgranda rondo el intimuloj de la imperiestro tuj metis siajn servojn al la dispoŝo de Tito, kiu afable akceptis kaj plensukcese praktikis iliajn opiniojn, venintajn de granda sperto pri la regiono kaj ties moroj.

La filo de la imperiestro estis grandanima kaj lojala por ĉiuj siaj samlandanoj, kiuj lin konsideris bonfaranto kaj amiko; sed kontraŭ siaj malamikoj Tito estis neesprimeble kruela.

Ĉirkaŭ lia arda, sentima figuro etendiĝis multenombraj legioj da soldatoj, kiuj furioze bataladis.

La sieĝo de Jerusalemo, finiĝinta en la jaro 70, estis unu el la plej impresaj en la historio de la homaro.

La urbo estis sieĝita ĝuste tiam, kiam grandegaj amasoj da pilgrimantoj, venintaj el ĉiuj punktoj de la provinco, estis kolektiĝintaj apud la fama Templo, por la festo de la macoj. De tio rezultis la supermezura nombro da viktimoj kaj la tre akraj luktoj dum la memorinda rezistado.

Da mortintoj en la teruraj bataloj estis pli ol unu miliono, kaj la Romanoj faris militkaptitoj preskaŭ cent mil virojn, el kiuj, post elekto de tiuj servokapablaj, dek unu mil estis ekstermitaj de la venkintaj legioj, ĉe korŝiraj sangelverŝado kaj sovaĝaĝoj de la Romaj soldatoj.

La maljuna senatano sentis sin dispremita ĉe tiu naŭza buĉado, sed estis lia devo liberigi sian ligitan parolon, kaj plej brave lin sin donis al la plenumado de sia mandato.

Liaj opinioj kaj scioj ofte estis sukcese uzitaj, kaj tial li fariĝis intima konsilanto de la filo de la imperiestro.

Ĉiutage, kune kun amiko, la senatano Pompilio Krasso, li vizitadis la plej antaŭajn postenojn de la atakantaj fortoj kaj tiam konstatis la bonan efikecon de la nova orientado, kiun sekvis la milita strategio de liaj samlandanoj. La operaciestroj plurajn fojojn admonis ilin sin ne tro riski, sed Publio Lentulus montris neniom da timo kaj, malgraŭ sia granda aĝo, faradis detalajn topografiajn esplorojn de la fama urbo.

Fine, en la antaŭtago de la konkero de Jerusalemo, oni jam batalis preskaŭ korpo kontraŭ korpon en ĉiuj enirpunktoj kaj de ambaŭ flankoj fariĝis en la malamikajn kampojn enpenetroj, ĉe kiuj okazis reciprokaj kruelaĝoj kontraŭ ĉiu, kiu havis la malfeliĉon esti kaptita.

Malgraŭ la zorgaj rimedoj, per kiuj ili estis gardataj, Publio kaj lia amiko, sekve de sia ĉiam montrata kuraĝo, falis en la manojn de kelke da kontraŭuloj, kiuj, rimarkinte iliajn vestojn de altranguloj de la Imperia Kortego, ilin tuj kondukis al unu el la ĉefoj de la fuzioza rezistado, en domo servanta kiel kazino, proksime de la Turo Antonia.

Observante la scenojn de sangelverŝado kaj sovaĝeco de la tumultanta plebo, kiu antaŭ liaj okuloj ekstermadis multenombrajn Romanajn civitanojn, li rememoris la doloran tagon sur Kalvario, kiam la kompatema profeto el Nazaret mortis sur la kruco, ĉe la terura kriegado de la furioziĝinta popolamaso.

Dum li iradis krude pelata, la maljuna senatano konsideris ankaŭ, ke, se tiu estis la momento de lia morto, li do devos heroe morti, kiel lia edzino mem, ofere al siaj principoj, kvankam fundamente diferencas inter si la regno de Jesuo kaj la imperio de Cezaro. La penso lasi Flavian Lentulian sen lia ama zorgado maltrankviligis lian animon; tamen li konsideris, ke lia filino havos, en la mondo, la noblan kaj konstantan sindonon de Anna kaj ankaŭ la materialan subtenon de lia riĉaĵo.

En tiu spiritostato, mirante pri la sinsekvo de la okazaĵoj, li iris longajn stratojn, plenajn de movado, krioj, insultoj kaj sango. Posedita de konsterno, Jerusalem mobilizis siajn lastajn fortojn, por eviti sian tutan disruiniĝon.

Post kelkaj horoj, elĉerpita de laceco kaj soifo, Publio kaj lia amiko estis kondukita en la malhelan kabineton de Juda ĉefo, kiu disdonis la plej malhumanajn ordonojn je turmento kaj morto kontraŭ ĉiuj arestitaj Romanoj, revenĝe al la kruelaĵoj de la malamiko.

Apenaŭ li vidis tiun maljunan Izraelidon kun karakterizaj trajtoj, Publio avide serĉis, per la penso, ian similan figuron en la arkivo de siaj plej profundaj kaj malproksimaj rememoroj; li tamen ne povis tuj identigi tiun homon. Sed la maljuna ĉefo fiksas sur lia sian ruzan rigardon kaj, farante spontanee geston de kontenteco, ekkriis kun flamanta malamo, montriĝanta ĉe ĉiu el liaj vortoj:

– Senatanaj Moŝtoj – li akcente diris kun sarkasmo kaj naŭzo –, mi konas vin jam de multaj jaroj...

Kaj fikse rigardante Publion, li pike emfazis:

– Honoras min precipe la ĉeesto de la fiera senatano Publio Lentulus, iama reprezentanto de Tiberio kaj de la lin sekvintaj imperiestroj en ĉi tiu provinco, persekutata kaj turmentata de la Romaj plagoj. Mi ĝojas, ke la fortoj de la destino ne konsentis, ke mi foriru en la alian vivon, post penplena maljuneco, ne venĝinte neforgeseblan insulton.

Alpaŝinte al la maljuna patricio, kiu forte surprizita lin rigardis, li impertinente demandis:

– Ĉu vi ne rekonas min?

Sed la mieno de la senatano vidigis lian profundan fizikan konsumitecon ĉe tiu kruda provo de lia vivo; vane li rigardis la malfortikan, makiavelan figuron de Andreo de Ĝioras, nun kun alta influo ĉe la laboroj en la fama Templo, pro la riĉeco, kiun li sukcesis atingi.

Konstatinte, ke lin ne povis rekoni la arestito, kies ĉeesto lin pli interesis kaj kiu ĉiujn liajn demandojn respondis per senvorta nea gesto, la maljuna Judo sarkasme klarigis:

– Publio Lentulus, mi estas Andreo de Ĝioras, tiu patro, kiun vi iam insultis per via troa fiera aŭtoritato. Ĉu vi nun memoras min?

La arestito kapjesis.

Sed, vidinte, ke lia trokuraĝa sinteno ne timigas la senatanon, la ĉefo de Jerusalem insistis furioza:

– Kaj kial vi ne humiliĝas en ĉi tiu momento antaŭ mia aŭtoritato? Ĉu vi ne scias, ke mi povas hodiaŭ decidi pri via destino? Kial vi ne petas de mi kompaton?

Publio estis elĉerpita. Li rememoris siajn unuajn tagojn en Jerusalemo kaj la viziton de tiu inteligenta, indignanta terkulturisto. Li penis rememori la ordonojn, kiujn li, kiel politikisto, donis, por ke la filo de tiu Judo revenu al la patra hejmo, sed ne memoris, ĉu li verŝis tiom da galo en tiun nerezignaciantan koron. Pro sia intima spirita humoro li decidis nenion diri al tiu kruela, ekzaltita homo; tamen, ĉe tiu impertinenteco, ne rezignante la malnovajn tradiciojn de fiero kaj vantamo, kiuj lin iam karakterizis, kaj kvazaŭ dezirante montri kuraĝon ĉe tiaj amaraj cirkonstancoj, li fine rebate diris energie:

– Se vi opinias, ke vi ĉi tie plenumas ian sanktan devon, superan ol ĉia aparta kaj malpli digna sento, ne atendu peton pri indulgo pro tio, ke vi faras vian devon.

Incitite de la neatendita respondo, Andreo de Ĝioras kunŝovis la brovojn kaj ekpaŝis tien kaj reen en la vasta kabineto, kvazaŭ cerbumante pri la plej bona rimedo efektiviĝi sian teruran venĝon.

Post kelkaj momentoj da peza silento, kvazaŭ veninte al solvo konsenta kun liaj bestaj projektoj, li per kaverna voĉo vokis unu el la multenombraj gardistoj kaj ordonis:

– Iru rapide kaj, komisie de mi, diru al Italo, ke li estu tie ĉi morgaŭ, frumatene, por plenumi iun mian ordonon.

Kaj dum la sendito eliris, li sin turnis jene al la du kaptitoj:

– La kapitulaco de Jerusalemo tuj okazos, sed mi oferos la lastan guton da sango de mia maljuneco, por ekstermi tiujn vipurojn, vian popolon. Via malbeninda raso venis satiĝi en la elektita urbo, sed mia venĝo falos sur vin, fieraj komisiitoj de la Imperio de la malpieco kaj krimo! Kiam la pordegoj de Jerusalemo malfermiĝos, mi estos jam plenuminta mian nepran intencon!

Li eksilentis, kaj ĉe simpla gesto la du amikoj estis pelitaj en senluman, malseketan karceron, kie ili pasigis teruran nokton en doloraj konjektoj, interŝanĝante amarajn konfidencojn.

En la sekvanta mateno ili estis vokitaj por la ekstrema provo.

Jam aŭdiĝis en la urbo la unuaj bruoj de la venkantaj Romaj trupoj, kiuj sin fordonadis al terurado kaj disrabado kontraŭ la humiligita kaj senarmila popolo. Ĉie virinoj kaj infanoj rapidis amase eliri el la urbo, meze de infera, korŝira kriegado; sed en tiun domegon kun dikaj ŝtonmuroj rifuĝis granda nombro da ĉefoj kaj batalantoj, por la lasta kontraŭstaro.

Publio kaj Pompilio estis kondukitaj en vastan ĉambro, ke kie ili povis aŭdi la kreskantan bruon de la venkanta imperia armeo, post dramaj, sangelverŝaj okazaĵoj kaj dum tiom da momentoj da teruro, rabado kaj lukto; sed tie, en tiu ampleksa, fortigita ĉambro, ilin ĉirkaŭis centoj da armitaj soldatoj kaj kelke da politikaj ĉefoj de la Izraelida rezistado, kiuj ilin rigardis kun fiera malŝato.

Ĉe la venka antaŭeniĝo de la Romanaj legioj, maltrankvileco kaj teruro posedis ĉiujn mienojn; tamen ĉiuj interesiĝis pri la du kaptitoj, gravaj personoj de la Imperio, kvazaŭ tiuj estus la lasta objekto, ĉe kiu malamo kaj venĝo povus satiĝi.

Sed, por iom modifi tiun sendecidan situacion, Andreo de Ĝioras prenis la parolon kaj per stranga, terura voĉo, kiu tondris en la tuta domo, diris:

– Sinjoroj, ni venas al la fino de nia senespera defendo, sed ni havas la konsolon gardi du grandajn ĉefojn

de la malbeninda politiko de rabado de la Roma Imperio! Unu el ili estas Pompilio Krasso, kiu komencis sian karieron de politikisto en ĉi tiu malfeliĉa provinco, kie li malfermis longan periodon da teroro ĉe niaj kompatindaj samlandanoj! La dua, sinjoroj, estas Publio Lentulus, fiera komisiito de Tiberio kaj de la imperiestroj, poste regintaj, en la ĉiutempe humiligata Judujo; tiu, kiu sklavigis niajn ankoraŭ junajn idojn, starigis krimajn procesojn en ĉiuj partoj de la provinco, kaj el sia sinjora loĝejo en Galileo, levis ĝis la apogeo la timegon de niaj persekutataj kaj skurĝataj fratoj! Nu! antaŭ ol la fiaj soldatoj de la imperia disrabado nin kaptos kaj ekstermos, ni plenumu nian decidon!

Ĉiuj ĉeestantoj aŭdis lian parolon, kvazaŭ ĝi estus la superega ordono de iu ĉefo, kiun oni devas blinde obei.

La du senatanoj estis tiam ligitaj per pezaj feraĵoj al la ŝtupoj de torturo, sen ia libereco de la membroj; ilia movokapablo limigis sin je la okuloj silentaj kaj serenaj ĉe la ofero.

– Nia venĝo – rekomencis la malamema Izraelido, klarigante – devas obei la ordon de la aĝoj. Unue, mortos Pompilio Krasso, ĉar li estas la pli maljuna kaj por ke la vantama senatano Publio Lentulus komprenu nian penon nuligi la fortikecon de lia malbeninda Imperio.

Pompilio longe rigardadis sian amikon, kvazaŭ lin angore, mute adiaŭante en la ekstrema momento.

– Nikandro, ĉi tiu tasko koncernas vin – diris Andreo, turnante sin al unu el siaj sampartianoj.

Kaj, donante glavon al la fortika soldato, li aldonis kun profunda sarkasmo:

– Eltiru al li la koron, por ke ĝin vidu lia amiko, kiu por ĉiam gardu en la memoro la hodiaŭan scenon.

La okuloj de la kondamnito ekbrilis de intensa angoro, kaj la vizaĝo palegiĝis, elmontrante la dolorajn emociojn, kiuj posedis lian animon. Tiam li kaj lia samsortulo interŝanĝis neforgeseblan rigadon.

En nemultaj minutoj Publio Lentulus ĉeestis tiun abomena operacion. La blankhara kapo de la ekzekutito antaŭen kliniĝis ĉe la unua glavobato, kaj el lia malgrasa torako estis perforte eltrancita la sanganta, ankoraŭ batanta koro.

Dum tio, la postvivanta senatano jam aŭdis la bruon de liaj venkantaj samlandanoj, kiuj alproksimiĝis, kaj ŝajnis al li, ke oni jam miksbatalas apud la pordoj de tiu tumulto bando da venĝemaj, krimaj homoj. La monstra sceno glaciigis de teruro lian spiriton, ĉiam optimistan kaj kuraĝan, sed ĉe tiu angora travivaĵo li ne perdis tiun fieran, rigidan teniĝon, kiun li al si mem altrudis.

Post la ekzekuto de Pompilio, kio estis plej rapide farita, ĉar ĉiuj alestantoj konsciis pri la terura situacio, ilin atendanta ĉe la venkintoj, Andreo de Ĝioras reparolis:

– Miaj amikoj – li per kaverna voĉo blekis –, al la pli maljuna estas donita la humana puno de la morto; sed ĉi tiun favan patricion, kiu nin aŭdas, ni favoros per amara puno de vivo, en la tombo de liaj frenezaj iluzioj pri vantamo kaj fiero! Publio Lentulus, la iama sendito de la imperiestroj, devos ja vivi, sed sen la okuloj, kiuj klare vidis la vojon de lia senmezura egoismo super niaj grandaj malfeliĉoj! Ni lasos lin vivanta, por ke en la nigreco de sia nokto li penu vidi per la okuloj de la sklavoj, kiujn li piedpremis dum sia vivo.

Interne de la ĉambro pendis peza silento, kvankam estis aŭdataj, venantaj de ekstere, la piedfrapado de la

ĉevaloj kaj la tintado de la armaĵoj, miksitaj kun la timiga bruego de voĉoj, kolerkriantaj ĉe la atako kaj ĉe la furioza rezistado de la lasta reduto.

Sed Andreo de Ĝioras ŝajnis ebria pro la plezuro de sia venĝo kaj, tenante la ekvilibron de spirito ĉe siaj kunuloj, en tiu tragika momento de la destino, energie ekkriis per sia ensorĉa, konvinka parolo:

– Italo, estas devo de viaj manoj la tasko farota en ĉi tiu momento.

El la densa kaj maltrankvila ĉeestantaro elpaŝis viro, laŭaspekte preskaŭ kvardekjara, kiu mirigis la senatanon pro siaj delikataj trajtoj de patricio. Iliaj rigardoj kruciĝis, kaj li kredis, ke li eltrovis en tiu animo ian strangan, nekomprenblan ligitecon kun la lia.

Italo? Ĉu tia nomo ne rememorigis al li ion el la lokoj najbaraj de lia neforgesata Romo? Kial tiu viro, evidente nobelsanga, tie bataladis ĉe la ribelantaj Judoj, venenitaj de malamo? Siaflanke, tiu sklavo, difinita de la superega voĉo de Andreo por la turmento, kvazaŭ inklinis al amo kaj kompato por tiu serena maljunulo, kies manoj kaj piedoj estis alkroĉitaj al la malhonora ŝtupo, kaj laŭŝajne hezitis, ĉu li devas, aŭ ne, plenumi la pereigan, kruelan ordonon de sia ĉefo.

Post kelke da minutoj, ĉe larĝa, malhela pordo aperis Izraelida militisto, portanta sur granda bronza pleto kurban inkandeskan lameton el fero, kies akra pinto kuŝis inter karbardaĵoj.

Interesite rigardante la enigman figuron de Italo, kiu montris la plenan vivoforton de sia matureco, la senatano, en silento, ne povis kaŝi sian vidamon pri lia delikata kaj rekte staranta korpo. Sed Andreo, ĝuante la scenon kaj konstatinte la streĉan atenton de la kondamnito, tiris lin el tiu stato de konjektoj kaj admiro, kaj ironie parolis:

– Nu, senatano, ĉu vi admiras la nobelan figuron de Italo? Eksciu, ke, kiel la patricioj permesas al si la lukson posedi Izraelidajn sklavojn, tiel ankaŭ la mastroj en Judujo ŝatas Romantipajn servistojn. Cetere, mi devas konsideri, ke estas ĉiam danĝere havi en la urbo tian sklavon, kiel ĉi tiu, pro tiu plago nomata patriciaro, hodiaŭ tro multenombra en la tuta provinco; mi tamen sukcesis ĝis nun tenadi ĉi tiun laboriston en la kamparo...

Publio Lentulus ne povus deĉifri la kaŝitan sencon de tiuj ironiaj vortoj kaj cetere li tie ne havis tempon por ia ajn esplorado de tio, kio fariĝis en lia animo. Li rimarkis, ke Andreo eksilentis, ĉar urĝis la efektivigo de la celata tasko, por ke la fatala lameno ne perdu sian blankardecon. Antaŭ multe da mirigitaj, senkonsilaj okuloj, kiuj ne sciis, ĉu ili sin turnos al la harstariga sceno aŭ al la brua penetrado de la soldatoj de Tito, en tiu momento rompantaj la barojn de la lasta reduto, la krulegulo donis al Italo la teruran turmentilon.

– Italo – li energie rekomendis – ĉi tiu minuto estas treege valora... Ni bruligu liajn pupilojn, por enfermi lin vivanta en tombo el eterna ombro.

Sed la kompatinda junulo, emociita kaj ploranta ĉe la turmento, kiun li devas plenumi per siaj propraj manoj, ŝajnis sendecida, hezitanta.

– Sinjoro... – li murmuris per petega tono, ne sukcesante formuli ian kontraŭparolon.

– Kial vi ŝanceliĝas? – tirane ekkriis Andreo, lin interrompante. – Ĉu estas necesa la skurĝo, por ke vi

min obeu?

Tiam Italo prenis la lamennon kaj delikate alproksimiĝis al la kondamnito, kiu montriĝis plene resignaciinta kaj animforta. Antaŭ ol venis la ekstrema momento, iliaj rigardoj renkotis unu la duan per vibroj de reciproka simpatio. Publio Lentulus ankoraŭ fiksas siajn okulojn sur lia figuro, kies plej karakterizaj trajtoj de senduba nobeleco preskaŭ forviŝiĝis ĉe la senkompataj krudaj laboroj; kaj tiel granda estas lia altiro al tiu junulo, kiun li je la lasta fojo rigardis en hela lumo, ke li ja neklarigeble rememoris sian malgrandan Markon, kiu, se ankoraŭ vivanta en tia malfavora medio, probable havus similan aspekton kaj saman aĝon.

La manoj de Italo, tremantaj kaj hezitantaj, alproksimiĝis al la lacekonsumitaj okuloj de la senatano, tiel delikate, ke tio estus prefere dolĉa kareso; sed la blankarda fero, rapide kiel fulmo, bruligis la fierajn, klarajn pupilojn de Publio kaj ilin por ĉiam enigis en mallumon.

Ĉe tiu momento la viktimo aŭdis inferan kriegadon, tondranta en la tuta ĉambro. Neesprimebla doloro disradiis el la brulvundo kaj lin tre akre suferigis. Li jam nenion vidis, krom la densa mallumo envolvanta lian spiriton, sed perceptis, ke la venkintaj fortoj tro malfrue alvenis, por lin liberigi.

Meze en la kapturna kriegado, Andreo de Ĝioras ankoraŭ alproksimiĝis al la kondamnito kaj flustris al li en la orelon:

– Mi povus mortigi vin, fia senatano, sed mi volas, ke vi plu vivu. Mi nun al vi malkaŝos, kiu do estas Italo, tiu, kiu vin fine difektis...

Sed forta glavofrapo de Romana legiano teren faligis senkonscia la maljunan Izraelidon, dum trafa ponardpiko vundis Italon, kiu, posedita de konsterniteco, rulfalis ĉe sia viktimo, kies piedojn li ĉirkaŭprenis en signifoplena maniero, kvazaŭ per lasta adiaŭo.

Amikaj voĉoj tiam envolvis Publion Lentulus, en tiu tumulto atmosfero. Liaj piedoj kaj manoj estis tuj malligitaj, kio redonis al li la leberecon de movoj, dum aliaj legianoj forportis la kadavron de Pompilio Krasso, senigitan je la koro, naŭzan ateston de sangverŝa sovaĝeco.

Post kvietigo de la unuaj tumultoj kaj tenante la plej afliktajn dubojn pri la kovritaj vortoj de sia nepardonema malamiko, Publio Lentulus, antaŭ ol iri per la brakoj de siaj kamaradoj al la ĝenerala komandejo, por tie ricevi la unuan kuracadon, rekomendis, ke oni plej respekte traktu la kadavron de Italo, kuŝanta apud amaso da sangantaj korpoj; ĉe tio diris al li unu el liaj amikoj:

– Senatano, antaŭ ĉio, ne forgesu vian staton, kiu postulas de ni ĉiuj la plej urĝajn zorgojn.

Kaj, kvazaŭ dezirante instigi la vunditon al propramova klarigo pri sia intereso por la mortinto, li delikate akcentis:

– Ĉu tiu ne estis la junulo, kiu vin submetis al la terura turmento?

Ĉe tiu neatendita demando kaj bezonante pravigi sian teniĝon antaŭ la lin aŭdantaj sampatrujanoj, Publio respondis per korŝira tono:

– Vi eraras, miaj amikoj. Tiu viro, kies kadavron mi nun ne vidas, estis nia samlandano, kiun antaŭ longe malliberigis la venĝema furiozeco de potenca sinjoro en Jerusalemo... Atentu liajn nobelajn trajtojn, kaj vi

ja konsentos kun mi!

Kaj dum li foriris, subtenata de siaj amikoj, por ricevi tujan, nepre necesan kuracadon, li kredis, ke per tiuj vortoj li plenumis devon, ĉar misteraj voĉoj parolis al lia koro pri tiu milda rigardo, kiu je la lasta fojo sidis sur liaj okuloj.

Dum pluraj tagoj Jerusalemo kuŝis sub la regado de la disrabado kaj tumulto, starigitaj de la imperiaj soldatoj, avidaj je plezuroj kaj ebriigitaj de la pereiga vino de la triumfo. Ĉiuj ĉefoj de la Izraelida rezistado estis arestitaj, por esti ekzekutitaj en Romo honore al la festoj, kiuj memorigos la venkon. Inter ili troviĝis Andreo de Ĝioras, kiu, resanigita post la ricevitaj vundoj, estis unu el tiuj, kiuj devos malaperi, por la plezuro de la festanta popolo en la ĉefurbo de la Imperio.

Post la ekstermado de dek unu mil vunditoj aŭ invalidaj kaptitoj, buĉitaj de la venkintaj legioj; post spektakloj, kiaj estis la detruo kaj disrabado de la majesta Templo, pri kiu Izrael kredis, ke ĝi vidas tie sian eternan, dian verkon, heredaĵon de ĉiuj generacioj de ĝia multenombra posteularo, revenis la densa amaso da venkitoj kaj venkintoj, ŝargitaj per rabbitaj riĉaĵoj kaj mirindaj trofeoj, por parade montri, en Romo, ĉiujn ornamaĵojn de la venko, meze de tumultaj vibroj kaj triumfokrioj.

Per komforta, glate iranta galero vojaĝis Publio Lentulus, resignaciinta en la densa nokto de sia blindeco kaj ĉirkaŭita de komplezemaj amikoj, kiuj ĉion faris, por malakrigi liajn moralajn suferojn.

Antaŭ ol alveni Romon, li ofte pripensis, kiel la plej bone li rekte parolos al Andreo, por elpremi al tiu la veron kaj kvietigi siajn dubojn pri la identeco de la Romantipa sklavo, kiu por ĉiam forprenis de li la netakseblan vidkapablon. Sed nun li estis blinda kaj, por efektiviĝi tian deziron, li devos fari komplikajn disponojn, petante la helpon de aliaj personoj; tial, li ankoraŭ ne trovis la plej bonan manieron aŭdi la Judon, ne vundante siajn tradiciojn de persona digno, kiun li ĉiam tenadis dum sia vivo de politikisto.

Ankoraŭ sendecida kaj akompanata de multaj politikaj kolegoj, li revenis en la Aventinan palacon, kie li dolore surprizis la koron de sia filino per tiu tragika, ŝiranta novaĵo – sia blindeco.

Anna, kvazaŭ ia frata anĝelo, brava fratino de ĉiuj malfeliĉuloj, sincera sekvantino de Kristanismo, afable atendis sian mastron, ĉe la flanko de Flavia, kiu ekkriis, posedita de nebridebla malespero:

– Mia patro, mia patro, kia malfeliĉo!

Sed la maljuna patricio, kun sia optimismo, konsolis ŝian spiriton, saĝe asertante:

– Filino, ne donu al vi la penon funde konjekti pri la problemoj de la destino. Ĉe ĉiuj okazaĵoj en la vivo ni laŭdu la superegajn decidojn de la Ĉielo; mi esperas, ke vi rekuragiĝos, ĉar nur en la nuna stato mi de hodiaŭ vivos ĉe vi, en ama reciproka konsolado! La destino mem, kontraŭ mia volo, forigis min de la ŝtataj laboroj, por ke mi de nun vivu nur por vi.

Ili tiam varme ĉirkaŭprenis unu la alian, kunfandiĝis per kisoj de sama malfeliĉo, dolĉaj vibroj de du animoj katenitaj al identaj suferoj.

Malgraŭ la necesa ripozo kaj la blindeco, kiu nebligis al li ĉian iniciaton, Publio Lentulus ne perdis la esperon ankoraŭfoje aŭdi sian nepardoneman malamikon, kaj por tio li atendis la tagon, tiun tagon, kies venon arde deziris la Roma popolo, por la grandiozaj festoj de la triumfo.

Estu reliefigite, ke la maljuna senatano, pro sia tute aparta stato, estis tuj kondukita al la urbo; sed la venkinto kaj liaj sennombraj legioj estis enirontaj en Romon laŭ ĉiuj pompaj ceremonioj de la triumfo, konforme al la multaj regularoj de la iama Respubliko.

En la difinita tago, la tuta ĉefurbo – ĉirkaŭe unu kaj duona miliono da homoj – atendis la belegajn festojn honore al la venko.

De la unuaj horoj de la tago komencis kolektiĝi ĉe la pordegoj de la urbo la venkintaj legioj, sen armiloj, vestitaj per delikataj silkaj tunikoj kaj ornamitaj per ĉarmaj laŭrokronoj. Trairinte la pordegojn de la urbo, inter la tondraj aplaŭdoj de la grandegaj popolamasoj, ili ricevis bonegan festenon, preziditan de la imperiestro mem kaj ties filo.

Tuj post la ceremonio en la senata Portiko de Oktavia, Vespaziano kaj Tito sin direktis al la triumfa Pordego. Tie ili faris oferon al la dioj kaj ekprenis la simbolojn de la triumfo dum la pompaj imperiaj festoj. Post tiu ceremonio ekmarŝis la longa irantaro, en kiu ja partoprenis Publio Lentulus; li havis la intuicion, ke li aŭdos la klarigan parolon de la kaptita ĉefo, kies kadavro, post la tiutagaj ekzekutoj, estis ĵetotaj en la akvon de Tibero, laŭ la observataj tradicioj.

Ankaŭ ĉiuj trofeoj de la sangverŝaj bataloj kaj ĉiuj venkitoj, en grandega nombro, vice iris unuj post aliaj, en tiu nepriskribebbla festo.

Ĉe la kapo de la supermezura irantaro estis portata nekalkulebla kvanto da artaĵoj el pura oro, ornamitaj per rubandoj de tranĉaj koloroj; ilin sekvis multekostaj ŝtonoj, ne nur en mirbelaj kronoj, sed ankaŭ sur ŝtofoj, kiuj pro sia diverseco ĉarmis la rigardantojn; ĉiujn tiujn trezorojn portis junaj legianoj, vestitaj per tunikoj kun graciaj oritaj ornamaĵoj.

Tuj post la prezento de la trezoroj, konkeritaj de la venkinto, venis centoj da statuoj de la dioj, el eburo, oro, aŭ arĝento, de miriga grandeco. (*)

(*) Kompreneble tiuj statuoj ne venis el Jerusalemo; ili estis el la Romaj sanktejoj. – La Trad.

Sekvante la diojn, iris armeo da plej diversaj bestoj, el kiuj distingiĝis multenombraj dromedaroj kaj elefantoj, kovritaj per frapante belaj gemoj.

Akompanis la bestojn la densa, morale frakasita amaso de la ordinara militkaptitoj, montrantaj siajn malgajajn rigardojn kaj mizeron, kaj penantaj kaŝi antaŭ la senkompata, malrespektema popolo la pezajn katenojn, kiuj ligis iliajn manojn.

Post tiuj ĉagrenitaj kaptitoj preterpasis, sur la ŝultroj de multenombraj soldatoj, tre lerte faritaj figuroj de la venkitaj kaj humiligitaj urboj, similaj al la nuntempaj alegoriaj veturiloj de la karnavalaj festoj. Vidiĝis reprodukaĵoj de ĉiuj detruitaj kaj disrabitaj urboj, de sukcesintaj bataloj, kaj eĉ la disruinigo de la kampoj, la renversiĝo de remparoj kaj la forkonsumantaj brulegoj.

Post tiuj figuroj, la riĉegaj militakiraĵoj el la venkitaj popoloj kaj konkeritaj urboj, precipe el Jerusalemo, venis tre zorge portataj de la legianoj. Inter la frenezaj, senrespektaj aplaŭdoj de la popolo, ĉie dense staranta, preterpasis statuoj, reprezentantaj Abrahamon kaj Saran, kaj ĉiujn nobelsangajn anojn de la familio de David; sensenkve iris ankaŭ ĉiuj sanktaj objektoj de la fama Templo de Jerusalemo, kiel la Tablo de la Panoj de la Propono, farita el masiva oro, la trumpetoj de la Jubileo, la ora kandelingo kun

sep brakoj, la religiaj ornamaĵoj de alta propra indico, la sanktaj vualoj de la Templo kaj, fine, la Leĝo de la Judoj, post ĉiuj materialaj militakiraĵoj, forrabitaj de la venkintaj fortoj. Ĉiuj objektoj iris sur altpezaj, riĉe ornamintaj portiloj, sur la ŝultroj de la Romanaj legianoj, laŭre kronitaj.

Post la Juda Leĝo iris Simon, la malfeliĉa superega ĉefo de la rezistado de Jerusalemo, akompanata de siaj tri plej gravaj helpantoj, inkluzive de Andreo de Ĝioras. Ĉiuj tiuj ĉefoj de la longa, persista rezistado surhavis nigrajn vestojn kaj solene paŝis al la ekzekuto, post sia elmontriĝo en ĉiuj festoj memorigaj de la triumfo.

Sekvis la belegaj, imponaj ĉaroj de la venkintoj. Post la rava preterpasado de Vespaziano, jen Tito, ebria de sia venko, en ia oceano da purpuro, silko kaj cinabroruĝo, simbolante Jupiteron mem.

Meze en la honorsekvantaro iris ankaŭ la blinda kaj malvigliginta senatano, jam ne pro la plezuro de la honoroj, sed pro la sekreta deziro aŭdi Andreon, antaŭ la tragika momento, kiam ties korpo ekbalanciĝos sur la ŝlima akvo de Tiberio post la ekzekuto, inter la tondraj aplaŭdoj de la popolo.

Post la imperiaj ĉaroj de la venkintoj kaj ties plej intimaj amikoj iris la tuta armeo, kantante la venkohimnojn, dum ĉiuj stratoj kaj placoj, forumoj kaj portikoj, tersasoj kaj fenestroj, pliniĝis per nekalkuleblaj vidamaj homamasoj.

La irantaro solene moviĝis ekde la Triumfa Pordego ĝis Kapitolio. Multe da horoj estis uzitaj en la irado tra la torda vojo, ĉar la festo estis plenumata en tia maniero, ke ĝi portu sian brilon al la plej aristokrataj anguloj de la kvartaloj de la Roma patriciaro.

Ĉe unu momento, antaŭ ol supreniri la monteton, tiu tuta amaso haltis kaj la maltrankvilaj okuloj de ĉiuj sin turnis al Simon kaj liaj amikoj, liaj ĉefaj helpantoj en la rezistado de la fama urbo.

Kvankam blinda, sed kutimiĝinte al la tradiciaj normoj de tiuj memorigaj solenoj, Publio Lentulus komprenis, ke venis la ekstrema momento.

Pro la tre aparta stato de la senatano kaj opiniante, ke la aŭtoritato ŝuldas al li respekton, la imperiestro zorgis pri lia situacio ĉe la irantaro, rekomendante al sia filo Domiciano fari ĉiajn disponojn, kiujn Publio petos ĉe tiaj cirkonstancoj.

En tiuj momentoj, inter la fortaj vibroj de la popola ekzaltiteco, Simon estis skurĝata antaŭ la tuta Romo, ebria kaj triumfanta, dum Andreo de Ĝioras kaj liaj du amikoj estis kondukataj al la Mamertina Malliberejo, kie ili atendis sian ĉefon, post lia skurĝado, por la samtempa ekzekuto; iliaj kadavroj estis trenotaj laŭlonge de la Ĝemonia ŝtuparo (*) kaj, en la ĉeesto de la popolo, ĵetotaj en Tiberon.

(*) Ĝemonia ŝtuparo: ŝtuparo, iranta de Aventino ĝis Tiberio, laŭ kiu oni trenadis la korpojn de la kondamnitaj, tenatajn per hokoj, por ilin ĵeti en la riveron. – La Trad.

Kun premata animo, sed decidinte realigi sian intencon, la senatano vokis la princon, al kies zorgado li estis konfidita, kaj al tiu li esprimis sian deziron private kaj sekrete paroli al unu el la militkaptitoj, pri kio li estis tuj kontentigita.

Domiciano respektive ekprenis lian brakon kaj, kondukinte lin en ĉambro de la teruraspekta malliberejo, ordonis venigi Andreon al izolita kaj sekreta ĉelo, laŭ la deziro de Publio; tuj kiam la kondamnitaj

envenis, por esti eldemandata de la malnova senatano, li atendis, kune kun kelke da gardistoj, en proksima ĉambro, la finiĝon de la konversacio.

Troviĝinte unu fronte al la alia, la du malamikoj ricevis strangan senton de ĝenateco. Publio Lentulus jam ne povis vidi lin, sed, kvankam liaj okuloj perdis ĉian emociopovon, ĉar la helaj, energiaj pupiloj estis por ĉiam bruligitaj, tamen lia rekte staranta figuro ja manifestis la movojn, kiuj regis lian animon.

– Sinjoro Andreo – diris la senatano profunde kortuŝita –, kontraŭante mian kutiman konduton, mi mem okazigis ĉi tiun sekretan renkontiĝon, por forigi miajn dubojn pri viaj aludoj en Jerusalem, en la tago, kiam vi donis viajn kruelajn ordonojn kontraŭ mi. Mi nun ne volas detale pritrakti vian sintenon, sed nur informi vin, en ĉi tiu momento, kiam la Justico de la Imperio tenas en siaj manoj vian destinon, ke mi ĉion eblan faris por al vi redoni la arestitan filon, plenumante devon de humaneco ĉe via petego. Mi bedaŭras, ke miaj tro malfruaj ordonoj ne faris la deziratan efikon, kaj la rezulto estis, ke en via koro bolas tia forta malamo kontraŭ mi. Sed nun mi jam ne ordonas: blindulo, ĉe la doloraj kondiĉoj de sia vivo mem, ne povas trudi sian volon por iaj ajn necesaj klopodoj; mi petas nur vian klarigon pri la identeco de la sklavo, kiu min por ĉiam senigis je la vidado!

Ankaŭ Andreo de Ĝioras, malsana kaj tre grandaĝa, estis konsternita. Kortuŝita de la teniĝo de tiu humiliĝinta, malfeliĉa patro, kaj, en tiuj ekstremaj minutoj de sia vivo, ĵetante retrospektivan rigardon al siaj krimaj agoj, li emociita respondis:

– Senatano Lentulus, la momento de la morto estas malsama ol ĉiuj ceteraj, kiujn la destino difinas al ni sur la supraĵo de ĉi tiu mondo... Eble tial mi sentas, ke mia malamo nun turniĝas en kompaton, nun, kiam mi komprenas vian akran suferon. De tiam, kiam mi estis arestita, mi ekzamenas la erarojn de mia krima vivo... Kvankam mi laboris en la Templo kaj vivis por la obeado al la Leĝo de Moseo, nur nun mi tamen konfesas, ke Dio donas liberecon de agado al ĉiuj Siaj kreitoj, precipe al la pastroj; sed Li tuŝas ilian konsciencon en la momento de la morto, kiam nenio pli restas, ol la sinprezentado de la fiaskinta animo antaŭ tribunalo, kiun trompi per mensogoj aŭ korupti neniu povas! Mi sentas, ke estas jam tro malfrue por iri returne la vojon, ke ni povus korekti niajn erarojn; tamen ia nova sento instigas min tie ĉi paroli al vi kun la sincereco de la koro, kiu, forte skurĝata de la Dia juĝo, jam neniun povas trompi.

“Antaŭ preskaŭ kvardek jaroj, via fiera severeco decidis la areston de mia sola filo kaj lin senkomplete pelis en la galerojn; vian indulgon de politikisto por mia senprotekta spirito mi vane petegis... Sed el la galeroj mia malfeliĉa Saul estis sendita Romon, kie li estis malhonore vendita kiel sklavo al la senatano Flaminio Severus...”

Ĉe tiu momento, la blindulo, kiu atente kaj treege emociita aŭskultis, rekoninte, per tiu raporto, tiun, kiu turmentis lian filinon, interrompis la Judon, por demandi:

– Flaminio Severus?

– Jes; kiel vi, li estis senatano de la Imperio.

Profunde emociita pro la interligiteco de la doloraj

faktoj, okazintaj al lia familio, kun la iama emancipito, sed bezonante ĉiujn siajn moralajn fortojn por sin regi, la senatano subpremis sian doloron kaj sin tenis plu en silento, dum la kondamnito daŭrigis:

– Malgraŭ ĉio, Saul estis feliĉa... Li ricevis la liberecon, riĉiĝis kaj de tempo al tempo revenadis Jerusalemon, kie li helpis min prosperi. Sed mi devas sciigi vin, ke, malgraŭ la teksto de la Leĝo, kiun mi ofte predikadis kaj kiu ordonas al ni deziri al la proksimulo tion, kion ni deziras al ni mem, mi ne krucigis la brakojn ĉe via krima arbitro kaj ĵuris venĝon, kostu, kiom ĝi kostos; tial, en kvieta nokto, mi forrabis vian malgrandan Markon de via loĝejo en Kapernaum, kun la kunkulpeco de unu el viaj servistinoj: tiun mi poste devis veneni, por ke ŝi eble ne senvualigu la sekreton kaj ne baru mian nigran intencon, kiam via patra maltrakvileco proponis, en Jerusalem, premion de mil sestercoj al tiu, kiu informos vin pri la loko, kie troviĝas la knabeto... Vi certe memoras la servistinon Semele, kiu subite mortis en via domo...

Dum Andreo de Ĝioras elvolvis sian bedaŭrindan konfesion, kiu tuŝis la plej profundajn fibrojn de la senatano, ĉar ĉiu vorto estis ia stileto, kiu ŝiris lian koron, Publio Lentulus tro malfrue eksciis ĉiujn faktojn kaj rememoris la akrajn turmentojn de Livia, kalumniita edzino kaj sindona patrino.

Sed, impresita de la prema silento, Andreo parolis plu:

– Nu, senatano; obeante miajn riproĉindajn sentojn, mi forrabis vian infanon, kiu humiligita kreskis sub plej krudaj terkulturaj laboroj... Instigita de la satana plezuro humiligi malamikan Romanon, mi ruinigis lian intelekton, faciligis al li sin doni al plej abomenaj malvirtoj, ĝis mi atingis la apogeon de mia venĝo, nome nian neatenditan rekontiĝon! Sed nun mi staras fronte al la morto kaj vidas nin ambaŭ nur kiel malfeliĉajn patrojn. Mi ja scias, ke mi baldaŭ prezentos min antaŭ la tribunalo de la plej honesta Juĝisto, kaj, se tio estus al vi ebla, mi dezirus, ke vi havigu al mi iom da paco per via pardono!

Aŭdinte tiun amaran, korŝiran malkaŝon, la maljuna senatano de la Imperio ne sukcesus klarigi sian profundan doloron. Aŭskultante Andreon, li sentis impulsojn demandi pri sia filo kiel infano, pri ties tendencoj, pri ties aspiroj de junulo; li deziris tute sciigi pri ties laboroj kaj preferoj, sed ĉiu vorto de tiu maldolĉa konfeso estis puŝo de ponardo kontraŭ liajn plej noblajn sentojn. Kvazaŭ muta statuo de la malfeliĉo, li ankoraŭ aŭdis la kaptiton ripeti, preskaŭ plorante, sian peton, kiu tiris lin el lia turmenta vagado:

– Senatano – li insistis, malgaje petegante –, pardonu min! Mi volas kompreni la spiriton de mia Leĝo, malgraŭ la lasta momento! Pardonu mian krimon kaj havigu al mi forton, por ke mi prezentu min antaŭ la lumo de Dio!

Dum Publio aŭdadis lian petegantan voĉon, larmo de neesprimebla doloro ruliĝis el liaj malgajaj, senlumaj okuloj.

Ĉu pardonu? Sed, kiel? Ĉu ne li, Publio, estis la ofendito kaj la viktimo dum tuta ekzistado? Strangaj emocioj skuis lian animon, dum sennombraj plorĝemoj estingiĝis en lia sufokita gorgo.

Antaŭ li staris la kruela kontraŭulo, kiun li afliktita serĉadis dum multaj sinsekvaj jaroj da malfeliĉo. Tamen, dum sia interna esplorado, li ankaŭ sciis kompreni siajn proprajn kulpojn, rememorante la ekscesojn de sia vanta fiero. Ankaŭ li tie troviĝis, kvazaŭ ia kadavro moviĝanta, en la densa mallumo. Por kio servis la honoroj kaj la senlima fiero? Ĉiuj liaj esperoj pri feliĉo estis mortintaj; ĉiuj liaj revoj disfumiĝis. Kvankam posedanto de granda riĉaĵo, li tamen ne vivos plu en la mondo, krom por kunporti la nigran ĉerkon de la dispecigitaj iluzioj. Malgraŭ tio, lia koro rifuzis la pardonon en la ekstrema momento. Sed tiam venis al lia menso Jesuo kaj ties doktrino de amo kaj kompatato al la malamikoj. La Nazareta majstro pardonis ĉiujn siajn martirigantojn kaj instruis al siaj disĉiploj, ke la homo pardonu ĝis sepdekoble sep fojoj. Li rememoris ankaŭ, ke, pro Jesuo, lia senmakula edzino mortis en la malhonora

cirko; pro Jesuo, Flaminio unu tagon revenis el la regno de la ombro, por inklinigi lin al pardono kaj kompatato...

La eksteraj bruetoj komprenigis, ke la ekstrema momento de Andreo estas proksima. Simon mem, ŝaceliĝanta kaj sangokovrita sin direktis, post la skurĝado, al la malliberejo, kaj tiel finiĝis lia torturo.

Tiam, forpuŝante ĉiajn tradiciojn pri fiero kaj vantamo, Publio Lentulus sentis, ke en la plejprofundo de lia animo ŝprucas ia fonto da kristalklara akvo. Abundaj larmoj ekfluis sur liaj sulkiĝintaj, velkintaj vangoj en la senesprimaj orbitoj, el la mortintaj okuloj; kaj, kvazaŭ dezirante fiksi sur la malamiko la spiritajn okulojn, por montri al tiu sian kompaton, li per firma tono diris:

– Vi estas pardonita...

Tuj reirinte en la apudan ĉambbron kaj atendinte nenian respondon, li komprenis, ke venis la lasta momento de lia malamiko. Post kelkaj minutoj la kadavro de Andreo de Ĝioras estis trenita sur la Ĝemonia ŝtuparo por esti ĵetita en la silentan Tiberon.

La senatano nenion pli perceptis el la restantaj multenombraj ceremonioj en la Templo de Jupitero.

Nun, kiam komencis fali la ombro de la vespero, lumigis la irantaron, laŭ ordono de Tito, nekalkulebla nombro da torĉoj, fiksitaj de la sklavoj ĉe la kvardek elefantoj; sed la senatano, frakasita de siaj moralaj suferoj, revenis per portoseĝo al sia palaco sur la monteto Aventino, kie, pretekstante grandan lacecon, li enfermiĝis en sia privata ĉambro.

Palpante en sia nokto, li premis al la brusto la krucon, kiun lia edzino ricevis de Simeon kaj postlasis al li, kaj ĝin surverŝis per la larmoj de sia malfeliĉo.

En amara, dolora meditado, li tiam povis kompreni, ke Livia vivis por Dio kaj li por Cezaro, kaj tial ili ricevis malsamajn kompensojn sur la vojo de la destino. Kaj dum la jugo de Jesuo estis milda kaj malpeza por lia edzino, lia fiera koro estis katenita al la terura jugo de la mondo kaj dronis en siaj nekvietigeblaj doloroj, sen ia lumo, sen iaj esperoj...

IX - AMARAJ REMEMOROJ

Tuj post la doloraj okazaĵoj en la jaro 70 kaj laŭ la deziro de Flavia, la senatano ekloĝis en sia komforta domo en Pompejo, malproksime de la bruado de la ĉefurbo. Tie li povos sin pli bone allasi al siaj meditoj.

Tien do la maljuna politikisto transportigis sian tutan ampleksan arkivon kaj kunportis la plej karajn kaj gravajn rememorojn en sia vivo.

Du tre kleraj Grekaj emancipitoj estis dungitaj por skribi kaj legi, kaj tiel, en sia neaktiveco, li estis ĉiam plene informita pri la literaturaj kaj politikaj novaĵoj, okazantaj en Romo.

Dum tiuj foraj tempoj, kiam la homo ankoraŭ troviĝis tre malproksime de la altvaloraj bonaĵoj, kiujn portis la elpensado de Gutenberg, la Romanaj manuskriptoj estis maloftaj kaj avide serĉataj de la

intelektaj elitoj; preskaŭ ĉiuj eldonejoj disponis pri ĉirkaŭ cent inteligentaj sklavoj-skribistoj, kiuj faradis pli-malpli mil librojn ĉiujare.

Cetere, Publio kalkulis en Romo je multaj kaj sinceraj amikoj, de kiuj li ricevis en Pompejo sciigojn pri ĉiuj faktoj, fariĝintaj en tiu urbo, kiu forkonsumis liajn plej bonajn fortojn.

Ankaŭ ofte li ricevadis de sindonaj amikoj sciigojn pri Plinio Severus, kaj ĝojis pro la informoj pri ties nun digna konduto, ĉar, pro la meritoj akiritaj en Gallujo, Plinio estis, post la jaro 73, revokita, por servi en Romo; en la ĉefurbo, pro sia, kvankam malfrua, senmakula konduto, li havigis al si respektindan, reliefan pozicion, kaj sekvis la tradicojn de la patra honesteco ĉe la administraj postenoj de la Imperio.

Sed Plinio neniam pli penis revidi sian edzinon, nek tiun, kiun li, kvazaŭ instigita de la destino, devus konsideri kiel sindonan, kareseman patron, kvankam li ja konis la grandan malfeliĉon de siaj familianoj. En sia koro, la Romana eksoficiro ne flanken metis la personon reveni en la rondon de siaj karuloj; tamen li deziris tion fari, kiam li estos en tiaj kondiĉoj, ke li forpelos ĉiajn dubojn pri la granda peno, kiun li al si mem trudis, por sia revirtiĝo. Kvankam li daŭre supreniris, atingante konfidpostenojn dum la administrado de la Flavianoj, li tamen aspiris al pozicio kun pli alta morala reliefo, por ke liaj hejmanoj havu la certecon pri lia spirita reboniĝo.

Tiam kuradis la jaro 78 tra la kvieteco de la ĉarmaj pejzaĝoj de Kampanio. Dum Tibur estis stacio por kuracado kaj revigliga ripozo de la pli riĉaj Romanoj, Pompejo estis la urbo de tiuj pli sanaj kaj feliĉaj. Sur ĝiaj publikaj vojoj estis ĉiupaŝe trovataj la altvaloraj marmorajoj kaj la bongusto de la plej belaj konstruaĵoj, ekzistantaj en la aristokrata ĉefurbo de la Imperio. En ĝiaj luksaj temploj kunvenis brilaj kolektoj da edukitaj, kleraj patricioj, kiuj prenis loĝejon en la ĉarma urbo, plena de kantistoj kaj poetoj, apud Vezuvio, kaj lumigata de mirinda ĉielo, kiun inundis ridanta suno aŭ punktis mildaj steloj.

Nun Publio Lentulus treege ŝatis la simplan kaj konvinkan parolon de Anna, kiu maljuniĝis ĉe Flavia, kvazaŭ bela figuro el malnova eburo. Kiam ili distriĝadis, rememorante sian pasintecon en la fora Judujo, estis rimarkindaj liaj intereso, emocio kaj ĝojo en tiuj momentoj, en kiuj ŝi laŭdis la principojn de Kristanismo.

Dum tiuj triopaj agrablaj konversacioj, tuj post la vespermanĝo, ili pritraktis la personon de la Kristo kaj la belegajn konkludojn el lia doktrino; tiam, pro sia tute aparta stato, la senatano povis pli bone mediti pri la grandaj instruoj de la Evangelio, ankoraŭ fragmenta kaj preskaŭ nekonata, kaj rilatigi la noblajn, sanktajn principojn de Kristanismo al la persono de ĝia dia fondinto.

Multe da horoj, en la lumo de la steloj kaj karesataj de la vespera venteto, kiu estis kvazaŭ delikata blovo de ĉielaj inspiroj, tie restadis, sur la vasta teraso, tiuj tri homoj, sur kies vizaĝoj estis stampitaj iliaj spertoj.

Kelkafoje Flavia ludis per sia harpo melodiojn, kiuj ŝajnis ĝemoj de doloro kaj resopiro, kaj kiuj penetris en la patran koron, enabismiĝintan en siaj maldolĉaj rememoroj. La muziko de la blinduloj estas ja pli rafinita, pli pura, ĉar per ĝi parolas la plejprofundo de la animo, sen distriĝo de la emocioj tra la sentumoj.

Unu vesperon, laŭ sia multjara kutimo, jen tiuj tri homoj sur la ampleksa teraso de sia vilao en Pompejo, meze de siaj dolĉaj rememoroj.

Jam de pli ol sep jaroj preskaŭ ĉiuj iliaj konversacioj temis pri la Mesio kaj la pureco de lia superbela doktrino; tamen estis observata la necesa diskreteco, ĉar la adeptoj de Kristanismo ankoraŭ estis persekutataj, kvankam malpli kruele. Kia ajn ilia temo, tio ja estis ĉiam konversacioj de malsanaj kaj grandaĝaj personoj, kaj do ne vekis la intereson de la pli junaj kaj feliĉaj amikoj.

Post kelkaj rememorigoj kaj komentarioj de Anna pri la korprema posttagmezo sur Kalvario, la maljuna senatano asertis, konvinkita:

– Sincere parolante, mi havas la certecon, ke Jesuo por ĉiam estos, en la mondo, la plej alta simbolo de konsolo kaj morala forteco por ĉiuj suferantaj, por ĉiuj malgajaj homoj!

“De la unuaj tagoj de mia fizika blindeco, mi penadas kompreni lian grandecon, kaj tamen mi ne sukcesas kapti la tutan amplekson de lia supereco kaj de liaj instruoj.

“Mi memoras, kvazaŭ ĝi estus hieraŭa fakto, la ĉarman krepuskon, kiam mi vidis lin je la unua fojo, sur la bordo de Tiberiado...”

– Ankaŭ mi – diris Anna – ne povas forgesi tiujn belajn posttagmezojn, kiam ni, servistoj kaj suferantoj en Kapernaŭm, kolektiĝis sur la bordo de la granda lago, atendente la ravan plezuron de liaj paroloj.

Kaj, kvazaŭ ŝi rigardis per la okuloj de la imago la preterpasadon de siaj plej karaj rememoroj, la maljuna servistino daŭrigis:

– La Majstro amis la kompanion de Simon kaj de la filoj de Zebedeo, kaj preskaŭ ĉiam per unu el iliaj ŝipetoj li, kompatema, venis aŭskulti niajn petojn...

– Min plej mirigas – diris Publio Lentulus sub forta impreso – tio, ke Jesuo, kiom oni sciis, ne estis ia leĝisto aŭ pastro, kursinta iun homan lernejon; tamen lia parolo estis penetrita de ia dia graco. Lia serena, neesprimebla rigardo enprofundiĝis en ĉies animon, kaj lia dolĉa rideto vidigis la kompatemon de iu, kiu, plene posedante la veron, sciis kompreni kaj pardoni la homajn erarojn. Liaj instruoj, pri kiu mi ĉiutage meditadis, dum la ĵus pasintaj jaroj, estas novaj kaj revoluciaj, ĉar ili renversas ĉiujn antaŭjuĝojn pri raso kaj familio, kaj do ligas inter si la animojn per grada spirita ĉirkaŭpreno de frateco kaj toleremo. La homa filozofio neniam diris al ni, ke la afliktitaj kaj la pacamaj estas tiuj feliĉaj en la ĉielo; tamen laŭ liaj renovigaj lecionoj ni modifas la koncepton pri virto: en la okuloj de la suverena kaj kompatema Dio, sidanta en la Ĉielo, la virto troviĝas ne ĉe la plej riĉa kaj potenca homo en la mondo, sed ĉe la plej justa kaj pura, kvankam malaltklasa kaj malriĉa.

“Lia parolo, plena de kompatato kaj mildeco, dissemis instruojn, kiujn nur nun mi povas kompreni, en la densa, malgaja ombro de miaj suferoj...”

– Mia patro – demandis Flavia Lentulia tre interesita pri la konversacio –, ĉu vi vidis la profeton multe da fojoj?

– Ne, filino. Antaŭ la nigra tago de lia malhonora morto sur la kruco, mi vidis lin nur unu fojon, kiam vi estis infano kaj malsana. Tio tamen sufiĉis, ĉar mi tuj ricevis el liaj senkomparaj paroloj plej altajn lecionojn por la tuta vivo. Nur hodiaŭ mi komprenas liajn mildajn admonojn kaj venis al la konkludo, ke mia ekzistado estas ja perdita oportuno! Vere, jam en tiu tempo, lia profunda parolo diris al mi, ke, en tiu minuto de nia renkontiĝo, mi staras antaŭ la mirinda favora okazo, kiu decidus mian tutan ekzistadon, kaj,

kun sia eksterordinara bonvolemo, li diris ankaŭ, ke mi povos profiti tiun okazon tiam aŭ post jarmiloj; mi tamen ne kapablis kompreni la simbolan sencon de liaj paroloj...

– Ĉiuj admonoj de Jesuo sin bazis sur la pura, konsola vero – diris Anna, nun vivante en plena intimeco kun siaj mastro kaj mastrino.

– Jes – diris Publio Lentulus, absorbita de siaj rememoroj –; mia persona observado pravigas min tute same kredi.

“Se mi aŭdus en tiu tago la admonon de Jesuo, mi eble evitus pli ol duonon de la amaraj provoj, kiujn la Tero destinis por mi... Se mi penus kompreni lian lecionon pri amo kaj humileco, mi persone estus irinta al Andreo de Gioras, kaj riparus la malbonon, kiun mi faris al li per la aresto de lia senkonsciencia filo; tiel mi montrus al li mian individuan intereson, ne konfidante nur oficistojn, kiuj havis nenian prirespondecon... Gvidate de tiu intereso, mi facile trovus Saulon, ĉar al Flaminio Severus, en Romo, mi konfidencus tiun mian deziron je kompenso, kaj mi do evitus la doloran tragedion en mia vivo de patro.

“Se mi sufiĉe komprenus lian kariton, kia estis la resanigo de mia filino, mi pli bone konus la spiritan trezoron, kaŝitan en la koro de Livia; mi vibrus kun ŝia spirito en la sama fido, aŭ falus kune kun ŝi sur la abomenan arenon de la Cirko, kio estus dolĉa kompare kun la malrapide konsumantaj turmentoj de mia destino; mi estus malpli vantama kaj pli humana, se mi estus precize kompreninta lian lecionon pri frateco...”

– Mia patro – diris la filino, penante malpliakrigi la vundojn de lia koro –, se Jesuo estas la saĝo kaj la vero mem, li do ja komprenis la motivojn de via konduto, ĉar li sciis, ke vi estas devigita de la cirkonstancoj obei tiun aŭ alian principon en via vivo.

– Mia filino – responde konsideris Publio –, el mia meditado dum la ĵus pasintaj jaroj, mi estas konvinkita, ke mi venis al la plej sendubaj konkludoj pri la amaraj problemoj de la doloro kaj de la destino...

“Hodiaŭ mi kredas, per la propra sperto, kiun la suferigaj laboroj en la mondo havigis al mi, ke ni mem kunhelpas por pliseverigi aŭ dolĉigi la krudecon de la spirita situacio ĉe la taskoj en ĉi tiu vivo. Konsentante nun la ekziston de iu Ĉiopova Dio, fonto de la tuta favorkoreco kaj de la tuta amo, mi kredas, ke Lia Leĝo estas la leĝo de la plej granda bono al ĉiuj kreitoj. Tiu leĝo de solidareco kaj amo devas regi ĉiujn estaĵojn, kaj, laŭ ĝiaj artikoloj, la feliĉo estas la determinismo de la Ĉielo por ĉiuj animoj. Ĉiufoje, kiam ni falas sur la vojon, favorante aŭ farante la malbonon, ni, per nia relativa libereco, nekonvene intervenas en la Leĝo de Dio, kaj faras do novan ŝuldon, kiun ni pagas elportante la pezon de la ĉagrenoj...”

“Ne parolante pri miaj personaj agoj, kiuj faris pli akraj miajn kruelajn dolorojn, kaj rigardante Jesuon kiel peranton inter ni kaj Tiu, kiun lia profunda parolo nomadis Patro Nia, mi hodiaŭ longe pensas pri tio, ĉu mi ne eraris, kiam vi estis infano, movante lian favorkorecon per mia petego de patro, por ke vi ĝis hodiaŭ vivu en ĉi tiu mondo, por nia amo en la familia rondo!”

Flavia Lentulia kaj Anna, kiuj jam de multaj jaroj akompanadis la manieron de rezonado de la senatano, aŭdis liajn moralajn kokludojn, mirante la facilecon, kun kiu li sciis interakordigi la maldolĉajn lecionojn de sia destino kaj la principojn predikitajn de la Nazareta profeto.

– Vere, mia patro – diris Flavia Lentulia post longasilento –, mi sentas kvazaŭ la Diaj fortoj decidis fortiri min de la mondo, konsiderante la grandajn dolorojn, kiuj atendis min sur la kalvaria vojo de mia malfeliĉa destino...

– Jes – aldonis la senatano, interrompante ŝin –; mi ĝojas, ke vi komprenis. La vivo kaj la suferado instruas nin pli klare kompreni la planon de la Diaj decidoj. Antikvaj inicitoj en la misterajn religiojn de Egiptujo kaj Hindujo kredas, ke ni plurajn fojojn revenas sur la Teron, en aliaj korpoj!

Ĉe tiu momento la maljuna patricio faris paŭzon.

Li tiam rememoris siajn iamajn sonĝojn, dum kiuj, vidante sin kiel Publio Lentulus Sura, en vestoj de konsulo en la epoko de katilino, li blindigis per blankarda fero siajn opoziciantojn.

En lian menson enfluis ia torento da superbelaĵ, nekonataj konkludoj, kvazaŭ renovigaj inspiroj de la Dia Saĝo.

Sed, post kelkaj momentoj, kvazaŭ la horloĝo de la imago estus haltinta nemultajn minutojn, por ke la koro povu aŭskulti la galopan preterpasadon de la rememoroj en la dezerto de lia subjektiva mondo, li konsolita murmuris, tro malfrue konante la planon de sia amara destino:

– Hodiaŭ mi kredas, mia filino, ke la saĝa ĉiela potenco ja decidis vian morton, kiam vi estis ankoraŭ infano, por ke, liberigita el via karcero, vi pli efike prepariĝu por la rezignacio, la animforteco kaj la suferoj; sed tiun decidon mi eble antaŭhaltigis per mia silenta patra petego, kiun la Mesio el Nazaret rimarkis en la interno de mia fiera, malfeliĉa koro. Vi certe renaskiĝus iam poste kaj trovus la samajn situaciojn kaj la samajn malamikojn, sed vi havus pli fortikan organismon, por elporti la krudajn batojn de la surtera ekzistado.

“Ni do hodiaŭ rekonas, ke ekzistas ia superega kaj kompatema leĝo, kiun ni devas obei, ne enmiksante nin en ĝian mekanismon, kies pecoj estas favorkoreco kaj saĝo...”

“Mi, kiu havis solidan organismon kaj fortan spiritan konstruon, sentas, ke en aliaj vivoj mi malbone kondutis kaj faris abomenajn krimojn.

“Mia nuna ekzistado devis do esti grandega ĉeno da senfinaj ĉagrenoj, sed mi tro malfrue vidas, ke, se mi ekprenus la vojon de bono, mi elaçetus multegon da pekoj, faritaj dum la malluma, krima pasinteco. Nun mi komprenas la lecionon de la Kristo, kiel senmortan instruon pri humaneco kaj amo, pri karito kaj pardono, sekuraj vojoj, kondukantaj al ĉiuj konkeroj de la spirito, for de la malhelaj kampoj de suferado!”

Kaj rememorante sian sonĝon, kiun li iam rakontis al Flaminio, li finis, dirante:

– La kulpelaĉetoj ne estus necesaj en la mondo, por la rafinado de la animo, se ni komprenus la bonon, farante ĝin per agoj, paroloj kaj pensoj. Konsentante, ke mi vere naskiĝis kondamnita al blindeco, en tia tragika maniero, mi tamen eble evitus tiun provon, se mi forlasus mian fieron, por esti humila, bona homo.

“Elmontraĵo de grandanimeco de mi aliigis la humoron de Andreo de Ĝioras kontraŭ mi; sed vere, malgraŭ ĉiuj netakseblaj admonoj el la Superaj Regionoj, mi tenadis plu mian egoismon, mian vantamon kaj mian kriman obstinadon en eraro. Mi do pligrandigis miajn abomenajn ŝuldojn ĉe la Dia Justeco, kaj

ne povas esperi indulgon de la min atendantaj juĝistoj...”

La maljuna Publio Lentulus havis dolorlarmon sur la angulo de la estingiĝintaj okuloj; sed Anna, kiu atente aŭskultis liajn parolojn kaj opiniojn kaj kiu forte ĝojis, konstatante, ke la fiera senatano atingis, sur la kampo de la Evangelio, la plej ĝustajn konkludojn, al kiuj ŝi mem venis dum siaj meditoj de maljunulino, bonkore klarigis, kvazaŭ ŝiaj simplaj kaj firmaj asertoj sonus ĉe la momento oportuna por la konsolo de ĉiuj:

– Senatano, ĉiuj viaj konsideroj estas saĝaj kaj pravaj. Tiun leĝon pri la multaj ekzistadoj, por ke ni lernu vivi per la akraj luktoj en la mondo, mi plene akceptas, ĉar en siaj diaj lecionoj Jesuo asertis, ke “se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio”. Mi tamen opinias, ke, malgraŭ via fizika blindeco kaj viaj suferoj, kiujn ni scias kompreni laŭ ilia tuta premanta intenseco, vi sendube havas la animon plena de kredo kaj espero je la spirita estonteco, ĉar la Kristo certigis al ni ankaŭ, ke Nia Patro ne volas, ke eĉ unu el Liaj ŝafoj pereu!

Publio Lentulus sentis, ke ia neklarigebla forto ŝprucas en lia animo, kvazaŭ nekonata fonto da stranga konsolo, preparanta lin, por ke li digne alfrontu ĉiajn ĉagrenojn.

– Jes – li murmuris –, ĉiam Jesuo, ĉiam Jesuo! Sen li, sen la instruoj de liaj vortoj, kiuj plenigas nin per kuraĝo kaj fido, por ke la animo atingu pacan regnon, mi ja ne scias, kio fariĝus el la homoj, enfermitaj en la karcero de la surteraj turmentoj... Sep jaroj da suferoj, en la solejo de miaj mortintaj okuloj, ŝajnas al mi sep jarcentoj da kruela lernado! Sed nur tiel mi povus kompreni la lecionon de la Krucumito!

Dirinte la vorton “krucumito”, la maljuna patricio reen portis sian penson al Jerusalemo, ĉe la Pasko de la jaro 33. Li rememoris, ke li havis en la manoj la proceson de la Dia Sendito, kaj nur nun li konsideris la grandegan prirespondecon, en kiu li estis implikita en tiu neforgesebla, dolora tago. Post longa paŭzo li ekkriis:

– Terure estas pensi, ke, por tia spirito, kia li estis, ni faris nenian decidan paŝon, kiu lin defendus en la dolora momento de la malhonora krucumo! Al mi, kiu nun vivas nur per amaraj rememoroj, ŝajnas, kvazaŭ li ankoraŭ staras antaŭ miaj okuloj, kun la bedaŭrindaj cikatroj de la martirigo.

“Ĉe li koncentriĝis la tuta superega amo de la Ĉielo, por la elpago de la pekoj sur la Tero, kaj tamen mi vidis neniun, kiu pledus por lia liberigo aŭ efektive klopodus por li!”

– Escepte de unu homo... – subite diris Anna.

– Kiu kuraĝis tiel noble agi? – demandis la maljuna blindulo, mirigita. – Mi ne eksciis, ke iu lin defendis.

– Vi ĝis hodiaŭ ne sciis, ke, aŭdinte niajn petojn, via digna edzino, mia neforgesebla bonfarantino, tuj iris al Poncio Pilato, kiam la nigraspekta homamaso eliris el la Romana provinca kortumo, por interhelpi por la Mesio el Nazaret, maljuste kondamnita de la furioziĝinta popolo. La provincestro akceptis ŝin en sian privatan ĉambron, sed vane la nobla sinjorino petegis de li kompaton kaj indulgon por la Dia Majstro.

– Ĉu do Livia iris ĝis la ekstremo sin turni al Pilato, por pledi por Jesuo? – demandis la senatano interesita kaj perpleksa, rememorante tiun turmentan tagon de sia vivo kaj la kalumniojn de Fulvia kontraŭ lia edzino.

– Jes – respondis la servistino –; pro Jesuo, ŝia nobla koro flanken metis ĉiajn konvenciojn, ne hezitis kontentigi niajn petojn kaj ĉion eblan faris por la Majstron savi de la malhonora morto!

Publio Lentulus tiam sentis grandan malfacilecon por esprimi siajn pensojn; konfuzita meze en siaj amaraj rememoroj, li havis la gorĝon sufokita de emocio kaj la estingiĝintajn okulojn nebuligitaj de larmo... Sed Anna elvolvis ĉiujn detalojn de tiu korporema tago kaj siajn travivitajn emociojn, dum la senatano kaj lia filino aŭdadis ŝin, plorante sur la vojo de la doloro, de la danko, de la resopiro.

Kaj tiel, ĉe la finiĝo de ĉiu tago, sub la hela kaj parfumplena ĉielo de Pompejo, tiuj tri animoj, en la milda, malgaja lumo de la amaraj instruoj de la destino kaj sekvante siajn kortuŝajn rememorojn, pretiĝadis por la konsolaj realaĵoj de la morto.

X - DUM LA LASTAJ MINUTOJ DE POMPEJO

En unu hela mateno de la jaro 79, la tuta Pompejo vekigis meze de festa aktiveco.

La urbo estis akceptinta la viziton de klera kvestoro de la Imperio, kaj, en tiu tago, ĉiuj stratoj estis plenaj de brua gajeco; post nemultaj horoj estis okazontaj en la amfiteatro la brilegaj festoj, per kiuj la registaro deziris soleni tiun fakton meze de la ĝojo de ĉiuj.

Por la maljuna senatano Publio Lentulus tiu vizito havis apartan gravecon, ĉar la alta gasto de Pompejo kunportis, destinitajn al li, alte signifan leteron kaj honorajn respektaĵojn de Tito Flavio Vespaziano, tiama imperiestro, surtroniĝinta post sia patro.

Ankoraŭ pli: akompanis la eminentan kvestoron ankaŭ Plinio Severus, jam en matura aĝo, plene revirtiĝinta kaj nun konsiderante sin rehonoriĝinta ĉe sia edzino kaj ĉe iu, kiun lia koro rigardis kiel patron.

En tiu tago, dum Anna persone direktis la hejmajn laborojn de multenombraj sklavoj kaj servistoj, preparante la akcepton al la vizitanto, Publio kaj lia filino sin reciproke ĉirkaŭprenis, kortuŝitaj de la agrabla surprizo, kiun la destino, kvankam malfrue, destinis por ili. Avizitaj per senditoj de la karavano da altrangaj patricioj, ili elverŝis siajn plej dolĉajn emociojn, ĉe la ridetanta perspektivo akcepti la erarintan filon, tiom da jaroj forestantan de iliaj karesaj amikaj brakoj.

Antaŭ tagmezo, riĉega kolekto da ĉaroj, ornamitaj ĉevaloj kaj radiantaj juveloj sur brilaj vestoj haltis ĉe la pordoj de la kvietaj gracia vilao, kio vekis la admiron kaj vidamon de la najbaroj; kaj tuj poste fariĝis efektiva bolegado de ĉirkaŭprenoj, karesoj, konsolaj kaj ĝentilaj vortoj.

Preskaŭ ĉiuj patricioj, ekskursantaj tra Kampanio, konis la senatanon kaj lian familion, kaj tial la okazaĵo estis agrabla renkontiĝo de koroj.

Publio Lentulus longe ĉirkaŭprenis Plinion, kiel li farus al tre amata filo, veninta de malproksime kaj kies forestado estus treege daŭrinta, kvankam li plej profunde sentis impulsojn de amelverŝado, kiujn lia koro subpremis, por ne vekti la malpravon miron de la ĉeestantoj.

– Mia patro, mia patro! – diris la filo de Flaminio per diskreta tono, apenaŭ perceptebla por la oreloj de Publio, kisante ties maljunan frunton. – Ĉu vi jam pardonis min?

– Ho filo, kiel longe vi malfruis! Mi amas vin kiel ĉiam, kaj la Ĉielo vin benu! – respondis la maljunulo emociita.

Post la dolĉa renkontiĝo de Plinio kun sia edzino, tuj diris la kvestoro meze en la silento de ĉiuj:

– Senatano, estas por mi honoro porti al vi altvaloran donacon de Cezaro, akompanatan de dankletero de la alta administrantaro de la Imperio; tio estas unu el la plej fortaj kaj pravaj motivoj, kial mi troviĝas en Pompejo. Mi komisias nian amikon Plinio Severus por nunmomente doni al vi ĉi tiujn relikvojn, kiuj reprezentas unu el la plej signifoplenaj honoroj de la Imperio al la penoj de unu el ĝiaj sindonaj servantoj!

Publio Lentulus bone sentis la plej profundan emociion de tiu horo. La respekto de la imperiestro, la delikata ĉeesto de la amikoj, la reveno de la bofilo al liaj patraj brakoj, ĉio ĉi naskis en lia koro kapturitan ĝojon.

Tamen liaj okuloj nenion povis vidi. En la sino de sia nokto li aŭdis tiujn noblajn parolojn, kvazaŭ iu ekzilinto el la lumo, kiu, el kiu estus eltiritaj la plej dolĉaj rememoroj.

– Amikoj – li diris, viŝante larmon, kiu elŝteliĝis el liaj estingiĝintaj okuloj –, ĉio ĉi estas la plej granda rekompenco en mia tuta vivo. Nia imperiestro estas tro malavara spirito, ĉar vere mi faris nenion, por meriti la dankon de la patrujo. Mia animo tamen ĝojegas kun vi, miaj samcivitanoj, ĉar nia kolektiĝo en ĉi tiu domo estas simbolo de unueco kaj laboro ĉe la altaj postenoj de la Imperio!

En tiu momento, iu ekprenis liajn ŝrumpintajn manojn kaj ilin levis ĝis siaj malsekaj lipoj, sed en la kavetoj de la sulkoj tiu lasis du varmajn larmojn: per spontanea ekvomo, Plinio Severus ja genuis kaj, kisant liajn manojn, manifestis sian amon kaj dankon, samtempe kiel li donis la imperiestran leteron al la maljuna senatano, kiu jam ne povis ĝin legi.

Tia estis la emocio, posedanta lian animon, ke Publio Lentulus ploradis, dum la ĉeestantoj observis lin per okuloj malsekaj de larmoj.

Tiam, la filo de Flaminio ne povis sin deteni plu kaj, por konfirmi sian spiritan korektiĝon, kortuŝita ekkriis:

– Mia kara patro, ne ploru, ĉar tie ĉi ni ĉiuj troviĝas, por partopreni en via ĝojo! Antaŭ ĉiuj niaj amikoj el Romo, kune kun la honoroj de la Imperio, mi por ĉiam fordonas al vi mian revirtiĝintan koron! Kvankam vi nun estas blinda, mia patro, vi tamen tia ne estas laŭ la spirito, kiu ĉiam penadis dispeli la ombrojn kaj formeti barojn de nia vojo! Vi ĉiam ankoraŭ gvidos miajn, aŭ plibone, niajn paŝojn, per viaj tradicioj de sincereco kaj klopodado, laŭ la severeco de konduto! Vi revenos kun mi al Romo kaj, ĉe via rehonoriĝinta filo, vi denove organizos la Aventinan palacon... Mi tiam estos, por eterne, kiel gardisto de via spirito, vin amante kaj protektante! Mian edzinon mi prenos sub mian zorgon, kaj tago post tago mi plektos por nia triopa rondo kronon da novaj nedifineblaj ĝojoj, per la miraklo de mia senmorta aldoniteco! En nia hejmo, sur Aventino, ekfloros nova ĝojo, ĉar mi plenigos ĉiujn viajn horojn per la granda, sankta amo de iu, kiu, konante la krudajn spertojn de la vivo, nun scias valorigi siajn proprajn trezorojn!

La maljuna senatano, disbatita de la tempo kaj de la plej akraj suferoj, staris kaj karesis la harojn de sia bofilo, ankaŭ blankigitajn de la vintro de la vivo, dum abundaj larmoj, trarompante la muregon de lia

nokto, tuŝis al ĉiuj la koron per nedifinebla premateco. Ankaŭ Flavia Lentulia ploradis, regata de profunda sento de feliĉo post tiom da jaroj da malforta espero! Kelkaj amikoj deziris rompi la doloran gravecon de tiu neatendita sceno, sed la kvestoro mem, kiu estris la karavanon da eminentaj patricioj, estis sin kaŝinta en angulon, kortuŝita ĝis la larmoj.

Komprenante, ke nur li mem povos modifi la aspekton de tiu prema atmosfero, Publio Lentulus rebatis la emociojn, ekkriante:

– Ekstaru, mia filo! Mi faris nenion, ke vi sur la genuoj dankas min! Kial vi parolas al mi en tia maniero?

Ni ja post nemultaj tagoj revenos Romon, ĉar ĉiuj viaj estas ankaŭ miaj deziroj... Ni revenos al nia domo sur Aventino, kie ni kune vivos, por rememori la pasintecon kaj kulti la memoron pri niaj prapatroj!

Post paŭzo, li daŭrigis per optimisma tono:

– Miaj amikoj, mi sentas min kortuŝita, kaj dankas vin ĉiujn, por via ĝentileco kaj amelmontro! Sed, kio fariĝas? Ĉu silentas ĉiuj? Memoru, ke mi vidas vin nur tra la parolo. Kaj la hodiaŭa festo?

La admonoj de la senatano rompis tiun silenton, kaj ĉiuj revenis al la intensa multmoveco de antaŭ kelkaj minutoj. Kun la fluado de la konversacioj miksiĝis la tintado de la pokaloj da vino, laŭ la tiamaj severaj stiloj.

Dum la vizitantoj kolektiĝis sur la vasta triklinio por iom trinki, Plinio Severus kaj lia edzino interŝanĝis karesajn, mildajn konfidencojn, jen pri la projektoj, kiujn ili intencis realigi dum la jaroj, ankoraŭ restantaj al ili en la mondo, jen pri la treniĝantaj amaraj tagoj de la fora pasinteco.

Sed insistaj alvokoj postulis la ĉeeston de la kvestoro kaj de ties akompanantaro sur la loko de la festoj.

La cirko estis preparita laŭ ĉiuj normoj: nenia oportuno estis preterlasita por la elmonro de ĉiuj, eĉ plej malgrandaj detaloj, propraj al la grandaj Romaj festoj.

Dum ĉiuj adiaŭis la senatanon kaj ties filinon, meze de la brilegeco de la monduma feliĉo, Plinio Severus, dolĉe ĉirkaŭpreninte sian edzinon, sin turnis al Publio jene:

– Mia patro, pro la cirkonstancoj mi estas devigita akompani la kvestoron dum la popolaj festoj, sed post nemultaj horoj mi revenos, por kun vi restadi unu monaton, kaj tiam ni priparolos nian reiron al Romo.

– Tre bone, mia filo – respondis la maljuna senatano, vere rekuraĝigita –, akompanu niajn amikojn kaj reprezentu min ĉe la aŭtoritatuloj. Esprimu al ĉiuj mian emocion kaj sinceran dankon.

Denove sola, la senatano sentis, ke tiuj dolĉaj, ĝojaj emocioj eble estas la lastaj en lia vivo. En la kaduka brusto lia koro sentakte batadis, kvazaŭ lin envolvus ia peza nubo da malgajaj pensoj. La reveno de Plinio inter liajn patrajn brakojn estis ja la plej granda ĝojo en lia senespera maljuneco. Nun li sciis, ke lia filino povos kalkuli je sia edzo sur la vojoj de sia tumulta destino kaj ke al li, Publio, restas nur kun rezignacio atendi la morton. Pripensante la amikajn vortojn de la filo de Flaminio kaj ties rememorojn pri la malproksima pasinteco, Publio Lentulus konkludis, ke estas jam tro malfrue, por ke li reiru al Aventino, kaj ke la reveno al Romo certe estus, por lia kulpa spirito, nur la simbolo de la tombo.

Meze en la spektaklo, Plinio Severus, jam en la aŭtuno de la vivo, faradis la planojn pri la estonteco; li

penos elaceti ĉiujn siajn erarojn ĉe siaj amantaj kaj karaj parencoj; li prenos sur sin la direktadon de ĉiuj aferoj de sia laŭkora maljuna patro, kiu estos do liberigita el ĉiaj premaj zorgoj de la materiala vivo.

De tempo al tempo la aplaŭdoj de la popolamaso interrompatis liajn revojn. La plimulto el la loĝantaro de Pompejo tie troviĝis en brua festo kaj ovaciis la venkintojn. Homoj el la tuta ĉirkaŭa regiono, kaj precipe el Herkulano, entuziasme alkuris al la amuzo preferata dum tiu fora tempo. Miksitaj kun la atletoj kaj gladiatoroj troviĝis la muzikistoj, la kantistoj kaj la dancistoj. Ĉie estis susurado de silkaĵoj, ĉarmaj sonoroj de brua gajeco, sub la sonoj de flutoj kaj liutoj.

Sed ĉe unu momento ĉies atento estis turnita al stranga, nekomprenebla fakto. El la supro de Vezuvio leviĝis densa konuso el fumo, fenomeno, kies kaŭzon neniu povis trovi.

La ludoj vigle daŭradis plu, sed nun el la interno de la fumkolono, kiu altiĝis laŭ kapricaj kirlaĵoj, elŝovis sin impresaj flamoj...

Plinio Severus, same kiel ĉiuj ĉeestantoj, ekmiris pro la stranga, neklarigebla fenomeno; kaj post nemultaj minutoj, konfuzo kaj teruro ekkrakis en la amfiteatro.

Ĉe la neatendita konsterniteco de ĉiuj la filo de Flaminio ankoraŭ havis tempon por alproksimiĝi al la kvestoro, tiam ĉirkaŭita de siaj familianoj, loĝantaj en la urbo; tamen la kvestoro parolis optimisme, kvankam li ne tute povis maski sian maltrankvilecon:

– Mia amiko, ni estu trankvila! Per la barbo de Jupitero! Kio do fariĝis el nia kuraĝo, el nia harditeco?

Sed post nemultaj momentoj la tero komencis tremi sub iliaj piedoj, per nekonataj, pereigaj skuoj. Kelkaj kolonoj brue falis kaj multaj statuoj ruliĝis el la tiucele preparitaj niĉoj, ornamitaj per oro kaj juveloj.

Tenante inter la brakoj sian filinon kaj ĉirkaŭita de multe da sinjorinoj, la kvestoro ekkriis, treege maltrankvila:

– Plinio, ni iru al la galeroj, senprokraste!

Sed la Romana oficiro jam ne aŭdis tiun alvokon. Terurite, li rapidis trabsi al si vojon tra la homamaso, kiu deziris, kvazaŭ tuta bloko, forlasi la cirkon, kio kaŭzis piedpremadon de infanoj kaj pli maljunaj personoj.

Post superhoma penado, li sukcesis atingi la straton, sed ĉiuj lokoj estis okupitaj de homoj, samtempe elirantaj konsternite el siaj hejmoj kaj krientaj: “Fajro! Fajro! Fajro!”

Plinio konstatis, ke ĉiuj stratoj estas plenaj de afliktegitaj homoj, de ĉaroj, de teruritaj bestoj. Treege malfacile li transiris ĉiajn barojn, sed Vezuvio nun elĵetis al la ĉielo nepriskribeblan mason da flamoj, kvazaŭ la Tero mem bruligus al si la plej profundajn internaĵojn.

La pluvo da cindro, komence apenaŭ perceptebla, ekfalas, dum la tersupraĵo senĉese tremadis, samtempe kiel bruis surda, neklarigebla muĝado. De tempo al tempo aŭdigis la terura krako de falintaj kolonoj aŭ de konstruaĵoj, detruitaj de la sismaj movoj, dum la fumo el la vulkano iom post iom kaŝis la gajigan sunan helecon.

Envolvita en densa ombro kaj posedita de neesprimebla teruro, Pompejo tiam travivadis siajn lastajn

momentojn, en senespera aflikto...

En la vilao de Lentulus la sklavoj tuj rimarkis la alproksimiĝantan danĝeron. Dum la unuaj momentoj la ĉevaloj strange blekis kaj la maltrankvilaj birdoj forflugis, sendecidaj.

Post la falo de la unuaj kolonoj, kiuj subtenis la konstruaĵon, ĉiuj servistoj de la senatano plej rapide forlasis siajn postenojn, dezirante gardi en alia loko sian propran vivon. Nur Anna restadis ĉe siaj mastroj, kiujn ŝi informis pri la teruraj okazaĵoj en la urbo.

La tri homoj, en prava maltrankvileco, aŭdadis la timigan bruegon de la neforgesebla katastrofo. La vilao mem jam estis parte detruita, kaj la cindro, ĝin invadante tra la aperturoj, kiujn faris la disruiniĝo de la tegmento, komencis sian laboron de grada sufoko. Ĉiuj afliktite atendis la tujan revenon de Plinio, por decidi pri la necesaj paŝoj; sed la maljuna senatano, kies koro ne iluziigis pri tio, kion ĝi preme antaŭsentis, rezignacie ekkriis:

– Anna, alportu la kruceton de Simeon kaj ni diru la preĝon, kiun al vi instruis la disĉiploj de la Mesio! Diras al mi la koro, ke ĉi tio estas la finiĝo de nia restado sur la Tero!

Dum la servistino rapide foriris, por alporti la relikvon de la Samaria maljunulo, riskante sian vivon ĉe la ŝanceliĝantaj muroj, Publio Lentulus aŭdadis la surdan bruon de la disfendita tero kaj la terurajn kriojn de la popolo, miksitajn kun la tondra voĉo de la vulkano, kiu, turniĝinte en grandegan, nepriskribeblan fajrujon, superŝutadis la tutan urbon per bolantaj cindroj kaj lafo. Tiam, la senatano memoris la parolojn de la Kristo, iam, en Galileo, kiam la Majstro diris al li, ke la tuta Roma grandeco estas tre mizera kaj ke en minuto la Imperio povos esti reduktita al iometo da pulvoro. En tiu ekstrema horo, lia koro sentakte batadis; la maljuna servistino estis jam reveninta kaj serena staris sur la genuoj, tenante la memorajn de Simeon kaj de Livia, kaj preĝante per kortuŝanta, profunda voĉo:

“Patro nia, kiu estas en la ĉielo... Via nomo estu sanktigita... Venu Via regno...”

Sed en tiu momento la servistino subite mutiĝis, kaj ŝia korpo estis ĵetita teren de ĵus falintaj ruboj; tiam, ŝi sentis sin spirite helpata de la respektinda Samariano, kiu ŝin tuj forkondukis al la plej altaj spiritaj sferoj: tiel granda estis la pureco de ŝia koro, rafinita de la plej premaj doloroj kaj atestoj en la surtera lernado.

– Anna! Anna! – plorante ekkriis Publio kaj Flavia, kiuj je la unua fojo sentis tian malfeliĉon, kia estas la absoluta izoleco, sen ia lumo, sen ia gvidanto, tute senprotekta.

Sed iu, trarompinte ĉiujn ruinojn, rapide atingis tiun ĉambron kaj, ĉirkaŭprenante Publion kaj ties filinon, anhelante kriis: “Flavia! mia patro! jen mi!”

Plinio fine alvenis, por la lasta momento. Flavia Lentulia lin karese premis inter siaj brakoj, dum la maljuna senatano, duonsufokita, prenis la manojn de sia filo, kaj la tri homoj interligiĝis per dolĉa, lasta ĉirkaŭprenado.

Flavia kaj Plinio deziris paroli, sed densa amaso da cindro enpenetris tra la grandegaj fendoj de la duondetruita vilao...

Ankoraŭ unu ekstremo de la tero, kaj jen la kolonoj, kiuj ĝis tiam staris, falis sur ilin kaj neniigis iliajn

lastajn fortojn: por ĉiam ligitaj unu al la alia, ili tie restadis sub peza amaso da ruboj...

Sed en tiu densa ombro ŝvevis flugantaj subtilaj estuloj, kiuj preĝis aŭ vigle kuraĝigis la malfortiĝintan koron de la mizeruloj kondamnitaj al pereco.

Super la tri korpoj, kuŝantaj sub ruboj, staris la brilradia figuro de Livia, kune kun multenombraj fratoj, kiuj sindone kaj precize kunlaboradis por la plena liberiĝo de la Spiritoj de la mortantoj.

Metante siajn lumajn, purajn manojn sur la estingiĝantan frunton de sia elĉerpita, agonianta edzo, Livia turnis siajn okulojn al la nigriĝinta ĉielo kaj ekpreĝis kun la mildeco de sia fido kaj de siaj senmakulaj sentoj:

– Jesuo, dolĉa, dia Majstro, ĉi tiu dolora momento estas ja simbolo de niaj eraroj kaj krimoj tra mallumaj tempoj, tamen vi, Sinjoro, vi estas la tuta espero, la tuta saĝo kaj la tuta favorkoreco! Benu niajn Spiritojn en ĉi tiu akra, dolora momento! Mildigu la suferojn de la animo ĝemela de la mia, nun konsentante al li la liberiĝon! Kvietigu, grandanima Savinto de la mondo, ĉiujn liajn ŝirantajn dolorojn, liajn frakasantajn suferojn! Havigu ripozon al lia afliktita koro, antaŭ ol li ankoraŭfoje revenos en la malhelan labirinton de la reenkarnejoj sur la planedo de la ekzilo kaj amaraj larmoj... Li jam ne estas, Sinjoro, la iama vantama despoto, sed koro inkлина al bono kaj kompatemo, predikataj de via doktrino de amo kaj savo; sub la pezo de la maldolĉaj, elaĉetantaj provoj, liaj impulsoj rafiniĝis direkte al viaj Vero kaj Vivo!

Dum Livia preĝadis, la senatano, ĉirkaŭtenante siajn jam mortintajn gefilojn, ellasis sian lastan ĝemon, kun peza larmo brilanta sur la mortintaj okuloj...

Multenombraj legioj da spiritaj estuloj dum pluraj tagoj traflugadis la senluman, malgajan ĉielon super Pompejo.

Post longa senkonscieco, Publio Lentulus kaj liaj gefiloj vekigis sur tiu sama loko, sur la griza tombo de la mortinta urbo.

Ankoraŭ en la prema iluzio pri la materia vivo, la senatano vane alvokis iun, ĉu Anna, ĉu iun alian serviston; en lia psika organismo persistis la impresoj pri la materia blindeco, kiu estis la longa turmento de liaj lastaj jaroj en la karna vesto.

Tamen, post la unuaj lamentoj, li aŭdis karesan voĉon, kiu milde diris al li:

– Publio, mia amiko, ne alvoku plu la rimedojn de ĉi tiu planedo, ĉar via tuta povo finiĝis samtempe kiel viaj mortaj restaĵoj, sur la ombra, malgaja supraĵo de la Tero! Petu la helpon de Dio Ĉiopova, kies favorkoreco kaj saĝo estas al ni donataj pro amo al Lia Ŝafido, Jesuo Kristo!

Publio Lentulus ne sukcesis vidi la parolanton, sed li rekonis la voĉon de Flaminio Severus, kaj tiam elverŝis sian koron per torento da preĝoj kaj ardaj larmoj.

Malgraŭ la konstanta zorgado de Livia, jam de kelkaj tagoj lia Spirito troviĝis sub la efiko de teruraj deliroj, ĉe la unuaj momentoj de la vivo en la Spaco, sed li estis ĉiam helpata de Flaminio kaj aliaj sindonemaj amikoj, kiuj lin atendis en la spirita sfero.

Tamen, post tiuj sinceraj petegoj, kiuj fluis el la plejprofundo de lia koro, li sentis, ke lia interna mondo sennubiĝis... Ĉe siaj karaj gefiloj, li reakiris la vidadon kaj, kun larmoj de amo kaj danko, rekonis siajn

karulojn, ĉe la sojlo de la Transmondo.

Tie staris multaj el la personoj, priparolataj en ĉi tiu rakonto, nome Flaminio, Kalpurnia, Agripo, Pompilio Krasso, Emiliano Lucius, kaj multaj aliaj; sed vane la afliktitaj okuloj de la eks-senatano serĉis unu homon en tiu amika kunveno.

Post ĉiuj elmontroj de kareso kaj ĝojo, Flaminio turnis sin al li, intence dirante:

– Vi miras, ke Livia forestas – li diris kun sia indulga, afabla rigardo –, sed vi ne povos vidi ŝin, dum vi ne sukcesos demeti, per la preĝo kaj bonaj deziroj, ĉiujn dolorajn kaj malutilajn impresojn el la Tero. Ŝi ĉiam staras ĉe via koro, sincere, varme preĝante por via revirtiĝo, sed nia grupo ankoraŭ konsistas el Spiritoj tro alkroĉitaj al la planedo; ni atendis la revenon de ĝiaj lastaj anoj, ankoraŭ vivantaj sur la Tero, por povi, per komuna interkonsento, difini novan planon pri la estontaj enkarniĝoj... Jarcentoj da laboro kaj doloro atendas nin sur la vojo de la elaĉetado kaj perfektigado; sed, antaŭ ĉio, ni devas serĉi la necesan forton ĉe Jesuo, fonto de la tuta amo kaj tuta fido, por la altaj verkoj de nia penso!

Publio Lentulus ploradis, tuŝita de strangaj, nedifineblaj emocioj...

– Mia amiko – dolĉe daŭrigis Flaminio –, petu Jesuon, por ni ĉiuj, ke li nin favoru per tiu heleco de iu nova tago!

Publio tiam genuiĝis kaj, en larmoj, koncentris sian koron sur Jesuon per arda, silenta petego... Tie, en la soleco de sia brava, sincera animo, li prezentis al la Ŝafido de Dio sian penton, siajn esperojn pri la estonteco, siajn promesojn pri fido kaj laboro en la venontaj jarcentoj!

Ĉiuj ĉeestantoj akompanis lian preĝon, plorante kaj envolvitaj en mildaj vibroj de nedifinebla konsolo...

Ili tiam vidis, ke ia luma, florkolora vojo strekas la ombran, malgajan ĉielon super Kampanio kaj sur ĝi, kvazaŭ venante el la lumaj ĝardenoj de la Paradizo, aperis, brako en brako, Livia kaj Anna. Tio estis kvazaŭ eĉ tien Jesuo sendis simbolan instruon al tiuj animoj, ankoraŭ katenitaj al la Tero, por montri al ili, ke, en ia ajn pozicio, la enkarniĝinta animo povas aspiri al lia regno de lumo kaj paco, de vivo kaj amo, ĉu en la modesta tuniko de la sklavo, ĉu en la pompaj vestoj de la mastro.

La maljuna patricio rigardadis la radiluman figuron de sia edzino kaj ravita fermis la okulojn, banatajn de larmoj de kortuŝiteco kaj pento; sed baldaŭ du lipoj, kvazaŭ konsistantaj el nebulo, tuŝis lian frunton, simile al delikata kontakto de dia lilio.

Kaj, dum lia ekstazanta koro dronis en la larmoj de ĝojo kaj de danko al Jesuo, tiu tuta grupo, potence pelata de la varmaj preĝoj de tiuj du animoj, elaĉetintaj siajn kulpojn, flugadis, kvazaŭ ia mirinda bando da lumaj papilioj de la Senlimo, al pli altaj sferoj, por necesaj ripozo kaj lernado, antaŭ ol komenci novajn stadiojn de korektiĝo kaj purigaj laboroj.

NOTO DE LA ELDONISTOJ

Forpasinta la 21-an de Julio 1964, en sia 70-a vivjaro, nia karmemora samideano L. C. Porto Carreiro

Neto estis vere eminentulo: Universitata Profesoro, membro de la iama Lingva Komitato kaj poste de la Akademio de Esperanto, iama ĉefdelegito de U.E.A. kaj ĝenerala sekretario de B.E.L.

Prof. G. Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, komunikis kun granda bedaŭro lian malaperon al la akademianoj kaj sendis kondolencajn leterojn al la familio kaj al B.E.L.

El la nekrologia noto aperinta en la oficiala organo de U.E.A., en Oktobro 1964, ni transskribas:

Li estis vaste konata pro siaj modelaj tradukoj, precipe de spiritismaj verkoj, el kiuj sep jam estas eldonitaj. Li postlasis manuskriptojn de 530-paĝa romano kaj vortarego portugala-esperanta”.

Li estis ĝisfundulo kaj verkis plurajn gravajn artikolojn pri Esperanto; li refandis la lernolibrojn “Esperanto sem Mestre”, de F. V. Lorenz, kaj “Curso de Esperanto em 20 lições”, de M. Mendes e C. Fernandes.

En la “Enciklopedio de Esperanto”, eldonita en Budapest en 1933/4, ni legas pri la tiam juna esperantisto:

“Porto Carreiro Neto (portu karejru netu), Luiz da Costa, brazilano, d-ro inĝ., docento kaj asistanto ĉe Politeknika Lernejo de Rio de Janeiro. Ĝenerala Sekretario de B.E.L. kaj vicprez. de B.K.E., vicĉefdelegito de U.E.A.. Poeto kaj prozverkisto, du trad. romanojn en manuskripto. Kunredaktas kompletan P. E. Vortaron.”

Post tiu artikoleto, li vige, brile, konstante laboradis por Esperanto dum pli ol 30 jaroj.

Per siaj modelaj libroj li restos kun ni kaj instruos la lingvon al la estontaj generacioj de esperantistoj; tial ni ne diras, ke ni perdis kunlaboranton: li neniam estos perdita!

Kara leganto, ĉi tiun libron la Brazila Spiritisma Federacio distribuas senpage, en PDF. Mi konvertis ĝin por faciligi ĝian legadon en komputiltelefonoj, tabulkomputiloj kaj elektronikaj librolegiloj kiel Kindle, Kobo, Lev, Sony PRS, ktp. Se vi trovis erarojn, bonvolu sciigi min (librojesperanto@gmail.com).